

# MARKO JELUSIĆ

BRITANNIO

ESPAÑIA  
4388T

GALLIO

HISPÁNIO

ITALIO

MAKEDONIO

# CEZARO

AFRIKO



KOMISIO DE  
LITERATURA  
MONDO BUDAPEST  
1934.

EL LA KROATA KAJ  
GERMANA TRADUKIS: IVO ROTKVIĆ







MIRKO JELUŠIĈ

# CEZARO

(ROMANO)

El la germana kaj kroata :

IVO ROTKVIĈ

*»Jen, tia estis tiu unika viro, kies  
prezento ŝajnas tre facila, sed  
vere estas senlime peniga. La sek-  
reto kuŝas en lia perfekteco.«*

Th. Mommsen, Rom. Hist. III. 467

ELDONO DE LA TRADUKINTO 1934

KOMISIO DE »LITERATURA MONDO«, BUDAPEST

Al ĝesinjoroj

**OLGA kaj KARLO KELLNEK,**  
la plej noblaj homoj, renkontitaj en la  
vivo,

tutkore dediĉas  
**LA TRADUKINTO**

Esper. 1388 I



Y-48749

I. PARTO

***JULIO***





## Infano

»Kajo!«

Silento. Nur insektoj zumetas en la varma tagmeza aero super la riĉkoloraj floroj de l' hejma ĝardeno. Alie ĉio senvoĉa.

»Kajo! Juna sinjoro! La patro vokas! . . .«

La maljuna trakianino ĉirkaŭturnas la sulkan vizagon, palpebrumante per la miopaj okuloj ĉiufranken; ŝi eĉ spirhaltas por pli bone aŭdi. Nenio. Tial, ĝemante, ŝi denove sin turnas kaj revenas tra la portiko en la domon.

»Mi ne povas lin trovi, ho sinjorino«, — aŭdiĝas la malforta, plorema voĉo de la maljunulino. »Certe li ree transsaltis la muron kaj nun vagaĉas kun la stratbuboj. Nu, ili foje lin eĉ mortigos.«

»Mi mem serĉos lin« respondas la plena, alda voĉo de l' patrino. »Bone, bone, Kirissa, iru jam«.

Naztrumpetado, frothruo de la lacaj, tremaj piedoj kaj poste denove silento.

El post mirta arbeto elŝoviĝas malrapide kaj singarde infana kapo: akraj, grizaj okuloj, nun furioze fajrantaj; sub la maldika, delikattrua nazo kunpremiĝas la etkarnaj lipoj. Nun la infano rektiĝis tiom, ke ekvideblas la mallarĝa korpo ĝis la koksoj. La dekstra mano, montrante sperton, lerte eksvingas bas-

tonon trans la muron de l' ĝardeno. Por momento la okuloj postrigardas la turniĝantan bastonon, sed jam denove iĝas malhelaj kaj koleraj.

La maljuna Kirissa ne povis veni en malpli oportuna tempo: ĵus li estis Arhidamo kaj ĝuste volis ruzlogi la *plateanojn* en embuskon. Jes vere, Tukidido tion alie rakontas, sed kial imiti la fuŝaĵon? Tion li ja pli bone plenumos: ĉar li ne povas kuratake konkeri la urbon, li ŝajne retiriĝas kaj kaŝe ekbivakas. La plateanoj kompreneble lin persekutas. Intertempe li kojne sin ŝovas inter ilin kaj la urbon, pereigante eĉ la lastan homon... Meditante li pristudas la batalkampon. Urban remparon prezentas al li la ĝardenmuro. Arbetaĵoj dislarĝiĝas en arbaron, en kiu li ekembuskis kun la elektita taĉmento, kreita de lia senlaca fantazio. Profunde enspirante li elstreĉas la tutan korpon. Ĉu jam ne sonas el malproksime la ovacioj de l' urbanoj, kiuj kredas forliberiĝi de la sieĝo? Ĉu en la urbomuro jam ne malfermiĝas pordo, larĝe faŭkante por...

Aŭdiĝas voĉoj. Kajo eltiriĝas el la revaĵo, en kiun li ĵus denove dronis, li jam estas maldorma kaj nuntempa. Rapide ĉirkaŭrigardante li kaptas la libron sur ŝtonbenko, surventriĝas kaj komencas, ŝajne, diligente legi.

»Ĉu vi havis malagrablaĵojn en la ofico?« — li aŭdas demandi la patrinon.

»En la ofico oni ĉiam havas malagrablaĵojn« — respondas la patro. »Vi ne povas imagi, ho Aŭrelia, kiom da homa krudeco, malnoblo kaj naŭzo evidentiĝas en la bagatelaj procesoj. Pensu do, kiel estos en la *pretorejo*, kiam elviciĝos gravaj aferoj?« La patro eksilentis. Kun videbla intenco li turnas la interparolon al io alia. »Kiam vi vidis Kajon lastafoje?«

»En la biblioteko, kiam li venis por preni la Tukididon.«

»Al mi ŝajnas, ke la junulo tro multe legas. Serioze mi interparolos kun Gnifo. Ĉiun honoron al la klereco, sed se oni estas delikata kiel Kajo, oni devas ion entrepreni por fortigi sian korpon. Cinno rekomendis al mi skermiston; foje mi venigos tiun homon. Nu, mi volus el mia filo fari ne hejmsidulaĉon.«

»Miaopinie tiu zorgo estas superflua,« rimarkigas la patrino kun kaŝita rideto en la voĉo. »Kirissa diris, ke li ree ŝtelkuris al siaj stratamikoj. Jen li! Kajo!«

La infano kaplevas, salte ekstaras kaj atendas. Aŭskultante la konversacion de la gepatroj, li tamen enprofundiĝis en sia plej amata aŭtoro. Por momenteto, jen, la gepatroj rimarkas en la grandaj, ardaĵoj okuloj strangan, fremdan flamon, sed kvazaŭ la kurteno jam falus antaŭ la brilajn stelojn: perdiĝis ilia senlimeco, ili iĝas malprofundaj kaj klaraj.

»Ĉu vi ne aŭdis Kirissan?« riproĉetas la patrino.

Mallonga hezito, poste kapbalanco, duone spiteme, duone konfuzite.

»Do, kial vi ne venis?« Feliĉe, la patrino ne atendas la respondon, sed tuj pludemandas:

»Kion vi ja faras tie ĉi?«

»Mi legis« respondas Kajo eviteme.

Nun alpaŝas la patro kaj jam prenas la libron.

»Tukidido... nu, ĉu vi ankaŭ komprenas, kion vi legas?«

Denove la kapbalanco, sed nun vigle, ĝoje.

»Ree vi kombinis la batalplanojn, ĉu? Ankaŭ korektadis grekajn strategiistojn?«

Embarasa ridetado — la ridetado de l' knabo, kiam oni divenis liajn revojn. Sed la rigardo estas

firma kaj konfidema: Kajo konas la patron, li scias, ke la patro havas komprenon pri lia juna animo.

La sinjoro *edilo* sidigas sur la benko, tenante ankoraŭ ĉiam en la mano la libron. Bonvoleme li demandas:

»Do, kiel vi imagas ĉi tiun aferon? Kiel vi konkerus *Platean*?

Kajo pimeditas. Fikse alrigardante la patron li komencas disvolvi la planon. La edilo aŭskultas, forperdigas lia rideto, lokcedante al atentema mieno. Jam post momenteto ili ambaŭ vive interdiskutas: ne ekzistas rimarko, kiun la knabo ne sciis kontraŭ respondi. Fiere jam brilas la okuloj de l' patro kaj Kajo inspire altenflugas.

Sed ve! La patrino ne partoprenas la konkeron de Platea. Dum Kajo parolis, ŝi, siavice, rigardis kaj observis. Kaj subite en la plej vervan disvolvon de la taktikaj ideoj ŝi enĵetas la neatenditan demandon:

»Ĉu dum la tuta tempo vi estis en la ĝardeno?«

Rapida flankenrigardo. Mensogeto ne utilis.

»Ne... ne« aŭdigas — jam hezite.

»Do, ree vi saltis trans la muron? Ree en la bando de bubaĉoj?«

»Ne bubaĉoj tio estis,« vive sin defendas Kajo.

»Kuzo Kotto estis kune, ankaŭ Scevolo — kaj ĉiuj.«

»Kaj kion vi faris?« nun komencas enketi ankaŭ la patro.

»Ah nenion — ni ludis.« La situacio igas pli kaj pli embarasa.

»Vi ludis! Tiel do! Eh, pro kio tio ĉi?« La dekstra montrofinĝro de la patro jam glitas laŭ la freŝa gratvundo sur la sunbruna vizaĝo de l' knabo.

»Ĝi — de Bibulo.« Ĉiam pli malrapide elfluas vorto post vorto.

»Vi interpugnis?«

Senresponde.

»Vi interpugnis, ĉu? Jes aŭ ne?« En la rigida voĉo tremetas nekaŝata akreco.

La nereakta respondo estas defenda majstraĵo:

»Ĉar mi ne permesas ofendi onklon Mario.«

Malaperas vertikala sulketo el la frunto de l' patro. Glata kaj senmova iĝas lia vizaĝo. Kun akcentata trankvilo li demandas:

»Ĉu Bibulo ofendis onklon Mario?«

»Jes.«

»Kion li diris?«

Kajo hezitas. Tiam li respondas klare kaj mal-longe:

»Tion mi ne povas al vi diri.«

»Kial ne?« La kolersulko reaperas. Sed Kajo estas nekonfuzebla.

»Ĉar vi vizitus lian patron.«

Rapida suprenrigardo, poste nerimarkebla rideto de l' kompreno ĉe la forte kunpremitaj lipoj. Fiere ekruĝas Kajo, kiam la patro diras, kvazaŭ parolante kun plenaĝulo egala al si:

»Jen mia honorvorto, ke mi ne vizitos lian patron. Sed vi devas al mi laŭvere ĉion elrakonti.«

»Nu, Bibulo diris: estas vera feliĉo, ke Sullo forpelis el la urbo tiun pleban alkurinton.«

Silento. Poste:

»Kaj vi?«

»Mi vangofrapis al li kelkajn sonorajn,« respondas Kajo kun bela sincereco. La patrino subite sin turnas kaj ial okupiĝas pri la florbedo.



»Kaj post tio li vin gratvundis?« Mieno de la patro restas terure severa. Tro severa ja por kredigi pri seriozeco de sia esprimo.

»Jes,« malestime kapklinas la knabo. »Tiu malbravulaĉo ĉiam nur gratas. Nu, tiam mi lin batregalis«. Kaŝe li rigardetas supren al la patro. Li ne estas tute certa, ke la lasta vorto ne vekos ĉe la patro malagrablan pensofluon.

Sed la patro estas bona kiel ĉiam.

»Vere, vi meritas punon,« li diras — »sed ĉar vi estis sincera, estu pardonite al vi. Aliafoje ne kuru sur la straton kaj vi ne devos aŭskulti, kion tia maŝagulo babilaĉas.«

Li jam rompas la interparolon: »nun iru en la domon, lavu la manojn kaj transvestu vin.«

»Jes, patro.« Ĝojante, ke li tiel bone elturniĝis, Kajo forrapidas por malaperi.

»Ĉu ankoraŭ ĉiam vi havas zorgon,« — aŭdas Kajo la varman patrinan voĉon — »ke li fariĝos hejmsidulaĉo?«

»Ne,« ĝoje respondas la patro. »Tiu knabo kapablos iam esti brava. Oni devas lin nur bridati. Sed mi kredas, ke pro li mi ĝisvivos grandan ĝojon...«

Kajo ne plu aŭdas. Sed eĉ tio sufiĉas por ŝveligilian bruston kaj ĝermigi firman decidon, ke ĉe la unua okazo li fervore pugnoknedos Bibulon.

## Onklo Mario

Nur la lasta, firma mankapto, minacante forŝiri duonon de la dorshaŭto super la senkarnaj ripoj, kaj tiam la gladiatoro, kontente elstreĉante la gigantan korpon, prenas tukon por viŝi siajn ole-makulajn fingrojn.

Duonkreska, malgrasa junuleto, tute sin levinte de sur la benko, sentas, ke ĉiuj liaj ostoj estas kvazaŭ intermiksitaj pro la krudaj masaĝofrotaj. Svenete kaj duonblinde li diskurris sur la ŝtonplanko kaj palpgestas ĉirkaŭ si.

Glacia akvoŝpruco ekhajlas sur lian nudan korpon redonante la konscion. Jen ankaŭ la dua. Tiam du pezaj manegoj ĵetinte kovrotukon ĉirkaŭ liajn bruston kaj dorson lin ekfrotas.

»Tiel,« diras fine la giganto. »Kaj nun en la kirason! La leciono daŭrigota!«

Rapide surĵetinte la tunikon Kajo kunlaĉas pezajn militistajn botojn, glitas en la ledan brustokirason, surmetas pezan kaskon kun viziero kaj liginte ĝin sub la mentono rapide prenas la kirasitajn skermogantojn. Prete! Nun fine nur la ŝildon kaj glavon — kaj li aliras la jam plene ekipitan instruiston, kiu atendas lin senzorge mallevinte la senpintan ekzercoglavon.

»Trompataku la kapon kaj piku« sonoras obtuze el la kontraŭula kasko. »Ek!«

»Celu kaskokreston — salto al — salto for — al — piko!« Facila movo de la kontraŭula ŝildo, la armilo jam forglitis.

»Refoje!«

»Salt' al — for — al — pik'!«

»Fuŝe! Refoje!«

»Al — for — al — pik'!«

Senmove tenas la instruisto ŝildon, sed la glavpinto tamen maltrafis sian celon: je pli ol du coloj ĝi ekfulmis preter la giganta korpo en malplenon kaj Kajo fal-kline post ĝi.

»Celu! Celu hej!« tondras la kontraŭulo. »En la vera batalo vi jam estus kadavro. Refoje: sindefendo kaj tujsekva reatako!

»Al — for — al — pik' — rebat'!« Apenaŭ li povas defendi sin per la malgranda ronda ŝildo. »Al — for — al — pik'! Trafite!«

»Jam pli bone,« sonas el la kasko del' instruisto. »Nun ni tion priekzercu.«

Celu kaskopinton — ho, kiel bela estas hodiaŭ la vetero! — for — Ĉiuj kamaradoj iris por sin bani — pik' — rebat'! — Ho, se ankaŭ li povus ĉeesti! Salt' al — Estas ja certe terure amuze, Fabio estos — al — pik' — rebat'! Fabio certe denove petolaĵas kaj rolas marmonstron — for — kaj li devas ĉi tie tede skermolerni — pik' — rebat'! — ĉe la kruda brutulo, nenion komprenanta kaj — ve, trafite! La maldekstra ŝultro pikbrulas. Estos bela kontuzaĵo!

Montri nenion! — Al — for — ne ĝojigi tiun ulaĉon, montrante, ke doloras! — Pik' — rebat'! Lipmordi, tiam ne doloras tiom forte. Al — for — al — pik' — rebat'!

De kie venis tiu malgranda knabino? Salt' al —

for — kial sin movaĉas ĉi tie tiu infanaĉo dume — pik' — rebat'! Ha, kiel timplene ŝi rigardas! Ŝi certe — for — al — ankoraŭ neniam vidis kiel glavoluktas du viroj — rebat'! Alie ŝi ne estus tiel maltrankvila. — Al — for — Ne timu, ho etulino, al vi nenio okazos! Kajo alridetas ŝin, forgesante, ke la retviziero kovras lian vizaĝon.

Tri furiozaj batoj ektondras sur la bronzan kupolon de lia kasko. Kajo sven sente ekŝanceliĝas dorsposten.

»Atenton!« krias la malafabla voĉo de la skermisto. »Ne nun estas la tempo por okulumi la knabinojn.«

»Eh, kion permesas al si tiu ĉi impertinentulo? Kion li pensas, kiu ja estas antaŭ li?« En Kajo disflamiĝas furiozo. Li forgesas la lokon, la horon, la malgrandan knabinojn — ja ĉion kaj sin ĵetas kontraŭ la giganton.

Tiu ĉi staras momenton tute konsternite, poste incitite ekspiregas, ĵetas la ŝildon antaŭ la korpon kaj pli firme kaptas la glavon. La junulo fariĝis sovaĝa kato. Regulaj batoj postsekvas la malregulajn, lernaĵo alternas kun spontaneaĵo, efektiva pluvego da batoj akraj kaj plataj krakas sur lin maltrafe kaj trafe. La rutina skermisto komencas sin defendi. «Hej, li nun ekzemplos al tiu ĉi junuleto!«

Se oni povus lin nur altuŝi. Sed li estas fiŝsvinga: forglitas el sub klingo, ŝanĝas la starlokon, jen ĉi tie, jen tie — unu, du batoj, kontraŭ kiuj la junulo ne forsaveiĝas, ne povas lin bridi — Piko! Kaj ree piko! Demon! Ja, malgranda demono!

Tondra rido ĉe la enirejo, poste alvokoj:

»Haltu! Haltu do!«

Kajo retiriĝas, resobriĝinte turnas la kapon. Ĉe la enirejo staras brilvizaĝe la patro kaj apud li — ĉu eble? Mario! Onklo Mario estas denove en Romo!

Jam for la glavo kaj ŝildo, jam for la skermogantoj de sur la manoj, malferme cedas la buko de l' kasko, ankaŭ ĝi forruliĝas kaj Kajo jam fluge sin jetas en la ĉirkaŭprenon de la maljuna leono.

»Ho, onklo Mario!« li ĝojkrias. »Onklo Mario!«

Tiu ĉi alpremas lin al la brusto, ke Kajo aŭdas kraketi siajn ostojn, tiam ekkaptas lin ĉe l' ŝultroj kaj tenante antaŭ si, boras la flamŝprucajn okulojn en lian vizaĝon.

»Tigreto mia!« ridas Mario fiere. Kaj turninte sin al la patro li diras: »he, kion vi rakontis al mi pri ĉi tiu nematura lernoknabo. Li estas ja perfekta skermanto.«

»Eĉ majstra,« aldonas ies voĉo. Kajo ekrigardas supren. Estas ankaŭ tria persono en la skermejo, dikmalgranda, larĝŝultra homo kun grasa vizaĝo.

Mario alrigardas la parolanton dume liaj manoj skuas la ŝultrojn de l' knabo, kiun li ankoraŭ tenas.

»Cinno,« li krias per voĉo sonoranta kiel raŭka trumpeto, »kiam ni ree ekmilitos kontraŭ Sullo, kontraŭ tiu malbenita hundaĉo« — ruĝa ondo trapasas sur la malhela vizaĝo — »kontraŭ tiu nobela kanajlo, kies intestojn mi elŝiros tuj, kiam —«

Kvietige metas la patro sian manon sur la ŝultroon de la ekscitita homo, kiu — tute ne sciante, kion li faras — skuas la duonkreskan junulon kvazaŭ sakon. Mario tuj ĉesas kaj fine ellasas Kajon.

»Jes, jes« li elmurmuras, »mi ja scias. Sed kiam mi nur ekpensas pri tiu aĉulo, sango tuj alblas en la kapon.« Mario rigardas ĉirkaŭ si kaj ekokulas al



la skermisto, kiu demetinte sian kaskon, humilrikane atendas.

»Kaj vi?« li ektrumpetas kiel antaŭe »kiel vi estas kontenta pri li?«

La maljuna gladiatoro riverencas.

»Nur unu, du monatojn plu —«

»Eh kion, unu, du monatojn?!« senpacience en-  
diras Mario. »La junulo jam pretas, mi diras! Iom pli — estus eĉ tro! Li devas kromlerni nur: ŝirmi sin — kaj tion plej bone instruos al li la danĝero mem. Jen al vi« — li palpserĉas en la ledsaketo ĉe l' zono kaj ĵetas al la instruisto moneron. Tiu ĉi lerte ĝin kaptas. — »Nun for!«

La skermisto kelkfoje sin klinante elŝteliĝas eksteren. Mario turniĝas al Kajo:

»Kion vi donos al mi, ke mi liberigis vin de via turmentisto?«

»Mi ne povus vin sufiĉe rekompenci,« kore respondas la junulo. Mario rideksplodas.

»Volonte mi kredas« li ekkrias. »Turmenta lernado ĝi estas, sed iam vi estos eĉ dankema, ke li vin tiom torturis.«

»*Ho me dareis anthropos ou paideuetai*« silabas Cinno.

»Greke, ĉu?« moke enĵetas Mario. »Ĉesigu tiun dolĉetan parolaĉon. El Grekujo mi ŝatas nur la vinojn«

La patro ridetas.

»Ili — jam preparitaj. Nur iru kun mi en la manĝejon.«

»Ankaŭ Kajo,« ekkrias Mario metante manon sur la ŝultron de l' knabo.

Jam mallarĝa sulketo sur la frunto de l' patro.

»Kajo postvenos,« diras li iom abrupte. »Mi tro alte taksas lian ĝentilecon por pensi, ke li lasos Kornelian sola.«

»Kornelian?« demande okullevas Kajo.

»Vi ankoraŭ ne konas mian filinon?« demandas Cinno kaj jam mansvingas:

»Hola, Kornelia! Venu ĉi tien!«

»Ah, tiu etulino!« Ankoraŭ ŝi estas timplena: ŝi staras antaŭ Kajo, mentonpreme al la brusto, kaj ludante per la fingroj ŝi malkuraĝete okuligas al li. Grandanime li etendas al ŝi la manon. Embarasite ŝi altuŝas.

Cinno fingropinte puŝetas ilin unu al la alia.

»Iru en la ĝardenon,« li kaŝridetas,« kaj iom interamikiĝu.«

Nur en la ĝardeno rememoris Kajo, ke li ankoraŭ ĉiam havas la skermoveston. Embarasite kaj mal-lerte li demetas trans la kapo la ledan brustkirason. La militistajn botojn li kompreneble devas lasi surpiede. Senvorte alrigardas la malgrandulino. Nun li eksentas la devon, senkulpiĝi pro sia aspekto.

»Ĵus mi ekzerciĝis, sciu!« li klarigas. »Dume oni devas esti tiel vestita.«

»Mi tiom timis,« ŝi ekflustras.

»Ba, nenio,« grandioza gesto de la bagateligo. »Tion mi ja faras ĉiutage.«

»Kaj vi tute ne timas?«

»Mi — timi?« li manbatas sian bruston. »Tute netimiga ĝi estas.«

»Sed kiam oni vin trafas, sendube, terure doloras.«

»Tute ne,« li mensogas. »Tion oni eĉ ne sentas. Guste hodiaŭ la instruisto min trafis sur la ŝultro — kaj mi eĉ ne rimarkis. Jen!« Kajo forŝovas la tunikon de la ŝultro kaj alstrabas ĝin okulangule. Jes, restis kontuzajo: ruĝsanga kaj larĝa. »Nu jen!«

»Huj« okullarĝe ŝi miras kaj delikate ĝin fingretas. »Kiel terure!«

Guante ŝian admiron Kajo reĝustigas la tunikon. »Vi devus min vidi,« li fanfaronas, »kiam mi interpugnas kun la stratbuboj.«

»La stratbubojn mi ne ŝatas« ŝi diras grimace. »Ili ĉiam grimpas sur nian ĝardenmuron kaj mokas min per elmetita lango!«

Li ne scias respondi. Jes ja, tiaj ili estas, tiuj stratbuboj. Sed la knabinoj ne komprenas ŝercojn, ili tuj timas. Li turnas la interparolon al io alia.

»Vere, kio vin venigis ĉi tien?«

»La patro alkondukis min,« ŝi respondas, »al via patrino.«

»Tiel do, vi venis por viziti la patrinon.«

»Jes. Kaj ŝi estis tiel bona al mi! Sendube, vi amas vian patrinon?«

»La patrinon mi amas pli ol ĉion,« deklaras Kajo energie. Sed tuj li plivastigas sian certigon: »Eble ankoraŭ nur la patron mi amas tiom, kiom la patrinon.«

»Ŝi tre plaĉas al mi« duonvoĉas Kornelia.

Ŝia diro lin ĝojigas. Afable li rigardas ŝin. Ŝiaj okuloj estas jam larmaj kaj ĉirkaŭ la lipoj tremetas.

»Certe ankaŭ vi amas vian patrinon?« li demandas bonvole.

»Ne« mallaŭte ŝi respondas. »Mia patrino jam delonge mortis.« Nun vere ekfluas ŝiaj larmoj.

Malagrable estas al Kajo. Certe estas tre dolore ne havi patrinon. En kora emocio spontanee li kaptas ŝian manon:

»Se tiuj stratbuboj denove vin langmokos« li konsolas »mi lecionos al ili per pugno!«

Dankeme ŝi okullevas al li.

»Kiam mi estas kun vi,« ŝi flustras, »mi tute ne timas«.

Kapklinante al ŝi, li decidas aparte ŝin favori.

»Reiru al la patrino,« li diras. »Vi povas resti ĉe ŝi ankoraŭ iom da tempo. Mi devas nun iri al la viroj.«

Onklo Mario estas jam tute purpura, kiam Kajo eniras. Lia fera mano premas la maldikan glason kvazaŭ rompvole. Li parole ekrajdis sur sia eterna temo — sur Sullo — kaj tutvoĉe insultas. Kiam li rimarkas Kajon, lia kolergrimaca mieno tuj serenigâs.

»Hej, jen nia militisto!« ĝoje li tondras. »Venu al mi, junulo mia!« Li ekbrakumas Kajon. »Jes, vi estas vera adepto de Marso. Vi volus servi al li, ĉu?«

»Mario —« sur la ŝultro de Mario jam denove la mano de l' patro.

»Nu, bone, bone,« murmuras tiu ĉi. »La patro timas pro vi,« li ekridetas al Kajo. »Liaopinie vi estas ankoraŭ tro juna por militado. Eble li pravas. Sed al Marso vi povas servi ankaŭ en Romo: mi havas kelkajn disponeblajn postenojn en la pastra kolegio. Ĉu vi volus iun el tiuj? Jam post du jaroj vi povus esti konsekrata kiel *flamen Martialis*.«

Kajo eĉ ne pripensas, li nur signife kapneas, fleksiĝante malantaŭen por eviti la vinodoraĉon, kiu alblovas lian vizaĝon el la buŝo de l' maljunulo.

»Ne,« li diras.

»Hu! Kaj kial ne?«

»Ĉar Marso ne estas la unua inter la dioj.«

Mario ridtondras ĝistuse.

»He, vi plaĉas al mi!« li ekkrias. »Neniam dua laŭvice: prave ja! — Lasu nur« li rifuzas la patron, kiu volas enmiksigi. »La junulo estas prava. Nu mi vidos, kio estos farebla en la kolegio de Jupitro«.



## Junulo

Jam fordronas la sovaĝaj krioj de l' forumo. Profunda, solena silento de la Sankta Ĥoseo envolvas ambaŭ junulojn, kiuj — ŝultron ĉe l' ŝultro — trenas la piedojn al la templo de Jupitero. Samaĝaj, ili evidente portas ankoraŭ mallongan tempon la virtogon. Sed ĉiu ilia gesto estas aparte plena de patricia digno, laŭnaske kaj eduke sorbita en la sangon. Eĉ pli, tion ankaŭ pravas ilia sama sintenado: ambaŭ tenas la dekstran manon en la antaŭaj faldoj, dum la maldekstra senzorge pendas. Tiel ili preskaŭ similas al du militistoj de la blanka, pacama militistaro, kiuj patrolas tra la stratoj de la metropolo.

La Fabiano unua rompas la silenton. Li rimarkigas turnorigarde al la jam marŝita vojo:

»Eh, kiel tie oni krias, gestas, kiel ekscitiĝas! La plebo kondutas kvazaŭ oni ne scius, ke la sorto de Romo estas jam delonge decidita aliloke.

La Juliano kaplevas.

»Oni mem estas kulpa,« diras li mallonge.

»Jes,« kapjesas la Fabiano. »Oni devis ne permesi, ke la afero tiom disŝvelu. Nun, post kiam unu mortis, la alia per unu sola buŝmalfermo englutos la tutan forumon.«

Li eksilentas kaj subite ekridas:

»Pardonu la senrespektajn esprimojn. Mi tute forgesis, ke Mario estis via onklo. Ĉu vi koleras?«

»Ridinde,« mansvingas senĝene la Juliano. »Tiom pli, ke vi tute pravas. Kion ankaŭ mi trovas bedaŭrinda, estas sole: tiu kapitulaco antaŭ lia Moŝto Sullo.«

»Kion alian oni povis ja fari?! La taĉmentoj de Fimbrio perfide transiris al la malamiko kaj li mem — jam mortinta; la konsuloj Karbo kaj via, cetere altsatata bopatro, estas feliĉaj, ke li ankoraŭ vivas; Metelo, Krasso kaj Pompejo ekpartiis kun Sullo. Kion, do, faru la kromrestintoj?«

Brilokule rigardas la Juliano rekte antaŭ sin.

»Ankaŭ Hanibalo staris antaŭporde de Romo, sed estis pereigita.«

»Estas nekonate al mi —« la Fabiano lin moke duonokulas — »ke al la devoj de la jupitraj pastroj apartenas ankaŭ la aŭgurado. Ĉu vi eble intencas mobilizi viajn kolegojn, ho altrespektata moŝtulo?«

Tiu ĉi bildo estas tiom groteska, ke la Juliano devas ekridi. Eĉ nevole li vidas la dikan, mallertan Lenon, kaj la nerveman, eterne ekscititan Scevolon marŝi en senmankaj batalarmajoj laŭ la Apia Ŝoseo kontraŭ Sullon.

»Ne,« li diras ankoraŭ ĉiam ridante. »Precipe, ĉar kun miaj kolegoj mi interrilas plej malvarme: helpe de onklo Mario mi akiris la pastran oficon same kiel pere de Cinno la edzinon.«

»Do?«

»Do, vi pravas: Sullo fariĝos mastro de Romo, ĉar tiel ordonas ĝia fatalo. Aŭ pli ĝuste: ĉar ĉiuj aldestinitoj cedis senbatale. Perdita estas nur tiu, kiu mem opinias sin perdita.«

Kelkatempe ili silente paŝas unu apud la alia.

Tiam denove daŭrigas la Fabiano — energie, eĉ iom tro emfaze:

»Mi pensas: estas feliĉo, ke okazos tiel.«

»Ankaŭ mi tiel pensas,« seke diras la Juliano.

»Vere?« Ĝoja surprizo sonas en la ekkrio. »Tio sincere ĝojigas min!«

»Eble iom tro frue« enĵetas la Juliano mallaŭte ridante. »Nu, ni vidos. Unue diru al mi, kial vi opinias la venkon de Sullo feliĉo.«

»He, tio ja ne estas problemo,« ekbabilas la Fabiano. »Ne plu opinios ĉiu proleta alvagulo, ke li estas destinita por decidadi pri bono kaj malbono de la Respubliko. La povo revenos denove al tiuj, kiuj rajte ĝin disponos: al la patricioj kaj membroj de la senato. Kaj ĝuste tial mi ĝojas, ke vi, ho Kajo, kiel posteulo de unu el la plej eminentaj familioj kaj antikva nobelaro, fine retrovos la vojon al viaj samklasanoj.«

La Juliano metas la manon sur lian ŝultron.

»Hej, malrapide,« li diras, »malrapide ja! Lasu nun ankaŭ min paroli. Dankema vi estos pro la interrompo«. Iom pene li venkas la rideton klopodante aspekti digne. Naskiĝas grimaco, kvazaŭ li ekmordus ion acidan. Ankaŭ la vortoj estas laŭ tio.

»Via rezonado estas ĝusta, sed ne kompleta: la malfeliĉo estas ne nur tiu tropotenco de la proletaj alvaguloj — kiel vi ĵus diris — sed eĉ multe pli la tropotenco de tiuj pedantaj, sencerbaj arogantuloj — por ne diri: korupteblaj aristokratoj. Jen kial mi opinias feliĉo, ke Sullo venas. Ĉu li regos dekstrule aŭ maldekstrule, ĉu li formos registaron el la senato aŭ popolo, estas al mi indiferente. Al mi gravas nur, ke fine

venis homo, kiu kuraĝos ĉion trakribri.« Subite li haltas antaŭ la ŝtuparo de la jupitra templo etendante la manon al la Fabiano, kiu ŝajnas frapita sur la buŝon: »Mi havas laboron ĉi tie. Adiaŭ, Marko, kaj dankon pro la akompano.« Ne atendante la respondon li supreniras la larĝan ŝtuparon kun la digno de *flamen Dialis*.

Ie ĉe la ŝtuparmezo li haltas, ekrigardas norden, trans la valon, al la deklivoj de Kvirinalo kaj Viminalo. Subpiede kuŝas Subura kun siaj grandaj loĝkazernoj, kiujn tage-nokte plenigas bruo kaj tumulto. Vidalvide, meze de vasta parko, en la ŝirmo de grandaj ombroriĉaj arboj, turas la vilaoj kaj palacoj de la nask- kaj mon-aristokratoj. Per unu sola rigardo, momente ĉirkaŭprenanta ĉion, li entrinkas tiun ĉi bildon. Liaj okuloj glitas maldekstren ĝis la brila krono de l' templo super la melankoliaj, krutaj deklivoj de Kapitolo. Jam li rememoras la antikvan proverbon: »De Kapitolo ĝis la Tarpeia roko estas nur unu sola paŝeto.« Ridetante li ĝin elmurmuras. Li pensas: La vojo estas mallonga por ĉiuj, kiuj ne komprenas sian nuntempo, kiuj riskas, kiam oni devus heziti kaj hezitas, kiam oni devus riski. Jes, en tio kuŝas la plej granda sekreto de ĉia sukceso. La Korneliano, al kiu nun riverencas la tuta urbo, komprenis tion pli bone ol la aliaj. Nezorgante pri partiaj kvereloj kaj registaraj dekretoj, li arbitre militis, ligante la militistojn, homon post homo, ĉiam pli intime al si. Fine ĉiuj, la estro kaj la militistaro iĝis unuj: unu penso, unu volo, unu potenco. Kaj nun ruliĝas tiu giganta globo kontraŭ Romon, detruante ĉian reziston per sia nevenkebla rompforto.

Malrapide li sin turnas ŝtuparsupren, enpense

transpaŝas la lastajn ŝtupojn kaj atinginte la plataĵon, li direktiĝas maldekstren.

El la ombro de la kolonoj forŝiriĝas figuro, vokas lin ies voĉo:

»Ho sinjoro!«

Li turnas la kapon: estas unu el la hejmo-sklavoj, la grizhara hispano, kiu servas, de kiam la junulo memoras.

»Vi?« mire li demandas. Subite li rimarkas la tremetajn lipojn, la larmodronajn okulojn. Kvazaŭ pinto de arda pinglo, boriĝas tra lia brusto la disbrula timo. »Kio do okazis?« li elraŭkas.

La sklavo alproksimiĝas kurbdorse, braketede, li genufalias antaŭ la junulo kaj tremmane, liptuŝe, kaptas la borderaĵon de la togo. Sovaga plorsingulta konvulsie skuas lian tutan korpon malhelpante la parolon. »Sinjoro! Juna sinjoro!« jen ĉio, kion li elbuŝigas.

La junulo alkliniĝas kaj kaptas liajn ŝultrojn:

»Kio do okazis?« li ripetas jam ekvilibre.

La firma mankapto kaj trankvila voĉo rekonsciigas la maljunulon. Levinte sian larman vizagaĵon, li elbalbutas:

»La sinjoro — malfeliĉo —«

»La patro?« malgraŭ la peno, ĝi estas elkrio de plej sovaĝa doloro. La sklavo kapjesas.

La Juliano jam forgesis la patrician kaj pastran dignon: unugeste li kaptas kaj transĵetas la togon. Longpaŝe li jam saltas malsupren laŭ la ĵus irita ŝtuparo. La maljunulo postsekvas, kiom permesas al li la tremaj kruroj.

Hejmrevene la Juliano tiras el la sklavo la plej gravajn informojn. La *pretoro* foriris kiel ĉiumatene

al la juĝista kunsido. Veninte en la oficejon li plendis pri misfarto, tamen rifuzis reveni hejmen kaj prokrasti la procesojn. Sed tuj ĉe la unuaj vortoj li subite eksaltis, disŝiris la tunikon super la brusto kaj stertorante falis teren. La alkurintojn fiksrigardis jam la vitrecaj okuloj de la mortinto.

»Kie li nun estas?« informiĝas la junulo.

»Hejme. Ni reportis lin hejmen«.

»Do, la patrino jam scias —«

»Ŝi mem sendis min por vi.«

Ili atingas antaŭ la hejmon. Terurite rigardas la maljunulo, kiel la dolorgrimacan vizaĝon de la juna sinjoro kovras ŝtonmasko, mildigante la mienon kaj altrudante senespriman, solenan trankvilon.

Altrekte, malrapide kaj egalpaŝe la junulo transiras la sojlon.

Jam alpaŝas la pordisto por saluti lin per laŭta lamentado, kiun li trovas konvena al la cirkonstancoj: sed antaŭ la nealirebla seriozo de tiu ĉi statuo li retiriĝas kaj senbrue sin ŝovas en la ĉelon.

En la vestiblo venas renkonte al la junulo la patrino, digne kaj solene, kiel ankaŭ li mem. Estas ŝi, kiu unue riverencas: profunde ŝi klinas la noblan kapon antaŭ la nova estro de l' juliana domo. Li reŝalutas lacgeste, respekte. Poste li atente disvolvas la faldojn de sia togo kaj lasante forgliti la vestaĵon li prenas el la manoj de l' patrino la nigran funebroveston.

Eĉ vorteton ili ne parolas. Mute kunpaŝante ŝi gvidas lin en la atrion. Kune ili eniras, tute absorbitaj en si mem, irante kvazaŭ trans la sojlon de sanktejo.

En la atrio la novan domestron salutas lia juna

edzino kun tima, humila esprimo en la ronda infanvizaĝo. Ŝia korpo ŝvelas pro la infano, naskota post kelkaj monatoj. Ĝis nun ŝi staris ĉe l' piedo de la katafalko. Kaj tiu ĉi stranga koincido de la vivo en kreiga kaj ĉeso donas al la solena malĝojo de tiu ĉi momento preskaŭ ĝenan kontraston.

Per la malrapida, senesprima gesto, kiel ĵus la patrinon, la edzo resalutas sian junan edzinon. Li preteriras ŝin, dum ŝi senbrue, kvazaŭ kun senkonscia ĝemeto, flankeniĝas. Meze de la ejo, ricevanta lumon tra aperturo en la tegmento, li haltas antaŭ la kadavro de sia patro.

La katafalko estas tegita per orbrodita, skarlata kovrilo, super kiun oni sternis la plej delikatan tolaĵon kaj surŝutis florojn el la hejma ĝardeno. Jen la lasta kuŝejo de pretoro Kajo Julio Cezaro, la patro. Envolvita li estas en la veston de sia ofico, kiun apudas insignoj de liaj senatana rango kaj patricia deveno, Folia girlando, signo de la militheroeco, fleksiĝas ĉirkaŭ la frunto. La okuloj estas fermitaj, la vizaĝo montras trankvilan, preskaŭ serenan mienon. Ŝajne la pretoro ĵus plenumis malfacilan, longatempnan taskon kaj nun kore ekĝojis pro la akirita ripozo.

La filo alpaŝas tute proksimem kaj senvorte mallevas la rigardon al la mortinta patro. Iom fore haltas la patrino kaj edzino, kvazaŭ nevolante ĝeni la mutan interparolon de la vivanto kun la mortinto.

Al la junulo ŝajnas, ke li estas tute sola kun tiu pala viro, senmove kuŝanta antaŭ li sur la luksa katafalko. Tute sola en la tuta, vasta mondo. Li rememoras milojn da delikataj, neeldiritaj vortoj kaj ili nun ektorturas lian koron. Li pensas pri la senlaca zorgemo de l' mortinto, pri la fruktodona amo kaj

subtila komprenemo por liaj ofte senkonsideraj, komplikitaj pensoj kaj agoj. Ho, li volus ankoraŭ nur unufoje danki la patron pro tiuj sennombraj bonaĵoj — sed li scias, ke estas jam tro malfrue. Neniam plu li sentos sur si la bonan, varman rigardon de tiuj ĉi okuloj, nek la firman, kvietigan manon sur sia ŝultro.

Flama doloro torentas en la gorĝon por estiĝi en spasma, infana ploro. Per peno de sia tuta forto li ĝin sufokas, vekante la tremetadon ĉirkaŭ la ekploranta buŝo. Streĉante sian tutan volpovon li rektiĝas. Jam denove li sentas, ke en li leviĝas la flamo, la skarлата ondo de doloro, li sentas, ke nur kelkajn sekundojn li povos ĝin kontraŭstari. Kaj tiam kaptante per granda, solena gesto sian togon li ĝin ĵetas trans la kapon por kovri la vizaĝon, kiu taŭziĝas sub ĝi en la nevenkebla sufero.



## Vivĉaso

El la branĉkabano gvidas tra kano kaj junko mallargĉa, zigzaga vojeto, longa proksimune cent kvindek paŝojn. Ĝi trairas sur la kotvoma, marĉa grundo, kiu subpaŝe elaste encedas kaj ĉe piedlevo ŝmacas for de la plandoj. Veninte al la fino de tiu ĉi vojeto oni ĝuas liberan perspektivon sur la grandan marĉregionon, kiu, sen iu ajn arb-ombro, etendiĝas tra la tuta horizonto. Nek ĉirpeto de birdo aŭdeblas, nek besto videblas. Nur svarmoj da muŝetoj dancas en la tremetanta aero, kies putran haladzon arda bloveto foje — foje tiras ĉi tien kaj tien. Abunde kaj riĉe kreskas herboj intermiksitaj kun herbaĉoj kaj maloftaj floroj. Super la ebenajo, en sensanĝa bluo, vastas la giganta ĉielkloŝo. De ĝi la ardega suno dispafas siajn senkompatajn radiojn.

La Juliano lasas kunfermiĝi la kantrunketojn, kiujn li ambaŭmane dispuŝis kaj ekiras returne. Liaj manoj estas glacietaj kaj ostaj, sub la terbruna haŭto elŝvelis vejnoj, en kiuj furioze pulsas. Febrotreme la junulo envolvas sin pli forte en la krudan, disŝiritan mantelon; malgraŭ la sunardo li frostas ĝis la ostmedolo. Nur la kapo brulas kaj en la tempioj neelporteble martelas: la tutan kapon premegas fera ringo, brute kuntirante la kranion: la kampania febro...

Senfina estas la vojeto. Ĉiufoje, kiam ŝajnas ke tuj montriĝos la kabano, jam aperas nova vojkurbo, gvidante eĉ pli internen en la netraireblan kankaron. Estas vojo, kiu rememorigas per sia kruela monotoneco la antikvajn fabelojn pri la labirintoj. En ili, la vojaĝanto, serĉante vane la elirejon, malespere vagas, ĝis kiam la plena elĉerpiĝo liberigas lin de la tumentoj. Ion similan al tia malespero sentas ankaŭ la junulo, trenanta sin antaŭen ŝanceliĝe, pezpede. Ambaŭmane li kaptas en la trunkaron, ĝin puŝklinas, boras sin antaŭen, plue, kun obtuze sovaĝa furiozo, pelanta lin tute sen lia volpovo.

Fine — la kabano. Li frappuŝas la malaltan pordon kaj paŝas en la malluman ejon. Aero pezas kaj sufokas, sed la tegmento tamen ŝirmas kontraŭ la sunradioj, tiom dolore brogantaj lian nekovritan kapon. Li sin ĵetas sur la kuŝejon el sekaj, fagaj folioj kaj fiksrigardas antaŭ sin.

Jam tri semanojn tiel daŭras: de loko al loko, de kaŝejo al kaŝejo. Nenie ripozo, nenie sekureco: ĉiam saltpreta por kuri for — ien ajn, kie li espereble almenaŭ dum kelkaj horoj, libere respiras. Kio estas dormo, la natura, profunda dormo, dum tiuj ĉi tri semajnoj, li preskaŭ forgesis. Nutraĵon donas al li sovaĝaj beroj, nokte ŝtelataj fruktoj el la vilaĝaj ĝardenoj kaj manĝradikoj kaŝe elfosataj en la kampoj. Unu-dufoje liaj amikoj en Romo sukcesis havigi al li per sekretaj senditoj nutraĵon: fumajitan viandon, kiun la malforta stomako ne povis digesti; panon, kiu dum la longtempa transporto ŝtoniĝis. Antaŭ ol manĝi, li devis ĝin eĉ akvumi en malpuraj kotmarĉoj. La sciigoj, kiujn li samtempe akceptis, estis malesperigaj: Sullo per teruraj, sangaj ediktoj frakasadis la lastan

reziston. Sed la Juliano estas nur unu el la miloj, kiujn frapis la fulmo de ekzilo. En la tuta lando oni bruldetruas kaj mortigas: senatanojn, kavalirojn, popolajn *tribunojn*, kiuj kulpigis kontraŭ la diktatoreco aŭ fariĝis nur suspektindaj; centope oni ekzekutas ilin sen juĝ-enketo, eĉ ne provante trovi ian ajn pretekston! Formiĝis tutaj bandoj da vivĉasistoj: la sangavidaj volontuloj de Sullo. Rondirante tra la tuta Italio ili plenumas la murd-ordonojn de la ĉiopova, profitante ĉe tio sekrete bonan rabajon. La pripensita teroro de Sullo eĉ pli ol duobligis la malbonon, kiun faris al la nobelaro la alkoholumita frenezo de la maljuniĝinta Mario. Romon konsistigas nun nur du specoj de estuloj: la ĉasistoj kaj la ĉasatoj, la ekzekutistoj kaj la proskribitoj.

Turniĝante sur la kuŝejo, la Juliano sopiras je dormo, lin evitinta jam dum tri semajnoj. Tiel senlime laca li estas, ke en lia animo formortis ĉiuj pensoj, ĉiuj deziroj, krom unu sola: satripozi, fine denove disetendi la membrojn. Sed sen tiu senĉesa nervostreĉo, kiu devas lin neniam forlasi, se li ne deziras fali en la trisemajna rifuĝado. Neklare trairas lian febrobrulan cerbon rememoro pri la patrino, pri la juna edzino, pri la filineto, aĝanta jaron kaj duonon. Ilin li devis forlasi en tiu infera kaldrono, en Romo. Ĉu li iam ilin revidos? Terurite li sentas, ke la respondo al tiu ĉi demando iĝis por li indiferenta: lia tuta forto estas ja elĉerpita. Spite lian pli noblan memon en la furioza, ekribela egoismo, lia homnatura avidas trankvilon, pacon, ripozon. Malrapide liaj pensoj disnebulas, ster-niĝas jam la unuaj vualoj de dormo.

Ekbojo! Ankoraŭ fora, sed sufiĉa por elĵeti la Julianon el la dormodrono. Unusvinge li sidrektiĝas,

baniĝante jam en glacia ŝvito ŝprucanta el ĉiuj poroj;  
Timitero eksufokas: oni kaptos lin!

La bojado, jen denove — nun jam pli proksime. Verŝajne la hundo jam flarkaptis la paŝsignojn al la kabano. Tio redonas al la Juliano lian movkapablon. Li saltas al la pordo kaj streĉante sian tutan forvelkan forton, li fermopuŝas la pezan riglilon. Returne li forŝanceliĝas ĝis la kuŝejo, kaj serĉfosante ĉe la kaploko li eltiras mallongan ponardon, kiu kaŝite kuŝis inter la fagaj folioj. Tuj li treniĝas ĝis la muro kaj dorsapogas sin larĝe disokulante. Dume la mano spasme gluiĝis al tenilo de l' armilo. Nur unu sola penso en la senorda cerbo; min viva ili ne kaptos! Ja, vivan ne!

Krurgratetoj, ternoj de l' senspira hundo, flaroj, kolermurmuro, jam furiozaj albojoj: la hundo signalas la kaŝlokon, sovaĝe, diseĥe. Tiel senĉese. La paŝoj. Iu skuas ĉe la pordo. Tiam ies voĉo:

»For la pardon!«

Silento. La junulo streĉas ĉiujn muskolojn, kaj ĉesas spiri. Viva ne! li decidas.

Skuoj denove. Pugnobatoj sur la dancsaltajn tabulojn:

»Hej vi, for la pardon! Ĉio jam vana! For la pardon!«

Silento...

Tuta eterneco...

Min viva ne!

»Lastafoje: for la pardon!«

Senresponde.

Tondra diskraĵo, duafoje, triafoje: hakilbatoj, Splitpluve falas tabulo en la kabanon. Ankaŭ la dua.

Jam rikana vizaĝo en la disfendaĵo: inter blankaj

dentoj la pikglavo. Sub ĝi kapo de la hundo: sangrulaĵoj okuloj, bojaĉa buŝego kun ŝaŭmguta lango.

Subite en la okuloj de la atakanto surprizo, hezito. Lia vizaĝo sereniĝas, unu mano gestas al la glavtenilo elprenante la armilon el la dentkapto.

»Cezaro? Vi?«

En la vizaĝo de la Juliano same la surprizo. Liaj muskoloj malstreĉiĝas.

»Katilino?«

Denove la nervostreĉo:

»Min viva vi ne kaptos.«

Katilino repaŝas.

»Sensencaĵoj, Cezaro. Ni estas ja amikoj.«

La Juliano hezitas. Ne lasas Katilino for el la vido.

»Ni estas ja amikoj,« malpaciencaj ekstere la Sergiano.

»Je honora vorto, malfermu jam! — Kuŝ' Barakas!« li diras la lastajn vortojn al la hundo, kies kapo tuj malaperas. Malrapide, ankoraŭ tute konfuzite, la Juliano sin trenas al la pordo, forpuŝas la riglilon kaj malfermas.

La Sergiano eniras, senzorge ĵetas la glavon sur la kuŝejon kaj explore ĉirkaŭrigardante etendas la manon al Cezaro.

»Hej, kion vi faras ĉi tie?«

Ankaŭ la hundo postvenas, tere kuŝiĝas kaj langpende ekspiregas.

»Proskribita« respondas Cezaro.

»Ankaŭ vi? Kial?«

»Ĉar mi ne konsentis eksedziĝi.«

»Ĉar vi — eh jes, via edzino estas filino de Cino. Nu jes, Sullo scias malami — eĉ post la tombo!«

Refoje li ĉirkaŭrigardas. »Kaj ĝi estas via tuta palaco? Aristokrate ĝi ne aspektas.«

Sultrolevo.

»Estis al mi eĉ pli malbone.«

Katilino alrigardas lin demande.

»Vi malsanas, ĉu?«

Cezaro kapjesas.

»La marĉofebro — sen nutraĵo — malbona akvo.«

Katilino ekpensas. Poste kaptas al la kokso kaj malligas botelon:

»Jen, trinku!«

Cezaro albuŝigas la botelon kaj longglute eksuĉas.

Vino! Agrable kaj varmige ĝi trafajras la vejnojn.

La Sergiano sidiĝas sur la kuŝejo ekludante per branĉeto.

»Malsaĝa vi estis« li diras afereme.

»Kial do?«

»Ke vi ne obeis al Sullo. Vidu ja Pompejon: li tion faris kaj nun ĝuas grandan favoron.« Katilino rideksplodas: »Ĉu vi scias, kion li antaŭ nelonge ekkuragiĝis? Sullo riproĉis lin pro ia arbitraĵo. Sed Pompejo al li rediris: »Kaj tamen pli multaj popoloj adorkliniĝas al la leviĝanta ol al la subiranta suno!«

Cezaro sidiĝas apud la Sergiano.

»Kiaj novaĵoj tie fore — ĉe vi?«

La alia mansvingas tra l' aero.

»Malbonaĵoj! — Ĉu vi scias, kiel altan murdpremion pagas Sullo. Dekdu mil denarojn! Mi jam buĉakiris tutan havaĵon. Bedaŭrinde ĉion forglutis la faŭko de miaj uzuristoj.«

»Ĉu multaj viktimoj?«

»Nu, vi povas ja imagi: proksimume tri aŭ kvar mil kapoj. Patricioj — plutokratoj — precipe la lastaj:

estis ja ĉe ili multe por pirabi«. Malice li ekridas. Sed tuj denove elŝprucas liaj pensoj: »Sullo ordonis faligi la trofeojn de Mario sur Kapitolo. Ankoraŭ nun kuŝas tie la ruboj: per mortminaco estas malpermesite ilin tuŝi. Li ankaŭ ordonis disrompi lian tombon kaj disŝuti la cindron en la Anion. Jes ja, tiu scias malami!«

»Kaj ĉu vi scias ion pri la miaj?«

»Ne,« respondas Katilino. »Sed vi povas esti senzorga, nenio al ili okazis, alie mi jam scius. Sendube la Kottoj intervenis pri ili. Kaj nun plej sendanĝere estas ja ĝuste en Romo.«

Mallaŭta, tute mallaŭta ekĝemo. Tiam denove la Juliano fiksrigardas antaŭ sin.

»Trinku refoje,« instigas lin la Sergiano. Kaj dum Cezaro albuŝigas la botelon, li daŭrigas:

»Kiel vi prezentas al vi la propran estontecon?«  
Cezaro formetas la botelon.

»Mi ne scias,« li diras premite.

Katilino alrigardas lin duonokule.

»Sed, se vi tamen provus obei?« li proponas pripense.

Kapneo. La Juliano firme kunpremas la lipojn.

»Do, ne! Kion alian?«

Malrapide Cezaro dismetas la interplektitajn manojn kaj rigardas la disetenditajn manplatojn.

»La parencoj sciigis al mi, ke ili ĉion entreprenos ĉe Sullo — ke estas espero —«

La Sergiano leviĝas. Tuj ankaŭ la hundo ir-pretas.

»Nu do nenio alia ol atendi. — Nun mi devas antaŭen. Restu sentime ĉi tie: mi zorgos, ke al vi nenio okazu. Kaj se mi ekscios ion el Romo, mi komunikos al vi. — Adiaŭ do, Cezaro!« Katilino etendas al li la

manon. Nur momenton hezitas la Juliano, ĉu preni la sangmakulan manon. Sed — al li ĝi faris nur bonon. Tiam li enmetas sian terbrunan, febran manon inter la fortikajn longegajn fingrojn de la Sergiano.

Tiu ĉi refoje kapsalutas, surzonas la glavon, alfajfas la hundon kaj eliras. Cezaro lin postrigardas, ĝis kunfermiĝis post li la ekstremanta kanaro. Tiam li returniĝas. La nekutima vinguo je malplena stomako jam vualis ĉion en la kapo. Per du pezaj paŝoj li atingas la kuŝejon kaj sternaĝas fale.

Post momento li jam dormas forte kaj profunde: unuafoje post tri semajnoj.



## Sullo

Piedpinte eniras la korposervisto kaj proksimiĝas al la diktatoro kurbiĝinta super senfinaj ciferkolonoj. Kun la rideto de l' favorato kaj samtempe kun la tuta malestimo, kiun en lia servistaĉa animo vekas la amnestiita proskribito, li alflustras:

»La Juliano, sinjoro.«

La diktatoro eĉ ne levas sian kapon. Senlace balaas liaj okuloj supren, malsupren laŭ la ciferoj, pesante ilian reciprokan grandecon. Mallonge kaj seke elsaltas inter liaj maldikaj lipoj:

»Li atendu!«

La sklavo neaŭdeble malaperas. La diktatoro okupiĝas plue pri la kalkulado.

Ekstere en la atrio staras la vizitanto. Meze de la ejo li pririgardas kun ekvilibra, nepenetrebla mieno la murbildojn, la avbustojn. Li scias, ke mokaj, malestimaj kaj enviemaj rigardoj observas ĉiun lian geston. Sed nenian spektaklon li volas ĝuigi al la servistaĉa bando.

Fine el la kabineto disefas metaltinto. La flavhaŭta siriano kuras internen, eliras kaj senzorge kapsignas al la pordkurteno. Li volas tuj malaperi.

Apenaŭ rimarkebla gesto de l' vizitanto lin forĝas al la loko. La mano de la Juliano, indiferente, preskaŭ

enue leviĝinta al la kurteno, restas etendita. La sinjorokuloj briletas malvarme, metale. Dorsflekse alŝoviĝas la siriano kaj forpuŝas la kurtenon. Enirinte egalpaŝe tra la pordo la Juliano haltas kun muta saluto. Post li pezfaŝe kunvolviĝas la kurteno.

La diktatoro ŝajnas fine sata pri la ciferoj. Forĵetinte la skribilon, komforte li apogas sin dorsoposten kaj okulfermete rigardas la Julianon.

»He, sinjoro Kajo Julio Cezaro bonvolas fari ankaŭ al mi la honoron« li diras kun seka primoko. Lia voĉo estas kaduka kaj sibla. Eluzita komandovoĉo. Sullo multe kriegis en sia vivo — nevole ekpensas la Juliano. Laŭte li ekvoĉas:

»Vi mem ordonis, ho diktatoro!«

Sullo ridetas. Ankaŭ tiu rideto estas kaduka kaj ŝajne eluzita.

»Tio signifas, ke alie mi ne havus la plezuron, ĉu?!« Liaj ruzaj okuloj larĝiĝas, la voĉo ekprofundas je unu oktavo. Nun vibras en ĝi io forta kaj plena — la eĥo de l' iama tondro. »Nu, almenaŭ kuraĝa vi estas.« Lia mano, delikata, flegita virinmano, gestas al la seĝo. La Juliano sidiĝas.

»Mi venigis vin,« komencas la diktatoro sen ĉirkaŭfrazoj, »ĉar mi volas havi pri vi klaran opinion!« Foliumente inter paperoj sur la skribotablo Sullo eltiras faskon, en kiun li dum la sekva parolo kelkfoje enrigardas. »Al mi estas kompreneblaj la motivoj de la aliaj: ili dentmontre bojaĉis kontraŭ mi, ĉar al la hienoj malplaĉis la tigro forunganta ilian rabaĵon. Mi ne kredas, ke estas ankaŭ ĉe vi tiaj motivoj. Sed, kompreneble, mi vane demandas min, kio instigis vin komploti kontraŭ mi.«

»Ne, diktatoro, mi ne komplotis kontraŭ vi.«

Tio estas trankvila, laŭfakta korekto, sed ne senkulpiĝo.

Denove la kaduka, sibla voĉo:

»Eh kompreneble, ne rekte, ĉar aliĉe vi ne sidus ĉi tie. Sed vi ne zorgis pri miaj ordonoj, vi eĉ malobeis ilin.«

Ioma ruĝeto en la vangoj de la Juliano:

»Vi aludas mian eksedziĝon kun Kornelia?«

»Mi aludas vian eksedziĝon kun la filino de mia malamiko Cinno« korektas Sullo tre energie. »Cezaro, mi volas sincere paroli kun vi. Mi intencis al vi nur bonon. Sufiĉe mi konas la tutan kanajlaron de Mario; tiu maljunulo ja preskaŭ dum mia tuta vivo laborokupis min. Nu, mi demandas min: kion serĉu la aristokrato ĉe l' parenĉaro?« (Mi — mi — mi — pensas la Juliano). »Eble —« la miopaj okuloj ekpalpebrumas — »mi planis pri vi ankaŭ ion alian. Per via rezisto vi malebligis tion. Eĉ pli: per via freneza obstino vi altrudis al mi la plej akrajn punfarojn. Ĉu tio devis okazi?«

»Diktatoro —« komencas hezite la Juliano.

Refoje interrompas lin Sullo.

»Mi postulas de vi, Cezaro, sinceran respondon« li akcentas. »Alie prefere silentu.«

»Jes, vi ricevos, ho diktatoro, sinceran respondon« rediras firme la Juliano levante sian noblan kapon. »Unue, permesu al mi, atentigi vin, ke mia malobeo tute ne koncernas miajn rilatojn kun la partio de Mario.«

»Ĉu?« enĵetas ironie la maljunulo.

»Ne!« kontraŭas la Juliano tiom fajre, ke la diktatoro ekmiras. »Mia edziĝo havis, vere, politikan karakteron, sed baldaŭ ĝi evoluis al la kunvivo de la

plej bona homa intimeco. Nur tio kaj neniam politikaj intrigoj igis min ignori viajn ordonojn.»

»Do, obstineco? Fanfaronemo?«

»Ne,« respondas la Juliano refoje kun firma trankvilo. »Lojaleco. Kavalireco eĉ, se tiel plaĉas al vi. Mi ne povis perfidi la deksep-jaran infanon, kiu, rigardante en mi — post la murdo de la patro — la solan ŝirmon, kroĉiĝis al mi. Tio estus pli malnobla ol malkuraĝa: tio estus kanajla!«

»Ta-ta-ta!« la maljunulo mansvingas tien, reen. »Nur bombastoj. Al la malfeliĉa, sensirma infano nenio ja okazus: mi neniam militis kontraŭ la virinoj.«

»Vi ne, diktatoro« glacie respondas la Juliano. »Sed la viaj — la plenumantoj de via volo — ne estis tiel sentemaj kaj delikataj kiel vi. Ili konis nur unu motivon por sia agado. Ne: kiel al Romo havigi la internan pacon —«

»Sed?«

»Sed: kiel liberiĝi el la ŝuldoj!« La maljunulo volas enparoli, sed la Juliano ne permesas. »Ĉu mi elnombru al vi centon da okazoj, kie estas ekstermitaj tutaj familioj nur, ĉar ili posedis riĉaĵon, nur, ĉar por viaj ekzekutistoj estis tie io por forrabi? Ĉu vi ne scias, ke multaj el viaj partianoj, kiuj antaŭ persekutoj dronis en la ŝuldoj ĝis super la kapo, hodiaŭ vivas bonstate kaj riĉule. Ĉu vere vi ne scias, ke en certaj rondoj viaj proskriboj estas ne alie nomataj ol, la granda ŝuldlikvido?«

Silento. Dorsĝibe sidas Sullo en la apogseĝo, kies larĝajn apogilojn spasme ĉirkaŭkaptis liaj fingroj. Sub la minace kuntiritaj brovoj liaj okuloj malice fajreras. Ŝajnas, ke li tuj saltkaptos la Julianon ĉe l' gorgo.

»Vi postulis de mi, diktatoro, sinceran respon-  
don. Mi ĝin donis.«

La vortoj falas en la silenton kiel akvogutoj en malplenon. La diktatoro sidas senmove kaj fikse rigard-  
kroĉiĝas al la Juliano, kiu trankvile kaj ekvilibre reo-  
kulas. Li ja scias, ke neniam ĝis nun tiom prete pendis  
super lia nuko la dangero. Forpasas minuto. Du. Tri.

Fine eksonas la voĉo. Kriaĉa, fajfosibla:

»Kaj — tio alia?«

»Kion vi aludas, diktatoro?«

»Vi ja donis al mi nur duonon de la respondo«  
insistas Sullo. »Mi demandis ankaŭ: kion serĉu Cezaro  
ĉe la Marianoj? Vi, sendube, ne kredas min konvin-  
kita, ke viaj rilatoj al tiu kanajlaro, al la popolpartio,  
ampleksis nur amaĵojn kun via edzino. Do, kion vi tie  
serĉis? Respondu!« Nereteneble elsaltas la lastaj vortoj.

Sed nun la Juliano respondas tiom surprize, ke  
la diktatoro dorsfale puŝiĝas:

»Ĉu mi hezitu karesi la azenon, kiu iam min  
portos?«

Denove silento. Sed ankaŭ malstreĉiĝo. Post iom  
da tempo elsaltas el la buŝo de la maljunulo, kvazaŭ  
akompane de la sufokata, gargara rido:

»Kiel do?«

Nur nun la Juliano mallevas sian trankvilan rigar-  
don. Zorge li observas la ungojn de la maldekstra ma-  
no, kuŝanta en lia sino — la dekstra mortpendas —  
kaj flegme klarigas:

»Mi bezonas la potencon, ho diktatoro, kaj mi  
volas ĝin ankaŭ akiri. La oficiala vojo estas barata de  
la profesiaj politikistoj, kiuj per la reciprokaj profitoj

plej intime interligiĝis. Tial mi havas en la antaŭvidebla tempo nenian ŝancon por levigi supren. Mi eĉ ne parolu pri tio, ke tiu ĉi vojo trudas al mi devojn, kiuj malhelpus min esti mastro de la propraj decidoj. Nu, ĝuste tial mi ekserĉis alian vojon kaj ĝin ankaŭ trovis ĉe la popolpartio. La du Marioj, la patro kaj la filo, mortis; Cinno, Fimbrio, Flakko, Norbano kaj ĉiuj ceteraj ankaŭ. Kiuj ankoraŭ vivas, timtremas antaŭ vi, kuraĝante apenaŭ spiri. Mi sola estas heredanto de la Maria tradicio: jen do — mia granda politika ŝanco! Nu, ĉu mi estu tiel stulta aŭ malkuraĝa por facilanime ĝin glitlasi el la manoj?«

»Kaj se mi tion ordonus al vi?«

»Tiuokaze mi obeus — kaj atendus.«

»Sed kion?«

»La okazon, pri kiu estas necerte nur: kiam ĝi alvenos.«

Sullo tute ne estas malagrabla tuŝita. Kiel adepto de la epikura kaj stoika skoloj, kiuj ambaŭ indiferekte konsideras la morton, li eĉ intime ĝojas pri la taktikulo, kiu tuj post la ĵus forpuŝita atako senhezite redonas la kontraŭfrapon. Preskaŭ kontente li demandas:

»Kaj kion vi intencas fari per la potenco, se vi sukcesos ĝin akiri?«

La Juliano pripensas. Poste li diras:

»Ĉu vi permesas kontraŭdemandon?«

»Nu?«

»Kiam vi ekmarŝis el Brundisio kontraŭ Romon, ĉu vi jam antaŭsciis, kion vi faros el la venkita ŝtato?«

La maljunulo sufokite subridas.

»Ne malbone,« aprobe li kapjesas. »Sed dum vi

mem ŝuldas la respondon, jen mi respondos al vi: fari ordon.«

»Ankaŭ mi volas nenion alian,« alĵetas la Juliano flegme.

»Tiel do. Al vi ŝajnas, ke la laboro de mi farita ne sufiĉas? Ĉu ankoraŭ por vi ne sufiĉe da sango?«

»Eĉ tro!« La okuloj de la junulo iĝas grandaj kaj profundaj. Lia voĉo tembras malhele: »Sed eble ne de la ĝustà. Vi faris ordon inter la malgrandaj dioj de la forumo; la grandajn en la *kurio* vi sentuŝe lasis. Hodiaŭ ili ankoraŭ dorskliniĝas, ĉar Jupitero tenas fulmojn en la mano. Sed kiam foje el tiu mano la fulmoj elfalos ili eĉ pli fiere fruntlevos ol antaŭe. Kaj tiam — ve al Romo!«

Sullo kaplevas kvazaŭ aŭskultante en la lastajn vortojn. Malrapide li demandas:

»Kaj de kio vi atendas la savon?«

»De la regado per forta viro.« Tranĉe li respondas, ĉiu vorto estas martelbato.

»Kaj se tia ne ekzistos?«

»Li ekzistos, kiam estos necese.«

Krepusko malleviĝas, fluidigas la realon, delikate araneaĵante objektojn kaj pensojn. Malrapide stariĝas Sullo, aliras la Julianon, kaj metante la manon sur lian frunton li puŝetas lian kapon posten. Profunde li ekrigardas en liajn okulojn. Longe, longe.

»Ĉu vi scias, kion mi diris al viaj parencoj, kiam ili venis por elpeti vian amnestion? Prenu do tiun junulon en la virinjupo; sed mi avertas vin: en li kaŝiĝas pli ol unu Mario!«



La dika, flava soriano spirkaptas por aero, vidante la diktatoron kaj la iaman proskribiton ŝultro-ĉe-ŝultro eliri el la kabineto. Li faras la movon por sin ĵeti teren, sed fakte nur genufleksas, kiom profunde li povas.

Sullo akompanas sian gaston ĝis la elirejo de la atrio. Tie li haltas kaj salute braklevas:

»*Vale, Caesar!*«



## Du girlandoj

La juna roma sendito honore sidas dekstre de la reĝo. La vasta greka vestaĵo laŭas iom strange la malgrasajn, muskolajn membrojn de la junulo. Strange konvenas ankaŭ la krono el la plenfloraj, brilkoloraj rozoj, al la mallarĝa, serioza vizaĝo, kies grandaj okuloj akre kaj flegme ĉirkaŭprenas ĉiujn personojn kaj ĉiujn objektojn en la vasta kolontenata salonego.

Tutforte penas reĝo Nikomedo plaĉi al sia gasto. Per riĉa festeno, kies elektitajn manĝaĵojn admiras eĉ la tro dorlotitaj aziaj-grekaj gastronomoj, komenciĝis la vespero. Nun, post kiam la tabloj estas nudigitaj, la kelestro alportas la plej bonajn vinojn: la *kipran*, la *kiean*, la *tenedan* kaj ankaŭ la plej valoran, pli ol centjaran *lesbian*, kiu skarlate ruĝa kaj sirope densa fajreras el la kruĉoj. Tiom dolĉa ĝi estas, ke post ĝi oni sentas guston nek de konfitaĵo nek de rozfolioj. Per tiu ĉi lesbiaĵo tostas la reĝo sian gaston: komenante per la glora batalo ĉe Zamo, kiam tiu vino estis elpremata, li emfazas la meritplenan partoprenon de la praulo de sia gasto, pretoro Seksto Julio Cezaro. La reĝo estas tre bone informita pri la historio de Romo, same ankaŭ pri la gento juliana kaj nun elmontras sian scion por honori la gaston. Per delikata parolturno li akcentas, ke la plej juna Juliano prave portas nenion

el la laŭnombraj nomoj kiel: Kvinto, Seksto, Decimo. Ĉar, se oni taksus laŭ la reputacio kaj valoro, li devus esti nomata *Primo*: la Unua.

»Permesu, do, ke mi montru,« finas la reĝo sian oratorajon, komponitan el la plej subtile facetitaj *jon*iaj frazoj, »al nia karega gasto, al mia, se permesate diri, amata amiko Kajo Cezaro lian *prognostikonon*. Mi vidas —« la oratoro lerte modulas sian voĉon en la solenan tonon de la aŭgurantaj pastroj — »la estontecon, kiam la potenca Romo, tiu reĝino de l' mondo, sindone kuŝos ĉe liaj piedoj; mi vidas la epokon de la plej admirinda disfloriĝo, la epokon plenan de ĉiaj bonaĵoj, kiujn disŝutas lia senlime donacema mano. Sed mi vidas eĉ pli foren, ĝis la plej malproksimaj tempoj, kiam nekonataj popoloj transprenos nian heredaĵon: ankaŭ ili pridankos tiun, kiu hodiaŭ estas en nia mezo. Jes, ĝuste Cezaro estas la granda nomo, kiu signifos ilian idealon kaj samtempe la gvidstelon! Por ke vere plenumiĝu tiu aŭguraĵo ni nun trinku! *Quod bonum, faustum, felix fortunatumque sit!*« La lastan frazon diras la oratoro latine. Malglataj, iom malmolaj vortoj glitas pli ol flue kaj elaste de lia fleksebla lango.

La gasto scias, ke tio estas nur retorikaĵo, nur bombastoj laŭ la greka maniero, sub kiuj oni ne serĉu la enhavon; kaj tamen li sentas sin strange kortuŝata. Malforta ruĝiĝo ekpentras liajn sunbrunajn vangojn, kiam li responde tintigas sian kruĉon al tiu de la reĝo.

La reĝo jam kliniĝas al li:

»Plenumu al mi la deziron,« li komplezas, »volu konservi tiun ĉi kruĉaĉon, el kiu vi trinkas, kiel etan donaĉon por rememori pri tiu ĉi tago«.

La Juliano alokulas la pezan, luksan vazon el

masiva, pura oro, inkrustitan per multnombraj juveloj. Liaj vangoj eĉ pli ekruĝas.

»Ho, reĝo«, li respondas »estas tro afable. Vi superŝutas min per donacoj. Antaŭtagmeze la belegan statueton el eburo —«

Nikomedo lin interrompas.

»Eĉ ne vorton plu, se vi ne volas min ofendi! La feliĉon, ke en vi mi gajnis amikon, mi pagus ne tro kare eĉ per mia tuta havaĵo!«

La Juliano senvorte riverencas. La parolmaniero de la reĝo resobrigas lin, sed ankaŭ logas. Ornamspiraloj de la reĝaj frazoj volviĝas tro alten: sed la kompono estas senriproĉa. Oni devus kompromisi inter tiu ĉi flor-abundo kaj la seka realemo de la romaj oratoroj. Ĉu ~~tamen~~ ne estus bone viziti la oratorajn kursojn ĉe Milono sur Rodo, post kiam estos solvitaj la aferoj en Azio?

Dolĉa tono eltiras la junulon el la pensoj. En la salono, rekte kvazaŭ arkaika distatuo, staras juna knabino kun dufluto surlipe kaj blovetas.

Ŝi komencas temon, sendube popolkanton. Longtrene, kresĉende el la plej mallaŭta forsonoro ĝis mezforto, tiam denove elspirante, flirtas la melankoliaj tonoj tra l' salono, kiun ekregis tomba silento.

Nun variacio. La plenda ario malrapide viviĝas, triletante kaj module ĝi disŝprucas; kaj jen, kunkune, jam la alia, alda, tubeto en nelongaj, malkuraĝe tintantaj kadencoj. Ŝajne tra l' herbejo ekpetolis infano... Riproĉete kaj brakĉase ĝin postkuras vartistino... Hu, ŝi ne kaptos ĝin . . .

Sed baldaŭ forperdiĝas la unuaj tonoj kaj triloj. En energiaj taktoj torentas la melodio sian plenan forton, dume ĝin araneaĵe vualas kursonoroj kaj kol-

oraturaj. Tiu kanto sopiras kaj pretendas ion, kio nerifuzeble frapetas sur la koron de l' aŭskultanto kaj tentas ĝin malfermiĝi, doni sin en la pasiajn tonojn.

Nur nun la artistino montras sian tutan talenton: ambaŭ tubetoj kaptas la saman temon kaj pilklude ĝin jen reciprokas, jen kuntintigas kaj denove lasas forflugi. Ĉu ne swingiĝas amparo en rondo, plektante sennombrajn figuretojn? Fine ambaŭ tubetoj perfekte ekakordas la melodion, kiu dutinte disperlas en sennombrajn kursonorojn, trilojn kaj koloraturajn.

Refoje kaptas la flutistino tiun temon; la aldtubeto blovas ĝin trankvile, trene, kvazaŭ dormema maljunulo. La soprano ĉirkaŭtentas la kunulinon, ŝajnas, ke spirete, spirete ĝi flustras al ŝi la rememorojn; vane ja: pli kaj pli mallaŭtiĝas la tonoj de l' gvida instrumento kaj fine formortas.

En la ĉiam noveksplodaj aplaŭdoj la flutistino riverencas, malaperas.

La Juliano tion ne rimarkis: nekonata sento sufokegas lian bruston, korpreme kaj tamen feliĉige. Ĝis nun li havis malmulte da tempo por sin doni al sopiro; sed nun, eĉ ne sciante pri tio, li eksentas dublan sopiron, kiu tute trankviligas lian nervostreĉon.

Denove ekregis silento. En la salonon eniris maljunulo, kun okuloj plenaj de akra inteligento, sed tamen iel nebulaj. Nikomedo kliniĝas al sia gasto: »Jen mia plej bona improvizisto« li klarigas ridete. »Nun rigardu!«

La poeto profunde riverencas.

»La reĝo ordonas?« li humilas demande.

»Verku poemon pri la gasto,« respondas la reĝo

La maljunulo preterfluge alrigardas Cezaron kaj denove riverencas.

»Kia-verse? Heksametre? Distike? Alkmene, antiloke?

»En la saffaj strofoj« ordonas Nikomedo. La poeto repaŝas, por momento mallevas la palpebrojn, poste alokulas la salonplafonon kaj komencas:

»Venis ĉevalkvar' de Helio teren?  
 Ĉu glitfalis stel' de l' ĉielo alta?  
 Aŭ ĝi estas ben' de l' favora Dio,  
 Nin vizitanta?«

La Juliano, kiun jam ektedis la troaj flatincensoj, ne plu aŭskultas la ritmon preterglite ruliĝantan. La glataj verstintoj, el kiuj foje-foje raketas fajrero de sprito, ekŝajnas al li nedefineble unutonaj kaj dormigaj. Per la dekstra mano li subapogas la pezan kapon, per la maldekstra ekfrotas la okulojn dormopreme fermiĝemajn.

Tion rimarkas la reĝo.

»Vi estas malkontenta« li konstatas. »Ankaŭ prave: estas mizere kaj malinde je vi. Oni skurĝu tiun fuŝulon!«

Cezaro okullevas. Mirigita, malagrabla surprizita.

»Kial?« li demandas. »Tiu ĉi homo donis sian plejbonon. Nur ja — tiu tuta glorado —« li jam rimarkas sulkon inter la brovoj de l' reĝo kaj pli vigle aldonas: »mi petas vin, venku la koleron. Kulpas nur mi.«

Nikomedo ridetas sian molan, grekan rideton.

»Nu bone; ĉar vi deziras, estu pardonite al li. Sed li ne plu nin ĝenu. — For!« li krias por haltigi la versotorenton.

La maljunulo vortrompas, rimarkas la minacajn okulojn de l' reĝo kaj ekrapidas por senbrue malaperi.

»Verŝajne mi estas jam tro laca,« la Juliano denove defendas la malfeliĉulon. »Permesu do al mi retiriĝi!«

La reĝo, jam denove bonhumora, rideksplodas.

»Hu, kion vi imagas? Nun ja venos miaj dancistinoj!«

Inter la altaj tripiedoj kun flamoj de aromaj lignetoj sklavoĵ zigzagis ŝutante pulvoron en la pelvetojn. La flamoj endronas, vastiĝas peza bonodoro. La salono plimallumiĝas.

Ekspiretas muziko sur kordoj, karesas la orelojn, mildigas la lacajn sentorganojn. Jen, el la krepusko kurpaŝete alflugas blankaj ombretoj, poste jam pli klare brilas tra l' mallumo: ses nudaj knabinkorpoj.

Ili venas unuvico, rigardante rekte antaŭ sin kun maske rigida rideto. Kvin paŝojn antaŭ la sofoj de la reĝo kaj Juliano ili haltfiksiĝas kaj unusvinge velkas teren, alklinante la fruntojn ĝis la mozaiko en la ŝtonplanko. Tiam denove ili resaltas kaj ekdancas la rondojn.

Komence malrapide, vindante sin en arte implikajn figuraĵojn — jen kuniĝe, jen disiĝe — en ĉirkaŭturnoj kaj paŝjongloj, ili elmontras la flekseblajn korpojn. Estas ĝi senĉesa kuniĝo kaj disiĝo, kiuj forkaŝante la detalojn prezentas al la okulo nur alfluan-refluan luliĝon kaj ondadon.

Jen subite la spireta melodio fortiĝas, ekpasias. Pli kaj pli rapide turniĝas la dancistinoj, glitante kun serpente glataj fleksiĝoj unu preter la alia; du kaj du sin kaptas ĉe l' manoj kaj fulme kirliĝas ĉirkaŭen. La juveloj, la perloj tintetas mallaŭte, disflirtas jam kriete incitetoj.

La servistoj zigzagis de tripiedo al tripiedo, riĉe

ŝutante narkotan pulvoron en la tremetantajn flamojn. Plivastiĝas mallumo kaj prema parfumo.

Ĉiam pli sovaĝas la muziko, ĉiam pli ekstazas la movoj de la dancistinoj. Nun ĝi ne plu estas luliĝo, ankaŭ ne glito: en freneza kirliĝo tumultas la danco plue, ĉiam pli senbride, ĉiam pli volupte. Nun turniĝas ĉiuj jen manĉene, sesope, en furioza rapido, jen mandelase, ĉiu ĉirkaŭ si mem. Vualoj kaj florgirlandoj flirtas alten kiel strangaj flamoj; pli laŭte eksonas la aklamoj; en la aromon de l' pulvoro miksiĝas odoro de ardaĵ korpoj.

La Juliano kvazaŭ estus songvida. Nur elfore, ŝajne tra vualo li vidas, kio ĉirkaŭe okazas. La muziko, la bonodoro, la rigardo al la dancistinoj, elŝiris lin el lia kutima trankvilo kaj sindeteno, rabinte lian animan ekvilibron. Li rezistas kontraŭ si mem, li volas reakiri, kion li perdis, sed iel mankas al li la forto. La koro bategas ĝis kreviĝo, la brusto ne povas ensorbi sufiĉan spiraeron, dolĉa-dolora paralizo distordas la cerbon, nerimarkeble dismolligas la volpovon. Li vidas la nigrajn okulojn de l' reĝo mistere boriĝi en la liajn, li volus paroli, sed ne povas, li volus stariĝi, sed neniu membro mov-obeas.

Jam tute mallume. Nur tie kaj tie flagretas ekŝpruce blua, verda flameto, poste tuj revelkas. La tuta salono iĝis ununura bonodoro.

Subite ekpluvas rozoj. Komence gut-gute, kiel dikaj pluveroj antaŭ la fulmotondro, poste pli riĉ-nombre kaj fine en senĉesa, densa torento. Jam la salono, la tabloj, la sofoj estas pieddike kovritaj de rozoj. El la florpluvo teksiĝas antaŭ la paroksisma dancado viva, ĉiam varianta kurteno kaj la briletantaj korpoj apenaŭ distingiĝas.

Pli proksimiĝas la dancistinoj, kaj ĉirkaŭringante la kuŝantojn, ili serpentas inter la tabloj kaj sof-oj. Nur por sekundo ekvidas Cezaro nudan knabin-mamon tuj ĉe sia pupilo, sed la sorĉa ŝajnaĵo jam malaperis. Post momento ĝi jam alŝoviĝas el alia flanko, denove malaperas, montriĝas ankaŭ triafoje, ĉirkaŭŝvebante la kuŝanton en pli kaj pli mallarĝaj rondoj. Preskaŭ helpopete ekrigardas la junulo transen al la reĝo. Tiu ĉi subite ekbrakas kaj kaptante unu el la knabinoj altiras ŝin al si sur la kuŝejon. Mal-laŭta kvermurmuro, ŝajne de kolombo vekita el son-ĝo, kaj tiam dronas en la purpuran mallumon ĉio vidita . . .

Kaj denove tiu nuda dancistino. Nun ŝi restas tute proksime, alkliniĝas super la Julianon kaj disbrakante enboras siajn aziajn flamokulojn en la liajn. Pli kaj pli ŝi kliniĝas super lia vizaĝo, la odora buŝo ekŝvebas super la lia, alspiretas ĝin glue, jam alsorbiĝante en senfina kiso. Du manoj ekkaresas lian frunton, liajn tempiojn, lian kolon, lian bruston — kaj tiam disbrula korpo febre rulfalas sur lin.

Estingiĝas la lasta tremflameto.

---

Kuzo Kotto havas hejme figureton el nekonata laktoŝtono, kiun multekoste trudis al li hebrea antikvaĵisto. Laŭdire ĝi devenas el Seriko kaj prezentas strangan estaĵon: fantazie vestitan viron, kiu sovaĝe braksvingas kun rikana vizaĝo kaj elruliĝintaj malbonaj okuloj. Kotto ĝin stilguste starigis sur belege broditan ŝtofon, same el Seriko. Kaj nun li faras grandan bruon pro nenio, same kiel ankaŭ pro la malgranda hinda statuo de viro, sidanta sur malfermita florkaliko. Li ĝin nomas Budho.



Pri tiu ĉi serika sovaĝulo Cezaro senĉese pensas, dum la komandanto, *propretoro* Marko Municio Termo, sapumas al li la okulojn. La maljunulo pasiginta la duonon de sia vivo en tendaroj tra la plej diversaj landoj, nun furiozas kaj verŝas en siajn vortojn la tutan galon. De tempo al tempo li ekpaŭzas por ricevi la spiron, poste denove li daŭrigas kun duobla furiozo.

»Ĉu tial mi konfidis al vi tiun ĉi mision,« li krias, »ke vi rulbaraktu kun aziaj malĉastulinetoj sur la silkaj kusenoj? Ĉu tiel do oni plenumas la ordonojn? Dum nin ĉi tie ĝisgorgas koto, la sinjoreto lasas sin nutri per grasigitaj anseroj kaj egiptaj frandaĵoj kvazaŭ hundeto de publikulino! Kaj krome li ignoras ĉiun ordonon por reveni! Eĉ hodiaŭ vi estus ĉe tiu prostituita kortego, se Flavio ne venus por vin forkonduki. Kun la plej granda plezuro mi starigus vin antaŭ la militan tribunalon!«

Li buŝkaptas por aero kaj reĵetas la forglitintan togopinton trans la ŝultron. Poste li daŭrigas:

»Kiu diablo ja instigis vin, ke vi vin anoncu ĝuste al mia ekspedicio? Ĉu ne estas sufiĉe da militestroj, kiuj tiel militas, kiel vi ĝin prezentis al vi? Kiuj zorgas, ke al la sinjoroj-volontuloj ne manku vino kaj virinaĉoj! Ĉe mi tio ne ekzistas, karuleto! Mi kapablas klarigi al la junaj sinjoroj, ke la militarto estas diable serioza afero, ĉe kiu oni povas akiri nur vundojn kaj pedikojn! Ankaŭ vi, karuleto, tion ellernos! Mi ne devigis vin veni kun mi, sed ĉar vi ja estas ĉi tie, vi devas ankaŭ sperti, kion signifas militi sub Marko Termo!«

Denove spirpaŭzo. Furioze li kolerblovas kaj pluinsistas:

»En mia tendaro mi ne toleras kakkubojn, kom-

prenite?« La ŝvelvortoj ŝajne lin sensarĝigis. Pli trankvile, kvankam ankoraŭ sufiĉe furioze, li finas (Fine!-ekpensas la Juliano):

»Mitileno estas atakmatura. Morgaŭ matene je la kvina ni ekfrapos. Tuj anoncu vin ĉe *tribuno Materno* kiel komandanto de la ataktaĉmento. Aŭ vi montros morgaŭ, ke vi ion valoras, aŭ diablo vin prenu. Tiuokaze nenia domaĝo pri vi! — For!« La lastan vorton li eltrumpetas kiel incitita militefanto. La Juliano brakleve salutas klopodante plej rapide malaperi.

---

Danĝere siblante turniĝas en la aero la ŝtonoj de la sieĝmaŝinoj kaj krakante disŝprucas kontraŭ la urbomurojn. La kabanetaj mur-rompiloj, kvazaŭ sang-soifaj hirudoj, jam engluiĝis al la larĝaj ŝtonblokoj. Laŭ la taktaj ordonkrioj ĵetiĝas la detruiloj jen antaŭen, jen malantaŭen, ĉiupuŝe plitremigante la strukturajon. Samalte kun la murdentoj balanciĝas la sieĝturo, ruliĝante sur cilindroj laŭ la improvizita digo kontraŭ la urbon. Ĝi estas tute envolvita per akvogutaj ledajoj, ŝirmantaj kontraŭ flamsagoj kaj peĉ-girlandoj. La ŝtonĵetilstoj kaj pafarkistoj senĉese pafante kaŭras post ĝia brustŝirmilo, dum interne atendas la legianoj sian vicon. La tranĉeoj estas jam fositaj ĝis la »mortangulo«: en ĉiuj svarmegas kurtaĉmentoj, atendente la ordonon por eksalto.

Malespere defendas sin la sieĝatoj. Post ĉiu pafofendo embuskas elektitaj pafistoj. Sufiĉas, ke aperu nur manpeco da korpo por esti trafita. Sian plej grandan atenton ili dediĉas al la turo, kiun oni ekatakis el du flankoj. Dume sur la kabanetajn murrompil-

ojn kraktondras ŝtonblokoj. Unu el la rompiloj estas jam difektita kaj for el la batalo; en la tegmento de la alia oscedas vasta truego, tra kiu senĉese pluvegas brulaj ŝtupoj, pajlogarboj, ĉifonoj, bolantaj akvo, oleo kaj plumbo. Ĉe unu flanko tordiĝas el la kabaneto longa hokego kaj, kroĉigante al la murdento, ĝin rompas. Jam ĉasmaŝo kaptis la hokegon kaj dum surdiga kriego levas aeren. Sur ĝi ekbaraktas pende du legianoj, post momenteto du sag-erinacoj.

Cezaro saltas el sia arbetejo kaŝita observejo en la tranĉeon kaj ĉirkaŭrigardas. Lia taĉmento, kuŝante surfunde de la tranĉeo, indifereinte lin rigardas. En la okuloj de multaj li legas senkaŝan mokon: la ornamita volontulo en la freŝe nova uniformo ne imponas al la barbaraj, ĉifonaj bataluloj. Unu el ili ŝovas la manon sub la ledveŝton, enpense palpserĉas kaj fine metas ion sur la ungon de la maldekstra dikfingro. Kaj persiste rigardante en la vizaĝon de la junulo per la dekstra mano li tion dispremas. La ceteraj apenaŭ povas kaŝi la eksplodeman rikanon.

»Vi povis vin ja pli frue purigi!« furiozas la Juliano.

»Mi ne havis okazon,« spitemas la militisto.  
»Miaj sklavoj bezonis multe da tempo por bonodorigi la bankuvon kaj tiam estis jam tro malfrue.«

Kelkaj ridternas. La junulo sentas, ke lia reputacio pendolas sur rompebla hareto. Li jam ekflamiĝas, tamen subite sin detenas. Al tiu oni devas ekzempli, li pensas. Sed tute flegme, aŭ alie ĉio perdita!

Malrapide li alpaŝas tute ĝis antaŭ la homo.

»Leviĝu,« li diras danĝere mallaŭte, »kiam vi parolas kun via superulo.«

La homo kontraŭvole obeas. Sed apenaŭ li star-

iĝas jam pugnobato sub la makzelon ĵetas lian kaskon de sur la kapo kaj lin mem al la tranĉea muro.

»Nun vi ja scios,« diras la Juliano tiel trankvile kiel ĵus antaŭe, »kiel konduti rilate min!« Tomba silento. La junulo ĉirkaŭrigardas kaj daŭrigas, ankaŭ ĉiam egalé trankvila, preskaŭ indiferenta: »Poste vi povas puŝi lancon en mian dorson, vi malbravulaĉoj, sed vizaĝ-al-vizaĝe vi ne plu risku aroganti!«

Ankoraŭ ĉiam tomba silento. La okuloj de la Juliano ĉirkaŭkuras. Ĉiuj faligas la rigardon: la sovaĝaj bestoj estas katenitaj.

Tra la tranĉeo alkuras spirblove oficiro.

»Tuj ĝi komenciĝos« li stertoras voĉmanke. »Via direkto estas la bastiono, tie duondekstre.« Senspire li fortrotas antaŭen.

Cezaro subite eksentas sian koron frapi ĝis en la gorgo, dum ĉe la stomako ekpezis malfortemo. Unuan fojon ĉe la fronto, li pensas. Mildiabloj! Nur oni ne lasu rimarki. Ĉu mi palas? turmentas lin.

»Batalprete!« li komandas kun altrudita trankvil-ego.

La vojo, de la tranĉeofino ĝis la muro, estas ne-longa: apenaŭ kvindek paŝoj. Sed ĝi gvidas tra hajlego da sagoj kaj plumbo. Antaŭ ol la taĉmento atingas la celon, falas preskaŭ triono. La kromrestintoj nun premiĝas al la muro, libere ekspirante.

La Juliano orientiĝas. Dekstre kaj maldekstre de li estas aliaj kurtaĉmentoj, kiuj antaŭ la decidiga atako ankoraŭ iom ripozas. Ĉie, okul-atinge, li vidas febre brilajn okulojn, forte kunpremitajn aŭ mordatajn lipojn, mienojn, kiuj malrapide senformiĝas pro la pene regata ekscitiĝo.

Signalo — longe, rulsonore.

»Ek!«

La sekvaj minutoj ŝajnas al la junulo kvazaŭ haosa febrefantazio. Li vidas sin mem: grimpi sur ŝtuptegmentojn el ŝildoj, svingsalti sur la murkronon kaj, jen, subite li jam mezras en la plej furioza tumulto. Antaŭ li aperas vizaĝo kun elruliĝintaj okuloj. Per la glavklingo li frapas sur ĝin! Inter du kirasringoj li ekvidas fendeton kaj enpuŝas sian glavon, nekonsciante kion li faras. Unuafoje en li vivo la eksentas tiun teruran cedemon de la karno sub klingo en la mano — la molan ekpezigon de la trafita korpo, tiranta la brakon teren, kvazaŭ bulaĵo glitus de la klingo. Super lia kapo jam ekfulmas glavo, ŝvebante momenton super li sed ne surfalas. La ĉirkaŭkaptaj fingroj subite en konvulsia ekstremo rigidigas.

Tiam abrupte ekregas silento en li kaj ĉirkaŭ li. La malamikoj komencas retiriĝi kaj forcedi la muroringon. Nur kvin-seks ankoraŭ rezistas, alfuriozante iun legianon. La Juliano lin tuj rekonas: estas tiu pedikĉasinto. La legiano jam terenfalas, lastaforte li ŝovas antaŭ sin la ŝildon, kiun post momento kaptas kaj forrabas furiozaj manoj. Unusalte Cezaro alapudas, ŝirme diskurante super li. La unuan atakanton li batas ŝildrande sur la korpon, ke tiu trafite forruliĝas, al la alia li enpuŝas klingon en la ventron. Jen, kiel tiu, en kies kolo subite pikfiksiĝas lanco, malaperas kvazaŭ forblovite.

Kaj tiam ĉirkaŭ li nur kamaradoj. Ŝanceliĝe li retiriĝas. Ĉie nur brilaj okuloj, manoj, kiuj preme skuas la liajn. Penege leviĝas la falinto, sanglipe li balbutas kelkajn vortojn de danko. Liaj hundfidelaj okuloj senĉese rigardas nur la Julianon. El

ĉiuj flankoj trumpetsignaloj. Distondra eĥo de l' ak-lamoj: Mitileno estas konkerita.

---

Sur la *agoro* staras trupoj en maldensa karoo-vico. Meze Marko Minucio Termo, apud li la ad-jutanto, kiu nomvokas laŭ la listo.

»Volontulo Kajo Cezaro!« La Juliano elpaŝas antaŭen kaj haltas antaŭ la militestro. Tiu ĉi lin ok-ulas de la kapo ĝis la kalkanoj kaj mangestas post sin.

»Jen la civitana girlando pro savo de kamarado el mortdangero,« li diras murmure. En lia mano estas girlando el kverkfolioj. Per mallerta gesto li ĝin fiksas sur la kaskon de la Juliano.

»Diablulo vi estas!« li ne diras ion plian, sed Cezaro scias, kion signifas tia laŭdo el la buŝo de Termo.

## Unua renkonto

La posttagmezo estas varma kaj suna; tial la gastoj kolektiĝis en la ĝardeno, senĝene komfortante sur la ŝtonbenkoj, alportitaj seĝoj kaj sidiloj, kelkaj eĉ sur herbo. Ĝoje oni babilas, sen kio ne povas ekzisti vera societemo.

Ridete observas Cezaro la multkoloran bildon. Li aranĝas tre atente faldon sur la togo, kiu al li ne ŝajnas sufiĉe eleganta kaj poste li iras al la domestrino.

Tiu ĉi estas en agema moviĝado: senlace ŝi kuretas ĉirkaŭen. Jen ĉi tie ŝi interkonatigas du gastojn, jen tie instigas al manĝpreno — la granda ŝtontablo estas plenplena de sennombraj frandaĵoj — kaj pretere ŝi reciprokas komplezan, afablan vorton al amikino aŭ gasto.

Nun ŝi rimarkis ankaŭ la Julianon kaj ekrapidas al li kun malfermitaj brakoj.

»Hola Cezaro!« ŝi krias kun troema koreco. »Tamen vi venis! Mi ja pensis, ke vi forgesis!«

Ridetante li kliniĝas super la malgranda, diketa mano.

»Via suspekto ĉagrenas,« li respondas. »Eĉ duoble min ĉagrenas.« Poste li sekvas ŝin, tirite de ŝi, al la aliaj gastoj, tuj okupantaj lin de ĉiuj flankoj.

Lia misio en Azio — sed precipe la ĉeesto ĉe

Nikomedo — havigis al li brilan pozicion en la aristokrataro de Romo. Estas ja ne unuafoje, ke ĉiuj lin ĉirkaŭkuras gratulŝute, demandante senfine pri la detaloj: plej multe da detaloj! Kaj li volonte ilin donas, miksante veron kun falsajo. Nur por ricevi trankvilon li verŝas fluegon da sensacioj en la nesatigeblan faŭkon de l' sciavido, elŝpinante rakonton, kian eĉ la plej lerta verkisto ne povus pli bone kaj pli spirithaltige komponi.

Fine forpasas la unua, la plej forta atako. La sciaviduloj disariĝas satigite. Ŝarĝitaj per fremda enhavo ili revenas al propraj klaĉaĵoj. Cezaro facile liberiĝas de kelkaj plej altrudiĝemaj kaj lasante for la vesposvarmon strategie retiriĝas al la flanke staranta tablo, kie hazarde regas kvieto.

La pulĉinela ĉefrolo lin ĝenas. Tiu senfina gratulado pro liaj militistaj sukcesoj kaj precipe pro la orden-ricevo antaŭ Mitileno estas jam tedegaj. Same ankaŭ pinĉdemandoj pri la travivaĵoj ĉe la kortego de Bitinio, pri kiuj ŝajne vastiĝas malicaj klaĉoj.

Sed jen: homo staras ĉe la ŝtontablo. Tro malfrue rimarkas lin la Juliano. Nun li devas premi la aletenditan manon.

»Saluton, Cezaro!«

»Saluton, Katilino!«

Tamen, malgraŭ ĉio restis iom da antikva, magia rasbelego en la fordiboĉitaj vangoj de la Sergiano. Ankaŭ tio malaperas, ĉar jen, lia buŝo grimacetas ridon por afabli.

»Longe ni ne intervidiĝis, ho Cezaro!«

»Jes, longe,« senpense ripetas Cezaro.

»De post la rekontiĝo ĉe la marĉoj, ŝajnas al mi,« daŭrigas Katilino.



Cezaro kapjesas. Jam enfosiĝis sulketo sur lia frunto. Tiu Sergiano ne estas ja tro takta, rememorigante pri la ŝuldata danko.

»Sed kun Sullo vi interpacigiĝis?«

»Jes — proksimume«. Cezaro ekrigardis junan, al li nekonatan, virinon, kiu interparolis kun Sempronia, la edzino de Decimo Bruto. Jam antaŭe li rimarkis ŝiajn okulojn.

»Kaj nun en Azio vi akiris laŭrojn?«

»Nur kverkfoliojn«.

Grandaj demandaj okuloj tio estas, kies fundon li ne povas travidi, ĉar la delikata vualo nebulas ilian profundon kaj tamen — aŭ eble ĝuste tial? — ili havas por li ian apartan ĉarmon.

Katilino sekvas la rigardon de la Juliano. Eksonas lia senespera, mallaŭta rido.

»Ne penu vane, ho Cezaro! Onidire ŝi estas virta.«

»Mi havas neniajn intencojn«, respondas la Juliano malpli varme ol li mem volis.

Malrapide kuntiras Katilino la delikatajn, apatiajn lipojn.

»Jes, vere,« li kapjesas, »vi jam estas katenita. Ĉu ankoraŭ ekzistas viaj rilatoj kun Lolia?«

Eĉ okultreme ne montras Cezaro la malagrablan surprizon.

»Eh, ĉu ekzistis iaj rilatoj?« li respondas kun trankvila ironio. »Al mi ĝi estas novaĵo.«

Esplora alrigardo, tiam denove cinika subridado.

»Kara amiko,« diras la Sergiano, »oni vidas, ke vi en Azio malkutimiĝis al tiu ĉi malnova klaĉnesto. Cetere, vian laŭdindan diskretemon ne partoprenas eĉ

unu el viaj intimulinoj: vi nun estas heroo de l' tago kaj Lolia ĝuege pendas, kun vi en ĉies buŝo, kiel antaŭe ankaŭ Postumia.«

Denove elsaltas sulketo inter la brovoj. Sendube Cezaro tre malfacile konservas la serenon kaj trankvilan maskon.

»Vi kontraŭdiras vin mem« li iom malpacienas. »Nek Sulpicio, nek Sabinio estas tiaj edzoj, kiuj tolerus ion similan.«

»Vere vi estiĝis provinculo,« konstatas Katilino kun favora kompatemo. »Eĉ unu edzo ne estas en Romo, kiun ekscitus la malfideleco de edzino. Nu, vi mem havos okazon por miregi! Restu ja nur kelkajn semajnojn ĉi tie!«

La Juliano ne respondas: kun subita intereso liaj rigardoj ekakompanas la domestron, kiu ĵus eniris kaj salutante iras de gasto al gasto. La grasa, zorgoplena vizaĝo de l' bankiero aŝiŝas rigidan rideton.

»Jen urso en la komedio« sarkasmas Katilino. »Sen sia riĉo Krasso neniam akirus la belan Tertulian.«

Nun rulas la granda financisto sian korpulentan korpon al ili. Dum saluto al Katilino en lia vizaĝo ankoraŭ frostas rideto, sed turne al Cezaro ĝi tuj forviŝiĝas, la apatia vizaĝo iĝas atenta kaj streĉita.

»Cezaro,« li diras sen enkonduko, »mi tralegis vian planon kaj mi tre interesiĝas pri la afero. Venu por momento kun mi.« Li subbrakas Cezaron tirante lin flanken. Ludante en granda distro per la faldoj de la Cezara togo, li komencas: »Do, vi kredas vin kapabla por reformi tiun ĉi Romon?«

»Ne« seke respondas Cezaro. »Mi pensas, ke la decido pri la roma problemo tute ne povas esti farita en Romo mem.«

Kun miro lin strab-okulas Krasso.

»Sed, kie do?« li spirblovas.

La junulo mane duoncirklas.

»Ie inter Hispanio kaj Azio. Ĉie, nur ne en Romo. La Respubliko, kia ĝi nun estas, transvivis sian ekzist-orajton.

»Parolu pli klare.«

»Ni havas ankoraŭ tiun saman konstitucion, kiun Romo akceptis post la falo de l' reĝoj: tiun de la *Polis*, de la urbcivito, laŭ la modelo de Ateno, Sparto, Korinto. Sed dum jarcentoj ĉirkaŭ nia Romo amasiĝis komplekso de landoj, kiuj praktike estas senrajtaj. Tial okazas, ke la ĉi tie hejmanta kanajlaro, kiu vivas nur per balotkoruptoj, fakte decidas pri la sorto de tutaj altkulturaj kontinentoj.«

»Vere ja«, murmuris Krasso. »Sed, kion vi volas entrepreni kontraŭ tio?«

»Mi volas helpi la romian ŝtaton demeti la veston, kiu iĝis tro malvasta kaj survesti pli larĝan.«

»Praktike: vi volas malcentralizon?«

»Jes, malcentralizon,« kapaprobis Cezaro. »Ĉio, kio hodiaŭ ne apartenas al Rom-urbo mem, estas ĝia ekspluatado. Tio estas eĉ malpli bona ol malmorala: tio estas malekonomia. Se oni interesigos por Romo la subjugitan terrondon, propravole ĝi restos fidela. Kaj tute alie ĝi klopodos por la ĝenerala bonstato ol hodiaŭ sub la skurĝo de ekspluatantaj guberniestroj kaj monavidaj impostistoj. Sed tian intereson ĉiu havas nur tie, kie ankaŭ li mem povas kundecidadi. Jen kial diras mia postulo: penetru la spirito de Romo niajn provincojn — kaj poste oni donu plenan aŭtonomion en la kadro de ŝtata unueco.«

»Se nun vin aŭdus iu el la senato!«, subridetas

Krasso. »Tamen estas iom da vero en viaj ideoj. Nu, ĉu vi pripensis, al kiaj malhelpoj puŝiĝus la realigo?»

»Mi scias,« diras trankvilege Cezaro, »ke kontraŭ mi estos la tuta senato. Same ankaŭ la tuta plebo, kiun mi senigos de ĝiaj senpene akirataj subvencioj de senlaboreco.«

»Kaj vin ne timigas la sorto de la Grakhoj?»

»Pompejo montris al ni, kiel oni povas kapti la senaton ĉe l' gorgo. Ĉu vi kredas, ke li gajnis la hispanan militon malgraŭ siaj multegaj ŝancoj, se li, venkinte Lepidon, eksigis laŭordone sian militistaron?»

»Vi nepre devas viziti Pompejon« kaptas Krasso tiun penson:

»Kun li ni devas esti en bona rilato. Pompejo prezentas hodiaŭ konsiderindan povon. Li estas, vere, fiera malsaĝulo, kion neniu scias pli bone ol li mem. Mi ja satĝuis lin dum la sklaboribelo —«

»Sed kiel taktikulo li estas vere brila« alĵetas Cezaro vive. »La plej bona armeestro kiun entute ni havas. Mi pristudis lian marŝon tra Piceno — nu, majstraĵo!«

Kun favora rideto Krasso alrigardas la junulon.

»Pri kio vi ja ne okupiĝas, ho mia eta Cezaro!« li diras laŭde. »Nun vi studas eĉ la historion de militoj.«

Ankaŭ Cezaro ekridas.

»Neniam oni scias, kiam io estos necesa,« ĝoje li respondas.

Krasso denove serioziĝas.

»Por kolekti la militistaron necesas milito« li pensas duonvoĉe. »Sed, kie elpensi ĝin? En Ponto batalas Lukulo, do nekonsidereble. En Hispanio Pompejo ĵus finis la aferon. Ankaŭ nekonsidereble. Alie

nummomente ĉio trankvila. — Ba,« li interrompas sin mem, »oni ja trovos ian militon, kiam ĝi estos necesa«.

»Pli gravas la hommaterialo« aldonas Cezaro. »Sed, la degenerinta roma proletaro ne helpas al ni: ĝi diskuros ĉe la unua sagpafo«.

Denove ili alproksimiĝas al la societo. La bankiero haltas etendante al la Juliano la manon.

»Se foje vi venos en Transpadion,« li diras singarde, »sciu, ke tie mi havas bonajn rilatojn. Pririgardu iom tiujn homojn. Ili estas sana kaj ŝvelforta popolo, tute nedegenerinta. Pririgardu tiujn transpadianojn«. Li premskuas al Cezaro la manon ĝisnune tenatan kaj turniĝas al la aliaj gastoj. Tujsekve reaperas sur lia vizaĝo la frosta rideto.

La interparolo kun Katilino difektis la serenan humoron de Cezaro kaj la pritraktado kun Krasso estingis ĉion luman en lia animo. Serĉe li ĉirkaŭrigardas por trovi ie ĝojon kaj helecon.

Ankoraŭ ĉiam sidas Sempronia kun tiu juna nekonatino flanke, sur la larĝa, elŝovita ŝtonbenko. Cezaro pretertreniĝas kaj Sempronia lin vokas. Li aliras.

»Jen via Cezaro« ŝi diras gaje al sia kunulino. »Sed nun vi mem zorgu, ke li denove ne forkuru.«

»Sempronia! Mi petas vin!« La juna virino ekruĝiĝas.

»Ah sensencaĵo!« energie rifuzas la alia. »Nun, kiam la tuta Romo interesiĝas pri li, tio estas permesata ankaŭ al vi! — Cezaro, jen Servilia, la edzino de mia kuzo Marko Bruto, kiun la edzo punmerite malzorgas. Klopodu rebonigi lian pekon.«

»Sed Sempronia!« denove la flama ruĝiĝo.

Carmega ŝi estas, pensas Cezaro. Jen fine natura,

nemisformita estaĵo. Tuj li bonhumoriĝas. Komforte instalante sin al la brakapogilo de la benko, li diras:

»Ĉu vi scias, Sempronia, pri kiu vi memorigas min?«

»Ne, diru do pri kiu?«

»Pri la maljuna judo, kiu sur Rodo sin servoproponis. ‚Kion vi scipovas?’ mi demandis. Kaj li respondis: ‚Priservi per bonaj konsiloj!’«

Sempronia leviĝas kun rideta indigno.

»Hu, vi kuraĝas al mi tion diri!« ŝi ekkrias. »Fi, Cezaro! Por puni vin, mi foriras!«

La junulo ŝin postrigardas, poste sidigias sur la malplena loko apud Servilia.

»Vi permesas?«

Ŝi iom fortiriĝas.

»Plezure,« ŝi kapbalancas.

»Sed pro tio vi ne devas fortiriĝi,« li riproĉetas. Ĝoje ŝi alridetas lin.

»La grandaj sinjoroj bezonas multe da loko.«

»La grandaj sinjoroj? Ho, se vi scius, kiom eta mi estas antaŭ la belulinoj!«

Ŝia vizaĝo jam serioziĝis.

»Cezaro,« ŝi diras, »unufoje por ĉiam: mi senkaŝe konfesas, ke mi volus esti kun vi bona amiko. La motivo vi ekscios poste. Sed, se vi volas, ke ni harmoniu, neniam, aŭdu, neniam vante min priflatu!«

Nun ruĝiĝas Cezaro. Preskaŭ mire li tion konstatas.

»Ho pardonu« li diras iom konfuzite. »Vi estas prava.«

Silenteto. La konversacio rompiĝis, neniu el ili trovas eliron. Fine tamen komencas la Juliano:

»Kiel okazis, ke neniam ĝis nun mi vin renkontis?«

»Ni tre malofte faras vizitojn« ŝi klarigas. »Mia bofrato estis implikata en la fiaskan komploton de Lepido; tio jam komence puŝis nin en malagrablan situacion. Nun, post la interpaciĝo kun Pompejo, la afero iom pliboniĝis.«

»Jes,« li elmurmuras penseme. »Pompejo troviĝas ĉe la apogeo.« Kaplevante li ekrigardas rekte en ŝian vizaĝon: »Do, la naŭza politiko kulpas, ke mi nur hodiaŭ vin ekkonis.«

»Ho, mi jam delonge konas vin« ŝi respondas mallaŭte.

»Vi min konas, ĉu? — de kie ja?«

»Ĉu vi rememoras Lucion Servilion?«

»Nu kia demando! Kompreneble! Unu el miaj plej bonaj kamaradoj. Post la batalo ĉe Mitileno ni kune militservis en Azio sub lia onklo Isaŭriko. Ĉu vi kun li parenkas?«

»Li estis mia frato.«

»Estis? Ĉu...«

»Li falis la pasintan jaron en Hispanio.«

Denove silento. Poste la juna virino ŝanĝas la temon:

»Ĉu plaĉas al vi, Cezaro, la vivo pasigata ĉi tie?«

»Kion vi aludas?« li demandas iom embarasite.

Kelkajn momentojn ŝi meditas. Poste ŝi respondas evitante la demandon:

»Mia frato multe rakontadis al mi pri vi: pri via rezisto kontraŭ Sullo, pri via sintenado en Azio, pri via ekstaro kontraŭ la ekspluatuloj de la provincoj.

Ofte ŝajnis al mi vidi en vi reviviĝintan heroon el la antikva tempo. Jes, tiom kuraĝan, tiom sentiman, fide-  
lan kaj modestan. Sendube, vi ne miskomprenos min,  
kiam mi konfesos al vi, ke mi infanece ĝojis pri la  
hodiaŭa tago — nur, ĉar mi sciis, ke ankaŭ vi ĉeestos.«

»Ne, mi ne miskomprenas tion« diras la Juliano  
strange raŭke. »Sed daŭrigu plu.«

»Vi venis — kaj anstataŭ la antikva heroo mi  
vidis dandon kun bukligita hararo kaj poluritaj ungoj,  
en freŝfasona togo, faldita laŭ la leĝoj de la lasta  
modo. Mi aŭdis pri la eldorlotita favorato de l' virinoj,  
kiu — same laŭmode — ŝanĝas siajn amikinojn, pri  
la riskludanto kaj ĝuemulo, kies vivcelo estas monŝute  
malŝpari kaj facilanime sin dronigi en ŝuldojn. Par-  
donu, —« ŝi alrigardas rekte en lian vizaĝon — »ke  
mi tiel sincere al vi parolas. Sed — ĉio ĉi, vere, ek-  
ĉagrenis min. Estus ja dolore malestimi tion, kion mi  
admiris.«

La lastaj vortoj elvenas tute mallaŭte, sed la  
grandaj, demandaj okuloj ne malleviĝas. Sur ili ne plu  
estas nebulo kaj Cezaro enrigardas ilian senliman pro-  
fundon. Antaŭ ol respondi li dum kelkaj momentoj  
penas rekolekti li pensojn. Tiam li komencas kaj dum-  
parole ankaŭ al li mem klariĝas multaj aferoj, kiujn  
li ne klare konsciis ĝis nun:

»Al iu alia eble mi respondus, ke mi malgraŭ la  
juneco tre multe suferis. Ke tiu mia ĝuemo, eĉ  
ankaŭ mia dandemo, estas nur la naturaj reagoj kon-  
traŭ la malfacilaj jaroj. Al vi, ho Servilia, mi ne diros  
tion. Kvankam ni ĵus interkonatiĝis, al mi ŝajnas, ke  
ni jam dum jaroj interamikas. Eble tial, ke vi estas  
fratino de mia amiko Lucio. Li kutimis prediki al mi  
ĝuste kiel ankaŭ vi. Ne, Servilia, —« li levas la kapon



— »al vi mi diros la veron, almenaŭ, kiom mi mem ĝin sentas: tiu ĉi vizaĝo de la ĝuemulo estas nur masko, sub kiu mi kaŝis la veran memon. Ĉu vi ne rememoras, kiel la avo de via gento akiris sian nomon? Ĉu vi jam forgesis, ke »Bruto« signifas »idioteto«, ĉar la Juniano ŝajnis sin stulteta, por neobservate realigi siajn planojn? Eble rilate mian dandemon estas same tiel. Eble mi havas pli altajn celojn ol povus ilin eĉ nur imagi tiuj unutagaj muŝetoj ĉirkaŭ mi. Ĉu mi do distrumpetu ilin tra la forumo, donante tiel al la kontraŭuloj ŝancojn por dispremi ĉion jam en ĝermeto? La verko estas ja arbo, staranta en riĉaj sunradioj videble al ĉiuj. Sed la radikoj devas disvejni sub la tero, en ŝirmo de l' mallumo, ĉar alie la arbo ne trovos forton por elŝpruci la trunkidon. Se vi povus vidi min tute solan, vi vidus alian vizaĝon kaj ne tiun ĉi maskon. Eble venos la tago, kiam mi povos ĝin formeti. Dume vi komprenu, kial mi aktoras tiun malsaĝan komedion. Kaj, se vi amike sentas al mi, atendu. Vi havas nenian motivon por min admiri, sed min ankaŭ ne malestimu.«

En la profundo de la grandaj okuloj eklumas. Jam subtila rideto lumigas elinterne la delikatan vizaĝon.

»Dankon al vi, ho Cezaro« diras simple Servilia.

Paŝoj. La Juliano turninte la kapon vidas preterpasi Katilion. Duoble palas la fordiboĉita rasvizaĝo, tute turnita al malvarma lumo de l' vespero, dum ĉe l' buŝo tremetas preskaŭ dolora trajto. La juna virino leviĝas. Ŝiaj okuloj denove nebuliĝis.

»Estas jam malfrue«, ŝi diras per altrudite indiferenta tono, »nun mi devas reveni hejmen. Adiaŭ do, Cezaro!« Hezite ŝi etendas al li la manon.

Li retenas por momento ŝiajn fingrojn inter la siaj.

»Ĉu permesite viziti vin?« li petas.

Ekfajreras la lasta subtila rebrilo de l' antaŭa lumiĝo en ŝiaj okuloj.

»Jes, venu« ŝi diras varme.« Venu baldaŭ! — Do, ĝis revido, Cezaro!«

## Katenoj

Kiu li estas, al kiu turniĝas okuloj de ĉiuj? Kiu estas la trodorlotita favorato de l' popolo, same kiel ankaŭ la granda espero de l' senato? Al kiu falas senpene en la sinon ĉiuj fruktoj? Kiun alridetas la feliĉo, kiel ĝi ankoraŭ nenium alridetis, de kiam staras la urbomuroj?

Estas nur unu sola respondo al ĉiuj ĉi demandoj: Pompejo. Pompejo, kiu kutimas rikolti, kie semis la aliaj; Pompejo, por kiu fremdaj manoj konstruas ŝtuparon al la gloro. Jes, nur Pompejo, kiun oni flustre kaj laŭte mencias sur la forumo kaj en la politikaj kluboj, kiel nuran kapablulon por fini la miskomencitan militon kontraŭ Mitridato de Ponto.

En la ĝardeno de sia hejmo promenas la Juliano laŭ la longa, rekta gruzvojeto, senĉese tien-reen. Kruĉinte la brakojn dorsoposte kaj rigardante, sendide, rekte antaŭ sin, li paŝas de la kolonaro ĝis la ĝardenmuroj, de la ĝardenmuroj ĝis la kolonaro. Furioze uraganas en lia koro kaj li kolektas la tutan forton por venki sin mem, por ne droni en malkuraĝon kaj senpovan envion.

Lin ne tiom favoris la sorto, kiom la feliĉulon Pompejon: kion li mem atingis, tio estas akirita nur en maldolĉega batalo post gravaj kontraŭbatoj. Pom-

pejo ja senpene alkaptis ĉion aspiritan, sed li mem devis ŝvite peni, disperdi la fortojn destinitajn al krelaboro; ankaŭ ĉiuflanke defendi ĉion jam akiritan nur, por ke la malamikema hazardo ĉion ne ruinigu.

Kaj kio fakte estas, kion li konkeris? Li estas nur grupestro, kiel ankaŭ multaj aliaj, en la partio, kiun oni devas penege fingrokrampi, por ke ĝi ne disfalu. Kaj ĉu li ne estas lastranga inter la gvidantoj? Jen estas Krasso, la potenco de la kapitalo, larĝe kaj furioze obstrukcanta la vojon; Gabinio, la ruza popoltribuno; Manilio, la traktolerta diplomato kaj fine Cicerono, egale sagaca kiel advokato aŭ politikisto kaj krome ĉiam centvizaga, vaste intriganta kun la partio de la senato. Nu, kio li estas kompare al ĉi tiuj homoj?! Vere, Krasso lin favoras: sole li aprobas lian celon kaj ankaŭ subtenas per la propra mono. Sed tio ĉi estas ĉio: la ceteraj vidas en li nur la uzeblan agitiston. Ĉar, kiam temas fakte pri la partiogvido, oni forignoras lin.

Kiom utilas al li la bombastoj, kiujn oni permesas al li tondrigi? Kiu eĉ nur konsideretas lin, kiam li en funebraj paroladoj — dediĉe al mortintaj onkloj — rememorigas la homojn pri si kiel heredanto de la antikva nobela tradicio kaj *mariana* ideo. Estas ja nura kutimo esti en tiaj okazoj buŝplena: ĉiuj tion scias kaj ridete preterrigardas la aspirojn de l' junulo, kiu estas nenio, kiu nenion havas kaj ankoraŭ per nenio akiris al si reputacion, krom per la ĝis-superkapaj ŝuldoj.

Al tio aldoniĝas lia malfeliĉo hejme. Kvankam la edzeco estis nur politikaĵo, li tamen kore eksimpatias la edzinon. Li alkutimiĝis esti protektanto de tiu ĉi infano, forigi survoje de antaŭ ŝiaj piedetoj ĉiun ŝtoneton. Rekompencis lin la muta dankemo, brilanta en

tiuj bluaj okuloj. Sed nun kaptis Kornelian io, kontraŭ kio li ne povas batali: grava malsano forĝis al lito la kadukan korpon de l' infano, elsuĉante ŝian velkeman kaj senrezistan vivoforton.

Kaj ŝi, kiun li amas kaj kiu reciprokas, estas edzino de la alia...

Ekde la momento, kiam en la ĝardeno de Krasso tiom rapide ili intimiĝis, li ofte ŝin renkontis. Tiam ili ambaŭ pensis nur pri la amikeco, honeste, lojale kaj sincere. Baldaŭ tio ŝanĝiĝis: disfajriĝis inter ili ruĝa flamo de pasio, enkaptante ilin sen, ja eĉ kontraŭ, ilia volo. Ĉiu rezisto estis vana. Do, ili submetiĝis al la sorto kaj suferas kiel krimuloj. Ĉiu horo kune pasigata estas dolĉo-sufero, ĉiu sekundo de l' disiĝo estas infero mem. Ne ĉielfeliĉaj, sed kvazaŭ malbenitaj, ili iras tra l' printempo de sia amo kaj la ligilo ilin unuiganta pezegas katene.

En la ĝardenon enpaŝas la patrino, rektkorpa kiel ĉiam, alturninte sian noble ĉizitan vizagon, sur kiu maldikaj sulketoj anoncas jam la proksimiĝantan maljuniĝon. Ŝi venas renkonte per ĉiam egalmezuraj, kvietaj paŝoj. La seriozaj, saĝaj okuloj serĉas la liajn. Kaj nun ŝi demandas:

»Pri kio vi pensas, ho Kajo?«

Gesto de mishumoro.

»Ke Aleksandro mia-aĝe konkeris jam la tutan mondon.«

Ŝi kaptas lian manon svingantan tra l' aero kaj ĝin tenante ŝi kondukas la filon al benko sub cipreso. Tie ŝi sidiĝas kaj milde altiras lin, furiozan. Milde ja, sed tamen nerezisteble, almetante lian kapon sur sian ŝultron. Mole kaj delikate ŝi karesas liajn vangojn. Tiel ili restas kelkajn minutojn. Kaj tiam, rimarkinte,

ke lia plej akra furiozo iom post iom fordegelis, kiam la longaj, profundaj spiroj certigis, ke la filo retranskiviligis, ŝi komencas kun delikata patrina rideto:

»Hu, la mondon konkeri volus mia granda knabo?«

»Tio ne estas tiom malfacila, kiom ŝajnas,« li spitemas.

Ŝi ridas sian bonan, kveran rideton.

»Kaj kial vi tion al vi malfaciligas?«

»Ĉu mi?« li volas kaplevi, sed la karesa mano montras ankaŭ sian forton, firme lin retenante. Do senmove li spitemas kiel ĵus antaŭe: »Eh, ne mi, sed la aliaj tion al mi malfaciligas.«

»Ĉu?« trankvilas la patrino tiel perfekte, ke li, malgraŭ sia kolero, devas ekridi.

»Nu jes« li diras, »ŝajnas kontraŭdiro; sed —« la frunto apenaŭ sereniginta denove nubigas — »kiam oni puŝigas kontraŭ tiom da malhelpoj, kiam oni estas tiom misŝanca, kiom mi...«

»Ho vi, infano!« diras ŝi tute trankvile kun la saĝa sperto de l' matura aĝo. »Ekzistas nek bonŝanco, nek misŝanco; ekzistas nur forta aŭ malforta volo.«

Li denove ekflamiĝas, sed denove lin retenas la karesa mano.

»Mia volo estas sendube sufiĉe forta,« li grumblemas. »Rememoru ja, kiom rapide mi revenis el Azio post la morto de Sullo.«

»Kaj kion vi atingis per tio?«

»Nenion: ĉar mi tuj vidis, ke la entreprenon de Lepido oni ne povas taksi serioza.«

»Via volstreĉo estis vana. Tiajn klopodojn, mia kara Kajo, mi ne taksas kiel fortan volon. Energio ne

devas evidentigi nur en la senĉesa agado, la vera forto ripozas kaj atendas la ĝustan momenton.«

»Eh, atendi! Ja dum tiu tuta tempo mi ne faras ion alian!«

»Ne, ne, Kajo, tio ne estas vero: vi tempoperdas, malŝparas vian forton, kontraŭnaĝas la torenton, opozicias, kiam ne konvenas, kaj poste miras, ke viaj klopodoj restas sensukcesaj. Ĉu vi volas, ke mi instruu al vi la fundamentajn elementojn de la alcela agado? Ke mi al vi rememorigu — kaj vi ja estas tridekjara — ke ne ekzistas aksiomaj instrukcioj por la agado, sed nur la momentaj situacioj, kiujn oni devas kiom eble plej elprofiti? Ke la forton de la malamikoj oni ne sufokadu, sed eĉ, se eble, subtenadu por plej baldaŭ ĝin konduki al la apogeo — kaj per tio ankaŭ al la malŝveliĝo? Ĉion ĉi aliafoje vi tre bone komprenas, ĉu nun subite vi ĉion forgesis?«

Ŝi daŭrigas per trankvila, sonora voĉo, lulkante muzikanta en la oreloj de l' filo. Li aŭskultas en tiun voĉon, eĉ ne atentante la vortojn: ili estas superflujaj; kunligiĝo inter li kaj la patrino estas tiel senpera, ke nenecesas perado de l' lango. Lia kapo malrapide velk-falas, ekripozante ĉe l' patrina brusto, ĉe l' montetoj, donintaj al li la unuan nutraĵon. Li aŭdas bati la koron de l' patrino en forta, kvietita ritmo, kiun konfuzi povas nenio. Senvole li kaptas la propran pulson kaj plene feliĉa eksentas la same kvietan ritmon. Forflamis jam la lasta tondrado de l' uragano en lia animo. Trankvile eniras lin silento, en kiu li sentas leviĝi vian forton en la animo, la forton kiu lin kaptas kaj hardas. Antaŭ ĝia firma fortikaĵo malaperas ĉiuj eksteraj malhelpoj.

Kviete li levas la kapon, kiun nun tenas neniu mano kaj ekrigardas en la okulojn de la patrino. Am-

baŭ silentas, sed nun ili parencas ĝis la plej intima fundo de siaj memoj.

Nun, post la kvietiĝo de l' uragano en la animo Cezaro ekrememoras sian junan edzinon.

»Kiel estas hejme?« li demandas signife.

»Jam pli bone« respondas la patrino. »Ŝi vekigis kaj volis vin vidi. Sed, kiam ŝi aŭdis, ke vi estas en la ĝardeno, ŝi malpermesis vin ĝeni.«

»Ho, kompatinda infano,« li diras dolore tuŝita. »Tuj mi iras al ŝi.« Li jam leviĝas kaj iras al la hejmo. La patrino per siaj seriozaj, saĝaj okuloj post-rigardas lin.

En la ĉambro de la malsanulino mallumetas. Oni malfermis unu el la fenestroj por havigi al la suferulino freŝan aeron. Kiam Cezaro eniras, la flava kurteno vele ekŝvelas pro trablovo.

Kornelia alturnas la kapon, ekridetas, provante senforte levi la manon. Li jam alrapidas, kaptas la rompeblajn fingretojn kaj almetas ilin al la lipoj.

»Bele, ke vi venis,« ŝi flustretas.

»Nu, Kornelia, tio estas, ja tute natura,« respondas li sidigante sur la litorando. »Je mia granda ĝojo mi aŭdis, ke vi jam pli bone fartas.«

»Dankon, jes. Iom pli bone.«

Li ekrigardas ŝin kaj ekkaresas la manon kiun li tenas ankoraŭ ĉiam en la sia. Kvankam li tute malspertas la medicinon, tamen li scias, ke li rigardas la vizaĝon de mortanto: profunde enkavaj, brilfebraj okuloj, endronaj vangoj, sur kies ostopintoj ĝiskreve streĉiĝas la haŭto, sensangaj lipetoj, malkaŝante ĉiuvorte la dentojn — ĉio ĉi certigas eĉ tro klare. Kaj tra la vizaĝo li vidas la kranion, la detale elĉizitajn ostojn de la subtile modelita kapskeleto.



»Huj, multe mi ŝanĝiĝis, ĉu?« Flustras la mal-sanulino intuante lian rigardon.

Tranvilige li ekridas ne konfesante eĉ per okul-tremeto kion li ĵus konstatis.

»Tute ne« li respondas. »Vere, vi iom malgrasiĝis kaj maldikiĝis. Sed, kiam vi resaniĝos, ni vin diligente nutros.«

»Kiam mi resaniĝos?« ŝi ripetas senkrede kaj tamen kun nova espero. Tiam ŝiaj pensoj transiras al aliaj aferoj.

»Ĉu bele ekstere?« ŝi demandas.

»Belege« li certigas. »Varme kaj sune. Birdoj kantas. Ĉu vi ne aŭdas ilin?«

Ŝi enaŭskultas kaj apenaŭ aŭdeble ĝemetas:

»Ho, mi volus denove viziti la ĝardenon.«

Li kapklinas.

»Kaj tion vi ankaŭ faros, infano mia. Jes, tuj kiam vi iom refortiĝos.«

Ŝi ne respondas okulante senmove al la plafono. Senvorte li ŝin rigardas kaj mil pensoj svarmas tra lia kapo. Ŝajne neniam plu li promenados kun ŝi ĉe la bordo de Bajo; la eta Julia baldaŭ estos orfineto, sed la infano tion ne komprenos; kaj li mem baldaŭ oratoros ankaŭ super ŝia katafalko — ĝuste pro tio, ke ŝi estas filino de la spitema Cinno, tiu amiko de Mario. Tiam kun solene agordita mieno, nur mallerte kaŝante enuon, staros ĉirkaŭ li komplete ili ĉiuj: Krasso, Manilio, Gabinio, Cicerono, Katulo, kuzoj Kottoj — eble eĉ Pompejo...! Ankoraŭ zigzagis tiu ĉi nomo en lia kapo, kiam eniras sklavino portante glason da limonado. Kaj tute pensabsorbata li diras:

»Se alvenos sendito de Pompejo, voku min.«

»Jes, sinjoro,« kapklinas timeme la sklavino kaj denove malaperas.

La malsanulino alturnas la kapon.

»Vi atendas komunikon de Pompejo?«

»Jes« li kapklinas. »Mi devas interparoli kun li.«

»Pri kio?«

»Pri politikaĵoj,« li evitemas.

»Nu, pri kio?« insistas ŝi. »Diru ja.«

Li komprenas, ke ŝia senokupa cerbo avidas iajn ajn novaĵojn. Pente li riproĉas al si, ke li antaŭe ne pensis pri tio, ke li ne pli atente zorgis pri ŝi. Sed tio estis tiom malfacila, ĝuste nun, kiam li tiom pene levas la trabaron, kiu devus helpi al li por realigo de la planoj. Klare li sentas la egoismon de tia sintenado, la eternan, praoriginan egoismon de l' sanuloj kiuj sin fortunigas de la malsano por iri propravoje.

»Ĉu vi ne respondos al mi?« petegas la malsanulino dolore.

Li alkliniĝas super ŝi.

»Mi respondos, respondos, ho vi infano! mi ja timis, ke tio vin ne interesos«. Senforte ŝi gestas malpaciencon. Rapide li tuj daŭrigas:

»En Azio ni suferis malvenkojn, nun oni intencas revoki Lukulon. Pompejo jam brulaspiras la komandon: kaj mia tasko — lin helpi.«

»Eh, milito!« la suferulino malkvietas kape tienreen. »Ĉiam nur milito! Dum mia tuta vivo de kiam mi memoras, oni batalis, sin interbuĉis kaj sangverŝis. Sanga krimo estas mia unua memoraĵo: la murdo de Druzo. Poste venis la alianca milito. Poste la bataloj inter Mario kaj Sullo. Poste mortfalis ankaŭ la patro. Ankoraŭ nun mi vidas antaŭ mi, kiel oni portas lin hejmen de la Marsa kampo kun disfenditaj vund-

oj. Poste jam venis la proskriboj kaj via forkuro. Poste Lepido, poste Stertovio en Hispanio. Poste ribelo de la sklavoj. Kaj nun la milito en Azio. De kiam mi vivas, mi aŭdas nur: Milito! Milito!« Pli kaj pli ŝi ekscitiĝas. Kaj nun ŝi sidleviĝas el la lito ekkriante per voĉo, kian neniu supozus en tiu ruina brusto: »Ĉu vi do neniam starigos la pacon? Ĉu tiom valoras por vi la sangaj laŭroj? Ĉu vere vi ne scias, vi viroj, kion signifas: Milito? Ĉu en viaj triumfaj militiroj vi vidas nur brilon kaj lukson kaj ne ankaŭ la mizeron, kiun vi kaŭzas, la larmojn, kiuj fluas viakulpe? Ho, Milito! Kio ĝi fakte estas: la Milito? Kiom koncernas min, ĉu la romia limŝtono estos ŝovata kelkajn mejlojn pli antaŭen? Vivi, jen sole kio valoras! Ja, vivi! Vivi!« plorsingulte ŝi falas sur la kusenon.

Timigite observas Cezaro tiun nervatakon. Komence li provis ŝin trankviligi, sed ne sukcesinte, li lasis la uraganon elfuriozi. Nun li alsidiĝas tute proksimen, ĉirkaŭbrakas ŝin kaj, karesante ŝian longan, senordan hararon, dorlotas ŝin kiel infanon, parolante mallaŭte, delikate.

Ŝia ekscitiĝo disfluas en larmojn, senĉese, silente fluantajn, kvazaŭ la okuloj estus senvelkaj fontoj.

»Ankaŭ vi pereos en tiu sango,« ŝi ploretas, »ne hodiaŭ, ankaŭ ne morgaŭ, sed venos la tago, kiam tiu tuta sango falos sur vin, vin englutos, ĉar per la sango oni ne ŝercas. Kie ajn ĝi disverŝiĝas, ĝi fortiras kun si pli aŭ malpli frue la kulpulon. De ĉiam estis tiel kaj por ĉiam estos tiel. Kiuj foroferas viktimojn, fine mem estos viktimoj.« Ŝi eksilentas kaj denove ekokulas al la plafono. Kaj nur laŭ ŝiaj larmoj, senĉese fluantaj, oni povas supozi, kiom profunde kortuŝita ŝi estas.

Mute observas ŝin la edzo. Kion li diru al ŝi? Ĉu li klarigu, kial li ne povas alie fari? Ĉu li instruu, ke en la mondo oni povas krei nenion grandan sen batalo, ĝi estu sanga aŭ ne, kaj ke la sensanga batalo estas eĉ multe pli terura, multe pli kruela ol tiu kun armiloj en la mano? Ĉu ŝin konvinkus la motivoj de l' prudento? Ŝiaj sentoj malordiĝis, ŝi terurite retiriĝus for de tio, kio al li ŝajnas nepre necesa. Li povas doni al ŝi nenian konsolon, li devas ŝin lasi al si mem.

Senvorte ili restas vizaĝ-al-vizaĝe, tiom proksime kaj tamen tiom malproksime unu de la alia. Kontraŭvole ekpensas Cezaro pri la virino, kiu lin komprenas pli bone ol tiu kompatinda, mortemalsana infano, pri la virino, kiu eble iam tremos pro li, kiam li devos militiri, sed kiu sendube ne provos lin reteni: ĉar, se li ne estus tia, kia li estas, ŝi lin ne amus.

Denove eniras la malgranda sklavino. Hezite, timeme paŝante ŝi proksimiĝas al la mastro kaj ekflustras:

»La sendito, sinjoro.«

»De Pompejo?«

Ŝi kapjesas.

Cezaro leviĝas, sin klinas super la malsanulinon kisante ŝian ruĝ-ardan frunton. Ŝi returnas la kapon, dum la vizaĝon kovras fremda, rigida esprimo.

Mute eliras la Juliano el la ĉambro. Denove ekŝvelas la kurteno pro trablovo, lasante momenton disflui tra la mallumeta ĉambro ondon de sunbrilo kaj odoron de floroj. Tra l' fendeto ekvidas la junulo fringon: sur la granda, malsovaĝa kaŝtanarbo ĝi sidpende kantas sonoratan himnon de la vivo ...

## Pompejo

»Kion vi alportas?« demandas Pompejo, kiam post la intersaluto ili sidigas.

»Se vi volas — la pacon« respondas Cezaro.

Kiel ĉiam en surprizo, la generalo fiksas la rigardon sekundon-sekundeton antaŭ sin. Nur post tio li pludemandas:

»La pacon. Sed kun kiu?«

»Kun Krasso — tio signifas kun la popolpartio.«

Pompejo malrapide kapbalancas.

»Kontraŭ vi mi ja ne militas.«

»Tiuokaze —« Cezaro arangas la sulkojn de sia togo gestante por leviĝi — »pardonu la ĝenon.« Senkomprene ekrigardas lin Pompejo.

»Sed kien vi?«

»Al Krasso por informi, ke vi opinias ĉiun traktadon superflua.«

En la okuloj de Pompejo senhelpa rigardo.

»He, kiam mi tion diris? Kiam entute estis parolo pri traktadoj?«

»Sed ĵus vi klarege rifuzis« insistas la Juliano.

»Ĉu mi? Eĉ ne unuvorte. Mi ja diris nur ke mi kontraŭ vi ne militas.«

»Imperatoro —« la sonora titolo celas dolĉigi

amaran pilolon — « ni ne estas sur la forumo por kaŝludi per diplomataj artifikoĵ. Vi ankoraŭ ĉiam tenas kuna vian iaman militistaron el la hispania milito same kiel ankaŭ Krasso la sian el la sklavmilito. Sed kiam du armilhavaj viroj staras kelkan tempon kontraŭfrunte, kiel finon ili nepre aranĝas interatakon. »

»Vi parolas kiel — « hezite komencas Pompejo.

»Kiel oni devas, se oni volas interkompreniĝi, energie kompletigas lian penson Cezaro. »Alie — domaĝe pri la tempo. «

»Sed restu, mi petas, ĉi tie « haltigas lin distrite Pompejo.

Obeinte la Juliano observas per siaj senindulge akraj okuloj la generalon. Tiu evidente penas rekolekti la pensojn kaj jen prenante objektojn, jen remetante ilin, evitas alrigardi la vizitanton.

Cezaro meditas. Sendube, Pompejo estas anime tre inklina por intertrakti; li devas nur subpremi iajn malhelpojn kaj sian maldecidemon. Estas necese lin helpi. Sed kiel?

»Pompejo, « diras fine Cezaro, »mi antaŭmetos al vi la proponojn de Krasso. Trankvile mi ĉi aŭskultu kaj diru, kion vi pensas pri ili. Tiel ni, certe plej baldaŭ, interkompreniĝos. «

Pompejo sidigante kontraŭ li, atente lin observas.

»Parolu do! « li invitas.

»Kiel al mi ŝajnas, « komencas Cezaro, »nun temas pri la jeno: la du plej fortaj homoj en Romo vi kaj Krasso, — Pompejo ruĝiĝis ravite, ke oni tiel konfesas lian potencon — »kolektis rimarkindajn militistarojn. Kaj nun vi staras — egale ĉu prave aŭ ne — unu kontraŭ la alia, plenaj de plej granda mal-

konfido. Tiu interstreĉo povus doni sekvojn, kiujn neniu el vi deziras. Krome tio utilas al neniu el vi, sed nur al la kurio, kontente rigardanta, kiel batalpretas unu kontraŭ la alia tiuj, kiuj solaj povus fariĝi al ĝi danĝeraj.

»Hm!« Pompejo krucas la krurojn, ĉirkaŭbrakante sian talion, kvazaŭ volante tute entiriĝi. Ŝajne la konciza kaj klara temdisvolvo vekas en li la plej gradan intereson.

Cezaro atendas momenton, por ke la generalo eble ion rimarkigu. Ĉar tio ne okazis, li daŭrigas:

»Dume, estas fakto, ke ni estas necesigitaj reciproke: vi, la militestro sen partio, ni, la partio sen militestro. Ni bezonas unu la alian por reciproki ŝirmo al la dorsoj. Se ni estos disigitaj, la kurio facile puŝos trablojn inter niajn krurojn. Al vi tiel, ke ĝi ne plu daŭrigos vian mandaton — la militista diktator-eco ne povas ja eterne daŭri — kaj al ni tiel, ke oni incitos kontraŭ nin la militistaron de la senato. Nu, tiu-okaze adiaŭ por ĉiam al la partia vivo. Sed konkorde, ni estas nevenkeblaj: vi havos apogon en la ĉefurbo, kie nia partio kunhelpos por enleĝigi ĉiun vian deziron se necese eĉ kontraŭ la volo de la senato. Dume ni havos la elharditan, ĉiam batalpretan militistaron sub la plej kapabla militestro en la ŝtato — « Pompejo reruĝiĝas — «kiu, se necese, firmigos niajn decid-ojn. Jen do, la klara, precize difinita kontrakto, kiun Krasso pere de mi proponas al vi.»

Pompejo rigardas antaŭ sin. Poste li duonvoĉas:

»Sed, la kondiĉoj de Krasso?«

La batalo jam gajnita! ĝojkrias en si Cezaro daŭrigante tuj per aferema voĉo:

»Kraso proponas al vi la jenon: vi ambaŭ eksigos samtempe viajn militistarojn: vi mem aliĝos al ni tute sen sindevigo, proksimume kiel nia sendependa interligano; kompanse ni garantias al vi, ke vi transprenos komandon jam en la sekvonta pli granda milito. Same plenumo de ĉiuj aliaj deziroj.«

Prema silento postsekvas la koncize konturitan programon de la kunlaboro. Tiam diras Pompejo, sed ankoraŭ ĉiam hezite:

»Tio estas nur ĝeneralaj promesoj. Oni devas ilin precizigi.«

Kompleza mangesto de Cezaro.

»Dependas de vi formuli viajn kondiĉojn.«

Pompejo konscias la gravecon de l' momento. Profunde sulkigas lia frunto pro peno de koncentrigita meditado. El la buŝo ŝiriĝas vorto post vorto, sed ĉiu — pro sia graveco — estas pripensita kaj pesita:

»Antaŭ ĉio ŝajnas al mi,« li diras »ke mi ne povas akcepti la kondiĉon postulantan, ke mi eksigu samtempe kun Kraso la militistaron. Tion mi ne povas konsenti. Estas ja konate al mi: dum la malarmado de la kontraŭula militistaro pro ia ajn motivo oni ĉesigas la malarmadon propran, kaj mi subite staras tute sola kontraŭ la malamiko, armita ĝis super la oreloj.«

Cezaro sufokas rideton. Pompejo, kiu antaŭe tiel emfaze neis la malamikecon kontraŭ Kraso, uzis dufoje la vorton kontraŭulo. Poste, per same seka, preskaŭ negocista voĉo li respondas:

»Tio ne estu inter ni kaŭzo de disputo. Mi prenas sur min la devon, aranĝi, ke Kraso la unua eksigu sian militistaron. Vi komencos tiam, kiam ni estos jam senarmilaj.«



Mirigite rigardas Pompejo la junulon tiel tran-  
kvile formulantan gravsekvajn proponojn.

»Tion oni ja povus pripensi,« li diras, hezite  
kiel ĵus antaŭe. »Kromrestus nur la militestredo.«

Cezaro ekridetas — la unuan fojon dum la tuta  
traktado.

»Vin atendas la Mitridata milito,« simple li diras.  
Sed Pompejo denove malrapide kapbalancas.

»La Mitridata milito ne preterglitos min« li res-  
pondas. »Lukulo tiun aferon eĉ tro malbonigis. Tiun  
militestredon mi ricevos ĉiuokaze pli aŭ malpli frue.«  
Li pravas, pensas la Juliano. »Por mi temas pri io  
alia.«

»Nu?« nun, siavice, Cezaro pikil-armiĝas.

»La plej granda kateno por nia komerca trafi-  
ko,« diras Pompejo, »estas la pirateco, kiu terure en-  
radikiĝis, ekstermante tutajn regionojn. Vi mem, Ce-  
zaro, proprahaŭte spertis tiun kanajlaron. Vi ja scias,  
kion signifas tiaj krimuloj. Kaj ne ĉiu tiel bon-  
ŝancas kiel vi. Tiun ŝarĝon oni devas nepre forĵeti de  
la kolo. Nu, mi pensas — «profunde li enspiras kaj  
poste energie finas — »ke mi estas kvazaŭ kreita por  
tio.« Scivole li rigardas la Julianon por legi sur lia  
vizaĝo la efikon de siaj vortoj.

Sed la vizaĝo de Cezaro restas nepenetrebla. Li  
nur seke endemandas:

»Kaj viaj kondiĉoj?«

La rapida respondo de Pompejo klare pravas, ke  
li ĝisfunde okupiĝis pri tiu demando kaj jam de-  
longe ĉion pripensis:

»Militestredo por tri jaroj kun ĉiuj *prokonsulaj*  
rajtoj super ĉiuj maroj kaj super la tuta marbordo,  
kvindek mejlojn land-internen; kvincent militŝipoj kaj

cent dudek kvin mil militistoj, kvin mil rajdistoj; libera dispono pri ĉiuj ŝtataj, provincaj kaj ŝtatklientaj kaso.

Jen la fino de l' respubliko, pensas Cezaro. Tio estas monarkio de Pompejo. Nun ĉiuj miaj planoj detruigis. Se li tion atingus, mi povus retiriĝi al mia posteno en la sankta kolegio por tie travivi mian tempreston. Febre li serĉas ian eliron sed ne trovas. En la plej bona okazo tio signifas por mi, li pensas plue, batalon por la vivo aŭ morto kontraŭ tiu ĉi homo. Batalon, en kiu li havas ĉiujn ŝancojn kaj mi eĉ ne unu. Ho, se mi ricevus ian ajn ekspedicieton por alkollekti kaj elzerci la trupojn.

»Vi ne respondas al mi?« alorelas lin la voĉo de Pompejo.

Aŭdinte la demandon Cezaro rricevas sian tutan trankvilon. Li rememoras la vortojn de l' patrino, kiujn ŝi diris la saman posttagmezon: la forton de la malamiko oni ne sufoku, sed eĉ, se eble, subtenu por plej baldaŭ konduki ĝin al la apogeo — kaj per tio ankaŭ al la malŝveligo. Singarde li respondas:

»La gravaj sekvoj de viaj kondiĉoj devigis min pripensi. Por tio mi ne estas rajtigita. Mi devas interkonsiliĝi kun Krasso. Ĉu tio estas via lasta vorto?«

»Jes ja, la lasta. Pri tio mi ne cedas.«

Nu, fine — kial ne akcepti tion? Tri jaroj signifas longan templimon, kiu kreos mil eblaĵojn; homo, kiu forestas tri jarojn malproksime de Romo, perdis os ĉiun apogon nun posedatan. Reveninte li povos trovi sin en tute nova situacio, al kiu li devos adaptiĝi. Kaj fine: tri jaroj, vere, sufiĉos por elzerci la armeon, por ke ĝi estu ĉiumomente atakpreta, sed ne senkondiĉe katenita al la estro, kiel ekzemple estis ĉe la militist-

aro de Sullo. Pri ĉio ĉi oni devos atentigi Krasson, se li hezitos.

Pompejo senpacienciĝas. Maltrankviligas lin la longa silento de Cezaro. Piedpinte li frapetas la plankon, tamburetas fingre sur la brakapogiloj de la seĝo.

Fine Cezaro ekparolas:

»Kompreneble, ke mi povas deklari nenion sindevigan, sed al mi viaj novaj kondiĉoj ne ŝajnas ne-transpontebla baro.« Profunda, liberiga elspiro, kiun Pompejo ne povas reteni, faras Cezaron eĉ pli singardema. »Mi do parolos kun Krasso kaj poste vin informos.«

»Espereble plej baldaŭ,« rimarkigas Pompejo. »Alie mi devus min ĉirkaŭturni por aliaj interliganoj.«

»Eh, kie?« naivas Cezaro.

Pompejo momenton hezitas, poste diras akcentante ĉiun vorton:

»Se devas esti — eĉ en la senato.«

Cezaro froste ekridas.

»Nu, ĉiuokaze mi konsilas al vi tion ne fari. Vi povus fariĝi nur sklavo de la malsaĝa, sed tiom pli sinestima koteriaĉo.«

Pompejo mishumore flankrigardas: la vortoj de Cezaro celtrafis. Iom aĵurte li elĵetas:

»Ankaŭ mi esperas, ke tio estos nenecesa.«

»Mi ja ĉiel klopodos fari la plejblon« respondas Cezaro sindetene. Li jam preparas sin por leviĝi. Sed nova demando de Pompejo lin retenas.

»Se ni ja interkonsentos —« (do li jam tion konsideras, pensas Cezaro) — »kiel vi imagas tion praktike realigi?«

»Ja, tre simple,« respondas la Juliano. »Unue

oni voĉdonigos tiun proponon en la senato. Tie oni certe antaŭflaros la insidon kaj senhezite ĝin rifuzos.»

»Sed per tio la afero estas fuŝfinita,« zorgemas Pompejo.

Denove Cezaro ekridetas.

»Eh, tute ne. Tio ja estas antaŭvidita en nia plano. Guste tio devas kunhelpi por fari nian projekton la plej populara. Ĉar tiam ni disflamigos la pasiojn.«

»Ĉu vi kredas, ke per tio vi sukcesos timigi la senaton? Pripensu nur —«

»Tiamaniere mi intencas forŝiri la proponon el la kompetenteco de la senato kaj rekte ĝin elmeti antaŭ la popolkunvenon.« En la grizaj okuloj ekfajreras fulmo, sed tuj estingiĝas.

Pompejo alrigardas lin. Li jam ekkomprenis la grandecon de l' entrepreno kaj timiĝas.

»Ĉu vi estas tiel firme konvinkita, ke la popolkunveno tion akceptos?«

Cezaro abrupte ekridas.

»Propono direktita kontraŭ la senaton estas jam anticipe akceptita!«

Pompejo peze spiras.

»Mi volus esti optimisto, kiel vi« li elmurmuras.

»Nu, optimisto pro sperto,« firmigas Cezaro. »Ne ekzistas koruptaĵo, kiu povus bridi la malamon kontraŭ la senato — kaj la mono de Krasso faros ĉion ceteran.« Li leviĝas. »Ĉu vi havas ion por kromdiri?«

»Nenion. Mi pensas, ke ni finis.« Ankaŭ Pompejo leviĝas.

»Do, adiaŭ, Pompejo.«

»Kompreneble mi vin elakompanos.«

Irante tra la atrio Pompejo, ŝajne, ion primeditas. Ĉe la elirejo li tion eldiras:

»Kiel estus — nu, ĉu vi volus iri kun mi, kiam venos la tempo? Kiom al mi konate, vi jam posedas militspertojn. Por vi oni trovas postenon en mia militistaro — eble la *propretoran* rangon.«

Nun Cezaro vidas, ke tiu ĉi alia, se ankoraŭ lin ne vidpenetris, tamen jam konjektas lian intencon kaj volas ĝustatempe certigi lin por si. Ĝoje li rifuzas:

»Nun mi ne povas foriĝi el Romo: kiu alia ja ŝtopus la truojn, kiuj ĉiam fendigas. Eble iam poste ni renkontiĝos.«

## Fino kaj komenco

Ŝi ne aŭdis lin eniri. Nun subite li staras en la pordo, duoble mallarĝa kaj maldika en la nigra togo, kun la okuloj brularde malhelaj.

Ŝi leviĝas de sur la sofo kaj formetinte multajn kusenojn, sur kiuj ŝi kuŝis, ŝi iras al li etendante la manon, kiun li silente kisas.

Mute ŝi revenas al la sofo kaj denove ensidiĝas inter la kusenoj. Postsekve li haltas antaŭ la sofo, sur kies brakapogilon li metas la manon.

Silente ŝi gestas kaj li sidiĝas apogante sin kiel homo, kiun venkis lacego. Ŝi rigardas lin per siaj grandaj, profundaj okuloj.

»Ĉu finite?« ŝi demandas duonvoĉe.

»Finite,« li ripetas rigardante rekte antaŭ sin kun la krucitaj brakoj en la sino.

»Ĉu multe da publiko?« singarde ŝi pludemandas.

»Eĉ tre multe.« La rigidaj okuloj ekvigliĝas.

»La forumo estis formike svarma.«

»Vi mem faris la funebran paroladon?«

»Jes ... « li redronas en la ĵusan rigidigon.

»La morto estis liberiĝo por la kompatindulino«, ŝi diras postpaŭze.

Li kapklinas, unue mekanike, poste pli vigle, kvazaŭ nur nun li ekkomprenus ŝiajn vortojn.

»Jes,« li diras, »ĉiurilate. Ŝi ne estis kreita por tiu ĉi mondo.« Li turnas al ŝi la okulojn, nun malklarajn kaj larmoplenajn. »Ne multe ŝi ĝuis la bonaĵojn de la vivo.«

Kaj eĉ tiun malmulton, ŝi ne sciis konservi, ŝi almetus, sed tamen sin detenas.

»Ja, kiel infano ŝi jam devis tiom suferi,« li daŭrigas »kaj tio ĉi elsuĉis ŝian tutan vivoforton. Jes, ŝi mem tion konsciis kaj estis preta por foriĝi . . . Nun, almenaŭ, mi povos trankvile dormi, ŝi diris ĝuste antaŭ nelonge. Mi tiom bedaŭras, ho Vilia, la kompatindan malgrandulinon. Ja, tre bedaŭras«.

»Ankaŭ mi,« ŝi elflustras.

Senatente al ŝiaj vortoj, li disvolvas plue siajn pensojn:

»Inter ni jam delonge rompiĝis ĉiu interna rilato,« li diras. »Kiam ni geedziĝis, ni estis ankoraŭ veraj infanoj — mi dekse- kaj ŝi dekkvarjara — kaj se entute oni povas paroli pri nia mielmonato, ĝi estis tre mallonga. Niaj vojoj tiam disiĝis, Eĉ ideon ŝi ne havis pri miaj aspiroj. Ŝi opiniis politiko tumultojn sur la forumo, patrolojn tra la stratoj kaj sangajn ediktojn. Ĉiam kun tremego ŝi postrigardis min forirantan el la hejmo konvinkite, ke iun tagon oni ankaŭ min reportos kiel siatempe ŝian patron.«

Momenteton li paŭzas, poste daŭrigas:

»Kaj tamen — en mia koro estis anguleto apartenanta nur al ŝi. Kiel infano mi foje kaptis en la ĝardeno merlon, kiu mortotime disforkis sian bekon borante en min siajn flamojn okulojn. Kiam ajn mi ekrigardis Kornelian, mi nepre devis pensi pri tiu juna birdeto. Ĝuste tiel senpova, tiel kompatinda ŝi estis...« Denove li malĝoje rigardas antaŭ sin.

Ŝi ne okullasas lin. Silenton, ŝi flustras al si mem. Li volas elverŝi la koron. Ja, silenton!

»Estis misŝance por ŝi pendkroĉiĝi ĝuste al mi. Por ŝi estus plej bone edziniĝi al iu provinca nobelo«, al iu bienulo el Kampanio aŭ Tuscio. En la kvieta medio, for de la ekscito de l' granda urbeĝo, eble estus cikatriĝintaj la vundoj de la frua infaneco. Dum ĉi tie ili estis ĉiam denove disungataj. Nu, mi ne povis ŝin helpi kaj antaŭ ĉio mi ne povis zorgi pri ŝi tiom, kiom estus al ŝi necese. Mi ja havis mian laboron, miajn celojn, kiujn mi ne povis malatenti. Lastatempe pro tio mi ofte riproĉis min mem. Kaj tamen: ankaŭ hodiaŭ mi ne povus agi alie. Ĉu mi faras per tio grandan pekon?»

»Ne, Kajo,« ŝi diras mallaŭte kaj firme.

Agrable lin tuŝas la tonoj de tiuj simplaj, spontanaj vortoj. Rigarde li dankas al ŝi.

»Jes,« li diras, »se mi estus ricevinta vin kiel edzinon! Vi komprenas min, vigle interesiĝas pri mia laboro, inspiras, kiam mi eklacas, donas ripozon, kiam mi elĉerpiĝas. Kornelia estis nur ĉeno min katenanta; vi estus flugilo levanta min super ĉiujn aliajn.«

»Kornelia donis nur sian plejbonon,« ŝi diras firme kaj trankvile, kiel ĵus antaŭe. »Estas ja ne ŝia kulpo, ke ŝi ne povis doni al vi plimulte.«

Denove li levas la rigardon al ŝi. Perdiĝas la senfortiĝo el liaj okuloj, ili estas jam klaraj kiel kutime.

»Ankaŭ bona vi estas,« li diras kore. »Bona ja, sed ne pro malforto, kontraŭe, ĝuste pro la forto.« Lia rigardo ekkaresas: »Ho, vi!«

Ŝi spiras pli kaj pli rapide.

»Ne rigardu min tiel« ŝi petas kapfale.



Li ne respondas. Malrapide leviginte li iras al ŝi, levas ŝian vizagon. Ŝiaj okuloj larme rosas.

»Vi ploras?« ektime li demandas. »Kial vi ploras?«

Ŝi kapbalancas, delikate lin forpuŝas. Kaj tiam, tute subite, kun neretenebla sinmovado, ŝi ĉirkaŭbrakas lin puŝante la malsekan vizagon al lia brusto.

Kelkaj pasiaj flustretoj. Kaj klinante sin pli proksimen al ŝi, li ekkomprenas, kion ŝi parolas penplene, hontege kaj feliĉe. Jam la tuta sango ektorentas en lian koron:

»Infano — de vi — infano...«

»Vilia!« li svenventas. Disnebulas la spaco antaŭ liaj okuloj. Li klopodas sekundeton — sekundeton por sin superregi, tiam falas genue antaŭ ŝi, brakkaptas ĉirkaŭ ŝian zonon kaj kaŝas la kapon en ŝian sinon. Konvulsiaj plorĝemoj skuetas lian korpon.

Sinkline al li ŝi alvangigas sian vizagon. Intermiksita fluas iliaj larmoj, fluas laŭ la alpremataj vangoj.

Longe daŭras, ĝis ili ambaŭ retranskviliĝas. Li unua sin superregas. Nun li demande ŝin superŝutas: de kiam ŝi tion scias? Ĉu ŝi multe suferas? Nu, kial ŝi nenion al li diris? Kaj ĉu ŝi certe, tute certe scias? La forta, sinrega viro, ŝajne, tute ŝanĝiĝis, li iĝis knabo ne povanta satdemandi.

Ŝi respondas, sed langolame: ke ŝi, vere, jam longe supozis, sed, ĉar li ja havis tiom da zorgoj pri la malsanulino, ŝi ne volis maltranskviligi lian animon. — Ne, ŝi ne suferas: kiel li povas tion eĉ ekpensi! Ja, ŝi ĉiam tiom sopiris pri la infano! Jes, jes, tio estas tute, tute certa: de hodiaŭ matene ŝi tion scias, tute sen-

dube ja. Ŝi eĉ nun ne volis tion al li diri, sed ĉar li ŝin tiel rigardis.

Ĉio ĉi elŝprucas ĥaose, kiel la pensoj zigzagas tra ŝia kapo.

Rektiĝinte li denove staras antaŭ ŝi kun konfuzita rigardo, sencele vaganta tra la ĉambro. Li mordetas la lipojn, peze spiras kunpuŝante manon al la mano. Kien perdiĝis lia nevenkebla trankvilo?

Kaj tiam lia rigardo falglitas al la piedoj, li vidas la nigran togon, pezsulke falantan laŭ lia korpo. Kaj subite li ekmutas: lia voĉo tiel ŝanĝiĝas, ke la virino tuj eltiriĝas el la ebriiga feliĉo kaj ekatentas.

»Kiel strange,« li komencas »ke vi diris al mi tion ĝuste hodiaŭ, kiam mi enteriĝis Kornelian. Kaj, ke vi ĝuste hodiaŭ certiĝis. Ĉu ne ŝajnas al vi,« nun li tiel flustras, ke ŝi pli divenas ol aŭdas la vortojn — »kvazaŭ la malsanulino estus tiom longe hezitinta nur por donaci sian animon al mia infano?« Pro malforteta ekfrosto liaj vangoj eĉ plipaliĝas. Li sidiĝas apud ŝi parolante eĉ per pli flustra, apenaŭ aŭdebla, sensona voĉo, fremde ŝiriĝanta de la lipoj: »Mi devas al vi ion rakonti. Tio estis la lastan vesperon. Kiel kutime, mi sidis litrande kaj observis ŝin. Ni ne interparolis: kelkajn tagojn antaŭ tio ni iom malpaciĝis, ĉar mi prikonsentis inviton al grava konferenco kaj rekte de la lito foriris tien. De tiam ŝi restis silentema kaj nealirebla. Subite ŝi dislarĝiĝis la okulojn, alrigardis min kaj ekkriis: mi revenos! mi revenos! Dufoje ŝi tion kriis kaj tiam denove mutiĝis, tute nevolante al ni klarigi siajn vortojn. La saman nokton ŝi mortis«.

Silente ili sidas unu apud la alia. Kvazaŭ disversiĝus io sennoma, tutforte premante ilin malsupren en la salonon. Nur post longa silento ŝi ekparolas kaj la

sama frosto, ĵus vibranta en lia voĉo, tremas nun ankaŭ tra ŝiaj vortoj:

»Nun ankaŭ mi devas al vi ion konfidenci. De kiam mi eksentis, ke mi naskos infanon, mi tre riproĉis min. Vi ja scias: dum vi estas apud mi, ĉio estas bona; sed kiam mi estas sola, amase alsvarmas min la malbonaj sentoj, ke ni ambaŭ grave pekis, ke nia amo estas kontraŭ ĉiuj diaj kaj homaj rajtoj, ke mi estas adultulino. Sed, kiam mi ekpensas pri la infano mem, mia sufero eĉ duobligas. Kaj kiam mi hodiaŭ matene litkuŝis tute certe konvinkiginte pri mia stato, kiam denove komenciĝis akraj sinkulpigoj: tiam mi aŭdis, kiel du hejmosklavoj interparolas. Mi ne komprenis iliajn vortojn, ĉar ambaŭ estis tion fore kaj duonvoĉaj, sed poste, kiam ili alproksimiĝis klare mi komprenis kiel unu diras: ‚La sorto mem tiel decidis!‘ Tute klare kaj laŭte. Poste ili daŭrigis flustre kaj mi ne plu aŭdis eĉ vorteton.« Per la grandaj, enigmaj okuloj ŝi rigardas lin. »Ho, Kajo, ĉu vi opinios min tre malsaĝa kaj superstiĉema, se mi konfesos al vi, ke en tiu momento al mi ŝajnis aŭdi la voĉon de l' destino?« La lastaj vortoj sufokiĝas en malfacilege kaŝata ekscitiĝo.

Li kapneas.

»Ne,« li respondas. »La sorto mem tiel decidis. Vi donacos al mi filon, kiu estos inda al nia amo«.

Kaj nur nun li kuraĝas timete ekridi dum tiuj ĉi frostotremigaj momentoj.

»Sed, se estos infanino?« voĉe ŝi timemas.

»Estos filo« li diras firme, kvazaŭ li povus ordoni eĉ al la sorto mem. »Jes, filo, kiu elfinos mian vivon.«

## Libera popolo sur libera tero

Al la rigardoj de l' rajdantoj etendiĝas ebena, sunkisata en sia tuta fruktora beleceto. Fresige blovetas facila venteto. Okulante nur frukturaj kampoj, kaj kelkloke, tie kaj ĉi tie neĝe blankas aŭ arde flavas muroj de l' vilaĝoj kaj bienetoj. Fagoj disŝovas kvazaŭ benogeste siajn ombrodonajn branĉojn. La aleo, laŭ kiu galopas rajdanto similas per siaj morusuloj al ombra, verde tegmentita koridoro. Ĉerande fluas rivereto murmurante sian eternan monologon. En la aero ĝojtriloj de birdoj. Susurete zumas diligentaj abeloj svarme pendantaj sur floroj. La tuta pejzaĝo elspiras trankvilon, silenton kaj harmonion.

Rajdante tra Transpadio la junulo trinkas per ĉiuj sentorganoj la originan forton kaj purecon de tiu ĉi lando. Li kunirigis nur du servistojn, kiuj lin akompanas ankaŭ enese kaj bridtenas po unu ŝarĝĉevalo. La ceterajn akompanantojn li forsendis antaŭen, ordoninte al ili atendi en Mediolano. Kaj nun li estas libera, sensarĝa kiel li jam delonge ne estis. Tutanime li povas nun ĝui la ĉirkaŭaĵon.

Laŭ la ŝoseo venas al li renkonte vilaĝano aŭ servisto. Li urs-paŝas apud la du-rada bovoveturileto kaj kantas ian melodion. La rajdanto lin haltigas.

»Ĉu vi parolas latine?«

La homo, vide al la nobela vojaĝanto, haltas kaj interrompas la kantadon. Elmontrante belegajn dentojn, ŝajne eĉ neĝblankajn, ĉar lia vizaĝo estas sunbruna, li vigle respondas:

»Mi, latine, ho sinjoro! Mi tre bone latine!

Tiu »tre bona latinaĵo« elsaltetas tiom malmole kaj malglate, ke la rajdanto devas ekridi. Tio igas ankaŭ la vilaĝanon ĝojeksplodi: li skuiĝas, frapklakas la nudajn, brunajn koksojn, fleksante sin preskaŭ ĝistere. Fine ankaŭ la servistoj ne povas konservi sian pompan dignon: konkorde ili aliĝas. Kaj tiu kvarvoĉa ridado sonoras tiom laŭte kaj forte tra la tuta ĉirkaŭaĵo, ke la abeloj kaj birdoj ekmutiĝas kvazaŭ por kaŝaŭskulti. Fine ĉiuj kvar rekvietiĝas. La rajdanto pludemandas:

»Ĉu vi konas Kaburon?«

La vilaĝano pripensas, kun fingro nazpinte, kapskuas kaj diras naive:

»Ne, sinjoro, mi ne koni nenio Romano.«

»Sed Kaburo ja ne estas romano,« rediras akcentante la alia. »Kaburo estas hejmano, transpadiano.«

»Hej!« la vilaĝano denove ekrikanas fandiĝante en ĝojon: »Ne romano! Kial vi ne diri tio tuj? Nu, koni kompreneble lin! Kiel ja li nomiĝas?«

»Kaburo, hej aŭdu! Kajo Valerio Kaburo!«

»Kaburo!« krias la vilaĝano, »Kaburo! Ho, li tre eminenta homo! Tre — tre —« Li serĉas ian flatan epiteton, sed ne povante rememori, li ripetas la ĵus diritan: »Jes, eminenta homo.«

»Nu jen! Kaj ĉu vi scias ankaŭ, kie estas lia bieno?«

Kiel ĉiuj demandoj, tiel ankaŭ tiu ĉi naskas en la vilaĝano senliman gajecon. Li ĉirkaŭsaltas, ridgar-

garas, gratas sian nazpinton kaj orelkonkon. Kiam la rajdanto komencas malpacienti, li elbuŝigas:

»Vi min demandi, kie esti lia bieno? Hej, hej! Tre bone! Vi ja ĝuste rajdi direkte al la bieno! Vi vidi blankan domon — nu tie?« li montras al kelko da domoj en kvaronhora distanco. »Tie Kaburo! Tie!« Li balancas, klinas la kapon kaj longe ridante montras al la rajdanto la direkton. Tiu ĉi afable lin dankinte jam forrajdas.

La ŝoseo estas ombra kaj senpolva. Birdoj kaj insektoj daŭrigas la interrompitan kanton. La ĉevaloj jam flarkaptis, ke estas proksime stalo kaj galopegas, Baldaŭ kaj plej agrable pasas tiel la kvaronhora vojo. Jam ekblankas muroj. Al ili gvidas flankvojeteto, disigante de la ŝoseo. La rajdanto ekvojas tiudirekten: li jam enrajdas en la malfermitan korton kaj haltigas la ĉevalon.

Bojege elfuriozas hundo el sia dometo, rompstreĉante la tintan ĉenon. De la putorando saltas granda, blanka kato, kiu tie sunĝuis. Kokinoj dispafiĝas en kapturna timo, grupeto da anasoj indigne leviĝas, dum kelke da anseroj flugilante ĉkinsultas.

En la malalta enirpordo de la maldekstra domo aperas maljuneta virino.

Mansirme super la okuloj ŝi observas la alveninton. Nun ŝi alpaŝas pli proksimen kaj demandas lin pri la deziroj en sufiĉe bona, nur iom malglata latinaja. Li respondas, ke li volus paroli kun la dommastro. Eh, la dommastro estas surkampe, rediras la virino. Ĉu la fremda sinjoro eble havas tempon por atendi lian revenon. Li diras, ke li havas kaj saltas de sur la ĉevalo. Same ankaŭ la servistoj.

Vokite de la virino aperas juna knabino kun kiu ŝi mallaŭte interparolas. Tiam denove ŝi turniĝas al la fremdulo, petante lin eniri kun ŝi en la domon. Ŝia filino montras al la servistoj la stalon, kie ili povos loki la ĉevalojn.

La gasto ne povas satmiri pri la sintenado kaj digno de tiu virino, kiu paŝas antaŭ li, same kiel ankaŭ ne pri la senĝena, neafekta digno de ŝia tuta staĵo. Li pensas pri la edzinoj de l' bienuloj tie — fore — ĉe l' sudo. Tio estas estaĵoj, tro frue maljunigintaj sub laborego, kun zorgaj vizaĝoj, kurbaj dorsoj; virinoj arogantaj, avidaj kaj mensogemaj. Kaj jen, ĉi tiu rememorigas al li iun el la mitaj praavinoj de la glorgento, kiam ŝi afable kaj kore, sed tamen kun neeldirebla digno, proponas al li lokon ĉe l' fajrujo, ja, ĉe sia fajrujo.

Kelkatempe ambaŭ silentas: foje-foje li sorbŝmacas gluton el la forta, akvumita hejmovino, kiun en argila kruĉo ŝi metis antaŭ lin. Poste li rompmordas peceton el la kruda, sana hejmopano kaj manĝas la kremitan fromaĝon. Ŝi sidiĝas sur benketo kaj denove prenas la ŝpinilon, kiun ŝi certe formetis, kiam li venis.

Post kelkaj momentoj ŝi rompas la silenton. Virina scivolemo venkas la dignan sindetenon, kiun ŝi ĝis nun praktikis, jam ŝi demandas, ĉu de malproksime li venas. — El Hispanio, li respondas. — Nu, kie ĝi estas; pri tiu ĉi lando ŝi ja neniam aŭdis. — Multcent mejlojn direkte al la okcidento, klarigas li; ĉe la mondrando, kie Oceano banas la bordojn de Eŭropo. Mire ŝi kapbalancas kaj tuj enketas plue, kion li tie faris, se permesate demandi. — Senĝene ŝi demandu, li afablas; nu, komisiite de la ŝtato li restadis tie: kiel *kvestoro*, se ŝi scias, kio ĝi estas. — Komprenoble, ŝi

diras, ĝi estas homo, kiu impostas. Kaj iom timeme ŝi almetas, ke eble li estas ĉi tien sendita por la sama afero. — Ne, li trankviligas ridetante. Finiĝis la jaro de lia ofico kaj nun li revenas Romon. Tio ja mirigus ŝin, ŝi respondas, ĉar ili ĉiam akurate pagas la impostojn kun krompagoj kaj neniam donis kaŭzojn por plendoj. Li informiĝas, ĉu ili harmonias kun sia kvestoro. Tre bone, ŝi kapjesas; li estas tre prudenta homo, kiu ne ŝarĝas sur la vilaĝanon pli grandan pagon ol li povas elporti. Generale al ili estas pli bone, de kiam ili havas la latinan civitanecon, kiel la sinjoro certe scias. Ĝi estas rekompenco pro ilia kuraĝo en la milito de la 64 jaro. Ankaŭ ŝia edzo partoprenis, ŝi fieras aldone. La latina civitaneco estas nemalmulte grava, ŝi mencias pretere, sed la romia civitaneco estas eĉ multe pli grava. Tion oni povas facile imagi, ŝi konfirmas kun serioza rigardo, kaj la tuta lando ĝin jam sopirege atendas. — Krasso diris al mi la veron, li pensas. La romia civitaneco signifas por tiu ĉi lando vere la vivproblemon. Ĝuste li volas pli detale tion priparoli, kiam silueto ekombas la pordon. Li alrigardas tien.

Eniras viro, ŝultrolarĝa, grizethara, vestita per simpla vilaĝana tolkitelo. Brunkoloraj, muskoloraj brakoj pendas inerte laŭ la korpo, kiel ĉe laboristo fininta sian taglaboron. Trankvile esploras liaj rigardoj la vizitanton. Same klaraj kaj energiaj ili estas kiel ĉe la fremtdulo. Gentile li alproksimiĝas.

»Oni diris al mi en la korto, ke alvenis fremda roma sinjoro, dezirante kun mi paroli. Per kio mi servu al vi?«

El liaj vortoj, el lia tuta sintenado elradias tiu sama senĝena, neafekta komplezemo, kiun la gasto rimarkis ankaŭ ĉe la edzino; sincera, amika afableco,



sen eĉ la plej malgranda signo de flatemo aŭ hipokrita humilo.

La fremdulo resalutas ĝentile laŭ la sama maniero:

»Antaŭ ĉio, ke vi akceptu min por tranokti« li respondas, »se mi ne tro ĝenos vin.«

La dommastro rapide ekrigardas la edzinon.

»Jam ĉio preparita« ŝi respondas la mutan demandon.

Trankvilaj, energiaj okuloj denove rigardas la gaston.

»Mia hejmo estu via hejmo.«

Kiam ili residiĝas ĉirkaŭ la fajrujo — ankaŭ la dommastro alprenas seĝon kaj komencas kun la edzino interparolon pri la hejmaĵoj — la fremdulo kaŝrigarde observas la homojn kaj objektojn. Pli kaj pli lin kaptas la sento, ke li vojeraris en la pasintan jarcenton, en la epokon, kiam la homoj estis pli primitivaj, pli modestaj — ankaŭ pli grandaj. En tia ĉambro verŝajne ankaŭ Cincinato ripozis post la kamplaboro, ripozigante la rigardon, observante simple la blankajn murojn, sur kiuj nur kelkloke briletis atente purigitaj teleroj. Li atendis la meritatan, senspican, sed nutran mangaĵon. Tiam ankoraŭ vivis la homoj, kiuj per sia sana forto vastigis kaj potencigis la respublikon. Certe tiaj estis la viroj kaj virinoj, transformintaj la italan arbarplenan dezerton en ridetantan florgardenon. Ili, kiuj per sia vivforto kaj patrintino naskis la genton simplan kaj fortegan kiel la gepatroj mem. Sed la granda urbo alportis kun si malfeliĉon, per siaj troaj rafinaĵoj kaj malnecesaj bezonoj, en kiuj pereis ĉiu originaleco, graveco kaj forto.

La dommastro tute ne demandas, kial kaj kun kia

intenco li venis. Nur kelkaj ĝentilaj demandoj: kia la farto, ĉu li jam ion mangis, jen ĉio. Ĉiu vorto, spirante reteniĝemon, dignon, estas saturita de sincera gastamo.

Eniras du junuloj, laŭ la staturō kaj sintenado similaj al tiu ĉi pli aĝa. Ilin la vilaĝano prezentas kiel siajn filojn; jen, ankaŭ la knabino, kiun li vidis jam en la korto, kaj fine postsekvas ankaŭ geservistoj. La dommastrino okupiĝas ĉe l' fajrujo helpate de la filino. Poste ĉiuj sidiĝas ĉirkaŭ la kvadrata tablo, farita el puregaj, tabuloj, por vespermanĝi: tablofrunte la dommastro, apud li la gasto.

Simpla estas ankaŭ la vespermanĝo — kiel ĉio en tiu ĉi domo: malmole kuiritaj ovoĵoj, nestante sur salato, fazeolita kapridaĵo kaj fromaĝo. Krome la malforta, akvumita vino, alportita sur la tablon en kruĉego, el kiu povas ĉiu laŭplaĉe plenigi sian kruĉeton.

Post la manĝo la dommastro komisias laboron por la sekva tago. Tuj leviĝas for de l' tablo la virinoj, la filoj kaj geservistoj, dezirante al la dommastro kaj fremdulo bonan nokton. Ili eliras lace, pezpaŝe el la ĉambro. Nur la gasto kaj gastiganto restas solaj.

Mute rigardas la gasto antaŭ sin, fingrante per elverŝita vino komplikitajn figuraĵojn sur la tablo-tabulo. Li sin demandas, kiel komenci la interparolon, pro kiu li ja venis ĉi tien, en tiun sunan, fruktodonan regionon, kiu eĉ ne iomete similas al aliaj ĝis nun viditaj.

Ĉar la gastiganto unua ekparolas, nenecese, ke li plue turmentiĝu:

»Vi min serĉis?«

La gasto okullevas kaj penetre ekrigardas la seriozan, iom severan vizaĝon de l' homo, sur kiun la

flamo de l' fajrujo skribas siajn flagrajn, tremetajn rebrilojn.

»Estas al vi konate — ?«

»Oni diris al mi.« Kaj poste jam pli klare li aldonas: »La vilaĝano, kiu montris al vi la vojon.«

»Jes.« Nur nun la gasto kapjese konfirmas la unuan demandon. »Mi volis paroli kun vi. Mi devas al vi transdoni salutojn de Krasso.«

La griza kapo kliniĝas.

»Mi konas Krasson. Vi estas iu el liaj amikoj?«

»Ni kunlaboras.« Li ĉirkaŭrigardas. »Ĉu mi povas transdiri al vi lian komunikon?«

»Parolu ja. Ĉi tie en la vilaĝo neniu kaŝaŭskultas.«

Malgraŭ tiu trankviliga deklaro, la gasto daŭrigas obtuze:

»Krasso sciigas al vi,« li kliniĝas pli proksimen, »ke vi estu pretaj. Nur momenteton plu kaj eksonos la minuto, kiam ni provos fari ion por vi.«

Okulpenetre rigardas la maljunulo la junulon.

»He, kiu vi estas?«

La junulo senpacience mansvingas.

»Estis necese tiel komenci: Krasso sciigas al vi, ke vi povas plene konfidi al mi — je mia *mantua juro*!« La lastajn vortojn li akcentas.

Kaburo malsereniĝas enpense.

»Ŝajne Krasso vin tre fidas,« li diras, »ĉar li konfidencis al vi la signalvorton. Do, parolu libere, mi konfidas al vi. Eble Krasso povos fari ion por ni?«

»Krasso plej baldaŭ fariĝos *cenzero* kaj tiam li libere manipulos ankaŭ la civitanajn listojn. Li iĝos enskribi en tiujn listojn ĉiujn nomojn, kiujn vi diros al mi.«

La maljunulo mirigite alrigardas.

»Vere, multon li promesas.«

»Krasso ĉiam plenumis, kion li promesis. («Tion mi scias« elmurmuras Kaburo). La plena civitaneco, kiun vi tiom longe vane priaspiris, estas jam al vi certigita. Mi ne volas perdi tempon per vanaj vortoj: kion tiu paŝo signifus, vi scias same bone, kiel mi. Sed ni esperas, ke ankaŭ vi rekompencos nian penon per la plenumo de niaj kondiĉoj.«

»Kondiĉoj?« La frunto de la maljunulo nubigas.

»Nu ne tiaj, ke vi ne povus ilin akcepti. Ni ne tentas vin ekribeli aŭ revolucii. Sed ni devas vole-nevole vin vortligi, ke vi al la popolpartio — kaj antaŭ ĉio al Krasso kaj mi — konservos la fidelecon.«

La frunto de Kaburo ankoraŭ ne sereniĝas.

»Nu, kial pri tio perdi la vortojn?« li demandas.

»Pri tiu ĉi kondiĉo ni jam delonge konsentis. Se ne estas io alia...«

»Tiu ĉi kondiĉo validis nur por la popolpartio,« interrompas la gasto. »Sed Krasso kaj mi — havas precipan intereson pri via persona sindevigo al ni.«

La maljunulo rigardas lin malkonfide, sed diras nenion. La gasto daŭrigas: »La popolpartio kaj ni — estas nun la samo. Sed estas demando, ĉu tiel restos. En Romo ĉio ekbolis. Povas okazi — mi diras ‚povas‘! — ŝanĝiĝo. Ne hodiaŭ, ankaŭ morgaŭ ne, eble post dek-dekkvin jaroj. Ni ambaŭ projektas reformojn, kiujn la urbegaj voĉdonantoj ne prikonsentos, lasante nin en amaso da embaraso. Por tiu okazo necesas, ke ni povu apogi nin al niaj amikoj el la valo.«

La maljunulo ankoraŭ ĉiam silentas, ŝajne li pricerbumas, kion li ĵus aŭdis. Nun li demandas, kiel ĵus antaŭe, sindetene, malkonfide:

»Vi diris: reformoj. Kion vi pensas per tio?«

Denove senpacienca mansvingo.

»Ho Kaburo, ankoraŭ ĉiam vi opinias min konspirulo. Mi certigas vin, ke mi eĉ ideon ne havas por nur unupaŝe devojiĝi for de la leĝo. Refoje mi diras al vi, ke por mi gravas nur: havi anstataŭ la urbega proletaro, kiun mi taksas tute malalte, dorsapogon en tiu ĉi regiono, kiu al mi tre valoras. Ni plivastigu la kondiĉon: vi devligas vin esti al ni blinde fidelaj, ĝis ni postulos ion, kio kontraŭas la leĝon.«

Kiel antaŭ momento, la maljunulo ankaŭ nun vort-vorte pripensas ĉion. Poste li singardemas:

»He, pri tio oni povus paroli.« Refoje li pripensas kaj decide kapjesas. »Tion neniu povas rifuzi. — Kiom da tempo vi disponas?«

»Unu semajnon.«

»Sufiĉas. Mi kunvokos la konfidatojn de niaj liganoj kaj vi povos ĉion diri al ili. Espereble, ili samopinionos kun mi.« Li profunde ekspiras. »Eble vin mirigas tia misteremo. Ankaŭ nin ĝi jam tedegas. Ni volus esti romianoj. Sed, se ni volus atendi, ĝis nin rememoros la grandsinjoroj tie ĉe vi, ĉiuj ni dume maljunule griziĝus. Kaj tial ni interligiĝis por kune elbatali niajn postulojn. Sed ne kontraŭ la leĝo: ĝi restas nia ĉefprincipo. Krome ankaŭ en la kunveno ĉe Mantua oni nenion alian decidis. Ni spitis ĉiujn tentojn — kaj tiaj ja amasis. Sed same tiom energie, kiom ni kroĉtenas nin al la leĝo, ni kroĉtenos nin ankaŭ al tio, kion ni opinios nia rajto. Ni sangverŝis por la komuna bono, por ĝi ni portas nian ŝarĝon, do ni rajtas ja havi ankaŭ egalecon.«

»Kaj, miaopinie, tute prave,« kapjesas la gasto. »Nu, por pruvi, kiom mi simpatias al vi — sciu, ke

ĝuste mi konsilis al Krasso tion pri la civitanaj listoj.«

La maljunulo surprizite alrigardas lin, poste malrapide diras:

»Mi jam unu fojon demandis, kiel vi nomiĝas. Ne pensu, ke mi altrude scivolemas, ĉar mi ripetas la demandon.«

La fremdulo leviĝas preteraŭdante la vortojn.

»Estas jam malfrue,« li diras, »kaj morgaŭ, ankaŭ la sekvajn tagojn, ni ambaŭ havos multe por labori. Ĉu vi estos afabla montri al mi la dormolokon?«  
Treniĝe li iras al la pordo, haltas kaj refoje turniĝas:  
»Mia nomo? Eh, mia nomo nenion diros al vi: mi nomiĝas Cezaro. Kajo Julio Cezaro.«

## Gvidanto de l' popolo

»Ho kuncivitanoj!« Ŝvelforte tondras la hela voĉo tra la tuta vasta forumo. Facile ĝi aŭdiĝas de la Templo de l' Konkordo ĝis tiu de l' Flamvirgulinaj.  
»La konservativuloj apelacias al sia tradicio. La tradicio estas tiu jurtitolo, per kiu ili arogas al si rangojn, la tradicio estas tiu preteksto, per kiu ili vin ekspluatas, jes, la tradicio estas ilia flugvorto. Nu vere, ankaŭ mi estas adepto de l' tradicio: mi ĝin ŝatas, estimas kaj amas.« (*Muta silento.*) »Sed ĝuste en tio ja estas mal-feliĉo, ke la konservativuloj havas nenian tradicion.« (*Brua aplaŭdo. Ekkrioj: »Oho!«*)

»Iu, ŝajne, ne kredas tion. Sed mi pruvos al vi. Nu, kio estis la estimataj prauloj de niaj aristokratoj? Ne permesu blindigi vin per belaj vortoj: kamparanoj ili estis.« (*Aklamoj.*) »Tute simplaj kamparanoj.« (*Aklamoj fortiĝas.*) »Nur la kamparanoj kaj nenio alia!« (*Aklamoj tumultas*) »Jen: Fabio — kamparano« (*Aprobo: »Tre bone!«*) »Mucio — kamparano« (*Aklamo: »Jes ja!*) »Kornelio — kamparano.« (*Silento: Sullo estis Korneliano! Poste tumulto de entuziasmo!*) »Julio — kamparano!« (*Uragano de ĝojkrioj. La popolo preparas sin ĵetiĝi sur la tribunon por ŝultrolevi la oratoron.*) »He, de kie oni fortiris Cincinaton, kiun oni volonte montras al vi, kiel luman ekzemplon? Ĉu

ne de la plugilo?« (*Longaj aplaŭdoj.*) »Nu, kie estis Kurio Dentato, kiam li rifuzis la donacojn de la samnianoj, parenteze: jen la ekzemplo, kies imiton oni vane serĉus ĉe la nobelaj moŝtoj!« (*Rido.*) »Li sidis ĉe l' fajrujo kaj propramane senŝeligis rapon por la tagmanĝo. («*Rapon! Rapon! Nun vi mem aŭdis!*« »*Silenton! Li pluparolas!*«)

»Sed la kamparanoj devas iom scipovi: pri la terkulturo kaj kiam ili fortiĝas ankaŭ pri la bienkulturo, kaj kiam ili eĉ pli fortiĝas ankaŭ pri la politika ekonomio!« (*Denove uragano de l' aproboj.*) »Alie ili valoras nulon« — («*Jes ja!*«) — Ĉar kiel diferencas la ŝtata de la agrikultura administro? Nur laŭ la amplekso!« — (*Ĝuste tiel!*) — »Se la kamparano volas ricevi lakton de la bovino, li antaŭ ĉio klopodos havigi al ĝi bonan nutraĵon kaj necesan prizorgon. Li ja scias: kiu ne donas, ankaŭ ne povas ricevi! Kaj ĝuste tial li povas laŭplaĉe melki — li kaj ankaŭ la bovino estas kontentaj. Sed niaj guberniestroj estas tiom malsaĝaj, ke ili tion ne povas kompreni!« (*Aproboj.*) »Ili pensas, ke ili povas elpumpi siajn provincojn ĝis la lasta sukĝuto, forgesante, ke la melkobovino pro tio suferas kaj fine eĉ pereas!« (*Longaj oklamoj.*) »Kaj nun tiuj ĉe la aŭtoritata centro mir-konsterniĝas demandante: Pro kio ja pli kaj pli ruiniĝas niaj plej riĉaj provincoj. Eh, pro kio? Pro la krimula malsaĝo de tiu sistemo, kiun oni devas jam foje publike brulstampi.« (*Furiozaj aplaŭdoj.*) »Eble tamen oni sukcesos, almenaŭ en kelkajn senlime malplenajn kapmelonojn, enverŝi guteton da prudento!« (*Krio: maleble ja!*)

»Sendube ankaŭ mi ne kredas tion! Por la nobelaj moŝtuloj pli ol ĉio valoras iliaj partiaj profitoj.



Ja, eĉ pli ol la plej gravaj interesoj, la interesoj, kiuj estas komunaj al ni ĉiuj. Tiuj melonoj nur tiam saĝlumigōs, kiam oni ilin tratrauos!« (*Tumulto; interrompo:* »*Vi ŝajne serĉas homojn por helpi vin pri tio!*«)

»Mi serĉas virojn!« (*Krioj, aproboj.*) »La virojn, kiuj decidis ne plu toleri tiujn senatajn aferadojn! Kaj okulatinge tra la tuta forumo mi vidas nur tiajn virojn!« (*Longaj aklamoj.*) Escepte la malmultajn, kiuj sin vendis al la senato kaj kiujn mi povas nur bedaŭri!« (*Bruaj fi-krioj*) »Kun vi, ho viroj, mi iros antaŭ la kurion kaj al la tie kunvenintaj mumioj mi konsilos, ke oni penu plej baldaŭ fari ordon, alie la popolo mem prenos en siajn manojn la aferojn! *Caveant consules!*« La lastan pikbombaston ĵetas liaj pugnoj dismalferme kontraŭ la senatejon. Li jam malsupreniras. Ĉirkaŭ li tondro de senlimaj ovacioj.

Krasso retenigās en la malantaŭo de la tribuno. Nun li aliras la oratoron kaj manpremas lin.

»He, bone vi parolis, Cezaro!« li laŭdas.

»Kompreneble, ĉio ĉi estas nur krimulaj babilaĵoj« seke konfirmas la Juliano, »sed feliĉe por ĉiuj — neniu opinias tion serioza kaj eĉ plej malmulte la kontraŭpartio, ĵus laŭmerite rebatita. Aha, jen ankaŭ Katono, tute spirŝaŭma, kvazaŭ incitita bovo«.

»Sed, escepte, li estas sobra,« sarkasmas Krasso. »Nu, ni iru!« Ili malsupreniras la ŝtuparon, unue Krasso kun Cezaro kaj post ili minace kunbuligis la ceteraj ĉefoj de l' partio, gvidate de Manilio, Gabinio kaj Kapitono. Dolĉe ili mienas, sed kaŝrigardoj malkovras koleron, indignon kaj apenaŭ premegatan furiozon.

Cezaro ilin eĉ ne ekrigardas. Liaj klaraj okuloj ĉirkaŭflugas tra la forumo.

»Tiu ĉi popolo ne estas kapabla pensi« li diras. »Por tiu, kiu antaŭ ĝian nesatigeblan buŝegon ĵetas pli grandan glutajon, ĝi trakuros eĉ la fajron. Sur la lipoj de l' plej genia oratoro, en la cerbo de l' plej genia ŝtatisto estas eĉ ne la duono de tiu potenco, kiel unu enhavas unu sola el viaj monŝrankoj.«

»Ŝajne vi pravas« jesas Krasso kun sia rultondra rido, kvazaŭ ŝprucanta el la diafragma.

En flankstrato korvo-svarme altumultas ilin la ceteraj, kiuj evidente ne plu povas ĝisatendi la interklarigojn. Jam sarkasmas kritiko, riproĉoj, minacoj. Distorentas pikkrioj kaj plendoj. Precipe paroksismas Gabinio.

»Tion oni vere brile aranĝis« li krias kaj batpuŝe disbrakadas laŭ takto de l' vortoj. »Cicerono, ankoraŭ hieraŭ nia amiko, hodiaŭ estas nia plej pasia kontraŭulo. La subtila ŝak-movo per la transpaciaj civitanlistoj senvalorigis. Kaj Pompejon, al kiu ni helpis grimpi en la selon de l' potenco, ni ne plu povas kapti; li fariĝis nevenkebla! Brave! Tio vere signifas: gvidi la partion!«

Cezaro konservas sian eksteran trankvilon, kvankam li interne furiozegas. Sed ŝajnas, ke tial Krasso perdis la paciencon.

»Ion vi forgesis,« li ekgrumblas, rigardante Gabinion okulangule.

»Kaj ĝi —«

»Ke mi ne plu donos mian monon.«

Ĉiuj konsternite rigidiĝas: — tiam ekŝprucas nova torento, sed tute malsimila al la antaŭa. Nur tiuj kelkaj vortoj sufiĉis por malkaŝi iliajn verajn mo-

tivojn: la sola celo de iliaj kvereloj estis refirmigi siajn ekŝancelitajn poziciojn en la partio. Kaj nun Krasso ektiris la star-bazon el sub iliaj piedoj!

Per kaskadaj frazoj ili sin trudkroĉas al li, penante savi la plej gravan: la profitigajn postenojn en la partio.

Subite estingiĝas la tumulto. Dissonis ekkrio mallonga kaj akra kvazaŭ oni tranĉus krudan silkaĵon! Ĉiuj ekaŭskulte kaplevas, kolstreĉas: antaŭ ili staras Cezaro trem skuigante, apenaŭ povante elbuŝigi la vortojn:

»Kiom abomenindaj vi estas!« li stertoras. »Tie fore oni dividas la mondon — por avelo oni aĉetas la tutan regnon — kaj vi kalkansidas ĉi tie, rabante unu de la alia panerojn! Stultuloj! Malsaĝuloj! Hontu jam!«

Ili silentas, rigardas lin disbuŝante, senkomprene lia vulkana temperamento eljetis tro kunpremita la penson, kaj ili ne povas ĝin tuj kompreni.

Krasso, la bankiero, kutimanta pensi en mallongigoj, unua ekkomprenas. Kvazaŭ fajrero trafulmas lin la vortoj de Cezaro.

»Cezaro pravas!« li ekkrias. »Per nia, sole per nia forto ni estus levintaj nin, sed hontige vi perfidis nin — fi, vi timis perdi vian sidlokon ĉe la manĝotplena tablo! Kaj nun vi arogas al vi rajton nin riproĉi! Eh, ne, ne! Jam sufiĉe! Se vi volas, ke mi donu al vi nur tiometon —« ungo klako de la kolere tremantaj fingroj, »estas necese fleksi la nukon; ĉu komprenite? Jes ja, fleksi la nukon!«

Gabinio, Kapitono, Manilio interŝanĝas rigardojn. Antaŭ ili staras tiuj du, rigidaj kiel statuoj de l' pasio: Cezaro, pala, preskaŭ fige verda; Krasso, pur-

pura, jam iom viola. Ankoraŭ unu fulma interrigardo, tiam Manilio demandas preskaŭ humile:

»Nu kion — kion vi postulas de ni?«

Forfluas la sangondo el la kapo de Krasso. Elŝvelas la graspuŝfaj muskoloj de l' vizaĝo. La lipoj maldikiĝas distirite.

»Ke vi blinde obeu ĉiun nian decidon,« malmole kaj brute li elbuŝigas. »Kion ni elmetas antaŭ la publikon, tion oni devas senkondiĉe porbatali. Kiu spitos, flugos for!«

»Sed tio estas diktatoreco!« Salivas Gabinio voĉrompite.

La glaciaj okuloj de la bankiero falas sur lin kiel du peziloj.

»Kaj ĉu ĝi ja ne estas la vera fincelo de la demokratio?« Li forturniĝas kaj senvorte, malestime, eĉ ne ekrigardante la mutiĝintan grupeton, li eniras kun Cezaro en sian hejmon, antaŭ kiu ili staris. La ceteraj post ili — nun jam malsovaĝa brutaro.

Duonhoron poste estas jam ĉio finita. Manilio submetiĝas, ĵuras obeemon, promesas devigi la vicĉefojn kaj la agitistojn al la disciplino. Same tiel ankaŭ Kapitono. Gabinio iros al Pompejo en Azion. Cezaro reakiris unu ĝismortan malamikon pli . . .

## „Panem et Circenses!...“

»Kion? — Ne, la sidloko estas ankoraŭ neokutpita. Sidiĝu ja trankvile tie ĉi. — Nu, atendu, mi iom forŝoviĝos. — Tiel do, jam pli bone. Kun iom da bonvolo ĉio plenumebla. — Ĉu...kion? — Ah tiel, ne, mi sidas tute komforte. Ne necesas al mi multe da loko. He, ankaŭ vi, najbareto, ne estas ventrobarelo. Nu ja, estas malbonaj tempoj. Senĉese oni parolas pri la venkoj tie, nun en Afriko, nun en Azio, sed ni en Romo havas nenian profiton. La faruno plikarĝiĝas ĉiutage kaj pri la rabatita prezo ne estas io en ordo: la greno perdiĝas en la grenejoj de la spekulaciantoj kaj la aĉetanto ricevas ventumajon. — Kion? — Nu sciu, mi iom surdetas: ĉe *Aquae Sextiae* germana bandito frapegis sur mian kapon kaj mi restis surdeta. — He jes, mi estas veterano de Mario. Elservinta rot-estro de la sesa legio. Tri honorĉenoj, du medaloj kaj folikrono. Ankoraŭ mi estas junulo, se vi pripensas, ke mi estas sesdekjara, hej? Mi estis jam inter tiuj, kiuj ĉasis la Negrion, Jugurthon, kiun tiam ruzkaptis Sullo. Mi batalis ankaŭ kontraŭ Cimbroj kaj Teŭtonoj. Hejha, tio estis tempoj! Tiam ankoraŭ ekzistis oficiroj kaj generaloj! Mario! Se mi nur rememoras lin! Li estis unu el niaj bravulegoj kaj ne kiel tiuj nuntempaj moŝtuloj, kiuj tuj fingroŝtopas

la nazon, ekflarante ajlon. Li estis kruda kiel kotŝuo, akra kiel glavo, sed justa, kaj por la militistoj vera patro, kiam ili konsciencie plenumis la devon. Nu, tial oni lin en Romo malamamis kaj incitis Sullon kontraŭ lin. La vivan Marion Sullo ne povis renversi en lukto. Kaj tial, pro furiozo, kruda li ja estis, li diskrevigis lian tombon kaj faligis sur Kapitolo liajn triumfajn emblemojn. He, Cezaro iom riparis la aferon. — Kion? Diable, de kie vi ja elsaltis, ke vi tion ne scias? Tiel, vi estis en vojaĝo. Aŭdu do min bone: Cezaro estas nun edilo, kion? Li estas nevo de Mario, nu, lia onklino estis, mi scie, edzino de la maljunulo. He, belega knabo! Jes ja, sed mi volis ion alian — eh, kion mi ĝuste volis? — Ja, vere! Ni paprolis pri la pompkolono de Mario. Kuŝis la ruboj dum jaroj tie kaj neniu kuraĝis ilin tuŝi. Kaj nin, la malnovajn Marianojn, kiam ajn ni tie preteriris, ĉiufoje io korpikis. Tiel daŭris, ĝis Cezaro fariĝis edilo. Kaj subite, iun matenon, antaŭ eble dekkvar tagoj, apenaŭ mi ellitiĝis, venis al mi najbaro Velejo, same maljuna veterano de Vercelo, kaj diris: ‚Hej vi, Lucio, ĉu vi jam aŭdis?‘ Nu, kion mi estu aŭdinta? mi rediris. Mi ja nenien iras, mi rediris. ‚Oni diras, ke la emblemoj de Mario estas restarigitaj‘, li respondis. Kvazaŭ fulmo tiam disfajris tra miaj maljunaj ostoj, mi devis falsidiĝi. ‚Kion vi diras?‘ mi alkriis. ‚La emblemoj de Mario estas restarigitaj‘ — li ripetis. ‚Diris tion al mi la homoj venintaj de la Roma Placo‘. Nu facile vi povas imagi, kiel estis en mia animo! ‚Seksto, mi diris, tion ni ja devas vidi.‘ Kaj tiam ni ekmarŝis, kiom paŝkapti povis niaj maljunaj piedoj, kiuj sub si sentis iam la numidian sablon kaj la alpajn rokojn. Kaj ek al la Placo! Ju pli ni prok-

simiĝis al la arkaĵo de *Jano*, des pli terura iĝis la kunpremiĝo kaj la homoj parolis nur pri tio. Nu, ni elkubutis nin antaŭen, paŝ-al-paŝe — kaj subite antaŭ ni: novnova kaj brila, kvazaŭ hieraŭ restarigita, statuo de Mario, dekstre kaj maldekstre la trofeoj. Mi ne kapablas diri al vi, kion mi sentis: en mia maljuna kapmelono ĉio zumis, kiel iam ĉe *Aquae Sextiae*, la kruroj ekfleksiĝinte tremis kaj la gorgo kvazaŭ kunforĝiĝis — nu, finfine mi, la maljuna azenaĉo, pløre ekblekis! Kaj la Marianoj — ĉie ili svarmegis — faris ne alie. Hej, tiu ora knabo, tiu Cezaro! Dum la nokto li igis restarigi la emblemojn. Tion ni neniam al li forgesos! La moŝtuloj terure ekkoleris, la maljuna Katulo alnomis lin en la senato revoluciulo. Eh, tiam Cezaro nur ridis dirante: »Por vi revoluciulo estas ĉiu, kiu ion konstruas!« Refaligi la monumenton ili tamen ne kuraĝis.

Sed ĉu mi eble tedas vin per miaj babilajoj? Tiel feliĉa mi estas, kiam iu min aŭskultas, ke mi ne scias, kiel komenci, kiel fini. Hejme oni ne havas por mi tempon: mia filino — la filo estas milite kun Pompejo en Azio — edziniĝis al la budvendisto tie transe, aliflanke de la Tiberio, kaj la tutan tagon iliaj manoj viglas labore. Nu, kiam enmondiĝos la nepetoj, tiam la avo povos kun iu almenaŭ babiladi. La unua estas jam survoje: Nur du monatojn oni devas atendi. Jam nun mi scivolos, kio ĝi estos. Se ĝi estos bubo — li militservu foje sub Cezaro — Kion? Hu! La nevo de Mario ne estos militisto!? Oni lasu al li nur unufoje la bridon kaj li tuj montros, kion li kapablas! Sed ili tion ne permesas, sciante, ke li havas la saman temperamenton kiel la onklo. Plej volonte ili dronigus lin, se eble, eĉ en glaso da akvo. Sed oni ne kaptos lin in-

side, eh, lin ne! Paciencu iom kaj vi vidos, frateto mia, vi vidos —

Kion diras tiu bubaĉo? — Ĉu mi volas figojn? Ne, mi ne volas. — Ne, ne aĉetu ja! — Nu, tiu majstre vin trompis. — Ne, ne, dankon vere ne! — Do, bone unu, nur por ne ofendi vin! — Hm, vere ili estas bonegaj, sed ankaŭ tro karaj! — Kion, ĉu ree unu? — Nu bone, sed la lasta! — Ah, kiel ĝi refreŝigas! Fakte estas malsaĝe, ke mi piedaĉas tiom malproksimen, sed mi ne preterlasas eĉ unu spektaklon. Kaj vere valoras la penon, de kiam Cezaro alprenis la superan kontrolon! Ĉu vi scias, kiom da skermoparoj antaŭ nelonge li igis batale sin prezenti. Tricent dudek! De l' kapo ĝis la piedoj en arĝentaj armaĵoj: kaskoj, ŝiloj, kirasoj, glavteniloj — ĉio el arĝento. Sed eĉ tio estas nenio: okaze de la pelĉasoj, nome li aranĝas ĉiajn eblajn ĉasojn: kontraŭ cervoj, aproj, leopardoj, tigroj — nu, okaze de tiuj pelĉasoj eĉ la kaĝoj estis el arĝento! El pura arĝento! Ho homo, ĉu vi povas imagi, kion signifas tio? Kaj kiom kostas? Jen, aŭdu, onidire li dronas en ŝuldoj ĝis super la kapo kaj la moŝtuloj esperas, ke ili tiamaniere eltordos lian kolon. Sed tio estas miskalkulo. Krasso, la plej riĉa homo en Romo, ne lasos lin glitfali!

Por la popolo Cezaro domaĝos neniun elspezon. Li ruinigus por ni eĉ sin mem. Li ankaŭ monhelpas, kie ajn li povas. Lia pordo estas protekte malfermita al ĉiu, lia mano al ĉiu etendita. Kiu ajn havas zorgojn, vizitas lin kaj neniu foriras de li senkonsole. Hej, kiom da procesoj li jam gvidis por la malriĉuloj! Multaj povas nur al li danki, ke super la kapo ili ankoraŭ havas la tegmenton. Cezaro protektas la malfortajn, subtenas la maljunajn. Tial li levos sin alten, eĉ



se la moŝtuloj diskrevos de kolero! Li ja scios fari ordon! Antaŭ la tribunalon li altrenos tiujn aristokratajn friponojn, kies kanajlaĵojn hodiaŭ kovrokaŝas iliaj amikoj! Pri tio Cezaro ne konas diferencojn! Ĉu li ne venigis antaŭ la tribunalon la provincajn rabimpostistojn, kiuj apartenas al la alta nobelaro? Kaj ĉu li ne kondamnis ankaŭ la ekzekutistojn, kreitajn de Sullo?

Nun oni devas iom atendi, ĉar li diras, ke li faros nenion kontraŭlegan. Sed post du jaroj li fariĝos pretoro, post du jaroj pli — ni faros lin konsulo. Kaj tiam ŝanĝiĝos la aspekto de Romo: malaperos la kareco kaj ĉiutage estos novaj spektakloj. Kiam Cezaro ekkonsulos, komenciĝos la ora epoko! —

Vi ridas? Kial vi ridas? Ĉu vi, junuleto, ne hontas priridi min, maljunulon, la veteranon de Mario? Ĉu estis io ridinda en tio, kion mi parolis? Ĉu vi eble havas alian opinion? Ĉu eble ankaŭ vi apartenas al la moŝtuloj, malamikoj de Cezaro, kiuj — — kk — — kio?! Fulmontondro, estas li, ja, li mem! Saluton, ho Cezaro!«

Ankoraŭ ĉiam ridetante leviĝas Cezaro. Li enpuŝas figojn en la manojn de la maljunulo-veterano, kies sulkoriĉa vizaĝo disbrilas kaj sendenta buŝo kontente ekrikanas. Frapetinte lian ŝultron, Cezaro supereniras la ŝtuparon de la amfiteatro ĝis sia oficiala loĝio, por signi la komencon de la spektaklo.

## Tondrominacoj

»Kion fakte faris kontraŭ vi tiu maljunulo?«

Cezaro ne tuj respondas; malrapide li senŝeligas la pomon ĝisfine, enmetas tranĉaĵon en la buŝon, elmaĉas ĝin kaj forglutinte li fine diras kun ĝuo:

»Faris? Kontraŭ mi? Nenion.«

Servilia duone sin levas el la komforta pozicio, rapidrigarde konvinkiĝas, ke la malgranda Marko ĉe ŝiaj piedoj ankoraŭ ĉiam trankvile ludas en la sablo. Tiam ŝi daŭrigas:

»Ĉu la homo, kiun oni mortigis, estis do tiom grava?«

»Ĉu Saturnino?« iom malestime ekridas Cezaro. »Tute ne: li estis revoluciema popoltribunulo kun malluma animo, kiu provis ribeligi kaj kiu verŝajne estus mortkondamnita, se Rabirio ne estus tion farinta.«

»Do, Rabirio tamen ĝuste faris?«

Cezaro, ĵus enmetinte novan pomtranĉaĵon en la buŝon, povas nun respondi nur kapnee. Ŝi daŭrigas: »Kaj cetere — tio estas afero, kiu, laŭ viaj propraj vortoj, kuŝas en la tempo de tridek-kvar jaroj.«

»Tridek ses,« ĝustigas Cezaro. »Mi estis tiam unujara.«

Ŝi ŝultrotiras.

»Ĉiuokaze mi vidas nenian kaŭzon, kial vi el-tiris en la taglumon tiun malnovan rakonton, kiu jam dronis en la forgeso.«

»Ĉu mi?« ĝoje ekpalpebrumas Cezaro. »Nu, la akuzon antaŭmetis popoltribuno Labieno.«

»Sen pretekstoj, ĉu« ŝi interrompas furiozete. »Kion diras Labieno, diras Cezaro.«

Li apogas sin dorsen, interkrucas la brakojn sub la kapon kaj fiksas la rigardon al la blua ĉielo.

»Mi elfosis tiun malnovan rakonton en la taglumon,« li revenas al ŝia antaŭa demando, »ĉar — nu jes, ĝuste pro tio, ke ĝi estis malnova kaj forgesita. Mi volis klarigi al tiuj sinjoroj-ekstremuloj, ke la krimoj ne povas ekstempigi — eĉ ne post tridek-ses jaroj.«

»Sed Rabirio faris ja nenian krimon! Ĵus vi mem diris, ke Saturnino estus eĉ sen li mortkondamnita.«

Cezaro kuntiras la brovojn, ekfajfas duonvoĉe kaj eksvingas la montrofigron tien-reen, kvazaŭ ne-ante ion.

»Estas ne ĝuste tiel, kiel vi tion prezentas al vi, ho Vilia,« li diras poste. »Mortkondamnita, ja, ĝuste pri tio temas! Li havis rajton por la regula tribunalo.«

»Sed tio estas nur formalajo!«

»Ah ne!« vigliĝas Cezaro, kiel ĉiam, kiam li eksentas reziston.

»Tio ne estas formalajo! Ĉi tie temas pri la konservo de la antikvaj rajtoj al la civitanoj, antaŭ ĉio pri Lex Porcia, pri la rajto apelacii al la popola referendumo.«

Pli kaj pli ŝi ekatentas. Li klare vidas, kiel ŝia

sagaca, elekzercita spirito klopodas kompreni la gravecon de tiu ĉi afero.

»Vi pensas,« ŝi hezitas, »se Saturnino estus apelaciinta al la popola referendumo —«

»Diablo prenu Saturninon,« li interrompas senpaciencie. »Verŝajne ankaŭ la popolo ne alie verdiktus. Sed neniu ĝin demandis kaj ĝuste pri tio ja temas. Nu, aŭskultu!« Li sidiĝas pli proksimen kaj ekklarigas: »La konservativuloj uzurpis de la senato la rajton, proklami, kiam necese, sieĝstaton, transformante ĝin en simple praktikatan rajton. Kaj tiu ĉi batalo ne estas de hodiaŭ: ĝi daŭras kaj ne ĉesas ekde la tempo de *Grakhoj*. Tiam la imuneco de la popoltribuno ne ĝenis la kurion por forfalĉi ambaŭ fratojn de sur sia vojo. De tiu tempo oni milfoje provis revalidigi la apelacian rajton, sed vane. Do, nun mi volas tion miamaniere provi kaj mi kredas —« li iom ekridas — »ke ĉi tiun fojon mi sukcesos.«

Fervore ŝi pripensas liajn vortojn analizante punkton post punkto.

»Se mi vin ĝuste komprenis,« ŝi diras malrapide, »vi havas intereson, ke Rabirio estu kondamnita, ĉar li pekis kontraŭ la menciita apelacirajto?«

»Ĝuste tiel« li kapjesas vive.

»Kaj kio poste? Kio estos per tio gajnita? Ĉu vi pensas, ke la senato lasos lin senhelpa en la danĝero? Ĉu jam eĉ tio, ke oni konfidis lian defendon al la konsulo mem, al Cicerono, ne estas klara okulsigno, ke la konservativuloj opinias sia propra la aferon de Rabirio?«

»Ĝuste tiel« li ripetas.

»Nu do — tiam —«

»Tiam« kunfrapinte la manojn kiel gaja infano

li bridas sin, mallaŭtigas sian voĉon, por ke ĝi sonu trankvile kaj priafero:

»Rabirio venas antaŭ la oficialan tribunalon; oni kondamnos lin — kondamnos al morto, tio estas firme neŝanĝebla. Kaj nun, por eviti la plenumon de la verdikto — nun?«

»Nun?« streĉite ŝi demandas.

»Nun — li mem apelacios al la popola referendumo!« Brue ekridas Cezaro. »Li estos devigita kaj kun li ankaŭ la tuta senata partio apliki mem la tiom atakatan kaj senĉese foruzurpatan rajton de la popolo! Do, ĉu tio ne estas amuza? Ĉu tio ne estas vere brila spritaĵo?« li ridskuigas.

»La ideo estas genia,« ŝi diras tute mallaŭte, »Kaj tamen —«

»Kaj tamen?«

»Kaj tamen mi ne komprenas, ke pro tiu ĉi principa demando — mi petas, alie oni ne povas tion nomi — vi iros eĉ tra-super kadavron. Kaj ke vi tion povas eĉ priridi, tio — tio —« Kontraŭvola frostotremo sufokas ŝian voĉon.

Ankaŭ Cezaro ĉesas ridi.

»Mi povus al vi respondi, ke la justo rajtas pretendi tiun oferon, ĉar tiom da homoj falis pro maljustaĵo; ke krome pri Rabirio, la malnova sangsuĉulo kaj ekzekutisto, estus neniel domaĝe; sed mi ne postulas lian kapon, al la maljunulo nenio okazos. La el-suferita ĉimo estu lia puno.«

Servilia ne komprenas.

»Ĉu vi kredas, ke la popolo lin liberigos?«

»Ĝis tie eĉ ne venos la afero« li respondas. »Ĉio ĉi estas jam antaŭarangita. Cicerono hieraŭ multajn horojn traktadis kun mi. Kiam la proceso kulminos an-

taŭ la asiza tribunalo, tiam, pro ia ajn formalaĵo oni ĉesigos la kunvenon — ĉar la sanktaj kokinoj ne volas manĝi aŭ io simila — kaj la proceduro fine dronos en la maro de l' forgeso. Vi komprenas nun? Al la senato restos ĝia Rabirio, la popolo reakiros sian foruzurpitan rajton kaj ambaŭ partioj estos entuziasmitaj per tiu ĉi solvo.« Kontenta pri si mem li prenas alian pomon kaj komencas ĝin senŝeligi.

Longe ŝi lin rigardas.

»Terura homo vi estas,« fine ŝi diras. »Mi ne dezirus kontraŭ vi malpaci.«

Mansvingo tra l' aero.

»Ekzistas eĉ malpli bonaj. Kun mi estas facile repaciĝi tuj, kiam mi rimarkas la bonan volon.« Kun videbla ĝuo li okupiĝas pri la pomo.

Lastan tranĉaĵon li enbuŝigas al la malgranda Marko, kiu ankoraŭ ĉiam obeeme kaj senbrue ludas en sablo.

»Memoru, ho filo,« li ridetas al li, »la leĝo estu super ĉio. Kontraŭ ĝia ofendinto agu per ĉiuj rimedoj, eĉ se li estus via propra patro. Sed ĉiam sen persona venĝemo.«

La infano alrigardas lin per grandaj senhelpaj okuloj — la okuloj de l' patrino — kvazaŭ komprenante liajn vortojn. Servilia subpremas ĝemon.

»Li estas ĉiam tiom silentema« ŝi flustras. »Ofte mi timas, ke li iĝos revemulo.«

»He, foje li ŝanĝiĝos,« ĝoje li ŝin trankviligas. »Jam kiel infano mi aŭdis, kiel la patro eldiris sian timon, ke mi iĝos vera hejmsidulaĉo. Kaj mi tiam ĵus venis de terura interbatiĝo.«

Ekregas silento, kaj dume Servilia observas la

senĉese ŝanĝiĝantan mienon de Cezaro. Fine li denove ekparolas.

»La sekvan semajnon okazos la pontifika elekto.«

»Ĉu jam?« Eĉ kontraŭvole ŝi time surpriziĝas.

Li estas bonhumora kaj ride kapjesas.

»Ĉi tie mi denove piedbatis veran vesponeston!

La tuta nobelaro ekbolis! He, la kapo de l' eminentaj sinjoroj ne povas kompreni, ke por tiu ofico, kiun ili ĝis nun tiom plaĉe interdividis, jen subite konkuras homo neapartenanta al ili. Kaj ili jam antaŭdestinis la unuajn kandidatojn kontraŭ mi: sinjorojn konsulojn Kvinton Lutacion Katulon kaj mian malnovan milit-estron Publion Servilion Isaŭrikon, vian estimatan onklon. Unue ili aranĝis grandan bruon pro mia onidira korupto al la voĉdonontoj — kvazaŭ ili mem ne estus elspezintaj grandan monon tiucele! Poste, kiam tio ne helpis, proponis al mi Katulo, la gardanto de l' antikva respublikana tradicio, tute belan monsumon, se mi rezignos pri mia kandidateco.«

Ŝi devas ridi pro lia priskribo.

»Kaj vi?« Ŝi demandas.

»Mi igis respondi al li, ke mi prutenprenos eĉ pli grandan sumon por certigi mian elekton.«

»Kaj vi pensas...«

Sur lia vizaĝo ree, kiel ofte, trafulmas la rideto en seriozon.

»Mi pensas,« li diras tute trankvile, sed voĉvelke, »ke en la okazo de la malvenko, postrestas al mi nur tio ĉi.« Li montras la ringon, en kies kava ŝtoneto, laŭ ŝia scio, ĉiam estas veneno.

Ŝi mortpaliĝas.

»Vi ja ne faros,« penege ŝi elbalbutas.

»Mi devos« li diras per la same senviva voĉo. »Mi

metis ĉion sur unu lotkubon: se mi ne estos elektita, mi estos perdita.«

Ŝi gluas la rigardon antaŭ sin. Longe. Tiam ŝi diras sen sonore:

»Kaj ĉio ĉi nur — por kontentigi la ambicion! Kapneo.

»Ho ne, ĝi estas for de mi« li diĝas.

»Sed mi bezonas postenon, sur kiu mi staros radikfirme, kiam ektondros la uragano.«

Ŝi okullevas konsternite.

»Ĉu ankaŭ io kroma?«

»Pompejo triumfe finis la militon kontraŭ Mitridato kaj la piratoj, kaj nun kun sia militistaro li revenas hejmen.«

Ŝi komprenas kion tio signifas.

»Nova Sullo,« ŝi flustras. Li kapjesas.

»Sen Mario. Se ne okazos miraklo, ni havos plej baldaŭ diktatoron.«



## Konstruisto de l' pontoj

En la atrio li renkontas nur la patrinon. Ŝi sidigis kun sia manlaboraĵo sub la tegmentan malfermaĵon por havi sufiĉe da lumo. Aŭdinte liajn paŝojn, ŝi formetas la brodkadron kaj leviĝas.

»Ĉu ankoraŭ neniu venis?« li demandas.

Antaŭ ol la patrino povas respondi, alsonas la respondo el alia flanko, el la vestiblo pordanta en la ĝardenon. Flirtante ŝiriĝas io ĉarma for el la ombro de l' verando kaj momenton poste ĵetas sin brunhara orfiŝeto ridante ĉirkaŭ la kolon de la surprizita homo.

»Ĉu vi, Julia?« li ekkrias surprizite kaj feliĉe.

»Ho paĉjo,« senspire ŝi flutetas, »intence mi elitiĝis pli frue por bondeziri al vi! Gajnu ĉiujn voĉojn kaj estu elektita de ĉiuj triboj!«

Li levetas ŝian delikatan vizaĝeton kaj kisas la virgajn lipojn.

»Plej koran dankon, vi, karulineto,« li varmas. »Almenaŭ vi estas sincera, mi scias.«

Ŝi alpremigiĝas eĉ pli forte al li.

»Hej, kiu al mia paĉjeto ne dezirus plejbonon?« ŝi flatkaresas. »Vi estas la plej bona, la plej nobla, la plej aminda homo en la mondo, en la tuta mondo. Jes, vi devus regi la tutan mondon.«

Iom rezigneme li ridetas.

»Tiuokaze mi havus por vi eĉ malpli da tempo.«  
Ardege ŝi ĵetiĝas sur lian bruston.

»Ho, tio ne gravas! Ne povas ja mi, la eta pupeto, pretendi, ke vi estu nur la mia! Vi apartenas al la tuta Romo! Al mi sufiĉas nur la rajto stari en la postdorso kaj observi. Paĉjo mia, ho, mi tiel fieras pri vi!«

»Ah!« Kvankam lia voĉo estas karesa, tamen jam montriĝas iom da distriĝo. La sentema infano tion eksentas.

»Mi ĉi tie babiladas — kaj vi certe devas ankoraŭ paroli kun la avino. — Mi do refoje deziras multe, multe, multe da bonŝancoj, dolĉa paĉjeto!« Kaj kiel ventsubite ŝi venis, tiel ŝi ankaŭ forkuras.

Li postrigardas ŝin. La rideto iom post iom cedas for, sur la vizaĝo jam altrudiĝas pena trankvilo. Tute profundiginte en la pensojn li kapvelke ekpromenas tien-reen. Per penetra rigardo observas lin la patrino. Kun multe da intima zorgemo ŝi fine pridemandas:

»Ĉu vi ne bone dormis?«

»Jes, ne bone.« li ripetas. »Malsaĝajn songojn mi havis.« Denove li aliras la brakseĝon kaj manplate tamburas sur la dorsapogilo. »Ho, se ĉiuj ĉi sensencaĵoj estus malnecesaj!«

Tre bone ŝi lin komprenas, sed tamen demandas:

»Nu, kion vi pensas?«

Li nur nedefinite mansvingas.

»Tion, hodiaŭ. Vi povas ja facile imagi, ho patrino, ke por mi, intime, la pontifikeco havas nenian valoron.«

»Kial do...«

Li ne lasas ŝin fini.

»Vi estas ne la unua, kiu tion demandas. Nu,

ĉar mi bezonas apogilon, ĉar ĉi maniere mi ne povas plu labori.« La maltrankvilo devigas lin forruli de la animo la ŝarĝon, jam delonge lin premantan. »Tiun ĉi aferon mi tute alie prezentis al mi. Mi pensis, ke estos eble klarigi al la homoj iliajn proprajn interesojn. Sed pri io mi ne kalkulis: pri la grandeco de l' homa vantemo.« Kapleve li rigardas la patrinon per la okuloj de eltorturita besto. »Ĉu vi scias, el kio konsistas mia laboro tra la tuta jaro? El nod<sup>l</sup>-ligado de fadenoj, senĉesee ŝirigantaj, sed sen ia ajn pridankemo. Komence mi sukcesis tute bone: Pompejo prezentas potencon, ankaŭ Krasso prezentas potencon. Laŭ la plej primitivaj leĝoj de la politika matematiko, ilia kuniĝo devus rezultigi la multobligon de iliaj fortoj kaj ne la sumigon. Tion, ŝajne, ambaŭ ekkomprenis: estis ja Krasso, kiu min sendis al Pompejo. Kaj Pompejo tuj volonte akceptis la etenditan manon, kiun li tiam arde deziris. Sed daŭris nelonge kaj jam rekomenciĝis: ekflamis disputoj pro ridigaj bagateloj, postsekvis piketoj jen de tiu, jen de l' alia flanko — kaj hodiaŭ Pompejo plene forturniĝis de ni, li nun amindumas la senatan partion. Kaj Krasso — li eksingultas dirante ŝajne por si mem — preskaŭ faris novan malsaĝaĵon.«

»Katilino,« kapjesas la patrino. Li subite turniĝas:

»Ĉu tio estas al vi konata?«

»Nu, la tuta Romo parolas nur pri tio.«

»Jes, Katilino« li kapjesas. »Al li ne sufiĉas la pasintjara malvenko, ree volas li, la malesperulo, elprovi ĉe la nunjaraj konsulelektoj sian ŝancon. Kaj Krasso donas al li monon por la agitado. Tio daŭros, ĝis okazos io ne plu riparebla.«

Subite li eksilentas: en la atrion eniras kelke da membroj el la porelekta komitato. Tuj li ŝanĝiĝas en la afable komplezan mastron, iras renkonte kaj salutas.

»Jam estas tempo.« diras unu el ili, Basso, la mulovendisto, unu el la plej kapablaj agitistoj de la popolpartio. »Ni venis por kunpreni vin.«

»Mi estas preta,« li kapjesas. Poste li turniĝas al la patrino, etendante al ŝi la manon. »Do adiaŭ,« li diras kun la tima rideto de infano iranta al malfacila ekzameno.

Impulse ŝi kaptas lin ambaŭbrake kaj kisas ambaŭ vangojn.

»Adiaŭ, ho Kajo,« ŝi flustras. »Kaj revenu baldaŭ«.

Li jam rektiĝis. Foriĝis la mola, infana esprimo de l' vizaĝo; la patrino vidas nur vizaĝon neŝancebleble streĉitan en la lasta decido.

»Kiel pontifiko aŭ entute ne,« li respondas lakone.

Trenpaŝe li iras el la atrio.

La forumo kaj flankstratoj estas hodiaŭ superplenaj. Oni interpusiĝas kaj kunpremiĝas, staras en grupoj, kiuj, jen kun nenatura trankvileco mimikas la neimiteblan »*civis romanus*«, jen kun tiom pli denaska sudana vikleco reciproke sin insultas. Agitistoj de diversaj partioj rapidmove sin ŝovas tien-reen; elektontoj okulserĉas membrojn de sia *komicio*, kiun ili rondiras kiel fidelaj gardohundoj la ŝafaron. Tie kaj tie ĉi oficisto aŭ pastro, kun nepenetreble solena vizaĝo, puŝboras sin tra l' amaso svarma kaj zuma, klaĉa, disputema kaj ridanta.

Oni tuj rekonas Cezaron. Oni salutas lin, ŝoviĝas for de lia vojo, aklamante, ke li kuraĝe sin tenu. Li dankas ilin kun trankvila kaj ĝoja mieno, kiun neniu kredus altrudita; afable li mansvingas al la homoj, kun kiuj li iam rilatis kaj kiuj tuj aperas el lia nekredibla primemoro de vizaĝoj kaj nomoj; kiel patrono li paŝas tra amasoj de siaj klientoj.

Liaj akompanantoj kondukas lin sur la estradon — ne por paroli al la popolo, ĉar tio estas malpermesita en la elekto-tago, sed por — laŭmore — prezenti la kandidaton. Kiam supre aperas la bone konata, gracitalia staturo, la amasoj ektondrigas ovaciojn, kiuj ĉiam noveksplode daŭras dum kelkaj minutoj. Ĵaluze observas tion la kontraŭpartiaj kandidatoj aliaflanke de la estrado: Lutacio Katulo kaj Servilio Isaŭriko. Lia maljuna ekskomandanto riproĉe lin rigardas, dum la freŝa vizaĝo de Katulo sub la neĝblanka, densa hararo ekpurpuras. Li apenaŭ redonas la komplezan saluton de l' Juliano.

»Du novaj malamikoj,« rimarkas Cezaro afereme.

»Neniam vi ilin nombris« respondas Basso rapide kaj laŭde.

»Ne, sed tamen mi pesis. — Do, ni iru?«

La porelekta oficejo de la popolpartio troviĝas en la domo de bankiero Lukcejo, iu el la negocaj amikoj de Krasso. En la luksa atrio, superplena de artaĵoj el ĉiuj mondpartoj, kutimis ĝis nun montriĝi nur la zorgemaj vizaĝoj de l' potencaj bankieroj, ruze enfermitaj vizaĝoj de la siriaj aŭ hebreaj makleristoj kaj monŝanĝistoj. Sed hodiaŭ ĝi rigardas tute aliajn vizaĝojn: alvenas delegitaro post delegitaro: jen homoj el la plebo, havantaj intereson por ankoraŭ unufoje persone renkontiĝi kun siaj kandidatoj, jen senlaboraj

urbegaj proletoj, etmetiistoj, komercistoj, kamparanoj. Tuj kiam ili eniras, oni povas ilin klasifiki: la suburiano aŭ transtiberiano ĵetas rapidan, arogante scivolan rigardon sur ĉiujn elmetitajn belaĵojn; metiisto aŭ etkomercisto haltas timeme ĉeflanke, kvazaŭ atendente pagon por la plenumita laboro, liveritaj varoj; peze mallerte, vilaĝanpaŝe urs-piedas sur la multekosta mozaiko la terkulturisto, mireganta kaj preskaŭ ebria pro la brilego de l' nova medio.

Cezaro trovas por ĉiu la ĝustan vorton. Al la patosaj paroladoj de l' proletaj konfidenculoj nun li respondas per malplenaj, sunaj ridetoj kaj glataj frazoj, la mallertajn parolturnojn de l' etmetiistoj per priaferaj saĝaj vortoj; nun li premas siajn molajn, inertajn, far-malkutimajn fingrojn al tiuj kalokrustaj de la manlaboristoj. Laŭ la *freŝa* flekseblo de ĉiu lia movo, laŭ la brila okulklaro, neniu pensus pri la sendorma nokto kaj ekscito de ĉi tiu tago. La varmo de lia estaĵo ŝajnas traardi eĉ tiun iom frostan pompsalonon.

Ĉe iu kamparana delegitaro li restas iom pli longe. Tiuj homoj venis el unu el la maloftaj komunumoj de Transpadio, kie la romia civitaneco jam validas.

»Ĉu vi longe vojaĝis?« li demandas la gvidanton.«

»Dek tagojn« lakonas la respondo.

»Kaj kiel hejme?«

»Bone ja: ni ĉiuj konkordas.«

Cezaro pli proksimem alpaŝas.

»Miaespere en Transpadio oni scias, kiam pri penson mi havas.«

»Ni scias kaj konfidas al vi« respondas la kam-

parano, dum la ceteraj mute kapjesas. Peze, kiel iliaj laborharditaj manoj, falas sur lin iliaj rigardoj.

»Mi trompiĝis« li diras profunde kortuŝite al Basso, post kiam la delegitaro eliris. »Mi opiniis tiujn ĉi elektojn ordinara urbega aranĝo, sed nun mi vidas, ke ĝi estas komunaĵo de la tuta popolo.«

»Eh, ĉu mi ne diris al vi?« Sub la malalta frunto de la mulovendisto ekfajreras la nigraj okuloj fulme kaj tranĉe. »Hodiaŭ fine la grandsinjoroj ekscios, kion fakte pensas la popolo.«

»La elektoj komenciĝas!« ekkrias akra voĉo ĉe la elirejo. La delegitaroj, urbanoj kaj provincoj forpaŝiĝas. Cezaro restas sola kun nur kelkaj anoj el la porelekta komitato.

Tuj, malaperas la solena rigido de la ĉeestantoj. Kelke da komitatanoj elprenas sian matenmanĝon komencante manĝi kaj babili. Basso, kun sufiĉe malpura, stumpnaza junulo, retiriĝas en la angulon kaj kontrolas iajn listojn aŭ kalkulojn. Pri Cezaro neniu zorgas.

Tio lin tute ne malĝojigas: sola li estas de kiam li memoras. Ja, li trovis en sia vivo por kelka tempo kamaradojn, kiuj helpis al li efektiviĝi la planojn kaj konceptojn; sed, kiam tio estis atingita, oni denove forlasis lin sola — ion alian li eĉ ne deziris. Lian tiun — celon, la plejprofundon, li neniukaze povis malkovri al iu, ĉar lin ĉiam disigis de la aliaj ekstrema, maldika, sed nepenetrebla interbarilo.

Same ankaŭ hodiaŭ li tute ne sentas doloron, eĉ ne bedaŭreton. Li ekserĉas kvietan lokon, sidiĝas en malluma anguleto kaj inerte fiksas la rigardon antaŭ sin. La unuaj, pounuaj rezultoj, verŝajne ne estos konataj ĝis post unu horo. Kaj ĝis tiam oni devas pacienci — atendi.

Nun, kiam li povas por momento libere respiri, la senfortiĝo ekpostulas sian rajton. Liaj okuloj brulas, la membroj malrapide moliĝas, la kapo falvelkas al la subapoga mano. Li dronas en ian duonsongon inter dormo kaj realo. Ĝi ligas lin per nerompita fadeno al ĉio ĉirkaŭe okazanta kaj samtempe tamen revivigas antaŭ li kaj en li iajn songbildojn. Li vidas, kiel turniĝas unuopaj homoj, li aŭdas modulon de iliaj voĉoj — kaj samtempe...

Li ne scias, kiel nomi tion, kio en li naskiĝas: unue, dum la unuaj, nedifinitaj sentoj, ĝi ekŝajnis al li grandega kapo. Kaj nun, kiam ĝi pliklariĝas, li sentas, ke la homa parolo ne havas vortojn, ne havas ideojn por ĝin esprimi. Ĝi lin rigardas — kaj tamen ĝi ne havas okulojn, aŭ pli ĝuste: ĝi estas ununura granda okulo. Ĝi parolas al li — kaj tamen ĝi ne havas buŝon, pli ĝuste: ĝi estas ununura buŝo. Kvazaŭ ĉiuj sentaj funkcioj de tiu supernatura ŝajnaĵo estas reduktitaj al sia praradiko, ili nun ne bezonas peradon de la organoj, ili efikas ja elmeme. Ĝi ankaŭ ne estas io, kio estus ekster li: iel — li mem ne povus tion klarigi — li apartenas al tiu Neeldireblo, li estas Parto kaj Plenumiĝo, Komplemento kaj Subjekto sammomente.

»Kiu vi estas?« li demandas fine. Nek liaj lipoj, nek la lango moviĝas kaj tamen li scias, ke tiu ĉi demando eldiriĝis kaj estis aŭdata.

»Mi estas ne vi,« respondas ĝi, »sed vi estas mi.«

»Ĉu vi estas natura estaĵo,« li esploras plue, »aŭ supernatura? Ĉu vi apartenas al la dioj de l' supra aŭ malsupra mondo?«

»Mi estas natura kaj dia samtempe« respondas



la eĥo. »Tie, kie mi ekzistas, estas nek supre, nek malsupre.«

»Ho, mi ne komprenas vin.«

»Mi estas ĉio, kion vi povas sentorgane ekkoni, kore eksenti, mense ekpensi. Nenio estas ekstere de mi, ĉar ĉio estas en mi: balbuteto de suĉinfano, kiel ankaŭ la plej profunda penso de l' praa saĝulo, spiretoj de l' herbo, kiel ankaŭ mistera ŝvelkresko de l' kristalo, ventturniĝo de la plej eta polvo, kiel ankaŭ la sankta, praorigina rondirado de l' astroj.«

»Do vi estas la kosmo? La harmonio?«

Kvazaŭ io konfirmas, senteble, sed neeldireble, kiel ĉio, kion li nun travivas.

»Tio estas nomoj, per kiuj vi povas min percepti.«

»Kial vi montriĝis al mi? Kion vi volas de mi?«

»Mi volas montri al vi la vojon al mi, fari vin konscia pri la fortoj en vi mem. En la difinitaj epokoj mi starigas limŝtonojn, kiuj alturnas la tutan agadon en komunan vojsulkon; bazblokojn, kiuj estas apogiloj de mia konstruaĵo. Vi nomas ilin militistoj, ŝtatistoj, pioniroj de grandaj ideoj. La destino ilin elektis por esti fiksitaj punktoj en la dancado de l' forpasemaj muŝetoj, por tra si kaj ekster si efiki sur la aliajn kaj per la ardo, radianta el la personeco, influ ian epokon. Ili estas instrumento, per kiu mi perfektigas la krudmaterialon, purigas la fundajon de ĉio ekzistanta, alkondukante al la lasta, plej alta celo, al la perfekteco mem. — Jen!«

Spirete ŝvebas io antaŭ la vizaĝo de Cezaro, nubvualetoj flagretas tien-reen kaj el ili malrapide elvolviĝas bildoj, jen pli jen malpli klare... Arboriĉa parko, branĉaro ombrita de nekonataj arboj. Mal-

granda domo sur la vojo, dronanta en arbaron. Antaŭ la domo nigra bovo, selita kaj bridita kiel rajdĉevalo, Fruaĝa junuleto en stranga vesto, kun flava, neordnara vizaĝo, tenas la bridojn. Kvazaŭ nigraj juveloj fajras liaj okuloj el sub la mallarĝaj palpebroj.

Du homoj eliras el la domo. Unu pramaljuna, kies neĝblanka barbo falpendas ĝis la zono, la alia iom pli juna. Ili ambaŭ surhavas same longajn, ventflirtajn vestojn, ili ambaŭ kunstreĉis la longajn harojn ĉe la diskombajo.

La maljunulo, multrespekte akompanata de la pli juna, paŝas al la rajdobo. Nun li etendas al la akompananto ian libron. Tiu ĉi respekte ĝin akceptas. Ekrajdinte la beston, la maljunulo kun neeldirebla mildo rigardas malsupren. Estas en tiu rigardo io nedifineble malproksima. Nun li ekrajdas post la junuleto iranta antaŭ li kaj malaperas en la arbaron...

La pli juna restas surloke, alrigardante la libron en la manoj. Klare vidas Cezaro: tri fremdaj signoj pentritaj nigrakolore. Deĉifri ilin li ne povas, sed tamen li scias, kion ili signifas: »la Libro pri l' Senco kaj Vivo.«

Oni nomis lin la »Maljuna Majstro«, diras tiu Neeldireblo apud li, ne, en li. »Milionoj lernis de li.«

Alia bildo. Denove la arbaro, denove la nekonataj arboj, tamen ne superstaraj, ne mutaj nun ili estas, sed sovaĝkreskaj kiel herbaĉoj surŝutitaj de grandaj, luksaj floraĵoj kaj tute envolvitaj de herborampaĵoj, Longtrunkaj herboj kaj larĝfoliaj vegetaĵoj kovras la teron. Rondo de brunhaŭtaj viroj sidiĝis ĉirkaŭ unu, kiun ĉiuj aŭskultas. Inter iliaj brovoj fajreras ruĝaj

signoj. Cezaro ne povas turni la rigardon for de l' instruisto. En tiuj trankvilaj okuloj li trovas la saman rideman mildecon, kiu distingis la antaŭan viron, sed kunigite kun senlime profunda trankvilo, kiu elvastigas kiel io solida, kiel fokuso de l' forto subiganta al si ĉion. Dum la instruisto parolas, ĉirkaŭ li ŝajne pliheiligas; forglitas ĉiuj ombroj, subtiligante kvazaŭ elsuĉitaj, ĝis la tuta bildo fordronas en senlime delikatan edifan ardon.

»Li nomiĝis la Juvelo en Lotuso« reaŭdas Cezaro la voĉon de l' ŝajnaĵo.

Nova bido. Cezaro ĝin rekonas: estas bosko de *Akademo* ĉe Ateno. La helenaj sinjoroj, aristokrataj kaj elegantaj, promenas laŭ bele gruzitaj vojetoj. Unu el ili, altstatura, bela viro, kies grizeta barbo kovras la potencan bruston, altiras lian atenton. Tiu aŭskultas sian akompananton vigle parolantan, sed lia rigardo, serioza kaj mensa, penetras tra la masko de la eksteraĵo, ekkonante la internon de l' homo, lian memon. Kaj per la sama potenco de l' ekkono trapenetras tiu ĉi rigardo ĉion, kion ĝi ĉirkaŭprenas: domojn, arbojn, teron, ĉielon. Ili disfluidigas antaŭ li, tamen ne disfalante, ili jam havas nenian sekreton antaŭ li, venkite kaj volonte ili nudigas al li tion, kio igas ilin ekzisti: sian ideon.

»Lia instruisto, eltrinkinta la glason de l' veneno, kutimis lin nomi la Larĝbrusta.«

»Platono mem,« elmurmuras Cezaro. »Kaj la aliaj?«

»Malproksime de vi, malproksime. — Ĉu vi volas enrigardi en la estontecon?«

»Ho jes!«

Denove flagraj vualoj, el kiuj naĝas la bildoj. Pli nebulaj, pli senkoloraj ili estas kaj nur dum momenteto rekoneblaj, ŝajne pli imagoj ol realaĵoj.

Jen homoj ĉe l' bordo de akvo, senmovaj, korprenitaj. Ili aŭskultas la vortojn de unu sola, predikanta al li el boato. Lia vesto estas malriĉula, same kiel de la aliaj, sed el lia pala kaj nobla vizaĝo lumaŝtia ardo kaj amo, ke ĝi ŝajne envovlas ĉion en brilon de siaj radioj. Oni aŭskultas lin senspire kaj en ĉiuj ĉi persekutataj, mallumaj vizaĝoj disflamas rebrilo de tiu ardo, ili iĝas trankvilaj kaj mildaj. Tiel ja unuigas ilin tiu ĉi brilo, ke fine ili ĉiuj estas kvazaŭ unu sola estaĵo el kiu radias la sankteco de l' oratoro.

»Li nomos sin ‚La Filo de l' Homo‘ kaj venos por preni sur sin ĉiujn suferojn de la mondo.«

Cezaro profunde spiras.

»Ho Majstro, vi montras al mi la saĝulojn. Nu, igu min vidi homon kia mi estas: la ŝtatiston, aŭ — »li hezitas, ĉar tio li ankoraŭ ne estas — »la militiston«.

Jam antaŭ li disfajris la fulmo. Refoje. Plurfoje. Ofte. Apenaŭ post kelkaj sekundoj li povas viddistingi. Jen monteto sur kiu senĉese ŝprucbrilas fajrosagoj. Cie ili estas: siblas el la tero, saltas en la aeron, erupcias ĉiuflanken longlekajn flamlangojn. Rapidmove zigzagas homaj siluetoj manipulante per nekompreneblaj movoj nekonatajn instrumentojn. Fumo, fumo envolvigas ĉion en la densajn, grizajn nebulĉifonojn...

Altempeŝtas rajdtaĉmento kaj ekhaltas. Rajdanto disiĝas forgalopante sur la blanka ĉevalo antaŭen. Nur post momento vidas Cezaro lian graspuŝan, palan, senbarban ŝtonvizaĝon kun la malhelaj, ardbrulaj okuloj. La ĉevalo timsovaĝiĝas pro la fajrofulmoj, ĝi saltle-

viĝas, sed ĝin bridvenkas la fera mano. Senmove fiksri-  
gardas la okuloj en la malproksimon, kvazaŭ sorbante  
ĝin en sin mem. Tiam li ĵetas al iu el la homoj algal-  
opintaj kelkajn vortetojn, poste turniĝas kaj ree for-  
rapidas.

»Oni nomos lin la Grandulo de l' Insulo,« aŭdas  
Cezaro. »El insulo li venos, sur insulo li finos la vivon.  
Sed intertempe la tuta mondo timtremos antaŭ li«.

Cezaro hezitas.

»Nu, kaj mia destino?«

»Vian destinon vi devas elvivi. Se mi malkovrus  
ĝin al vi, vi perdus la tutan forton: ĉar krei signifas  
venki ĉiun morgaŭon per la postmorgaŭo. Kontentiĝu  
pri la scio, ke vi same kiel ili estas mia instrumentoj,  
kiun mi ne forlasos antaŭ ol ĝi plenumos sian verkon.«  
Silento. Tiam refoje la voĉo:

»Hodiaŭ vi estos elektita kiel ĉefkonstruisto de  
pontoj. Neniam forgesu, ke ĝi estas nur malplena vor-  
to, nur titolo. Efektive estas ja nur unu, kiu konstruas  
la ponton. Ĉiuj aliaj estas ŝtonoj, mortero, sablo. Estu  
kontenta, ke vi mem estas kolono.«

— — — — —

Cezaro timigite rekonsciĝas, ekrigardas ĉirkaŭ si.  
La ŝajnaĵo malaperis. Li sidas en la atrio, en la domo  
de Lukcejo kaj la porelekta komitato ĉirkaŭas lin. Al-  
paŝas Basso kun interna ekscitiĝo en la kruda vizaĝo.

»*Pontifex maximus*,« li diras per malhela, ekscit-  
plena voĉo, »estu salutata.«

Cezaro leviĝas. En li estas granda trankvilo, li  
sentas sin esti unu kun la universo. Granda humileco  
klinas lian kapon.

»Nur unu estas, kiu konstruas la ponton,« li flus-  
tras ripete la vortojn de l' viziaĵo.

## Momento de Danĝero

Ili renkontiĝas ĉe la elirejo; de unu flanko Krasso, akompane komplezanta la vizitinton, aliflanke Cezaro, ĵus eniranta. Taglumo falante tra la luko strange ombras iliajn vizaĝojn.

La vizitinto laŭte ekridas: stranga, senespera rido. Laŭ tio Cezaro lin rekonas.

»Kio, Cezaro, vi? Nu, ĉu ankaŭ ni foje renkontiĝis?«

Cezaro nur tuŝetas la aletenditan manon.

»Saluton Katilino. — Saluton Krasso.« Tiu ĉi nur mute kapklinas. Katilino daŭrigas laŭ sia ĉiam sarkasma tono:

»Ĉu vi venis por pruntepreni aŭ redoni? Ne pensu, ke sole vi havas rajton al la neelĉerpebla kaso de tiu ĉi kreditreĝo: ankaŭ la aliaj volas vivo!« Subite li turniĝas al la domastro: »Do, la plej grandan dankon al vi kaj ĉio restas kiel interkonsentite. Vi ja aŭdos pri mi. Adiaŭ. — Adiaŭ, Cezaro!«

»Adiaŭ,« respondas Krasso per laca, inertia voĉo.

»Adiaŭ,« diras ankaŭ Cezaro. Katilino kapsalutas ilin ambaŭ kaj rapide forperdiĝas tra la elirejo.

Ŝultro ĉe ŝultro iras Cezaro kaj Krasso en la kabineton de la bankiero. Neniu el ili diras vorteton: la gasto ŝajnas droni en pensojn, dum la domastro

okulas lace kaj apatie en la malplenon. Longatempe ili jam sidas, sed neniu el ili rompas la silenton. La junulo ŝajne kun la plej granda intereso observas enteksaĵon de la tapiŝo, la rigardo de Liciano ankaŭ plue malplenas. La silento disigas ilin kvazaŭ dezerto.

Kaj nun Krasso ne plu povas sin regi: li malfermas la pezajn palpebrojn kaj ekrigardas Cezaron dirante truride:

»Eh, vi ne estas kontenta pri mi, Cezaro? Tiu ne respondas, nur okule li travagas sur la arabeskoj de l' teksaĵo. Krasso daŭrigas: »Mi faras nenion alian, ol kion mi kutimis fari dum mia tuta vivo: mi subtenas la entreprenon, pri kiu mi supozas, ke ĝi al mi utilos.« Kaj ĉar la alia ankaŭ plue silentas, li singarde akcentas: »Nu, kiel mi faris ankaŭ pri vi.«

Nur nun la Juliano okullevas. Enigme li rigardas la bankieron, eldirante nur unu solan vorton:

»Pompejo.«

Krasso sidas sur pingloj.

»Nu jes — mi povas imagi, lin kolerigas la lastaj okazaĵoj en la partio,« spirmanke blovas Krasso. Ne tio estis mia intenco: ĉiuj ĉikanoj kontraŭ Pompejo ŝarĝas la konsciencon de la aliaj. Mi ne amas Pompejon, tion mi konfesas, kaj min ne ĉagrenas la kaŝpikoj kontraŭ tiu bonŝanculo, tiu tutmonda dorlotato, sed mi scias, ke li estas al ni necesa.«

»Mi havas informojn el lia ĉefstabo,« interrompas Cezaro. »Pompejo furiozegas. Sur vin li ĵetas la tutan kulpon. Li eĉ ĵuris neniam plu kuleri la supon kun vi.«

Ektremetas la makzeloj de Krasso.«

»Ho, kiom maljusta estas Pompejo!« li malĝojas. »Ion similan mi jam konjektis. Kaj pro tio mi — dum ankoraŭ estas eble — sekurigis min.«

Cezaro alrigardas lin demandoŝajne.

La vizaĝo de Krasso perdas la tutan lacecon; ĝi refariĝas ŝvelforta kaj kvazaŭ plena. Ruzridete li daŭrigas: »Ni havas ankoraŭ tempon: Pompejo povas alkuri ĉi tien nek morgaŭ, nek postmorgaŭ. Kaj se li revene trovos la cirkonstancojn aranĝitaj — ja, laŭ nia deziro — li devos konsideri ilin kaj adaptiĝi.«

»Mi vin ne komprenas,« voĉtreme kaj iom mal-estime diras la Juliano. La ruza rideto en la vizaĝo de Krasso dislargiĝas.

»Vi konas Katilino; estas ja ne unuafoje, ke ni kun li kunlaboras; nu, tiun ĉi fojon ĝi ne estas romantika aventuro kiel pasintjare, sed bone pripensita plano. Krome, hodiaŭ Katilino ne plu estas sola, li havas influaĵn, altrangajn personojn post si — eĉ pli, ankaŭ la militistan potencon kiu tag-al-tage kreskas. »Nun Krasso haltas, serĉante en la okuloj de l' vizitanto miresprimon, sed ĝin ne trovinte, li tujsekve daŭrigas: »Ĝis nun mi pri tio silentis, ĉar la afero ankoraŭ ne maturiĝis por prikonsidero. Aŭskultu min: en Etrurio iu maljuna Mariano varbkolektas por li la militistaron. En Hispanio staras la juna Pizono prete atendanta. Jes, eĉ ĝis Maŭretanio atingas liaj rilatoj. Kaj nun atentu: la dudekan estas konsulelektaj, ĉu ne? Guste kontraŭe ol la lastan fojon, Katilino nun, kredu, kontentige sin pretigis. Lia sukceso, do, estas certigita. Kaj kiam ĝi estos jam finita, tiam disflamos ĉie: en Etrurio tuj troviĝos du legioj armilprete, en Hispanio Pizono ŝirmos niajn flankojn; en Romo tiujn kelkajn mizerajn policistojn la gladiatoraj taĉmentoj pugnotenos kvietaj. Neniu povos malhelpi, ke Katilino proklamu sin diktatoro kaj post tio starigu — ĉar pli-malpli frue li devos iri kun ni — nian registaron: kontraŭ la senato,



kontraŭ la konservativuloj, kontraŭ Pompejo.« Triumfe Krasso alrigardas Cezaron. Ĉar tiu ĉi ankoraŭ ĉiam ne okulmovas, li demandas mirigite, preskaŭ korpremite: »Nu, ĉu vi diras nenion?«

En la vizaĝo de Cezaro preskaŭ nenia ŝanĝiĝo.

»Vi rakontas ja hieraŭajn novaĵojn.«

»Kiel?« Mirege demandas Krasso.

»Jen, aŭdu la hodiaŭajn novaĵojn,« daŭrigas Cezaro nezorgante pri la parolrompo. »Antaŭ ĉio: Pizono estas malviva!«

!Krasso saltleviĝas.

»Ne eble!«

»Mortigis lin lia hispana eskorto.«

»Verkonfese, malbonaĵo« elmurmuras la bankiero, manfrotante la mentonon. »Kvankam tio fakte min ne mirigas, ĉar ili estas krudaj junuloj.« —

»Ĉu krome io?«

»Marcio, kiu kun sia militistaro atendas la triumfon, ricevis ordonon por marŝi Etrurion.«

Krasso dislarĝigas la okulojn.

»Kion tio signifas?« li demandas pli kaj pli maltrankvila.

»Al Cicerono estas konataj ĉiuj fazoj de la konspiro kaj senĉese li estas pri ĉio informata.«

!Kvazaŭ fulmotondro trafus la celon. Krasso ek saltas kaj konsternite okulegas al Cezaro. Dume tiu ĉi daŭrigas kaj ĉiu vorto estas nova fulmofrapo:

»La elektoj estas prokrastitaj ĝis la dudek-oka kaj okazos sub la protekto de armiloj. Ĉiu provo malhelpi estos sange frakasita.«

Senspire aŭskultas Krasso. Nun li demandas voĉlame:

»De kiu vi scias ĉion ĉi?«

»De Cicerono« respondas mallaŭte Cezaro.

Al la bankiero ŝajnas, ke li erare aŭdis.

»Ĉu de Cicerono?« li ripetas.

»Hodiaŭ posttagmeze invitis min Cicerono al si,« kapjesas Cezaro. »Li estis miele dolĉa. Nu, li estas jam de antaŭe al ni tiom amikema, ke li opiniis sia devo averti nin pri tiu, cetere neserioza, entrepreno, kiu povus al ni grave malutili. Kaj, se permesite doni al ni amikan konsilon, ni plej baldaŭ nin forturnu de tiuj aventuristoj ĉirkaŭ Katilino. Komprenoble, ke li devas kalkuli pri nia diskreteco, ĉar alie ne estos al li eble nin ŝirmokovri kontraŭ la uragano atendata el la senato.« Cezaro apogas sin dorsen kaj lipmordas: »Pli klarparole, tio signifas: mi kaptofermis vin en la mano, sed mi havas apartajn motivojn por vin indulgi. Se vi katenos la langon post la dentoj, diablo zorgu pri vi!«

Residiĝinte rigardas Krasso antaŭ sin rigide, korpemite. Nur post iom da tempo li povas pene-pene elbalbuti: »Neeble! Neeble!« Apoge li ekkubutas sur la femuroj, premante la frunton al la manoj, kaj mal-espere kapbalancas.

»Estas eble,« respondas Cezaro. »Eĉ pli, tute certe: Cicerono montris al mi la leterojn de Katilino skribitajn al Manilio en Etrurion.«

Cezaro mallevas sian rigardon sur la malesperulon, daŭrigante pli voĉmole: »Ho Krasso, vi ja scias, ke la postfaraj riproĉoj ne estas mia kutimo. Sed mi vin petas, plej kore petas, entreprenu nenion sen mia scio! Ni povas esti eĉ feliĉaj, ke la tuta afero tiel finiĝos. Eble vi ne scias, ke Katilino intencis dum la elektoj mortigi la konsulojn kaj la kontraŭajn kandidatojn. Tiu frenezaĵo ne povis sukcesi — sen konsidero de tio,

ke mi mem ne helpus tiajn rabistajn metodojn. Jes, vere, en Romo mem ne estas garnizonoj, sed en Etrurio prete staras Marcio Rekso, en Apulio — Metello, en Kapuo — Rufo, en Piceno — Celero, — ja, ĉiuj estas elprovitaj estroj, fronte de armeoj batalspertaj kaj fidelaj al la registaro. Sed antaŭ ĉio rememoru pri Pompejo kun la granda armeo, fidela ĝismorte, kiu plej ĝoje akceptus ekstermi manplendon da la mi-zeraj ribeluloj kaj al sia amata imperatoro enpremi en la manojn la diktatoran bastonon. Nu, estu feliĉa, ke al ni restis truo, tra kiu ni povas elgliti for! Mi suferas, treege suferas, ke mi devas tion al vi diri — sed ne ekzistas alternativo!«

Sufokita stertorado. Tiam Krasso kaplevas kaj Cezaro emociite forturniĝas: la giganto ekploris . . .

»Jes, vi pravas,« diras la potenca bankiero per rompita voĉo. »Milfoje vi pravas, ho Cezaro. Mi estis bovo blinde kaj stulte ekkurinta kontraŭ la muron.« Li kaptas la manon de Cezaro. »Vi estas sola al kiu mi fidas. Neniam plu mi entreprenos ion sen vi. Nur nun helpu min, diru, kio farota?« Cezaro leviĝas. La okuloj de Krasso gluiĝas al li time, senhelpe. »Kien vi?«

Penege elvenas la vortoj de Cezaro, sed sonas klare kaj firme. Radias el ili neŝanceblebla decido por plenumi tion, kion li ekkonis necesa.

»Al Cicerono. — Por informi lin pri nia blinda obeo. Por fleksi la nukon sub la jugon. — Adiaŭ do, ho Krasso!«

## Katastrofo

Devigata silenti. Rigardi, kiel la ruzega advokato, kiun la malkuraĝo de l' patricioj puŝis sur la pinton de l' ŝtato, atendas per sentreme embuska rigardo la oportunan momenton, la tagon, kiam la skandalo sufiĉe disŝvelos, por ke li el la »savo« de l' patrujo tiru faktan profiton; ĉion scii, la spionojn, kiuj la konsulon senĉese pri ĉio informas, citi nomojn, povi fingromontri ilin — kaj tamen esti devigata silenti, kvazaŭ buŝŝtopita. Ĉio nur por ke ne falu ĉirkaŭ la propran kolon la kaptomaŝo, pli kaj pli kuntiriĝanta ĉirkaŭ la gorgo de la blinduloj, sin ĵetantaj en la certan pereon. Vidi kiel kelkaj priridas liajn avertojn, riskitajn de li spite la minacan danĝeron, dum la aliaj ilin tuj denuncas al la konsulo, sendanta al li insistajn, dignostilajn leterojn kun mallerte maskitaj minacoj. Stari kviete, brakligite kaj kiel Cassandra antaŭvidi la malbonan fatalon, kiu alproksimiĝas, kaj tamen ne povante sin defendi, ĝin malhelpi. Jen, tio estas la sorto de Cezaro.

Forpasis la dudekoka de oktobro kiel profetite al Krasso: sub la armila protekto de la Cicerona volontula gvardio okazis la elektoj plej orde kaj anstataŭ Katilino estas elektita kiel konsulo por la sekva jaro Decimo Silano. Cicerono rifuzis suspektindan maten-

viziton de du konspirantoj, pli ĝuste nematuraj fantaziuloj, eĉ senskrupulaj krimuloj, sed li ankoraŭ ne miksis sin en la aferon, li nur cirkuligis la famon, ke oni provis atencion kontraŭ lia konsekrita vivo de l' konsulo! Lia ĉiam maldorma rigardo observis la sekretajn senditojn de Katilino en la provinco: Manilion en Etrurio, Septimon en Piceno, Julion en Apulio; nur lia manovro estas ankaŭ la incita letero, kiun senatano Senio publike legis en la kurio: en Fezulo eksplodis ribelo; nur lia manovro estas, ke oni anoncis denuncpremiojn: ĉiu denunconta konspiranton estos rekompencata, la sklavoj estos liberigitaj kun cent *sestercoj*; nur lia manovro estas, ke tra Romo disvastiĝis la famo: la konspirantoj intencas bruligi la urbon ĉe dek-du lokoj samtempe kaj al la loĝantaro aranĝi teruran sangbanon.

Sed li ankoraŭ ĉiam hezitas. Nur unufoje li ekatakis: nu, Katilino mem, kiam tiu ekkuraĝis lin spiti kaj veni en la senaton. Tio estis oratorajo tiel potence komponita, kun ekzaltaj klimaksoj, flama verbo kaj senkompata logiko. Ja, eĉ Cezaro mem, febre ĝin aŭskultanta, ne povis ne admiri. Rapidege malpleniĝis la benkoj ĉirkaŭ Katilino, dum lia respondo estis tute neaŭdebla en la tumultego de l' senatanoj. Kaj tiam Katilino saltis de sur sia loko: »Ĉu ĉirkaŭ mi sole malamikoj, puŝantaj min en pereon? Hej, tiuokaze sub ruinoj mi estingos la flamon min konsumantan!« Ili vidis lin puŝiĝi for kaj sub tiu ĉi impresio Cicerono atingis, kion per la grandioza sceno li intencis: la decidon de l' senato »*Videant consules*«, kio fine faris liajn manojn ag-liberaj.

Sed li ja ankoraŭ atendas: li dispremis la kapt-on de l' konspiro, forkurigis Katilino el Romo al

Manilio en Etrurion. Sed tiuj aliaj, kiujn inerte kondukas la intertempa gvidanto Lentulo, ankoraŭ ĉiam ne estas sufiĉe kompromititaj, por ke lia gloro disbrilu plene. Romo jam malpacientiĝas: la antaŭanoncitaj bruloj kaj murdoj mankas, eĉ pli, la sendanĝera ribelo en Fezulo, ŝajne senfruktiĝis. La aspirata gloro nun disfumiĝos — eble eĉ transformiĝos en primokojn.

Nun la konspirantoj mem enŝovas en liajn manojn la batalilon.

Deputitaro de l' allobrogoj, galla gento antaŭ nelonge subjugita kaj jam spertinta la senskrupulecon de l' romaj impostistoj, venis en Romon por plendi pri la elsuferitaj turmentoj kaj elpeti, ke impostistoj estu eksigitaj. Sed Romo surdiĝis: la alta aristokrataro havis tute nenian inklinton por malbonigi al la siaspeculoj la gajnon. La senhelpaj provinculoj serĉis manon, kiu en ilia mizero etendus al ili la helpon.

Kaj ili ĝin ankaŭ trovis ĉe la konspirantoj. Iu Umbreno, posedanto de eksporta entrepreno por Gallio komencis ilin ĉirkaŭiri kaj fine proponis al ili interligon. Inicinte ilin en ĉiujn sekretojn de la konspiro, oni invitis ilin reveni hejmen kaj en Gallio komenci disvastigon de ribeletoj, ĉar tiamaniere la militistaro de la respubliko estos katenata.

Postkonsente la galloj ekcerbumis pri la farita kontrakto. Ili eksentis, ke io ne estas en ordo kaj krome ili pensis, ke ili pli certe bonigos sian situacion, se ili fariĝos meritplenaj por la oficiala Romo; fine ili decidis malkovri tion al unu el la malmultaj viroj zorgantaj pri ili, al senatano Kvinto Fabio Sango, kun multe da singardaĵoj: »kio okazus, se« . . . kaj »kiel estus, se . . .« Post duonhoro la konsulo jam sciis ĉion.

Li tuj ekkonis: jen la decidiga frapo: interligo kun fremdaj popoloj por malutili al la respubliko! Sekrete li venigis la gallojn, laŭdis ilian fervoron, superŝutis ilin per sennombraj nedifinitaj promesoj, prezentante al ili allogajn perpsektivojn — kaj fine li ordonis, ke ili ŝajne akceptu la planon de la konspirantoj kaj trompinstigu ilin fari la decidigan paŝon. Malbele ja el morala vidpunkto, same malnoble kiel ankaŭ la entrepreno de la konspirantoj: la unua funkciulo de l' respubliko uzis la duonsovaĝan popolon por puŝi romiajn civitanojn sub la buĉhakilon.

La konspirantoj falis en la kaptilon: laŭ la postulo de l' allobrogoj la kontrakto estis skribe fiksata. Lentulo, Cetego kaj Statilio ĝin sigele subskribis. Nur Kasio Longino, ekflarinte la danĝeron, trovis ian pretekston kaj rapidis foriri el Romo por serĉi Katilino.

Nun la klapkaptilo kunfermiĝas: la delegitoj vespere ŝajnigas plensekrete forlasi Romon por reveni hejmen. Akompanas ilin Tito Volturcio. Antaŭ ĉio ili devas viziti Katilino, por ke li solene konfirmu la kontraktitan interligon. Sed ĉe la Mulvia ponto jam atendas pretoroj Valerio Flakko kaj Pomptino kun taĉmento da militistoj. La vojaĝantoj estas ĉirkaŭataj, la allobrogoj tuj — interkonsente — cedas, Volturcio provas ekrezisti, sed ankaŭ li cedas, vidante sin perfidita de ĉiuj. La pirata embusko de Cicerono sukcesis.

Eĉ pli brile ol la grandan scenon kontraŭ Katilino, Cicerono aranĝas la spektaklon kontraŭ la konspirantoj: jam la saman nokton ili estas malliberigataj, estas kunvokata la eksterordinara kunsido de l' senato; propramane enkondukas la konsulo senatanon Lentulon; postsekvas la aliaj, emblemitaj per liktoraj hakiloj,

brilantaj el la faskoj. En la flagranta lumo ludiĝas la dramo: la allobrogaj delegitoj propravole rakontas, kion ili scias — ja eĉ pli — kaj Volturcio sub la premo de la indikoj iom post iom konfesas. Lentulo kaj la aliaj devas konfirmi la aŭtentikecon de la sigelo kaj skribo. La senato decidas ĉiujn akuzitojn restigi en la enketa malliberejo; la sekvantan tagon oni devos decidi pri ilia sorto.

Cezaro malesperas. Ke Cicerono puŝos la aferon en tiom gravan stadion nur por kontentigi sian ambicion, Cezaro ne povis supozi. Alie li estus ekparolinta spite ĉion, kion li riskus. Nun li sentas sin kunkulpulo pri tio, kio okazis. Korskuite li observas la palajn vizaĝojn de la arestitoj. Dum la aliaj venkas sin mem, Statilio, freŝjuna, preskaŭ infano, mienas al ploro; liaj terurlarĝaj okuloj almozas indulgon, observante eĉ la plej malgrandan ŝanĝon en la malmolaj, nepenetreblaj vizaĝoj de la senatanoj. Inter ili estas ankaŭ tiuj, al kiuj mankis nur kuraĝo por fari la samon. La senpripensa junulo tute ne komprenas, pri kio fakte temas. Sendube oni devus lin puni, sed tiel estas malhumane.

Subpremata kolerego plenigas la animon de la Juliano. Nun la potencaj sinjoroj denove furioze senbridiĝos opiniante, ke per la punoj ili kvietigos la pli kaj pli kreskantan malkontenton de l' popolo. Kaj ti am — satiginte siajn moralajn inklinojn — ili revenos hejmen kaj okupiĝos plue pri siaj aferacoj. Ankoraŭ neniam en la profundo de lia animo iĝis tiom klare, ke la respubliko perdis sian ekzistorajton, ke nur unu sola, sed samtempe honesta kaj forta mano, povus eltiri la rompknaran ŝtatŝipon el la kirliĝo de l' ur-



aganta maro, sur kiun altiris ĝin malhonesto, stulto kaj koruptiteco.

La oleo glata voĉo de Cicerono elvokas en li preskaŭ fizikan vomsenton. Pento kaj sinriproĉoj dismordas lian koron. Li scias, ke li neniam povos al si pardoni tiun silenton, ke ĝi de nun kiel malluma ombro ŝvebos super lia vivo.

Oni dividas la arestitojn: tiun solan nokton gardos ilin eminentaj civitanoj. Nevolonte sin anonc- as kelkaj: Lentulo Spintero transprenas sian kuzon Lentulon Suron, Kornifiko Cetegon, Krasso, kies pufa vizago malgraŭ la ruĝa lumo de la torĉo estas mortpala, Kapitonon kaj Terencio Ceparion. Tiam paŝas antaŭ- en Cezaro kaj kvazaŭ ŝirmovole ĉirkaŭbrakas la mal- larĝajn ŝultrojn de l' juna Statilio.

## „Vae Victis!“

*Bell. Cat. 51, 52*

Morton! — Morton! — Morton! — Voĉdono post voĉdono, homo post homo tiel! Komence de Silano (konsulo por la sekva jaro) ĝis la lasta aristokrata melonkapulo, kiu ĝis nun diris en la senato nenion alian ol »Jes!« aŭ »Ne!« ĉiuj voĉdonas por la ekzekuto de Publio Lentulo Suro, Kajo Cetego kaj ĉiuj ceteraj. La tuta senato eksoifegis la sangon kaj tiu soifego kvazaŭ pasie ekzaltis eĉ la plej paceman homon. Ŝajne ĉiuj ekfrenezis. Kaj la kaŭzanto de tiu purpura ebriĝo, konsulo Marko Julio Cicerono, la heroo de l' tago kaj la ventoflago en la politiko, staras kun fierega kaj digna mieno ĝuante sian triumfon.

La rigardo de Cezaro, saturita de abomeno, ĉirkaŭiras la benkojn. Hieraŭ, antaŭhieraŭ ili ĉiuj timtremis. Pro tio ili volas hodiaŭ sin venĝi. Oni ne povas trovi sufiĉe da kruelaj vortaĉoj por brulstampi la « perfidon kontraŭ la patrujo », por altiri ĉiujn malbenojn de la dioj kaj homoj sur tiun manplendon da kompatinduloj, elmetitaj sendefende al la senata furiozemo.

Se Katilino sukcesus venki, eĉ ĝis la tero mem ili kapklinus por saluti la novan estron. Same ja kiel ili nukfleksis antaŭ la pli bonŝanca Sullo.

Jen voĉdonas Volkacio Tullo, jen Katulo, jen

Fabio Sango, al kiu oni danku la decidigan baton. La sagrigardoj strabas transen: oni scias, ke Cezaro rilatis kun Katilino kaj kvankam oni ne sukcesis pro tio eltordi lian kolon, tamen oni fruktuzas klaĉon kaj faktojn por cirkuligi la nekontrolleblan famon, por aranĝi la plej indignan opinion kontraŭ li.

Lipmorde li silentas. Do, la proceso kontraŭ Rabirio estis vana? La donita instruo neniom utilis? Ĉu ili, apenaŭ refortiginte post la frapo sur la kapon, jam forgesis la averton kaj kun aluzurpita aŭtoritato kondamnas al morto, tute malzorgante pri la popolo, kiu laŭ la tradicio kaj leĝo devus diri la lastan vorton? Ĉu la malsaĝeco de tiuj ĉi cerboj estas senesperiga? Sed ili ja atentu, ke post Katilino ne venu iu alia, pli forta, kiu frakasos ĉion, kio baros lian vojon!

»Kajo Cezaro havas la parolon!«

Kion, ĉu jam? Leviĝante li rapidege rekontrolas la kernopensojn de sia oratorajo.

Singardema li devas esti. Akreco aŭ minacoj ne plibonigus la situacion de la kulpigitoj kaj lian propran puŝus en malfacilaĵojn. Li devas paroli mildipe kaj flate, kvankam li ŝatus tondri. Eble tamen li sukcesos malhelpi la plejmalbonon.

Silentego. Evidente ĉiuj kun streĉita scivolemo atendas, kion li havas por diri. Rapida, lasta ĉirkaŭrigardo kaj li jam ekparolas:

»Altestimata senato!

Kiam oni volas decidi pri malfacilegaj problemoj, oni devas rezigni pri la sentoj de simpatio aŭ antipatio, venĝemo aŭ indulgo. Tiuj ĉi sentoj malfaciligas ja ekkoni, kio estas justa, ĉar estas maleble servi al la pasio kaj utilo samtempe. Regi devas nur la

prudento: kie ekregas la pasio, estas mortigata ĉiu klara penso.

Mi povus, ho altestimata senato, citi sennombrajn okazojn, en kiuj krueleco aŭ indulgemo de reĝoj aŭ eĉ de popoloj fruktigis malbonon. Sed mi preferu fingromontos la korektan, senpasian kaj skrupule pripensitan agmanieron de niaj avoj.

En la milito, kiun ili gvidis kontraŭ Perseo, la makedonia reĝo, staris la granda, plenflora komunumo Rodo, perfide ĉe l' flanko de la malamikoj, kvankam sian bonstaton ĝi devis danki al ni. Sed kiam, post la fino de la milito, niaj praavoj interkonsiliĝis pri la sorto de Rodo, ili ĝin ne punis, por ke oni ne riproĉu ilin: »ja, ili militis pli por riĉiĝi ol por revenĝi sian ofenditan rajton.«

Same dum la *punikaj* militoj ili neniam eluzis la ŝancojn por venĝi sin laŭmerite, kvankam la kartaganoj tre ofte rompis pacon kaj interpacon: la reputacio kaj digno de Romo estis al ili pli gravaj ol ĉiuj punŝancoj kaj juraj titoloj. La saman aferon vi havas ankaŭ nun: oni devas priatenti, ho altestimata senato, ke la krimon de Lentulo kaj liaj adeptoj oni ne pli taksu ol la dignon kaj reputacion de Romo; ke la verdikto estu formulata por la interesoj de la respubliko kaj ne pro ia persona venĝemo. Se temus nur pri ia teoria traktado de la puno, kiun meritas tia krimo, ankaŭ mi konsentus pri la neordinaraj proponoj ĉi tie eldiritaj; sed la graveco de la peko igas forlasi tian pritraktadon; ni devos do, sendube kontentiĝi pri la laŭlegaj rimedoj.«

Ĉu iu rimarkis la ironion en la lasta frazo? Fulma ĉirkaŭrigardo. Oni sidas mute kaj atente kaj sur

la vizagoj estas nenio rimarkebla. Li jam daŭrigas:

»La plimulto de miaj antaŭparolintoj tre bedaŭris la sorton de Romo, priskribante teruraĵojn de milito kiel ankaŭ la sorton de l' venkitoj: estas eldiritaj tie ĉi vortoj pri rabkaptitaj knaboj kaj knabinoj, pri suĉinfanoj elŝiritaj el la ĉirkaŭteno de l' gepatroj, pri virinoj senhonorigitaj de la venkintoj, pri la prirabado de l' sanktaj lokoj kaj privataj domoj, pri instigo al murdo kaj bruligo — ĝis, ja, ĉio finiĝis en haoso de armilaro, kadavroj, sango kaj mizero. Sed kion — pro dioj — oni volis atingi per tiu ĉi priskribo? Cu per tio oni volis bloveksciti la fajron, se la teruraĵoj de l' nuraj faktoj nesufiĉe flamigos?

Neniu ekzistas, ho altestimata senato, al kiu la farita maljustaĵo ŝajnus malgrava: estas ja multaj, kiuj pro ĝi eĉ pli forte suferas ol estus necese. Nur pri la sekvoj oni vidas diferencon: ja, tre malmultaj ekscias pri la furiozaj faroj de l' tiom nekonata kiom sensignifa proletaro. Kontraŭe, la faroj de l' eminentulo vekas ĝeneralan atenton. Pro tio oni devas esti plejeble singardema. Ju pli io staras meze de la ĝenerala interesiĝo, des pli devas foresti pasio, malamo kaj precipe vengemo. Kion oni povus pardoni al privatuloj, ĉar ili faris tion en afekcio, tion al la registaro oni facile riproĉus, ke ĝi faris ĝin nur por troa krueleco. La grandeco de l' krimo, ho altestimata senato, estas super la mezuro; nu jes, sed la plimulto de la homoj pensas nur pri la fina konsekvenco kaj kritikante iom la severan kondamnon, ili forgesas la krimon mem.«

Mallaŭta susurado. Kelkaj voĉpreme interflustras, signife reciprokante la kapjesadon. Cicerono ne kaŝas sian senreviĝon. Kaj nur Katono enboris la rigardon antaŭ sin, balancante la hirtan, ruĝharan kapon: —

nu, nun alvenis la momento por uzi la plej fortan ar-  
milon.

»Mi konas la firman karakteron kaj honeston de Decimo Silano kaj mi scias, ke tiu ĉi tre estiminda honestulo ne konsideras personajn simpatiojn aŭ antipatiojn, li pensas nur pri la interesoj de la ŝtato. Kaj tamen al mi ŝajnas, ke lia voĉdono estas vere ne kruela — kio ja, konsidere al tia krimo, povus nomiĝi kruela? — sed malutila por la interesoj de la ŝtato. Fakte, ho Silano, oni povus ekpensi, ke vin al la aprobo de tiu neordinara procedo instigis timo kaj supraĵema kono de la leĝo. Pri timo ne povas ja temi pro la imponaj aranĝoj por la sekureco plenumitaj de nia altestimata sinjoro,« — akre flugas la vortoj kaj lia rigardo trafas kiel klingo rekte en la viz-aĝon de Cicerono, kiu pli kaj pli paliĝas — »la sinjoro konsulo. Ankaŭ pri la mortpuno mi ne volas diri ion alian ol ĝi efektive estas: por la mizeraj kaj premataj la morto ne signifas doloron, sed ripozon post ĉiuj turmentoj, ĝi faras finon al la tuta homa sufero, ĉar tie transe estas nek ĝojo nek doloro. Sed, pro la ĉielo, mem, kial vi ne proponis ankaŭ la publikan skurĝigon?« Ĉiuj rigidiĝis. Nun rapide pikon en la kolon okul-al-okule al Cicerono: Nu eble, ĉar la *Lex Porcia* tion malpermesas?« Kaj nun disruliĝas vorttorento, kvazaŭ ŝprucegoj de akvofalo, unu vorto puŝpelas la alian:

»Sed ekzistas ankaŭ aliaj leĝoj, kiuj anstataŭigas la mortpunon kontraŭ la civitano per ekzilo! Aŭ eble pro tio, ke la skurĝado estus pli peza puno ol la ekzekuto? Sed vi mem diris: kio ja povus esti tro severa aŭ kruela por krimuloj, kiaj tiuj ĉi! Ĉu, ke ĝi estas eble pli milda? Nu, kial en malpli gravaj

okazoj ni obeu la leĝon, se ni ĝin malobeas en la pli gravaj?«

Brukrioj kaj tumulto. Plimulto de la senatanoj saltleviĝas de la sidlokoj. Furioze disbrakante ili kriegas tiom, ke unu ne povas aŭdi la alian. Silano viŝas dikajn ŝvitgutojn de sia bonula, graseta vizaĝo. Dume la tutan tumulton superbruas sonora, ĉien penetranta voĉo:

»Sed, kiu riproĉus tian agmanieron kontraŭ la perfiduloj de l' patrujo? La tempo, ĉiu morgaŭo, la sortoŝanĝo, reganta la animojn de ĉiuj popoloj. Eksterdube, ke la krimuloj meritas sian sorton; sed havu antaŭ la okuloj, ke via kondamno trafos ankaŭ la aliajn. Se la aŭtoritato nur unufoje transirus en la manojn de la malpli saĝaj aŭ malpli honestaj homoj, tiu ĉi ekzemplo, starigita de la indaj kaj kapablaj, servos al la malindaj kaj malkapablaj kiel regulo.« Multpene li sufokas torenton de mokvortoj, sin puŝantaj al la buŝo. Li sin savas en kvietan retorikon:

»Post la venko super Ateno la lakedemonianoj starigis 30 virojn kiel regantojn. Tiuj ĉi komencis sian ofidadon per la senjuĝa ekzekutigo de krimfamaj kaj malamegataj individuoj. Ekestis granda ĝojo en la popolo kaj oni unuanimis: ja, trafis ilin meritata puno. Sed poste, kiam ilia aŭtoritato enradikiĝis, ili komencis veran sangteroron, mortigante sennombre senkulpulojn kaj kulpulojn. Nu, la sklavigita popolo kare suferpagis sian stultan ĝojon. Aŭ jen ekzemplo de nia epoko: kiu ne aprobis la agmanieron de Sullo, —« estas eldirita la timiga nomo; kvazaŭ fulmo traskuus ĉiujn korpojn — »kiam li ekzekutigis Damasippon kaj aliajn degenerintojn. Kaj tamen tio estis komenco de terura hombuĉado: kiam oni pekaspiris domon kaj havaĵon, aŭ eĉ nur valorajn aŭ veston de l' alia, oni enmetigis lin en

la proskribliston. Nur tempeton post la ekzekuto de Damasippo trafis la sama glavo ĉiujn, kiuj ĝojis pro lia morto kaj la murdado estiĝis senfina ĝis Sullo sukcesis superŝuti siajn kreitaĵojn per senmezuraj riĉaĵoj! Nu ne, tio ja ne estu komparo al Marko Tullio aŭ al tiu ĉi okazo. Sed en la granda ŝtato vivas ĉiaj homoj: imagu alian okazon, alian konsulon, kiu disponas ankaŭ la militistaron: unu falsa sciigo — unu decido de la senato trudanta en lian manon la glavon — nu, kiu obstrukcos lian vojon kaj malhelpos al li eksvingi la glavon?! Niaj praavoj, altestimata senato, estis sufiĉe kuraĝaj kaj sagacaj, ilin ja ne malhelpis la troa memtaksemo, kiam temis pri alprenado de fremdaj utilaj aranĝoj. Nia armilaro por la batalo de proksime kaj de malproksime estas de *samnita* deveno; niaj oficialaj emblemoj, de *tuskana*. Ni kutimis esplori kaj alproprigi ĉiun praktikan novaĵon ĉe malamikoj aŭ amikoj, pensante tute ĝuste, ke ion bonan oni ne nur envie rigardu, sed ankaŭ adoptu. Kaj samtempe enhejmiĝis laŭ la greka ekzemplo — skurĝado kaj ekzekutoj de civitanoj, kio en la posta evoluo de la respubliko kondukis al bedaŭrindaj erarfaroj de l' justeco. Jen tial estis proklamata kun aliaj leĝoj ankaŭ Lex Porcia, per kiu oni rekonas la eblon de la amnestio. Mi kredas, ho altestimata senato, ke en la nuna okazo oni devas ĝin ne rompi. Ĉu ni ja pretendas esti pli saĝaj ol tiuj, kiuj el malgranda civito elkonstruis tiun ĉi grandegan ŝtaton, ĉu ni, kiuj apenaŭ povas priŝirmi tiun imponegan organizaĵon?

Nu jes, vi min demandos, ĉu oni liberigu la konspirulojn por pligrandigi la taĉmentojn de Katilino? Tute ne! Mi proponas, ke oni konfisku iliajn havaĵojn kaj malliberigu ilin por ĉiam en la karceroj de la



grandaj komunumoj. Same tiel mi proponas la punodonan sankcion kontraŭ ĉiu provo por rekomenci tiun ĉi entreprenon.«

Dum kelkaj momentoj paŭzo. Poste oni ekplaŭdis, komence timete, sed baldaŭ pli kaj pli rulbrue. Formiĝas grupetoj, elŝprucas viglaj diskutoj. Ŝajnas, ke la plimulto estas konvertita por la pli milda procedo. El iu grupo elturas Teracinio. Li surgrimpis la sidbenketon kaj svingante sian nottabuleton krias senĉese en la svarmon lin ĉirkaŭantan: *Lex Porcia! Lex Porcia!* Silano, la fostokrura, malrapide venas ĝis Cezaro, rigardas lin zorgokule kaj premante lian manon senĉese certigas, ke li ne esploris ĝisfunde la aferon. Jes, nun li bedaŭras sian senpripensan decidiĝon.

Savita, jam ekspensas Cezaro. Ja, savita! Malpeza kaj agrabla sento varmigas lian bruston.

Sed nun leviĝas Katono. Brulegas liaj fanatikulaj okuloj, li ekkrias nekomprenblajn vortojn en la tumulton. Jam malpli laŭte, ĉiam malpli laŭte — fine silento.

»Eh, mi havas tute alian opinion, ho altestimata senato,« ektranĉas lia kriaĉa voĉo la ondantan aeron — »kiam mi pririgardas la danĝeron minacantan al ni. Ne sola mi estas kun la konvinko, ke la puno por la krimuloj agintaj kontraŭ la altaro de l' patrujo kaj la hejmaj fajrujoj estis bone primeditata. Ĉi tie ja ne temas pri sagaca cerbumado, sed pri necesa sindefendo. Ĉiu alia krimo estas finita en la momento, kiam oni ĝin plenumis. Sed tiu ĉi ne facile ĝisatendos la reveniĝon, se okazos tio, kion ĝuste ni devus antaŭfare malhelpi: eh, ĉu estas ja iu, kiu post la venko super Romo volus juĝi? Kaj tial, pro la ĉielo mem, mi turnas min al vi, al kiuj plivaloris la propraj domoj, bienoj, art-

trezoroj kaj negoclubroj ol la ŝtato. Se vi volas vian tutan havaĵon, ĝi estu io ajn, konservi por vi solaj; se vi volas ankaŭ plue pasigi vian komfortan vivon, vekigu do: temas nun pri viaj kapoj mem! Minacataj estas nek la impostoj, nek niaj aliancaj amikoj: nia libereco, nia vivo staras sur la lotkubo. Kiom ofte kaj ĝisdetale, ho altestimata senato, mi jam riproĉegis la luksemon kaj monavidon de niaj kuncivitanoj, kiom da malamikoj per tio mi akiris: havante mem nenian aspiron, mi ja havis nenian komprenemon pri la krimfaroj de l' aliaj. Nu, vi povis tion rigardi ne grava, ĉar la ŝtato staris firme kaj la abundeco povis senkulpiĝi la misuzojn. Sed nun temas nek pri la moralo, nek pri la nemoralo, nek pri la potenco, nek pri la grandeco de Romo, nun ja — egale de kiu flanko ni observas tiun ĉi aferon — temas nur pri la demando: ĉu la estonteco apartenos al ni aŭ al niaj malamikoj!«

Silento, nur silento. La vizaĝoj paliĝis, la okuloj de ĉiuj gluiĝas al la buŝo de l' oratoro: li enkaptis ilin en sian potencon. Amare Cezaro lipmordas: ankaŭ ĉi tie la adorata monsako ludas decidigan rolon.

»Modereco? Kompato? Delonge ni ja forperdis la veran sencon de ĉi tiuj vortoj! Disĵetadi monon de la alia estas — nundire — donacemo, esti malnoblaĉa signifas hodiaŭ: kuraĝi. Jen ja, kial la respubliko enfalis en la nunan situacion. Nia moralo forcedas la ŝtatbienojn al la donacemaj ekspluatistoj super la aliancanoj aŭ al la kompato de l' ŝtelistoj. Sed oni ne komencu nun vane disverŝadi ankaŭ nian sangon pro indulgemo al kelkaj krimuloj! Kajo Cezaro, kiu evidente ne kredas pri la posttomba vivo, laŭ tio ankaŭ ne pri la punekzilo de l' mortintaj krimuloj en la sovaĝajn, malmildajn kaj terurajn regionojn for de ia ajn

bono, belege kaj verve oratoris pri: ĉu esti aŭ ne esti. Li proponis konfiskon super la bienoj de ĉi tiuj krimuloj kaj ankaŭ ilian enkarcerigon en la diversaj komunumoj, sendube pro la timo, ke ĉi tie en Romo povus ilin liberigi la konspirantoj de l' popolpartio aŭ subaĉetita bandaĉo. Eh, kvazaŭ ne ekzistus tra la tuta ŝtato krimulaj individuoj kaj kvazaŭ per kuraĝego oni ne povus en la provincoj eĉ pli multe atingi, ĉar tie la defendo estas multe pli malfacila! Ne, ho ne! Aŭ li vere timas: tiuokaze lia propono estas superflua; aŭ li sola el ni ĉiuj ne timas: tiuokaze mi devas tiom pli timi pri mi kaj vi ĉiuj!«

Eĉ tro klare. Nun eĉ plimultiĝis la venenaj rigardoj, kiuj Cezaron dum la lastaj tagoj kaj horoj tiom ofte trafadis. Ĉe la malica aludo de Katono al la ateismo de la supera religia funkciulo de la respubliko, ili lin ekskurĝis. Kvazaŭ ne rimarkante ilin, li konservas sian trankvilan, atentan mienon, kvankam en li bolas kiel en la infero mem. Pereis ĉio, pensas li. Jes, pereis ĉio.

»Nu, ne forgesu la jenon!« krias Katono plue. »Se vi kondamnos Publion Lentulon kaj la kunulojn, vi kondamnos per tio ankaŭ Katilino, lian militistaron kaj ĉiujn ceterajn konspirantojn! Se vi nur iom hezitos, ilia aroganteco superos ĉiun limon. Mankaptu ilin, nu, fortege, kaj vi rompos la spiton en iliaj animoj.

Ne per la potenco de l' armiloj niaj prapatroj levis la respublikon al tiu ĉi alteco. Ĉar en tiu okazo ni trovus nin en belega situacio, ni ja havus pli multe da ŝtatanoj kaj aliancinoj, plimulte da armilaro kaj ĉevaloj ol ili. Ho ne, io alia, io, kion ni tute ne taksas, firmigis la grandecon de Romo: familiareco, diligentaĵo, justo kaj animsimpleco, kiu ne inklina al kri-

mulaj instinktoj aŭ pasioj. Ni tion transformis en lukson kaj monavidon, en malabundon ĉe l' popolo kaj en abundon ĉe l' unuopuloj. La riĉeco estas nia idealo, la neniofarado — nia celo. Ne plu ekzistas diferenco inter bono aŭ malbono kaj la salajron por honesta laboro ŝtelas la senskrupululoj. Ĉiuj el vi konas nur vian multkoston »mi«, klopodante hejme nur ĝui kaj ĉi tie nur gajni monon aŭ influ-rilatojn. Ĉu do vin mirigas, ke la krimulaj manoj kroĉiĝas en la neprizorgatajn ŝtat-trezorojn?»

Mokrido disfendaĉas lian buŝon, nun similan al la disosceda faŭko de rabobesto.

»Ho jes, mi tute forgesis: estis ja civitanoj el la unuarangaj familioj, kiuj ekkonspiris por disflamigisian naskurbon kaj batalinciti la gallan genton, saturitan de malamego. La gvidantoj de l' malamikoj kun sia militistaro minacas la respublikon kaj vi ankoraŭ demandas: kion do fari pri la banditoj de Katilino, kaptitaj en la urbo? Eh, kompreneble: ni fermetu la okulojn, jen nematuraj junuletoj pekis pro ambicio — kaj krome ni ekspedu ilin bone armitajn, por ke vi ne pripentu la indulgemon kaj mildecon, kiam ili eksvingos la armilon. Vere ja, la situacio estas malfacila, sed tamen ne timiga«. La mokema ridado estingiĝas, la nuda malamo eksiblas el la sonora voĉo. »Al mil (diabloj, fi! Vi okuletas unu al la alia, ŝanceliĝante pro la kadukiĝo kaj forvelko de via spirito kaj via tuta espero estas kroĉita nur al la ĉielo, kiu jam tiom ofte savis la respublikon. Ho ne! Per ĵurpromesoj kaj virineca plorego vi ne elpetos la dian helpon: singardo, decidemo kaj primedito — jen la sekreto de l' sukceso. Ignorema maldiligentulo vane petegas la diojn: malamike ili rifuzos lin«.

Li mallevas la kranion kaj fiksrigardante antaŭ sin denove ĝin levas. Flugtuŝe li ekrigardas Cezaron kaj daŭrigas:

»En la tempo de niaj patroj Aŭlo Manilio Torkvato, la supera militestro kontraŭ la galloj, igis ekzekuti sian propran filon, ĉar tiu ĉi ne obeis la ordonon kaj ekbatalis kontraŭ la malamiko. Tiel terure devis tiu brava junulo pripenti sian nebriditan riskemon. Kaj vi ankoraŭ hezitas por kondamni tiujn ĉi monstrojn, kiuj perfidis sian patrujon? Nu jes: ilia krimo tute ne akordiĝas al ilia vivkutimo. Indulgu do Lentulon ĝuste tiel, kiel li ja mem iam indulgis la senton de l' honto, la reputacion, la diojn kaj homojn, estu do kompatemaj ankaŭ pri Cetego, ĉar li unuafoje levis armilon kontraŭ la patrujo! Kaj Statilio, Kapitono, Cepario? Se ili iam ajn estus respektintaj ion, ili ne implikiĝus en tiun ĉi konspiron.

Sed jam al la fino! Se ankoraŭ iu ekzistas, kiu kompatemas al la krimuloj kaj kiun oni ne povas konvinki per vortoj, li turnu sian rigardon al la situacio: ni estas ĉirkaŭsieĝataj; la glavo de Katilino minacas ĉe nia gorgo; en la urbo, ĉe l' koro de Romo, embuskas liaj kunfriponoj; oni povas pri nenio sekrete interdiskuti, pri nenio decidadi: ja, estas necesa la plej granda rapideco«.

Li elrektiĝas, strikte sin envolvas en la faldojn de sia togo. El lia senkarna vizaĝo radias nun, vere, io potenca, impona.

»Tial: ke per la agado de la senkarakteraj kuncivitanoj la ŝtato estas puŝita en la plej grandan danĝeron; ke per la atestado de Tito Volturcio kaj la allobrogaj senditoj estas pruvita la kulpo pri la

preparoj de murdoj, bruligo kaj aliaj kruelaĵoj kontraŭ la ŝtato kaj civitanaro,

mi proponas, ke ĉiuj konfesintoj estu ekzekutataj kiel ĉefkulpuloj.«

Tumulta aklamado: ĉio finita.

Malrapide leviĝas Cezaro. Li estas ĝisfine elĉerpita. Ŝlimeca, maldolĉa gusto pikas lian langon, kvazaŭ li estus diboĉinta la tutan nokton. Pezpaŝe li forlasas la kurion.

Post li, elirinta, oni daŭrigas la voĉdonadon.

Morto! — Morto! — Morto!...

## Gasto el la alia mondo

Cezaro adiaŭis sian gastiganton kaj nun iras tute senakompane al sia oficiala loĝejo en la pontifika palaco. Plenpulme li enspiras la malvarman, puran aeron de l' decembra nokto, elmetas sian brulan frunton al la glacia vento, fajfanta tra la stratoj de Romo. Estas agrabla tiu malvarmo, karesanta la martelatajn tempojn kaj forpelanta la turmentajn pensojn. Oni forgesas dum momento, ke la senato estas atuto, antaŭ kiu ĉio alia estas malpli valora, ke, ĝuste kiel li supozis, oni eltiris la glavon de Romo por frakasi ne nur la konspiron, sed ankaŭ la tutan popolpartion. Oni ankaŭ ne sentas, ke oni baraktas en la manoj de l' honoravida ambiciulo Cicerono, kies nura vorteto sufiĉas por fari kadavron el ĉiu malsimpatiato.

Sed en malluma, mallargha strato, proksime al la palaco, eksentas Cezaro, ke la vento ĉesis blovi, ke la apenaŭ malvarmiĝinta frunto denove ekbrulis. Sed li rimarkas ankaŭ ion alian: ke ĉe la alia stratflanko, ĝuste kontraŭ li, iras viro, kiu evidente atendas oportunan okazon por proksimiĝi al li. Li ekrememoras, ke subkonscie jam delonge li aŭdis kiel post li klakehas urĝemaj paŝoj — jam de Aventino, de la domo de lia gastiginto.

Nun la nekonato sin turnas por transiri ĉi tien.

Cezaro ekstreĉas la muskolojn, okulborante tra la mal-lumon. Subite li ekpensas, ke tio povus esti dungita murdisto, kiun iu el la malamikoj sendis kontraŭ lin — Cicerono, volante skandal-evite tiel liberiĝi de li, aŭ Katulo, kiu ekde la pontifikaj elektoj persekutas lin kun flama malamo. Ĉar li ne sukcesis impliki la Julianon inter la konspirintojn, eble li tiamaniere volas kvietigi sian vengemon. Malrapide Cezaro enŝovas la manon inter la faldojn de sia togo kaj nerimarkeble ekkaptas la tenilon de l' ponardo, kiu pendas ĉe la zono de l' tuniko.

La nekonato transversas la straton kaj ekbaras al Cezaro la vojon. La mantelon li ĵetis trans la kapon kaŝante la vizaĝon, el kiu flamas nur du arĉdaj okuloj. Cezaro pli preme kaptas la tenilon de la ponardo kaj ekhaltas:

»Nur du vortojn, Cezaro,« diras la fantomo kaj ĝia voĉo ŝajnas al la Juliano strange konata.

»Kiu vi estas?« li demandas.

La nekonato hezitas, ĉirkaŭturne rigardas. Ili staras antaŭ la fermita pordo de viandvendejo, tra kies fendoj elpenetras iom da lumo. La maskito venas tute proksimen kaj levas por momento la kovraĵon for de l' vizaĝo. Cezaro fiksrigardas lin, kvazaŭ ekvidinte terurfantomon.

»Vi — nun en Romo?« fine li ekbalbutas penege.

La alia ekridas — ekridas raŭke, senespere.

»Ĉu vi ne volus gajni la denuncpremion? Vi estus ja la unua, kiu pere de mi profitus monon.« Malaperas jam sarkasmo el lia voĉo. »Ĉu mi povas kun vi paroli?« li demandas koncize.

»Nu, iru kun mi«.



Tiu alia lin alrigardas okulangule kaj ekmiras.

»Vi eĉ ne hezitas? Ĉiun honoron, vere, vi estas bravulo!«

Ili silentas ĝis antaŭ la enirejo de l' ĝardeno. Cezaro rapide malŝlosas, lasas la malfruan gaston eniri kaj fermas post si la pordon. Tiel ili eniras la domon nerimarkite. Nur kiam ili eniris la kabineton, ili daŭrigas la konversacion.

La dommastro prizorgis, ke ili restu neĝenataj, Nur la maljuna sklavo — la sama, kiu antaŭ pli ol du jardekoj sciigis al la junulo la morton de l' patro, pri-servas ilin, alportante manĝaĵojn, vinon, fruktojn. Poste li neaŭdeble foriĝas.

»Vi proponas al mi eĉ panon kaj salon de l' bonveno,« diras la gasto, »al mi, la ekzilito. Tion mi neniam forgesos al vi. — Mi devus esti pli frue vin ekkoninta,« li aldonas ĝeme.

»Ĉu vi scias, kio okazis dum via forrestado?« evitemas Cezaro.

»Mi scias«, kapjesas la alia. »Ankaŭ mi havas miajn spionojn — same kiel Cicerono. Ili rakontis al mi ankaŭ, kiel korflame vi pledis por miaj amikoj. La malgrandan komplezon, faritan iam al vi, vi pli ol kompensis...«

»Mi scias,« ripetas la gasto mansvinge, »ĉion mi scias. Ke ili vin post via parolado antaŭ la kurio minacis per siaj ludglavoj kaj ke Cicerono mem — ho, kiom da kornobleco! — ĵetis sin ŝirmodone antaŭ vin!«

»De tiu tempo mi ne plu estis en la senato« diras Cezaro. »Pli malpli baldaŭ mi montros al ili, kion signifas: endanĝerigi la vivon de l' romaj civitanoj.«

»Ankaŭ mi ĉeestis,« daŭrigas la gasto malatentante la interrompon, »kiam oni gvidis miajn amikojn en la ĉelon de mortkondamnitaj; mi ĉeestis, kiam Cicerono eliris kaj eldiris la sian: »Ili vivis!« Neniam li estis pli proksime al la propra morto ol en tiu ĉi momento: mi jam kaptis la ponardon. Sed tiam mi rezignis: por kio ja ĉio? Tamen restus ĉiuj aliaj, la tuta, granda patricia senato — Cicerono estas ja nur ilia pulĉinelo, malgraŭ sia laŭŝajna ĉiopovo.«

»Kaj kion vi intencas nun entrepreni?«

»Pri mi estas finite,« trankvile konstatas tiu alia. »Nenian esperon plu mi havas rilate tion. Mi provos kun la miaj trapuŝi nin en Gallion, sed tio estos mal- ebla: Metelo Celero gardas kun tri legioj la alpajn trairejojn, dum elsude marŝas kontraŭ min la senataj taĉmentoj. Kaj tiel la hundoj ĉirkaŭcirklos la lupon kaj diskarnos ĝin«. Malgaje li rigardas antaŭ sin, sed tuj kaplevas: »Nu, mi ne venis nun por priplendi mian sorton,« firme li voĉas.« »Mi devas kun vi paroli pri pli gravaj aferoj. Kion mi entreprenis, tio malsuk- cesis — eble prave malsukcesis: mia ideo ne sufiĉe profunde ekradikis. Mi volis altrudi mian personon al la kaduka kaj maljuniĝinta senato, eĉ ne sciante, kion mi faru pri la ŝtato, se mi akiros la superregon. Vi tion scias, ho Cezaro. Vi estas la sola homo en Romo, kiu ankoraŭ kapablas fari ion el la malnova regno. Ĉiuj aliaj interesiĝas nur pri si mem, nur vi sola zorgemas pri la afero. Kaj tial mi al vi transheredigas ĉion, kio en miaj intencoj estis bona kaj vivkapabla.« Tiuj okuloj, kiujn Cezaro vidis ĉiam nur malklare vu- alitaj aŭ senripoze flagraj, iĝas nun grandaj kaj brilaj. La vizaĝo denove retrovis sian belecon, kiun ĝi posedis antaŭ ol ĝin disformis kaj ruinigis la sovaĝa, nebri-

debla vivmaniero. En tiuj vangoj ŝvebas io potenca, preskaŭ genia, kaj subite Cezaro ekkomprenas, kial ĝuste tiu homo sukcesis fari el tiom da homoj siajn fanatikajn adeptojn.

»Ciceronon mi nomis pulĉinelo,« daŭrigas la gasto. »Ankaŭ la ceteraj estas ne pli bonaj: Katono estas malsaĝulo, kiu tute enboriĝis en siaj malnovromaj sensencaĵoj. Li neniam komprenos, ke nia tempo postulas alian vivmanieron; Krasso pensas nur pri la propra mono kaj ambicio; cetere lin vi jam bridis por vi, kaj fine Pompejo estas hezitulo, kiu neniam riskos la lastan decidigan paŝon. Do, postrestas nur vi.«

»Kaj mi estas senpova,« amare enĵetas Cezaro — »ĉar Cicerono scias, ke mi rilatadis kun vi kaj tio sufiĉas por min pereigi, kiam ajn plaĉos al li.«

»Nu, ĝuste pro tio mi venis al vi,« kapklinas la gasto. »La armilon, kiun li havas kontraŭ vi, vi povos sindefende forturni nur, se ankaŭ vi havos ian armilon kontraŭ li. Jen, tiun armilon mi mem donos al vi.« Li manŝovas sub la vestaĵon kaj eltiras mallarĝan, maŭdikan paperrulon. »Mi havis« li diras, »siatempe proceson pri mia provinco. Tiam Cicerono, kiel ja ĉiuj scias, proponis sin al mi kiel advokato. Sed, kion neniu scias, jen estas tio ĉi.« Li disrulas la volvaĵon, ekserĉas ion inter la paperoj troviĝantaj ene, elprenas kelkajn etendante ilin al Cezaro. »En tiuj ĉi leteroj Cicerono proponas al mi kunlaboron kontraŭ la senato. Tralegu ilin kaj vi vidos, kiom forte ili kompromitas lin.« Li eksplodas en mallongan ridon. »La konsulo kiel intimumulo de la ŝtatperfiduloj! Tiujn ĉi leterojn mi donas al vi. Konjektigu al Cicerono, ke vi ilin posedas, nu, vi vidos, kiel li fariĝos ŝafmilda kaj humila. Do, tiel vi denove liberiĝos kaj povos fari, kion ajn vi volos.«

Li jam leviĝas. »Tiel mi, eĉ se mi ne plu vivos, rompos la nukon al tiu senata kanajlaro!« Nur por momenteto disformiĝas lia vizaĝo, poste tuj ĝi resereniĝas kaj ektrankvilas.

»Adiaŭ, ho Cezaro,« li diras mallonge. »Estu bonŝanca — kaj se vi venkos, rememoru iom ankaŭ min. Ne, ne, lasu ja, mi povas eliri ankaŭ sola. — Adiaŭ!«

## En la lasta horo'

La situacio ĉe la kunveno en la domo de Krasso similas al tiu, kiam kvestoro Kajo Cezaro elmilitis sian unuan venkon super la malgrandaj kaj etaj partiaj idoloj, elkubutante sin apud Krasson sur la plej influan postenon en la gvidantaro de l' partio. Denove ĉiuj ĉeestas, la samaj homoj — krom kelkaj star-roluloj — kiuj ankaŭ tiam rabie sin intermordis kaj interbatis: Cezaro, Krasso Manilio, Gabinio. Nur Kapitono mankas: li lasis sin delogi en la konspiron de Katilino kaj ankaŭ li troviĝis inter tiuj kvin, al kiuj, tiun faman kvinan de Decembro, la ekzekutisto rompis la kolon.

La samaj homoj — kaj tamen la centro de l' povo estas forŝovita — iliaj vizaĝoj atestas, ke io grava okazis, kio la planojn de iuj detruis, de l' aliaj akcelis. Cezaro sidas sur la seĝo mute, kun senmova vizaĝo, senvorte li enaŭskultas la alternan interparolon, ŝajnigante ne partopreni; Krasso tute kadukiĝis, la grasdikaj vangoj terure palas, liaj okuloj febre palpebrumetas tra la nuda, malplenigita ĉambro jen tien, jen ĉi tien. Li igis ĉiujn artobjektojn kaj valoraĵojn enpaki kaj ekspedi parte en sekretajn deponejojn, parte en la *massiliotan* rapidegan velŝipon, kiu en la *ostilia* haveno lin atendas. Manilio tute sin ŝvelblovis kaj kun nekasta ĝojmalico liaj verdaj okuloj pafas ambaŭ venkit-

ajn, senpovajn ĉefojn de l' partio. Kaj kontraŭe de tiuj tri, sidas Gabinio rekte kaj rigide. Pro lia estado sur la batalkampo lia vizaĝo bruniĝis, fortiĝis la muskoloj, dum la voĉo kaj rigardoj iĝis pli firmaj. Kiel li nun sidas ĉi tie, li ne plu estas radeto de l' komplika maŝinaro, vivanta per la svingo de l' granda turnorodo, sed libera kaj supera sendito de potenculo. Sendito, donanta en la nomo de sia mastro komisionojn, kiujn oni devas ne kontraŭstari, ordonojn tuj plenumotajn, esprimanta laŭdojn kaj riproĉojn, kiujn oni devas obeeme akcepti.

»Manilio,« li sin turnas al la maljuna popoltribuno, »estas konsilinde, ke vi anoncu vin ĉe Pompejo tuj, kiam li albordiĝos. La imperatoro ne forgesis vian fidelecon kaj servojn kaj li vin protektos«. La alparolito kun ĝentila rideto riverencas. Laŭ la rigardo kaj mieno oni vidas, ke li estas tute preta fariĝi la plej fidela sklavo de la Pontia venkinto. Nun Gabinio alparolas Krason:

»Nu, koncerne vin,« li diras malestime — ĉu antaŭe iu ajn riskus tiel alparoli la Licinianon? — mi ankoraŭ ne scias. La imperatoron terure malkontentigis via agmaniero.« La paleco sur la vangoj de Krasso iĝas eĉ pli vaksa. La kranio sur la bovforta nuko velkas kvazaŭ forglavite sur la larĝan bruston. La sendito daŭrigas senkompatate: »Ni scias pri viaj provoj por alkapti helpe de Katilino la diktatorecon, ankaŭ pri viaj klopodoj por forĵeti pere de l' *Rulia* akto la imperatoron el la selo. La imperatoro rezervis al si mem rajton decidi pri via sorto. Eble li vin amnestios, —« la unuopaj vortoj falas kiel guto de veneno — »se vi petege ek genuos.« La palaj, grasdikaj vangoj senhelpe tremetas.

Gabinio nun direktas siajn glaciajn, serpentajn okulojn sur Cezaron.

»Koncerne vin, ni estas ekster dubo. Krasso almenaŭ neniam kaŝis sian malamikecon. Sed vi, tra ĉiuj tiuj ĉi jaroj, ekde la unua momento, aktoris duoblan rolon: vizaĝ-al-vizaĝe vi afablis, post la dorso vi kontraŭincitis. Vi provis fruktuzi Pompejon kaj samtempe lin faligi. Post ĉiu frapo, kiun vi donis pere de la aliaj — ĉar vi estis tro ruza por mem tion fari — sekvis ia afablaĵo. Hodiaŭ ni scias, kion ni pensu pri vi kaj se Pompejo ankoraŭ hezitus vin batplatigi, mi mem zorgos, ke tio okazu. En la plej bona okazo ni lasos al vi la pontifikan seĝon, sed kondiĉe, ke via politika rolo ĉesu. Cetere — li aldonas kun memplaĉa rideto — »por ĝi ja ne plu estas ŝanco. Eh, ĉu vi rememoras, ho Juliano: la diktatoreco estas la fincelo de la demokratio. Nu, kompreneble, ne tiel vi imagis.«

Sur la tableto apud la cezara sidloko staras brulanta bronzlampo. Por momento la rigardo de la Juliano falas al ĝi kaj la ekpensas, ĉu per tiu ĉi objekto li elbatu la dentojn de la parolanto. Denove li levas la rigardon, jam tute sin regante, kaj trankvile li preterrigardas la homon plu babilantan, kvazaŭ li tute for-estus.

Finite: pri tio ne povas esti dubo. Kion tra la tuta tempo li konjektis, kio tra ĉiuj tri jaroj fantome levigis kontraŭ liaj planoj, nun okazis: kiel iam Sullo, tiel nun Pompejo preparas sin elŝipiĝi en iu itala haveno, por jugmeti sur la ŝtaton laŭplaĉajn leĝojn. Krome li estas en senkompare pli favora situacio ol estis Sullo. Tiu ĉi trovis la landon en flamego, li devis unue venki la kontraŭulan potencon — nu, kiu volus, kiu povus malhelpi Pompejon, se li ekpromenetos kun sia

militistaro el Brundisio en Romon kaj volvos la blankan diktatoran rubandon ĉirkaŭ sian frunton?!

Dum eksteraje li restas trankvila, kaj senmova, en li tumultas la pensoj: perditaj tri jaroj, tri multekostaj jaroj! Tempo, kiu sufiĉus por alkolekti potencon, por organizi fortojn de la lando, por starigi ordon tiel, ke oni povus al la hodiaŭa venkinto samforte kontraŭmarŝi. Kaj kion oni faris dum tiuj tri jaroj? Oni disperdis, foruzis ilin en bagatelaj kvereloj kaj fantaziaj projektoj — kaj hodiaŭ oni staras ĉi tie kun malplenaj manoj, sendefende elmetita al la kapricoj de la potenculo.

Gabinio babilaĉas plue, fiere kiel virkoko, klarigas ideojn saĝajn kaj stultetajn, proprajn kaj fremdajn — estas ja neelteneble. Kial pluaŝkulti tiun buŝmuelajon? Kial ja pluresti ĉi tie sur sia loko kaj ebligi al tiu neniulo afekti imagatan potencon. For de ĉi tie, ien, kie estas trankvilo, kie la okuloj kaj oreloj ne devas suferi sencelan galimation.

Eniras servisto kaj haltas embarasite ĉe l' pordo.

La Liciano levas siajn senbrilajn okulojn.

»Kio, nu — ?«

»Sciigo por Kajo Cezaro«.

Tiu ĉi leviĝas dankante al la sorto, kiu lin savis el tiu turmento. Li postiras la sklavon, elirantan el la ĉambro. Kunruliĝas la peza kurteno, post kiu la pluvantaj vortoj de Gabinio dronas en monotonan, malklararan murmuradon.

Post duonminuto la kurteno denove disflugas duflanken. Gabinio vortrompas, ĉiuj ekrigardas tien.



Cezaro staras en la pordo, tutkorpe tremanta, pala kiel la morto mem, sed la okuloj — la okuloj fulmas!

Unu sekundon daŭras silento, tiel terure peza, ke ĉiu volus krei por ĝin rompi — se li trovus tiom da forto.

Tiam de l' pordo aŭdiĝas voĉo, premite, apenaŭ kompreneble, sed tamen potence kiel rompmartelo unufrape ĉion frakasanta:

»Pompejo elŝipiĝis en Brundisio. — La militistaron li eksigis!«

II. PARTO

***CEZARO***



## La Homo ĉe l' Pordo

Senbrue kunfermiĝis la pordo post la enirinto. Li staras en la krepuska mallumo de la kolongalerio kaj senmove rigardas sub siajn piedojn en la duoncirklon de l' amfiteatro, kiun dense plenigas solenaj figuroj en flirtaj togoj. Ĉiujn vestojn borderas purpura rubando, ĉiujn vizaĝojn kovras same fiera, memkonscia esprimo: jen, kunsidas la kurio, la reĝino de l' mondo.

Timrespekte ekstremus fremdulo vidante tiun spektaklon, sed ne la homo ĉe l' pordo: li travidas la solenajn mienojn, la aplombajn gestojn ĝis la fundo de l' kavaj kapoj kaj malplenaj koroj. Lia rigardo penetras tra ĉio, kvazaŭ tra diafana vitro, ĝi ekkonas ĉion kvazaŭ ĝi estus interne de tiuj, kiujn ĝi tratuŝas.

Sajnas, ke revenis la ora epoko de l' senato: ĉie nur samopiniuloj sen obstrukco kaj ĝeno de opozicio, kiu precipe en la lasta tempo pli kaj pli fortiĝis. Ili nun gvidas sian hereditan parti-politikon, kiel en la bona malnova kaj aŭtokrata tempo; ili zorgas nur, ke oni ne difektu iliajn interesojn, ili ĝojas pri la rekonkerita potenco, firme decidinte ne plu lasi ĝin el la manoj.

Estis tri potencoj, minacantaj al tiu feliĉiga stato. Sed ĉiuj tri estas nun paralizitaj. Unue Pompejo, la majesta, kiu prave portas tiun epiteton kaj al kiu oni kun kompleza rideto aprobas la vanteman, eksteran

pompon; sen militistaro, sen politikaj adeptoj, malpacante kun Krasso, li ne plu rajtas ion diri. Due Krasso mem, kiu ŝajne perdis ĉiun emon aktive entrepreni ion post la malsukcesoj de siaj projektoj. Kaj fine Cezaro, kiun post la forpaso de lia pretora oficjaro oni ekspedis en la hispanian provincon por batalaĉi tie kontraŭ sovaĝuloj. Vere, li akiris nekontesteblajn sukcesojn, li venkoportis la romian armilaron eĉ ĝis la norda bordo, sed —

Sed ĝuste tio estas la fakto, doninta ŝancon por la diplomatia majstraĵo, pri kiu ĝiaj aŭtoroj tre fieras: Cezaro riĉsukcese militadis kaj nun postulas rajton al la triumfo, al la granda venkosoleno. Komence oni ekindignis decidante tion glate rifuzi; sed subite oni ŝanĝis la opinion: kun okulfrapa afableco oni aprobis lian deziron, alkonsentante la ceremonion. Nu ja: laŭ la antikva, glora moro la triumfonto ne rajtas veni en la urbon antaŭ la soleno mem. Sed Cezaro volas samtempe kandidati por la konsuleco; lia peto pri permeso: persone agiti por sia elekto, estis ĝentile, sed energie, rifuzata, apoge al la leĝo kaj moro. Tiel restas nenio alia ol prokrasti la triumfon ĝis post la elektoj — jen, kiel oni forskuis de la kolo ankaŭ tiun ĝenulon, kiu ja sole povus endanĝerigi la konservativegan partion de l' patricioj.

Kontente do rigardas nun en la estontecon la oligarke regantaj altnobelaj familioj: Metellanoj, Fabianoj, Kornelianoj kune kun la landfama plebano Cicerono. — Senzorge ĉirkaŭglitas rigardoj de l' enirinto tra la alta senornama salono de la senatejo. Ili rimarkas jen izolitecon de Pompejo, malserene kaj senhelpe sidanta sur sia loko, jen apation de Krasso, kiu siajn estingigintajn okulojn alforĝis en la sinon. Kaj por ĉarmigi

la idilion kantas nun Katono, tiu respublika najtingalo, iun el siaj himnoj pri la antikvaj romaj grandeco kaj honesto. Dume oni povas tiom dolĉe revii pri la profitigaj prefektecoj kaj grasigaj ŝtataj helppostenoj.

La homo ĉe l' pordo jam frandis la vidaĵon ĝis plena satiĝo. Nun ŝajnas al li tempo por ĝin konfuzi. Elpaŝinte el la ombro de la kolonaro li komencas malrapide malsupreniri. Kelkaj turniĝas, poste jam multaj; oni ekvidas la gracitalian staturon, la malgrasan, delikatan vizaĝon, kies afabla mieno mokete ridetas, oni jam rekonis tiun, kiu estas malplej atendebla ĉi tie: nu, Cezaro mem.

Senkomprenaj, embarasite konsternitaj, furiozaj rigardoj. Rimarkinde estingiĝas atentemo, ĝis nun dediĉata al la oratoro. Katulo, kiun eĉ la nura nomo de l' Juliano incitas kiel ruĝa ĉifono, pro sangbolo ekpurpuras. Pompejo blovlevas la grasajn lipojn, en la malplena rigardo de Krasso ekbrilas malforta fajrero. Eĉ Katono mem ŝajnas por momento perdi la pensfadon: ekŝanceliĝas la konstruo de liaj frazoj, la vortoj implikiĝas, dume li mem pene venkas la langolamiĝon. Sed jam denove li elmetas sian dikegan kranion kaj kiel kurataka virbovo daŭrigas eĉ pli akre, pli mordeme, sian oratorajn.

Nur unu tuj ekmajstras la situacion: Cicerono, al kutimiĝinta bridi ĉiun ĉevalon. En la sennombraj procesoj, kiujn li gvidis, li ellernis preti por la plej surprizaj epizodoj kaj ilin eĉ antaŭkonsideri. Esploro glitas el la palpebrumaj okuloj liaj rigardoj al la ĵuveninto, klopodante tralegi ties rigardojn.

Fine Cicerono ne plu povas elpacienci sur sia loko: li devas elpumpi, kiel povis okazi, ke la triumfonto venis en la urbon. Malrapide li leviĝas, ŝteliras

laŭlonge de la koridoro ŝtupar-malsupren al la sidloko de Cezaro. Kapsalute, kun miele vulpeca mieno, li ek-sidas sur la malplena seĝo apud li. La Juliano resalute kapklinas, sed ŝajne li ne plu rimarkas sian najbaron. Tio ne plaĉas al Cicerono. Senpacience li malkvietas sur la seĝo turniĝante tien-reen, kelkfoje ektusas, fine alklinas la kapon pli proksimen kaj demandas mallaŭte, singarde — penante moduli en la voĉon patran bonvolemon: »Al kiu ĝojiga cirkonstanco ni pridanku vian ĉeeston, ho Cezaro?« La demandato malplezurete okul-levas, ekrigardas al Katono, kvazaŭ pardonpetante pro la kontraŭvola ĝeno; fine li tamen decidiĝas respondi:

»Tion vi ja ĉiuj devus scii,« diras li iom surprizite. »Mi kandidatas por la konsuleco.«

»Nu jes — sed persone?« ekfulmas la respondo. Ŝultrolevo.

»Ĉar vi ne bonvolis doni al mi la permeson.«

La mieno de Cicerono senlime ruziĝas: li kredas, ke li nun povas kunfermi la kaptilon.

»Vi nur forgesis,« li ekflutetas, »ke antaŭ la triumfo vi devus ne eniri en la urbon.«

Ĉe l' buŝo de Cezaro konvulsiĉto.

»Eh, tiu malsaĝa triumfo«, senzorge li endiras. »Do, mi rezignos pri ĝi.« Liaj okuloj iĝas klaraj kaj firmaj, ili kroĉiĝas al la tremetantaj pupiloj de »la patro de l' patrujo.« — »La konsuleco estas ja pli grava!«

Cicerono ekrikanas, kvazaŭ li estus ricevinta sur la nazon fortan frapon. Li estas jam ion redironta, sed tamen prefere li ekmutas. Momenton li per malplena rigardo fiksiĝas antaŭ sin, poste li sin levas kaj senbrue glitpaŝas al sia loko.

Tuj lin ĉirkaŭas el ĉiuj flankoj scivolemaj mieno-  
noj, susuroj, flustroj. Post mallonge flugas la granda  
novaĵo buŝ-orelen, ekscitante ĉiujn spiritojn kaj detru-  
ante la lastan restaĵon de la ĝis nun konservata atento.  
Meze de ĝenerala ekscitiĝo finas Katono sian orator-  
aĵon, kies patosa pinto ne plu ekzaltas.

Subite paraliza silento. Cezaro dislarĝigas la okul-  
ojn, kiujn li — post la mallonga konversacio kun  
Cicerono — palpebre kunfermis. Lia rigardo glitas tra  
la salono de homo al homo, kvazaŭ volante ĉiun ope  
elpesi kaj pritaksi. Refoje enkaptas liaj grizaj, senkom-  
pate firmaj okuloj Ciceronon, kuras plue ĝis Katulo,  
hezite treniĝas trans Pompejon, trans Krasson, ĉirkaŭ-  
fermante kun nerimarkebla malestimo la tutan amason  
de l' profesiaj *Por-* kaj *Ne-diruloj*. Fine ili akompanas  
paŝ-paŝe Katonon, irantan al sia loko. Ĉiuj estas sub  
rego de tiu ĉi rigardo, ĉiuj sentas la potencon, kiu el  
ĝi radias kaj oni ne povas eĉ nur ekpensi pri la rezisto.  
Tiam la palpebroj denove falas kaj la vizaĝo de Cezaro  
reakiras sian antaŭan marmoran rigidon.

Momenton poste leviĝas la prezidanta konsulo,  
anoncante, kun konfuzaj tusoj, la finon de l' kunsido.  
La kolektitaj »patroj« komencas leviĝi kaj forlasadi  
la salonon, furiozaj, ke ili dum momento malkapablis  
ekregi sin mem, ke ili subiĝis al volforto multe pli  
potenca ol ilia propra.

Sed kiu ja povus eĉ sonĝi, ke Cezaro rezignos pri  
la triumfo. Ja, pri sia unua triumfo!



## Al gloro renkonte

Preskaŭ tute malpleniĝis la cirklo de l' amfiteatro. Ĉe la pordo ankoraŭ staras interparole kelkaj senatanoj, ie-tie skribas nete kelkaj privataj stenografoj la oratorajon de sia patrono. Cezaro, salutinte kelkajn favorajn al si — aŭ almenaŭ ne malfavorajn — aliras Krasson. Ŝultro ĉe ŝultro ili forlasas la salomon: la Liciniano klinis pli ol kutime la dikegan kapon, la Juliano levis la sian kvazaŭ flaranta ĉashundo.

Nur ekstere, surstrate, Cezaro ekparolas:

»Mi estis en Transpadio,« li komencas.

La okuloj de Krasso restas malklaraj kaj senbrilaj.

»Tiel do, vi estis?« li rediras sentone, apatie.

»Kaburo vin salutas.«

»Dankon . . .«

»Ili fidas kaj atendas.«

»Eh, kion?«

Cezaro, kvazaŭ ne rimarkante la korprematecon de la amiko, daŭrigas per la same trankvila voĉo:

»Nu, vi konas la diron de Arĥimedo: donu al mi firman apogpunkton kaj mi levos la mondon el ĝia pivotujo!«

Krasso kapklinas, kaŝe mirante pro la strangaj

pensosaltoj de la kunulo. Tiu ĉi daŭrigas: »Mi trovis mian arhimedan apogpunkton; ĝi estas — Gallio.«

»Hm.«

»Ĝi estas la plej aktuala problemo, kvankam ĉi tie oni ankoraŭ ne komprenas tion. Mi vojaĝis okulmalferme, ho Krasso, mi konferencis kun *massiliotaj* kaj *narbonezaj* komercistoj, kun *allobrogaj* ĉefoj, kun *transpadij* eminentuloj, kaj ĉiam denove prezentigis tiu sama problemo; ĝia solvo estas vivnecesaĵo por ni.«

»Hm, vi pensas?« Malgraŭ la tuta laco malforta interesiĝo ŝajne ekkoloras la voĉon de Krasso.

Cezaro levas la fingron, desegnas tra la aero vertikalan kaj horizontalan liniojn.

»Jen tiel iras la Rejno, tiel la Alpoj« li klarigas. »Oriente kaj okcidente etendiĝas tie la migroteritorio de la germanoj. Estas tie giganta hom- kaj popolinterpuŝiĝo, plena de neantaŭvideblaj eventualoj. Demandu iun maljunan *marianon*, kiaj homoj ili estas.«

»Jes, jes...« La okuloj de Krasso denove iĝas malklaraj kaj senbrilaj.

»Nu, ili nun ekmoviĝis kaj ektorentis okcidenten. Ilia ĉefparto jam transiris la Rejnon kaj malrapide, sed senhalte ondruliĝas suden. Do, oni devas ĝustatempe kontraŭmeti la barilon, alie — post kelkaj jaroj — ili inundos la tutan Gallion.«

»Lasu, ke la sovaĝuloj solaj tion likvidu inter si! Kiom ĝi koncernas min?«

»Eĉ treege,« kontraŭdiras emfaze Cezaro. »Se ni kviete permesos, ke tio okazu, post nelonga tempo ni havos norde kolosan, alcentre direktatan premon kontraŭ Romo. Pli aŭ malpli frue ĝi diskrevigos ĉiujn digojn. Tio devas esti malhelpita — ja, ofensive malhelpita.«

Krasso subite ekatakas el sia troekscitiĝo:

»Oni devas! Oni devas! Nu kial ĝuste al mi vi rakontas tion? Kiom ĝi min koncernas? Jen, diru al la senato, rakontu al Metellanoj, Fabianoj, Scipionanoj, al la tuta altnobela societo, kiu dividis inter si la regadon!«

Cezaro sulkas la brovojn.

»Eh — se vi estas kontenta pri la nuna stato.«

»Kontenta! Kontenta! Kion mi ja povas kontraŭ ĝi?«

»Interpaciĝu kun Pompejo,« respondas Cezaro trankvile, rekte.

Tio venis tiom neatendite, ke Krasso ekhaltas, disbuŝe okulante al sia akompananto.

»Ke mi —« li elmurmuras penege. »Do mi simple interpaciĝu kun Pompejo. Grandioze ja! Nur tiel senceremonie. Kial ankaŭ ne tuj demeti sur la teron la lunon?«

»Ho Krasso!« Cezaro kape ekbalancas. »Via izoliteco ŝajne malklarigis vian rigardon. Alie vi ja sciis, ke mi neniam premis en mian kapon ion nerealigeblan, sed, ke ĉion enpremitan mi ankaŭ realigis.«

La kapo de Krasso denove pendfalas sur la bruston.

»Sed, maleble ja,« li murmuris. »Inter Pompejo kaj mi estas tiom multe.«

»Malpli multe ol vi kredas kaj scias,« interrompas firme Cezaro. »Kelkaj miskomprenoj — jen ĉio. Sed vi ambaŭ tiom profunde dronis en vian koleregon, ke vi perdis la vojon de l' unu al la alia.«

»Kaj vi ĝin konas, hu!« mokas rezignemo en la sensona voĉo.

»Almenaŭ mi kredas min kapabla por ĝin trovi — ĉar trovita ĝi devas esti.«

Krasso kapbalancas.

»Sed ankaŭ Pompejo estas hodiaŭ senpova.«

»Jes, disigite de ni. Sed, se li unuigĝos kun ni, ne ekzistos io, kio povus malhelpi nian superregon.«

Ili jam atingis al la »Sankta Strato,« kie ĉiuvespere korsas nobelaj nenifaruloj, trenpaŝe kaj ridbabile promenante preter la frontoj de l' palacoj kaj domegoj. La pordisto de la pontifika palaco jam ekrapidas por disporde, sed lia mastro nur senvorte mansignas kaj preteriras. La vojo iom post iom ekleviĝas, paŝ-al-paŝe, kun ĉiam pli grandaj, preskaŭ barbaraj ornamaĵoj. Lum-sagas oro, marmoro fajreras — kaj tie supre disflamas la kupolo de Kapitolo: sunkisate, en nekredbla disbrilo, ĝi superturas la urbegon. »Jen la »Triumfa Strato« ridete rimarkas Cezaro.« »Jen la vojo renkonte al gloro. Verdire estus mi devinta ĝin ekmarŝi fronte de mia militistaro. Nu, ankaŭ ĉi tiel bone!«

Krasso malatentas la vortojn.

»Kaj kiel vi volas tion aranĝi,« li diras el profunda primedito, »ree alkonduki Pompejon?«

Cezaro subridetas. Kun granda kaŝĝojo li konstatas, ke liaj vortoj enpikiĝis.

»Tion mi ekscios,« li rediras, »kiam ni vizaĝ-al-vizaĝe renkontiĝos. Li jam invitis min viziti lin.«

Krasso ekaŭskultas.

»Kiam?«

»Tuj post la kunsido mi havis okazon interparoleti kun li. Ankaŭ li vidas, ke la nunaj cirkonstancoj ne povos longe daŭri.«

»Kaj li konsentis?«

»Nun nur min akcepti,« rapide endiras Cezaro. »Sed vi scias, kion ĝi signifas, kiam temas pri Pompejo. Dependos nur de ni, klarigi al li la neceson de la reciproka interligo. — Nu, ĝi estos ĉe ne tro malfacila,« daŭrigas li laŭte la penson. »Pompejo estas tro saĝa por ne rekoni sian profiton. Li volas esti nur pripetata«.

Ili jam atingis preskaŭ sur la monteton, surprizante el hela verdo de fagoj kaj kaŝtanujoj, el nigreta verdo de pinioj kaj cipresoj, ĝis la plena klaro de l' pinto. Rapide ekrigardas la Juliano flanken. La sinteno de Krasso estas senŝanĝa, pensodrone kaj pene li paŝas antaŭen. Sed la paraliza apatio jam forvaporigis. Silente ili trairas la vojreston kaj haltas sur la vasta platformo. Subpiede sterniĝas la potenca urbo, domo ĉe domo, nur ie kaj ie rompita de grandaj placoj aŭ de kompleksaj ĉefkonstruaĵoj. El mil kamentuboj spiralas aeren fumo de fajrujoj, en tiu aŭ alia fenestro ekbrilas lumetoj... la valon jam ekvalis krepuskaj ombroj de vesperiĝo. Nur la pintoj de l' fratmontetoj, de *Vatikano*, *Kvirinalo*, *Eskvilino*, *Celio*, kaj de la ceteraj, kapklinas saluton al la lastaj radioj de l' subiranta suno.

La okcidento — almare — kolorsimfonias el densa purpuro ĝis plej delikata orangajo. La oriento — alvale — nuanciĝas de plej subtila bluo ĝis diafana verdo. La rigardo de Cezaro ronde ĉirkaŭglitas, dum potenca sento ŝveligas lian bruston.

»Ho rigardu,« li diras duonvoĉe, »kiel sidas tie la urbo, premante sin inter la montetojn, kiel infano ĉe l' patrina brusto. Ho, kiel ĝiaj dometoj sin interapogas, plenigataj de milobla vivo, trapulsataj de miloblaj, kontraŭaj deziroj; jen ĝi, la kovejo de milspecaj ideoj, planoj, celoj. Ĉu vi ne sentas la ondon, kiu

leviĝas ĝis ni, tiun kunfluigon de senombraj vivoj en la unueco, kiu sonigas — kvazaŭ fanfaro de trumpeto — la fieran nomon de Romo? Ĉu vin ne kaptas, same kiel min, ebria deziro por lasi, ke tiu impulso kaj aspiroj efiku en vin, vin enpenetru, ke vi iĝu ereto de ĉio ĉi kaj tamen mastro super ĉio.

Ho Romo, Romo, vi granda, admirinda urbo, vi reĝino de l' mondo! Kiom bele estus ekregi vin, kiom rave kolekti viajn fortojn, ordi, unuigi ilin kaj al la alto konduki vin laŭ la granda vojo, kiun destinis al vi la sorto mem! Kiom potence kaj grandioze estus, ho vi, unika instrumento de l' homaro, preni vin en la manojn kaj komenci la grandan laboron, kies fincelo estas la perfekteco de ĉio vivanta! Nu, donu vin al mi, ho Romo, konfidu vian animon en mian volon, ebligu al mi atingi per vi tion, kion mi aspiras, ne por mi, sed por vi kaj por ĉio nobla, granda kaj bela!«

Kvazaŭ ekstaze li disbrakas super la urbon, nun tute dronantan en la krepusko kiel grandega, ĉirkaŭfermita maso. Li turniĝas al Krasso kaj la Liciniano, kaptita de stranga kortuŝiĝo, rigardas en la larĝajn, flamajn kaj tamen tiom molajn okulojn de l' ekstaza viro.

»Ho Krasso!« ekkrias Cezaro, »estu mia amiko! Helpu al mi! Ne permesu, ke tio potenca, kion mi planas, frakasiĝu sur sensencaj bagateloj!«

La pasiaj vortoj efikas kiel flamo de torĉo, puŝita en sekan pajlogarbon. Krasso plensvele rektiĝas, fajro ekŝprucas el liaj senbrilaj okuloj, la grasa, profunda voĉo jam tondras:

»Ho ne, pro dioj ne, tion mi ne permesos! Jen ĉio, kion vi volas, vi, mia eta Cezaro. Jes ĉio!

Iru al Pompejo! Parolu kun li! Kaj se vi tion aranĝos, se vi sukcesos lin rekonduki al ni, tiam — «

La peza manego, falinte sur la ŝultron de Cezaro, lin rekonsciigas. Li alrigardas la Licianon kaj ridetas kvazaŭ liberigite.

»Do, mi konsuliĝos,« li diras ŝercendence.

»Jes!« firmigas Krasso. »Ankaŭ Gallion vi konkeros!«

»Kaj mi levos la mondon el ĝia pivotujo«, denove ekridetas Cezaro. Okullarĝe Krasso lin alrigardas, eksingultas. Poste li diras duonvoĉe, preskaŭ time:

»Je la ĉielo mem, vi ankaŭ kapablas por tio!«

## Bataloj kaj vundoj

»La mastrino estas en la ĝardeno.«

Cezaro danke kapklinas kaj eniras la atrion. Ekĉirkaŭas lin vasta spaco, senornama kaj severa kiel ĉiam.

Senvole eksentas la vizitanto ion mildan, subtilan, preskaŭ virinan — ja, ĝuste kiel en la hejmo, kie mankas la edzo. Li ne povas klarigi al si tion pli precize, li ne scias, en kio ĝi konsistas: ankaŭ antaŭe li ne renkontadis la edzon de Servilia, li apenaŭ konsciis pri lia ekzisto, kaj tamen en la ĉambroj, en la aero, postrestadis io de la Juniano, io apenaŭ sentebla, sed konstante memoriganta pri lia esto. Tio nun plene forrestas, de kiam la mastro forlasis por ĉiam tiun domon, transloĝigante en multe malpli grandan kvarangulon ĉe la tomo-distrikto de *Via Appia*.

Momenton li pensas, ĉu plenumi la ĝentilon kaj laŭkonvene kondolenci al Servilia. Sed tuj li forĵetas la penson. Kial ja komedii? Ĉu ne la nepra sincereco estis ĉiam la fundamento de ilia rilato? Ĉu li nun konduku alie — nur por obei al la socia kutimo? Li ŝultrolevas, kvazaŭ forĵetante ŝarĝon, kaj, libere ekspirante, enpaŝas la ĝardenon.

Jam de malproksime li ekvidas la amikininon. Ŝi sidas kun la okjara Marko sur la duonronda ŝtonbenko,



kiun li ja bone konas. Ambaŭ tiel dronis en kuna legado, ke, ŝajne, por ili ne ekzistas la cetera mondo.

Nur pro grinco de gruzo la juna vidvino okullevas. Distrite ŝi ekokulas, sed alrigardante pli atente, ŝi jam eksaltas kurrenkonte al Cezaro. Ankaŭ la knabo tuj leviĝas, sed restas hezite, timeme, staranta.

»Kajo, vi?« ŝi ĝojas ekkrie. »Kiom bele, ke vi ankaŭ nin rememoris!«

La aletenditajn manojn li prenas firme en la siajn.

»Pri tiu ĉi ĝardeno mi ofte pensis tie, malsupre, en Hispanio,« li diras ĝojridete.

Kondukante lin al la benko ŝi fervore babilas:

»Jam antaŭ semajno mi eksciis, ke vi revenis. Kial jam pli frue vi ne vizitis min? Ĉu vi estas tiom enlabora?«

»Eĉ pli ol mi povus diri al vi. Poste mi rakontos.«  
 Ŝi zigzagas de unu afero al alia kaj al li ŝajnas, ke en tiu ĉi ĝojo pro la revidiĝo estas iom da nervozeco. Nun ŝi montras al la knabo:

»Ĉu vi ankoraŭ povus rekoni Markon?«

»Apenaŭ,« ridete etendas Cezaro la manon. »Hu, kiom alta li iĝis! Saluton, Marko!«

Serioze metas la knabo siajn fingrojn en la etenditan manon.

»Saluton, Cezaro,« li ĝentilas sindeteneme.

»Hej« ekkrias Cezaro bonhumore, »ĉu tiel oni salutas la malnovan amikon? Ĉu vi ja tute ne ĝojas min revidi?«

»Nu ja, mi ĝojas,« respondas la knabo kun same serioza trankvilo.

La patrino rideksplodas.

»Li ĝojas, eĉ sincere, Kajo, volu tion kredi. Sed,

kompreneble, estus kontraŭ lia patricia digno brue montri sian ĝojon.«

La knabo ruĝiĝas. Cezaro tion rimarkas kaj kun sia treege delikata takto rapide endiras:

»Li tute pravas. Fine ja gravas nur tio, kion li sentas. Ĉu ne, Marko?«

»Jes.« Tio estis same serioza, kiel ĉio, kion la okjarulo jam diris, sed la okuloj ekbrilas elfunde kaj dankeme.

»Sed sidiĝu,« plubabilas Servilia en ĝoja ekscitiĝo. »Sendube vi lacas. — Ĉu mi alportigu ion?«

»Nenion,« ridete rifuzas Cezaro. »Se permesate al mi resti iom ĉi tie, mi estos kontentega.«

»Kiel longe vi volos!« ŝi ekkrias. »Vi ja scias, ke vi estas al mi ĉiam bonvena!« Ŝia rigardo falas sur la knabon, atende starantan antaŭ ŝi. »Ĉu vi deziras ion, Marko?«

La knabo kapjesas.

»Ĉu permesate foriri, ho patrino?«

»Kien? — Ah jes!« ombreto falas sur ŝian brilan humoron. »Nu, iru ja! — Nome, li estas invitita,« sinturne ŝi klarigas al Cezaro.

»Do, ni ne retenu lin. — Adiaŭ, Marko!«

Denove la infano serioze tuŝetas la etenditan manon, por momento pasie ĉirkaŭprenas la patrinon kaj poste forrapidas. Ili ambaŭ postrigardas lin.

»Kia vi trovas lin?« demandas Servilia post paŭzo.

»Entute bonega«, respondas Cezaro. »Sincera, lojala, brava. Eble nur iom tro serioza por sia aĝo.«

»La influo de Katono,« ŝi diras kun ĝemeto.

»De Katono?« malkontente sulkiĝas la frunto de Cezaro. »Kiel li ekrilatis kun tiu ĉi homo?«

»La knabo estas tre inteligenta kaj jam nun kapablas trividi la plimulton de la homoj. Kaj la severa justemo de la Porciano tiom lin altiris, ke li fine plene aliĝis al Katono.«

Cezaro fikse rigardas antaŭ sin.

»Mi ne scias,« li diras pripenseme kaj malrapide, »ĉu tio estas ĝusta rilato por la knabo. Ĉiu honoro al la karaktero de Katono; sed li estas fanatikulo, kiu plenigos la kapon de la junulo per senutilaj strangaĵoj. Hodiaŭ, per la nuda respublikana burĝvirto, oni ne savos Romon. Oni bezonas virojn kun neŝanceble klaraj okuloj, kun sobraj cerboj kaj ne — konfuzitajn revulojn.« Denove ili ambaŭ eksilentas; tiam li — laŭ sia kutimo — forpuŝante malagrablajn pensojn ŝanĝas la temon: »La lastaj tagoj superkape dronigis min en laboroj.«

»Jes,« ŝi ensaltas ĝojante pro la forturniĝo, »vi promesis rakonti al mi. Do, kio okazis? Ĉu vi konsuliĝos?«

»Jes,« li kapbalancas. Ripete, akcente: »Jes. Mia elekto estas certigita. La kurio eĉ ne provas kontraŭstari. Tio, kion ĝi ekriskis estas nur: apudigi al mi kolonon el sia mezo. Li haltigadu la veturilon, se ĝi submia gvido tro rapide ekruliĝos. Divenu, kiu li estas?«

Ŝi ŝultrolevas.

»Kiel mi povus scii! — Nu?«

»Mia ĉiama malamiko Bibulo,« plezure li streĉetendas la membrojn. »Tio estas speciala malico: ĉiu homo en Romo scias, ke jam de nia infaneco ni sincere nin malamas. Sed ankaŭ ĉifoje mi scios, kiel lin dorsosterni.«

»Sed kiel ĉio ĉi okazis tiom subite?«

»Oni eksciis pri mia interligo kun Pompejo kaj Krasso: kaj oni tute prave trovis ke ĉiu rezisto estus vana.«

»Jes,« ŝi kapklinas, »denove vi faris majstran ŝakmovon.«

Senzorge li mansvingas.

»Nu, nenion eksterordinaran: oni devis nur klarigi al tiuj du malnovaj, batalemaj virkokoĵoj, ke la interpacigo estas por la interesoj de ĉiuj; ĉio alia aranĝigis per si mem. Nun, kompreneble, ni estas potenco, kiun neniu alia en Romo povas egali.«

Ŝi volas rapide ion interdiri sed hezitas — fine tamen diras:

»Nur ne okazu, kiel la unuan fojon!«

Demande li ŝin alrigardas:

»Kion vi aludas? Ĉu la konflikton inter Pompejo kaj Krasso? Estu senzorga: nun mi estas ĉi tie kaj, krome, nun mi havas sufiĉan influon —«

»Ja, ĝuste pro tio,« ŝi respondas mallaŭte.

Nova rigardo ŝin altuŝas. Mallonge li pripensas, jam ekkomprenas.

»Vi kredas, ili povus —«

»Ĉiam ĝis nun vi mem aranĝis por ili ĉion. Ili kutimiĝis konfidi al vi, ili sciis, ke vi eltiros ilin el ĉiuj embarasoj. Kaj nun, subite, ili ekvidos, ke la homo, kiun ili ĝis nun opiniis nur taŭga instrumento, samrajte ekstaris apud ili; ili ekkomprenos, ke fakte ili laboris por tiu, kiu ŝajne laboris nur por ili. De tiu ekkono ĝis la rivaleco estas nur — paŝeto.«

Trankvile li ridetas.

»Ankaŭ tion mi antaŭvidis.«

»Ĉu?«

»Pri Krasso mi devos ne tro peni: li estas laca kaj saturita, li havas nun nur unu sopiron: akiri la laŭrojn de militestro.«

»Strange.«

»Sed kompreneble, se vi konas tiun homon: lia subpremata ĵaluzo kontraŭ Pompejo serĉas elŝprucon: li ankoraŭ ne povas forgesi, ke tiam, en la sklavomilito, Pompejo forrabis de li la gloron; li volas montri, ke li estas same bona strategiulo, kiel la venkinto super Mitridato.« Denove li ekridetas. »Nu bone, tion oni povos aranĝi: oni trovos por li ian sendanĝeran ekspedicion, kiu tamen ŝajnos grava — eble mi sendos lin en Egiptujon, kie oni ankoraŭ postulas lian enmiksiĝon — aŭ en Azion, kie li povos malimpliki la konfuzitajn rilatojn inter la satrapoj. Post tio la maljunulo trankviliĝos kaj pace vivos en Romo por siaj — kaj per siaj interesoj.« Kun brila rideto li rigardas ŝin, scivolante, ĉu ŝi laŭvalore taksos lian vortludon.

Sed Servilia estas tro priaferema por eĉ nur rimarki tion.

»Tio estas pri Krasso,« kapjesas ŝi. »Sed Pompejo?«

Nun li elbuŝigas — kiel ofte — abrupte, tute neatendite:

»Pompejo edzinigos Julian«

Ŝi kredas misaŭdi.

»Kiun?«

»Mian filinon Julian: li enamiĝis al ŝi superkape kaj sekrete ili estas jam gefianĉoj.« Disokule ŝi rigardas lin; ŝi ektemas antaŭ la mirinda antaŭvidemo de tiu ĉi homo, kiu ĉies penson ne nur jam anticipe divenis sed preparis ankaŭ la kontraŭrimedon antaŭ ol povus okazi atako. Dume li daŭrigas indifere,te, agrable:

»per tio ĉi mi ĉenos lin por ĉiam al mi: ekde la geedziĝo liaj aferoj estos ankaŭ la miaj.« Li eksilentas kaj, krurkrucinte, ĉirkaŭprenas la genuon, donante sin al revoj. Nur post paŭzo li diras — ŝajne tute preterkure: »cetere, ankaŭ mi intencas reedziĝi.«

Surprizite ŝi kaplevas. Li rapide daŭrigas: »De longa, tro longa tempo, mankas en mia hejmo la estrino; en mia nova posteno ne plu povos tiel resti.«

Kontraŭvole ŝi eksentas sian koron pli forte frapi. Pene konservante la trankvilon ŝi esploras:

»Ĉu vi konsideras iun difinitan personon?«

»Kompreneble,« li kapjesas. »Mia edzino nepre devas havi certajn ecojn, eĉ tiomgrade, ke al mi estus ridinda ĉiu penso pri reedziĝo sen konsidero al difinita persono. Tri aferojn mi postulas de ŝi: nobelan devenon, kapablon estri miajn hejmon kaj filon, kiu estos mia heredanto.«

Ĉiam pli ekscite frapas ŝia koro. Ŝajnas al ŝi, ke ankaŭ li aŭdas tion.

»Kaj vi jam ŝin trovis, vi diris?«

»Jes.«

»Kiu ŝi estas?« senspire, sufokite elŝprucas la demando.

»La filino de Kalpurnio Pizono.« Se li ne estus tiom pensodrona, li rimarkus la paliĝon, sterniĝantan sur ŝia vizaĝo, la konsternon, kiu ŝtonigas ŝiajn trajtojn. Sed li daŭrigas: »Ŝin mi ekkonis en la hejmo de ŝia patro: modesta, delikata estaĵo ŝi estas, krome serena kaj gaja kaj tiel juna, ke mi sendube povos ŝin elformi, ne rompante ŝin.«

Ŝi ekridas kaj tiu ĉi rido lin rekonsciigas. Lia delikata orelo distingis falsan, sonoratan tonon.

»Hej,« ŝi krias kun troa gajeco, »oni, do, bon-

deziru! Sed ne forgesu, ho Cezaro, inviti ankaŭ min al la duobla geedziĝo.«

De vort' al vorto li pli atente enaŭskultas. Mirige lin frapas, ke ŝi nomis lin — la unuan fojon dum ilia rilato — per la familia nomo. Kaj subite li ek-sentas rigardante tiun noblan, palan vizagon, sub kies rigido luktas apenaŭ bridataj pasio, senreviĝo kaj furiozo, kiom profundan vundon al ŝi li senintence ponardis. Ja, li ekkomprenas, ke ankoraŭ ĉiam ŝi lin amas, ke ŝi mem esperis okupi iun tagon la postenon ĉe lia ŝultro...li ekkonscias, ke li perdis por ĉiam en tiu ĉi domo la rifuĝon.

Post senfina, por ambaŭ neesprimeble amara, paŭzo, dum kiu neniu el ili trovas vorton, li leviĝas.

»Estas jam malfrue,« li diras, »kaj nun mi devas reveni hejmen.« Subite li rememoras, ke per la tute samaj vortoj iam Servilia finis ilian unuan interparolon. Sed, kiom multe ja kuŝas inter tiu tago kaj la nuna!

»Adiaŭ, Servilia!«

Ŝi senmove plusidas kaj nur aŭtomate kapklinas:

»Adiaŭ, Cezaro...«

## Konsulo

La germanaj gigantoj, kiuj — ŝajne — plenigas la tutan salonon, pezpaŝe sin trenas tra la pordo eksteren. Post ili, kun humila komercistaĉa liprideto, iras malalta hebrea vagvendisto, ĵus servinta kiel interpretisto.

Enpense rigardas Cezaro antaŭ sin, frotante per la maldekstra mano la dekstran, tra kiu denove ekcirkulis la sango, forpremita de la ursmanegoj. Li malatentas ankaŭ la revenintan sekretarion, kiu elakompanis la senditaron.

Fine li kap-returnas kaj, lasante enflui en la okulojn la nunon, li vigle diras:

»Du stenografojn. Tuj!«

La sekretario forpafiĝas, revenas kun ili, svingante paperfolion en la mano. Nun li ĝin donas al Cezaro:

»La hodiaŭa senat-protokolo.«

Cezaro surĵetas flugan rigardon, komencas legi, jam profundigas en la akto. La aliaj atendas. Subite, sen okullevo, li diras:

»Karo!«

»Sinjoro!«

»En la etaton de la ŝtatbienoĵ, kiuj por la plano de la koloniigo —«



»*Lex Pompeia*« rapide flustras la sekretario al la skribisto.

»— povas esti konsiderataj, oni devas enmeti ankaŭ la *kampanian* ŝtatbienen.« Li formetas la protokolon sur la tablon kaj ekmarkas per plumbopeco streketojn sur margĝenon: kroĉpunktojn por la ideoj, planoj, intencoj. »Hircio!«

»Konsulo!« (La sekretario).

»Oni ellaboru projekton de leĝo pri la provincaj administradoj. Mi proponos ĝin ankoraŭ en tiu ĉi semajno al la senato. Samtempe preparu la kopiojn por la popolkunveno.«

»Jes, konsulo.«

»Filino!«

»Sinjoro!«

»Leteron al la prezidantaro de l' impostistoj: Mi estas preta malaltigi — laŭ la petoj — ilian pagon, sed mi avertas kontraŭ ekspluatado de la provincoj; alie mi aplikos la plej severajn leĝpunojn. Singardan aludon al mia provinca leĝprojekto.« Li tralegas la protokolon kaj parafas ĝin: »Ĉu oni jam kutimiĝis al la publikigo de la kunsidaj protokoloj?« li demandas la sekretarion.

»La popolo amasiĝas ĉe la stratanguloj por ilin legi,« respondas tiu ĉi. »La nova praktiko estas de ĉiuj laŭdata.«

»Strange, ke ankoraŭ al neniu venis tiu ĉi ideo.« Li komencas esplori la poŝtaĵojn. »Kia humoro ĝenerale?«

»Favora.«

Kapbalanco.

»Mi bezonos ĝin.«

»La amasoj komencas kompreni, ke oni laboras por iliaj interesoj.«

»Por iliaj interesoj? Ne. — Jes. — Laŭ la kompreno de l' afero. Karo!«

»Sinjoro!«

»Leteron al Kalpurnio Pizono: tuj li venu al mi. La flugvorto: la proksimaj konsulelektoj. — Ĉu ankorau iu en la antaŭĉambro?«

Hircio mallaŭte ekridetas.

»Jes.«

»Kial vi ridas? Kiu li estas?«

»Gabinio.«

Cezaro okullevas.

»Aŭlo Gabinio?«

»Jes.«

»Interese. — Karo, la letero al Pizono superflua.«

»Jes, sinjoro.«

»Sed anstataŭe leteron al Cicerono. — Hircio!«

»Konsulo!«

»Iru al Gabinio. Enkonduku lin en la bibliotekon. Mi petas, ke li nur iom paciencu.«

»Jes, konsulo!«

»Sed ĝentile, Hircio! Kaj tuj revenu!«

»Jes, konsulo!« Hircio forrapidas.

»Karo!«

»Sinjoro!«

»Leteron al Cicerono. Koncerne la viziton de Kornelio Balbo. Refoje mi varme lin petas, ke li pripensu miajn proponojn; mi atendas liajn sciigojn.«

Hircio revenas kun leteroj kaj depeŝoj subbrake.

»Gabinio atentos.«

»Donu.« La konsulo prenas la paperojn, flug-

rigardas ilin unu post la alia. Iun leteron li senvorte donas al Hircio. Tiu legas, surprizite ekvoĉante:

»Cicerono rifuzas!«

Cezaro ŝultrolevas.

»Lia afero. — Karo!«

»Sinjoro!«

»La letero al Cicerono superflua. Leteron al Klodio: Mi atendas proponon de liaj leĝoj.«

»Jes, sinjoro!«

Timigite ekokulas Hircio Cezaron.

»Vi volas —«

»Mi provis kun li ĝentile. Sed, se li ne volas — mi povas ankaŭ alie.«

»Sed la homon, kiu savis kontraŭ Katilino la ŝtaton!«

Mirigita rigardo sufokas ĉiun pluan vorton.

»Eh, kion vi scias pri Katilino!« Paperrulo ekflugas antaŭ la stenografojn. »Filino: ekspresan leteron al la reĝa egipta korteg-ministro: oni konsentas al la reĝo la petitan titolon de amiko, kontraŭ pago laŭ la tarifo.«

»Ses mil talentoj,« alflustras la sekretario.

Kun sulka frunto klinas sin Cezaro super la rapidan knarskribanton.

»Nun for!« li ordonas tranĉe. Ambaŭ forpafiĝas. Cezaro atendas, ĝis la kurteno post ili kunfermiĝas. Tiam li diras al la sekretario:

»Do, kie la gallo?»

»En mia ĉambro.«

»Tuj hodiaŭ li revojaĝu hejmen. Akompane donu al li konfidindajn homojn, kiuj kolektu materialon pri la invado de la germanoj. Tuj kiam tio estos plenumita, ili revenu hejmen. Por mi gravas la plej precizaj

informoj. Krome ili devas havigi al mi kartografian materialon pri Gallio, liston de la strategiaj punktoj, fortoj, armilstato kaj versaĵnaj kolektiĝejoj de la gallaj militvokitoj. Ĉi tion lastan sekrete; ankaŭ la gallo Di-Divi- nu, kiel li nomiĝas?«

»Diviciako, la *edua* militestro.«

»Jes, prave. Ankaŭ li nenion eksciu pri tio.«

La grifelo de la sekretario flugas sur la skrib-tabulo. »Ĉu vi scias, kion la germanaj senditoj volis de mi —?«

»Pac-kaj amikec-konvencion.«

»Sensencaĵo: min priruzi, ekscii, ĉu ni estas kapablaj kaj emaj malhelpi ilian invadon en Gallion. Vi povas imagi, kion mi al ili respondis.«

»Nu, vi diris al ili —«

»Nenion mi diris al ili. Sole ĝentilajn vortojn, sen iaj sindevigoj. Ilia ĉefo ricevos la reĝtitolon: en sekurecon oni ja devas luldormigi la ursojn! Ĉu vi atente pririgardis ilin?«

»Jes.«

»Iliajn okulojn? Kvazaŭ bluaj flamoj. Prezentu al vi, ke cent miloj da tiaj gigantoj inundos Gallion: post du jaroj ni havus la duan *cimbran* enfalon en Italion. Tion oni devas antaŭbari.«

»La milito —«

»La milito eksplodos jam la sekvontan jaron: en Gallio. Ĉu vi ekspedis miajn ordonojn por Transpadio?«

»Pri la rekrutigo? Jes.«

»Bone. — Kaj nun alkonduku Gabinion.«

La sekretario eliras. Vere, li admiras Cezaron; tamen li ne bedaŭras, ke por iom da tempo li liberiĝis de lia ordon-hajlo.

La popola eks-tribuno kaj vicesro de la venkinto kontraŭ Mitridato ne scias, kian vizaĝon li mienu: li ne vidis Cezaron de post la decidiga interparolo en la domo de Krasso, kiam la komuniko el Brundisio renversis ĉiujn planojn. Nun li estas necerta, kiel taksas la malnovan rivalecon tiu ĉi homo, kiu nun alprenis la povon.

Trankvila, afabla bonvenigo de Cezaro iom lin kuraĝigas: la konsulo forgesis la pasintecon — aŭ estas sufiĉe forta por tion ŝajnigi.

»Al kio mi danku la plezuron de via vizito?«

Gabinio hezitas.

»Konsulo,« li diras energie, »mi venis al vi, ĉar —«

»Nu?«

»Ĉar mi deziras klarigi la malnovajn miskomprenojn.«

»Parolu do!«

»Se vi volas —« pene elsaltas la vortoj — »mi proponas interparolon.«

»Kun kiu?«

»Kun mi« torturite elbalbutas Gabinio. »Estas ja malnova disakordo inter ni du; nu, mi volus ĝin ĉesigi.«

Post ĉiu frazo sekvas paŭzo: Cezaro pricerbumas vorton post vorto antaŭ ol diri.

»Kiom koncernas min; la disakordo, ho Gabinio, estas jam delonge finita: tion vi ja devus scii.«

Gabinio kelkfoje kapjesas nerveze.

»Certe, certe. Tio al mi ebligis — tial mi ankaŭ venis.«

Subite li saltleviĝas. »Ho Cezaro,« li diras firme.

»permesu, ke ni interparolu kiel du viroj. Nehonte ja, konfesi sian eraron. Vi estis prava kaj mi — malprava.«

Ridete gestrifuzas Cezaro.

»Mi estis bonŝanca.«

»Ne! — Bonŝanca — nu jes — ankaŭ tio estas necesa. Sed —« denove ekflugas liaj pensoj — »dum la lasta jaro mi havis sufiĉan tempon por pripensi. Tial mi primeditis vian tutan leviĝon. Kiel vi, de la unua komenco, supreniris spite la senlaborem, mal-inteligenton kaj malicon de l' aliaj — ĝis la loko, kiun vi hodiaŭ okupas — kaj kiu por vi signifas nur saltotabulon —« Li interrompas kaj en subita pasia ekscitiĝo etendas la montrofigurojn de ambaŭ manoj kontraŭ Cezaron — »Vi — vi sola — nur vi sciis — ni ĉiuj aliaj dediĉis nin al momentoj, zorgis nur pri la hodiaŭo — prenadis tiom, kiom unuopaj horoj proponis al ni — sen plano — sen celo — nur vi sola konis vian vojon — vi havis forton kaj volon preni tion, kio estis via — kio al vi apartenis — Pompejo — li multon faris por Romo — sed vi faris eĉ pli: lin timigis la lasta paŝo — ĉe vi neniu estis la lasta. Vi estas ne nur venkinto — ja, venko: ĉiutage oni aŭdas pri iu nova — vi estas gvidanto — kiun ĉiuj devas sekvi, kiu sola sukcesos — levi la dronantan republikon — kaj tial — tial —«

Trankvile kaptas Cezaro la ankoraŭ ĉiam aletenditajn manojn de la treege ekscitita homo, tiras ilin mal-supren, premas Gabinion en la seĝon, el kiu la malnova rivalo elsaltis.

»Mi dankas vin,« li diras mallaŭte. »Vi estas la unua, kiu min fakte komprenas. Tial mi ĝojas, ja pli ol mi povas diri, ke vi venis al mi.« Li ellasas la tremantajn manojn, sidigas iom malrapide por kaŝi la inter-

nan ekscitiĝon. — »Interpaciĝo! — Stulta mi estus, se mi forpuŝus la manon, etenditan de vi: vi estis unu el la malmultaj, kies kontraŭstaron mi serioze konsideris, ĉu mi do ne amu kiel amikon vin, kiun mi tiom estimis kiel malamikon.« La okuloj de l' alia rigardas lin dankeme. Cezaro rekolektas la pensojn kaj daŭrigas:

»Kiam mi eksciis pri via vizito, Gabinio, ĝuste mi estis invitonta iun mian amikon por lin peti pri helpo. Mi retenis la leteron kredante, ke vi helpos al mi.« Li ridetas sian nerezisteblan, kor-venkan rideton. »Ĉu vi rifuzos al mi la unuan peton, kiun mi direktos al vi?«

»Parolu, Cezaro,« diras Gabinio premvoĉe.

»Grandajn planojn mi havas,« komencas Cezaro, »vi ekscios ĉiujn, kiam ili estos maturaj. Sed por efektiviĝi ilin, mi bezonas tempon — kelkajn jarojn — kaj virojn, kiuj dorsoŝirmos min, kiam mi ne plu povos plenumi la plej altan ŝtatoficon. Ĉu vi volas esti unu el ili — ĉu vi volas esti la unua inter ili?«

Gabinio kapjesas, brulante pro scivolo.

»Nu, kion mi faru?«

La respondo superas liajn — eĉ plej grandajn — esperojn:

»Vi devus akcepti en la sekvonta jaro, kune kun Kalpurnio Pizono, la konsulecon.«

Gabinio sidas rigide.

»Ĉu la konsulecon?« li ripetas pridubante.

Cezaro ŝultrolevas.

»Oni devas ĝustatempe sin sekurigi. Nun ni havas la povon, meti niajn amikojn sur la plej gravajn postenojn; se mi preterlasos la bonŝancon, la kontraŭuloj reakiros la superecon.«

Gabinio blovspiras. La grandanima propono de

Cezaro tuŝis lian plejprofundon. Tute mallaŭte, kun rompita voĉo, li elflustras:

»Cezaro — mian dankon —«

Cezaro rifuzas ridete, fortosupere, kiel ĉiam.

»Sen danko,« li interrompas, »ne faru grandan bruon pro nenio: vi dankŝuldigos min same, kiom mi vin.« Li ŝanĝas la tonon: »Do, konsentite?«

Gabinio kapjesas, ne povante ankoraŭ venki sian ekscitiĝon. Nur post kelkaj sekundoj li rekonsciigas.

Ankaŭ mi ne venas al vi malplenmane. Mi portas al vi informon, kiu estos por vi treege valora.«

»Nu, ĝi estas?«

»Vi estas tro danĝera al la senato. Oni timas, ke vi povos fariĝi tro potenca, kiam vi — post via oficjaro — transprenos la konsulan provincon.«

»Tion ili timas?«

»Jes, tial ili intencas al vi atribui neniun provincon.«

»Kio?« La fortika korpo tuj streĉiĝas.

»Ne — vi ricevus la administradon de la ŝtatarbaroj kaj bienoj.«

Silento. Dikaj nuboj ekombras la vizaĝon de Cezaro. Malrapide li diras:

»Vere, gravega informo. Vi faris al mi, ho Gabinio, pli grandan servon ol vi eĉ supozas.« Li ĵetas sin malantaŭen en la seĝon. »Ruze elpensite, tre ruze! Sed mi trastrekos iliajn kalkulojn!« Lia fingro jam ektuŝas la tamtamon, vibrantan sur la tablo. Enkuras Hircio.

»Konsulo?«

»Hircio, tuj vizitu Pompejon.« Masvingo al Gabinio. »Vi pardonas.« Ree el Hircio: »La leĝprojekton rekte al la popolkunveno.« La grifelo de l' sekretario flugegas. »Per tio ĉi oni atribuas Transpadion



kaj Illirion, inkluzive la limgardon, al konsulo Kajo Cezaro por — « momenton li pripensas — » kvin jaroj. Du — ne: tri legioj«. Komenco de l' ofico — retroaktive — ekde la unua de Marto ĉijare. La malneton tuj buŝe vi komentarios al Pompejo kaj ankaŭ anoncos, ke mi ankoraŭ hodiaŭ kontaktiĝos kun li por pritrakti ĉion necesan. Rapidu!«

»Jes, konsulo.« Hircio jam malaperas. Cezaro denove turniĝas al Gabinio.

»Se la grandaj sinjoroj volos kun mi trompludi, la popolkunveno muelos pipron sub iliaj nazoj.«

»Kaj la senato?« Preskaŭ timeme alturniĝas Gabinio.

Sovaĝa svingo — la gesto de l' pugnotuktisto, ekatakanta la kontraŭulon.

»La senato iru al diablo!«

## Sola, tute sola . . .

Foriris ankaŭ la lastaj gastoj . . .

Ankoraŭ ĉiam staras Cezaro senmove en la sinteno, en kiu li rigardis post Julian, kiam ŝi kun la novedzo foriris el la atrio. Ankoraŭ ŝajnas al li vidi la delikatan kaj gracian figuron de la filino, kiu en festvesto, sen alia ornamo krom sia ĉarmo kaj floroj, aspektas duoble aminda. Ankoraŭ ĉiam li sentas la konfidan alpremiĝon de l' knabina korpo antaŭ ol la filino ŝiriĝis for el lia ĉirkaŭprenado por sekvi la viron, al kiu ŝi parolis hodiaŭ, ĉe l' geedziĝo, la eterne belajn vortojn de la formulo, sanktigita de la tradicio: *»Kie vi estas Kajo, mi estos Kaja.«*

Sendube, se entute ekzistas bazo por la homa feliĉo, ŝi estos feliĉa. Pompejo havas ĝisfunde noblan karakteron, krome, li estas ankaŭ delikatsenta kaj bonkora. Kaj li amas Julian: tio estas ne nobelranga geedziĝo, nek edzeco kontraktita pro praktikaj kaj politikaj motivoj. Ĉiu lia rigardo perfidas lian simpatian: la profunda, mola tembro vibranta en lia voĉo, kiam li parolas kun la junedzino, la senlime milda, delikata movo, per kiu li ĉirkaŭbrakas ŝiajn ŝultrojn. Kaj ŝi reciprokas al li la konfidon kaj tiun ekburĝonan simpatian, kiu en la varmo de l' kunvivo bele kaj plene disfloros.

Nur nun estas sekurigita la grundo, sur kiu Cezaro konstruados sian verkon. La ligo inter ambaŭ potencaj familioj kreis bazon, kiun nenio plu ekŝancelos. Unuafoje de kiam ekzistas la Respubliko, ekkonstruigas io simila al dinastio. Nun li havas ankoraŭ nur unu deziron: havi filon, al kiu li povos transheredigisian verkon, se li devos retiriĝi antaŭ ĝia definitiva pretigo, se li ne plu povos atingi tion, kion li decidis.

Tiu ĉi penso rememorigas al li la alian junedzinon de l' duobla festo, la filinon de lia amiko Kalpurnio Pizono. Ŝi hodiaŭ iĝis lia edzino.

Jen, timigite, mute, senmove ŝi staras kaj rigardas lin per larĝaj, maltrankvilaj okuloj. Kiom longe jam? Preskaŭ kompata sento ekondas en li pri tiu ĉi tremtanta juneco, kies mastro li fariĝis. Li preskaŭ sentas, ke Julia ŝanĝis nur la korpon, kvazaŭ li anstataŭ ŝi estus ricevinta novan filinon por ŝin ŝirmi, prikaresi kaj defendi kontraŭ ĉiu bloveto de l' vento.

»Ĉu vi ne lacas, Kalpurnia?« li demandas afable.  
»Ĉu vi bonvolas sidiĝi?«

Kvazaŭ oni subfalĉus ŝiajn krurojn, ŝi tuj sidfalas sur la plej proksiman seĝon, respondante per iom alta voĉo de knabineto:

»Jes, Cezaro.«

Li alproksimiĝas malrapide, rimarkante kiel timo dislarĝigas ŝiajn okulojn. Singardeme li alŝovas seĝon apud la ŝian, sidiĝas apud ŝi, prenante ŝiajn manojn, senreziste lasatajn al li.

»Ĉu vi timas min, ho Kalpurnia?«

Senhelpe ŝi lin rigardas kaj silentas.

»Nu, estu kuraĝa, mia infano,« li diras milde. Ŝi

volas kapjesi, sed eĉ por tio mankas al ŝi la forto. Li daŭrigas: »Vi devas ne timi min — nu aŭdu —« momenton li pripensas, kontinuigante la antaŭan penson: »hodiaŭ forlasis min la filino. Sen vi ĉi tie, mi estus denove tute sola, nur kun mia maljuniĝinta patrino. Vi estos ne nur mia vivkunulino, kun kiu mi dividos la zorgojn, sed, antaŭ ĉio, vi estos la juneco, disradianta tra ĉiuj ombroj de mia vivo sian brilan lumon. Pezon de unu devo faciligos al vi la alia: vi devas esti nur vi mem, ja, ĉiam tutanime vi mem.«

»Jes, Cezaro.«

Penetre li ekrigardas ŝin. Li ne kapablas solvi la enigmon de tiuj dislarĝaj okuloj: ĉu ĉiam ankoraŭ — nur timego — aŭ jam klopodo por lin ekkompreni, eksenti?

»Kajo nomu min,« li petas mallaŭte. »Cezaro — tio estas por la fremduloj. Kaj vi ja volas esti al mi amikino; ĉu jes?«

»Jes, Ce — jes, — Kajo!«

»Kajo,« li ripetas reveme. »Kiel mole tio sonas sur viaj lipoj... kvazaŭ komenco de kanto...« Li delasas unu el ŝiaj manoj, subtenante sin brake sur la apogilo de la seĝo, en kiu ŝi sidas.

»Timema birdeto, la mia! Mi kredas al vi, jes: hodiaŭ mia hejmo al vi ŝajnas ora kaĝo, en kiu oni vin fermis kaj vane vi serĉas la elirejon. Nu, antaŭ ĉio, vi devas ellerni, ke ĉi tie estas nenio, kio vin malhelpus, ke vi estu tiel plene libera, kiel vi ja deziras kaj ke mi volas ricevi de vi nur tion, kion vi volonte, tutkore, donacos al mi. Ĉu vi aŭdas, Kalpurnia?«

»Jes, Cezaro.«

Vane penas liaj okuloj droni en la ŝiajn; tiu

enigma mallumo, senespere rezistanta kontraŭ ĉiu enpenetro, restas ĉe l' fundo de la larĝaj pupiloj. Tamen li ne rezignas.

»Mi scias, ke vi hejmece sentos vin ĉi tie, kiam vi al kutimiĝos. Ho, kedu al mi, en mia koro postrestis ankoraŭ multe el tiu infano, kiu ĝislaciĝe ludtumultis kaj nun deziras en mola sino elriprozi ĉion, kio avidas serenecon, senzorgemon, ridon kaj eĉ ludon. Kaj tiu sopiro en mi des pli fortiĝas, ju pli mi supreniras, ju pli maldensiĝas ĉirkaŭ mi la baroj. Ho, ne facile estas, Kalpurnia, stari alte super la aliaj.«

Li metas la brakon ĉirkaŭ ŝian ŝultron kaj, eksentante tremeton en la delikataj muskoloj, li mallaŭte tiras ŝin al si. »Ĉion, kion mi serĉas, mi trovos ĉe vi; ĉu jes?«

»Jes, Cezaro.«

Kiom sensente, kvazaŭ elparkere, sonas tiu eterna respondo: »Jes, Cezaro.« Glacia sento leviĝas en li. Sed li ĝin tuj subpremas: la varmo de l' juna korpo, altirita al la lia, ekbruligas en li, iom post iom, flamon, kiu trafajras ankaŭ liajn vortojn. Nun li jam alpremas ŝin pli forte, flustrema iĝas lia voĉo, sed pli kaj pli arda, penetra:

»Sed mi volas de vi eĉ pli multe, ho vi, mia edzineti! Mi bezonas ne nur la helan tagon, mi bezonas ankaŭ la purpuran mallumon de l' nokto, kun ĉiuj ĝiaj misteroj kaj mirakloj. Jes, mi bezonas ankaŭ ebrion, en kiu mi sinforgese dronos, ekstazon, kiu min disfandos kaj purigos. Donacu al mi, ne nur la blankajn horojn de l' tago, sed ankaŭ tiujn ruĝajn de l' nokto.«

»Jes, Cezaro.«

Ĉu ŝi ja scias, kion ŝi parolas? La rozaj vangoj

paliĝis, la lipoj, treme elparolantaj tiujn du vortojn, iĝis sensangaj. En la okuloj disardis flagra flamo. Ĉu tio estas ankoraŭ la knabina honto — aŭ ankaŭ ŝin jam enkapitis la fajro, en kiu li forbrulas? Li ĉirkaŭmetas ankaŭ la alian brakon, alpremante ŝin tute al si; lia buŝo disŝovas la buklojn, kovrantajn la oreleton kaj enflustras:

»Jen la nokto, en kiu vi fariĝos mia vera edzino! En tiu ĉi nokto fortunultos super vi uragano, disŝovante ĉiujn florojn, por ke vi morgaŭ brilbrile ekfajru — kiel herbejo sub la printempa kareseto! En tiu ĉi nokto vi ellernos, kion signifas disfajri en la plej alta ardo, forbruli en la plej suprenŝpruca flamo! En tiu nokto falos for de vi via knabineco, kvazaŭ malnova vesto, kaj vi ekĝuos la tutan ĉielfeliĉon de virino, kiam vi fariĝos unu-sama kun la viro, al kiu vi vin donis! Nu, venu!«

Li leviĝas kun pasiega, apenaŭ bridata moviĝo, altirante ŝin, ankoraŭ ĉiam ĉirkaŭprenatan, kun si supren. La sekaj, soifaj lipoj serĉas la ŝiajn.

Du pugnetoj puŝiĝas en malespera rezisto kontraŭ lian bruston. Terurite grimaciĝinta infanvizaĝo forturniĝas senhelpe. De la lipoj elŝiriĝas jam krio:

»Ne, Cezaro, ne!«

Lia ekstaza movo rigidigiĝas. La ĵus sovaĝe flamanta fajro en li ekvelkas, estingiĝas. Liaj ĵus brulantaj okuloj iĝas malvarmaj kaj klaraj, ili rigardas objektivite, senkompate penetre en la ŝiajn — internen, tute internen, ĝis la fundo mem. La premeĝo de liaj brakoj malfirmiĝas, delasas ŝin.

»Ne,« li diras sensone. »Ne. . .«

Li forpaŝas de ŝi du paŝojn, okulmallevas, pri-

pensas, premante per la manoj la koron, kiu ankoraŭ ĉiam furioze frapas. Fine li okullevas.

»Estas jam malfrue,« li diras same sensone. »Vi estas la dommastrino. Ordonu ordi la tablon. Bonan nokton!«

Malrapide, trenpaŝe li iras en sian dormoĉambron — sola, ja, tute sola.

## La ĉaso komenciĝas

Tri mordhundoj akompanas Cezaron en lia ĉaso por la potenco. Unu estas pli rasa ol la alia: Klodio, Hircio kaj Labieno.

Unue li senĉenigis Klodion. La patricia dando, kiu libervole rezignis pri sia aristokrata rango nur por iĝi popol-tribuno, estas fidela al li dumvive — ĝismorte: li ne forgesis, kion antaŭ jaroj faris por li Cezaro. Tiam Cicerono, la moraljuĝisto, volis ekprocesi kontraŭ la senpripensa Klodio. Nur Cezaro lin savis. De tiam Klodio amas Cezaron tiom fanatike, kiom fanatike li malamas Ciceronon.

Jam delonge li embuskas la ŝancon por meti antaŭ la popolon — laŭ tribuna rajto — leĝprojekton: kiu iam ajn kondamnis sen la kunvoĉo de la popolo romian civitanon al morto, estu ekzilita. Tiamaniere oni devus postfare puni la procedon de Cicerono kontraŭ la kamaradoj de Katilino. Ĝis nun Cezaro lin bridtenis atendente la plej oportunan momenton: nun li liberigis Klodion.

Kaj la leĝo kiel peza ŝtono boriĝis tra l' maldika glacio: la popolkunveno de l' tumultema ĉefurba plebo, ravita pri la atendebla spektaklo, alkonsentis. Tio estis terura vangofrapo sur la vizaĝon de l' senato. Nu,



kiel piedbatita abelujo, ĝi ekfuriozis. Deputitaro vizitas la konsulojn. Bibulo, la kolego de Cezaro, estas, en sia konservativega koro, samopinia kun la ofenditaj samklasanoj. Li promesas entrepreni ĉion eblan, sed Cezaro malvarme atentigas, ke estas maleble rifuzi sankcion al la — laŭkonstitucie — akceptita leĝo. Dentogrinco retiriĝas la senatanoj: plezurege ili instruus la kontraŭeman konsulon, ke la senato de ĉiam estis la vera mastro de l' Respubliko. Sed ili ne sukcesas: ĉar ĉeŝulte kaj postdorse de Cezaro ŝirme staras Pompejo, kies veteranoj, plenigante la forumon, apenaŭ kaŝas sub la vestoj la kunportitajn glavojn. Dume Krasso, malavare disŝutante ormonerojn, aĉetas por li animojn — senĉese novajn animojn. La leĝo restas kaj Cicerono, antaŭ ĝia ekvalidiĝo, senreturne forkuras el Romo; lia hejmo, liaj somerdomoj, estas detruataj ĝis la fundamento.

Klodio dume plenumis nur la duonon de sia tasko; sed Cezaro jam revokas sian mordhundon: paciencon! paciencon!

Anstataŭe li senĉenigas la alian: Hircion. Tiu ĉi estas majstro de diplomataj maŝoj: li traktas kun Pompejo, konferencas kun Krasso; oni lin renkontas ĉe Gabinio, same kiel ankaŭ ĉe Kalpurnio Pizono; li plenumas sekretan ĉaspeladon, puŝas la ĉasaĵon en embuskon, sen ties kompreno, kio vere okazas. Kaj iun tagon subite displuvas sur la forumo proponoj, unu super la alian, kaj ĉiuj estas akceptataj per ĝojaj aklamoj: Cezaro ricevas, ankoraŭ kiel konsulo, la transpadian provincon kun la jam konkeritaj regionoj de Gallio; oni konsentas al li la rajton por ĉiurilate defendi la interesojn de Romo kontraŭ la lim-vagaj popoloj; lia estreco daŭros dum kvin jaroj; tri legioj estas tuj al lia dispono kaj, laŭnecese, ankaŭ la rezervaj trupoj;

samtempe oni prikonsentas ankaŭ la postulitanjn ŝtat-kreditojn.

Sed ĉifoje la senato ne tiel facile cedas: kolego Bibulo obstrukcas, interrompas la kunvenojn por aranĝi religiajn veter-prognozojn. Cezaro lin ignoras kaj daŭrigas la diskutojn. Bibulo protestas, parto de la senatanoj, gvide de Katono, aliĝas. La furiozan tumulton Cezaro subpremas perforte, li malliberigas sian kolegon, li malliberigas Katonon. Post tutsemajna ekscitiĝo la proponoj estas akceptitaj kaj, krome, ĉe la samtempaj voĉdonoj estas elektitaj, kiel konsuloj por la sekvonta jaro, la kandidatoj de Cezaro: Pizono kaj Gabinio.

La perforta procedo kontraŭ Bibulo kaj Katono misinfluis la vastajn popolrondojn. Negrave ja pri Bibulo: neniam li estis populara kaj oni priridas la senpovan furiozon de l' homo, kiu retiriĝis en sian loĝkavon; oni marĝenas per malicaj rimarkigoj liajn murafiŝojn, plenajn de furiozaj protestoj; lian senpovan paroksismon oni preterignoras kun spritaĵoj: anstataŭ nomi — laŭmore — la oficialan jaron laŭ ambaŭ konsuloj, oni anoncas ĝin kiel jaron de konsuloj: Julio kaj Cezaro. Sed rilate Katonon! Katono estas populara: al la senkaraktera plebo imponas lia senmakula honesteco, plaĉas lia vulgara, drasta esprimmaniero, toleranta nenian buŝumon, lia kuraĝo retiriĝi antaŭ nenio kaj neniu: estus ja tro danĝere fari el Katono martiron!

Nu, Cezaro tion tute ne intencas. Refoje li stimulas Klodion sur la piedsignojn: ĉar la apro povus senteble malutili al la impulso de l' popolo, oni devas ĝin forpeli. Tuj aperas nova leĝo, tre konvena al la plebo, ĉar ĝi promesas senperan akiron de novaj enspezoj: la reĝo de Kipro iam pro malico subtenadis la piratojn; kiel punon oni devas nun plandpreni lian

regnon kaj konfiski lian havaĵon. Vane Katono kontraŭstaras tiun novan aventuron. La propono estas akceptita kaj ordonite — ho, kiom malicega ironio! — ĝuste al li, la plej justa, okupi la ĉeflokon de la komisiono, kies tasko estas: registri ĉiujn trezorojn sur tiu bela, sed ve! tiom malproksima insulo.

Nun la vojo estas libera, la ĉaso povas komenciĝi. Estas ja la lasta momento. Senĉese alvenas el la nordo alarmaj informoj: la malgranda, sed — pro sia nebridebla kuraĝo — fama, batalema gento de l' *helvetoj*, preparas sin por enbatiĝi en la regionojn sub la roma suvereneco. Unufoje ĝi jam forpuŝis kaj sangigis la romiajn trupojn. Kaj nun aperis ĝiaj avangardaj taĉmentoj ĉe la limo, ĉe la *lemania* lago.

Cezaro tuj elarangis siajn aferojn: ordo restu post li, kiam li foriros supren, al la nordo, kie jam alten ekŝprucis la unuaj flamoj de l' giganta brulego. Li forlasas la ĉefurbon, kondukante kun si Labienon, la trian, furioze atakkureman mordhundon.

## Lasta spirkapto

Ĉe tiu, nun jam bone konata fajrujo, sidas Cezaro kontraŭ Kaburo.

Plezure rigardante ĉirkaŭ sin li trinkas la malfortan, akvumitan vinon de vilaĝanoj kaj konstatas, ke nenio ŝanĝiĝis. Sur la blanke kalkitaj muroj brilas en senmakula pureco, kiel ĉiam, vazaro kaj ilaro. Neŝanĝita estas la serena, libera temperamento, radiantanta el la okuloj de liaj gastigantoj, kiel ankaŭ la terdonacita sano, plenstreĉanta iliajn rektajn korpojn.

Ja, ĉio sensanĝa, nur li jam delonge estas ĉi tie ne fremdulo: ĉenstreĉe albojis lin en ĝoja renkonto la hundo — ankoraŭ tiu sama hundo — patrinece kosalutis lin la dommastrino, dum la dommastro senvorte, sed tiom pli varme lin manpremadis. Kvazaŭ ĉio estus alvokinta: Koran bonvenon!

Ankaŭ la gejunuloj estas nun ĉi tie: ambaŭ filoj, Procillo, Donnotaŭro kaj filino Valeria. Ili sidiĝis en respektoplena distanco, iom fore de la patro kaj gasto, kaj aŭskultas silente ilian saĝan kaj malrapidan konversacion, kiun iam-iam rompas longetaj, revplenaj paŭzetoj.

»Vi do, vere, pensas,« interrompas Kaburo la paŭzon, »ke tiun ĉi junulon —« li montras Procillon — »vi bezonos?«

»Eĉ kiom!« certigas Cezaro. »Li estas al mi, vere, treege necesa: kion mi ja povus fari tie, supre, sen konfidinda homo, kiu al la indiĝenoj tradukados miajn vortojn?« Procillo tute ruĝiĝas pro ĝojo kaj fiero. Sinturne al la mastrino Cezaro daŭrigas: »Tute ne timu, patrineto: mi mem gardos vian karulon!«

»Dum li estos ĉe vi,« ridetas ŝi responde, »mi tute ne timos pri li. Traktu lin nur severe.«

»Kaj se tiam aŭ tiam,« interdiras Kaburo, »ĉe l' fingroj ekbrulos danĝero, ankaŭ li ekklopodu! Al junulo ne malutilos ellerni, kiel oni sin defendu per du sanaj manoj.«

Procillo elstreĉas sin, kvazaŭ li volus diri, ke tio ne donas al li zorgojn. Donnotaŭro, aŭskultante kun enviemaj rigardoj, flustras ion al li kaj ambaŭ knaboj interkubutante kaŝridas.

Plezure rigardas Cezaro la du sunbrunajn, muskolajn junulegojn.

»Se ĉe la rekrutigo mi ricevos tiajn militistojn, mi estos kontenta.«

»Estu senzorga,« respondas Kaburo kun evidenta fiero. »Ĉe ni estas ĉiuj nur fortikuloj kaj ili ne donos al vi kaŭzon por iam ajn honti.«

Procillo, kiu iom sentas sin la heroo de l' tago, riskas la demandon: »kiom da legioj havas la konsulo?« Pro la granda respekto li ne kuraĝas rekte alparoli la eminentan gaston.

»Ankoraŭ nur unu, kiu staras en *Genabo*,« klarigas Cezaro. »Sed baldaŭ estos pli multaj,« li aldonas kun mallaŭta rideto.

»Do, nia rekrut-legio ricevos numeron du?« Cezaro kapneas.

»Ne,« li diras, »oni tion numeras laŭ alia klasi-

fiko. La transpadianoj ricevos numeron dek. — Mian bonŝancan numeron.«

Procillo ridetas feliĉege, kvazaŭ tio estus lia persona merito. Kaburo denove daŭrigas la konversacion:

»Kaj morgaŭ vi jam revojaĝos?«

»Ja, mi devas,« respondas Cezaro ŝultroleve. »Kiu scias: dum ĉi tie trankvile ni sidas kaj babilas, eble tie, supre, komenciĝis jam la infera danco.«

»Mi ne povas pririproĉi vian urĝemon,« kapjesas Kaburo. »Mi bone konas la helvetojn. — Domaĝe,« li aldonas mallaŭte.

Cezaro ekatentas.

»Vi havas ĉi tie por mi ian aferon?«

»Nu, laboron fakte ne — mi volis nur kunvoki la gvidantojn, por ke vi interparolu kun ili antaŭ la forvojaĝo.«

»Tio ĉi, feliĉe, estas ne necesa ĉi tiun fojon,« trankviligas lin Cezaro. »Male: eble estas eĉ pli bone, se — anstataŭ mi — vi mem transdonos al ili mian komunikon. Estas pli sendanĝere.«

»Kian komunikon?«

»Ke de hodiaŭ mi vin konsideros kiel romiajn plenrajtajn civitanojn kaj laŭ tio vin ankaŭ traktos. Vaste mi tion preparolis, antaŭ mia forveturo, kun Pompejo kaj Krasso. Ni tri samopiniis, ke la oficiala konfirmo de la civitaneco al la tuta Transpadio estas nur formalajo, kiun ni realigos tuj post mia reveno en la ĉefurbon. Mi jam elirigis la praktikajn ordonojn pri la politika kaj administra procedoj.«

Profunda, emocia silento sekvas la vortojn, kiuj fine anoncas la plenumon de la granda sopiro flanke de la tuta popolo. Ĉiuj estas preskaŭ senspiraj. Tiam sufokvoĉe ekparolas Kaburo:

»Cezaro —«

Cezaro interrompas.

»Eĉ ne vorton plu, Kaburo! Ĝi estas la plej malgranda rekono, per kiu mi provis rekompenci vian senekzemplan fidelecon kaj paciencon.«

»Nur ion —«

»Sed, kion do? Ĉu vi estas ne kontentaj?«

»Ni estas — se ni povas esti certaj —« li vortrompas, serĉante la ĝustan eldiron por klare kaj nedubeble esprimi sian timon, sed sen ofendo al la amiko.

Cezaro ekkomprenas kaj ridetas. Evitante, laŭ sia kutimo, la singardajn ĉirkaŭvojojn, li ektuŝas rekte la kernon de l' afero:

»Vi pensas, ke povus okazi same, kiel iam pri la civitan-listoj.« Kaburo direktas zorgoplenan rigardon sur lin. »Laŭ tio mi denove rekonas la malkonfideman vilaĝanon.« Neante li fingrogestas tien kaj reen. »Nu, vi povas esti trankvilaj: hodiaŭ ĉio estas tute alia ol antaŭ ok jaroj. Tiam ni, Krasso kaj mi, staris, solaj kontraŭ la plimulto de l' senato. Pompejo estis en Azio kaj apenaŭ rilatis kun ni. Mi mem nur komencis mian karieron kaj, krome, mi jam sukcesis malfavorigi al mi la aŭtoritatulojn.« Mallaŭte li ridetas, ekmemorante la multajn malicaĵojn, kiuj tiam plenigadis grandegan parton de lia publika agado. Sed jam li reserioziĝas.

»Hodiaŭ ĉio estas ŝanĝita: ni tri estas mastroj de l' ŝtato kaj dume ni reciproke harmonias, ne ekzistas en la mondo tia forto, kiu povus detrui niajn intencojn.«

»Sed la konstitucio —« rimarkigas Kaburo.

»La konstitucion,« respondas Cezaro, « oni rompos neniupunkte. Ni trovis, ke estas necese ĝin — nur

unurilate — eksigi por iom da tempo.« Mallonge li pripensas, poste daŭrigas: »Vi, ho Kaburo, konas niajn leĝojn, vi konas la decidon de l' senato *Videant Consules*, kiu donas — por eksterordinaraj cirkonstancoj — senliman aŭtoritaton al la plej superaj oficistoj. Nu, ni trovis, ke hodiaŭ estas tia eksterordinara cirkonstanco kaj ĉar ĝuste la senato mem estas, kiu puŝis la ŝtaton en danĝerojn, ni decidis validigi la menciitan ordonon laŭ propra aŭtoritato. Nur oni devus — laŭfakte — diri: *„Videant triumviri“*.«

Denove silento. Ĉifoje silento de timiĝo, korprenateco. Poste diras Kaburo tute mallaŭte, plena de hezita admiro:

»Kaj — estas neniu, kiu povus vin malhelpi?«

»Neniu,« akcentas Cezaro. »Pompejo regas la popolkunvenojn, Krasso la monmerkaton kaj mi la militistaron. »Liaj okuloj dislarĝiĝas, la brilo de l' estrema rigardo, ŝajne, pli heligas la ejon. »Kiu ja malhelpus nin fari tion, kion ni trovas ĝusta?« Li rimarkas, kiel li kaptis la aŭskultantojn sub sian potencon kaj ridete decidas ilin denove liberigi. »Ĉio ĉi ŝajnas tre timiga kaj danĝera, sed efektive estas ne tiom terura. Niaj politikaj rivaloj konas la rimedojn de nia potenco ĝuste tiel bone, kiel ni mem, kaj ili certe sin gardos kontraŭ komenco de disputoj. Jes, Italio povas esti trankvila: dum niaj manoj tenas ŝildon antaŭ tiu ĉi lando, leviĝos neniu mano por ĝin ekskui.«

»Tamen estus pli bone, se vi mem restus ĉi tie —« mallaŭte rimarkigas la dommastrino.

»Ne, panjo,« li respondas. »La lando estas ordaranĝita, nun oni devas zoni ĝin per ŝirmomuroj. Mi ne povas disŝuti la semojn antaŭ ol mi estos certa, ke



ilian maturiĝon neniŭ malhelpos.« Lia serena vizaĝo jam nubigas. Kaj li finas: »En la maljuniĝinta *kelta* lando torente ekŝprucis freŝa kaj ŝvelforta gento. Ankoraŭ en tiu ĉi jaro estos decidite, ĉu Gallio, kiu ne plu povas resti galla, iĝos germana aŭ romia. Kaj germana Gallio displandus mian verkon antaŭ ol ĝi estus farita. Jen kial mi iras supren al la nordo.«

## La unuaj

Antaŭ la helveta senditaro staras la romia militestro. Lia klara rigardo preterglitas la malgraciajn figurojn en ledveŝtoj, kovritaj per mallongaj kupraj kaj feraj kirasoj. Atente li observas la pezan armilaron, sovaĝajn militornamaĵojn, kiujn la naŭveco destinis por efiki al malamikoj teruron kaj konsternon.

Ankaŭ li estas armita. Anstataŭ la malpeza togo lian korpon ĉirkaŭas peza brustkiraso; sur la larĝa zonrimeno pendas mallonga pikglavo. Man-apoginte sin al la koksoj, li iom diskurris. Kontraŭvole li lasas vibri tra la tuta korpo la vejnajn muskolojn, kvazaŭ li volus montri al la aliaj, ke ankaŭ lia forto estas ne malrimarkinda.

La senditoj, ĉefoj de siaj gentoj, komprenetas kaj balbutas la latinon. Tial interpretisto estas superflua. Cezaro parolas malrapide kaj artikige, ĉiun vorton aparte, por malebligi ĉian miskomprenon.

»Mi tre bedaŭras, ke mi devas rifuzi vian peton: kiel romia *prefekto* mi ne povas surpreni respondecon pri la malordo, kiu sendube okazus, kiam tia amaso marŝus tra nia provinco.«

La helvetoj ŝajnas tre malagrade frapitaj. Ili interŝanĝas rapidajn rigardojn, vortojn, kaj al iu, kiu ŝajnas ne kompreni, liaj najbaroj urĝe klarigas, dum li,

per sang-subfluaĵoj okuloj de rabia virbovo, kroĉas sian rigardon sur la romian militestron.

Unu el la gvidantoj de la senditaro, la helveta princo Namejo, refoje provas pace atingi la celon.

»Ni estas pretaj doni al vi ĉian dezireblan garantion kaj —«

Mangesto tratanĉas lian vorton.

»Viaj garantioj estas superfluaĵoj. Por kompensi la malutilojn, kiujn vi estus kaŭzontaj, ne sufiĉus via tuta havaĵo.«

»Sed ni devigas nin —« komencas Veroklecio, la dua gvidanto de l' helvetoj.

»Por promesoj, kiujn vi ne povus plenumi. — Ne klopodu vane —« la voĉo de la romano sonoras ne malafable, sed necedeme — »mia decido estas neŝancelbla: vi ne povas tramarŝi niajn provincojn. Kaj, se permesate al vi konsili, mi rekomendas: revenu en vian landon kaj rezignu pri viaj sencelaj planoj pri elmigro.«

Nun la galla princo perdas la sinregadon: la maniero, kiel la *prokonsulo* parolas kun ili, boligas la sangon de la fiera nobelo:

»Amike ni volis ricevi vian konsenton, Cezaro,« li diras malestime. »Vian konsilon ni ne bezonas. Se vi ne volas kun ni interkonsenti, ni atingos nian celon aliamaniere. Estas ja ne la unua fojo, ke ni renkontiĝas kun la romianoj. Nu, mi mem ĉeestis, kiam konsulo Kassio kaj lia anstataŭanto Pizono —«

»Mi scias, mi scias,« interdiras Cezaro trankvilege. »Mi konas vian heroaĵon, la embuskan atakon sur la romian taĉmenton, kiu ne militis kontraŭ vi kaj tial estis nepreparita al ia malbono. — Ja bone, provu, do, tiun alian manieron. Sed mi tuj hodiaŭ diras al vi:

tute male al Kassio aŭ Pizono, mi persone scias, kion mi esperu de vi, kaj mi estas sufiĉe forta por laŭvalore akcepti ĉiun, kiu ĉi tien enkuros.»

La manoj de l' gvidanto pugnigas. Silentego. Nur en la malantaŭo denove flustras iu, interpretante al sia najbaro la dirojn de Cezaro. Tiam Namejo ekmoviĝas abrupte al la pordo:

»Ŝajne, ni havas nenion plu por interparoli?«

»Ne ...«

Sensalute forlasas la senditoj la ejon. Cezaro postrigardas ilin, ĝis la lasta el ili furioze tondrofermas la tabulpordon. Tiam li turniĝas al Labieno, kiu, same armita kiel li, ĉeestis la interparolon:

»Labieno,« li diras sangmalvarme, »gardtaĉmentojn en la redutojn kaj al la lagoflanko — krome, duobligu nepre la gardstarantojn ĉe la pontofostoj, plimultigu la signalstaciojn: ni devas esti preparitaj, ke en la plej baldaŭa tempo oni nin atakos. — Venu, mi volas inspekti la laborojn.«

Ili eliras el la tabuldometo, nun servanta kiel komandejo, kaj direktiĝas al rivero *Rodano*, fulme torentanta el la lago, kiun ĝi ĵus trafluis. Ĉi tie estas unu ekstremo de la remparo, farita en la lasta semajno; valferme ĝi etendiĝas ĝis la monto. Interrompe distaras, kiel krono el la fortikaĵoj, plektaĵo el urĝe elfositaj, provizoraj redutoj. Antaŭ la bastionoj konturiĝas kontraŭ la vesperĉielo la silueto de la duone rui-nigita lignoponto, tra kiu iam oni plej vigle trafikadis.

Preterirante la legianojn, kiuj, interrompante sian laboron, mansalutas kaj post muta instigo denove ekfosas, Cezaro kontente observas la faritaĵon: bonege oni plenumis la taskon. Iu el la *centurionoj* kontrolantaj la fosantojn, ekrikonas per sia tuta, ledeca viz-

aĝo, kiam li alproksimiĝas. Cezaro alrigardas pli akre kaj haltas.

»Tiu vizago estas al mi iom konata,« li diras malrapide.

»Kiel vi nomiĝas?«

»Krastino.«

»Krastino?« Tiu ĉi nomo diras al li nenion; sed tamen: »Ĉu ni jam ie renkontiĝis?«

»Jes ja.«

»Kie? Kaj kiam?«

»Antaŭ Mitileno!« Antaŭ Cezaro subite reviviĝas la tuta sceno: li jam vidas la mallarĝajn tranĉeojn, la militistojn kun la koleraĵoj, malkonfidaj kaj mokemaj vizagoj, kiuj subite mirlongiĝas. Goje li demandas: »Do vi estas tiu pedikĉasinto?«

La rikano aliĝas en neesprimeble ĝajan ridgargaron.

»Jes ja!«

»Mi tre ĝojas revidante vin! Kie vi estis intertempe?«

»Sub Lukullo kaj Pompejo en Azio. De nelonge mi estas centuriono en la transpadia rekrutlegio.«

»Do ĉe la deka-anoj? Bonege! Kaj kiel mi vidas, vi ankaŭ atingis ion.« Li montras al la medaloj kaj honorĉenoj sur lia brustkiraso.

Ektremas en la gorgo de la centuriono. Li elbalbutas:

»Via frapo sub la makzelon tiam mirakle efikis.« Cezaro ridas.

»Ĉu ankaŭ tion vi rememoras?«

Denove tremoj en la gorgo. Poste:

»Ankaŭ tion alian — kio poste okazis.«

Cezaro rapide forĝestas.

»Nu bone. — Do de nun ni havos okazon pli ofte renkontiĝi kaj nun saluton.« Cezaro etendas al li la manon.

La centuriono akceptas ĝin singarde, kvazaŭ ion senlime delikatan, rompeblan. Subite li ekkrias:

»Saluton al vi, ho *imperatoro!*«

»Ankoraŭ ne,« ridetas Cezaro jam forire. »Sed mi volonte prenas tiun profetaĵon.«

La centuriono rigardas post lin per okuloj, kiuj ankoraŭ ĉiam estas fidelaj hundaj okuloj, kiel iam antaŭe. Poste por denove ekregi sin, li subite ekinsultegas malfeliĉan rekruton, kiu laborĉese observis la scenon.

Cezaro daŭrigas la ĉirkaŭiron. Aprobe li diras al Labieno:

»Se niaj homoj nur iom valoros, la helvetoj ne povos ĉi tie tramarŝi.«

»Kaj alian vojon ili ne havas,« kapklinas Labieno.

»Sed tamen: tiun tra la mallarĝejo de la Rodano.«

»Nu, tiu vojo gvidas tra la regionoj de la *sekvanoj* kaj estas facile fermebla.«

»Kiom tio gravas?«

Labieno ne komprenas.

»Kion vi pensas?«

»Perforte ili atingos nenion,« klarigas Cezaro. »Sed eble ili sukcesos pace interkonsenti.«

»Vi kredas? Ambaŭ gentoj ja malpacegas.«

»Sed, se ili repaciĝos? Se ili ekflaros la komunan malamikon kaj forlasos siajn disputojn? Se eble jam intermetiĝis peranto, klariginte al ili, kiom necese estas, ke ili konkordu?«

Labieno haltas.

»Cezaro,« li ekkrias ekscitite, »vi jam ricevis sciigojn?«

»Mi ricevis sciigojn. Nu, eĉ tre gravajn.«

»Oni jam intertraktas?«

»Tre serioze: la helvetoj, konjektinte mian rifuzon, jam antaŭpreparis sin.«

»Kaj kiu estas tiu peranto?«

»La frato de nia galla amiko.«

»De Diviciako?«

»Guste.«

»Tio estas perfido!« Ekscitiĝas Labieno.

»Kial tiom pezaj vortoj?« trankvile riproĉetas Cezaro. »Mi tuj ordonos la necesajn preparojn.«

»Jes,« vigle ekkrias Labieno, »tion oni tuj faru! Tuj mi ordonos unu trupon en la mallarĝejon kaj —

»Tion vi ja ne faros,« rapide interrompas Cezaro. »Tute kontraŭe: estas por mia plej granda intereso, ke la intertraktoj sukcesu.«

»Eh, kio?«

»Se ni nun provokus batalojn en la lando de l' sekvanoj sur la libera galla tero, ni estus atakantoj kaj niaj malamikoj en Romo ricevus armilon kontraŭ ni.«

»Sed dume la helvetoj forkuros!«

»Kaj rabante inundos la landon de *eduoj*, limantan kun tiu de sekvanoj. Kompreneble, la *eduoj* vokos nin por helpo.« Labieno okulas lin kun malfermita buŝo, iom post iom disetendiĝanta en la larĝan, komprenan rideton. »Ĉu vi nun komprenas? Ni atingos tion, kion la vivbezonoj de Romo senkondiĉe postulas: la enmarŝon en Gallion — kaj krome laŭ tute leĝa, neriproĉebla vojo.«

»Sed kiel ni transjetos la militistaron tiom rapide?«

»Nu, Labieno!« riproĉe kapbalancas Cezaro. »Ni ja, kiuj havas belegajn ŝoseojn tra la provinco?«

Labieno manplate alfrapetas la frunton.

»Vi pravas! — Hej, kio okazas tie?«

El ĉiuj flankoj ekalarmas signaloj, la militistoj jam forĵetis la ŝovelilojn, ŝpatojn kaj fulmorapide surmetas armilojn. Post nur kelkaj minutoj ili jam densege viciĝis sur la remparo.

Esplore rigardas Cezaro sur la lagon, trans kiu alglitas malrapide grandaj, pezaj boataĉoj, el kiuj bril-fajreras armilaro.

»La komedio komenciĝas,« li respondas trankvile la demandon de Labieno. »Ankaŭ ni partoprenos: ek al niaj postenoj!« Kaj li supreniras laŭ la deklivo, gvidanta sur la dorson de l' remparo. La vicestro lin sekvas.



## Bibrakto

Dum semajnoj Cezaro postsekvis la helvetojn, senĉese en frotuŝiĝo kun ili, ĉiutage implikiĝante en negravajn bataletojn, sed ĉiam sen la eblo, devigi ilin sur oportuna grundo al decidiga batalo. Foje, kiam ili transversis riveron, li sukcesis ilin frapi; sed tuj la alian tagon ili revengis sian eraron per kavaleria atako kontraŭ la eduajn helptaĉmentojn de Cezaro; alian fojon fiaskis bonege planita embusko pro malkapablo de oficiro, plej varme rekomendita de Krasso. Ŝajnas, ke la batalego entute ne okazos.

Nun aldoniĝas ankaŭ malfacilaĵoj pri la provianto: dum oni marŝis laŭ grandegaj riveroj, oni povis postvenigi la provizojn per flosoj. Sed la helvetoj forlasis la riverojn kaj Cezaro devas ilin postsekvi. Kaj la eduoj mem, alvokinte la helpon de Romo, nun, kiam ĝi venis, kondutas strange, malvarme kaj fremde. La promesitaj grentransportoj ne okazas, la urĝado de Cezaro renkontas konfuzajn senkulpiĝojn, falsajn pretekstojn: ŝajne eklaboris ies mano, malhelpante sekrete ĉiujn liajn ordonojn.

Baldaŭ li ekkonas tiun ĉi manon: ĝi apartenas al Dumnorikso, la frato de Diviciako; al tiu riĉa, juna princo el la gento de la eduoj, kiu en la kavaleria batalo gvidis la eduan taĉmenton; al tiu sama, kiu, verŝajne,

ne ĉesas perfidi al la malamiko la planojn kaj intencojn de Cezaro. Ankoraŭ ne estas eble al Cezaro lin manfrapi, ankoraŭ li havas multajn motivojn por lin indulgi, sed malgraŭ tio li okulvige lin observas.

Fine, lacega pro tiu senĉesa interludado, li turniĝas al la proksima urbo Bibrakto, unu el la plej grandaj grenejoj de Gallio; antaŭ ĉio oni devas renoviigi la militistaron, kiu dume ŝvelis ĝis ses legioj. La malamikon, treege malrapide forŝoviĝantan, li baldaŭ reatingos.

Sed la helvetoj erare komprenas lian intencon: ili opinias retiriĝo tion, kio estas nur necesajo. Laŭ tio ili decidiĝas: apenaŭ la kolonoj de Cezaro fordirektiĝas, la helvetoj komencas ataki.

Arda somera antaŭtagmezo. La malbone proviantitaj, marŝlacegaj trupoj, estas en tre malbona stato. Tial malagrabla surprizas la sciigoj, ke la hezitaj postgardiaj interataketoj ŝanĝiĝas en furiozan batalon. Cezaro apenaŭ sukcesas jeti la kavalerion inter la atakantojn kaj proprajn trupojn por bone batalvicigi manplenen de siaj legianoj.

Dekomence estis al li klare, kiom malbone li situas. Manko de tendaro postdorse — de la laŭkutima vespera fortikaĵo, donanta al la militistaro necesan ŝirmon — malfacila disgrupigo sur la plej proksima deklivo de la multmonteta grundo, la nespertaj trupoj sen memfido — jen la motivoj, pro kiuj li volus eviti la batalon.

Sed li ne povas elekti: se li nun elturniĝos, sen-signe pereos la multpena klopodado tra du jardekoj. Ĉion li devas riski en la ludo: tiun unuan bataalkampon li devas forlasi kiel venkinto aŭ — entute ne.

Salte li elseliĝas, mansvingas al la plej proksima

ĉevalisto por forkonduki la ĉevalon. Ja, ankaŭ grave: tiun unuan sian batalon li devas elbatali en la plej antaŭa vico; se li postulas sangon kaj vivon de la simpla militisto, li devas unue enmeti ankaŭ la siajn.

Li ĉirkaŭrigardas. Lia ĝismalsane ekzaltita sentemo tuj ekkaptas la spiriton de l' inertece, kiu regas la kolonojn de lia militistaro, dismetita kvazaŭ sur ŝaktabulo. Feliĉe, ke li povas plene fidi al siaj oficiroj, nuraj batalspertaj veteranoj. Kiel ferkrampoj ili kuntenas la batalvicojn: kaj ili staras; la vizaĝoj estas, vere, palaj kaj treege ekscititaj — sed la vicoj staras.

Oni devas doni al la homoj tiun impulson, kiu forgesigos al ili la ekscitiĝon de l' unua kunpuŝiĝo. Malrapide, colon post colo, li rektiĝas, profunde enspirante. Ŝajnas al li, ke liajn vejnojn trafaras duobla, abunda sangfluo. Kvazaŭ li sentus super sia kapo potencajn flugilojn, en la oreloj ekbruegas ia stranga, surdige tondranta melodio.

Sekundon li staras senmove, kun flamŝprucaj okuloj, gluitaj al la grandegaj amasoj da malamikoj kiuj ekruliĝis al li. Tiam subite lia rigida sinteno malaperas en abruptan, sovaĝan ekmoviĝon. Jam ekbrilas lia glavo kiel brilblindiga, eksaltanta serpento, lia hela, tondranta voĉo ektiras nerezisteble la tutan fronton:

»Hura kun mi!«

Kornosignaloj. Tumultaj kriegoj. Poste knarado, frakaso, diskraĵo: la batalantoj kunfrapiĝis.

Malleviĝis la nokto, varma julia nokto post la sunarda tago. Profunda silento, nur iam kaj tiam disheŝas la intervokoj de l' gardostarantoj. Flamlangoj de torĉoj flagras kontraŭ la ĉielon, lumigante scenojn de

doloro, ruiniĝo : kelkloke montetoj el kadavroj kun spasme fermitaj pugnoj kaj larĝe disŝtreĉitaj, vitroŝajnaj okuloj; korpoj, disŝiritaj en terurajn vundojn; stertorantaj, ĝemantaj, plorkriantaj vunditoj, kiuj jen lastforte rampas antaŭen, kvazaŭ kirasitaj gigantokankroj — jen senforte kuŝas sur la tero, petante akvogluton aŭ finofaran pikon; arde brulantaj ruboj de veturilo-barikadoj, kiujn oni kuratake konkeris en la lasta, malespera batalo kaj poste frakasis, bruligis; amasoj da militkaptitoj, pliparte virinoj kaj infanoj, kiuj en rigida trankvilo submetiĝis al la sorto.

Cezaro kun Labieno kaj Publio, la dua filo de sia amiko Krasso, faras la lastan ĉirkaŭiron: preter amikoj kaj malamikoj, kies vundoj estas jen bandaĝitaj, jen nudaj; preter vivantoj kaj mortintoj. Kelkfoje li kliniĝas super iu el la gigantaj korpoj kuŝantaj kvazaŭdorme sur la verda, fruktodona kampo. Poste li denove rektiĝas.

»Eĉ ne unu el ili havas vundon en la dorso,« li diras profunde serioze. Labieno ne respondas, li kokete kaj sinflata, balanciĝas el la koksoj, dum ĉirkaŭ la delikate ĉizita, volupta buŝo trajtetas krueleco. Ŝajnas, ke li trinkis el tiu ĉi sango, kiu hodiaŭ rivere fluis. Publio Krasso elmurmuras ion similan al »ja, diabla laboro.«

»Jes, diabla laboro,« kapjesas Cezaro. »Dum iom da tempo la afero statis tre malbone.«

Labieno malfermas la belan, ruĝan, ebrian buŝon.

»Sen mia turnomanovro la batalo estus perdita,« li diras kun triumfa rideto al sia militestro.

Tiu ĉi redonas al li la rigardon. Malgraŭ la mallumo li rimarkas malican ekbrilon en la verdaj okuloj de

l' kontraŭstaranto. Lupaj okuloj estas tio, li pensas kontraŭvole.

»Mi ŝuldas al vi grandan dankon, ho Labieno,« li konfirmas trankvile. »Jes, tre grandan. Vere mi intencis ion alian: la centro jam cedis kaj mi esperis, ke mi ĝin trarompos antaŭ ol oni eksentos la turnomanovron. Nu, estus okazinta ĝuste la sama afero, nur iom pli maldekstre.«

Kun sinflata rideto aŭskultas Labieno.

»Vi ne estus trarompinta,« li spitas. »Vi preparis vin por atako, ĝuste kiam iliaj rezervotrupoj alvenis.«

»Ni nun ne disputu pri tio ĉi,« diras Cezaro pacige. »Via merito estas nepridubbla.«

»Kaj krome,« daŭrigas Labieno siajn pensojn malgraŭ la takta averto de Cezaro, »ĉe la veturil-barikado ni devus batali kontraŭ du trionoj de la malamika forto.«

»Ni nun ne disputu pri tio ĉi,« diras Cezaro refoje, sed nun jam pli energie. »Postfare facile saĝumi!« Sur lia frunto elsaltas tiu vertikala sulko. Li turniĝas — iom urĝeme — al la juna Krasso.

»Publio, anoncu en la tendaro, ke la tagordono estos publikigata je la deka horo.« Silente li postrigardas la foriranton, poste turniĝas al sia vicestro, dirante malvarme kaj sinrege:

»Labieno, mi ripetas: via ideo estis bona — kaj antaŭ ĉio sukcesodona; tamen mi vin tre petas, estonte restu ĉe miaj ordonoj kaj nur en la plej ekstrema neceso apliku viajn proprajn arbitraĵojn. Ordo, ja povas regi nur, se unu komandas. Nu, tie ĉi mi estas tiu.«

La bela virvizaĝo apud li disformiĝas en naŭzan grimacon.

»Cezaro —«

Sed tiu ĉi ankoraŭ ne finis.

»Same tiel mi petas vin,« li daŭrigas eĉ pli malvarme, »ne disputu kun mi antaŭ la subuloj. Mi ne toleras, ke oni kritiku miajn komandojn. Ne estas mia kutimo pozi la estron, sed tial mi postulas de miaj paglaboristoj — « li tradentas la malmolan vorton — »ion, kion oni ja povus supozi ĉe ĉiu bone edukita homo: takton!«

»Cezaro —« rekomencas Labieno.

»Finite por mi!« Li jam kliniĝas super legianon, kiu vane provas sin levi. Cezaro sukcesas lin starigi kaj, subtenante kun singardo, li gvidas la legianon paŝpaŝe al la tendaro.

Senvorte ili iras la vojreston. Cezaro sentas, ke senhelpa kolero kaj ofendita vantemo naŭze kunbuliĝis kaj ke Labieno nun malfacile tion glutas.

Glutu ja, li pensas kaj atentis, kien surpaŝi por eviti malglataĵojn. Estas pli bone tuj, ĉekomence, montri al vi, kiu estas la estro. Alie, kiam vi al kutimiĝus kaprici, duoble dolore vi eksentus la bridon. Eĉ dankema vi estos al mi. Kaj aŭskultante la piedbatojn de la akompananto, li mallaŭte ridetas sub sian mantelon.

## Kaptilo

La granda galla landkunveno estas kunvokita. Eksterordinare rapide oni elektis la delegitojn. Preskaŭ el ĉiuj distriktoj de la meza Gallio alrapidis princoj kaj dukoj de diversaj gentoj. Multjaraj amikoj kaj malamikoj sidas nun konkorde unuj apud la aliaj — en la komunaj landkunvenoj regas severa interpaco — kaj kune interkonsiliĝas.

Al Cezaro, kiu ĉeestas la kunvenon kiel honor-gasto, Diviciako montras la plej famajn gvidantojn. La *eduoj* sub sia duko Lisko, la ofickolego de Diviciako («Tute tiel, kiel ĉe vi la konsuloj», li diras kun evidenta fiero,) plenumas devon de la dommastroj. Ili akceptas gastojn, difinas al ili sidlokojn, zorgas, ke manku nek manĝaĵoj nek trinkaĵoj. La honorlokon ili cedis al la *aŭlerka* princo Kamulogeno, kies vortoj kaj opinioj sendube ĝuas la plej altan estimon. Apud li sidas *trevera* duko Akko, larĝa, barela, kaj atente aŭskultas la paroladojn por ilin primediti post sia malalta, sulko-krispa frunto. Ĉe lia flanko estas Cingetorikso kaj Indutiomaro, la unua altstatura, iom degenera kun laca, kruela trajto en la pala vizaĝo, la dua malgrasa, muskola, senskrupule energia. Al ili aliĝis Kommio, la reĝo de l' *atrebatoj*; li estas altkreska kun kuraĝa profilo de rabobirdo. La *eburona* duko Ambiorikso — la sola, kiu

venis el la norda Gallio — ŝovas sian nazon ĉier, montrante sian ruĝan mustelvizagoŝon; jen li interparolas kelkajn vortojn kun la *arverna* princo Verkassivelaŭno, jen kun la *senona* Moritasgo; jen li aliĝas al la delegitaro, aliranta Cezaron por gratuli pri la venko super la helvetoj, jen malaperas senbrue. Dumnorikso, la frato de Diviciako, promenvagas kaj senzorge salutante, li eĉ ne penas kaŝi la kontraŭromian antipation. Kiel li, faras ankaŭ liaj akompanatoj — Diviciako ilin nomas: Eporedikso, Koto, Kavarillo, Litaviko kaj ĝemante li aldonas, ke, bedaŭrinde, lia frato veneninfluas ĝuste la junularon (kaŝa palpebrumo de Cezaro al Hircio kaj la nomoj estas tuj grifelataj sur la nottabuleton). Goban-nicio, la duko de l' arvernoj, venante por salutriversenci, puŝas antaŭ sin proksimume dekkvinjaran junulon, kiu per siaj ardegaj okuloj preskaŭ manĝas la romian militestron («Mia nevo Vercingetorikso,» elbalbutas la duko la vortojn, kiujn li evidente kun granda peno elparkeris). Tujsekve aliras multe, multe da aliaj, kies nomojn Cezaro tuj forgesas.

Kun intereso, al kiu miksiĝas indiferento, observas Cezaro la kunvenon. Dum tiuj kvar monatoj, kiujn li pasigis sur la galla tero, ĝisfunde ŝanĝiĝis lia juĝo pri la lando kaj ĝiaj loĝantoj: anstataŭ veni — kiel li esperis — en arbardezerton, loĝatan de duonsovaĝuloj, li trovis koloniitan plugkamparon, riĉan vojreton, urbojn kaj vilaĝojn, komercon kaj industrion; li trovis loĝantaron, kies almenaŭ pli altaj klasoj scipovas legi kaj skribi — resume: originalan kaj konsiderinde altan kulturon.

Kiam li eĉ nur ekpensas, ke ĝuste li estas tiu, kiu devas meti sur tiun landon la konkeran plandon kaj forrabi ĝian originalecon, ĝian animon, li eksentas ion



kiel sinriproĉon. Sed li tuj ĝin venkas: se ne lia plando konkeros tiun landon, faros tion multe pli peza, la germana, detruante ne nur la originalecon de Gallio, sed ankaŭ ĝian kulturon.

Cu oni divenas liajn intencojn, liajn planojn? Oni traktas lin plej respekte, oni afablas lin tiom, ke tio ŝajnas tro servistaĉa, oni komplezas lin tiom, ke ĝi estas vera servuteco. Sed tamen li klare sentas, ke ĉe la plimulto subrestas io kion oni zorgeme kaŝas antaŭ li, ke ekzistas muro, post kiu pasas al li nekonataj okazaĵoj. Escepto estas nur Diviciako: ne pasas eĉ unu horo sen elmonro de lia plena sindono kaj bombasta panegirado pri la »patro de l' galla libereco.« Sed, se io ajn povus vekti la singardemon de Cezaro, tio estas tiu videbla sindeteno, kun kiu la ceteraj gallaj ĉefoj akceptas tiujn kaj similajn vortojn. Li havas la senton, kvazaŭ li starus en ĉambro tegita per pezaj velurkurtenoj: ili estas molaj, cedemaj sub manpuŝo, sed nenia voĉo penetras el-ekstere internen, nenia elinterne eksteren.

La landkunveno finiĝis. Post la solena fermokunsido la pliparto de la princoj forvojaĝas kun sia sekvantaro. Restas nur malgranda grupo. Kaj ĝi anoncas sin ĉe Cezaro por la adiaŭa aŭdienco.

Kaj li estas eĉ malpli konfidema ol ĝis nun: la malamikaj rigardoj de Dumnorikso, la necedema muteco de Akko, la aplomba sintenado de Indutiomaro — estas al li pli agrablaj ol tiu oleoglata komplezemo, pensiganta pri serpento ĉirkaŭlekanta sian viktimon. Tial li aliras la gallajn aristokratojn ŝajne trankvila kaj afabla, sed fakte nervoza kaj mishumora. Krome, li ne estas satdorma: la lastajn noktojn li traviglis super la geografiaj karto, tabeloj, kurier- kaj spion-informoj.

La komenco de l' aŭdienco estas plene konforma al la oficiala kutimo: oni dankas Cezaron pro la servoj faritaj al Gallio kaj pro lia vizito al la landkunveno. Tiam oni aldonas varmajn bondezirojn por la estonteco — responde li esprimas esperon pri la bonaj reciprokaj rilatoj ankaŭ plue. Per tio ŝajnas ĉio finita kaj li atendas la komencon de la enuigaj adiaŭaj formalajoj.

Subite okazas io neatendebla: ĉiuj ĉi altaj, riĉbarbaj, viroj eklamentas braketende al li: kelkaj eĉ genufalias kun esploro.

Mirigite Cezaro informiĝas ĉe sia konstanta interpretisto Procillo, kion ĉio ĉi signifas. Tiu ĉi respondas, ke ili helpopetegas kaj, se li ne volas, aŭ ne povas helpi, li almenaŭ pridiskretu la deciditajn paŝojn, ĉar alie atendos ilin terurega vivofino.

Konsternite Cezaro esploras plue kaj — pro insisto — ekscias la kaŭzon de ilia ĉagreno: la germana estremo malesperigas ilin. Iu el la gallaj gentoj, luk-tintaj por la supereco, vokis en la landon la *sueban* ĉefon Ariovisto. Tiu ĉi nun firme ensidiĝis, venigante post si el la patrujo la junularon. Per sia germana ferpugno li ĉirkaŭkrampas la kolon de l' keltoj, ke ili nun ne plu povas spiri.

Malgraŭ la plej preciza kono de la afero, tiel eks-cite prezentita, Cezaro opinias, ke estas oportune ŝajnigi plenan nescion. Mirigite li sin turnas al Procillo:

»Nu, kion mi faru en tio ĉi?«

Post la vortoj, interpretitaj de la junulo, refoje disekplodas la lamentado de la gallaj nobeloj. Dum ili denove humilas braketende, Cezaro rigardas iliajn tremantajn lipojn kaj larmajn okulojn.

La tuta sceno ŝajnas al li naŭza: li ne toleras plorantajn kaj lamentemajn virojn. Li rememoras pri la

tagoj, pasigitaj sur Rodo, kiam li kaj liaj samlandanoj, ankaŭ en la oratora kurso ĉe Milono, primokadis la virinmolajn grekojn, kies okuloj larmemis pro ia ajn bagatelo. Kio jam tiam ŝajnis al li malestiminda — estas al li ĉe tiuj sunbrunaj gigantoj duoble naŭza.

»Ili diras,« rekomencas Procillo, »ke nur vi sola povas ilin helpi: post via brila venko super la helvetoj, Ariovisto ne kuraĝus provoki vian koleron. Ili petas, ke vi mem peru ĉe li — kaj se tio ne sukcesos, ke vi ŝirmu ilin.

Dum la interpretado Cezaro observas la vizaĝojn de la gallaj ĉefoj. Nuraj ĉagrenoplenaj, petegaj vizaĝoj, grimacantaj zorgojn kaj malesperon, baniĝantaj en abunde verŝataj larmoj.

Ĉu ĉio ĉi estas sincera? Nur de kelkaj monatoj li konas tiun riĉsange temperamentan popolon, sed ŝajnas al li, ke tiuj ĉi timo kaj doloro estas ruze ŝajnigataj. Onidire ili estas majstroj en aktorado, lertaj en ĉiaj artifikoj, kiam ili ne povas rekte kaj senkaŝe atingi la celon.

Kaj subite li ekkomprenas, ja, travidas la komedion, kiun ili ludas al li, li ekkonas la insidon en la larmovualaj okuloj, malican streĉon ĉirkaŭ la disgrimaciĝintaj buŝoj: ili flarkaptis ion pri liaj planoj kaj nun volas — incitante lin kontraŭ la germanoj — mortigi du muŝojn per unu sama bato: la batalo estos certe terurega, kaj poste kontraŭ la elĉerpita *Pirho*-venkinto sufiĉos la gallaj militvokitoj.

Sovaĝa ridego, apenaŭ subpremebla, kaptas Cezaron. Se tiuj ruzeguloj povus eĉ nur konjekti, kiel ili apogas lin kaj, volante lin subfosi, akcelas liajn planojn. Nu bone, vulpo ruzu kontraŭ vulpo! Li priservos ilin laŭ iliaj propraj deziroj.

Ereton post ereto li kunmetas la pensoĉenon. Antaŭ ol Procillo ĉesis parolis, li jam pretigis sian planon.

Eĉ dum momento ne perdas lia vizaĝo la mienon de bonvolemo. Nun li respondas al la peto de la gallaj nobeloj:

»Diru al ili, ke ili ne malesperu: mi klopodos por ilia afero. Multe mi favorajis Arioviston, kaj, krome, li konas mian potencon. Certe mi sukcesos instigi lin al cedemo.«

Humilaj riverencoj, bruaj dank-esprimoj. En ĉiuj okuloj videbla kontentiĝo, kaŝata triumfo. Malrapide, dorsire ili forlasas la ejon.

La vizaĝo de Cezaro streĉiĝas, la okuloj ekbrulas. La oficiroj de lia stabo preskaŭ ektimiĝas, rigardante tiun bronzan vizaĝon, tiun maskon de l' bataldio. Lia rigardo jam ĉirkaŭkuras ĉiujn vicgvidantojn kaj ŝajnas, ke al ĉiu el ili saltas brulfajrero mezen en la koron.

»Tuj ni ekmarŝos,« li diras per seka voĉo, draste kontrastanta al lia flampasia mieno. «Ek al Vesoncio! Postmorgaŭ ĝi devas esti en niaj manoj: nu, ĝi estas la ŝlosilo de Gallio.»

## Turniĝo de l' Sorto

»La eskorto pretas.«

Cezaro formetas la skribkaneton kaj leviĝas. Liaj okuloj estas ankoraŭ ĉiam fiksitaj sur la folieto de la papiruso; nun ili forŝiriĝas, sinkroĉante al Hircio.

»Jes,« li kapklinas. »Jen mi tuj.« Ĉirkaŭvolvante la mantelon, li ĝin bukofermas. »Ne, la kaskon ne,« li forpuŝas la manon de sia adjutanto. »La batalo ne okazos — devas ne okazi.« Malrapide li forlasas la tendon. »Kioma horo?«

»Eĉ ne la tria.«

»Do, ni havas sufiĉan tempon.« Lian rigardon subite eksaturas laceco.

»Ho Hircio,« li diras, »mi iras sur malfacilegan vojon.«

»Cezaro — ?«

»Jes.« Refoje li kapklinas. Akcente. »Tiu Ario-visto estas neordinara homo kaj mi bedaŭras, ke ĝuste mi devas esti lia malamiko.«

»Cezaro — ?« kreskas zorgemo en la demando de Hircio.

»Mi ellernis, kion signifas batalo.« Ŝajnas, ke Cezaro parolas al si mem. »Mia tuta vivo estas nenio alia ol batalo. Sed tiu ĉi sovaĝulo estas ne malpli kapabla ol iu ajn mia kontraŭulo. Nur antaŭ tri jaroj mi

kontraktis kun Ariovisto amikecon, kiun li tu'e ne difektis per la anekso de l' norda Gallio: mi mem, kiel konsulo de Romo, metis mian subskribon sur tiun ĉi dokumenton. Nun vane mi klopodas senkulpi mi-an atakon, kiun ne li provokis. Anstataŭ abrupte rifuzi miajn pridubindajn postulojn, li deklaris sin preta intertrakti, li mem proponis la lokon kaj horon de la interparolo. Kaj se li min demandos, laŭ kia rajto mi estas tie ĉi: kion mi respondu al li? Ĉu vi povas tion diri al mi?»

»Laŭ la rajto de l' konkerinto,« emfazas Hircio.

Pala rideto transflugas la zorgoplenan mienon.

»Hircio,« li diras sufokate, kun mano sur la ŝultro de sia adjutanto, « unufoje por ĉiam: mi abomenas bombastojn. Vi estas juna kaj tial vi revemas. Konkeri — jes, tion oni faras, sed pri tio oni ne parolas. Mi ne estas ja galla kavaliro, kies sola celo estas aventuroj: mia tasko estas amare serioza — kaj amare sobra: la ŝirmo de Romo kontraŭ atakoj de pli juna kaj pli forta kontraŭulo. Se mi nun ne forpuŝos Arioviston post la Rejnjon, li forpuŝos min post la Padon — eble eĉ post la Tiberon. « Denove malforta rideto. » Ĉu eble al li tion diri?«

Hircio ne respondas. Li staras antaŭ Cezaro, profunde klininte la junulan kapon. Li ekkomprenas la ŝarĝon de l' respondeco, prepezanta sur la ŝultroj de lia komandanto.

Tiu ĉi parolas plue — kaj denove ŝajnas, kvazaŭ li parolus al si mem:

»Kaj Ariovisto estas ne nur saĝa: li estas ankaŭ kuraĝa — tiel senkondiĉe kuraĝa, ke neniu vera viro povus rifuzi al li sian admiron. Nur malofte mi trovis tion en Romo, kaj se jes, nur ligite kun mens-malriĉo,

kiel ĉe Katono. Ankaŭ honesta estas Ariovisto li ple-  
numas la kontraktojn eĉ nun kvankam jam delonge mi  
ilin rompis. Kie en Romo ni trovos al li similan? Ho  
kiel domaĝe, ke mi devas kontraŭ li batali, kaj ke ni ne  
povas stari ŝultro ĉe ŝultro!«

Rapidpaŝe li transversas la *pretorion*. Mallaŭte  
tintas ĉe ĉiu paŝo la bronzpecoj sur lia kiraso.

Subite li haltas proksime al la eskorto.

»Nu, tio estas galloj?« li demandas malkontente.  
»Kial do?«

Hircio mansvingas senkulpiĝon.

»Ni ne havas romian kavalerion kaj tial —«

Kapbalanco de Cezaro tranĉas lian vorton. Liaj  
grizaj, brilaj okuloj kaptis unu rigardon de la eskorto-  
gvidanto: Dumnorikso rigardas de sur la danca, pur-  
sanga ĉevalo kaj lia tuta mieno, apenaŭ kaŝante mal-  
amon, anoncas baldaŭan triumfon.

»Plene malfidindaj,« diras Cezaro, tute nezorg-  
ante, ke la laŭte diritaj vortoj sonoras tra la tuta pla-  
co. »Se al Ariovisto venus ideo min kapti, mi estus  
perdita.« Li ĝuas la ŝanĝon en la mieno de Dumnorikso  
kaj daŭrigas ĉirkaŭrigarde: »Kie la deka-anoj?«

»Jen,« sonoras el muro de vicigitaj trupoj.

»Kiu scipovas rajdi? Volontuloj antaŭen!«

Dek, dekdu, dekkvar knaboj elkubutas sin antaŭ  
la fronton kaj haltas vicorde antaŭ Cezaro.

»La kavaliroj de Cezaro,« ekridetas tiu ĉi. »Sed  
mi bezonas pli. — Kiu scipovas entute trakti ĉeval-  
ojn? Kiu kondukis ilin al banoj?«

Ekviviĝas la tuta amaso: preskaŭ ĉiuj estas filoj  
de vilaĝanoj kaj de infanaĝo ili kutimas prizorgi ĉe-  
valojn. Jam la tuta legio ekmoviĝis antaŭen.

»Hej haltu! Haltu do!« Ride rifuzas ilin Cezaro:

la fervoro de liaj homoj redonis al li la bonhumoron. »Jam sufiĉe — ja, eĉ tro! — La galloj for de l' seloj! Sed tuj!« Li alordonas sian blankan ĉevalon, svingsaltas en la selon kaj observas la interŝanĝon, fulmorapide plenumatan kun ridoj kaj bruoj. Apenaŭ forpasis unu minuto kaj trans la ĉevalkapoj jam alridas lin — anstataŭ la malserenaj gallaj — kvindek freŝaj, transpadianaj vizaĝoj. Kontente li kapklinas. »Kaj nun ek!« li turniĝas kaj tra la ĉefstrato ekrajdas al la antaŭpordego.

Sed ekstere, sur la ebenaĵo, denove malaperas lia bonhumoro, cedante al la antaŭa korpremateco. Unuafoje en la vivo lia animo eksentas ŝanceliĝon: ĉio, kion li ĝis nun faris, ŝajnis al li tiom nature necesa kaj konsekvenca, ke li entute ne cerbumis pri la praveco de siaj agoj. Eĉ kiam li invadis la liberan Gallion, li sentis sin nur plenumanto de tasko: konstrui fortikaĵon, sub kies ŝirmo la kulturo de Romo atingos sian plej altan disfloriĝon; nun, en tiu ĉi fatala momento, ŝajnas al li la tasko ne tiom facile pravigebla: li supozas iaajn apartajn fortojn kontraŭ si, li sentas, ke — jen ĉi tie — preparas sin ia popolo, neelĉerpita kaj potenca, por plenumi sian historian mision. Ĉu li rajtas tion malhelpi? Ĉu li ne faros grandan maljuston, plenumante agon, kies efiko estas neprijuĝebla ĉar ĝi penetros sennombrajn generaciojn? Ĉu li staras en la ĝusta loko, ĉu li helpas elkonstrui la gigantan ponton, por kies kolono li estas antaŭdestinita?

Demandoj, nur demandoj, ĝisfunde lin konfuzantaj. Sed ili gutas en la malplenon, nenia respondo eĉas resone: li mem devas eltrovi sian vojon, tiun dekstran aŭ eble la malan? Tute rompita en la animo, lacega, li klopodas reveni al la elharditaj principoj.



*Romano* vi estas, li diras al si mem, kaj tial kapabla pensi kaj agi nur kiel romano. Via lando devas esti al vi super ĉio. Bona estas, nur tio, kio al Romo utilas, malbona, kio al Romo malutilas. Ne temas nun pri vanta gloro, ne pri nura larĝigo de l' imperiaj limoj, temas ja pri la sekurigo de l' Rom-ekzisto. Neŝanceleble vi devas havi tiun celon antaŭ la okuloj, tutforte al ĝi klopodi. Kiom koncernas vin, kiel la vojo pasas, se vi ja trovos ĝian finon?

Tiu ĉi penso iom lin edifas. Pli libere li rigardas antaŭ sin. En li ekburgonas mallaŭte espero, ke tamen estos eble interkonsenti kun Ariovisto, ke lia mano ne devos kunbuliĝi en frapagan pugnon, ke ĝi povos amike ripozi en la mano de tiu alia. Se li sukcesus konverti la germanojn en amikojn, enplektante ilin en la kultur-cirkon, kies perfektigo ŝajnas al li la lasta celo de la tuta mondokazado —?

Li decidas esti cedema en siaj postuloj, provi interakordon: Ariovisto retenu sian parton de Galio, same kiel li mem retenis la sian. Fadenoj ŝpiniĝos de homo al homo, de popolo al popolo. Li devos sin defendi nur, ke la torento de l' juna popolo ne tro forte disŝvelu kaj fine trarompu la digojn: jen, tio estas akordigo de l' kontraŭaĵoj, kiun li devas serĉi. Kaj, se foje li trovos ĝin, estas nenio, kio povus mal-amikige diskajni ilin du.

Monteto, al kiu li rajdas, leviĝas alte el la ebenajo kaj estas jam proksime. Eltiriĝinte el siaj profundaj pensoj, Cezaro rimarkas la deklivon, kiu jam ekkutis sub la hufoj de lia ĉevalo. Rigarde li glitas laŭ la altaĵo kaj tie, supre, sur la pinto, elstaras ĉielen — potence kiel rajdista statuo — la senmova figuro de l' germana princo.

## La maldekstra vojo

»Kajo Cezaro al Marko Krasso saluton kaj sanon!  
Espereble vi estas plej bonfarta; mi jes.

Metante sur la paperon tiun ĉi tiom ofte kaj senpense skribatan frazon, mi ekkonscias, kiom malmulte mankis, ke ĝi estu mensogo. Malfacilajn tagojn mi travivis kaj estis multaj momentoj, kiam al mi ŝajnis, ke jam ĉio ruiniĝis.

La oficialan raporton vi aŭdos en la senata kunsido. Ne kredu al ĝi, ĉar ĝi plibeligas kaj kaŝvualas. La nuda vero donus al la kontraŭuloj motivojn por prepari al mi novajn malhelpojn. Kuŝas ja tiom da belo en la humaneco, kiam oni ĝin povas utiligi por politikaj celoj!

Ĉar vere: se en mia rilato kontraŭ la germanoj min gvidus falsa sentimentaleco, mi ne estus ĉi tie, kie mi hodiaŭ staras. Bone mi povas prezenti al mi, ke la sofismemaj juristoj nomos mian farmanieron nepardonbla, eĉ krimula. Prave aŭ malprave, egale ja: ne estis eble al mi elektadi kaj kiam mi ĉion ekkonsciis, mi simple faris tion, kio estis necesa, ne zorgante, kion iu ajn kaj iam ajn diros.

Mi ne volas tedi vin, prezentante la militajn operaciojn. Sufiĉu konstati, ke ili plenumiĝis pli ol kontentige, ke la granda germana invad-armeo plene pereis

en la torentoj de l' Rejno. Tiel por antaŭvidebla tempo Romo el tiu flanko timu nenian danĝeron. Ankaŭ en tio min helpis mia bona stelo de l' feliĉo kaj (mi estas ĝoja, ke mi povas tion diri al vi) la merito de via filo Publio. En krizega situacio — kiam la germanoj disbatitaj ĉe la dekstra ekstremo, furioze ekpemis ĉe la maldekstra, — li memdecide manovrante savis la situacion kaj kun ĝi, la venkon de l' tago.

Nu, pri tio, kiel mi jam diris, sufiĉas. Tiom pli, ke vin informos pri la detaloj, kiom plaĉos al vi, la forpermesitaj oficiroj kaj, antaŭ ĉio, alportonto de tiu ĉi letero, la filo de nia malnova amiko Kaburo. Ion pli gravan mi havas nun por komuniki al vi.

La diplomata kat-mus-ludo inter mi kaj Ariovisto, priskribita en miaj antaŭaj leteroj, rezultigis la interparolon, kiun mi nepre volis decidige fini. Tiel malsaĝa mi estis, ke mi venis tien kun la intenco: trovi, se eble, interkonsenton kaj iel ligi al ni la sovaĝulon. Tio estis molsenta humoro kaj hodiaŭ mi ĝojas, ke mi tiam ne cedis al ĝi: ĉar, se ni tiam estus interkonsentintaj, Gallio havus hodiaŭ du mastrojn — kaj morgaŭ eble nur unu, kiu estus ne mi. Tio iĝis al mi klara tuj post la unuaj vortoj de Ariovisto. Laŭ ili mi vidis, ke ĉe li entute ne povas temi pri ia cedemo. En tiu momento mi tuj decidis venkobati la kontraŭulon per ĉiaj rimedoj.

Ankaŭ alia cirkonstanco firmigis mian decidon. Ariovisto elbabilis pretertuŝe ion, kion li tuj pripentis. Nome ŝi diris ke la gvidantaj rondoj de Romo lin informis, ke mia morto (laŭvorte!) certigos al li ĝeneralan dankemon. Se ĝi ne estis elpensita fanfaraĵo — kion mi ne kredas — jen, ni havus plenaloran pruvon, ke certaj senatrondoj intime rilatas kun la malamikoj.

Laŭ mia sento, antaŭ ĉio, estas suspektindaj la grupoj ĉirkaŭ Cicerono kaj Katono, ĉar ĝuste ili regalas min per sia aparta malamo. Ĉiuokaze, mi petas vin, esploru la aferon.

Tuj kiam komenciĝis nia interparolado, ĝi jam perdis por mi sian tutan valoron. Nur tial mi ĝin pene plutenis, ĉar mia kontraŭulo perfekte kaj persiste sciopovis malhelpi malagrablan interrompon.

Bonŝance, la subita ŝtonbombardado, kiun komencis kontraŭ miaj homoj la malpac-soifa, jam senpacienca, eskorto de Ariovisto, donis al mi la deziratan kaŭzon por retiriĝi kiel profunde ofendita. Sed fakte mi ĝojegis en la animo: jen la motivo por la milito — kaj, kompreneble, mi plene uzis tiun ŝancon, energie rifuzante ĉiujn pliajn, kvankam seriozajn, proponojn por la intertraktoj.

Kiom profunde trafis Arioviston la disfumiĝo de liaj planoj, mi spertis laŭ la kruela traktado al niaj militkaptitaj perantoj. La filo de Kaburo, ankaŭ inter ili estis trifoje preskaŭ forbruligata kaj sekve de la korpaj kaj animaj suferoj, li tiom ruiniĝis, ke li devis esti forpermesata por iom longtempa resaniĝo. Ĉio ĉi, kion mi, kompreneble, tuj eksciis, instigis min al la plej energia sintenado kaj — ĉar fine la germanestro ekkonis la senutilon de siaj klopodoj — la batalo okazis.

Gian pason kaj sukceson mi jam resume prezentis. Kompreneble, ke la oferoj estas konformaj. Se mi ne estus nun en neprenebla fortikaĵo, iu ajn mezforta galla gento povus rapide fini pri mi kaj miaj homoj: tiom elĉerpitaj estas niaj fortoj. Kaj vere, tuj kiam la trupoj nur iom refresiĝos, ili iros de ĉi tie rekte en la kantonmentojn, kiujn mi igis fari en la

sama regiono, kiun reg-tenis. Ariovisto, en la lando de l' sekvanoj.

Tiel mi venas al la plej grava punkto de mia letero kaj mi petas vin, same ankaŭ Pompejon, dediĉu al ĝi la plej grandan atenton.

Per la du ĉi-someraj militiroj mi fakte fariĝis la mastro de Gallio, kiu mi intencas ankaŭ resti. Vesoncio, la ŝlosilo de l' lando, ne plu falos el miĝa mano. Plej longe post du jaroj, la tuta granda galla duoninsulo — ĝis la oceano — devas iĝi romia provinco. Kompreneble, ke ĝi kostos al mi pluajn malfacilegajn batalojn; sed mi eltenos. Nun super ĉio estas al mi necesa la dorsoŝirmo. Do, mi vin petas, ĉiel prizorgu antaŭ la senato aŭ, se tiu obstrukcos, antaŭ la popolkunveno, la postfaran sankcion de mia ĝisnuna agado, kaj ankaŭ, ke en la estonteco miaj manoj estu liberaj. Estas ja la lasta granda ŝanco, por ŝtopi la truegon en la nordokcidento — pri la sudoriento, la *partha*, oni poste parolos. Tiun ŝancon devas ne endanĝerigi la ĵaluzo de l' butikistaĉa spirito, kaŝiĝanta sub la tuta sentimentaleco de Katono kaj liaj kamaradoj. Se iu alia, antaŭ ol mi, estus plenuminta tiun taskon — mi estus kontenta, sed, ĉar ĝi eksarĝis min, mi intencas ĝin tiom ĝisfunde ellabori, ke miaj heredontoj ne plu devus ion fari. Feliciĉa mi estas, ke ĝuste via helpo ebligas al mi atingi tiun celon kaj, mi petas vin, ankaŭ plue min subtenu.

Ĉar mi ne volus tro malproksimiĝi de la ĵus konkeritaj regionoj, mi travintros en Transpadio. En la venonta printempo mi intencas, unue, penetri okcidenten ĝis la oceano kaj, poste, per du samtempaj operacioj pacigi la nordon kaj sudorienton. Se tio sukcesos — ni estos konstruintaj la digon, kiu ŝirmos Romon kontraŭ ĉiu danĝero. Do, adiaŭ!«

## La plej bravaj inter la bravaj

La dua printempo sur la galla tero.

Cezaro ĝin apenaŭ ĝisatendis; tuj kiam degelis la plej dika glacio super la riveroj kaj riveretoj, tuj kiam la unuaj printempaj floroj timeme elpuŝis la kapetojn, li forlasas Transpadion. Li transmarsŝas Alpoj, ankoraŭ kuŝantajn sub dika neĝo, kaj, antaŭ ol iu ajn supozus aperas li en Vesoncio. Tie li tuj ekalarmas la trupojn, ĝuintajn agrablan vivon en la porvintra kantonmento. Jam post ses tagoj kolektiĝis en la ĉefsidejo ĉiuj ses legioj kune kun la du novaj, kiujn Cezaro mem alkondukis.

La laste almarsŝantaj taĉmentoj ankoraŭ ne enviciĝis, tamen Cezaro jam komencas febran agadon. Kvazaŭ ventokirlo lin kaptus kaj tirus kun si. Li eĉ ne provas rezisti, disbrakante li sin ĵetas en la kirliĝon, por ke ĝi lin — kvazaŭ senkonscian — portu. La stimula kaj incita ritmo de lia laboro malebligas al la militistoj libere respiri kaj al li rekonsciigi: jam disfumiĝis ĉiuj duboj kaj hezitoj, kiuj en la pasinta jaro tiam malhelpis kaj paralizis lian agemon. Li ĵetis sin sur tiun landon, kiel rabobesto sin ĵetas sur sian viktimon.

Vere, li ne povis realigi sian originan planon:

senĉese kuriero post kuriero venadis en lian ĉefsidejon, informante ke en la libera pordo, kien malofte enpaŝis piedo de l' romia komercisto kaj neniam tiu de l' romia militisto, prepariĝas uragano por fulmofrakase detruu lian povon. La tieaj gentoj kontraktis interligon, ĉe kies pinto staras nerveoj, la plej bravaj inter la bravaj. Se li ne anticipos ilin, ondoj de l' alfujo inundos la malfortajn digojn, kiujn li ĵus ekkonstruis.

Cezaro, kutimante adaptiĝi al ĉia situacio, ne hezitas eĉ momenton. Estos tempo por konkero de la okcidento: »nun ek al la nordo!« jen lia devizo. Li komandas, ke oni levu la ok legiajn aglojn apud lia standardo, kaj ekrapidas el la sekura Vesoncio, kiun li konstruigis kiel romian ĉefarmilejon. Ardas liaj okuloj, en la koro jam disflamiĝis sovaĝa batalinstinkto. Ĝojkriante en la ekzaltiĝo, kiun sugestas lia volo, la trupoj sekvas nerve-dancan troton de lia ĉevalo, marŝante enen, en la koron de l' malamika lando.

Pene sin trabatas la legioj tra la vasta ebenaĵo, zigzage striata de la senlime longaj, netraireblaj dorn-arbetaroj. Marŝante malrapide, batalprete, ĉiam preparite, Cezaro sin ŝovas tra la marĉa lando al rivero Sabiso, kie kolektiĝis la malamikoj.

Tri marŝtagoj en la netraireblaj regionoj, en kiuj oni devas forlukti de la malafabla lando ĉiun paŝon. De la ĝisnunaj penegoj terure elturmentitaj trupoj elĉerpiĝis ĝis plena senfortiĝo. Grandega streĉiĝo, necedante eĉ momenton, ĝisfunde dismolidas iliajn nervojn. Mute kaj minace elstaras dekstre-maldekstre arbar-egoj, plenaj de fantomaj, misterdevenaj sonoj. Nenie videbla viva estaĵo: nur unu-dufoje pafistoj de l' avangardo rimarkas en malproksimo ion similan al homoj

— rajdistojn sur la malaltaj, hirtaj ĉevaloj, kiuj tuj retirigās en nepenetreblajn arbetaĵojn. Alie nenio-nenio. Estas ĝi marŝo tra l' ensorĉita regiono, stimulanta superstiĉemon per teruraĵoj. La militistoj serĉas konsolon kaj rekuraĝigon en la vizaĝoj de l' oficiroj; sed el tiuj vizaĝoj alrigardas ilin same konsternitaj mienoj, same sovaĝbrulaj okuloj, sopirantaj la kontraŭulon por jam ĉesigi tiun torturadon de l' necerto.

Fine, la trian tagon, venas informo de la antaŭen sendita rajdogvardieto, ke la rivero estas proksime. Tuj sekvan tagon la armeo ekmarŝas por meti ĉe la rivero firman tendaron. Tra vicoj de la superlaciaj militistoj trakuras profunda forspiro. La ses veteranaj legioj, formante kernoparton de la marŝkolono, ekrapidas por penetri ĝis la rivero kaj, atinginte, ili tuj ekfosas la ŝirmodigojn. Du-tri malamikaj rajdogvardietoj montriĝas aliaborde, sed tuj malaperas. Neniu zorgas pri ili: tio ja koncernas la kavalerion. Sed ankaŭ tiu ĉi faciligis al si la taskon: multaj elseliĝis kaj kondukas soifajn ĉevalojn por trinko, malstreĉinte selrimenojn kaj bridojn. Ankoraŭ nur du horojn kaj post la fortikaj digoj ekregos ĉiujn korojn la bona sento de l' sekureco.

Subite longtrena fajfo. Konfuziĝo sur la bordo de l' rivero, sur kiun jam alpluvis sagoj kaj pikstangoj. Timkrioj, dolorveoj de l' trafitoj; senespera interpuŝiĝo de l' panike teruritaj homoj. La transo de la rivero jam eknigris de la gigantaj, haroriĉaj korpegoj. Ili ekkuregas bord-malsupren; transvadas la malprofundan riveron; elsaltas ĉiflanken; sovaĝe alfuriozas la kavalerion, kiu en momento dispafiĝas ĉiudirekten; ekgrimpas la deklivon por ĵetegi sin sur la ĵus komentitan tendaron. Ĉio okazas nur dum kelkaj sekundoj.



Signaloj: Alarmo! Al-kune! Ĉiuj ellasis ŝpatojn kaj ŝovelilojn, ili jam kaptis ŝildojn. Neniu pensas pri surmeto de kasko, neniu pri serĉo de sia taĉmento: kie ajn oni vidas elstari flageton de kohorto, oni aliĝas, enviciĝas, senkomande ĵetas lancojn en la alruliĝantan amasaĉon, eltiras la glavojn — kaj oni estas jam — korpo kontraŭ korpo — ĉe l' sangsoife atakanta malamiko.

Cezaro, ĉiam preparita al embuskoj, restas sangmalvarma. Rapide, fulme, kuras liaj okuloj trans la trupoj.

La dek-anoj, ĉe kiuj li staras, tujege batalviciĝis apud li same la naŭ-anoj; ili lasas la senordan amasaĉon de l' malamikoj proksimiĝi ĝis paŝdistanco kaj nun, unusalte, ili ĵetegas sin sur la senspire stertorantajn atakantojn. Per nerezistebla kontraŭfrapo ili balaas la sovaĝulojn malantaŭen, kunbuliĝe ruliĝas kun ili deklivmalsupren, trans la riveron, sur la alian bordon kaj jam malaperas kun la kontraŭuloj en la arbaro.

Plue!

La dekunu-anoj kaj ok-anoj: ankaŭ ili forpuŝis la malamikojn en la kontraŭbato; la amaso sur la bordo ekhaltas, disŝutiĝas en konfuzega intersvarmo kaj baraktado. Sajne: malkovrita giganta formikejo.

Cezaro ne havas tempon por tion observi: li rimarkas ion alian, kio tuj lin plene okupas: la antaŭeniĝo de ambaŭ trupkolonoj subite formis truegon, tute malkovrante la fronton kaj flankojn de la tendaro. Tial la ses-anoj kaj dekdu-anoj, tie vicigitaj, venis en tre malfacilan situacion. Tion rimarkas ankaŭ la malamikoj kaj parto de l' atakantoj preparas sin por ilin rondĉirkaŭi; la kavalerio, kolektiĝinte denove, tuj dispafigas

en saĝperda paniko; sur la montetodorso interkrampiĝas disveturantaj trajnoĉaroj; vekriegoj, blasfemoj, helpovokoj — kaj super ĉio seninterrompe longtiraj gallaj signalfajfoj, ebria venkohurlo de l' sovaĝuloj. Antaŭ ol li ekkonscias, kiel li alvenis, jam Cezaro estas ĉe bulajo el legioj, kiuj malespere sin defendas sur manpeco da tero. Ilia situacio estas neeltenebla: la kvara kohorto de l' dekdu-anoj estas sen oficiroj, la flago forkaptita kaj la resto estas nur timtrema grupeto, ankoraŭ instinkte sin defendanta; ankaŭ ĉe la ceteraj kohortoj la centurionoj jam falis aŭ estas grave vunditaj; Bakulo, la plej altranga, kiun Cezaro jam delonge konas kaj estimas, pene sin apogas sur la ŝildon, kiun spasme tenas antaŭ li la dekstra mano; liaj kapo kaj flanelĉemizo sub la ledveŝto estas freŝe sangruĝaj; li apenaŭ sin tenas sur la piedoj, sed la dekstra mano regule donas martelajn kaj lertajn skermobatojn per la mallonga, larĝa glavo, kies brilon tute kovris sango. (Brave, maljuna heroo! pensas Cezaro.) Sed Bakulo estas preskaŭ sola, kiu ankoraŭ firme staras: sub furiozaj atakoj el tri flankoj la fronto ekŝanceliĝis; kelkaj batal-eviluloj en la postaj vicoj jam forsaltas, ekkuras — jen la katastrofo!

Ne! Cezaro saltas antaŭ iun el tiuj malbravululoj: »kanajlego!« forrabas de li la ŝildon, trapuŝas sin tra l' amaso: »Hura, knaboj, jen mi!« Li eksentas en si tian forton, ke li sola povus anstataŭi la disfalan-tan fronton — li, nur unu sola kontraŭ multegaj — kaj lia forto infektas la aliajn.

Ili vidas, ke la estro enhakas sin en amason da malamikoj, kaj blinde lin postsekvas. Tiu subita reatako ŝtopas ofensivon de la malamikoj; nur por momento: sed sufiĉe ja al Cezaro. Post sekundeto estas jam

aranĝitaj taĉmentaj interspacoj, ioma ordo restarigita. Fulma ordono alkurigis la sep-anojn, ili stariĝas dorsdorse kun la dekdu-anoj: kiam la malamikoj denove alfuriozas, renkontas ilin ĉiuflanke hirtpikila arbaro de l' etenditaj glavoj.

Kaj, kvazaŭ superaj potencoj estus atendintaj nur tiun sinhelpon de l' jamaj mortkondamnitaj, okazas miraklo: sur la montetodorso ekaperas ambaŭ rekrutlegioj kaj, preskaŭ samtempe kun ili, alkure ekatakas la dek-anoj, trans la rivero reen, dekliv-supren. Tio ĝis-ekstreme flamigas la kuraĝon de l' minacatoj: falintaj militistoj ŝanceliĝe leviĝas kaj krurrigide sin puŝas en la tumulton, etendante la glavon rekte antaŭen; senarmilaj ĉevalistoj saltĵetas sin sur la riĉarmilajn malamikojn; rajdistoj, kolektiĝintaj refoje, klopodas venĝisian kulpon kaj ŝajnas samtempi ĉie; post momento la situacio ŝanĝiĝas: la ĵus venke penetrantajn malamikojn oni premas en la mezon, rondĉirkaŭas, enfermas: kvin legioj kaj la tuta kavalerio faligas sin sur ilin.

Sed la kontraŭuloj ne cedas: vide al la neevitebla perejo ili, mort-ignore, rezistas kontraŭ la terura atakego. Iliaj unuaj vicoj falas; sed la postaj saltas sur la korpojn de l' falintoj, ĵetas lancojn kaj kaptitajn pikstangetojn en la atakantojn, defendas sin per la glavoj kaj, kiam ili rompiĝas, per la nudaj manoj, ungoj, dentoj.

Fine postrestas nur kelkaj: ili staras sur la kadavro-montetoj, elturante alten super la tumulto. Laŭ ordono de Cezaro alvokas gallaj interpretistoj por kapitulaco, garantianta al ili honoran kaptitecon. Nur nun malleviĝas iliaj brakoj, ili ĵetas for la glavojn kaj venas malsupren de l' altturaj kadavro-montetoj, ankoraŭ ĉiam, eĉ sen armiloj, teruraj kaj imponaj.

De iu el ili ekscias Cezaro, ke ili apartenis al la gento de l' nerveoj. Kortuŝite prenas la *prokonsulo* reston de tiu heroa gento sub sian personan protekton. Profunde li forspiras: li scias, ke post la venko super tiu ĉi gento, estas nenio, kio povus lin kontraŭstari: Gallio estas lia.

## Krasso

»Mia eta Cezaro —« kun videbla ĝojo elparolas Krasso la malnovan karesnomon, subbrakante samtempe la pli junan amikon — treege mi ĝojas vin revidi. Kiom longe ni ne renkontiĝis? Tri jarojn, ĉu?»

La mallarĝa, nur osta kaj vejna, mano de Cezaro kaptas la ŝvelkarnan urs-manegon, ripozantan sur lia antaŭbrako, kaj amike ĝin premas.

»Nu bele, aveto,« diras li kore. »Tri jarojn, jes. Ankaŭ mi tre ĝojas. Kaj kiel vi prosperas?»

La vizaĝo de l' bankiero, dum la lastaj jaroj eĉ pligrasiĝinta, tuj ekmienas profundajn zorgojn.

»Ne tiom bone, kiom vi,« ekĝemas li astme. »Minimume, vi estas via propra mastro, vi povas fari kaj entrepreni ĉion laŭplaĉe, neniuj ja vin riproĉos. Sed en Romo ĉio renversiĝis, Pompejo ne estas la homo, kiu povus bridigi la kanajlaron.«

»Mi scias,« kapjesas Cezaro. »Viaj komunikoj min pleje informis pri ĉio.«

»Vi estus informita,« elblovas Krasso, »se vi scius legi el sub la vortoj. Ne ĉiam mi povis skribi tion, kio estis en la koro.« Li haltas menton-elpuŝe kiel ĉiam en la ekscitiĝo. »Tra jaroj mi atendas la momenton,« orgenas lia profunda baso, »kiam mi povos malŝarĝi mian tutan koron.«

Refoje Cezaro premas la fortan manegon.

»Jen tiu momento,« li diras. »Malŝargû do.«

La mentono refalas sur la bruston. Krasso dronas en profundajn pensojn.

»Nu, mi ne scias, kiel komenci,« elmurmuras li. »Tio estas vere la *gordia* nodo, plena de interplektaĵoj, kiuj havas nek komencon nek finon.«

»He, ni imitu la ekzemplon de Aleksandro, la granda,« ekridetas Cezaro, »kaj energie ĝin kructranĉu. Ni do komencu: Pompejo, diris vi, ne kapablas por sia tasko.«

»Ne, vere ne,« amare rediras Krasso. »Li montris sin malkapabla ĝuste tiom, kiom oni povis atendi. — Nu, pripensu vi mem,« — li eltiras sian manon el tiu de Cezaro kaj metas ĝin sur lian ŝultron — »kiom ja povis atingi Pompejo en la situacio, kiun ni al li aranĝis! La senato ŝtonbuŝa; la popolkunveno partiiis kun ni; ĉiu dua persono estas unu el liaj veteranoj, nu ni diru: la nevidata armeo, ekmovebla per unu sola vorto!«

»Kaj kial li tion preterlasis?«

»Eh, ĉu mi scias?« mansvingas Krasso malestime. »Ĉar li perdis la kuraĝon! Ĉar li ne havis energion por konsekvence agi kaj dikti. Anstataŭ tio — Pompejo, la majesta, li, la laŭrita venkinto super la piratoj kaj Mitridato!« — mokeme li elbuŝigas tiujn vortojn — »interbatigis, gvidante amasaĉon da plebo, kontraŭ la bandaĉo de Klodio. — Kaj kio plej riproĉinda: li lasis, ke Klodio lin venku.«

»Jes,« kapjesas Cezaro. »Klodio tro ekpetolis.« »Ekpetolis?« kolerege ekkrias Krasso. »Li estas fakte impertinenta! Arogantega! La bubaĉo flatas al si esti malgranda Grakho kaj, se ni ankaŭ plue brakkruos,

li provos alkapti eĉ la diktatorecon. Kaj kio tiam sekvos, scias nur la dioj mem!«

Subtila rideto sur la lipoj de Cezaro.

»Klodio kroĉpendas sur fortika ŝnuro«, diras li trankvile, »kaj li ne entreprenos ion, kio povus iĝi al ni vere malagrable.«

Mirkonsternite alrigardas Krasso la tiom sinfidan homon.

»Sed li provokas eĉ kontraŭ vi mem!« li ekkrias »Li proklamas, ke ĉiuj viaj leĝoj estas kontraŭ la konstitucio, ĉar ili ne pasis la laŭordan vojon!«

»Mi scias, mi scias,« kapklinas Cezaro kun pli forta ekrideto. »Ankaŭ lin mi venigos en Lukon por sapumi alli la okulojn. Dume lin bridos la revokita Cicerono.«

»Cicerono!« Pli kaj pli flamiĝas Krasso. »Ankaŭ tio estis unu el la maltrafaj ŝakmovoj. Pro la senforteco de Pompejo la humilo de Cicerono degelis, kiel neĝo sub la printempa suno. Eĉ sole lia reveno estis vera triumfo kaj, de kiam li estas ĉi tie, la opozicio en la senato ĉiam plifortiĝas. Ili ĉiuj blovas la saman kornon. Ĉu vi scias, kio okazis en la lasta senatkunsido antaŭ mia foriro? Cicerono antaŭmetis la proponon, ke la disdivido de l' kampaniaj kampoj, aranĝita sub via konsuleco estu refoje metita en la tagordon.«

Cezaro iom brovsulkas. Sed tio estas sola videbla signo, ke li eltaksis la gravecon de tiu ĉi okazintaĵo. Alie lia vizaĝo restas trankvila, eĉ serena.

»Nu, ankaŭ Ciceronon mi venigos ĉi tien,« aldonas li flegme.

Krasso ne enaŭskultas: tiom forte lin okupas la zorgoj de l' koro.

»Kaj nun venas tio, kio estas plej malbona,« li

pluŝpinas la rompitan fadenon kaj senvole obtuzigas la voĉon. »La senatpartio ĉasas Pompejon en sian ret-on. Vi sendube havas malamikon, kiun vi ne konas kaj kiu agas pli sperte ol ĉiuj ĝis nun. Mi sentas — « li serĉas esprimon — «koncentrigo de l' malamikaj fortoj, organizatan reziston, kies influo ĉiutage pli kreskas. Katono, Bibulo, Domicio, Katulo kaj ilia tuta adeptaro laboras man-en-mane. Tiel estas eble nur, se oni havas firman, bone pripensitan planon. Ĉu vi konjektas, kie verŝajne kaŝiĝas risorto de tiu ĉi komploto?«

Cezaro konjektas; eĉ pli: li havas instinktan cert-econ. Sed li ne eldiras ĝin; silente li aŭskultas la daŭ-rigantan Krason:

»Se ankoraŭ vivus Junio Bruto, mi komencus tie serĉi; sed lia vidvino dediĉas sin nur al sia filo por eduki lin en la antikvajn romajn burĝvirtojn; al ŝi bon-vole kunhelpas Katono kaj liaj kamaradoj.« Li ne ri-markas malfortan paliĝon sur la vangoj de Cezaro, nek en la okuloj doloran kontentiĝon pro ekono de l' vero. Kiel iu, okupata nur de fiksa ideo, Krasso reven-as al komenco de l' ekparolo, al Pompejo, kies sup-renleviĝon kaj eksteran pompon lia ĵaluzemo ne povas pardoni. »Kaj Pompejo volonte glitas en la kaptilon. Do ne mirige, ke tiu senata kanajlaro sin tiom ŝvelb-lovis: li al ili tion tre faciligis.«

Nun Cezaro subbrakas Krason.

»Estu senzorga, ho Krasso,« diras li seke. »Ni denove ĉirkaŭtondos iliajn flugilojn.«

»Espereble ĝisradike,« orgenas Krasso. »En sia senbrideco ili tag-al-tage transpaŝas ĉiujn limojn. — Jen, antaŭ nelonge asertis iu maljunulinaĉo, ke ŝi rimarkis sur la ĉielo ian signon — kometon aŭ simile. Tio su-fiĉis, por ke la senato konfidu al du *etruskaj* astrologoj



la klarigadon; kaj tiuj ĉi, vere, donis la deziratan komenton. Laŭ ili tiu ĉi signo antaŭdiras nenion alian ol, ke al la respubliko minacas danĝeroj de iu ambicioga kuncivitano. Vi komprenas, ĉu?«

Cezaro sonore ekridas kaj forte premas al si la brakon de Krasso, en kiu li ankoraŭ pendas.

»Nu, elŝutu plene vian zorgosakon,« diras li ankoraŭ ĉiam ridante. »Mi ja vidas, ke krom tio ankaŭ io alia vin premas.«

La bankiero kapjesas, furioze blovlevante la suban lipon.

»Ĉu vi scias, kiuj kandidatas por la sekvontjara konsuleco? Katono kaj la plej intima amiko de Bibulo: Lucio Dimicio Ahenobarbo.«

Tuj forflugas rideto el la glaciiganta vizaĝo de Cezaro.

»Sensencaĵoj,« diras li tranĉe kaj krude. »La konsuloj por la sekvonta jaro nomiĝas: Krasso kaj Pompejo.«

## Luko

Malgranda provincurbeto subite ekbolis, ĝiaj loĝantoj ĝis nun vivantaj trankvile, neatentate — sentas sin umbiliko de l' mondo, dividata inter iliaj muroj. Ĉiu el ili imagas, ke li mem iel partoprenas en tiuj gravegaj interkonsiliĝoj kaj decidoj. Eĉ la plej naivaj mienas ĉirkaŭen kvazaŭ ili pridiskretus la plej grandajn ŝtatekretojn. Krom tio senĉese okazas io vidinda. Post iu simpla senatano oni nun ne kapreturnas: al tiaj oni tro alkutimiĝis, ĉar pli ol ducent anoj de tiu plej alta korporacio estas en la urbeto. Kaj inter ili ĉiuj, kies rango aŭ nomo iom valoras. Eĉ Cicerono mem, la ĝisnuna ĉefrolulo de l' opozicio, alvojaĝis en Lukon tuj, kiam li eksciis pri la kunveno de l' tri potenculoj. Nun li ne forlasas la lokon, kvankam li devas atendi en la antaŭĉambro kune kun sia ĝismorta malamiko Klodio.

Ĉiumomente preteriras, kun aplomba digno, iu alta ŝtatoficisto, antaŭ kiu tintas en vergofaskoj la liktoraj hakiloj; polvokovritaj kurieroj galopegas sur ŝaŭmaj ĉevaloj tra la pordegoj, saltas de sur la elĉerpitaj bestoj kaj krurrigide sin ĵetas en la urbodomon, kie okazas la interkonsiliĝoj; la aliaj elfalas eksteren, krikvokas pri siaj ĉevaloj kaj tuj forpafiĝas; taĉmentoj da blankaj, nigraj kaj flavaj lakeoj inerte kaj arogante

grupas sur la placo kaj stratoj; ili ekmoviĝas nur, kiam iu el la eskorto de Cezaro — unu el la dek-anoj — krude ilin ekinsultas aŭ puŝas flanken.

La urbon mastras la dek-anoj. Ili sin nomas: »la gvardio de Cezaro« aŭ »la cezaraj kavaliroj« (estas tiuj, al kiuj Cezaro sin konfidis por la kunveno kun Ariovisto). Kvindekopon da ili venigis Cezaro kun si; ĉiuj estas sunbrunaj, sentimaj knabegoj, kun blankebrilaj dentoj. Malgraŭ sia juneco ĉiuj estas jam dekoritaj kaj tre multaj el ili havas ĵus cikatriĝintajn vundojn. Vespere ili danĝerigas ĉiujn gastejojn, arogas al si ĉefan vorton en konversacioj, fanfaronas pri siaj heroaĵoj ĉe Bibrakto, en la Rejnovalo, apud la Sabiso. Iam-tiam ili ebriiĝas ĝisfunde, improvizante furiozan interbatiĝon kun ĵaluzaj burĝfiloj. Morgaŭ la centuriono per insultaj tondregoj freŝigas iliajn drinkozumajn kapojn. Sed vespere ili aperas denove, gajaj kaj facilanimaj, kaj se ne agrable, tamen gorgolarĝe, ili blekaĉas siajn ne ĉiam decajn militistajn kantojn; interpuŝiĝante kontraŭ la urbanojn ili kiatencas ĉiun knabinon, kiu troviĝas en la kaptodistanco.

En la antaŭĉambroj, en la oficejoj, senĉesa enirado-elirado, senĉesa zumado. Kiu havas deziron, peton aŭ pretendon devas pasi tra ĉi tie. Svarmoj da sklavoj skribistoj kaj sekretarioj travivas or-plenajn tagojn. Multaj manoj sekrete etendiĝas por akcepti tintetajn ormonerojn kaj malfermas la flankpordojn, lasante tragliti favoratojn. Kelkafoje aperas elĉerpita vizaĝo de Aŭlo Hircio, nervema sciencula kapo de Asinio Pollio, la statue bela Mamurro, pri kiu diskuras hontigaj famlaĉoj. Oni puŝiĝas ĉirkaŭ ili, sed ili gestrifuzas, Hircio senspire, Pollio glatĝentile, Mamurro kun sensenta aplombo: »Poste! Poste ja!«

En la plej interna, nealirebla, hermete fermita salono sidas tri potenculoj: Krasso, kies ŝvelgrasa korpo disfluas trans ĉiujn flankojn de la apogseĝo; Pompejo, kies senkarna, serioza vizaĝo refirmigis dum la intertraktoj; Cezaro, gracitalia kaj maldika, kun la senĝena sinteno, kiu tute ne supozigas pri lia ekstrema spiritstreĉo.

La intertraktoj proksimiĝas al la fino. La eksteraj atendantoj ne scias, kiom malfacile estis ofte likvidi kontraŭaĵojn kaj fine trovi la formulon, kiu ŝajnis al ambaŭ rivaloj, Krasso kaj Pompejo, akceptebla. Estis necesaj la tuta sagaco, la tuta energio — kaj la tuta pacienco de Cezaro por atingi la utilan celon, por alkonduki ambaŭ interbatalemajn virkokojn sur la samantan vojon, konforman al iliaj komunaj intereso.

Ili sidas ĉirkaŭ la grandaj tabloj, sendormaj, mortlacaj kaj tamen mensklaraj: nu, Cezaro ĝuste nun prepariĝas por refoje resumi la interkonsentojn. Antaŭ ili tri kuŝas elskrapitaj nottabuletoj, sur kiujn fiksiĝas iliaj okuloj; antaŭ Cezaro, krome, amaso da papirusoj, kiujn li iam-tiam kompare konsultas.

»Ni do interkonsentis,« li komencas klare, trankvile. »Vi ambaŭ transprenos konsulecon por la sekvonta jaro. Post fino de l' ofico Pompejo ricevos provincon Hispanion, Krasso provincon Sirion, ambaŭ kun ĉiuj administraj kaj militistaj rajtigoj. Rekrutigoj por necesaj trupoj komenciĝos tuj. La estreco de vi ambaŭ daŭros kvin jarojn ekde la finiĝo de l' konsuleco.« Krasso kaj Pompejo turnas la grifelon kaj per la malakraĵo glatigas kelkajn partojn en siaj vakstabuletoj. Cezaro per plumbopeco mallonge notas sur la papirusojn kaj poste daŭrigas:

»Ankaŭ mi retenos Gallion por kvin pluaj jaroj.

Vi garantias al mi laŭgradan pligrandigon de miaj legioj ĝis dek, same vi prenos sur vin rekrutigon, kiun mi arbitre ŝarĝis sur la ŝtatbuĝeton. Post forpaso de mia estreco mi prenos la konsulecon duafoje.« Komp-are li rerigardas de la nottabuleto en la papirusojn. Post tio li okullevas.

»Jen ĉio — ĉefkonture. Ĉu iu el vi havas krome iajn proponojn, dezirojn aŭ demandojn?«

»Klodio,« enĵetas Pompejo mishumore.

»Klodio estos kvieta,« respondas Cezaro. »Ĉar mi transaĉetis liajn ŝuldojn komplete, li estas plene en mia povo. Krome io?«

»Cicerono,« astme spirblovas Krasso.

Cezaro mallevas la kapon por kaŝi iom malestiman rideton: estas ja karakterize, ke ili ambaŭ volas aranĝi antaŭ ĉio la personajn aferojn.

»Ankaŭ Ciceronon mi katenis,« li rediras. »Cet-ere, lia frato iras en mia stabo en Gallion: tiamaniere ni ĉiuj estas sekuraj. — Plue?«

»La senato,« denove spiregas Krasso.

»La senaton oni traktu kiel kutime. Ĉiuj niaj proponoj estos laŭleĝe antaŭmetataj kaj kun helpo de la partianoj trapuŝitaj. Kie tio estos malebla, sekvu apelacio al la popolkunveno.«

»Ĝuste pri ĝi mi volis paroli,« elmurmuras Pom-pejo.

»La popolkunveno estos niaopinia. Oni ŝtopu la buŝegojn per malkara pano, la spiritojn oni nutru per pompaj festoj kaj teatraĵoj, kaj tiam vi povos atingi ĉe la plebo ĉion, kion ajn vi deziras.« Li ĉirkaŭrigardas.

»Finite?«

»Jes,« apopleksie ekgrakas Krasso.

»Jes,« rigide kapjesas Pompejo.

Cezaro side rerektiĝas, kunmetas la manojn kaj alrigardas ilin ambaŭ serioze, firme.

»Karaj amikoj,« li diras per strange emociita voĉo, »permesu nun al mi diri kelkajn vortojn. Dum la du lastaj tagoj ni povis konstati per niaj intertraktoj du aferojn: ke estas nenio pri kio ni ne povus konsenti, se ni nur malŝargas niajn korojn — kaj, ke ni interligiĝe estas nevenkeblaj. Ne forgesu tion, karaj amikoj, same kiel ankaŭ mi ne forgesos. Nian interligon ni kreis sur bazo de niaj interesoj, sed ĝi fariĝis io plia: la interligo de l' amikeco. Permesu al mi en tiu ĉi momento, kiam ni tri estas tamen nur unu, esprimi la deziron, ke por ĉiam tiel restos. Plej solene mi certigas, ke mi neniam entreprenos ion, kio povus al vi malutili, ke mi estas preta abnegacie plenumi ĉiun vian postulon. Akceptu tiun ĉi promeson, kaj redonu al mi sammaniere. Tiukaze ekzistos nenio, kio povus nin dividi, do nenio, kio povus rezisti nian volon. Disigite, ĉiu el ni estas nur puŝpilko aŭ ludilo de l' politikaj konstelacioj; konkorde ni estas mastroj de l' mondo kaj solaj liberuloj en la mondo. Nu, donu al mi la manojn kaj helpu al mi plenumi la taskon, destinitan al ni: elbatali liberecon al ĉiuj homoj, kiel ni ĝin jam elbatalis al ni.«

Profunde kortuŝite li etendas la manojn dekstren-maldekstren. Krasso unua kaptas: premegante la dekstran manon de Cezaro, li klopodas kaŝi sian emocion.

»Eta Cezaro! Mia eta Cezaro!« murmuris li senĉese kaj subite eksplodas en entuziasmon: »ĝis la morto mi estos fidela al vi! Vi ja mem tion scias!«

Cezaro redonas la premon, kiom estas eble al lia

mano, interpretata kvazaŭ per fera kuntenilo, tiam li turnas la rigardon maldekstren kaj demandas:

»Kaj vi, ho Pompejo?«

Malvarma, senenergia mano ekpremas la maldekstran de Cezaro.

»Estas ja tutkompreneble,« abruptas malhele vulalita voĉo.

Kvazaŭ io glacia, frostiga, trapinglus la dorson de Cezaro. Lia emocio jam malaperis. Malrapide altirinte la manojn, li diras priafereme:

»Do, ni subskribu nian kontrakton.« Lia fingro altuŝas la tamtamon. Enfalas Hircio, Cezaro, sinturne, etendas al li la plej supran folion el amaso da papirusoj, entenantaj la interkonsentojn en koncizaj, skizaj vortoj, simile kiel li ĵus resumis. »Tri kopiojn,« li diras mallonge. »Ni atendas.«

Rapide, kiel li venis, Hircio ankaŭ malaperas kun la malneto. Cezaro, profunde elspirante, turniĝas al siaj amikoj. Kaŝe li alrigardas unu — la alian. La koro lin tiras al Krasso, kiu ankoraŭ ne venkis sian kortuŝiĝon. Sed zorgoj pri la infano igas lin unue alvorti Pompejon — kiu ankoraŭ neniam ŝajnis al li tiel fremda, kiel nun!

»Kiel fartas Julia?« li demandas.

En la senkarnan vizaĝon, similan en sia rigido al praava masko, enfluas tuj la vivo. Kaj almenaŭ en tiu ĉi momento Cezaro ne bedaŭras, ke li donis al Pompejo sian plej grandan trezoron.

»Ne tiom bone, kiom mi deziras,« respondas kun hezita zorgema la edzo de Julia. »Jam kelkajn semajnojn ŝi denove suferas sian tusadon. Verŝajne mi forsendos ŝin al la sabinaj montoj.«

Timo eksufokas la gorgon de Cezaro. Nur por

momento. Tiam li venkas ĝin, certigante sin mem, ke la vortojn de Pompejo oni ne komprenu tro pezaj.

»Jes,« li kapklinas, »la printempa aero en Romo estas vera veneno. Tion kaŭzas la *pontinaj* marĉoj. Oni devus kanalizi la tutan regionon — he, kiom da fruktodona grundo ni ricevus.« La ĉiam vigla spirito, turniĝinte tuj for de l' personaj zorgoj, eklaboras. »Oni povus la kanalon trafosi ĝis la Teracino, reguligi rektangule al ĝi la malsupran Tiberon kaj konduki ĝin ĉirkaŭ Janikulo ĝis Ostio —«

»Jes, krome, ankaŭ malkonstrui Kapitolon kaj ĝin restarigi en Vesoncio,« zumas Krasso kun bonvola mokemo, aludante pri aparta amo de Cezaro al tiu galla fortikaĵo.

»Eh malnecese,« ridetas tiu ĉi. »En Vesoncion mi havas montfortikaĵon, al kiu Kapitulo estas tute nekomparebla.«

»Eble en Aŭgusto mi iros kun ŝi en Puteolion«, ĵetas Pompejo el la profundaj pensoj, tute ne partopreninte la konversacion.

Cezaro iĝas denove enzorga.

»Aŭ en Ariminon,« li proponas. »Kvankam ĝi ne estas laŭmoda kiel Puteolio, tamen la aero estas tie multe pli bona kaj ŝi ĝuos tie pli grandan trankvilon.«

»Ĉe Arimino,« enmiksiĝas fervore en la konversacion Krasso, »mi havas somerdomon. Se Julia ŝatos, ŝi povos ĝin uzdisponi.«

»Dankon,« malvarme rifuzas Pompejo. »Espereble ne estos necese, ke ni vin ĝenu. Cetere, la tuta afero ŝajne ne estas ankoraŭ tiom serioza.« Nun estas li, kiu certigas sin mem.

Cezaro lin alrigardas. La okuloj de ambaŭ pro-



funde interdronas, kaj ĉiu el ili legas en la rigardo de l' alia propran, sekretan zorgon, propran, sekretan timon. Krasso alrigardas unu — la alian sentante, ke prepariĝas io terura kaj fatala.

Eniro de Hircio rompas la turmentan silenton. Preskaŭ avide, ĉiu el ili kaptas al la tri identaj kopioj kaj komencas diligente legi.

Cezaro finas unua. Li sternas la folion sur tablon, prenas kanskribilon kaj rapidstreke subskribas unue sian ekzempleron kaj poste tiujn, kiujn senvorte ŝovas al li la aliaj du. Tiam li donas la skribilon al Pompejo.

## Ĉasfabelaĵoj en Germanio

*Bell. Gall. VI. 26—28.*

La peltokitelo estas hirta kaj tubereta. Hirta kaj tubereta estas barbo kaj hararo, kaj eĉ tiom, ke en tiu praarbo estas apenaŭ videblaj la ruĝa nazego kaj la ruze palpebrumaj okuloj.

Tra malfermaĵo de l' tendo montriĝas, kvazaŭ enkadre, montoriĉa riverpejzaĝo: profunde entrancitan valon, tra kies mezo la Rejno larĝe rulas siajn ondojn, krucstrekas flankvaletoj. Kurantajn ŝaŭmtorentojn gracie kaj forte superarkas trabaro de l' granda ponto, kiun Cezaro — en dek tagoj — alŝorcis el nenio. Kaj tiun ĉi ponton li rerigardas ĉiam, kiam por kelkaj momentoj liaj okuloj forglitas de la arba-rohomo, serĉante ian novan problemon en la nekonataĵo — novan ŝtoneton por la granda mozaiko, kiu pli kaj pli klare antaŭ li kompletiĝas.

Filino, la skribisto, spirblove kurbiĝis super notfolioj kaj fulme enskribas rezultojn de la cezaraj esploroj; malalta, hirta komercisteto, servante kiel interpretisto, fervore atentis ĉiun demandon; nur la germana giganto restas indiferenta; de kiam Cezaro per trankviliga alparolo forigis lian timemon, ŝajnas, ke lin tre amuzas respondado al sennombraj, ofte strangaj, demandoj. Ĉiam denove disfendiĝas en larĝan

ridon lia buŝo, sub senordaj vangoharoj, ĉiam denove kontente murmuris basaj sonoj el lia gorĝo, kiam li parolas pri moroj kaj kutimoj de sia popolo.

Multon jam Cezaro pridemandis; li eksciis, ke la germanoj apartenas al la *tenktera* gento, kies atakon la romia militestro forpuŝis ĝis post la Rejnnon; nun li konas la naivegan religion de tiuj naturinfanoj, adorantaj sundion, lundiinon kaj la martelsvingan diotondranton; li konas militajn kutimojn de la sovaĝuloj, iliajn, ĝismorte fidelajn vasalojn; kapbalance li aŭskultas pri vastaj dezertozonoj, per kiuj ili ĉirkaŭigas siajn loĝlokojn por jam komence sufoki atakojn de malamikoj; li ekscias pri ilia ĉiutaga vivo, apenaŭ konanta terkulturon, sed tiom pli militadon kaj ĉasojn.

Nun la germano flamiĝis. Liaj okuloj fajreras. Li ne povas satfanfaroni pri bataloj, kiujn li kaj liaj similuloj jam gajnis kontraŭ ursoj, lupoj kaj uroj.

»Uro?« interrompas lin Cezaro. »Kia besto ĝi estas?« Mire lin okulegas la giganto: ĉu la romiano ne konas uron? Ĉu en lia patrujo ne ekzistas arbaregoj, en kies profundo povas regi tiu nedubebla reĝo de l' sovaĝejo? Nur post ripetitaj insistoj, li ekbonvolas doni klarigojn, kiujn la malalta komercisteto riĉornome tradukas.

»Ĝi similas al bovo,« priskribas la germano tiun monstron, »sed ĝi estas multe-multe pli granda. Iom pli ol per la tuta kapo, ĝi superaltas la rekte starantan homon. Neniu alia besto egalas ĝin laŭ forto kaj rapi-deco, neniu superas laŭ sovaĝemo. Oni ne povas ĝin kapti alie ol per terkavoj, sed eĉ tiam batalo kontraŭ ĝi estas tiel terura, ke jam pli ol unufoje pereis homo. Tial la plej grandan gloron akiras tiu, kiu ĝin morti-

gas: kun ĝojkrioj de la tuta loĝantaro revenas la venkinto el la ĉaso kaj ĉe festeno li plej fiere uzas la kornojn de l' mortigita besto kiel trinkvazon.«

Palpebrumo de Cezaro spronas la skribiston al eĉ pli fulma skribado. Nun li plu demandas:

»Kiaj bestoj, krom tio, ekzistas en Germanio?«

»Nordkornulo,« respondas la giganto.

»Nordkurnulo? Kio ĝi estas?«

Denove mirstraba rigardo: ŝajnas, ke la romiano ne havas eĉ ideon pri ĝi!

»Nu, ĝi estas — iaspeca cervo — nur, ke ankaŭ la ino havas korneton.«

»Strange. — Sed daŭrigu!«

»La kornostangeto —«

»Ĉu la besto havas nur unu?«

La germano hezitas, kaŝe palpebrumas, subite kapjesas kun iom troa vervo.

»Jes, nur unu.«

»Kie ĝi kreskas?«

La germano respondas kun morte serioza mieno:

»Ĝi kreskas el mezo de l' frunto.«

»Inter la oreloj?«

»Precize inter la oreloj.«

»Tre interese. Notu tion, Filino!« Tiu ĉi kapjesas.

Cezaro daŭrigas:

»Nu kio pri la kornostangeto?«

Sed ŝajnas, ke la germanon ne plu interesas la korno: li montras nur mallonge per la fingrodisa mano, kiel la korno disbranĉiĝas kaj tuj sendemande li transiras al alia besto:

»Ni havas ankaŭ alkojn.«

»Nu, kio ĝi? Alkoj! Enskribu, Filino. — Kiel do ili aspektas?«

»Kiel kaproj. Sed pli grandaj.«

»Kian felon ili havas? Multkoloran?«

Denove ruza palpebrumo kaj kaŝita rido.

»Riĉe multkoloran.«

»Kaj ĉu ankaŭ ili havas kornojn?«

»Ne: kornaron; sed larĝan kaj tute malpintan.«

»Tiel do. Kaj ĉu ili estas ankaŭ facilmovaj kiel kaproj?«

La germano englutadas sian ridon. Longe. Poste:

»Tute ne! Ili havas ja rigidajn krurojn.«

»Kion vi ja pensas? Ĉu sen artikoj?«

Premata gorga rido.

»Tute sen artikoj.«

»Nu, tiuokaze ili ne povas kuŝiĝi.«

»Ja ne: se foje ili kuŝas, ili ne plu povas stariĝi.«

»Sed, kiel ili dormas?«

La germano apenaŭ povas paroli pro kaŝridado.

»Ili apogas sin kontraŭ arbojn.«

»Kontraŭ arbojn?«

»Jes. Kaj tiel ni ankaŭ kaptas ilin.«

»Ĉu? — Interese! Tre interese!«

La giganto subite ekmienas terure pie kaj daŭrigas:

»Nu, kiam ni trovas alkan postsignon, ni laŭsekvas ĝin ĝis la dormoloko. Tiam ni subfosas aŭ subsegas la arbon, ke ĝi apenaŭ staras; la laca alko venas tute ne sciante, ke la arbo estas difektita. Fidoplene ĝi apogas sin. Ĝia pezo estas tro puŝa: la arbo falas kaj kun ĝi ankaŭ la alko. La postan matenon ni havas nenion por fari ol tratranĉi ĝian gorgon.«

La skribisto mire disbuŝas. Ankaŭ Cezaro aŭskultas streĉite. Esplore li rigardas la germanon; nu, tiu scipovas bonege rakonti! Tutaj gregoj da bestoj, unuj

pli kuriozaj ol aliaj, ekkonturiĝas antaŭ li. Jes, tio estos multvalora ekskurso en la rememorlibro, kiun li intencas verki pri sia galla militado. La publiko ŝatas ja, kiam al gloro de l' militestro aldoniĝas ankaŭ tiu de l' esploristo. Kaj kun mallaŭta rideto Cezaro konstatas, ke ankaŭ li ne estas plene sekura kontraŭ verkista vantemo.

En la tendopordo aperas ombro: Hircio kun poŝtaĵoj. Kiom domaĝe! Nun li ne plu havas tempon por okupiĝi pri la sovaĝulo. Kun bedaŭro traglitas liaj okuloj sur la giganta korpo, kiu — nu, kial ja? — nevenkeble ridskuiĝas de l' kapo ĝis la piedoj. Amike li diras:

»Vi instruis al mi multon, kion mi ne sciis kaj ne opiniis ebla. Mi dankas vin. Nun iru, vi estas libera.«

Li rigardas post la vestĉifonan giganton, kiu pezpaŝe forlasinte la tendon rapide foriĝas el la romia tendaro. Momenton ankoraŭ okupas Cezaron la demando, kial la germano tiom ridegis, sed tuj aperas pli gravaj problemoj pri la strategiaj bezonoj kaj alta politiko.

## En la profunda nokto

De l' varma, ĉifita kuŝejo saltleviĝas la laciĝinto: ĉu vokis lin ies voĉo?

Li aŭskultas, streĉas ĉiujn sentorganojn, atendas kun ekscitita koro.

Nenio.

Profunde forĝeminte, denove li faligas sin sur la kuŝejon kaj ekokulas en la veluran nigron de l' nokto. La manoj kaj piedoj estas glaciaj, la kapo brulega. Feroringo dolorege kunpremiĝas ĉirkaŭ la tempioj. Febro? Li palpas la pulson. Ne. La koro jam retrankviliĝis, ĝi frapetas laŭ tiu sama regula takto, kiel tra ĉiuj ĉi jaroj, kies sumo formas lian vivon. Ankoraŭ neniam ĝis nun li eksentis tiom forte la strangan misteron — dum li pensis, sentis, agis, konstruis, detruis, ĝojis kaj suferis — estis ĉi tie io, kio senmalhelpe kaj firme iris sian propran vojon, io forŝirita el la propra volo de l' sentanto kaj al li preskaŭ fremda.

Tio lin maltrankviligas, turmentas: ĉu li kaj lia koro ne estis unu? Ĉu iam antaŭe venis al li ideo serĉi ĉi tie malakordon? Ĉu iam ekzistis io, kio konfuzus tiun harmonion? Kial ĝuste nun li sentas kontraston inter la senlace kurantaj pensoj kaj la regula frapetado de tiu objekteto en lia brusto?

Li brakkrucas sub la nuko, kunfermas la suferajn

okulojn, kvazaŭ li povus aldevigi la songon, lin evitantan.

Vane. Nur pli kaj pli dolore li sentas la suferon, kiu lin inkubas kaj al kiu li estas sendefende elmetita. Kun tremo de membroj per konvulsioj de nervoj, li sentas sin plene viktimo de la mistero, lin katenanta. Li serĉas la elvojon kaj provizore rifuĝas en la penson pri siaj taglaboroj: pri la bazoŝtonoj de sia granda verko, kiu samtempe estas stimulo kaj celo. Multo ja kuŝas post li, sed senlime pli antaŭ li. Rememoro pri la unuaj jaroj en Gallio redonas al li por momento la forton. Bonan laboron li plenumis! jam la unua jaro donis en liajn manojn la koron de l' lando, la dua — la nordon. Kun rapideco, kiu nun — rememore — ŝajnas eĉ al li mem nekomprenebla, li ekregis la landon kaj metis ĝin plene sub sian povon.

Sed tiam ekmordis lin la unuaj hezitoj: la tria jaro forpasis en senlabora revado. Nu, okazis kelkaj ŝajnaj sukcesoj: Decimo Bruto venkis la *venetojn*, Sabino la *unellojn*. Publio Krasso la *akvitanojn*. Sed ĉio ĉi estis laboro nur de liaj subuloj — preskaŭ ja servistoj. Sed li mem, kion li faris?

Kaj kion li plenumis en la kvara jaro? Li entreprenis militiron en Brition, — senrezulte; enfalon en Germanion, — nur baton kontraŭ venton. Kvazaŭ li estus knabo, kiu swingante lignan glavon tra l' aero revas pri heroaĵoj, sed ne havas forton por ilin realigi.

Subite vekigis en li terura timo. Li sentas, ke el sub li glitas la tempo, kiel rubando, kuranta el lumo en mallumon. Tuj klarigis al li, ke ĉiu sekundo estas absolute nerevenigebla, ke vana estas la serĉado pri tiu Nuno, kiun nur la agoj povas vivplenigi.

La agoj! Sed por kio? Abrupte li ekkonscias, ke



tiu ĉi demando jam delonge estis en li, dum la du lastaj ag-malriĉaj jaroj; ke la celoj forglitis — kiel ankaŭ la tempo — en ion nekonatan, kio lin kortimigas.

Kiel ĝi okazis? Kie li serĉu komencon de tiu ĉi senceleco? Kiam li perdis sian vojon? Palptuŝe li revenas laŭ la rememor-fadeno de Ariadna el la labirinto, en kiu li devojiĝis. Antaŭ li reviviĝas la tago de l' intertraktado kun la princo de l' germanoj; tiam ankoraŭ ĉio staris antaŭ li klara kaj firma; nur kiam li returne rajdis, li decidis, kontraŭ sia konvinko kaj konscienco, doni mortbaton al malamiko, kiu estis naiva kaj preta por interpacigo kaj amikeco. Tiam vekiĝis en li tiu alia sento, la ĝermo de tio, kio lin nun plenigas.

Nu, tio lin pelis pli kaj pli antaŭen, kiel vento, formuĝanta antaŭ si folieton. Jam la militiro kontraŭ la nerveojn estis nenio alia ol lastaj turnoj de la movrado, kies puŝforto subite ĉesis efiki. Tiam en li ĉio estingiĝis, formortis... Aliaj devis por li agi, li nur senmove sidadis... tiam li denove ekviglis, sed neserioze, ludeme, kvazaŭ por konvinki sin mem pri la aktiveco... Britanio — Germanio — nun refoje Britanio — en la senlimon — en la malplenon...

Malespere li kuŝturniĝas. Ĉu la spirito de l' mondo ne elektis lin kiel kolonon de granda ponto, ja, de dia ponto, kondukanta al la perfekteco? Kial la spirito forlasis lin nun en la mizero, kial ĝi nun ne parolas al li? Antaŭsignon! Nur antaŭsignon, eĉ se la plej etan!

Denove li enaŭskultas — nun ne plu en sin mem, sed rompite, brulsopire ekster sin...

Ekstere regas la profunda silento de l' tendara nokto. Ie-tie ektinto de lanco, frapita en teron, aŭ tute el malproksime paŝo de patrolo, de rondinspekta oficiro.

Estas tiom silente, ke li aŭdas la spiradon de ambaŭ gardostarantoj antaŭ la tenda enirejo: trankvilajn profundajn spirojn de unu, iom pli abruptan blovadon de l' alia. Kontraŭvole li provas distingi unu de la alia por nombri ĉiun aparte, vane ja; post du-tri spiroj ĉio ree intermiksiĝas kaj li devas refoje eknombri.

La spirblovulo interrompas, singarde kraĉtusas kaj sufokite diras:

»Vere enuige.«

»Mhm,« murmuras redire la alia.

Paŭzo. Tiam la unua daŭrigas:

»Oni jam malkutimiĝis al tia kvieta vivo.«

Nova murmuro responde.

Refoje silento; sed la unua ne cedas; triafoje li komencas:

»Do nun oni denove iros en Brition.«

Fine la alia enmordas:

»Jes, tuj kiam favore ekventos.«

»Strange, ke tamen estas io pli forta ol Li,« rimarkigas la unua. La subaŭskultanto en la tendo eĉ kontraŭvole ekridetas.

»Ne kalumniu,« riproĉetas sian kamaradon la alia.

»Mi tute ne intencas kalumnii,« defendas sin la riproĉato.

»Nur pripensu, kiom ni travivis dum ĉi tiuj kvar jaroj en Gallio: la militirojn kontraŭ la helvetojn, kontraŭ Arioviston, en Belgio, sur la okcidenta bordo, en Germanio, Britanio —«

»Sed la pasintjara milito en Britio, onidire, ne tre sukcese finiĝis,« enĵetas la alia, sed tuj aldonas: »Mi ne estis tie; la lastan tagon de Junio, tuj ĉe l' komenco de la batalo kontraŭ germanoj, mi ricevis ventrofrapon, kiu min suferigis ĝis la aŭtuno.«

»Ne tre sukcese finiĝis!« ekflamiĝas la unua. »Vi bovo! Kien ajn ni venis, tiuj kanajloj ricevis de ni batojn.«

»Pli mallaŭte,« avertas la alia. »Vi vekos Lin. — Sed tamen vi devis reveni,« li daŭrigas la rompitan konversacion.

»Kompreneble, ke ni devis reveni: ni ne povas ja eterne resti en Britanio! Li nur esploris! Alie li ne kuni-rigus sole nin kaj la Dekan.«

»Jes,« la alia jam temŝanĝas, »ni sepa-anoj ĉiam estas ĉie. Ĉu ankaŭ vi partoprenis en Germanio?«

»Ha, kiel! Mi helpadis eĉ en la ponto-konstruado.«

»Eh, tiam mi jam estis vundita.«

»Ĉio iris glatege, jes, mi diras al vi! Ni volis postsekvi la germanojn trans la Rejnon kaj la *ubioj* disponigis al ni amason da kanoj kaj flosoj. Sed Li diris: ne, pro kio mi ja estas la ĉefa pontifiko? Mi mem konstruos al mi la ponton!«

Ambaŭ mallaŭte priridas tiun vortoludon kaj poste la unua daŭrigas:

»Post du tagoj la lignaĵo estis kolektita kaj elĉarpentita; tiam ni batis en la fundon foston post fosto, transmetis trabojn, ligante ilin per latoj, kovrante per plektaĵo — kaj en unu semajno estis pretigita tiel eleganta ponto, kia estas la *mulvia* en Romo. Mirege disokulis la sovaĝuloj kaj tiom rapidege ili kurlevis la kalkanojn, ke ni ne povis ilin postsekvi. De tiu tempo ili nin timas.«

Paŭzo. Tiam ekparolas la alia, evidente serĉante en la memoro ia teknikan majstrajon, en kiu ankaŭ li partoprenis:

»Ĉu vi ankoraŭ memoras, kiel ni antaŭ du jaroj ĉe Ligero konstruadis la ŝiparon?«

»Eh nenio-kompare al la ponto-konstruado,« rifuze ĵaluzas la alia. »Ĉe la ŝipkonstruado oni ellaboradis ĉiam nur kilojn, starigadis mastojn, segadis kaj najladis tabulojn. Plej belan laboron plenumis ja la profesiuloj.«

»Tamen volonte mi rememoras la bordmiliton.«

»Mi ne. Mi plenumadis nur laboraĉojn. Penege oni aranĝadis fal-maturaj urbon post urbo sur tiuj insulaĉoj kaj kiam oni fine enpenetris, la kanajloj estis jam en siaj ŝipoj kaj for de tie. Nu, ĉe alia insulo atendis nin la sama plago.«

»Sed kiam ni venis kun la ŝiparo,« diras la alia, »oni tuj ekfajfis alian melodion! He, ili esperis, ke oni rapide nin pereigos sur la maro, sed ili eraris: tuj kiam ni tratanĉis iliajn velŝnurojn, ili estis likvidataj. Kaj militkaptajo abundis — tre abundis!«

»Jes,« grumbblas la unua, »kaj ni alvenis tro malfrue por ĉio ĉi. Ni havis la plezuron nur marŝi kun vi tra la marĉregiono.«

»Silenton,« interrompas la kamarado. »Ŝajne mi aŭdas la patrolon.« Ambaŭ eksilentas, streĉe aŭskultante. Tiam denove komencas la dua:

»Pri Gallio ni do finis.«

»Jes,« respondas la unua. »Tial oni iras nun en Britanion.«

»Mi scivolas, kiom longan tempon ni bezonos por tio.«

»Ne longan, vi ja vidos! En la aŭtuno Britanio estos roma.«

»Kaj tiam?«

»Kio tiam?«

»Kion Li tiam faros?«

La aŭskultanto en la tendo retenas la spiron.

»Ĉu mi scias? Nun Li entuziasmiĝas pri konkero kaj ne povas ĉesi. Eble el Britanio ni veturos en Thulon kaj de tie —«

»El Thulo oni povas nenien plu,« instruas lin la dua. »En Thulo estas la mondfino, diris iam al mi iu greko. Tie brulas ĉielo en eterna fajro, ŝprucas bolfontoj —«

»Tio ne malhelpos Lin,« enfalas la unua. »Li traktos sin ĉie. Kiu ja povus kontraŭstari Lin, kiam Li decidis antaŭen?« La homon en la tendo io eksufokas en la gorgo.

»Jes,« li aŭdas diri la duan, »sed kion fakte Li volas?«

La antaŭsignon! La antaŭsignon! martelas en la brusto de l' aŭskultanto. Jen la demando, kiun li mem tiom ofte starigis al si. Nun li aŭdos respondon el la buŝo de l' naiveco, ĝi malkovros la plej profundan veron. Uragano de sentoj ekfuriozas en li, forrabante por momento lian spiron kaj konscion. Li duonleviĝas, kap-elstreĉe avidegas la venontan vorton.

Jen:

»Ĉu vi frenezigiĝis, ke vi tiom kriaĉas?« sufokite enmiksigas akra voĉo. »Vi ja vekos la imperatoron! Eh, ĉu tio signifas: gardostari? Mi sentas plezuregon por radikale vin priinstrui.« Silento. Tiam refoje la akra voĉo en ofica koncizo: »Kio nova?«

»Nenio, ho centuriono,« raportas la unua.

»Do, kiel mi diris! Atentu bone kaj ne lasu vin refoje surprizi en babilado dum gardostaro; alie vi ricevos ĉiaspecajn karesojn!« Aŭdiĝas paŝoj, malrapide, singarde foriĝantaj.

»Tio estis tiu nova,« flustras la unua. »Tiu ĉi estas diable severa.«

»Nu, tiel okazas, ĉar vi ja ĉiam devas kriaĉi,« riproĉe respondas la dua. Tiam ambaŭ eksilentas. Post nelonge aŭdiĝas denove nur la spirado de ili ambaŭ: malrapidaj, profundaj spiroj de la unu, pli rapida, abrupta blovado de la alia.

Tiam fine alvenas songo, la profundega songo de l' elĉerpiĝo...

## Ĉe l' fino de la libereco

Cezaro ĝentilas kaj komplezas Diviciakon kiel ĉiam; tamen du ruĝaj makuloj ĉe la vizaĝosto kaj pene subpremata malpacienco en la voĉo perfidas, ke li apenaŭ sin bridas.

»Ne, Diviciako,« li respondas al la insistaj petegoj de la edua princo, »tion mi ne povas ignori. Tion vi mem devas kompreni.« Li parolas sen interpretisto: idum kvar jaroj en Gallio li sufiĉe ellernis la lingvon de tiu ĉi lando.

»Granda Cezaro,« denove ekpetegas Diviciako. Por aparte plaĉi al la romano li penas paroli latine kaj tiu ĉi interŝanĝo de la lingvoj strange impresas. »Vi montris kondute al mi tiom da bonaĵoj kaj amikaĵoj —«

»Vi scias, ho Diviciako, kiel korinklina mi estas al vi. Ĝuste pro vi mi ĝis nun preterrigardis ĉion, kion via frato aranĝis kontraŭ mi; mi neniam parolis pri tio por vin ne ĉagreni kaj sekrete mi ĉion denove riparis. Sed vi devas ja kompreni, ke mi ne povas permesi la publikan rifuzon de l' obeemo.«

»Granda Cezaro,« komencas denove Diviciako, »mi ne volas defendi la fraton —«

»Kaj ankaŭ mi ne lin akuzi,« refoje interrompas Cezaro. »Mi volas nur, ke vi komprenu la neceson de mia sinteno. Ĉu mi povas toleri, ke li uzu la konfuzon

de l' enŝipiĝo por simple malaperi kun via tuta tribo kaj reveni en la patrujon — sen mia permeso, ja eĉ kontraŭ mia ordono?»

»Mi vere ne arogas al mi,« mallaŭte kaj hezite diras Diviciako, »prijugi viajn ordonojn; sed, ĉu vere estis maleble forlasi Dumnorikson, ĉu estis ja neceso pro tiu ĝena incidento interrompi la tutan enŝipiĝon?»

»Jes,« akcentas Cezaro. »Tio estis necesa: eĉ nur por respektigi mian volon. Alie ĉe nova okazo venus ideo al iu galla nobelo foriri laŭplaĉe kaj, finfine, ĉi restus tute sola. Por eviti ĉiujn estontajn ripetojn mi estas devigata porekzemple puni.« Li rimarkas subitan paliĝon sur la vangoj de Diviciako kaj daŭrigas pli milde:

»Vi devas ne ektimi, ho Diviciako: kiam Dumnorikso revenos kun la taĉmento, kiun mi postsendis por li, oni ne juĝos pri lia vivo — ankaŭ ne pri la libereco, sed fine li devas ellerni obeemon — la senrezistan kaj senkondiĉan obeemon.«

La galla nobelo el ĉio ĉi elkomprenis nur amnes tion de sia frato. Antaŭ ol Cezaro povas malhelpi, Diviciako sin ĵetas al liaj piedoj, kaptoĉasante liajn manojn por kiso.

»Vi ne verdiktos mortigi lin?» li ekkrias larmokule. »Vi pardonos al li? Pro tio mi estos eterne dankema al vi! — Sed,« li daŭrigas kun subite vekiganta suspekto, »mi ja aŭdis, kiel vi ordonis al viaj rajdistoj reporti lin vivanta aŭ mortinta!«

Cezaro helpas al li leviĝi.

»Nu komprenu,« li diras trankvilige, »Dumnorikso devas ekkoni, ke mi ne ŝercas, vere ne ŝercas. Li ja mem ne volos, ke okazu io ekstrema.« La tendokur-



teno forleviĝas, la gvardiestro eniras kun militista saluto. »Kio okazis?« demandas Cezaro.

»Revenis la rajdotaĉmento,« raportas la centuriono, »kaj ĝia komandanto estas ĉi tie por prezenti la raporton.«

»Li venu,« kapklinas Cezaro. Kaj dum la suboficiro retiriĝas, li sin turnas al Diviciako: »Tuj ni ekscios ĉion.«

La komandanto eniras: malalte-dika staturo, kurbkrura, kun kruda, angula, senesprima vizaĝo.

»La ordono plenumita,« li koncizas.

»Ĉu vi rekondukis Dumnorikson?« demande rapidas Cezaro.

Antaŭ ĉio li volas trankviligi Diviciakon.

»Jes.«

»Kie li estas?«

»Kuŝas ekstere.«

Veeto apud Cezaro. Mallaŭta, dolorplena.

»Kuŝas?« Turmenta silento. »La raporton,« diras la imperatoro per sensona, senkolora voĉo.

La komandanto, ankaŭ gallo, ĵetas al ambaŭ straban, kaŝan flugrigardon. La vizaĝo de Cezaro estas trankvila, nepenetrebla, la mieno de Diviciako disgrimaca masko, vekanta en la rigardanto turmenton. Li decidas ĉiuokaze elraporti, kiom eble plej rapide, kaj ĉiun vorton bone elpesi.

»Laŭordone ni postrajdis Dumnorikson kaj atingis lin dek du mejlojn de ĉi tie. Unue li kredis, ke ni volas aliĝi. Liaj homoj haltigis la ĉevalojn kaj alvokadis nin lancosvinge.« Nun li hezitas, serĉante la ĝustan vorton.

»Nu, plue!« insistas Cezaro.

»Mi transdonis al li vian ordonon, tuj returniĝi

niĝi kaj reveni kun ni. Same, ke vi decidis plej severe procedi. Tiam Dumnorikso respondis, ke vi rajtas al neniuj en Gallio ordoni kaj ke ni hontu, ĉar ni obeas al via komando. Kaj li volis forrajdi.«

»Kaj vi?«

»Mi altrotis lin, kaptis la bridon de l' ĉevalo. Tiam li eltiris la glavon kaj ekbatis sur min, ke mi apenaŭ povis rebati; kaj li helpovokis la aliajn kaj kriis, ke li estas libera homo kaj civitano de libera lando. Nu, tiam ankaŭ la aliaj malkvietiĝis kaj ekpuŝis la taĉmenton, kriante, ke tio estas skandalo kaj ke ili ne plu vin obeos.« Li denove ekpaŭzas profunde spirante: nun venas tio, kio estas la plej malfacila. »Tiam mi ne povis alie helpi al mi — mi enpuŝis la klingon inter liajn ripojn,« li finas duonvoĉe. »Li tuj mortis.« Time li alrigardas en la senmova vizago de Cezaro.

»Kaj la aliaj?« li aŭdas la senonan voĉon.

»La aliaj — kiam ili vidis Dumnorikson kuŝi, ĉesis kontraŭstari kaj rajde revenis kun mi. Plennombro ili estas ĉi tie.«

»Perdoj niaflanke?«

»Neniaj.«

Denove peza, peza, prema silento. Tiam aŭdiĝas la voĉo ne plu sensone, sed sonore kaj klare:

»Prave vi agis kaj mi estas kontenta pri vi. Forpaŝu!« Foriga mangesto, la gallo malaperas forspirante. El la trajtoj de Cezaro foriĝas la malmoleco, la grizaj okuloj plenaj de kompatato rigardas al Diviciako, kies vizaĝo baniĝas en larmoj.

»Ho Diviciako,« li diras milde, »estas dolore al mi, ke devis tiel okazi. Kompreneble ja, oni enterigos Dumnorikson kun ĉiuj honoroj al li apartenantaj.« Li etendas la manon por forte premi tiun de la princo.

Sed Diviciako retiriĝas. Profunde li riverencas, dum sur la senviviĝintaj vangoj perle brilas larmoj.

»Cezaro estas tro afabla,« li diras per obtuza, estingiĝa voĉo. »Kun ĉiuj honoroj — tio estas pli ol mi povus esperi. Mi ne dubas, ke vi estas preta enterigi nin ĉiujn kun la honoroj al ni apartenantaj.« Eĉ pli profunde li kliniĝas kaj forlasas la tendon dorsire, evitante la rigardon de Cezaro.

»Diviciako!« Miro, nekompreneo.

Nenia respondo...

## Envio de Dioj

Duafoje Britio.

Sed la mallarĝa markolo, kiun li povus transversi ĉe favoraj ventoj en kelkaj horoj, nun estas — kaj restas — pli profunda abismo, ol li supozis. Kvazaŭ dioj starigus al li la gallian bordon kiel limon: ankaŭ nun li akiras sukcesojn, ankaŭ nun ne povas la indiĝenoj, malespere sin defendante de barikado al barikado, rezisti kontraŭ surprizatako de liaj legioj. Sed al li mankas tiu potenca frakasforto, preskaŭ unuspire gvidinta lin tra Gallio, de Alpoj ĝis la norda mondmaro. Nur paŝ-alpaŝe li venas nun antaŭen kaj la konkeritajn regionojn li ne povas firme teni, ili estas kiel sablo de l' britia bordo, kiu prenite kribriĝas tra l' fingroj.

Tiel naskiĝas — unuafoje dum liaj militjaroj — la senkonscia deziro por rezigni pri la senfrukta konkerado kaj reveni hejmen. Ankoraŭ li ne kuraĝas konfesi tion al si, li klopodas sin konvinki, ke estas necese atingi la celon, kiu distancas nur vojparteton — sed li ne povas forpeli el la koro maltrankvilon kaj dubon, ĉiutage pli kaj pli kreskantajn.

Estas unu el nebulaj matenoj, certa antaŭsigno de varma tago, kies sufokon ne mildigos eĉ bloveto de l' tro fora bordo. Cezaro, kiel ofte en lastaj monatoj, malbone tradormis la nokton kaj nun, nerefresigite kaj

mishumore, diktas Hircio kaj Pollio la tagordon: la stafetstaciojn ĝis la marbordo oni devas firmigi kaj plimultigi, per la patroloj denove starigi kontakton kun la malamiko, kiun oni perdis elvide. Ripete li informiĝas — estas la poŝtotago — ĉu la stafeto jam alvenis, kaj post nea respondo li redronas en neparolemon.

Senfortiĝinta kaj laca li sin sentas, li deziras elriposi, ĉion forgesi. Unuafoje en lia vivo tiu stranga sento. Ĉu li jam maljuniĝis?

Tiu ĉi demando donas al li grandajn zorgojn. Nur antaŭ nelonge li festis sian kvardek kvinan naskotagon: tio okazis en Porto Icio, kiam li atendis ventojn favorajn. Nun li rememoras la bondezirojn, kiujn esprimis al li en la tendaro liaj vicgvidantoj, trupoj kaj gallingaj nobeloj. Aperas antaŭ li la malserena vizaĝo de Dumnorikso, pene altrudante al si la konvenan rideton. Tiam li ankoraŭ vivis. De tiam pasis apenaŭ unu monato kaj la junulo, kiun li malgraŭ ĉio simpatiis, kuŝas nun sub sia termonteto kun la ripovundo tri fingrojn larĝa. Ja, kiom rapide pasas ĉio. Kaj kie iam estos tombo de li, de Cezaro? Ĉu ankaŭ lin trafos tiom boncela glavo, kiu —

Fine la stafeto. Li aŭdas ekstere hufobruon de ĉevalo laca kiel ĉiam, la kutimajn demandojn kaj respondon. Ĉio, ĉio estas nur la griza ĉiutago! Hircio senordone tuj elkuras kaj revenas kun la plena poŝt-sako, elŝutas la tutan enhavon sur tablon kaj komencas, helpate de Pollio, fingrolerte dividi. Post kelkaj minutoj kuŝas ĉio antaŭ Cezaro bele ordita: raporto de ŝiparestro Kvinto Atrio, oficiala komuniko el Romo, unu privata letero.

Cezaro laŭvice malfermas la leterojn. Atrio sci-

igas, ke la ŝipoj, difektitaj de la lasta uragano, estas riparitaj. Kvardek ŝipojn malgraŭ tio oni devos elĵeti. Malbone, tre malbone. Cezaro pripensas, kalkulas en pensoj. Tamen estos eĉ tiel eble ĉiujn trupojn samfoje enŝipigi. Komprenoble — estos interpreme, homo sur homo, kapo ĉe kapo. Sed, pli bone iel ol neniel. Li etendas la folion al Pollio, ŝparvorte ordonante, ke oni elkalkulu novan disdividon de la trupoj. Nun li prenas la komunikon el Romo.

Ankaŭ ĝi ne estas oportuna por bonhumorigi. Kia diferenco kompare al la pasinta jaro, kiam sub konsuleco de liaj amikoj ŝajnis, ke ĉio aranĝiĝas per si mem! Hodiaŭ estas ĉe la direktilo lia malamiko Domicio, sekrete kaj publike subtenanta ĉiujn entreprenojn kontraŭ li. Brovsulke legas Cezaro pri flama senatdebato pro lia militiro kontraŭ la germanojn, pri absurda propono de Katono, ke oni transdonu Cezaron al tiuj, kiujn li, laŭdire, kontraŭleĝe ekatakis.

Cezaro lipmordas, pensante kun obtuza furiozo: antaŭ ĉio oni devus min kapti. Penso, ĝis nun puŝata flanken, kiam ajn ĝi aperis, jen firme ekformiĝas: lin ne plu ligos iaj ajn diktoj aŭ ordonoj. Nun li estas sia propra, libera mastro; kaj li estas preta defendi, kiam necese, tiun propran liberecon eĉ per armiloj en la mano.

Profunde ekscitita kaj spronita per pikilo de la senata arogemo, li kaptas leterojn de Krasso kaj Pompejo. Krasso donis sin plene al siaj aventuroj en Sirio, li planas grandan militiron kontraŭ la parthojn kaj petas Cezaron alsendi la junan Publion, kiun li volas kunpreni. Cezaro legas tion kun bedaŭro: tio ja forprenos de li — dum du jaroj — la plej konfidindan amikon en Romo kaj — konsidere eĉ al Labieno —

lian plej bonan vicgvidanton sur la batalkampoj. Sed estas malfacile tion rifuzi, precipe, kiam la deziro de l' maljuna patro, ke la filo estu kun li en Azio, estas ja tute komprenebla.

Kaj Pompejo? Pompejo sendas laŭkutime senkernajn plendojn, el kiuj oni povas konstati nur ke li ne scias fruktuzi sian povon por teni en la limoj la tumulteman plebaĉon de Romo. Li plendas pri Klodio, kiu denove impertinentas kaj kiun povas bridteni nur murdisto dungita de l' senato: iu Milono. Krome li vicnombras ĉiujn bagrojn, kiujn oni ĉiuflanke puŝas sur lian vojon — iu kaŝaludeto ŝajnas celi al Krasso — kaj li ne povas komuniki eĉ nur unu faktan sukceson, eĉ nur unu fruktodone plenumitan agon.

Kun grimaco formetas Cezaro la leterojn, volante leviĝi. Tiam lia rigardo falas sur la lastan skribaĵon. Li prenas ĝin, esploras nekonatan skribmanieron kaj fine malfermas.

Tio estas letero de lia kuzo Kotto, sciiganta al li ŝparvorte morton de l' patrino.

La folio en lia mano ŝajnas kreski, dislargiĝi pli kaj pli ĝis ĝi superkovras ĉiujn aliajn. La grundo sub la piedoj glitas for, la apogserĉa mano peze falas sur la tablon, ĉifante kaj ŝirante ĝi enpuŝiĝas en la raporton de Atrio. Daŭras duonminuton ĝis la sufokita gorgo ekvoĉas:

»Retiri — la trupojn. — Ni revenas.«

---

Cio pasis.

Cio marŝis pli bone ol oni povis esperi: la britoj ĝojaj, ke ili liberiĝos de la pli forta malamiko, kontraktis pacon, kiu — sub la formala submetiĝo —

konservis prestiĝon de la roma militistaro. Revene marŝas la trupoj tra nove konkerita imperia lando. Sed tamen tiu marŝo estas retiriĝo. Dum unu-du jaroj efikos rememoro pri la ĵus finitaj bataloj, poste la indiĝenoj per si mem reakiros la liberecon, ĝis nun ĝu-  
atan.

Al Cezaro estas indiferenta ĉio. Apenaŭ li kap-  
ablis fintrakti kun la malamikoj. La malfacilan en-  
ŝipiĝon direktas la adjutantoj, dum li tuttage restadas  
sola en la tendo. Jes, estas la adjutantoj, kiuj respekte  
atribuis al li la lokon en la ĉefŝipo kaj, ĉe l' favora ven-  
to, donas signon por ekveturo. Plene submetiĝinte li  
sidas ĉe antaŭkilo de l' ŝipo, portanta lin reen. Li lasas,  
ke la sal-malseka noktventeto glaciigu la brulan frunt-  
on, dum li fiksokulas sur la apenaŭ krispiĝan maron.

Dum la tuta transveturo daŭras muta silento: la  
trupoj jam eksciis pri la malĝojo, neatendite trafinta  
ilian amatan estron. Ili montras kunsenton en kortuŝe  
naiva maniero: ili apenaŭ kuraĝas flustri, apenaŭ mov-  
iĝi, iam-tiam ili interŝanĝas kaŝsignojn, sed kondukante  
tiel senbrue, kiel ankaŭ Cezaro mem.

Je la noktomezo okazis la ekiro; nun jam ekmat-  
eniĝas. Elflore, ĉe l' oriento, pli kaj pli heliĝas. Ĉu ĝi  
estas naskiĝanta tago aŭ la alia bordo? Nedistingebla,

La tutan longan nokton Cezaro eĉ ne moviĝis.  
Rigide li okulas sur la milde ekscitiĝan maron, kies al-  
kaj for-ondetoj pasas sampaŝe kun liaj ekŝprucaj kaj  
fornaĝaj pensoj.

Li atendas la doloron, kiu devus veni, sed ne ven-  
as. Li rememoras la spirraban suferon, kiu kvazaŭ glave  
trapikis lian koron, kiam li, ankoraŭ junulo, eksciis la  
morton de l' patro. Li miras, ke li ĝin nun ne sentas,  
Surprizo naskiĝas en li kaj li ne povas satmiri pri sia



sensentemo, li hontas antaŭ si mem kaj tamen ĉio vana: li mensogus al si, se li afektus la doloron. Lin plenigas nur senkonsolo de l' abisma malpleno, impresado de l' homo, kiu staras, solsole, meze de la vasta, netransasvadebla dezerto kaj scias, ke lia voĉo atingos nenies orelojn.

Iu el la plej fruaj rememoroj venas en lian konscion: kiel trijara infaneto li vojperdis en la hejmoĝardeno kaj subite li estis sola meze de io fremda, minaca; de l' momento al momento plikreskis lia timo ego kaj fine ĝi lin superpotencis, elŝprucante en malesperan ekkrion: »Panjo! Panjo!« Ankaŭ nun ŝajnas al li, ke li aŭdas grincon de ŝtonetoj sub la rapidaj alpaŝoj, ankaŭ nun li sentas molajn brakojn, kiuj zorgoŝirme ĉirkaŭprenas kaj levas lin el la tuta terurajo; ankoraŭ sonoras la kara alda kaj ah — tiom konsolriĉa — voĉo ĉe l' orelo: »Ho vi, stulteta bubeto mia! Stulteta bubeto mia!«

Tiam li kredis la malvastan hejmoĝardenon senlime ega; poste jam la tuta mondo estis al li tro malgranda. Kio interkuŝis, kio donis al li forton por tiom alten elkreski kaj ĉion fremdan, malamikan ĉirkaŭ si subpremi per fera pugno? La zorgema amo de l' patrino estis tio; la konscio, ke li ne estis sola; ke du bonaj, grandaj okuloj viglis garde super li, kie ajn li estis; ke tie — hejme frapetis la varma koro, sur kiun li povis rifuĝi ĉiam, kiam la turmentoj iĝis tro pezaj.

Nun denove estas la mondo senlime granda, tiel granda, kiel tiam ŝajnis al li la ĝardeno; sed nun eĉ la plej malespera voĉo ne povas alvoki la patrinon: li scias, ke nun li estas lasita nur al si mem, ke ne plu ekzistas la ŝirma mano, levonta lin el la konfuzaĵoj de lia vivo. —

Pli kaj pli tagiĝas, li jam klare distingas la bordostrion antaŭ si. Estas ĝuste antaŭ la suneliro. Tie sur la tero siluetas arbaro, kies dent-elstaran randon jam borderas brilhelo. Ja, alvokas la tago kaj la devoj. Lacege, rompите, li leviĝas, »Bonan nokton, ho patrino,« elflustras li kaj nur poste ekkomprenas, ke li diris senencaĵon.

Nun videblas ankaŭ la larĝampleksa haveno. Plenele, akcelate de l' ekblova maten-venteto, la ŝiparo veturas en la ŝirman golfon.

Ĉe fino de l' haveno, tuj ĉe borde, estas terreduto kaj sur ĝi ligno-fortikaĵo. Labieno fervore laboris, ekpensas Cezaro. Iu figuro moviĝas sur la tegmentoplato, malforte kaj vualite alsonas ĉi tien tono de la signalkorno.

La tendaro viviĝas. El ĉiuj tendostratoj la militistoj rapidas, viciĝas laŭ la bordo, okulante al la revenanta ŝiparo. Pli multaj iĝas la militistoj, senĉese pli multaj. Kial ili ne vokas? Ĉu ankaŭ Labieno jam havas la informon el Romo?

Jes: tie li staras, rekte, en la konvena, festa sintenado kaj, ne malproksime de li, homo en funebra vesto. En la sama momento elire disbrilas la suno.

Superŝute orata de l' sunradioj, la havenon enveturas unue la ŝipo de Cezaro. De la bordo forpuŝiĝas boato; remante renkonte ĝi alkroĉiĝas ĉe l' ŝipflanko. Cezaro enpaŝas en la luliĝan transportilon kaj rapidaj rempuŝoj lin albordigas. Malmole grincas sabloŝtonetoj sub la kilo, dum li eliras sur la bordon. Nun li staras sur la gallia tero.

Trankvile iras al li Labieno, haltas en la oficiala distanco kaj salutas militiste. Cezaro resalute atendas la raporton.

»Ĉio en ordo,« sonoras voĉo de Labieno en militista lakoneco. Cezaro kapklinas kaj per laca gesto forviŝas la distancon inter la superulo kaj subulo. Labieno alpaŝas pli proksimen, la bela, aroganta vizaĝo sulkiĝas kondolence. »Cezaro,« li diras obtuze, »bedaŭrinde mi devas al vi —«

Cezaro mane forgestas.

»Lasu,« li diras sensone. »Mi scias jam.«

»Vi scias?«

»Lucio Kotto skribis al mi en Brition.«

En la vizaĝo de Labieno montriĝas, ŝajne, vera embaraso. »Ho Cezaro,« hezitas li murmure, »ne ĉion vi scias.« Li eksentas sur si lacajn, rigidajn okulojn, kvazaŭ de l' torturato. Rapide li pluparolas: »Via filino Julia — tute neatendite —«

En la rigidaj okuloj ekstremas la vualo.

»Mia patrino —« ekvibras io sensona, hezite korrektanta.

»Kaj ankaŭ via filino,« mallaŭte finas Labieno.

Tra la maldika korpo antaŭ Labieno trakuras konvulsio, kian li vidis ĉe la homoj, kiujn sago aŭ lanco trafis rekte en la koron. Sed ĝi tuj pasas. Kovrante per la maldekstra mano la dolore distaŭzitan vizaĝon, Cezaro rigide, lignokrure iras preter Labieno kaj la ceteraj en sian tendon, kiu amplekse kaj lukse disstreĉiĝis en mezo de l' tendaro — kaj fine li malaperas internen.

## Embuska frapo

Posttagmezo de l' malfrua aŭtuno proksimiĝas al sia fino. Senhome kuŝas la stratoj; nur ie-tie, laŭ la muroj de l' militista urbo, rapidas malfruiĝinta pasanto hejmen: al la loĝantoj de Samarobrivo estas malpermesite eliri el sia loĝrondo ekde la krepuskiĝo. Kaj la romia komandejo tute ne ŝercas pri tio, ĉar ĝi staras sub senpera kontrolo de l' arma komandanto. Tial sole aŭdeblaj voĉoj estas la sinturnaj paŝoj de l' gardostarantoj kaj marŝado de l' patroloj, kiuj okulvigle esploras tra l' dezertaj stratoj. Dume jam kelkloke en la dometoj ekflagras vesperaj oleolampetoj — novaĵo, enkondukita ankaŭ de la romianoj.

Cezaro rigardas el fenestro de sia ĉambro al la du gardostarantoj, kiuj postenas antaŭ la enirejo. Indiferente kaj senmove fiksokulas ambaŭ militistoj antaŭ sin kaj atendas la anstataŭigon. Nur foje-foje, kiam ekbojas hundo aŭ malproksimaj kamaradoj eklaŭtiĝas, turnas unu aŭ la alia el ili la kapon, sed tuj ĝin enue returnas. El la posten-budo sonas tonoj de sentimentala militista kanto. Trankvilo de l' krepusko sterniĝas super la urbon.

Rigardoj de Cezaro glitas plue, trans la stratoj, al la kontraŭstara konstruaĵo. Unu fenestro estas lumigita kaj li vidas rekte en la ĉambron. Tie loĝas ambaŭ

liaj adjutantoj kaj nun atendas — verŝajne — la vespermanĝon. Pollio sterniĝis maldiligente kaj mansubkape sur la kuŝejo; Hircio disstreĉas la membrojn, komfortante en apogseĝo. Ambaŭ babilas ĝojpetole kaj iam-tiam rideksplodas.

Cezaro repaŝas ordonante al la servisto, atendanta en la pordo, prepari la ĉiuvesperan banon kaj venigi la raziston. Tiu ĉi, malgrand-azia greko, komprenas transformi la ceremonion, ne ĉiam tre agrablan, en veran plezuron kaj Cezaro jam sincere antaŭĝojas. Dume li denove repaŝas al la fenestro por ĝui trankvilon kaj silenton de l' vespero.

Ankaŭ en li ĉio trankviliĝis kaj silentiĝis. Post la unua atakego de l' doloro — kiu ĉe l' sciigo pri la morto de Julia en duobla furiozo elŝprucis — li denove sin regas. Ja, strange: la doloro forskuis lin el la rigido, en kiun li dronis en Britio, kaj redonis lian malnovan elastecon. Nu vere, li ne plu zorgas pri la altaj celoj kaj planoj, sed li ekkonis, ke ankaŭ la ĉiutago postulas grandan aktivecon. Tial, kun revekiga fervoro, li ĵetis sin en la laboron. La malriĉa rikolto devigis al disdivido de la transvintrejoj en pli vastajn regionojn por fari al la lando la ŝarĝon pli elportebla. Tiun disdividon ellaboris li mem; same li mem kontrolis disiron de la trupoj kaj permesis al si ripozon nur, kiam alvenis el ĉiuj flankoj la sciigoj, ke la trupoj jam loĝiĝis en la transvintrejoj. Li ja sciis, ke ili estas nun sekuraj en tiu larĝa arko, etendiĝanta de la esuvioj ĉe la okcidenta bordo ĝis la eburonoj ĉe la malsupra Rejno. Kaj dum tiu laboro revenis trankvilo de lia animo; li estas trankvila, memfida, kvazaŭ en vintrodormo de l' sentoj pasas al li tago post tago.

La placon transversas patrolo. Komence li apenaŭ

ĝin rigardas, sed poste ĝi altiras lian atenton. Kvar vir-oj, en ilia mezo unu gallo tute disŝirita, pendĉifona, kaj, ŝajne, ankaŭ mortelac. Tamen li volonte iras kun ili. Iu el la legianoj treniĝas kun lanco, sendube for-prenita de l' eskortato.

Inter la komandejo kaj adjutantejo ili haltas. La patrolestro elmurmuras al la aliaj kelkajn vortojn kaj paŝas en la domon. La gallo, profunde forspirante, apogiĝas al la muro kaj, jam post momento, enstare ekdormas. Verŝajne li venis el malproksime. De kie?

La patrolestro eliras kun la gvardia komandanto, kiu irante aranĝas la kaskorimenon. Ili vekskuas la dormantan gallon kaj ĉiuj malaperas en la adjutant-ejo. Kio okazis? Cezaro denove direktas la rigardon en la oficirĉambron.

Hircio kaj Pollio ekmanĝis kaj nun trankvile frandas bone rostitan anseraĵon. Ilia humoro estas, kiel ĵus antaŭe, bonega, ili interrompas la ridadon nur kiam plenas la buŝoj.

La pordo malfermiĝas. Eniras la dejora komand-anto. Ambaŭ kolere alrigardas kaj fiksokulas la viron, kiel homoj, ĝenataj en la plej granda plezuro.

Mallonga, senspire elpuŝita raporto — la vizaĝoj de ambaŭ jam serioziĝas. Mallonga ordono, la subofi-ciro forlasas la ĉambron, sed tuj revenas kun la gallo, kiu blindpalpebrume haltas en la lumo. Unue li hezite respondas al demandoj de Hircio, sed poste flue kaj glate ekrakontas. Vorto post vorto la adjutant-oj pli kaj pli paliĝas, konsternite interrigardas sin. Unu-du mallongaj demandoj plu, tiam Hircio saltas, prenas la ledoveŝton, ĵetitan trans la seĝon, rapidtiras ĝin trans la kapon kaj, liginte laĉon fingro-treme, li

kaptas la glavrimenon, elkuras eksteren, trenante perforte kun si la gallon. Kio okazis?

La pordo de l' Cezara ĉambro malfermiĝas. Sed tio estas nur la razisto, kiu humile saltante komencas 'dismetadi sian ilaron, Rapidgeste Cezaro signas atendon.

Refoje la pordo: Hircio! Li ĵetas sin enen kaj apenaŭ havante tempon por saluti, li elspiregas:

»Kurieria komuniko de Kvinto Cicerono!«

»Ĉu?« Streĉite, atentege lin rigardas Cezaro.

»Ekribelis la eburonoj,« Hircio raportas tranĉe kaj tiom abrupte, ke liaj vortoj interpuŝiĝas. »Ĉe Aduatuko okazis akregaj bataloj, la tendaro de Cicerono estas ĉirkaŭfermita.«

»Kie estas la raporto?«

»Ĉe la kuriero. Li ne volis ĝin doni al mi: ĝi estas adresita nur al vi persone.«

»Venigu lin!«

Hircio elrapidas tuj kaj revenas kun la gallo, sur kies larĝa buŝo pendas konfuzita ridaĉo.

»Vi venas de Cicerono?« demandas mallonge Cezaro.

»Jes — Cicerono,« kapjesas la gallo.

»Kio okazis? Kion vi alportis?«

La gallo, larĝe disokulante, plenblovas la vangojn.

»Granda malfeliĉo!« rompите li elpuŝas, sed tamen langoglite, kio pruvas, ke li tion elrakontis ĝuste antaŭ nelonge. »Amaso da galloj — faris tiel kaj tiel —« ambaŭbrake li svingas batalĝeston — »eburonoj ĉiuj jam for, amaso da galloj,« li ripetas. »Militistojn ili faris tiel!« per la manplato li tranĉas laŭ sia

gorgo. »Amaso da militistoj.« — »Nu, kiam ĝi okazis?« demandas Cezaro fruntosulke. »Laŭ la lastaj informoj ĉe la eburonoj regas plena paco.« La lastan diron li direktas al Hircio, kiu urĝe kapjesas.

La gallo tondre ekridas, kvazaŭ Cezaro estus dirinta plej amuzan spritaĵon. »Oh, nun ĉio paca!« krias li interrompate de ĉiam novaj ridataĵoj. »Nun ĉio paca! Ĉio morta!« Okulturne li jen parolas en la senvoĉani, terurplenan silenton: »Tiam eburonoj for. Aduatukoj, nerveoj kun eburonoj, Ambiorikso princo. Krome cetronoj, grudoj, levakoj, pleumoksoj, geidumnoj. Ĉiuj kune. Amaso da galloj!« Ŝajne li enamiĝis al tiu ĉi diro. »Ĉiuj ĝis Cicerono. Cicerono tie — kaj galloj tie ĉi.« Montrofingre li tuŝas en la mezon de l' manplato, ĉirkaŭsignante cirklon. »Galloy diras al Cicerono: Vi kapitulaci. Cicerono diri: ne. Galloy diri: bone, ni atendi ĝis vi malsati, treege malsati, morti de malsato. Cicerono voki Iduorikson, al li doni letero por Cezaro. Galloy kapti Iduorikso fari tiel.« Refoje tiu karakteriza mangesto. »Cicerono sendi Alvino. Galloy kapti Alvino fari mortinte. Cicerono demandi kiu esti kuraĝa, diri, kiu al Cezaro iri. Mi diri: mi esti kuraĝa viro, mi iri. Cicerono diri: vi iam esti libera homo, vi denove esti libera homo, se vi alporti al Cezaro letero; vi ricevi bieno kaj bovoj kaj ŝafoj kaj ĉevaloj kaj kaproj kaj ĉio, se vi alporti al Cezaro letero. Mi preni letero, ligi al lanco, teni sur ĝi mano. Malsaĝaj galloy nenio rimarki, min tralasi. Mi kuri ĝis romiaj militistoj renkonti, tiam demandi: Kie Cezaro? Militistoj montri: tie. Mi plue kuri, ĉiam plue, demandi, ĉiam kuri, demandi ĝis alveni. Ĉi tie mi kun letero de Cicerono.«

»Kie estas la letero?«

»Vi Cezaro?«



»Jes, mi Cezaro,« senpacience stimulas lin Cezaro.  
»Donu al mi la leteron. Nu, kie ĝi estas?«

»Letero jen.« La gallo manŝovas en siajn ĉifonaĉojn kaj eltiras neeldireble malpuran, grajnoĉifitan papereton, kiun li etendas al Cezaro. Tiu ĉi prenas la paperon el la mano, disfalde mangladas ĝin kaj, unurigarde, ensorbas la tutan enhavon. Li morte paliĝas.

»Ho, miaj kompatindaj knaboj!«

Jam denove revenas la sango en lian vizaĝon. Li purpurigas, la tempiovejnoj ekŝvelas. Lia flamega rigardo boras tra l' ĉambro.

»Hircio!«

»Cezaro?« alsaltas Hircio.

»Kuriero-oficirojn. Du, ne, tri. Seli kurierĉevalojn. Tuj!« Hircio estas jam for el la ĉambro. Cezaro faras du paŝojn, haltante ĉe la pordo: »Gvardiestro!«

»Imperatoro?« La homo estas jam ĉi tie.

»Alarmi la garnizonon! For!« La centuriono tuj forpafiĝas. Cezaro returniĝas en la ĉambron, ekrigardas la raziston:

»Hiparko!«

»Sinjoro?« La servisto, ankoraŭ kun la razilo en la mano, alŝoviĝas.

»La skribtabulojn kaj grifelon.« Hiparko rapidas al la tablo, dismalfermas kelkajn kunmetitajn tabuletojn, aldonante la grifelon. Cezaro alsidiĝas, ekskribante plej rapide. Ekstere jam tondras la alarmo.

Post kelkaj momentoj disflugas la pordo, enkuras juna oficiro.

»Kuriero preta!«

Cezaro etendas al li unu el la tabuletoj.

»Al Marko Krasso. Galope, kiom nur la ĉevalo povas elteni. Ek!«

»Servoprete!« anoncas sin la dua kuriero kaj tuj li havas alian tabuleton en la mano.

»Al Labieno. Ankaŭ, kiel ĵus dirite! For!«

»Servoprete!« (la tria.)

»Al Fabio. Rapide, rapide, rapide!«

Li estas jam sola. Nur la gallo kaj la razisto konsternite retirigis en la angulon. Cezaro refoje legas la papereton, kiun li ĉifis en la maldekstra mano. Kaj subite liaj okuloj eklarmas.

»Tiuj hundaĉoj!« li krias. »Miaj kompatindaj knaboj! Miaj kompatindaj, kompatindaj knaboj!« Li iras al la fenestro kaj, fruntopreme al la lignaĵo, li okulas eksteren en la malluman, gallan nokton de l' malfrua aŭtuno.

Denove enpaŝas Hircio. Cezaro returniĝas, liaj okuloj ekfajras trans Hircio al ambaŭ sklavoĵoj, la galla kaj la greka, kiuj ankoraŭ ĉiam staras en la angulo, apenaŭ kuragante spiri.

»Kion vi do volas ĉi tie?« li demandas nervoze.

»Sed sinjoro — mi devis vin ja razi,« elbalbutas la greko.

»Eh razi?« krias Cezaro. »Nun ne plu estas tempo por razado! Kiam la gallaj hundaĉoj elpagos al mi pro miaj kompatindaj knaboj, vi povos reveni!« Neniam ĝis nun oni lin vidis tiom furioza. Li rimarkas la timegajn okulojn ĉirkaŭe kaj, perforte sin bridante, daŭrigas voĉpremite: »Iru ja, Hiparko, donu al la gallo por manĝi kaj montru al li angulon, kie li povos satdormi. Nu iru.«

Hiparko gestas al la gallo kaj ŝoviĝas en lia akompano al la pordo. Cezaro postrigardas ilin, sed, ŝajne, li jam ŝanĝis la intencon:

»Gallo!« li vokas.

La vokito returniĝas, hezite ekhaltas.

»Venu pli proksimen,« ordonas Cezaro. Kaj kiam la gallo nur ŝanceliĝe obeas, Cezaro akras: »Pli proksimen!«

La gallo alpaŝas. Cezaro metas sur lian kapon la manon, kvazaŭ al la fidela hundo, kiu ĵus plenumis sian ordonon kontentige.

»Grandan servon vi faris al Cezaro kaj vi vidos, ke Cezaro scias ankaŭ rekompenci. De tiu ĉi momento vi estas libera homo kaj povas pretendi plenumon de iu ajn via deziro.« La gallo ekridaĉas, provante imiti la militistan saluton de l' romianoj.

»Ne estu tro modesta, kiam mi demandos pri via deziro.« La vizaĝo de la gallo eĉ pli ridaĉas, kvazaŭ li volus diri, ke Cezaro havu pri tio neniajn zorgojn. »Dume vi restos en mia proksimeco. Morgaŭ anoncu vin ĉe mi; vi ricevos la ĉevalon.« La gallo nun fakte terure ekridaĉis. »Vi gvidos nin al Cicerono. Kaj nun iru por manĝi kaj dormi.« La gallo malaperas, elpuŝante ĝuajn gorgosonojn. Cezaro turniĝas al Hircio. Malgraŭ doloro, furiozo, senpacienco, li rimarkas kun sincera aprobo, ke lia adjutanto jam survestis la marŝ-uniformon.

»Aŭlo,« li diras, »vi scias, kio okazis. Ĝi estas la plej terura frapo, ĝis nun min trafinta. Nun ni savution, kio estas savebla. Unue ni venu porhelpe al Cicerono antaŭ ol oni lin kun lia legio disbatos aŭ kapitulace malsatigos. Mia plano estas jena: ĉar mi ne povas lasi sen garnizono Samarobrion kun ĝiaj kasoj kaj provizejoj — kaj precipe kun ĉiuj gallaj garantiuloj, mi alordonis ĉi tien Markon Krasson. Li devas transmarŝi sian dudek kvin mejlan distancon ankoraŭ dum tiu ĉi nokto. Tuj post lia ekdeĵoro ni ekmarŝos. Sur-

voje al ni aliĝos kun siaj trupoj Fabio kaj Labieno. Plej malfrue post kvar tagoj ni devas esti ĉe Cicerono. Zorgu, ke ĉio estu marŝpreta. Granda trajno restas ĉi tie. Iru do.»

Hircio, atente aŭskultinte, mansalutas kaj forlasas la ĉambron. Denove alpaŝas Cezaro la fenestron kaj ekokulas eksteren en la nokton.

Tuj mateniĝos.

Dum la tuta nokto neniu dorme okulfermis. Marŝprete atendas la trupoj en siaj noktejoj, en la urbokomandejo kaj adjutantejo oni febre ellaboras la marŝplanon. Hircio staras en la pordego kaj senpacience rigardas laŭ la ŝoseo.

Fine klakado de hufobatoj. Ŝirigiĝinte el ombroj de l' krepusko, antaŭ la komandejo haltas rajdisto sur elĉerpita ĉevalo. Krurrigide li saltas de sur la ŝaŭmpenda, tremanta besto: la kuriero sendita al Marko Krasso.

Hircio paŝas renkonte:

»Nu, ĉu vi fine alvenos? Minimume dek fojojn jam demandis Cezaro pri vi?«

La kuriero volas respondi, sed ĉe la sojlo jam aperas Cezaro mem. Lia rigardo distranĉas la dormemajn okulojn de l' mortlaca aviz-rajdisto.

»Ho imperatoro,« elbuŝigas la juna oficiro per la peza, ekŝvela lango, »Krasso venas tujsekve: ne pli ol nur ok mejlojn li distancas.«

Cezaro senatente kapklinas kaj turniĝas al Hircio:

»La trupoj ek!«

## Legiano Glabrio

La legioj ne rapidas, ili flugas! Tra senfinaj barbaroj, trans ŝaŭmtorentaj riveroj, inter marĉoj kaj ŝlimajoj, ili trahakas al si la vojon furioze, rapidege. La okuloj estas direktataj rekte, sed la koroj flugas foren, antaŭ la urĝigeman ekspedicion.

Estas ĉi tie nur du el la ok: Labieno restis malproksime de la ekspedicio. Li kuŝas kiel alĉenita gardo-hundo; murmure li elŝovas ferajn dentojn kontraŭ la treverajn lupojn, kiuj embuske kaj sangavide rondiras lian tendaron — kaj la ceteraj kvin sidas tro malproksime por esti ĝustatempe alarmitaj ĉi tien.

Nur du el la ok — sed en sia brusto ili kolektis kuraĝon kaj batalopiron de ĉiuj ok kune. Zigzagaj gallaj ŝoseoj forglitas sub iliaj piedoj, unutakta klakado de l' marŝpaŝoj tondras tre foren tra la lando. Fumokolonoj tage, fajrokolonoj nokte, disportas la famon malproksimen, tre malproksimen: Romo venas por puni kaj venĝi!

La galla sendito, alportinta al Cezaro la helpvokon de Cicerono, forrajdis antaŭen sur la plej bona ĉevalo de Cezaro. Denove li portas sian lancon, denove estas volvita ĉirkaŭ ĝi skribajo. Ĝi estas kunmetita greke por nenion perfidi al la malamiko, se ĝi estus

hazarde kaptita; sed la enhavo estas roma, cezara: »Eltenu! Mi venas!«

Pli ol la vojduonon pasis en du tagoj la malgranda armeo: sep mil piedistoj, kvar mil rajdistoj. Kvankam la kruroj jam ŝanceliĝas pro lacego, la militistoj plenumas nur ribelmurmure la vesperajn ripozordonojn de l' oficiroj: se estus laŭ ilia plaĉo, ili marŝus la tutan nokton, la tutan tagon kaj ree la tutan nokton, por fine ja atingi siajn kamaradojn kaj plenumi la venĝon.

En la vespero de la dua tago oni ektendaris sur monteto meze de l' arbaro. Fortaj taĉmentoj eliris ekstere, disiĝante por kolekti brullignaĵon: la aŭtunaj noktoj en Gallio estas ja malvarmaj. Ĉiuj parolas nur pri ununura temo: kiam ni fine alvenos tien?

Du-tri homoj proksimiĝas al densa arbetaĵo kaj, reciprokante kelkajn vortojn, klinkorpe kolektas sekajn branĉetojn sur la arbara grundo. Al unu el ili ŝajnas, ke li aŭdis ian kraketadon. Tuj li avertas la aliajn. Ili enaŭskultas. Refoje kraketado.

»Ĉu iu ĉi tie?«

Senresponde. Sed el la arbetaĵo malrapide ŝiriĝas homfiguro. Ĝi staras rekte, apenaŭ distingeble, en la subiranta vesperlumo.

»Haltu! Supren la brakojn!«

Obtuza sono, kvazaŭ sufokita plorĝemo kaj terura ridaĉo samtempe. La figuro restas senmove. La vokinto alsaltas, sed tuj har-ekstare elpuŝas tranĉan krion de l' terurego: antaŭ li staras legiano sen la armilaro, en ŝirita lanĉemizo kaj etendante al li renkonte la brakojn; nur la brakojn, ĉar la manoj estas forhakitaj, la stumpoj bandaĝitaj per sangaj ĉifonoj. Nun oni povas jam klare distingi ankaŭ la vizaĝon, terure

rigidan, senvivan vizaĝon... anstataŭ la okuloj nur du sangaj krustoj kaj sur la palegaj, enfalintaj vangoj solidiĝintaj sangstrekoj.

»Kiu vi estas?« elbalbutas fine la vokinto.

»Tito Vigilio Glabrio,« respondas la figuro obtuze: la dek kvara legio, dua kohorto tria *manipulo*, unua *centurio*.«

»De kie vi venas, ho malfeliĉulo?«

»De Aduatuko. Ĉiuj aliaj estas mortigitaj. Mi mem tion vidis — ja, vidis!« Ekplorante li alpremas la brakstumpojn sur la malplenajn okulkavojn.

La aliaj terurite sin interrigardas. Tiam ili alpaŝas al la kripligito. »Venu kun ni,« diras la interparolinto. »Ni estas tute proksime: Cezaro jam ekmarŝis!«

»Do fine!« elmurmuras la legiano kaj, kvazaŭ li estus batita per bastonego sur la kapon, li falas teren kiel malplena sako.

Nur en la tendo de Cezaro li rekonsciĝas. La militestro, laŭ kies vangoj senĉese fluas larmoj, propramane lin lavas, vestas, metas sur sian kuŝejon, en verŝante al li manĝon kaj trinkon. Nun Glabrio tiom refortiĝis, ke li povas paroli.

Li ne lamentas, ne furiozas, li ne krias, ne malbenas, ne plendetas. Sed pli terura ol ĉio ĉi estas la ŝtona trankvilo, kovranta lian vizaĝon, la ŝtona trankvilo, pleniganta liajn vortojn. Mallaŭte, sensone, sed tamen aŭdeble ĝis la lasta angulo de l' muta tendo li respondas la demandojn. Li rakontas siajn travivaĵojn, rakontas ilin simple, mallerte; tamen al ĉiuj ŝajnas ke ili mem partoprenis en ĉio ĉi, ke la sanga tragedio plenumiĝis antaŭ iliaj propraj okuloj.

---

Al armiloj! Al armiloj! Tondre alarmas la trumpeto tra l' tendaro.

La militistoj, ĝuste ĉe kuirado de l' manĝo, forĵetas branĉofaskojn, kuirvazojn, grensakojn kaj kuras en la barakojn. Post nur kelkaj momentoj, jen la unuaj jam elsaltas kun kaskoj surkape, ledveŝtoj surkorpe, kun zonglavoj ĉirkaŭkole aŭ enbuŝe, kun ŝildoj kaj lancoj enmane. Ĉiuj kuregas al la kolektejo.

Tie jam staras centurionoj, multaj ankoraŭ sen la kirasoj nur kun kanbastonoj kaj nudaj glavoj. La alvenantojn ili tuj sendas al la kontraŭpafaj ŝirmiloj, kie ilin jam atendas kaj senhezite disdividas aliaj suboficiroj. Eĉ momenton ne tro frue: apenaŭ la remparoj estas maldense okupitaj, jam alfajfas trans la tendaron unuaj ŝton-, sag- kaj lanc-salvoj. Ankoraŭ tro alten celitaj ili estas kaj tial sen gravaj damaĝoj.

Tendar-estro Sabino staras ĉe la kolektejo. Li estas sangruĝa kaj jam la trian fojon devas ripeti al li la senspira trajnano fantazian rakonton pri la surprizatako de galloj. Gi okazis tiel subite, ke el ĉiuj, kiuj estis ekster la tendaro, eĉ deko ne revenis. Sabino estus ema kredi, ke la ekscita prezento estas nur timfantomo, se lin ne instruus pli klare la bonkonata obtuza tumulto transe de la remparoj. Tial li rigardas konfuzite al Kotto, kiu apudante lin turmentigas per necedema buko kaj, nur duonorele aŭskultante, direktodonas la preterkurajn centurionojn kaj militistojn. Samtempe li vomas sukajn blasfemojn.

Novaj salvoj kaj jam tute proksima tumulto montras, ke la atako plene disfurioziĝis. La interplektaĵo de l' remparo krakas kaj tondras sub pluvego de pafaĵoj. Ie-tie forsplitiĝas pecetoj de l' paf-niĉoj kaj la pafistoj, tie kaŭrantaj, kun freneza rapido alstre-



ĉas sagon post sago sur la pafarkon. Svingiĝas ĵetiloj kun plumbokugloj en maŝoj. La legianoj, ankoraŭ gardante multvalorajn lancojn, kolektas ŝtonojn kaj pikstangojn, falintajn proksime, kaj ŝutas ilin redone sur la atakantojn. Foje-foje iu aŭ alia disbrakas supren, forruliĝante laŭ la digo; de temp' al tempo la vunditoj, manpenante haltigi sangoŝprucon, ŝanceliĝe forlansas sian postenon, kiun tuj okupas aliaj kamaradoj.

Kotto saltas sur la remparon kaj korpokline ŝteliras laŭ la ŝirmobarilo, okulpionante la malamikojn tra l' paftruoj. La situacio estas bona kaj, se la militistoj ne perdos la spiritĉeeston, provizore minacas nenia serioza danĝero. Nenie ankoraŭ sukcesis galloj proksimiĝi al la remparo kaj pafoj de l' sagistoj terure ekstermas inter ili: falas tutaj vicoj; vane ili serĉas ŝirmon en la senarbigita kampeto kaj ŝajnas, ke la unua entuziasmo komencas perdiĝi.

»Sangmalvarme, kamaradoj,« ripetas Kotto ĉiam denove kaj kuras tien-reen post la abundŝvitaj defendantoj. »Nur sangmalvarme! Facile ni rompos la dentojn al tiu aĉa kanajlaro!«

Denove li saltas de sur la remparo kaj kuras al la kolektejo, kie ankoraŭ staras Sabino kaj, ekscitite rigardante ĉirkaŭ sin, disdonas milmil ordonojn, kvankam neniu havas tempon por ilin aŭskulti.

»Estas bone,« flegmas Kotto, kvazaŭ li ĵus revenus de l' ekzerca manovro. »Niaj homoj ne lasis surprize forfrapi al si la kornojn kaj radikale ili nun batregalas tiun aĉularon.«

»Ĉiuj al la paflokoj!« kriegas Sabino, neatentante liajn vortojn. »Ĉiuj senescepte sur la remparon!«

»Sed, kion vi volas? Eĉ sen tio ĉiuj jam estas tie. Postrestis eĉ ne unu por bone buki vian kirason. Per-

mesite?« kaj li mem streĉaranĝas la ŝultrorimenon de Sabino.

Ŝajne la flegmo de Koto trankvilige influas la ekscititon. »Dankon,« li elblovas. Kaj kun esprimo de senpova furiozo en siaj, kvazaŭ ĉiam timoplenaj, okuloj li abruptas: »Kion vi diras pri tiu fiago.«

Kotto iom ŝultrolevas.

»Ĉu ion alian vi atendis de la galloj? Sed nun ne estas tempo por psikologiaj primeditoj; nun estas la demando: kion fari?«

»Kion fari?« disokule ripetas Sabino. »Repuŝi la gallojn; kion ja alian?«

Kotto senpacience langoklakas.

»Nu, kompreneble; sed kiel konate, ekzistas defensiva kaj ofensiva defendoj. Kiom mi konas la gallojn kaj kiel, krome, mi juĝas la nunan situacion, estus ne malbone entrepreni grandan kontraŭatakon.«

»Vi pensas — ni devus la legianojn —«

»La legianoj jam staras en bona pozicio; sed bonvolu rememori, ke ni komandas ankaŭ kelkajn eskadronojn da hispanaj kavalerianoj.«

Sabino mire alrigardas Kotton kaj ekmeditas.

»Vi inspiris al mi bonan ideon,« diras li poste. (»Ordonu al la hispanaj rajdistoj elataki tra la ĉefpordego kaj —«

»Ili enfalos rekte en la inferan kirliĝon,« interrompas Kotto. »Guste tie ja estas la plej fortikaj pozicioj de la galloj.«

»Nu, kiom koncernas min, ili povas ankaŭ tra la malantaŭa pordego,« koleras Sabino.

»Sed tie estas la plej malbona grundo por la kavalerio.«

»Do, vi faru laŭplaĉe,« furiozas Sabino fortur-

niĝe. Kontente kapklininte, Kotto forrapidas al la staloj.

»Vi inspiris al mi bonan ideon,« li grumblas antaŭ sin. »Ho, malplena kap-melono! Alproprigi ideojn de l' aliaj, ja, tio plaĉas al vi, he?«

Antaŭ la staloj staras la kavaleriestro kun kelkaj siaj oficiroj.

»Decio,« diras Kotto, »ordonu al viaj homoj tuj enseliĝi kaj elrajdu tra la maldekstra flankpordo. Tie vi haltu en sendanĝera angulo laŭlonge de l' arbaro, batalviciĝu kaj ek sur la gallojn!«

La estro mansalutinte turniĝas al la staloj:

»Al-kune!«

Kotto ne atendas la kolektiĝon. Rapide li returniĝas sur la remparon kaj denove komencas sian ĉirkaŭiradon.

La batalo disvolviĝis laŭdezire: dume la legianoj suferis relative malgrandajn perdojn, ĉe la atakantoj estas multaj mortigitoj kaj vunditoj. Ŝajne la batala entuziasmo de l' galloj jam iom estingiĝis. Kelkloke, vere, ili ankoraŭ atakas, sed la plimulto retiriĝis malkantaŭen; ili limiĝas siajn penojn al ĵetilpafado kaj terura hurlado el la sendanĝera malproksimo.

Kotto haltas ĉe la maldekstra pordo de l' tendaro. Guste altrotas la kavaleria trupo.

»For la pordon!« li krias. »Antaŭen kaj ek sur ilin, Decio!« Barikadoj, vergofaskoj, tersakoj flugas disflanken. La kavalerio eltrotas eksteren, viciĝas kaj ekgalopas laŭ la deklivo sur la surprizitajn gallojn.

Kotto ilin postrigardas.

»Tio sufiĉos por ili,« kontente li diras antaŭ sin.

Duonhoron poste la kavalerio revenas paŝe. La surprizatako dispistis la gallojn en unua surfalo. Kriaĉe kaj hurle diskuris iliaj amasoj tra densaj arbaroj en

la ĉirkaŭaĵo. Tiel estas repuŝita la atako kontraŭ la tendaron.

La kavaleriestro retenas la ĉevalon antaŭ Kotto kaj fiere raportas:

»La ordono plenumita. Unu viro kaj du ĉevaloj vunditaj.« Kotto ridete kapklinas.

»Brave, ho Decio. En la raporto al Cezaro vi estos menciata. Eniru!« Tiam li turniĝas al Sabino: »Por nun ni liberiĝis de tiu kanajlaro; jam nun mi scivolas pri ilia sekvonta fiago.« Kvazaŭ responde, ekstere eksonoras longtira hurlado. Santempe venas la deĵorulo kun sciigo, ke ekstere staras du senditoj kun verdaj branĉoj.

»Pafu la hundaĉojn,« elgrumbias Kotto.

»Ne!« rapide endiras Sabino. »Ne estu tro frua, ho Kotto! Eble ili havas ion gravan por diri. Enkonduku ilin!«

»Ĉu en la tendaron?« ekkrias Kotto. Kaj post mallonga paŭzo li energie decidiĝas: »Mi mem parolos kun ili.« Li postsekvas la deĵorulon, kiu direktiĝis al la malantaŭa pordo.

Post longeta tempo li revenas.

»Guste kiel mi supozis,« li diras al Sabino. »Nia energio martelis timon en iliajn ostojn kaj nun ili deziras trakti. Ambiorikso petas, ke vi sendu al li iun, al kiu li povus komuniki gravajn aferojn.«

»Ambiorikso?« miregas Sabino. »Kion li farus ĉe la eburonoj? Li ja estas en tre granda favoro ĉe Cezaro.«

»Kiel ankaŭ ĉiuj aliaj eburonoj; kaj tamen estas nepridubeble, ke hodiaŭ ili provis venkopreni nian tendaron. Sed, pri tio ĉi poste; nun mi deziras scii, kion mi respondu al la friponoj ekstere. Miaopinie oni de-

vus respondi, ke ili plej rapide malaperu, antaŭ ol ni per kelkaj boncelitaj sagoj ektiklos iliajn dorsojn.«

»Eh, kian ideon vi havas! Kian ideon vi havas!« koleras Sabino. »Ambiorikso estas elprovite fidela: ofte ni ricevis ĝuste de li la plej gravajn informojn. Ne, ne, se li volas al ni ion komuniki, estas tio certe plej valora. Mi sendos al li Junion, kiu jam ofte havis mision ĉe li. Kaj —« li ĉirkaŭrigardas kaj mansvingas al sia nevo, volontulo, kiu staras ne malproksime kaj ĵus ordonis, ke sklavo purigu el lia ledjako makulon. — »Arpineo lin akompanu. Eble tiel la junulo havos ŝancon por distingigi.«

»Mi dezirus scii, kiel ja?« grumbblas Kotto. »Sed vi estas la estro kaj vi komandas.« Volvinte sin en la mantelon, li mishumore kaj senvorte aŭskultas la detalajn instrukciojn, kiujn Sabino donas al ambaŭ sendotoj.

Preskaŭ noktiĝis, kiam la senditoj revenas. Arpineo, akompanate de interpretisto Junio, rapidas al sia onklo. Ambaŭ estas ekscititaj kaj samtempe videble fieregaj pro graveco de l' komunikado, farita al ili.

»Ambiorikso akceptis nin unue tre malvarme,« ekrakontas la volontulo. »Sed tio estis nur masko: apenaŭ li retiriĝis sole kun ni, li jam fariĝis tre konfidema kaj korvarma. Li rememorigis pri la favoraĵoj, donitaj al li de Cezaro, kaj certigis pri sia dankemo al la imperatoro. Kaj, ke li nur sub premo de la tutgalla ribelo entreprenis la atakon.«

Sabino buŝkaptas por aero.

»Tutgalla ribelo!«

»Jes, la galloj hodiaŭ sammomente ekatakis ĉiujn transvintrejojn, por ke unu legio ne povu helpi al la alia. Sed li volas prui al Cezaro sian dankemon: li

plej insiste vin petas, ke vi kun viaj trupoj ĝustatempe retiriĝu en sekuran lokon. Post du tagoj alvenos grandega germana militistaro; se vi foriros antaŭ ĝia alveno, li garantias al vi liberan formarŝon tra sia regiono. Vi devus, liaopinie, klopodi por veni al Cicerono, kiu distancas apenaŭ kvindek mejlojn, aŭ al Labieno, kies transvintrejo estas ne tre malproksime.«

Kotto moke ekridegas.

»Liaopinie,« li furioze rimarkigas.

»Ĉu vi trovas la proponon tiom malbona?« demandas Sabino. »Se hodiaŭ vere okazis la ĝenerala atako — kaj mi persone emas tion kredi —«

»Vi emas, ĉu?«

»Certe!« rediras Sabino nun jam pli akre. »Ĉu alie tiu mizera gentaĉo kuraĝus ataki la roman trupon?« Li ekrigardas la malluman vizagaĉon de Kotto kaj iĝas cedema. »Ho Kotto,« li diras pacige, »ne disputu nun. Ni ja ne volas ludi komediaĉon ĉi tie antaŭ la militistoj, sed interkonsiliĝi pri la konsiderinda propono.«

»Pri kio ja interkonsiliĝi?« ekpacias Kotto. »Pri kio ja? Cezaro nin sendis ĉi tien en la transvintrejon; ni do devas ĉi tie resti. Vi ja ne lasos vin timigi per malicaj aludoj de Ambiorikso! Unue, li mensogas; due, ni povas ĉi tie, en la fortikigita tendaro, bonege kontraŭbatali eĉ la laŭdiran germanan militistaron, ĝis alvenos helpo el la plej proksima garnizono aŭ de Cezaro mem; trie, mi pensas, ke entute estas abomenige kaj hontinde formi decidon en tiom gravaj aferoj laŭ la plaĉo de l' malamiko.«

Dum ilia pli kaj pli laŭtiganta interparolo alvenas ĉiam pli multaj militistoj, kiuj densavice ekstaras ĉirkaŭ ili: stab- kaj trup-oficiroj, ankaŭ legianoj. La

vortojn de Kotto akceptas konsenta murmuro. Tial Sabino falas en paroksismon.

»Kompreneble!« li krias. »Sed, se ni ne finos ĝustatempe pri la germanoj? Aŭ, se al iu el la proksimaj garnizonoj okazos malfeliĉo? Tiam estos tro malfrue por foriro! Eh, vi ne atendu Cezaron: li ja forvojaĝis en Italion. Nun ni dependas nur de nia propra forto. Gallio disbrulis: kaj —« li ripetas sian antaŭan argumenton, kies efikon sur Kotton li rimarkis — »la eburonoj neniel kuraĝus solaj entrepreni tiun atakon; la Rejno estas proksime; la germanoj brule sopiras revengi la malsukceson en ĝia valo. Mi konsideras nur la aferon mem kaj ne, kiu donis la konsilon. Mia propono estas ĉiuokaze pli sendanĝera: se nin ne trafos neantaŭvidebla akcidento, ni venos sendanĝere al la plej proksima legio. Male vi — kio ja estas sekvo de via propono?« Liaj okuloj ĉirkaŭkure serĉas tiujn, kiuj antaŭe aprobis la vortojn de Kotto. »Eble ni evitos la momentan danĝeron; sed nur por mortaĉi ĉi tie, en la tendaro, de malsato.«

Malaprobaj. Precipe la pli aĝaj, militspertaj, trupoficiroj klare montras sian malkonsenton. Nun li pli fortigas la voĉon, por ke lin aŭdu eĉ la lastvica militisto sur la svarmodensa kolektejo.

»Nu bone, faru kion vi volas! Mi estas la lasta, kiun timigus la penso pri l' morto; sed, tiuj ĉi tie memoru, —« li montras la legianojn — »se okazos ia malfeliĉo, ke ili vin igu priresponda! Mi kondukus ilin, sendube, en du tagoj al la plej proksima legio kaj kune kun ĝi rekomencus la batalon; nur al vi sola ili danku, se forpuŝitaj kaj tute forlasitaj ili pereos ĉi tie de malsato kaj glavo!«

Kotto kolerege lipmordas.

»Tiel ja oni ne povas interkonsiliĝi,« li fine elbuŝigas.

»Mi petas pri la konsult-kunveno de l' oficiraro.«

»Sed dum la tuta tempo mi volis ĝuste la samon,« sensarĝigite diras Sabino.

Ĉirkaŭ noktomezo disiras la kunvenintoj. Post senfinaj, senfruktaj debatoj, Kotto kun sia partio cedis al petego de la ceteraj por ne alvenigi per sia obstineco malfeliĉon kun neantaŭvideblaj sekvoj. Oni decidis ĉiuokaze foriri.

La cetero de l' nokto estas dediĉata al pakado. Kiel ĉiam dum longaj militiroj, ĉiu militisto kolektis amason da senutilaj aĵoj, fakte nur balastojn, sed pri kiuj li ne volas rezigni. Ankaŭ nun estas malfacile decidi, kion kunpreni, kion forlasi. Finfine la tuta legio kaj duono estas marŝpreta kaj Sabino donas koresarĝe la signon por ekiro.

La legioj ekiras marŝvice, disdividite en kohortojn. Post la kavaleria avangardo rajdas Sabino kaj Kotto kun la ceteraj staboficiroj, ilin sekvas kohorto de l' unua legio kun la agloportisto meze. Kvinto Lukanio ĝia komandanto, la maljuna urs-miena bravulo, duonvoĉe interparolas kun sia antaŭulo en tiu ĉi rango, Tito Balvencio. Li kiel veterano restis en tiu ĉi trupo, ĝuante sian reputacion kaj gardante la junfreŝan filon de sia amiko, servantan kiel legiano inter la dekkvaranoj. Sekvas la ceteraj kohortoj, unue tiuj de la legio, poste la kvin sendependaj. Tute ĉe l' fino treniĝas la trajno, flankata kaj ŝirmata de kavaleria taĉmento.

Malserena, nebula mateno. Rigide kaj minace borderas la ŝoseon ambaŭflanke altaj pinoj, sub kiuj



abunde interplektiĝas arbustaĉoj. Nek voĉeto aŭdeblas nek vivaĵo videblas. Sabino, kiu turmentige pasigis la nokton serĉante respondon al la propra demando, ĉu eble la konsilo de Kotto tamen estis pli saĝa, reakiras freŝan energion kaj komencas laŭdi la honestecon de Ambiorikso. Ja, eĉ pli, li serĉas motivojn por senkulpigi la gallan princon.

Kotto ne respondas al la riĉbabila muelado de sia superulo. Envolvite en sian mantelon ĝis super la oreloj, li sidas ensele kun streĉitaj sentorganoj kaj senlace okulas dekstren-maldekstren; la nunmateno rememorigas al li tiun marŝon tra la ensorĉita lando de l' nerveoj; ankaŭ tiam regis tia silentego, subite eksplodinta en milgorĝan atak-hurladon. Nur unu solan fojon li interrompas la vortotorenton de Sabino:

»Tamen ni devus elsendi ankaŭ la flankogvardiojn.«

»La flankogvardiojn?« miregas Sabino. »Por kio ja? Nu, vi mem vidas, ke Ambiorikso plenumas sian vorton.«

La vojo ekserpentas iom krute malsupren, en la mallarĝan valon. Singarde malsupreniras militisto post militisto, nezorgante por momento pri la kutimata ordo. Malsupre la marŝkolono daŭrigas en proksimume ordaj vicoj sian vojon.

Subite la kavaleria avangardo ial ekhaltas. Kelkaj militistoj bule kunpremiĝas, ŝajnante ekscititaj kaj embarasataj. Kotto rektiĝas el la selo kaj alrajdas pli proksimen: iun el la legianoj kun sangkovrita vizaĝo, pli trene ol subtene, oni rekondukas al la trajno.

Nun okazas tio, kion dum la tuta tempo Kotto timis kaj kion li preskaŭ atendis: frostiga blekego,

kvazaŭ de sennombraj bestoj, ekhurlas, ŝajne, el ĉiuj flankoj; samtempe displuvegas sagoj, pikstangoj kaj ŝtonoj; la galloj jam svarmas el inter arboj.

Dens-amase kiel akridoj, sovaĝe kiel lupoj, ili sin ĵetas samtempe sur la kavalerian avangardon, sur flankojn de la marŝkolono kaj sur la trajnon. Antaŭ ol la surprizitaj legianoj retrovas la ekvilibron, amaso da ili jam kuŝas mortigite kaj vundite sur la tero. La ceteraj interpremiĝas kiel ŝafaro, jam de l' unua momento en terura malordo; venkis ilin paniko, kiu kaptis eĉ la plej kuraĝajn, la plej flegmajn.

Sabino, kompreneble, tuj perdas la spiritĉeeston. Kaj dum la larĝe disstreĉitaj okuloj terurite rigardegas el la pala vizaĝo, li elbuŝigas apenaŭ kompreneblajn, interpuŝigajn kaj reciproke kontraŭajn komandojn; nu, tiuj komandoj, kaptitaj kaj plu donataj de l' ĉirkaŭantoj — se entute iu kapablas aŭdi kaj kompreni — nur senmezure pligrandigas la konfuzegon. Blasfemoj, furiozaĵoj, malesperaj vokoj, veado, dismuĝas intermiksiĝe. Senĉese hajlegas sagoj kaj pikstangoj; senĉese frakasas pezaj ĵetilstonoj; longaj gallaj glavoj hakas larĝajn sangajn koridorojn en tiun teruran kaoson de l' estaĵoj, kiun oni apenaŭ povus nomi homa, sed kiu, nur antaŭ kelkaj momentoj, en sia laŭorda forto estis faktoro de l' terura potenco.

Nun Kotto energie prenas la aferon en siajn manojn. Bridgvidante la ĉevalon de Sabino, kiu kondutas malespere, li trabatas al si vojon ĝis libera loko de l' valfundo. Survoje li renkontas agloportiston Petrosidion, kiu — kiel ankaŭ plimulto de l' malnovaj militistoj — post la unua surprizo jam retrovis la spiritĉeeston. Glav-enmane li nun atendas okazon por la reatako. Kotto prenas lin kun si kaj, rektiĝinte alten, li brakleve

ekkriegas per la voĉo, kiu por momento supertondras la tutan tumulton:

»Kamaradoj! Karoon ĉirkaŭ mi!«

Kelkaj veteranoj tuj obeas. La centurionoj puŝas siajn taĉmentojn al la centro, farita de Kotto, kie jam ekbrilis la aglo. Du trumpetistoj aperas — nur dio scias de kie — kaj plenpulme, senĉese, signalas: »Alkune!« La kaoso komenciĝas iom post iom ordiĝi.

Sed, ĉe la trajno falĉas morto. La rajdistoj ĉevalglitante laŭ la deklivo kaj tial plene sendefendaj, estas tuj ĝis la lasta homo forglavitaj. Tamen multaj militistoj ne volas rezigni pri la trezoroj en la pakajoj. Tial oni senĉese vidas kiel unuopuloj klopodas veni al la trajno. Komprenoble, ili falas antaŭ ol ili ĝin atingis.

Refoje Kotto supertondras la tumulton:

»La trajnon por nun oni forlasu! Kiu ne restos ĉe ni, mortos!« Tio helpas; sed Kotto rimarkas, kiel la sunbrunaj, cikatraj vizaĝoj ĉirkaŭ li paliĝas: la legianoj ekkomprenis, ke nun venas batalo por vivo aŭ morto.

Ankaŭ la galloj tion ekkomprenas; ĝojhurlas ili sin ĵetas sur la malvaste interprematan trupon.

Sed ĝi ne plu estas amaso da senhelpaj ŝafoj, ĝi estas fera erinaco, kies pikiloj elstaras ĉiuflanken: Kotto sukcese ripetis la manovron de Cezaro el la nervea batalo. Eĉ pli: la legioj donas kontraŭbatojn kun terura energio. Jen ĉi tie, jen tie ekkuras iu kohorto antaŭen kaj, enhakante ĉirkaŭ si rondon el sango kaj teruro, ĝi denove revenas en perfekta ordo.

Longaj, nekompreneblaj vokoj laŭlonge de l' galaj vicoj. La sovaĝuloj retiriĝas en la densajn arbarojn, malaperante tiom rapide, kiom rapide ili aperis.

La legianoj uzas la spirpaŭzon — ili ja scias bone, ke ĝi ne daŭros longe — por sin iom ordarangigi;

forpuŝitaj revenas al siaj taĉmentoj, aliaj nur nun elprenas el la ujoj kaskojn, la vundetitaj bandaĝas siajn gratstriojn, dum la pli grave vunditajn oni portas en la mezon de l' karoo.

Sabino, iom rekonsciiginte, zorge rigardas la sang-  
an, elŝvelan buŝon de Kotto.

»Vi estas vundita?« li demandas.

Kotto, premante la maldekstran manplaton sur la lipojn, senpacience forgestas per la dekstra mano, teranta la glavon.

»Ŝtono trafis mian vizaĝon,« sible li respondas, »kaj elbatis kelkajn dentojn. Sed por tio estos poste tempo: jen, la sovaĝaj bestoj denove revenas.«

Li estas prava: denove ekmuĝas la atakhurloj de l' galloj, denove ekkrakas sur la karoon pafpluvego.

Sed la malamikoj ŝanĝis sian taktikon: singarde ili ne proksimiĝas; nur el distanco, kaŝante sin post arboj, ili jetŝutas siajn pafaĵojn.

Kelkaj kohortoj ekiras antaŭen por purigi la ĉirkaŭaĵon. Tuj kiam ili proksimiĝas al la atakantoj, tiuj kure retiriĝas; nun la kohortoj returniĝas por atingi la karoon, sed la forkurintoj estas jam denove ĉi tie; el ambaŭ flankoj de l' arbaro galloj elsvarme sin jetas sur la izolitajn taĉmentojn, kiuj sukcesas retiriĝi nur kun grandaj perdoj. Du aŭ tri kohortoj ekprovas rezisti sur la sama loko, sed ili estas ĉirkaŭataj kaj, post furiozega pugnobatalo, ekstermitaj.

Kaj tio senĉese ripetiĝas: kie ajn unu el la ferlangoj ekkuras antaŭen, ĝi trafas en malplenon; sed kiam ĝi retiriĝas, tuj ĝin surfalas murdemaj pikmuŝegoj kaj ĝi malaperas kvazaŭ tersorbite.

Ekvesperas. La legioj, pasiginte la tutan tagon en la plej akra batalo sen ereto da manĝaĵo aŭ gluteto

da akvo, staras ankoraŭ ĉiam firme kaj senŝancele. Sed ili suferis terurajn perdojn: plimulto de la suboficiroj falis, inter ili ambaŭ plej altrangaj, la eksa kaj la nuna, tutaj kohortoj estas ekstermitaj; el la postvivantoj nur kelkaj restis nevunditaj. Nun Sabino entreprenas lastan malesperan savprovon: li manvokas sian interpretiston kaj flustras al li kelkajn vortojn. Tiu ĉi kaptjesas, trapuŝas sin tra la karoo kaj brakleve ekkuras al la galloj. Oni vidas lin interŝanĝi kun kelkaj galloj durti vortojn, tiam la tutan grupon forglutas la arbarden-saĵo. Kotto mem nenion rimarkas, ĉar li rigardas per la elruliĝintaj, sangsubfluaĵoj okuloj la senĉese surkraktantan pafhajlegon kaj duonvoĉe siblas tra la elŝvelintaj lipoj blasfemojn.

Post nelonge reaperas la interpretisto. Facilmove saltinte el la arbaro, li transkuras la liberan interspacon, trapuŝas sin denove inter la densaj vicoj de la legianoj kaj komencas vikle alparoli Sabinon, kies vizaĝo iom post iom sereniĝas. Samtempe, kvazaŭ fortranĉite, ĉesas la pafpluvego.

Surprizite ekrigardas Kotto supren al Sabino. Li vidas kiel la interpretisto viglageste parolas, li vidas, kiel ekbrilas la okuloj de Sabino en ia nekomprenebla espero. Kotto alkliniĝas el la selo tien:

»Nu, kio okazis?«

»Kotto,« respondas Sabino, dum la vervo preskaŭ sufokas lian voĉon, »ni estas savitaj.«

»Savitaj?«

»Mi sendis la interpretiston al Ambiorikso kaj esperas, ke ni povos nin ĉiujn savi: li invitas nin al intertraktoj. Ĉu vi volas kuniri?«

Kotto ekflamiĝas. Kriego de protesto volas el-

ŝpruci. Sed li ĝin subpremas dirante en glacia kaj kru-  
da tono, finanta ĉiun pluan diskuton:

»Mi ne iras al la malamiko, tenanta la armil-  
aron.«

Sabino timigite alrigardas lin kaj volas respondi; sed tamen li preferas prisilenti kaj ŝultroleve fortun-  
iĝi. Kunkolektinte ĉiujn proksimajn staboficiojn kaj centurionojn, li elrajdas, akompanate de ili, el la karoo. Ĉe arbarrando atende akceptas ilin kelke da emi-  
nentaj galloj kaj forkondukas profunde en la arbaron.

Minutoj da korporema atendado, ĉiu aparte daŭras senlime, eterne. Denove laŭ sia kutimo la galloj dronis en la arbaron, sed laŭ sennombraj signetoj oni sentas, ke ili estas ĉi tie, atendante kun mano sur lanco aŭ pafarko.

Tra l' truoplena karoo ekkuras flustrado. La proksimaj legianoj aŭdis la vortojn de Sabino. Nun ili flugas de l' buŝo al buŝo; pluportataj, misformataj kaj sencŝanĝitaj de la vekiganta vivespero, ili fatale efikas paralizan rigidigon. La dense interpuŝitaj vicoj malfirmiĝas, jam ekformiĝas grupoj: en kortrema ekscitigo kaj kun espereto en la animo priparolas ti-  
uj mortkondamnitaj la subitan savŝancon. Jam ŝajnas al kelkaj, ke oni el la arbaro amike mansvingas al ili, al la aliaj, ke ili jam vidas la militestron kun sia stabo revenanta.

Subite disfendas la aeron denove la hurlado de l' galloj, eĉ pli sovaĝe kaj pli tondre ol ĝis nun. Ĝi estas la kortremiga kriego de l' venkebrío. Samtempe ili prematakas el ĉiuj flankoj, jetegante sin sur la karoon, kiu ne povas ĝustarapide kunfermiĝi; ili svingas per siaj grandaj glavoj — dum super ili sur longaj lanc-

oj balanciĝas la sangŝprucaj kapoj de Sabino kaj liaj akompanintoj, kvazaŭ salutante la pereontan grupon.

Ciu nun scias: jen la fino! Unusalte deĉevaliĝas Kotto kaj trapuŝinte sin en la unuan vicon, li ĵetegas sin en la plej densan atakosvarmon. Multaj lin sekvas. Oni vidas kiel kolerfreneze li hakas ĉirkaŭ sin, oni vidas kiel ĵetas sur lin tuĵaj svarmoj. Nur kelkfoje ankoraŭ flugleviĝas lia brako kun la glavo, tiam dronkovre kunfermiĝas super li la torento.

En la sekvanta buĉado, malespere rezistas ankoraŭ nur la kerno de l' karoo, la elharditaj veteranoj, brustŝirmante la aglon. Kaj dum ĉirkaŭ ili oni forfalĉadas tutajn vicojn da kamaradoj, ili malrapide, penplene traglavas al si vojon en la direkto, laŭ kiu ili venis. Ĉiu paŝo postulas sangon, sed tamen ili tratabiĝas antaŭen. Dume la vesperiĝo apogas iliajn klopojn. Iom post iom ili reatingas la montvojeton kaj, suprenirante, ili batas ĉirkaŭ sin, kiel vunditaj leonoj. Paŝ-al-paŝe ili progresas supren kaj fine alvenas sur la altan ŝoseon — proksimume nur ducent legianoj.

Sed nun ilia rezistemo estingiĝas. Ili ekkuras, ekkuras, kvazaŭ vete kun la morto, por savi almenaŭ tiun etan postreston de l' vivo — ĝis fine, plene elĉerpitaj kaj senspiraj, ili atingas la remparojn, elstarantajn ŝirme, nedifektite kaj konsole, kiel oni ĉimatene ilin lasis.

Refoje ĉirkaŭitaj de l' galloj ili kontraŭstariĝas por la lasta batalo. Alruliĝas ondo post ondo, sed kun la fidelaj remparoj postdorse ili staras kaj batalas tiel grandioze, tiel heroe, kiel neniam ĝis nun en la sennombraj bataloj, kiujn ili plenumis por la gloro kaj honoro de Romo. La agloportisto, sangante el mil vundoj sentas, ke la fina elĉerpiĝo estas jam prok-

sime; lastafoje li streĉas sian tutan forton kaj ĵetas la sanktan emblemon trans la remparo en la tendaron. Nun, imitante la ekzemplon de sia komandinto, li ĵetegas sin glavsvinge inter la malamikojn. Pluraj el liaj kamaradoj faras kiel li. La resto saviĝinte en la internon tra la pordego ĝin tuj barikadas.

Noktiĝo malhelpas la gallojn tuj kurataki. Tial ili kontentiĝas pri sensistema ĵetŝuto de amaso da pikstangoj kaj ŝtonoj en la tendaron, samtempe ĝin ĉirkaŭfermante. Tra la tuta nokto, hurlante siajn triumfajn kantojn, ili sidas ĉe fajroj de gardodejoruloj.

Sekvantan matenon al la remparoj singarde proksimiĝas iliaj spionoj. Nenia voĉo aŭdebla, nenia malhelpo kontraŭ ili. Alvenas plifortigaj amasoj. Ankaŭ nun nenia signo de l' kontraŭstaro. Fine la plej kuraj ekriskas surgrimpi la remparojn. La granda amaso ilin sekvas. Sed en la tendaro ili trovas nur mortinton apud mortinto: ĉiun kun la propra glavo en la brusto...

---

Glabrio finas. La aliaj mutas. Jen sidas Hircio enpuŝinte la kapon inter la manojn kaj ŝirante la harojn; Pollio, mortpala, apogis sin al la tendostango kaj ŝirlarĝe okulegas; Fabio promenas tien-reen, lipmordante ĝissange; Cezaro sidas ĉe la kapo de l' kripligito kaj karesas lian frunton, vangojn, ja, senĉese lian frunton, liajn vangojn.

Post kelka tempo Glabrio rekomencas:

»Min kaj kelkajn kamaradojn ili kaptis antaŭ la tendaro: estis ja tro multaj. Tutan nokton ni kuŝis ligitaj. La alian tagon — kiam ĉio estis finita — ili buĉis la kamaradojn kiel bestojn. Kiam ili venis laŭ-



vice ĝis mi, ili ĉesas — interkonsultiĝas — kaj — « li mutiĝas, dum obtuza stertoro ŝprucas el lia brusto.

»Ho ne parolu, infano mia, ne parolu,« voĉas Cezaro milde, mole, kvazaŭ patrino mem. »De nun Cezaro estos via okulo kaj viaj manoj. — Nun trankvilu, knabo mia.« Ankaŭ el lia brusto stertoras; sed ĝi sonoras kiel furioza blekego de l' terure rabiĝinta murdo-  
besto. Lia voĉo ektondras: »Ili pagos al mi pro vi tiom severe, ke vi mem ekkrius, se vi povus tion vidi: sufiĉe jam!« La tondra voĉo denove mildiĝas, mole ekvarmas: »Nu, venu, ho infano, kaj trinku, trinku!«

Leviĝinte li prenas vinkruĉon, starantan sur la tablo, kaj ekhaltas. De sia fingro li demetas la ringon kaj, metante ĝin super la kruĉon, li turnas la ŝtoneton. Bruna pulvoro ŝutiĝas en la vinon kaj dissolviĝas. La aliaj retenas la spiron, rigardas: ja, ili jam komprenas. Per la maldekstra mano Cezaro levas la kapon de la legiano, per la dekstra almetas surlipen la kruĉon. La kripligito avido trinkas. Subite li streĉiĝas, la brakstumpoj disflugas supren kaj tuj, velkinte, refalas. Lia korpo etendiĝe jam rigidiĝis.

»Dormu, ho knabeto mia,« duonvoĉas Cezaro kaj per senlime delikata gesto sternas sian mantelon super la mortinton.

## Ho Lando mizera!

La vicgvidantoj kolektiĝis en la komandejo de Samarobrivo kaj atendas Cezaron. Ĝi estas la sama ĉambro, en kiu Cezaro akceptis sciigon pri la katastrofo ĉe Aduatuko. Ankoraŭ nun ŝajnas, ke ŝvebas io de tiu fatalaĵo en la aero. La vicgvidantoj kuraĝas nur duonvoĉi interparolojn kaj iam-tiam direkti timeman rigardon al la pordo: ĉu denove enpaŝos la fatala sendito?

Venis ili ĉiuj. Siajn legiojn ili lasis en la bone fortikigitaj tendaroj, sub komandoj de la militistaj *tribunoj*, kun severa ordono: entrepreni nenion, neprenenion. La ordono estas tiom severa, ke eĉ ne unu kuraĝus ĝin malobei. Jen staras Labieno, kies bela, malvarma vizaĝo estas flegita — malgraŭ kvin militjaroj — kvazaŭ li ĵus venus de la korso ĉe l' Sankta Ŝoseo; lin apudas Fabio kun sia degenerinta tigrobuŝo, flustrante iam-tiam pinĉrimarkojn pri iu el la ĉeestantoj; Roscio kokete blovŝveligas sian larĝan bruston, super kiu briletas dekoracioj pro persona braveco — li ja estas famfama en la tuta armeo kiel freneze kuraĝa; Kvinto Cicerono, kies iam pufaj vangoj perdis sian rondecon pro la suferoj dum la sieĝado, klopodas gajni simpatian de Marko Krasso — Publio estas jam en Sirio kun la patro; Trebonio kun ŝtona oficmieno lignokuras mute kaj man-surdorse tien, reen; paŝba-

lance, kiel vera kavaleriano, promenetas Minucio Basilo de grupo al grupo; li estas gracitalia, eleganta kaj iom mens-malvasta. Planko kaj Vokacio staras malantaŭe kaj pribabilas siajn militrememorojn.

El la apuda ĉambro penetras fragmentoj de diktaĵo aŭ pli ĝuste de pluraj diktaĵoj, ĉar Cezaro plej volonte plenumus en la sama momento ĉiujn aferojn. Kaj la adjutantoj kun skribistoj apenaŭ orientiĝas en tiu konfuzaĵo, kiun sole li mem povas malimpliki:

»— — mi lasas al vi decidi — ĉu estus prave — oferi Gabinion, kiu dum tiom da jaroj — montris sin ĉiam plej uzebla kaj konfidinda.«

»Tio rilatas al Pompejo!« elflustras Fabio al sia najbaro. »Oni ekprocesis kontraŭ Gabinio pro malkorektaĵoj en la provinc-administrado kaj Pompejo preterlasis malhelpi, ke li glitfalu!«

»Cezaro furiozos,« reflustras Labieno kun dusenca rideto.

»— — pro mia amikeco — influu vian filon — ke li siajn poetajn kapricojn — iom bridu —«

»Tio rilatas al maljuna Katullo,« reflustre malicas Fabio. »La juna verkis pri Cezaro poemon akran kiel vinagro. Jen:

Heredon drinke profani,  
Popolojn brute sangbani,  
Ĉe Ponto, Taja ĉe l' rando.  
Nu, keltoj, britoj, kuraĝe!  
Friponon frapu sovaĝe,  
La monstron for el la lando!«

Li ruze ekpalpebrumas. »Nu?«

»Mil diabloj!« Labieno tenas la manon antaŭ la buŝo por kaŝi sian ridon.

» — — ke tiun sensencaĵon pri la diktatoreco — oni fine jam klarigu — ĉar ni intencas — «

» Al Marko Antonio, la popoltribuno, « flustras Fabio.

» Mi scias, « kapjesas Labieno. » Pompejo ekstras bis al la diktatoreco. «

» Nu, ĉu ĝi estus tiom malbona? «

Labieno estas jam respondonta, sed interrompas.

» Silenton: ili venas. «

La pordo de l' flankĉambro malfermiĝas, aperas Hircio:

» La imperatoro! «

Ĉiuj starrektiĝas.

Eniras Cezaro en kiraso, sub la nigra mantelo, kiun li — anstataŭ la ruĝa — portas ekde la katastrofo de Sabino kaj Kotto. Lian olivkoloran vizaĝon enkadrigas densa hirtipikila barbo; la koleraĵoj, iam elparolitaj en la sama ĉambro al la greka sklavo — ricevis por li valoron de ĵuro: tranĉilo kaj tondilo ne tuŝos liajn barbon kaj hararon antaŭ ol estos venĝita la surprizatako ĉe Aduatuko.

Per malzorga gesto li redonas la saluton al la vicgvidantoj kaj, forprenante tiel la rigidecon de ilia sinteno, li paŝas antaŭ ilin kaj ekparolas tuj kernotuŝe:

» Mi venigis vin ĉi tien, ĉar fine miaj manoj estas liberaj kaj mi decidis kvitigi la kalkulon kun la eburonoj. Bedaŭrinde, la necesa prokrasto, la militiroj kontraŭ ribelintoj ĉe l' nordo, vekis ĉe la galloj supozojn, ke mi rezignos puni la kulpulojn. Tiujn supozojn mi volas ĝisradike ekstermi. « Flamokule li laŭvicas ilin. » Nu, bone memoru la nomon de l' eburonoj; hodiaŭ ĝi estas ankoraŭ la nomo de gento; post du monatoj ĝi devas esti nur la nomo de iama gento. «

Paligintaj vangoj, disbrulaj rigardoj ĉirkaŭe pravas al li, ke oni lin komprenis. Dume li daŭrigas:

»Per la lasta militiro ni nur estingis la ribelon; ankoraŭ postrestas purigado. Antaŭ ĉio estas necese izoli la eburonojn de iliaj najbaroj. — Fabio! Krasso!«

»Jen!« elpaŝas ambaŭ.

»Unue ni ekmarŝos kontraŭ la menapeojn: larĝfronte tri korpusoj; la unuan komandos mi, la duan vi, Fabio, kaj la trian vi, Krasso. Laŭplane ni operacios en la sama linio, dezertigante la landon. Kapituladojn ni akceptos nur kun la kondiĉo, ke oni la eburonojn nek helpu nek akceptu. — Labieno!«

»Jen!«

»Vi okupos per tri legioj la regionon de l' trevero. Detalojn de l' operacio mi cedas al vi. La fina rezulto devas esti sama kiel ĉe l' menapeoj. Ĉar ankaŭ mi tuj — kiam mi finos pri ili — enmarŝos la treveran regionon, vi serĉos kontakton kun mi. — Roscio!«

»Jen!«

»Vi ekmarŝos kun unu el la rekrutlegioj ĝis la Rejno kaj serĉos oportunan lokon por pontokonstruo. Vi devas eviti ian ajn militan operacion, escepte se vi estos atakita. Sed, tial vi kolektos por mi materialon pri la germanoj dekstraborde de l' Rejno. — Planko!«

»Jen!«

»Vi restos kun la dua rekrutlegio en Samarbivo. Via tasko estos starigi kontakton inter unuopaj trupoj kaj komuniki al mi ĉiaspecajn informojn; same kiel ankaŭ miajn ordonojn pluekspedi. Samtempe vi transprenos la etapkomandon. — Cicerono!«

»Jen!«

»Vi marŝos kun la trajno en la fatalan tendaron ĉe Aduatuko kaj atendos tie la pluajn ordonojn. Ĉar

la remparoj ne estas detruitaj, facile vi ilin ordigos. Kiel trajno-eskorton vi kunprenos la trian rekrutlegion. — La aliaj vicgvidantoj aliĝos al mia stabo.»

»Hej, tio estas aparato,« flustras Fabio realirinte Labienon, »kvazaŭ li volus konkeri la tutan mondon.« Labieno ne respondas, lange li ĉirkaŭlekas la belajn lipojn: estos bataloj, sangverŝado, kaj tio ĝojigas lian lup-animon.

Cezaro denove ekrigardas ĉirkaŭ sin. Malrapide, entirante la suban lipon inter la dentojn, li daŭrigas:

»Espereble, la realigo de l' skizita plano renkontos neniam malhelpojn: post kvar semajnoj ĉio devas esti finita kaj la armeoj, escepte la du etap-legiojn, kolektitaj ĉe l' Rejno. Tie ni dividiĝos en tri grupojn: vi, Labieno, antaŭeniros kun tri legioj nordokcidenten, laŭlonge de l' menapeaj limoj ĝis la oceano mem. Aplikiĝas ĉio ordonita por la unua militiro — nur pli radikale: sur la kampoj oni devas detruiri eĉ la lastan grentrunketon, en la vilaĝoj kaj domaĉaroj eĉ la lastan kabanon. Ĉio vivanta devas pereii, oni indulgu nek virinon, nek infanon — eĉ ne brutaron enpaŝte. Bruligu, flamigu, murdu laŭplaĉe! Per glavo kaj fajro mi volas forlavi de l' tervizaĝo tiun hontaĵon!«

Lia voĉo tondras kaj siblas. Frostotreme aŭskultas la vicgvidantoj tiun teruran anatemon, elparolatan super la malfeliĉa gento eburona de l' alie tiom milda, ĉiam pardonema, homo.

Trian fojon li ekrigardas ĉirkaŭen, dum malica rideto ekpendas ĉe l' buŝo:

»Cetere, ne estos necese endanĝerigi la vivon de niaj militistoj. — Planko! Hircio donos al vi alvokon: kiun vi disvastigos ĉien: ĝi estas invito al la tuta Gallio

por partopreni en rabado kaj kaptajoj. Jam sufiĉe da  
romia sango verŝis la eburonoj; se pereados en iliaj  
arbaroj homaj vivoj, estu prefere de miloj da galloj  
ol de nur unu legiano!«

## Neniam ripozo

La militvizito estas finita.

Sunbruna, ĝisfale laca, sed unuafoje — post longa tempo — trankvila kaj preskaŭ ĝoja, rajdas Cezaro en sian ĉefloĝejon: liaj planoj pli ol sukcesis, el la iama gento de l' eburonoj postvivas nun nur la nomo — kaj eĉ ĝi nun tiom longe, kiom plaĉos al Cezaro. Se hodiaŭ li ordonus, ke ankaŭ ĝin oni ekstermu, la elĉerpito terkuŝanta Gallio obeus.

Ĉio ĉi devis okazi, kvankam Cezaro ŝatus tion eviti — sed nun jam sufiĉas: la renversitan landon oni devas suprenlevi. Post kiam ĝi spertis la akrecon de l' cezara glavo, ĝi eksentu ankaŭ la benon de l' cezara favoro, ja ĝi estas la plej nova, sed ne la lastranga ano de la okcidenta kultursfero.

Nu ankaŭ tio iom atendu; atendu tiuj turoj el romaj depeŝoj, amasiĝintaj sur lia tablo dum la forrestado; atendu ĉio, kio nomiĝas laboro: Cezaro konsentis al si ununuran ripoztagon kaj ĝin li volas elĝui tutanime.

Antaŭ la komandejo li elseliĝas, adiaŭante Markon Krasson kaj Trebonion, kiuj lin alakompanis. Hircion kun Pollio li forpermesas por unu tago. Plena de feliĉiga laceco, li iras ŝtup-al-ŝtupe supren kaj en sia



ĉambro li forspirege falas en apogseĝon. Al la servisto li ĵetas unu solan vorton:

»Hiparkon!«

Jam post kelkaj minutoj envenas la razisto kun humila rideto kaj komencas akriigi sian razilon. Ĝia tinto rememorigas al Cezaro akrajn rikoltilojn, alsortas en lian animon pacobenan bildon: jen senlimaj grenkampoj, ie-tie elruĝas papavo, elbluas cejano, fone siluetas paca arbareto kaj super ĉio sunoro, ĝojtrilo de alaŭdo. Agrable li sentas varmetan akvon sur la vangoj, mallaŭtan frotskrapon de l' razilo, pene sin trapuŝanta tra lia preskaŭ jaraĝa barbo.

Plezure li rigardas sian glatan vizageon en ovalo de metalspegulo, priridetas la palecon de siaj buŝo kaj vangoj, akre kontrastan al la bruno de l' frunto kaj nazo. Malrapide li leviĝas por ĝui la banon, dume preparitan.

La nigra mantelo, la nigra ĉemizo forglitas teren. Lace, ridkontente li rigardas ilin, poste lasas la rigardon fortunigi al la lito, sur kiu jam uzprete kuŝas neĝblankaj tuniko kaj togo kun la larĝa, skarлата bordero: li povas formeti la funebroveston, venis ja la tempo de l' ĝojo kaj aktiva agado.

Kiom dolĉmole kaj freŝige karesas la korpon akvo, forlavante kun la polvo de l' ŝoseoj ankaŭ la polvon de l' animo. Cezaro estas — almenaŭ en tiu ĉi momento — perfekte feliĉa. Dormeme kliniĝas lia kapo, la okuloj fermiĝemas, la etenditaj membroj ripozas delikate kaj trankvile unu apud la alia, kvazaŭ lacaj infanoj.

Ĉu oni pordfrapetis?

Cezaro ekskuiĝas kaj sentas sian koron pli forte

ekbati. Jam li priridas sin mem: ĉu tiom timema li iĝis?

Tamen ja: denove oni frapetas, mallaŭte singarde, sed insiste. Li turnas la kapon al la pordo:

»Kio okazis? Nu, kiu ekstere?«

»Mi, Hircio,« aŭdiĝas responde.

»Marko Krasso estas ĉi tie kaj petas permeson de interparolo.«

»Ĉu nun tuj?« La bonhumoro jam disfandiĝis; Cezaro sentas, ke kolero komencas lin regi.

»Se estas al vi eble, ho Cezaro,« eksonas voĉo, la konfuzita voĉo de l' traporda anoncito »mi petas akceptu min tuj.«

Io en tiu vibra voĉo timigas Cezaron. Li tuj levigis, ĵetas bantukon ĉirkaŭ la malsekan korpon, iras al la pordo, forpuŝas la riglilon. Ekstere staras Hircio kaj Marko Krasso. Unua kun ekscititaj, dislarĝaj okuloj, la dua apenaŭ kapabla piedstari.

»Kio okazis?« demandas Cezaro triafoje.

»La patro — Publio —« pene elbalbutas Marko. Subita ektimiĝo.

»Nu, kio pri ili?«

Marko Krasso levas du tremajn pugnojn al la frunto.

»Ambaŭ falis!« li ekkrias malespere. »La *parthoj* ilin buĉis kun ĉiuj iliaj militistoj!«

»Neeble!« Momenton, senkonsciĝe, okulegas Cezaro sian adjutanton. Sed tiu kapklinas konfirme:

»Ĉiuj depeŝoj el Romo estas plenaj pri tio.«

Cezaro ŝtoniĝis. Li turnas la rigardon al la ĵus forlasita bankuvo, tiam rerigardas Markon Krason, kiu apenaŭ povante sin bridi, duonsvene apogiĝas al la pordofosto. Cezaro metas manon sur lian ŝultron:

»Marko — kiom profunde mi kunsentas vin, vi ja scias. Poste ni interparolos, nun iru.« La juna viro kapklinas, kvazaŭ la promeso de Cezaro lin konsolus, kaj malaperas laŭ la ŝtuparo. Cezaro postrigardas lin, poste sin turnas al Hircio: »Alportu la depeŝojn en mian ĉambron kaj sendu al mi serviston. Ankaŭ mi tuj venos.«

La servisto tuj venas kaj, obeante la mutan rigardon, frotoŝas Cezaron, poste urĝe ekbrakas al la blanka tuniko.

»Eh, lasu ĝin,« diras Cezaro mallaŭte kaj mem kliniĝas por alkapti la nigran ĉemizon, kiun li ĵus senzorge forĵetis.

Hircio parolis veron: ĉiuj depeŝoj estas plenaj pri la malfeliĉo, trafinta Romon; ili rakontas pri bonŝanca komenco en Sirio, pri transiro de la Eŭfrato, pri fatala marŝo tra la dezerto, pri perfido de la araba *emiro* Abgaro, pri batalo ĉe Karrho, kie Publio Krasso finis sian espervekan vivon, pri malespera remarŝo al Sinnako, kie okazis la katastrofo mem. El la fieraj ekspedicia armeo, konsistinta el kvardek mil homoj, revenis apenaŭ la kvarono. Sed eĉ ĝi nur dank' al la singardema vicgvidanto de Krasso, al Kajo Kassio. El la ruinaĵoj li savis tion, kio estis savebla, kaj post multaj aventuroj li rekondukis la armeo-stumpon en Sirion. Ĉio alia pereis.

Sed ankaŭ aliajn malbonaĵojn sciigas la depeŝoj: en la ĉefurbo, en Romo mem, regas plena anarkio. Klodio kaj Milono, ĉiam pretaj ekscesi, donas malfacilaĵojn al ĉiuj. Tagtage interbatiĝas tiuj du stratkavaliroj kaj, dume, tiuj kiuj estas lertaj profiti en konfuziĝo,

fiŝas el malordo. Kaj Pompejo ne povas malhelpi la malordon — aŭ ne volas tion fari: ĉar, de kiam Kraso forlasis Romon kaj lia influo ĉesis subapogi Cezaron, la sintenado de l' iama venkinto super la piratoj fariĝis pli ol suspektinda. Lia lasta komplezo al Cezaro estis: transcedo de unu el la legioj ĵus rekrutigitaj por anstataŭigi la perdon ĉe Aduatuko. Sed, de tiam milmil signetoj montradis, ke ilia reciproka intimo malfirmiĝis: la famoj pri la diktatoreco de Pompejo tute ne ĉesas, dum li mem per nova edziĝo plej intime ligiĝis al la treege konservativa nobelpartio. Kaj kontraŭ la kandidatoj de Cezaro, kion Pompejo evidente ne malhelpis, estas elektitaj Katono kiel pretoro kaj la nova bopatro de Pompejo, la treege reaktiema Kvinto Scipiono, kiel konsulo. El sekretaj raportoj, alvenintaj al Cezaro de liaj konfidenculoj, elspiras pli kaj pli granda zorgemo. Nur rapidega ago povus savi la situacion: se oni ĝin ne tuj faros, estos tro malfrue.

Traleĝinte la lastan depeŝon, Cezaro mallevas la manon kun letero.

»Aŭlo, zorgu, ke ĉio estu preta,« li diras sensone.  
 »Ni forvojaĝos jam hodiaŭ vespere.«

## Fajro

Meze de unu el la plej belaj frazoj Cezaro senpaciencie interrompas la vizitanton:

»Ĉu permesite peti, ke vi transiru al la afero? Mia tempo estas ja limigita.« Tuj li iom bedaŭras pro sia krudemo: dum la longaj militjaroj li tute deĉimigis de la glata ĉefurba ĝentileco — aŭ ĝi dum lia forrestado iĝis eĉ pli glata? — kaj li jam pripentas, ke eble li ofendis la gaston.

Sed, ŝajne, Kurio ne estas tiel facile ofendebla: li prenas el sia ora skatoleto pilolon, dentpistas ĝin, proponante la skatoleton ankaŭ al Cezaro:

»Se plaĉas? Lasta modaĵo el Romo: sukeritaj sanpiloloj. Vendas ilin iu komercisto ĉe Flamina strato kaj per tio profitege negocas. — Ne? — Nu, laŭ via prefero.« Li enmetas la skatoleton kaj, krurkrucinte, alrigardas Cezaron per la saĝaj, petolaj okuloj. »Do, al la afero mem! Vere, vi plaĉas al mi, ho Cezaro.«

»Vi estas tre kompleza,« malgraŭ sia malpacienco Cezaro ne povas subpremi ekrideton.

»Jes,« ripete akcentas Kurio, »vi plaĉas al mi. Jam pli ol dekkvin jarojn mi observas vian supreniron kaj mi devas konfesi, ke vi en tiu tempo plenumis multajn majstraĵojn. Se oni nur pripensas —« li rimarkas ian geston de la aŭskultanto kaj pensrompas.

»Nu, mi jam silentas.« Li buŝgrimacas. »Kiam sukero estas for de piloloj, oni enmordas la maldolĉan kernon, sed onidire, ĝi estas tre saniga — jes, tre saniga!« Signife li ekpalpebrumas.

Cezaro, kompreninte, denove ekridas.

»Mi brulas pro scivolo ekkoni tiun sanigan, maldolĉan kernon.«

»Bonege,« kapklinas Kurio indifere. »Estas vera plezuro interparoli kun vi: vi tuj ekkomprenas, kion oni celas. — He, jen la maldolĉa kerno: vi havas sennombrajn, admirindajn ecojn, sed ankaŭ unu grandegan mankon, kiu ĉiam vin malhelpas: vi volas plenumi ĉion nur proprapersonne, ĉion preni nur en la proprajn manojn; vi kredas, ke la aliaj estas tro malsaĝaj por helpi vin eĉ en la plej simplaj aferoj.« Sen ĉirkaŭfrazoj li ŝanĝas la tonon, daŭrigante penetre: »Por paroli serioze, ho Cezaro: laboro tedsatigas vin ĝis super la kapo. Ĉion vi povis plenumi sola, dum vi vivis en mallarĝaj cirkonstancoj; sed hodiaŭ vi estas granda sinjoro, tro okupata de l' propra politik-strategio por dediĉi atenton ankaŭ al la taktikaj detaloj. Al vi necesus homo, kiu senŝarĝigus vin, forprenante de vi la detal-laboron.«

Cezaro jam seriozas.

»En viaj vortoj estas multe da vero,« li esprimas singarde, »ankaŭ mi mem jam kelkfoje pensis pri tio, altiri al mi tian homon. Nur —«

»Nur vi ne volis peni por lin trovi,« vigle endiras Kurio. »Vi atendas, ke li mem venu al vi kaj vi preferus neniam lin trovi ol —«

»Mia sinteno montriĝis celtrafa,« interrompas Cezaro ridetante. »Ĉar laŭ ĉio ŝajnas, ke ĝuste vi intencas fariĝi tiu homo.«

»Eh, tion vi danku nur al via nekredebla feliĉo,« kontentas Kurio redone. »Ĉar ankaŭ feliĉon vi posedas!« Denove li serioziĝas. »Jes, vere, mi intencas tion kaj, utiligante la morton de Klodio, mi proponas al vi miajn servojn.«

»Dependas de tio,« hezitas Cezaro, »el kio konsistas viaj servoj. Ĉu vi volus fariĝi eble bandestro, por ke ankaŭ vin mortigu iu Milono?«

»Hu, kion vi pensas!« Kurio pasie gestas rifuzon, sed rimarkinte, ke li malordis la artoplenajn faldojn de l' togo, li rapidemas por ilin tuj rearanĝi. »Ne,« li daŭrigas, reboniginte la difekton, »tio havus nenian sencon: Klodio ne povis al vi fari pli malbonan servon ol lasi, ke malsaĝulo Milono enbatu tranĉilon en liajn ripojn.«

»Do, kion?« Tujmomente la vizaĝo de Cezaro iĝas nepenetrebla masko.

Kurio ruze lin okuletas.

»Ho Cezaro,« li diras, »estas tute sencele aranĝi al mi kaŝludon: tro bone mi estas informita pri ĉiuj kulisoŝoj en la politika teatro. Aŭ vi eble volas nei, ke la morto de Klodio donis al Pompejo la longe aspiratan ŝancon por energie sin intermeti kaj fari sin mastro de l' situacio?«

»Kun mia konsento,« silabante enĵetas Cezaro.

»He, kun via konsento! Ĉu ankaŭ tio okazis kun via konsento, ke Pompejo kaj la senato estas unu? Ĉu ankaŭ kun via konsento, Pompejo mute toleras, ke iu pajlopupo de Katono estas konsiderata por la proksima konsul-elekto? Ĉu kun via konsento ankaŭ okazis — energie kaj krude li uzas la ĉefatuton — ke de antaŭhierau — laŭ propono de Bibulo — Pompejo estas diktatoro?«

Tiu rekte celita bato trafis: Cezaro paligas.

»Pompejo diktatoro? Kaj laŭ propono de Bibulo?«

»Jes, konsulo sen kolegoj,« konfirmas Kurio »kaj laŭ propono de via ĝismorta malamiko Marko Bibulo.«

Cezaro okulas antaŭ sin. Fulme zigzagas pensoj post lia frunto. Nun li kaplevas kaj kun reakirita trankvilo firme alrigardas Kurion.

»Nu ŝajnas, ke vi vere multon scias. — Mi do refoje vin demandas: kiajn servojn vi intencas al mi fari?«

Kurio hezitas kapbalance.

»Vi estas en Gallio tro okupata,« li diras enpense, »kaj ne estas eble al vi enmiksiĝi en la aferojn de l' ĉefurbo tiom, kiom necese. Tial estus por via intereso, ke oni dum certa tempo prokrastu ĉiujn definitivajn decidojn. Al vi estas necesa iu, kiu majstrus la maŝinon de l' politikaj intrigoj, uzante ĝin por kontraŭbari la intencojn de viaj publikaj kaj sekretaj malamikoj, unuvorte: kiu kapablos prokrasti ĉion, ĝis vi mem povus aperi sur la scenejo. Jen, mi proponas ĝuste min por realigi ĉion ĉi. Jes, tiel realigi, ke escepte vin, neniuj havos eĉ supozeton pri tio.«

Atente lin aŭskultas Cezaro. Nun li trankvile respondas:

»Viaj pripensoj estas ĝustaj kaj prudentaj, sed ili baziĝas sur erara premiso: vi diras: ke miaj manoj estas tro okupataj en Gallio; sed tio ne estas laŭfakta: en Gallio estas ĉio paca kaj mi povas ĉiutempe alvenigi kvin legiojn, la duonon de mia armeo, por doni al miaj ideoj tie ĉi, en Romo, la necesan apogon.«

Mirkreske aŭskultas liajn vortojn Kurio; nun li



elbuŝigas:«

»Nu, ĉu vi ne scias —?«

»Kion ja?« Cezaro kaplevas jam antaŭflare.

»Ke en la tuta Gallio eksplodis ribelo?«

Fluge renversiĝas la seĝo, ekkrakante sur la plankon. Cezaro jam kliniĝas super Kurion kaj ekkrias:

»Kion vi diris?«

Ankaŭ Kurio leviĝas, tute timigita per tiu subita senteksplodo.

»Ribelo estas en Gallio!« li ripetas. »Hieraŭ venis la unuaj precizaj informoj en Italion. Ĉe la poŝtstacio en Arimino oni komunikis al mi ĉiujn detalojn.«

Cezaro jam purpuras.

»Kaj mi estas informita pri nenio! Oni eĉ ne klopodetis por sciigi la prirespondan guberniestron!« Denove li senbride ekparoksismas super Kurio: »Nu parolu, ho homo! Kion vi scias? Ĉion, ĉion, kion vi scias! Sed rapide — rapide do!«

»En la lando de l' *karnutoj* — ŝajne, ili tiel nomiĝas — en Ga — Ge —«

»Genabo?«

»Jes ja, en Genabo, oni surprizatakis kaj forbuĉis la tutan garnizonon.«

»Forbuĉiŝ!«

»La saman tagon ribelleviĝis ankaŭ ĉiuj gentoj sude de la Ligerio; la amasoj moviĝas kontraŭ la provincon; ankaŭ ĉe l' nordo ekbolis; nur kelkajn tagojn plu kaj la ribelo disbrulos tra la regionoj, nun ankoraŭ pacaj; ĉe la arvernoj aperis gvidanto, al kiu el ĉiuj flankoj urĝe aliĝas armil-kapabluloj.«

»Kiel li nomiĝas? Ĉu vi scias lian nomon?«

Kurio kapneas.

»Mi jam forgesis. Ne elparolebla, vera galla nomo — fine ikso, ŝajnas al mi.«

Cezaro jam saltis al la pordo.

«Hej Hircio! Pollio!«

Ambaŭ brufalas en la ĉambron.

»La ĉevalojn! Mian armilaron! Alarmu la rajdistojn!«

Li ŝirtiras la togon for de l' korpo kaj en mallonga tuniko distreĉas siajn maldikajn, muskolajn membrojn.

Kurio konsternite nutrigardas tiujn multajn senteksplozojn; li vidas, kiel viglaj servistoj sin ĵetas en la ĉambron kaj surtiras al Cezaro ledveŝton, pantaloneton, ŝanĝante la malpezajn ŝuojn per pezaj marŝbotoj. Post kelkaj minutoj Cezaro estas jam alivestita. Tiom urĝas al li, ke li eĉ ne alzonas la glavon, kun ĝi en la mano li volas forlasi la ĉambron. Sed Kurio jam alsaltas, haltigante la rapidemulon.

»Eh, kio pri mi?« li ekkrias. »Ĉu vi volas —«

Cezaro momenton ekhaltas. Fajre li alokulas la elegantan dandon.

»Pri vi?« li dentknaras. »Eh, ne pensu, ke nun mi havas tempon por vi.«

Li elkuras eksteren.

## Nur malamikoj ĉirkaŭe

Freneza rajdado! Freneza rajdado!

Preskaŭ kaŭrante sur la kolo de l' ĉevalo, por plej malpezigi al la besto la ŝarĝon, Cezaro trasagas gallajn ŝoseojn. Post li estas manpleno da rajdistoj, prenitaj kiel eskorto. Arboj de aleoj ilin preterflugas, bruklako ekŝvelas en la preterkuro por denove perdiĝi. Kie la ŝoseo arke kurbigaŝas, la rajdanto rekte ĝin tratranĉas. Spiregante puŝigaŝas lia ĉevalo tra neĝo kaj blolverte denove grimpas laŭ deklivo sur la ŝoseon.

Laŭ la pli kaj pli abrupta spirado de la ĉevalo Cezaro ekkonas, ke ankaŭ al ĝi estingiĝas la forto: tamen li rajdos ĝin ĝisfale, ĝuste kiel la du aliajn, kiuj nun kadavras ie sur la ŝoseo, gvidanta el Vienno. Li bedaŭras la beston, sed ne povas al ĝi helpi. Nun estas grava nur unu afero: la plej ekstrema, spir-raba rapideco!

Teruraj tagoj kaj noktoj estas post li! Rapida, fulma agado estas lia vivelemento; sed ankoraŭ neniam li travivis tian kurĉason, kia estas tiu ĉi. Unue tigrsalto en Narbon, en la provincon, en kies ĉirkaŭaĵoj jam komencis minace kolektiĝi malamikaj amasoj; de tie dua salto al la montregiono de l' *cevennoj*, kie li levis la teritorian milicon kaj kondukis tra la montaro kun sesfute dika neĝo siajn legiojn, rekrutigitajn en la

neelĉerpebla Transpadio. Senspire ili sekvis lin, por ke li akcipitre sin ĵetu sur la sensuspektajn arvernojn, fidantajn al sia nekonkerebla remparo el montoj kaj glacio. De tie, post du tagoj, al Vienno — kaj el tiu urbo en senĉesa galopo, nek suspektita, nek rekonita de iu, tra la edua lando, eble baldaŭ malamika, al la regiono de la *lingonoj*, kie kuŝas du legioj en kantonmento.

En Narbo li eksciis la nomon de la ribelgvidanto: Vercingetorikso. Kaj lia nesuperebla memoro prezentas al li scenon de la landkunveno ĉe Bibrakto — ja, de l' unua landkunveno en Gallio, kiun li persone ĉeestis: jen venas la arverna princo Gobanicio por esprimi sian respekton; antaŭ sin li puŝas proksimume dekkvinjaran junulon, kiu per siaj fajraj okuloj manĝegas Cezaron. »Mia nevo Vercingetorikso,« balbutas kaj senĉese ripetas la princo tiujn, sendube parkeritajn vortojn. Dume la junulo okulegas — nur okulegas — —

Ĉu li estas tiu ĉi? ekpensas Cezaro. Tio okazis antaŭ proksimume sep jaroj. Jes sep jaroj — sed, kiom multe de tiam okazis! Akko estas ekzekutita, Indutiomaro falis kiel ribelanto, same Dumnorikso, dum Ambiorikso vagas senlande ie trans la Rejno — kaj la tiama dekkvin-jarulo jam plenkreskis kaj nun estas gvidanto de ribelo kontraŭ Cezaro.

En Narbo li eksciis lian nomon; en la lando de l' arvernoj li aŭdis pri liaj agoj, pri la granda energio elŝprucinta el la dudek-jarulo kaj sufiĉanta por plene ŝanĝi la gallan karakteron. Oni rakontas fabelojn pri lia severeco, eĉ kruelemo, kontraŭ aliaj kaj si mem. Same ankaŭ pri lia animgrandeco, pri la entuziasmo, kiu lin plenigas kaj tiom infektas, ke el ĉiuj anguloj

de Gallio kuras sub lian standardon la junularo. Li estas la unua, kiu organizis siajn amasojn laŭ la romia modelo, kiu per malgrandaj bataletoj kutimigis la gallojn al militpenoj kaj disciplino — li estas la unua, kiu ja entute komencis kreadi la gallan militistaron! En liaj vicoj staras la suda *kadurko* apud la norda *aŭlerko*, la okcidenta *piktono* apud la orienta *senono*. Al li kuras volontuloj el la lando de l' sekvanoj, kiel ankaŭ el tiu, ankoraŭ romiema, de l' eduoj. En siaj manoj li unuigis la tutan Gallion, escepte la parton, kiun rekte jugpremas la piedo de l' romia militestro. Kaj nun li submetis fajron por pereigi en la ĝenerala flamo la alatakantojn.

Submetis la fajron; tion oni laŭvorte komprenu: ĉar nenio provas tiel klare lian senliman povon, kiel tio, ke ne leviĝis eĉ unu protesto kontraŭ lia decido: dezertigi la tutan landon, subbruligi ĉiujn urbojn, por ke oni per malsato mortigu la romianojn, ĉar oni ne povas ilin ekstermi glave. Nu ankaŭ tiurilate li estas inter la galloj la unua, kiu ekkomprenis la gravecon de proviantado, la unua, kiu scias, ke la malbone provizataj trupoj estas jam duone venkitaj.

Ho kiel admirinda homo! ripete pensas Cezaro. Jes, kiel admirinda homo! Kiel domaĝe, ke li ne staras en miaj vicoj kaj ke mi devas ĝuste kontraŭ li batali!

Sub la hufoj la vojo flugas for. Cezaro konas tiun regionon tiel bone, ke li ne bezonas gvidanton por orientiĝi. Antaŭ du tagoj li preterrapidis Matiskon, kie li antaŭ sep jaroj unuafoje ekbataletis kontraŭ la helvetojn; antaŭ unu tago li transrajdis la glaciĝintan Araron, kie li pereigis ilian postgvardion; maldekstre, tre distance, aperas Bibrakto, la urbo de lia unua venko sur la galla tero; poste, tie dekstre, elstaras montforti-

kajo Alesio. Gian konkeron li longe aspiris por teni kvazaŭ premile, inter ĝi kaj Vesoncio, la tutan gallan landon. Delonge jam mortfalis ankaŭ la tria ĉevalo, sed la malgranda taĉmento galopas antaŭen — ĉiam antaŭen!

Nudaj, vintraj arbaroj: li jam proksimiĝas al la praarbaroj de l' nordo. La lando estas senhoma. Kaj ankaŭ tiuj kelkaj kabanaroj, kiujn li rajdтуŝas, estas nelogataj — signo, ke la romiaj trupoj estas proksime: ankoraŭ ĉiam evitas ilin la indiĝenoj, kiel fajro akvon: kien venas unuj, foriĝas la aliaj.

Fine, jam vesperiĝe, la unua kavaleria patroleto: du rajdistoj. Ili haltas sur altaĵo, esplorrigardas, malaperas. Cezaro kapbalancas: kontenta li estas pri la singardemo de siaj homoj.

Unu horon poste la ŝoseon baras du eskadronoj. Jam el malproksime la komandanto mansvingas halton. Cezaro, bridinte la ĉevalon en paŝon, rajdas antaŭen.

Ekmirego, tuj poste ĝojkria aklamado:

»Cezaro!«

Dumire al la tendaro, Cezaro informiĝas ĉe la juna milit-tribuno. Konsternite certigas la juna oficiro, ke ili scias nenion pri l' afero: en la plej proksima ĉirkaŭaĵo de la tendaro regas plenplena paco kaj oni ne rimarkas ion suspektindan. Ankaŭ la aliaj garnizonoj ne sendas maltrankviligajn komunikojn, kvankam ili ĉiuj — laŭ la ordono de Cezaro — staras en reciproka kontakto.

Guste tio tre pensigas Cezaron: ĉu tiel profunde enradikiĝis tiu movado, ĉu ĝi tiel forte katenis la langojn de la fanfaronemaj galloj, ke ne troviĝis eĉ unu babilemulo!

Horduonon poste li jam estas en la tendaro. Eten-

diĝinte sur la lito de Trebonio, li lasas siajn ligno-rigidajn membrojn al la fingroj de l' egipta masaĝisto. Samtempe li laborigas ĉiujn stenograf-povajn oficirojn de ambaŭ legioj. Unu horduonon plu kaj, jam denove, disflugas tra la ĉefpordego liaj kurieroj: okcidenten al Agedinko, kie kun ses legioj staras Labieno, norden al Fabio, sidanta kun du legioj en la trevera lando. Nun Cezaro ekdormas la plej profundan dormon de ekstrema elĉerpiĝo. La frunton surŝprucadas glacia ŝvito, kiun la egipto senĉese forviŝas.

Sed jam la sekvantan matenon li estas tiel freŝa, kvazaŭ li ripozus dekkvar tagojn. Ensele li inspektas alarmon de la trupoj kaj, tuj poste, oni eliras el la tendaro post la kurieron, kiu la antaŭan vesperon forrajdis okcidenten.

Ĉe Agedinko la brigadoj de Fabio kaj Trebonio atingas la ĉefan armeon. Libere ekspiras Cezaro kaj la altrudita ĝoja mieno, kaŝante la sekretajn zorgojn, cedas al la nova, elinterne arda. Tio antaŭsignas al liaj militistoj novajn aventurojn.

Nu, la reĝa tigro pretas por eklukti kontraŭ la gallan lupon.

Eĉ sekundon ne tro frue: post momenteto jam ekscias Vercingetorikso, ke lia granda plano — frakasi dividite la militestron kaj la armeon — malsukcesis. Nur nun li montras sin en sia plena grandeco: lia klara, netrompebla rigardo ne permesas al li eĉ dum momento la dubon, ke li laŭforte ne egalas Cezaron. Tial li ŝtelvagas ĉirkaŭ la reĝa rabobesto, nun por ĝin embuski elflanke, nun por saltfali sur ĝian nukon, sed lasante sin mem nek kapti, nek devigi al la decida batalo.

Tio estas milito en mallumo, kun embuskaj mortigoj de la gvardietoj, sensigna malapero de la patroloj,

kurieroj kaj forkapto de transportoj. Kaj tia milito submordas la jam malsanajn nervojn de Cezaro, kiel akra acidaĵo submordas ŝtalpecon. Furioze alkurinte kun la ok legioj suden, li eksvingas siajn ungoman-egojn. Sed ili trafas en malplenon: kapitulacis, vere, kvar urboj; inter ili ankaŭ tiu, kie komenciĝis la ribelo kaj kiun nun komplete detruis la pereiga punjuĝo — sed li, al kiu estis direktataj tiuj battoj, ĝustatempe elglitis. Kaj nun li zigzagas tra la dezertigita lando stimulante la gentojn, kiuj ankoraŭ hezitas. La eduoj tag-al-tage plifermentas; la senonoj — apenaŭ forlasis la romia armeo ilian regionon — ekkaptis, kun la *parisoj*, veliokasoj kaj ceteraj rivergentoj, la armilojn. Ne solvinte la aferon, Cezaro devas reveni al sia militbazo Agedinko.

Devas okazi tio, kion li volus eviti: li devas disdividi siajn fortojn. Kvar legioj sub la komando de Labieno ekiras antaŭen, laŭ la Sekvano, por kateni la malamikojn kaj tiel ebligi liberan respiron al la ĉefarmeoj. Kun la aliaj ses Cezaro refoje sin ĵetas suden, rekte en la koron de l' ribelo, en la arvernan landon, kiun la juna reĝo Vercingetorikso, kiel gvidanto de l' tuta Gallio — por sia reputacio — devas defendi. La imperatoro esperas, ke fine ĉi tie li povos provoki sian grandan kontraŭulon al batalo.



## Gergovio

Ankaŭ la deka-anoj ne plu povas...

Elĉerpitaj per grandegaj marŝoj kaj superhomaj penegoj dum la lastaj tagoj, ili batalas sur la maloportuna, multmonteta grundo kontraŭ bonege remparitaj malamikoj. Horojn kaj horojn ili staras tie en la plej terura manbatalo kaj ne povas trapuŝi sin eĉ nur unu paŝon. Vana estas ĉiu individua kuraĝo, ĉiu freneza atakfervoro: en la senĉesa pluvo el pafaĵoj, ĉiam denove, sed sensukcese atakante la gigantan fortikaĵon, ili fine devas kontentiĝi, ke ili povas teni almenaŭ la lokon, kie ili staras kaj, ke oni ilin ne forjetis laŭ la kruta altaĵo, kiun ili surgrimpis.

Tio estas antaŭ Gergovio, kie fine Cezaro sukcesis devigi Vercingetorikson al la batalo. Sirmite de l' potenca mont-fortikaĵo la egalforta kontraŭulo akceptas la romian atakon. Unue li lasas la legiojn alondi por poste ilin diserigi kun plej grandaj perdoj. Vane la legioj skuegas la ferajn riglilojn, per kiuj Vercingetorikso obstrukcis la vojon: ili staras firme, dum la atakantoj sangflue pendiĝas sur ili, perdante sensukcese en la senespera luktado la plej bonajn fortojn.

Preskaŭ plorante pro furiozo Cezaro kuregas — kiun fojon ja hodiaŭ? — al la maldekstra ekstremo.

Li estas sen kasko, kun glavo en la mano kaj anstataŭ ŝildo li volvis ĉirkaŭ la maldekstra brako la ruĝan imperatoran mantelon. Malgraŭ ĉiuj raportoĵ, malgraŭ sia klara konvinkigo, li nek povas, nek volas kredi, ke ekzistas io, kio povas kontraŭstari *lian* Dekan! Li ĵetas sin en la unuan vicon, mem puŝas antaŭen la agloportiston, li jam eksentas sur si elspirojn de galloj — kaj tamen li devas kun la aliaj denove reen: vere, nur tiom, kiom ili saltis antaŭen, sed tamen reen!

Respirinte post la fronto de la legioj, li direktas la rigardon dekstren. Li jam vidas danĝeron, kiu ekminacis al liaj trupoj: tri legioj puŝis sin en la unua atako tro antaŭen kaj nun gluiginte al la urbomuroj ili servas pli kiel celtabulo al malamikaj sagoj kaj ŝtonoj ol por atako. La plej proksima, Naŭa, tenas sin eĉ plej bone: kiel dorsoŝirmilon ĝi trovis arbareton kaj nun kontraŭ ĝia falango frakasigas atako post atako. La Dek-kvara, ĉe la fino de l' dekstra ekstremo, enpremis sin en la senbatalan angulon de l' murego; kiel devoĵiginta turista ĝi ne havas elvojon, sed momente ĝi estas ekster danĝero. Sed tiom pli granda malbono ekpremis la Okan, tiun rivalon al la Deka: ĝi pensis, ke ĝi devas montri sian egalecon al la elita trupo kaj tial senordone provis konkeri iun el la ĉefpordoj. Komence ĝi sukcesadis, sed poste malamika ĉefamaso ĝin tiel batregalis, ke ĉiu ordo ŝajnas en la momento perdita. Nun ĉiu oka-ano — aparte — tie, kie li ĝuste staras, batalas la plej teruran batalon el ĉiuj ĝis nun sur la galla tero. Kaj nenie eĉ nur unu homo, kiun li povus sendi porhelpe! La Dek-kvina estas malproksime, tro flanke, nun ŝajne preparita por atako — ĉiuokaze ĝi venos tro malfrue — la decido devas esti farita jam en la sekvonta minuto — kaj la Dek-tria,

sub Seksto, estas ekstreme malgrandan tendar-gvardio, de kiu li ne povas preni eĉ unu homon.

Refoje lia rigardo flugas laŭ la altaĵo malsupren. kie la deka-anoj aranĝas sin por nova kuratako. Li vidas, ke estos vane: denove senrezulte fluos la sango, kiu estas al li tiel kara kvazaŭ ĝi estus lia propra. Manĉetende li puŝiĝas antaŭen, kaptas iun trumpetiston ĉe l' ŝultro kaj elstertoras:

»Al-kune!«

La militisto okulas lin nekredante, senkomprene. Sed Cezaro jam ripetas, kvazaŭ ekkrius mortvundito:

»Al-kune!«

Tondre eksonoras la signalo kaj ĝin tuj akceptas la kornistoj de l' ceteraj kohortoj. En la saltpretaj vicoj hezito, halto; en perfekta ordo jam retiriĝas la deka-anoj, elĉerpitaj, sed nerompeblaj. Foriĝinte el la batal-tumulto, ili rigarde sekvas la imperatoron.

Sed tiuj, transe, ĉu ne aŭdis? La Oka, la Naŭa kaj la Dek-kvara restas plue en siaj pozicioj, kvankam nun la gallaj amasoj, liberigitaj per la retiriĝo de la Deko, komencas plifortigi sian ĉefparton. Ĉu tiuj transe ja frenezigiĝis? Ili devas retiriĝi, dum ankoraŭ estas tempo, dum ankoraŭ forestas la galla kontraŭatako, eksplodebla ĉiumomente.

Jam elsaltis antaŭ la fronton — laŭ la ordono de Cezaro — ĉiuj trumpetistoj kaj samtempe, plenpulme, ekblovas la signalon. Diverstonaj instrumentoj ektondras teruran misakordon. Sed vane: tiuj transe estas jam en spirita stato, en kiu oni nek ion vidas, nek ion aŭdas; ili povas percepti nur tion, kio estas tute proksima.

Lipmordante ĝissange, Cezaro jam volas ordoni al

sia legio helpatakon por la kamaradoj en danĝero — kiam —

Kiam ĉe la dekstra ekstremaĵo aperas la gallaj trupoj: tio estas la helpkontingento de l' eduoĵ, kiun antaŭe Cezaro ĵetis por disfrakasi flankon de la malamikoj kaj tiel sekurigi la ceterajn trupojn.

Sed tiu aperiaĵo efikas ĝuste male: en sia konfuziĝo la legianoj opinias ilin malamikoj (eble eĉ prave!): la Dek-kvara komencas lokcedi, retiriĝi; la Oka aliĝas — la Naŭa ankaŭ — kaj subite la tutan deklivon ekkovras forkurantoj. Samtempe gallaj amasoj, ekkompreninte la favoregan ŝancon, ekruliĝas, saltas sur la legiojn kaj penegas trabori ilin.

Krioj de furiozo kaj paniko post Cezaro, kiu brilokule rigardas la komencon de l' katastrofo. Li returniĝas: febraj mienoj, vokoj, petegas lin helpi, interveni. Senvorte li etendas la brakon, kiu ankoraŭ ĉiam ĉirkaŭspasmas la glavon — kaj signas al la grandega, senorda volvaĵo, ruliĝanta malsupren. La tuta Deko, kun la imperatoro, jam ekkuras antaŭen.

En mezo de l' deklivo enpuŝiĝas pinto de l' vivanta glavo en la gigantan, konfuzitan amason: pikas en ĝin, haltigas ĝin. La ŝtalo el homkorpoj fleksiĝas sub terura ŝarĝo — sed eltenas: la forkurintoj akiris valorajn sekundojn. Jen ili jam retiriĝas, malimplikiĝas, ne plu sentante gallajn glavojn sur la nuko — kaj la tri legioj estas savitaj.

Sed tiom pli endanĝeriĝis la Deko. La freneza enpuŝiĝo enbatis ĝin profunden en la malamikajn amasojn. Tiuj tuj alturniĝas el ĉiuj flankoj kontraŭ la atakantojn, ĵetante sin sur ilin kiel ĉashundoj sur apron. Tutaj palisaroj el gallaj glavoj leviĝas supren, falas

**malsupren, supren, malsupren, hakante al si vojon tra metalo kaj ligno, tra karnoj kaj ostoj.**

Neniam batalis Cezaro kiel tiun tagon: lia glavo falĉas ŝprucfajrerajn rondojn, kroĉas al si tri-kvar malamikajn glavojn samtempe; tie ĝi rapidege pikas, tie fulme batas. Sed la malamikaj glavoj pli kaj pli multiĝas; kiel furiozaj fulmoj ili ekbrilas tuj antaŭ liaj okuloj; jam li povas vidi nenion alian ol senĉesan fajreradon — ĉiam pli mallarĝa rondo ĉirkaŭ li unu mano, du, tri, kvar manoj, etendiĝas al lia dekstra, ĝin kaptas. Kvazaŭ freneziĝinte, li ĉirkaŭbatas per la maldekstra, volvita en mantelon, sed oni jam dispuŝas al li fingron post fingro — lia glavo elfalas, oni ĝin levas, ĝi tuj iras de mano al mano, kiel lignopeco, dancanta sur bolantaj ondoj — Brakoj ringe premeĝas kaj tiras lin for — li senespere rezistas — vane ja. La tumulto jam foriĝas — liaj piedoj provas ekradiki sur la tero, sed ne povas — ŝnurmaŝo jam kaptis liajn manartikojn, malrapide tirante la brakojn sur la dorson — En la plej furioza paroksismo li ekdentas al dika, sunbruna kolo tuj antaŭ si, enmordas profunde kaj sentas en la buŝo dolĉetan, narkotan guston de l' varma sango —

Subite ekhalto. Krioj — nervorompa, seka distondro de interfrakasa armilaro — la kirlaĵo, kies centro li estas, malvigle ekondas sur la sama loko kaj diseriĝas — Li staras sola kaj ŝanceliĝas, ŝiritaj ŝnuroj pendas de la manartikoj — sunbrunaj vizaĝoj sub romiaj kaskoj — orelfendaj kriegoj de ĝojo — li jam estas inter siaj deka-anoj — larmokule ili lin rigardas kaj preskaŭ hurlas, ke ili denove havas sian imperatoron.

Jen la infero mem! li ekpensas. Enen!

Li mire okulas ĉirkaŭ sin: freŝa taĉmento, ekipite

kiel sur ekzercejo, venas kurpaŝe montsupren. Aŭtomate li nombras: tri, kvar, kvin kohortoj: duono de la legio. La Dek-tria, li pensas. Seksto riskas la duonon de l' tendar-gvardio por savi la sukceson de l' tago. Li vidas admirinde precizan lancosalvon, li klare vidas ekan korpomovon, kiam ĉiuj militistoj samtempe eltiras la glavojn, li vidas la gallojn ŝanceliĝi, repaŝi kaj rapide malaperi post siajn murojn kaj remparojn.

Grave disfalcita, sed neĝenate kaj bonorde retiriĝas la Dek-a: ankaŭ al la galloj sufiĉas. La protekta tendaro akceptas kuniĝintajn trupojn, donante al ilin, kio nun estas plej necesa: ŝirmon kaj ripozon. Ĉio finiĝis pli sukcese ol oni povis esperi: la perdoj estas grandaj, sed ripareblaj; ne estas perdita eĉ unu legia aglo, neniuj trupoj ekstermitaj.

Sed la glavo de Cezaro estas en la manoj de l' malamikoj kaj li mem, unuafoje, venkita en fronta batalo...

## La glavo de Cezaro

Denove returniĝo al Agedinko.

Marŝo tra la disflama lando, kiun plenigas ĝismorta malamano.

El post proksima altaĵeto povas surprizi gallaj rajdistoj kaj hurlante sin ĵetegi sur la legiojn, el proksima arbaro povas surpluvi ilin milmil sagoj; ĉio estas malamano: la printempa uragano, muĝante super la stoplokampoj de l' pasintjara rikolto — kie ja oni povus trovi nunjare en Gallio kulturitan kampon! — kaj vipante pluverojn en la vizaĝojn de l' militistoj; same malamano estas ankaŭ la ŝlima gallia vojo, sur kiu la lacegaj piedoj glitglitetas.

Pereis eĉ la lasta espero. Nenie en tiu malproksima lando nur unu amiko: eĉ la eduoj mem aliĝis al tiu granda movado; la terure ŝvela lavango fortiris ilin kun si. Kaj ilia nuna, ne lastranga, gvidanto nomiĝas Diviciako, la tiom longe fidela Diviciako. Ja, li volas nun venĝi la morton de sia frato!

Senlime kuraĝega estas tiu marŝo, kiun entreprenis la ses legioj. Cezaro longe hezitis antaŭ ol ĝin riski: venkobatitaj, pro malsato duonmortaj trupoj forlasas la proksiman provincon kaj marŝas norden en regionon, el kiu eble ili neniam revenos.

Sed oni devas savi la kamaradojn, tial oni risku

la plej ekstreman rimedon: en la nord-okcidento ankoraŭ staras Labieno kun siaj kvar legioj; li estas fortranĉita de la ceteraj kaj sen ĉiaj sciigoj de ili. Se oni ne venos lin helpi, se oni retiriĝos en la proksiman provincon, havante antaŭ la okulojn nur la propran savon, Labieno sendube pereos en tiu disfosita, venkebria lando. Kaj kun li dudek mil homoj, la tuta trajno, la grandegaj provizejoj, la kasoĵ — ja, ĉio.

Tial ili marŝas norden, paŝo post paŝo, mortlacaj kaj tamen kvazaŭ pelataj, malkuraĝiĝintaj kaj tamen plenaj de malespera energio. Vespere: ili fosas lastforte la tendar-tranĉeojn kaj ŝirmodigojn; falas teren sur la sama loko, kie ili staras; dormas profundegan lacodormon. Matene: ili leviĝas, rapide kunpakas siajn malgrandajojn kaj ekmarŝas plue, ne satdormintaj, ne refreŝigitaj.

Meze de siaj militistoj, sur la elĉerpita, fallaca ĉevalo, rajdas Cezaro. De post la malvenko ĉe Gergovio li parolas nur tiom, kiom estas plej necese kaj la ceteran tempon li pasigas mute. Lia sintenado iĝis malvigla, la rigardo senbrila kaj malklara. Vespere, kiam la patroloj rondiras tra la dormodrona tendaro, ili vidas longatempan lumeton el lia tendo. Kaj kiam ĝi estingiĝas, ili aŭdas obtuzan singulton kaj ĝemojn, kiel ĉe homo, kiun torturas inkubaj songoj.

La fatala tago ĉe Gergovio profunde lin vundis: ke lin, la nevenkeblan, rebatis duonsovaĝa popolo, ke li devis forlasi la batalkampon venkite, jen tio mordas lian koron kaj plenigas lin per obtuza, senpova furiozo. Venas horoj, kiam li deziras kapti la tutan gallan landon inter siajn dentojn por ĝin disŝiri — kiel tiun gallan nukon, kiun li, militkaptate, enmordis. Sed venas ankaŭ horoj — kaj ili eĉ pli torturas — kiam lin



venkas deziro: ĵeti ĉion for de si, ripeti rajdon tra l' disflama lando en kontraŭa direkto kaj, ignorante kion li lasas, rifuĝi en kaŝitan angulon por forgesi ĉion, ĉion.

Sed plej malfacile estas elsuferi la perdon de la glavo. La klingo kun ora inkrusto fajreris brilblue; ankoraŭ kiel junulo li ricevis ĝin de onklo Mario. Ĝi devenas el Azio kaj estis, laŭdire, elforĝita en Hindio. En ĉiuj liaj vojaĝoj, en ĉiuj liaj militiroj, ĝi estis fidela akompananto. Antaŭ Mitileno li svingis per ĝi siajn unuajn batojn, li portis ĝin en Hispanio, en ĉiuj bataloj de la galla, brita, germana militoj. Jen tial li amis ĝin romantike, preskaŭ superstiĉe: ja, tiu glavo estis lia plej fidela, plej fidinda amiko, ĝi estis simbolo kaj emblemo de l' venkovolo, lin penetranta, de l' nebridebla impulso puŝanta lin ĉiam antaŭen. Kaj nun ĝi ornamas la zonrimenon de iu galla militestro, eble de Vercingetorikso mem. Dume ĉe lia propra kokso pendas la malplena ingo, kvazaŭ li volus turmentegi sin mem montrante al ĉiuj militistoj, ke ankaŭ la estro povas perdi sian glavon.

Novioduno, la ĉefa etap-urbeto ĉe la Elavero, estas en la manoj de l' eduoj, do — perdita. Gustatempe eksciinte tion, li forturnas sin kaj evite daŭrigas al la nordo. Lok-al-loke li tendaras, tag-al-tage kun malpli forta espero li elsendas kavaleriajn patrolojn por esplori pri la kamaradoj. Ĉu li trovos ilin?

Jes, li trovis ilin: iun tagon liaj lacegaj, malgrasiĝintaj esploruloj, apenaŭ sidante sur duonvivaj ĉevaloj, renkontas same elĉerpitajn rajdistojn: la patrolon de Labieno. Ĝi sciigas, ke la norda armeo sukcese solvis sian taskon kaj ankaŭ ĝi nun marŝas al renkontejo Ag-edinko.

Preskaŭ samtempe alvenas tien ambaŭ armeoj. Militistoj, suferintaj malsategon, faligas sin sur la plenajn provizejojn, kvazaŭ sur atake konkeritan urbon. Nur kun la plej granda peno oni sukcesas eldefendi kontraŭ disrabo la ne anstataŭigeblajn provizojn kaj revenigi la disciplinon, kiu rimarkinde malfirmiĝis. Tiam oni ripozas dum kelkaj tagoj kaj la plenigitaj stomakoj tuj kreas pli bonan humoron inter la militistoj.

Tamen, spite la favorajn raportojn de Labieno, Cezaro decidas la revenon. Kiom longe povus daŭri la provizoj? Maksimume du monatojn. Se ĝis tiam ne estos elbatalita la decido — nu, ĉu ĝi povus esti, kiam la kontraŭulo estas kate elasta? — kaj se li ankoraŭ troviĝos en la malamika lando, fortranĉite de ĉiuj helpimedoj, li pereos kun la tuta militistaro. Tial estas pli prudente retiriĝi en la nekonkereblan Vesoncion kaj, post la radikala refreŝiĝo de siaj armeoj, denove provi la atakon antaŭen. Sed al li mankas la glavo kaj antaŭ ĉio, li devas havigi al si novan.

Tiu ĉi penso iĝas lia fiksa ideo: ĉiuj celoj, esperejoj, planoj, fokusiĝis en tiu malgranda ŝtalpeco, kiun li devis lasi al la galloj. El la dekstra mano, doloranta kvazaŭ ĝi estus ĵus puŝita en flamon, penetras arda fluo rekte en la koron kaj tie cindrigas la tutan energion, tutan sinfidon. Glavon, glavon, ja glavon li devas havi, alie Gallio estos por li perdita!

Tiel li marŝas returne kun ĉiuj trupoj laŭ la sama vojo, kiun li antaŭ kelkaj monatoj uragane trabalais. Preterirante la transvintrejon de Trebonio, ili denove ekvidas Alesion: la longprocesia militistaro jam proksimiĝas al Araro. Ili estas neĝenataj, nenie vidiĝas malamikoj, nenie ilia plej eta patrolo. Tamen — eble ĝuste pro tio, ke en la korojn neforviŝeble ĉizigis la

batalo kontraŭ nerveoj kaj la katastrofo ĉe Aduatuko — ilin ĉiujn okupis unu sama sento. Ĝi ilin korprenas ekde Gergovio: ke el post proksima altaĵeto, el proksima arbaro povus surprizi aŭ atakegi malamikoj: pli potencaj, sangsoifaj, senkompataj!

Kaj la sento ne trompis: iun antaŭtagmezon la kavaleriaj patroloj senditaj antaŭen, galope repuŝiĝas en la armeon. Apenaŭ ili ekavizas la proksimiĝon de malamikoj kaj jam ekmuĝas netraversebla torento, falante sur frunton kaj flankojn de l' marŝantaj legioj: la galla rajdistaro.

Mankas tempo por batalviciĝo. La trajnon oni prenas en la mezon, formas fronton dekstren-maldekstren, la tuta kavalerio — en ĝi apenaŭ rekrutigitaj germanaj pezrajdistoj — estas ŝovita antaŭen. Jam ektondras malamika atako.

Kaj Cezaro, havante antaŭ si denove la kontraŭulon, nun tute retransviliĝas. Haltinte sur altaĵeto, ĉirkaŭata de sia stabo, li povas superrigardi de l' armeovosto la tutan batalkampon. Lin turmentas nur unu afero, lia mano kaŝite palpas al la malplena glavingo: ho, se li havus sian glavon!

Subite li surpriziĝas, klinas sin el la selo antaŭen, pli akre alrigardas tien: ĉu tiu tuta procesio, okulatinge, ne havas la formon de glavŝto? Ĉu ekzistas ja pli bona klingo ol la fronto de liaj kohortoj, pli akra pinto ol liaj pezrajdistoj, kiuj ĝuste nun en furioza enpuŝiĝo diskojnas la malamikan amason? En li ekbrulas sento de neeldirebla feliĉo el lia koro jam perdiĝis la arda fluoj de l' sufero; senlime potencaj fortoj akvofale inundas en lin kaj plenigas lin. Lia dekstra brako etendite leviĝas, la mano ekpugnas, kvazaŭ kaptante tenilon — Cezaro jam retrovis sian glavon.

Kaj nun, sentante ĝin denove en la mano, li montras, ke li scias ĝin ankaŭ manipuli: svinga, malmola bato dekstren — la malamikoj jam senorde tumultas returnon; poste maldekstren — sama rezulto: nun li puŝas la pinton, sekvatan de la tuta vivanta glavo, antaŭen, en la retiriĝan, jam forkurantan amason; la glavo ĉirkaŭsvingas kaj mordas, la malamikoj panikas, kuregas disen por eviti la senkompate kruelantan armilon.

Nur horkvarono kaj ĉio — jam pasis. Cezaro rajdas antaŭen rekte, streĉite, brilokule. Kun ĝoja miro rigardas lin la militistoj. Sur la vojo antaŭ li kuŝas glavo de falinta legiano. Li signas tien. Kelkaj kliniĝas kaj levas ĝin al li supren. Kun batanta koro li ĝin rigardas: tiu ĉi glavo de simpla militisto, tiu ĉi simbolo pri la forto de liaj legioj, estas pli bona garantio por venko kaj fina sukceso ol ĉiuj, eĉ la plej multvaloraĵoj forĝaĵoj el Azio.

Li levas la glavon signante al la malamika nubego, kiu kirliĝas al Alesio:

»Ek post ilin!«

## Kia Ŝanĝiĝo

La traktado finiĝis, venis jam la definitiva interpaco. Vana estis la senespera rezisto de lupo Vercingetorikso en la kaptilo ĉe Alesio. Vana la mortignora alkurego de l' gigantaj rezervo-amasoj, kiuj dum kvin tagoj kaj noktoj seninterrompe atakegis la ŝirmofosaĵojn de Cezaro. La potencaj batallinioj, ekipitaj ekstere kaj interne per ĉiuj rimedoj de l' militarto ĝis nekonkereblo, eltenis la duoblan atakegon: la gallaj ondoj el ĉiuj regionoj kaj anguloj disfrakasiĝis, refluis — kaj la nesaveble perdita, malsate elĉerpita trupo en la fortikaĵo devis kapitulaci.

La kondiĉoj de Cezaro estas pli mildaj ol oni povus esperi: oni devas transdoni la tutan armilaron kaj alsendi garantiulojn: evidente li volas indulgi la venkitojn, li estas jam sata pri punjuĝoj, kiel ili pri bataloj. Sed pri unu kondiĉo li ne cedas kaj la disbatitaj galloj devas ĝin akcepti: ili devas liveri en liajn manojn sian gvidanton, la avernan reĝon Vercingetorikson.

Necesas klare montri al la galloj la nerompeblan potencon de Romo. Tial Cezaro decidis aranĝi la kapitulacon kiel grandiozan militistan spektaklon. La dek legioj eliris kun armiloj; de la fortikaĵa ĉefpordego ĝis la kolektejo en la tendaro staras densa spaliro: legiano apud legiano en plena ekipaĵo, kun kasko sur la kapo,

kun ŝildo en la maldekstra kaj lanco, ĉepiede, en la dekstra mano. Militistoj kaj oficiroj portas ĉiujn medalojn, la kohortajn standardojn ornamas tiliaj kaj kverkaj folioj.

La kavalerio estas vicigita en du longaj kolonoj, dekstre-maldekstre de la tendara ĉefpordo. Kun kaŝata admiro rigardas tutan pompon kaj lukson la germanaj rajdistoj, kiuj gigantaj kaj diktrunkaj staras en la unua vico. Ili okulegas la taĉmentojn, kiuj ankoraŭ ĉiam venas el la tendaro kaj paradpaŝe okupas siajn lokojn. Ili aŭskultas la sonorajn signalojn, kiuj tie-tie ektondras. Konfuzite ili ridetas kaj klakfrapas postkolojn de siaj pezaj ĉevaloj, hodiaŭ ankaŭ feste ornamitaj. Ja, ŝajnas al ili, ke ili falis inter la radaron de iu el tiuj gigantaj romiaj batalmaŝinoj, kiujn ili senkomprene kaj konsternite admiris en la tendaro de Cezaro. Tial pacience ili obeas ĉion, kion oni ordonas al ili.

Ĉe la kolektejo de l' tendaro la pompo atingis sian kulminon. Rapide oni elĉarpentis el traboj kaj tabuloj estradon, tegis ĝin per kovriloj, tolaĵoj kaj dense ornamis per verdaj girdandoj. Sur la ŝtupoj kuŝas en sennombra kvanto pitoreske dismetitaj gallaj standardoj kaj emblemoj, kiujn oni konkeris — signo de l' definitiva venko. Kaj ĉion superstaras la apogseĝo de l' imperatoro. Ĝin tute envolvas duonvelka laŭro — iu provizejstro kunprenis ĝin el Italio kaj konservis tra la tuta vintro. Freŝaj branĉoj baldakene disarkas ombbron.

Sed la plej bela ornamo de la tuta placo estas tiuj dek legiaj agloj, kiuj orfajreras sub la printempa suno. Po kvin ĉiuflanke ĉe la imperatora trono, ili triumfe etendas siajn flugilojn kaj bekojn al la ĉielo — ili kaj la honor-kohorto de la dekaĵoj estas

hodiaŭ fakte tio, kion de la militkomenco ili ŝerce pri-  
fieris: la gvardio de Cezaro.

Unu flanko de la potenca kvarangulo restis libera; iom post iom ĝi pleniĝas: venas unu po unu, ĉiu laŭ ordone, neniun propravole — gallaj princoj, grafoj kaj, iam liberaj, nobeloj. La milittribunoj kaj centurionoj kun kompleza, sed malvarma ĝentileco asignas al ili la lokon. Amikoj kaj malamikoj de Cezaro: hodiaŭ ili ne diferencas. Trans la ŝultro de la legianoj, formantaj barieron en interpretata grupo, ili timigite kaj malserene okulas sur la sunan sablon, kie hodiaŭ ludiĝos la lasta akto de l' galla tragedio. Eĉ ne unu kun ruĝa vizaĝo, eĉ ne unu kiu montrus trankvilan mienon: ili ĉiuj sentas sur la propra vizaĝo la vipobaton de l' pereiga honto, per kiu Cezaro ilin frapis.

Cezaro ankoraŭ ne aperis, ankoraŭ li restadas kun altrangaj oficiroj en la tendo de militestro. Iam-tiam eliras iu el la oficiroj, algestas atendantan kurieron, forliberigas lin kun ordono kaj denove malaperas en la tendo. Silento, atendo.

Subite eksonas el la montfortikaĵo signalo de korno. Serena, klara aero flugportas ĝin ĉiufanken. Ĉiuj rigardoj direktiĝas al la monto: malfermiĝas la pordo de l' fortikaĵo kaj aperas unu sola figuro — rajdanto sur blanka ĉevalo.

Sama signalo tuj ĉi tie. La kapoj subite forturniĝas aliaflanken: antaŭ la tendo de l' militestro staras dek trumpetistoj. Iliaj sonoraj tonoj distrondras en la printempon. Kurteno de l' tendo distiriĝas kaj akompanate de siaj generaloj, Cezaro elpaŝas sur la placon.

Por tiu granda tago li surmetis paradan veston: la kiraso, la krurŝirmiloj, la braceletoj ĉirkaŭ la manartikoj, estas el oro. Juvele inkrustitaj bukoj orn-

amas la delikatajn, ruĝajn ledŝuojn, same ankaŭ la ruĝan, skarlatan mantelon, falantan de la ŝultroj ĝis la kalkanoj de l' imperatoro. Aparte impresas el tiu tuta pompo simpla legiana glavo: ĝi pendas ĉe la kokso en tubera, kupra ingo sur eluzita, flikita rimeno.

Ankaŭ la ceteraj estas en imponaj uniformoj: ĉio fajreras kaj brilas — en ora nubo la dioj mem malsuprenvenis de Kapitolo. Pri dioj rememorigas ankaŭ la fiera, memfida majesto de l' vizaĝoj, reflektantaj tiun tutan pompon: la statue belaj, kruelaj trajtoj de Labieno; la degenera tigrovizaĝo de Fabio; la ŝtonrigida mieno de Trebonio; la plenluma, jam denove ronda, vizaĝo de Kvinto Cicerono; la junula, kuraĝa profilo de Marko Antonio — li ĵus antaŭ Alesio aliĝis al la militistaro; la mallargha, eleganta kaj iom senmensa ĉevalvizaĝo de Basilo; la trajtoj de Roscio, Seksto, Planko, Sulpicio, Vokacio kaj de multaj aliaj, kiuj sekvas.

Nur la vizaĝo de Cezaro ne brilas. Ŝtone kaj rigide ĝi ombra per sia olivkoloro la fajrerojn de l' orkirasoj, kvazaŭ hajloporta nubo kaŝombrus la sunon. Malrapide turniĝas lia senluma rigardo laŭ la spaliro; tra la ĉefpordon, pli kaj pli foren — ĝis ĝi kroĉiĝas al la rajdanto, kiu atingis la duonon de la montvojetoj.

En tomba silento, dum unu-du sekundoj, la rigardo de Cezaro kaptas en sian fajron la figuron de l' sola rajdanto. Tiam la imperatoro kalkanturniĝas, iras egalpaŝe sur la estradon, firme ekpiedas sur la unuan ŝtupon — sur la gallan militstandardon, kuŝantan transverse. Sub la peza paŝo la tenilo ekkrakas — rompiĝas.

Ektremo trakuras la grupon de l' gallaj aristokratoj starantaj premate inter amaso da legianoj: ster-



toreto mallaŭta, sed tamen terura por aŭdi. Brulokule ĉiuj rigardas la profanitan standardon, jam forruliĝintan de l' ŝtupo en polvon. Cezaro, ŝajne, tion ne rimarkas. Kun sensenta mieno li trairas la ceterajn ŝtupojn, sidigās en la apogseĝo kaj fiksokulas malproksimen, laŭ la vojo, faden-rekte gvidanta al la pordo de l' tendaro. Ĉirkaŭ la estrado vicigās la ĝeneraloj.

Pasas pluraj minutoj — por la gallaj sinjoroj la eterneco mem. La rajdanto malaperis en profundo de l' intermonto, la vojo al la urbo kuŝas senhome kaj sunbrile kiel antaŭe.

Nun ekstere, tuj ĉe l' pordo de la tendaro, rapidaj, senregulaj hufoklakoj de ekscitita, timsalta ĉevalo. Ĉiuj elstreĉas la kolojn por vidi, kio okazas tie. Nur Cezaro sidas senmove.

La saltetoj ĉesas, aŭdiĝas jam regulaj hufoklakoj: en la ĉefpordo montriĝas Vercingetorikso alte sur la ĉevalo, armita de l' kapo ĝis la piedoj. Sur la kapo sidas riĉe ornamita kasko, la larĝan bruston ŝirmas malhela skvamkiraso, ĉe l' zono pendas longa galla glavo. La maldekstra mano tenas ŝildon kaj lancon, la dekstra bridgvidas la ĉevalon, jam plene obean. Lia vizaĝo estas senmova, ŝtona, kiel ankaŭ tiu de lia granda kontraŭulo, liaj okuloj simile rigidas rekte antaŭ sin. Brilbrila de l' suno, fajreranta sur la arĝenta metalo, jen Vercingetorikso rajdas paŝ-al-paŝe la vojnon de l' pordo ĝis la trono de Cezaro: ja, ĝi estas la lasta vojo de l' galla libereco . . . .

Jam atingite. Vercingetorikso hezitas. Li volus haltigi la ĉevalon, sed tamen malstreĉas la bridojn, donante al ĝi femur-premeton por turniĝo. La beleĝa, admirinde dresita rasĉevalo tuj obeas kaj turniĝas.

Flustro eksusuras tra l' vicoj: tio ne estis antaŭvidita. Ne sciante, ĉu enmiksiĝi, ĉiuj rigardas al Cezaro. Sed li sidas senmove, kiel antaŭe: ekstremas nek muskolo de l' vizaĝo, nek fingro de l' mano. Tial tuj denove kvieto kaj atendo.

Vercingetorikso ĉirkaŭrajdas la estradon. Pli kaj pli malrapidaj iĝas la paŝoj de lia ĉevalo: ŝajne, la besto kaj ĝia mastro ne povas disiĝi. Nun denove li estas antaŭ Cezaro. Subita halto. Per la bridoj kaj femuro li turnas la ĉevalon rektdirekte — ambaŭ jam ŝtonkvietaj.

Kvar okuloj interdronas reciproke; tiel longe, ke ĉiuj rigardantoj eksentas: ambaŭ viroj, tiu en la apogseĝo kaj tiu en la selo, iĝis bronzaĵ — nun staras sur la bataalkampo nur la statuoj de Cezaro kaj Vercingetorikso.

Subite Vercingetorikso desaltas, malligas la glavrimenon, prenas la glavon al la ŝildo kaj lanco en la maldekstra mano, kaj per la dekstra forlevas la kaskon. Li jam kliniĝas por meti ĉion antaŭ la estradon. Distinte falas la armiloj teren, dum li ambaŭmane kaptas la rompitan militstandardon — ĝin li levas al la lipoj.

## Al la Dioj dediĉite

La vojaĝo tra Gallio ne estas triumfa iro, sed Cezaro ne postulis de la ĝisradike venkita lando, ke ĝi aranĝu ion similan. Nun fine la armiloj estas mallevitaj kaj li sentas bezonon trakti Gallion plej indulge. Al ĉiuj, kiuj post la falo de Alesio propravole kaj senkondiĉe kapitulacis, oni redonis la militkaptitojn senkompanse. La regionaj konstitucioj restis sensanĝaj aŭ kiam estis nepre necese, oni kun la plej grandaj konsideroj adaptis ilin al la novaj cirkonstancoj. Nur la impostoj, ĝis nun fluintaj en la privatan havaĵon de l' hejmaj nobeloj, torentas al la romia fisko, inunde ĝin riĉigante. Krome, en la lando restis ankaŭ legioj de Cezaro: de l' treveoj, ĉe la ekstrema nordoriento, ĝis la rutenoj, sude limantaj la provincon, kuŝas unu transvintrejo apud la alia. Ili formas ĉenon, kiu Gallion nedisŝireble ligas al Romo.

Cezaro entreprenis vojaĝon por inspekti tiujn transvintrejojn. Li ekiris el la lando de eduoj, kie li amasigis la kernon de sia militistaro: ses legioj estas kunigitaj en mallarĝa rondo ĉirkaŭ fokusoj Vesoncio kaj Bibrakto. Unue li vizitas la garnizonojn ĉe la Mossello, poste transversante la ĉefvojojn de la lasta militiro, li rajdas suden, senĉese suden.

Laŭ sia kutimo li vojaĝas nur kun malgranda

eskorto, sen ĉia lukso kaj pompo, kiujn li — kiel imperatoro — povus ĝui, kaj kiujn li tiel supermezure ĝuigis al si, okaze de la kapitulaco ĉe Alesio. Li havas nenian intereson por forte impresi, nek por vekti publikan atenton; tute male: al li estas des pli agrable, ju malpli oni ĝin dediĉas al li. Tial li sendas ĉiam antaŭ si loĝej-prepariston, kiu elektas por la nokto vojforan bieneton aŭ somerdomon. Tien li alrajdas vespere kaj frumatene li jam estas for. Manĝojn li prenas en libera aero aŭ en iu vilaĝeto, kiel li al kutimiĝis dum tiuj longaj sep jaroj. Surstangete rostita viando, malmole bakita tritikpano, kiun li, kiel ĉiu simpla legiano, ricevas en preterirataj provizejoj — estas lia nutraĵo. Se oni ie ajn, survoje, renkontus tiun rajdogrupeton ne scianto, ke en ĝi troviĝas Cezaro, laŭ nenio oni povus supozi lian ĉeeston.

Li vizitas Agedinkon, kie li iam unuigis la armeojn kaj de kie, post la malvenko ĉe Gergovio, li entreprenis la revenon, poste aliĝintan en senekzemplan venkiron. Li vizitas Vellaunodunon, kiu post forbrulo denove renaskiĝas; Alesion, ĉirkaŭ kiu la gigantaj redutoj komencas malrapide ruiniĝi; Avarikon, kiu jam estas tute romia militkolonio. Tie, fronte de siaj dektria-anoj, salutis lin Seksto, la savinto ĉe Gergovio. Li vizitas ankaŭ Gergovion, kiu nun larĝe malfermas al li la pordon, iam tiom longe kaj obstine rezistantan.

La regiono de l' avernoj, la lando de lia granda malamiko, suferis pro la milito malpli ol oni povus atendi. Vere, ankaŭ ĉi tie — kiel ja en la tuta Gallio — estas detruita la rikolto; ankaŭ ĉi tie forbruligitaj bienoj kaj vilaĝetoj borderas la ŝoseon, sed ĉie oni rimarkas klopodojn por rekonstruo, ĉie laboras viglaj manoj por forviŝi la makulojn, kiujn la milito kotis

sur la ĉarman vizaĝon de l' pejzaĝo. Jam post kelkaj jaroj estos la okazaĵoj de tiu ĉi sanga periodo nur legendoj, nur materialo por historietoj, kiujn ĉe l' vintra fajrujo maljunuloj rakontos al infanoj.

Eble la ekstera aspekto estas pli agrabla ol Cezaro supozis, ĉar la arbaroj kaj arbaretoj restis nedifektitaj: la arboj ja apartenas al la dioj, amantaj la verdan, travideblan arbarombron. Tial ili devas esti nedifektataj. Nun ili disarkas sian branĉaron kvazaŭ konsolon, kaj ilia eterne unutona susurado rakontas: pasas, pasas kaj tamen restas ĉio sur la tero.

Iun posttagmezon de malfrua somero la malgranda taĉmento ektendaras ĉe la rando de tia arbareto. Druidon, kiu elpaŝis el mallumo de l' arbaro, Cezaro mem plej ĝentile petas pri permeso iom ripozi ĉi tie — li nun parolas galle, kvazaŭ li estus indiĝeno. La maljuna, blanke vestita pastro kun rigida ĝentileco donas la permeson kaj tuj retiriĝas en la arbaran profundon. Ĉu lin forpelis la elmema kaj laŭkutima inklino al soleco, aŭ naŭzo kontraŭ pli intima kontakto kun la fremdulo? Sed neniu lin pridemandas, precipe ne Cezaro; neĝenate kaj neofendite la maljunulo povas iri sian vojon.

Plene feliĉa, Cezaro enspiras la trankvilon de tiu ĉi horo. Dum la plimulto de liaj akompanantoj disvagas tra l' arbaro, zigzagante ĝoje kaj scivole ĉiudirekten, li kuŝiĝas ĉe la rando. Apoginte la dorson al tilio, vaste disombranta, li reve okulas la sunbrilan pejzaĝon. Mil bonaj, agrablaj pensoj vekiĝas en li. Li lernis ami tiun landon, kvazaŭ li mem estus en ĝi naskita, li sentas sin kun ĝi unu: dum li opiniis ĝin konkerata, ĝi konkeris lin mem, ĝi prenis lin en siajn fortajn brakojn, farante lin unu el siaj propraj filoj.

Li ne estas poeto; sed tiu solena momento inspiras al li senartan version, kiun li kun bonvola rideto ripete kaj mallaŭte deklamas:

»Venkon al nobla plugil' cedu, mortiga, ,vi, glav'!«

Bruego en la arbaro. Hola-vokoj pli kaj pli proksimiĝas. Puŝita for el la mola agordiĝo, Cezaro misthumore okullevas kaj saltas. Jam denove lin kaptis la spasma streĉo, kiu tra sep senfinaj jaroj taŭzis liajn muskolojn kaj nervojn ĝis neelporteblo. Kaj ĵus antaŭ momento li estis tiom feliĉa, ke lin forlasis tiu konvulsio. Brovsulke li okulas en la profundon de l' arbaro.

Mallonge li atendas: el inter la arboj ŝoviĝas, dense intermiksite, oficiroj kaj militistoj; ili ridas, ili krias. Li volas demandi, sed ili lin jam rimarkis kaj nun alvokas, mansvingas, signas. Nur tri vortojn li komprenas el tiu tumulto, sed tamen ne scias, kion ili signifas:

»Hola, via glavo!«

Jam senpacienca gesto. Senspire haltas antaŭ li la tumultanta grupo. Li turniĝas al Hircio, tutvizage ridanta ĝojon: »Kio okazis?«

»Nu, ni trovis vian glavon, ho Cezaro!« viglege raportas Hircio. »Tie, en la arbaro, ĝi pendas sur arbo!«

Mire lin rigardas Cezaro kaj kapbalance eniras la arbaron. Ĉiu klopodas esti la gvidanto. Kun denovaj ĝojkrioj ili iras cent paŝojn kaj haltas ĉe senarbejo.

Ĉiuj arboj estas plenplenaj de armiloj: gallaj, germanaj, romiaj. Longa sabro de suebo pendas apud mallonga glavo de legiano, cimbra ledŝildo apud edua rajdista klabo, pikstangeto apud elstara lanco. La armiloj plejparte rustiĝis, duone ruiniĝis, sed kelkaj estas ankoraŭ novaj, apenaŭ oksidigaj: jen unu el la lokoj,

en kiuj la galloj pendigas konkeritan armilaron, dediĉinte ĝin al la dioj.

Dekstre-maldekstre de unu el la arboj propravole ekpostenis du legianoj. En la mallevitaj dekstraj manoj ili tenas eltiritajn glavojn, per la maldekstra forpuŝas la druidon, kiu obstinas por atingi inter ili al la arbo.

Rigarde Cezaro sekvas la fingrojn, montrantajn supren. Ankaŭ li jam vidas: en du kroĉiloj fajreras blue kaj ore — la admirinda glavo, kiun li portis kaj per kiu li batalis en ĉiuj militoj ĝis la perdo ĉe Gergovio. Kortuŝite kaj ekscitite li rigardas la retrovitan kamaradon. Tomba silento.

»Ĉu mi deprenu?« fine Hircio riskas rompi la silenton: li jam faras unu paŝon al la arbo.

»Al la dioj dediĉite!« ekribelas la druido.

La etendita mano de Cezaro ekkatenas la movon de l' adjutanto. Nur unu longa, longa rigardo de l' imperatoro sur la estingiĝe fajrerantan glavon. Tiam li diras mallaŭte:

»Lasu ĝin pendi: ĝi ja gardos por mi Gallion!«

III. PARTO

***IMPERATORO***





## Antaŭ uragano

»Jes, patrino —« apoginte la krucitajn brakojn ĉe l' femuroj, Cezaro enpense rigardas en la malfermitan flamon de la fajrujo — »multo ŝanĝiĝis.«

Longe ili konversaciis pri la tempopaso: li kaj lia transpadia amiko Kaburo, kun sia edzino. Do al tio aludas la supraj vortoj. Sed same trafe la vortoj povus valori por lia pli proksima ĉirkaŭo: ĉar ankaŭ tie multo aliĝis. Ne tiom la ejo mem, en kiu ili sidas — domoj maljuniĝas pli malrapide, pli nerimarkeble — kiom ĝiaj loĝantoj. En iliaj trajtoj kaj staturoj la vivofluelasis neviŝeblajn postsignojn.

Sola li estas kun la geedzoj. La staturo de l' domestro estas preskaŭ tiel rekta, kiel iam antaŭe — ja, preskaŭ. Ĉar pli atente observante oni konstatas, ke lia dorso iom ĝibiĝis; la nuko ekkurbis, kvazaŭ sub nevidebla ŝarĝo; jam neĝe blanka estas la densa hararo kaj iom palaj la klaraj, akraj okuloj; ŝajne bruldifektis ilin la suno, al kiu ili estis elmetataj tra preskaŭ sep jardekoj.

Ankaŭ la dommastrino maljuniĝis: ŝia korpo forvelkis, la vizaĝo sulketiĝis; vikle, paŝete ŝi rapidemas tien-reen kaj klopodas, plej eble, komfortigi sian karan gaston.

La infanoj forestas. Valeria, la filino, estas jam

de pluraj jaroj for el la domo: amike demandante Cezaro ekscias, ke ŝi edziniĝis al bienulo el la ĉirkaŭaĵo kaj nun feliĉe patrinis du infanojn. Procillo laboras surkampe: al li la patro transdonis la bridojn de l' mastrumado, kiujn liaj maljunaj manoj ne plu povas firme teni. Sed, kiam vesperiĝos, Procillo revenos hejmen kaj estos feliĉa revidi lin, sian malnovan estron en la unua germana militiro. Kaj Donnotaŭro, la dua filo, foriris por ĉiam: li dormas eternon ĉe la limo de l' provinco, en la regiono de l' helvetoj, kiujn Cezaro iam ĵetis sur iun teruran atak-kolonon de Vercingetorikso, Indulgante la sentemon de l' geamikoj, Cezaro zorge evitas demandojn pri li.

»Mi ne komprenas la homojn,« kapbalance respondas la maljunulino la vortojn de l' gasto. »Neniam ili emas paci! Jes, neniam!«

»Nu, al mi estas malklara nur tio,« miksas sin Kaburo en la konversacion, »kial ili malpacas pro tiuj kelkaj monatoj.«

»Sed tio estas tute simpla,« respondas Cezaro ŝultroleve. »Ili estas la sola tempo, en kiu oni povas min renversi: laŭleĝe mi povus konkuri pri la duafoja konsuleco nur dek jarojn post la unuafoja, do plej frue en la sekva jaro. Kaj por esti dume sekura — en Romo estas ja sufiĉe da homoj, ĉasantaj mian kapon — mi donigis al mi siatempe la estrecon super Gallio; kompreneble, kun la dependaj militrajtoj. Nu, miaj amikoj nun asertas, ke la ofico ĉesas la unuan de Marto, kaj mi ĝin pretendas ĝis mia konsuliĝo, aŭ minimume ĝis la elektoj. Pri tiu ĉi duono, aŭ tri kvaronoj de la jaro, oni nun batalas: se mi sukcesos venkiĝi mian vidpunkton, mi estos savita: ĉar kontraŭ elektita, aŭ eble eĉ oficanta konsulo, neniu procesos.«

»He, nun mi komprenas vin,« kapjesas Kaburo.  
 »Se venkos la opinioj de la kontraŭuloj, vi estos ekde la unua de Marto privatulo kaj — sen defendo.«

»Sen leĝa defendo,« korektas Cezaro. »Aŭ, laŭ ilia opinio, laŭleĝe sen defendo,« li refoje korektas. Kaburo demande lin alrigardas. La vizaĝo de Cezaro ekruĝetas. Hezite, kvazaŭ timante siajn proprajn vortojn, li aldonas: »Sed estas demando, ĉu mi obeus senatan decidon, kiun mi trovus kontraŭleĝa.«

Profunda silento sekvas liajn vortojn, kies konsekvencojn Kaburo perfekte komprenas, kvankam ili estas tiel singarde formulitaj. Profunde li ekspiras.

»Do, ĝis tia grado la afero maturiĝis?« li diras mallaŭte.

La okuloj de la maljunulino malkvietas jen al li, jen al la alia viro. Jam ŝi rekte demandas:

»Do, denove oni militos?«

Kvazaŭ tiu ĉi frazo solvus ĉiujn malklaraĵojn. Cezaro levas la rigardon kaj, preskaŭ ektime, alokulas ŝin, kiu ĝin eldiris. Nun, kiam li aŭdis elbuŝigita la penson, kiu lin tiom turmentis en la lastaj sortopezaj monatoj, li subite resentas la fatalon, kiu lin senĉese pelas antaŭen, la ventokirlon, kiu — ĉiutage pli forta — lin kun si tiregas.

»Ne devas okazi ĝuste milito,« li diras malrapide, mediteme, profundspire. »Mi ne deziras ĝin,« li firme aldonas. »Ĉiuj miaj trupoj estas disdividitaj tra Mez-kaj Nordgallio, kun mi estas unu sola legio. Sed —« liaj okuloj mallumiĝas — »se oni min devigos —« subite li interrompas, kunpreminte la lipojn, kvazaŭ li estus dirinta tro multe.

»Ili ne riskos,« murmuris Kaburo preskaŭ timeme.

Cezaro amare ekridetas.

»Ne riskos?« li ripetas. »Estas ja nenio, kion ili ne riskus. Kiam oni murdis Klodion, la punoj estis praktikataj preskaŭ nur kontraŭ miaj adeptoj. Kaj la novan leĝon pri elektotrompoj oni garnis per milmil hokoj kontraŭ mi. La sola afero, al kiu mi povas hodiaŭ min apogi estas la ŝanceliĝemo de Pompejo. Li timas publike rompi nian rilaton kaj ĝis nun li tute ne kuraĝis rifuzi al mi, kion mi petis kun necesa energio.«

»Verŝajne ankaŭ plue li kondutos tiel,« diras denove Kaburo, nun jam pli firme kaj kun revenanta fido.

Refoje amara rideto ĉe la lipoj de Cezaro.

»Post la malvenko ĉe Aduatuko,« li rediras anstataŭ rekte respondi, »Pompejo cedis al mi unu el siaj legioj; sed, ĉar Krasso tiam falis, ĉiu el ni devis sendi unu legion kontraŭ la parthojn; nu, tiam Pompejo petis min, ke — krom la mia — mi alsendu ankaŭ tiun al mi ceditan, do fakte: du — ,por plisimpligi la ekspedon!«

»Ĉu li ne estis rajtigita por tio?« interdiras Kaburo.

»Tiu du legioj —« Cezaro ignoras la interrompon, »ankoraŭ hodiaŭ staras marŝprete en Italio, por esti disponeblaj laŭ la volo kaj plaĉo de l' senato.« Silento. Eltirinte sin el profundaj pensoj, Cezaro daŭrigas: »Mi travidas la taktikon de miaj malamikoj ĝisfunde. Hodiaŭ mi estas ankoraŭ tro potenca por ili; tial ili provas min malrapide, nerimarkeble senfortigi, subfosi. Ili rifuzas la sankcion al la civitaneco, kiun mi donis al vi; miajn veteranojn la senato volas senpere, evitante mian komandon, eksigi. Nu, tiamaniere

— ili ja tiel kalkulas — facile ili min renversos, ĉar mi restos kun malplenaj manoj kaj sen politika kredito — aŭ, eble, mi faros eĉ ian gravan eraron, per kiu mi mem min liveros en ilian potencon. Tial estas tiu senĉesa elturnigado, tiu prokrastado de l' intertraktoj, tiuj duonaj koncesioj, kiujn tuj poste oni nuligas. Ĉio iras testudopaŝe, sed tiom pli sekure.«

»Sed, ĉu en Romo perdiĝis tute la justeco?« koleremas Kaburo. »Ĉu la senato rajtas kontraŭ la volo de l' popolo, spite la protestojn de l' tribunoj —«

»La popolo! La tribunoj! Kiun oni ne povas korupti, ties buŝon oni mutigas per minacoj. La rajton havas tiu, kiu havas potencon kaj forton — por utiligi tiun potencon.«

»Terure!« mallaŭte diras la maljunulino.

Cezaro alrigardas ŝin per siaj brilaj, klaraj okuloj.

»Terure; jes. Sed samtempe ankaŭ bone: ĉar tio ebligas al tiu, kiu ne timas la paperajn ponardojn de l' hezitemaj murdistoj, detruĝi ĉion putran, ŝiman, kaj sur la purigita grundo konstrui ion novan, pli bonan.«

## Granda loto

»Kuriero el Romo?« streĉite Cezaro rigardas al sia sekretario.

Pollio kapneas, ridetante strange, embarasite.

»Labieno petas pri interparolo.«

»Labieno? Ĉu li ĉi tie?« Subita, brula ektimiĝo.

»Ĉu denove io ĉe la trupoj?«

Denove stranga, embarasita rideto.

»Ne — li petas aŭdiencon pro privata afero.«

Cezaro larĝe alokulas la sekretario. Meditas. Poste mallonge:

»Li venu!«

Pollio foriras kaj jam post kelkaj momentoj Labieno eniras la ĉambron. La bela, glacia vizaĝo estas brulruĝeta, taŭzita de interna ekscitiĝo, kiun li vane klopodas superregi. Li salutas nur supraĵe kaj ignoras la etenditan manon de Cezaro.

»Nu, kio okazis, Labieno?« afablas Cezaro demande, kunsente, zorgeme. »Kio vin trafis?«

Labieno volas paroli, sed ne sukcesas elgorgigi eĉ unu vorton. Li glutas, glutas, tiam kun peno elĵetas unuspire:

»Mi deziras danki vin pro la maniero, kiel vi repagis al mi miajn agojn en Gallio.«

»Kion?« Cezaro ne komprenas.

»Mi deziras vin danki,« ripetas la alia kun nebridata pasio, »pro via juĝo pri mi en via verko — « ŝajnas, ke la frazo konfuziĝos; li ĝin rompas kaj komencas novan — »ke en via verko pri la galla milito vi dediĉis tiel altan takson al miaj agoj.«

Cezaro ankoraŭ ne komprenas.

»Via rekono min tre ĝojigas,« li koras. »Bedaŭrinde al mi ne estis eble en tiel mallonga tempo prezenti viajn meritojn tiel kiel — « malica rideksplodo lin interrompas. Li ĉesas.

»— kiel viajn proprajn,« malamike alĵetas Labieno. Cezaro nun komprenis. Sur lia frunto, ĝis nun glata, aperas sulkoj.

»Antaŭ ĉio mi vin petas,« li akcentas, »ke vi uzu alian tonon rilate al mi.« Li iom atendas, poste trankvile daŭrigas: »Vi kredas havi kaŭzon por priplendo. Pri kio do?«

La fingroj de Labieno boriĝas inter la faldojn de la togo, kolere eltiras volumon kaj tremante ĝin ekĉifas.

»Pri kio, he?« siblas la bela, nun naŭze taŭzita, buŝo. »Pri ĉio, kio jen estas interne! Ĉiu vorto koncerne min estas falsaĵo!«

»Labieno!« Cezaro ekvoĉas tiel kolere, ke la alia senvole repaŝas. »Mi ne toleras tian tonon!« Denove li altrudas al si trankvilon kaj poste daŭrigas emfaze: »Vi havos okazon por defendi viajn asertojn.«

»Mi ne bezonas alian okazon ol la nunan,« rebatas Labieno. Denove li treme fingras tra l' volumo. »Kie ajn mi malfermas ĝin — ĉie mi renkontas nur mensogojn.«

Nun ankaŭ Cezaro perdas sian paciencon.

»Do ek, mi petas! Ek jam!« Kaj ĉar la pli juna



hezitas, li ekakras, ekfuriozas: »nu tuj ek, se vi volas, ke mi ne opiniu vin aĉa kalumnianto!«

Labiene terure paliĝas. Per tremantaj manoj li tenas la libron antaŭ si kaj igas la okulojn flugi laŭ la linioj.

»Do?« kolere insistas Cezaro.

Profunda ekspiro.

»Jen.« La tremanta fingro montras alineon. »La atako sur la postgvardion de l' helvetoj. Vi ĝin prezentas, kvazaŭ vi mem estus ĝin plenuminta; kaj vi entute ne estis tie! Tiam vi estis en la regionoj de l' ambaroj! Mi, mi tion plenumis!«

»Vi pravas!« glacie rediras Cezaro. »Sed vi ignoras, ke vi estis sub mia komando kaj ke mi mem ellaboris la planon. Via merito estis, kiel ĵus vi mem diris, nur la plenumo.«

»Ĉu!« serpenta eksiblo. La rapidema fingro glitas plue, kroĉiĝas denove en iu loko. »Kaj la batalo ĉe Bibrakto, kiun fakte nur mi gajnis? Mia flankemanovro, kiu sola donis la favoran ŝanĝon? Ĉu ankaŭ ĝi estis via plano? Ĉu ankaŭ ĝin vi mem ordonis?«

Nigraj nuboj sur la frunto de Cezaro.

»Tion ni priparolis en la vespero de l' batalo. Ĉu mi nun ripetu, ke via arbitra operacio per la rezervotrupoj tiam min puŝis en tre krizan situacion... kaj ke estis necesa mia tuta spiritĉeesto por adaptiĝi al vi en la lasta momento? Kio estus el la batalo, kio estus el ni ĉiuj, se vi ne estus havinta feliĉon ĉe via fortuna atako?«

»Feliĉo! Feliĉo! Kie kaj kio vi estus sen via feliĉo?!« Lia okulo serĉas plue. »En la batalo kontraŭ Ariovisto, en kiu mi forpuŝis la maldekstran frontofinon,« vi min eĉ ne mencias; male, vi laŭdas la junan

Krasson, kiu ja ĉe Karrho pruvis sian militistan talenton.«

Mankis nur tiu profano al la mortinto por puŝi Cezaron en paroksismon.

»Neniam mi alte taksis vian karakteron, Tito Labieno,« li diras malestime. »Sed neniam mi supozis, ke vi povas esti tiel malnobla. — For de miaj okuloj!« Li tondras.

Sed Labieno ne cedas. En kunpremita pugno li levas la libron kontraŭ Cezaron.

»Vi korektos ĉiujn erarojn!« li krias.

»For!«

»Ne antaŭ ol vi vin devligos —«

»For — aŭ —« kun sang-subfluaĵ okuloj, kiel du pugnoluktistoj, staras la du viroj interkontraŭe.

La pordo disflugas: Pollio.

»Kuriero el Romo.«

Du profundaj forspiroj. Kvazaŭ tra la malfermita pordo en la venenitan atmosferon enfluus freŝa aero. Cezaro rektiĝas, la ruĝa nebulo forŝiriĝas de liaj okuloj. Ankaŭ nun, kiel ĉiam post siaj maloftaj koler-eksplodoj, li sentas honton. Iom ŝanceliĝe, sed jam plene sin regante, li diras al Labieno:

»Poste ni parolos, Labieno. Nun mi estas okupata. Iru nun!« Kaj dum Labieno senvorte forlasas la ĉambron, li — jam tute ekvilibra — diras al Pollio:

»Venigu la kurieron.«

Sed vidante kiu eniras, li preskaŭ denove perdas sian trankvilon.

»Kurio! Ĉu vi?!«

Tute polva, lacega, sed ŝajne plej bonhumora, Kurio sin ĵetas en la proksiman seĝon, ne atendente inviton.

»En tri tagoj mi alrajdis el Romo. Ĉu mi povas ricevi gluton da vino?«

Pollio elkuras por alporti. Ankoraŭ ĉiam luktante por sia trankvilo, Cezaro senvorte okulas la popoltribunon. Kion serĉas ĉi tie la genia fripono, kiun li koruptis per granda sumo, por ke li konstante observu kaj obstrukcu la intrigadon de la kontraŭuloj en la senato? Certe okazis io tre grava, kio lin venigis ĉi tien en Ravenon!

Jes, tiel estas: Kurio sorbas longan gluton el la kruĉo, alportita de Pollio, tiam apogas sin aldorse kaj ridete ekrigardas Cezaron:

»Ĉu vi estas tre timema, ho Cezaro?«

»Ne parolu sensencaĵojn!« rifuze li koleras.

»Ĉar tiaokaze mi novaĵus al vi gutgute. Sed ankaŭ mi mem pensas, ke estas pli bone diri al vi ĉion unu-spire. Do, atenton: vi estas proklamita kiel malamiko de la patrujo, la senato ordonis mobilizon kaj al Pompejo oni komisiis la plenumon de l' tasko kontraŭ vi.«

Ekkrio de timo; sed ĝi venas ne de Cezaaro: li eĉ ne paliĝis. Tute trankvile kaj mediteme li diras:

»Mi tion antaŭvidis. Tio estas nur la lasta ĉenero en la kontinua evoluo de l' okazaĵoj.« Li rektiĝas. »Nun almenaŭ finiĝos tiu traktado kaj marĉandado: jam klaras ĉio.« Preskaŭ ĝoja li portas seĝon ĝis la tribuno kaj sidiĝas. »Do, rakontu, Kurio, ĉu vi prezentis mian leteron?«

»Vian ultimaton kun la cedoĵ? Guste pri tio mi volas paroli.« Li sorbas pluan gluton kaj daŭrigas: »La leteron — por tralego — mi prezentis en laa kurio la unuan de Januaro. Domaĝe, ke vi ne ĉeestis tiun alte dramatan scenon! Viaj vortoj efikis al ĉiuj profundan impreson kaj la plimulto, sendube, decidus

laŭ via sugesto, se ĝin ne terorus — plensence — la ekstremuloj. Sed tuj leviĝis la konsuloj, antaŭ ĉiuj Marcello kaj malpermesis ĉian debaton pri viaj proponoj; Kvinto Scipiono deklaris, kiel voĉtubo de Pompejo, ke nun alvenis la momento por agi kaj ke li ĝin utiligos. Tuj al li aliĝis la dua konsulo Lentulo, publike deklarante, ke la decidoj de l' senato lin ne ligos, ke li kaj liaj amikoj eĉ sen ili komencos la batalon. Tiel timigita, la plimulto akceptis la decidon, ke vi devas, en la daŭro de kvar semajnoj, transdoni Gallion al komisiono, gvidata de Domicio Ahenobarbo. Alie oni vin traktos kiel ŝtatperfidulon. Antonio kaj mi levis nian proteston. Sed tiam kelkaj el la pasiaj partianoj de Pompejo provis nin atenci per armiloj. La senato, proklaminte nian agadmanieron revolucia, akceptis la decidon »*Videant consules*« kaj elektis Pompejon militestro kontraŭ vi. Ni devis forkuri el Romo alivestite — kaj jen mi estas ĉi tie. Antonio, havante malpli bonan ĉevalon, verŝajne venos post horo. Nu, tio estas ĉio.« Streĉite li alrigardas Cezaron. »Kion vi faros nun?«

Cezaro leviĝas. Trankvile, malrapide.

»Tuj vi vidos, kion mi faros. Kiom da legioj Pompejo disponas?«

»En Italio nur du, kiujn vi mem cedis al li. Sed la mobilizo jam plene ekfunkciis.«

»Ne konsiderinde. — Pollio!« Tio estas denove la iama komandovoĉo, kiu tremigas la sekretarion, kiel en la tempo de la adjutanteco.

»Imperatoro?«

»Ordonu alarmi kaj vicigi la Dektrian: post horduono mi estos tie. Al Fabio kaj Trebonio ekspres-

ajn depeŝojn, ili devas senhezite alkonduki siajn ok legiojn. Venigu Labienon!«

Pollio, farante rapidajn notojn, hezitas:

»Imperatoro —«

»Nu?«

»Vane vi atendas Labienon. Jus oni diris al mi ekstere, ke li forgalopis al Romo.«

Cezaro trankvile lin aŭskultas, trankvile diras:

»La unua transkurinto. Espereble ankaŭ la lasta.«  
Ŝultrolevo. »Do bone, mi devas alie disponi. Iru jam Pollio.« Tiu sin ekspedas. Cezaro lin postrigardas, poste turniĝas al Kurio: »Antonio, vi diris, estas survoje ĉi tien?«

»Ĉiumomente li povas alveni.«

»Kaj vi? Kio pri vi? Ĉu vi partoprenus kun mi la militon?«

»Kiel —?«

»Kiel trupestro, kompreneble. Mi havas unu legion: ĝin mi dividos en tri kolonojn: kaj igos ilin marŝi samtempe tra ĉiuj tri ŝoseoj kontraŭ Romon.«

Kurio lin rigardas, dubas, konjektas, jam komprenas: »Meze de la mobilizo internen?«

»Jes. Unu kolonon gvidos mi mem, la duan Antonio kaj la trian vi, se vi akceptas.«

Kurio saltas.

»Ĉu mi akceptas?« Li entuziasmas krie. »Mi ĝojegas, ke mi fidis al vi! Hej, tiuj aliaj estis malsaĝuloj kiam ili ekriskis ludi loton kontraŭ vi!«

»Jes,« diras Cezaro malestime. »Nun mi jetos la loton!«

## Ĉio pretu!

Ankaŭ Cezaro rimarkas, kiel Marko Antonio al la eniranta Kurio ekpalpebrumis per la maldekstra okulo. Bone li komprenas la signifon de tiu ĉi grimaco; sed li ne deziras plue konservi la maskon de ŝajnigata trankvilo kaj ekstera sinrego: en li ĉio furiozas kaj li ne estas inklina lukti kontraŭ la uragano, tuj eksplodonta.

Sendube ankaŭ Kurio tion rimarkis kaj komprenis; sed li ankoraŭ ne konas bone Cezaron. Tial li ne imitas la aliajn, kiuj sin tenas tute trankvile kaj laŭeble evitas la incititan tigron. Ĝoje alpaŝinte Cezaron, li senzorge salutas.

Nekomprenebla murmurado de l' homo, manipulantaj aktojn kaj geografiajn kartojn, estas la respondo; ĉiu alia sin ekgardus, sed Kurio preferas, laŭ sia kutimo, ĝoje komenci la konversacion:

»Nu, Cezaro, kiel plaĉas al vi en Romo? Kiel longe vi forrestis? Naŭ aŭ dek jarojn, ĉu? Ĉu vi trovas la urbon terure ŝanĝita?« La furiozaj okuloj de l' venkinto super Gallio lin boras; sed tiu muta minaco lin ne ĝenas, li daŭrigas sian babilon: »Tion vi grandioze plenumis: per unu sola legio alataki, perdi preskaŭ neniun militiston kaj dum ne pli ol ses semajnoj fini la militon — ja, majstrajo!«

La buŝo, premate inter tremetantaj makzeloj,

moviĝas, la lipoj pintiĝas malrapide. Ekgrincas raŭko la voĉo:

»Kian militon?«

»He, kompreneble, tiun kontraŭ Pompejon; alian vi ja ne gvidas.«

»Kaj ĝin vi opinias finita?«

»Nu, kiel alie? Vi estas, nepridiskuteble, mastro de Italio kaj Romo — Pompejo kun la ekstremuloj forkuris en Grekujon —«

Akto-fasko krakas sur la tablono, disblovante polvan nubegon.

»Ankaŭ vi havas tiel malmulte da cerbo, kiel la aliaj, ekkrias Cezaro. »La milito finita? Eh, ĝuste de nun ĝi komenciĝos!«

Kurio konsternite lin okulegas.

»Nu jes — sed —« li balbutas.

»La milito ĝuste de nun komenciĝos,« Cezaro ripetas same furioze, kiel ĵus antaŭe, »kaj la senato prave ĝojas: ĉar nun ĝi tenas min en interpretilo kaj povas laŭplaĉe premeĝi. Ĉu mi havas mian armeon? Jes, ie supre en Gallio! Ĉu mi havas ŝipojn? Eĉ ne unu! Ĉu mi havas monon? La fisko, kiun mi devis forrabi, kvazaŭ ŝtelisto, jam delonge estas elspezita por ŝtopi la buŝon de l' grumblema plebo! Kaj vi nomas min mastro de Italio, vid-al-vid de la senato, al kiu sufiĉas unu sola vorto por ĵeti kontraŭ min la sep legiojn el Hispanio, la du el Grekujo, la tri almarŝantajn sub Kassio el Sirio kaj sub Scipiono el Cilicio! Ne, kun vi oni ne povas labori! Vi estas ja — vi estas ja blindaj!«

La eksplodo de Cezaro estingis la elokventecon de Kurio. Feliĉe, neniu atendas, ke li ion diru. Cezaro saltleviĝas kaj ekrapidas tra la ĉambro.

»Eh, al vi estus konvene,« li krias plue, »fari el mi duan Katilion! Tiel vi imagis, he? Ni enmarŝos Romon, prirabos la urbon, bruligos ĉiujn ŝuldlibrojn, diboĉos en ĝuo kaj bruo — ĝis ekplaĉos al la senato eltordi nian kolon. Sed mi diras al vi — « li haltas kaj vipas ilin per flamantaj okuloj — »el tiu suko ne estos kuko! Kiu nur ekfingros por la havaĵo de alia, tiu ŝnurpendos! Mi ne entreprenis ja tiun batalon por ŝanĝi unu teroron per la alia!«

Denove li ekpromenas. Liaj pensoj disŝprucas:

»Pompejo estas malsaĝa, jes malsaĝa,« li tradentas. »Se li venus nur al unu interparolo — ankoraŭ oni povus aranĝi ĉion. Sed ne — ho, la malbenita vantemo! — Kiel ja povus la imperia militestro trakti kun simpla prokonsulo, kun ekribelinto! He, nun li pli profitos: oni elpremos lin kiel citronon kaj poste forĵetos! Bone mi konas tiujn noblulojn!«

Refoja halto.

»Sed mi trovos rimedon ankaŭ por ili!« li krias. »Mi rompos la nukon al unu post la alia kaj poste ordos la imperion laŭ mia plaĉo!« Li haltas meze de furioza gesto kvazaŭ ŝtoniĝinte; la levita brako refalas kiel velkinta branĉo. Estingiĝe, senvive li subite ekvoĉas: »Ĉu vi venas de la konsulo?«

Tiu senpera temŝanĝo konfuzegas Kurion.

»De Lentulo — jes — « li balbutas.

»Kion li diris?« Cezaro senpacienca. »Ĉu li estas inklinata promocii min diktatoro?«

Kapneo.

»Ne — li deklaris al mi, ke nenia potenco en la mondo povus lin devigi — «

»Ĉu vi diris al li, ke mi estas preta pagi ĉiujn liajn ŝuldojn?«



»Jes. Sed li respondis, ke li ne vendas la respublikon.«

Cezaro staras silente, senmove, kvazaŭ aŭskultante la eĥon de l' vortoj. Tiam li malrapide ŝultras supren, malsupren. Nun li estas — almenaŭ eksteraje — plene trankvila.

»Nu, kun li oni do povas fari nenion, »li diras malestime. »Eble eĉ pli bone tiel. Ĉiuj kompetentuloj, Katono, Marcello, Scipiono foriris kun Pompejo en Grekujon — nu, kun tiu ĉi stumpo-senato oni ja ne povus regi« Li disstreĉas la membrojn kaj profunde ekspiras. »Almenaŭ neniu min ĝenos per grumbloj.« Kun la manoj surdorse li daŭrigas la promenadon. Lia cerbo laboras. La aliaj silente atendas.

»Senprokraste ni komencos la militajn operaciojn,« fine li elbuŝigas. »Morgaŭ mi forvojaĝos en Hispanion. Pollio, vi avizos la komandantojn en Gallio, ke oni atendu min en Narbo.« Li iras al la tablo, prenas iun el la aktoj tie kuŝantaj, notas sur la marginon kelkajn rimarketojn. »La tri veteranaj legioj, kiujn mi havas ĉi tie, estu tuj marŝpretaj: morgaŭ ili iros kun mi« Li okullevas kaj lia streĉita, ne plu malhela, rigardo serĉe ĉirkaŭvagas. »Kion mi bezonas krome?«

»Ŝipojn,« Kurio rememorigas preskaŭ timeme.

»Ŝipojn,« distrite ripetas Cezaro. Refoje li kaptas la ideon ripetante: »ŝipojn. — Antonio kaj Lepido restas ĉi tie. Vi, Lepido, garantias pri la paco en Romo, vi, Antonio, gardos Italion. En la havenurboj, antaŭ ĉio en Tarento kaj Brundisio, oni konstruu tiom da ŝarĝ- kaj milit-ŝipoj, kiom la dokoj ebligas. Kurio, vi ricevos kvar rekrutlegiojn kaj okupos Sicilion, poste vi iros en Afrikon por ŝirmi la dekstran ekstremon de

l' militistaro. Dolabello, vi marŝos kun du legioj en Illirion kaj observos Pompejon.« Li levas la kapon malantaŭen kaj mankovras la okulojn. »Mi kredas, ke tio estas ĉio« li diras malrapide. »Aŭ mi bezonas krome ion?«

»Monon...« velke elflustras Kurio.«

»Monon!« Cezaro kapjesas. »Pollio, mia filo, iru al bankiero Attiko kaj diru al li, ke li venigu en la hejmon kelkajn el siaj kolegoj; mi plej baldaŭ venos tien.« La junulo, kutimanta mute obei, kapsalutas kaj senbrue sin ekspedas. Antonio riskas mallaŭtan ride-ton: treege lin amuzas tiu mon-postulo ĉe la plej bona amiko kaj financisto de Cicerono. Ankaŭ Cezaro, iĝante vort-al-vorte pli serena, ridetas — afable, pirate. »Mi esperas, volonte ili pruntos al mi la monon, se mi sufiĉe energie klarigos al ili, ke tio estas nur kotizo por la sekureco de iliaj kaso.« Momente li ĝuas la komprenan subridetadon de siaj adeptoj, poste denove li iĝas realema. »Sed nun vere estas ĉio,« li ripetas fingronombre: »militistaro, ŝipoj, mono. Do, ni rapidu por venki unue la armeon sen estro kaj poste la estron sen armeo.«

Kurio embarasite kraĉotusas, rimarkigas:

»Estron sen armeo? Sed vi ja mem diris, ke Pompejo havas kun si militistaron.«

Grandioza mangesto.

»Du legiojn,« respondas Cezaro malestime. »Ne fidindaj por Pompejo, ĉar iam ili estis sub mia komando.«

»Kaj tiuj tri sub Kassio kaj Scipiono?«

Refoje la sama gesto.

»Ĝis ili venos el Azio...«

## Du Virinoj

Hodiaŭ oni ne kondukas Cezaron en la ĝardenon: nordvento blovas tra senfoliaj arboj kaj pelas la homojn en la domojn. Tie, envolvite en varmaj vestoj, ili sidas frostotreme kaj mishumore ĉirkaŭ fumantaj karbujoj.

Lian eniron oni honoras per ceremonioj apartenantaj al granda sinjoro: lakeoj spaliras ĝis la pordo de l' malgranda, agrabla ĉambro, kie atendas la dommastrino por bonvenigi lin laŭ alta ĝentileco. Tamen Cezaro kun nedifinita, obtuza malĝojo rememoras la iaman tempon. Tiam li kutimis eniri en la saman salonon neanoncite kaj la arda brilo de l' grandaj okuloj estis pli bela bonvenigo ol la tuta pompo, kiun hodiaŭ oni incensas al li.

Nun ili sidas vid-al-vide kaj konversacie ĝentilas. Li informiĝas pri ŝia farto kaj afable esprimas ĝojon pri la bonega aspekto. Ŝi gratulas al li pri la brilaj sukcesoj en Gallio, aldonante kelkajn demandojn pri la lando kaj ĝiaj loĝantoj. Sed li klare rimarkas, ke ŝi demandas neinterese, ja nur pro la ĝentileco mem.

Aŭtomate respondante li kaŝobservas ŝin. Kvankam maljuniĝinta, ŝi tamen ankoraŭ konservas postsignojn de l' iama beleco — kaj precipe tiun sorĉon de l' perfekta grandsinjorino, kiu iam lin tiel entuziasmigis.

Nur la okuloj, la grandaj, profundaj okuloj ne plu tiel varmas kaj molas kiel antaŭe; en ili enas tiu malmola, glacia brilo, kies ekflamon li unuafoje rimarkis kiam li parolis pri sia baldaŭa edziĝo al Kalpurnia.

Sed li ne venis por konversacii pri vantaĵoj. Dum la tuta tempo en Gallio li sentis tiun araneaĵon, kiu iom post iom disŝpinigis, kiu el tiu ĉi domo kaj el la domo de Katono nun retas super la tuta senato. Kaj fine en ĝi kaptiĝis ankaŭ Pompejo, tiel senhelpa en la politiko. Nun li provos malkovri tiun araneaĵon por konstati, kiel sin tenas al li Servilia kaj kion li povas de ŝi esperi.

»Marko Bruto bone fartas?« li diras en la unua paŭzo, kun ŝajnigita senzorgemo.

»Mi esperas,« respondas Servilia samvoĉe.

»Mi bedaŭras, ke mi ne povas lin vidi.«

»Jes, domaĝe. Li forvojaĝis.«

»Mi scias, mi scias,« Cezaro kapjesas indiferente kaj aldonas: »Kun Pompejo.«

Ruĝeto de embaraso.

»Jes —« Servilia, evidente, serĉas mildigan vorton — »ĉio okazis tiel rapide — entute al li ne estis eble elekti —«

»Mi scias,« ripetas Cezaro preskaŭ ĝojridete. »La pormilita partio ŝajne praktikis nekredetblan teroron.« Li jam tiriĝas el la komforta pozicio. »Ĉu ne estas tre malĝojige,« li daŭrigas, ke ĝuste tiel okazis?«

»Kion vi pensas?« konfuzite ŝi demandas.

»Ĉion —« li rediras kun nedefinita gesto. »Sendube, mi tute ne havis militemajn intencojn. Sed kion ajn mi entreprenis, ĉiujn miajn klopodojn por firmigi la pacon, obstrukcis kaj kontraŭrimedis iaj nevideblaj fortoj.«

Rapida, esplora flankrigardo.

»Vi suspektas?«

»Eĉ pli: mi pozitive scias.« Li vidas ŝian subitan paliĝon kaj instinkte eksentas la vundeblan punkton. Kun neesprimebla energio de riskludanto li ĝin atakas. »Personaj malamikoj, kaj malamikinoj — al kiuj pli valoris ilia vantemo ol la komuna bono — « li volas leviĝi, sed rememorante, ke ĉi tie li ne plu — ja, ne plu! — hejmas, li rompas la movon: tio donas la pozon de saltopreta pantero — »ĉu tio ne estas abomeninda?«

Ŝi ne povas reciproki lian rigardon.

»Vi devus citi iliajn nomojn,« ŝi elmurmuras.

»Por kio la nomoj? Ĉu al vi ne sufiĉas, kion mi diris?« li alnajas ŝin per siaj okuloj.

Ŝi larĝe malfermas la siajn kaj alrigardas lin rekte en la vizaĝon. Li preskaŭ ektimas pro la nekaŝata malamego, elŝprucanta sur lin. Nun fine li akiris la certecon — ankaŭ la volon ĝin utiligi.

»Tamen mi volus aŭdi la nomojn,« ŝi insistas.

»Ĉu de viroj aŭ de virinoj?«

»De unuj kaj aliaj.«

Denove li apogas sin aldorse.

»Katonon,« li diras. »Bibulo.«

»Plue!« ekscitite ŝi provokas.

»Porcia, la bela filino de Katono.« Pripensite hezitas la vortoj sur liaj lipoj.

»Porcia?« senkomprena mirego.

Cezaro profunde ekspiras: ŝi atendis alian nomon.

»Porcia,« li ripetas malrapide. Ŝi fakte estis nur rimedo por atingi la celon, nur logaĵo, por ke ĝin enmordu tiu, kiun oni volis stimuli kontraŭ min.«

»Porcia estas edziniĝinta,« Servilia tradentas.

»Ĉu vi tion opinias malhelpo?« li demandas rekte kaj krude. — »Tiom pli malbone — por Bruto,« senkompatate li elbuŝigas.

»Kion vi volas diri per tio?« sufokiĝe ŝi balbutas.

Nun li tamen leviĝas. Alte kaj rekte, kvazaŭ lanco, elstaras lia staturo en la vesperiĝo.

»Per tio mi volas diri,« li respondas mallaŭte, »ke oni ludis per mi kaj Bruto kanajle, intrigaĉe. Ke oni utiligis Katonon, Bibulon kaj la belan Porcian por inciti Bruton kontraŭ min; ke oni puŝis la aferon tiom malproksimen, ke Bruto akiris militgloron ne sub mi, sed kontraŭ mi; ke la filo levis armilon kontraŭ la patron.« Li alklinas la kapon pli proksimen kaj superŝutas la kuntiriĝintan virinon per fasko de siaj rigardoj. »Ĉu mi diru al vi, kiu estas tiu oni? Ĉu mi eldiru ankaŭ la lastan nomon?«

Ŝi eksaltas kvazaŭ serpento. Ŝia malamo perceptas el liaj vortoj tion, pro kio sangas lia sekreta vundo. »Via filo!« Tradente mokemas ŝiaj kolertremaj lipoj. »Sed ĉu li scias, ke li estas via filo?«

Li alrigardas ŝin preskaŭ konsternite.

»Sed, ĉu li ne konas sian devenon?«

»Ne!« malmole tranĉas la vorto, pasie eksplodas la furiozo: »Nu, mi ne povis ja diri al li, ke li estas bastardo!«

Cezaro sentas, ke la sango entorentas lian koron. La manoj kaj piedoj jam malvarmas glacie. La tremantaj fingroj de la dekstra mano palpas al la seĝapogilo, apud kiu li staras.

Tiam la sango denove refluas en la vejnojn.

Li jam plene regas sin. Stonvizaĝe li rigardas la furian maskon antaŭ si.

Kaj nun rigardante tiun vizaĝon, kiun li iam tiom amis, lia kolero, doloro kaj nervostreĉo estingiĝas. Postrestas nur malĝojeto, sed ankaŭ ĝi tute supraĵema, netuŝanta la animon, kvazaŭ li starus apud malnova, delonge forgesita tombo.

»Se, vere, vi opinias lin bastardo,« li diras sufokite, kvazaŭ en ĉambro de mortinto, »kompreneble, vi ne povis al li tion diri. — Adiaŭ do, ho Servilia!«

Klininte la noblan kapon, li turniĝas sur la kalkanoj kaj forlasas malrapide, egalpaŝe la salonon, la domon...

»Nu, kio?« Cezaro leviĝas kaj per okuloj devantaj reveni en la realon, li rigardas la serviston, kiu alportis lampon. Estas profunda nokto. »Ah tiel,« dire li ĝemas kaj rapide aldonas: »Mi volas esti ĝenata de neniu. Guste de neniu.«

La servisto hezitas.

»Nu? Kio krome?«

»La mastrino petis — se vi havus tempon —«

»Do?«

»La vespermanĝo atendas.«

Sur la lipoj ekpendas rifuza vorto. Sed li ne eldiras ĝin. Malrapide leviĝinte, li sekvas la lumportanton.

En la manĝejo atendas Kalpurnia. Ankaŭ ŝin ne preteriris sensigne la ok jaroj; sed, dum la matura beleco de Servilia forvelkis, ŝia knabina ĉarmo elburĝone disfloris. Rave bela ŝi estas nun, tiel stare atendante la edzon, zorge frizinte la admirindan, noblan

kapon, en la hela korpoglua vesto, kun la familia juvelaro de l' julianoj ĉirkaŭ la kolo kaj brakoj.

Cezaro ŝin salutas kun sindetena ĝentileco, preskaŭ kiel fremdulino; sed tiu belega bildo tamen lin iom kortuŝas.

Li alpaŝas la tablon, kiun laŭtradicie ĉirkaŭas seĝoj kaj ne kuŝripoziloj. Surprizite li haltas: lian manĝilaron girdandas rozoj kaj laŭro. Kaj kiam li levas rigardon, li rimarkas en la vizaĝo de Kalpurnia mildan rideton.

Nevole li redonas la rideton, montras la ornamitan tablon.

»Kial?« li demandas.

»Ĉar morgaŭ vi denove estos for,« ŝi respondas.

»Tiel do!« li kapbalancas. »Ah tiel.« Li atendas ĝis ŝi sidiĝas, tiam li ankaŭ. Servistoj enportas unuan mangajon: mar-konkojn.

Pensodrone li ĝuas la vespermanĝon nerimarkante, ke ĝi konsistas el liaj preferataj mangajoj. En kruĉon, plenan de *kiea* vino, li igas almiksi mielsukon kaj nun ekkomfortas dorsapoge al la seĝo. La servistoj jam forlasis la salonon. Lampoj en diafanaj, tralumaj kornovazetoj disradias sur la tablon molan, egalan lumon. Tio ne estas korprofunda trankvilo, kion li sentas, — jam delonge ĝi estas al li fremda — sed tamen ia ripozo, malstreĉiĝo. Unuafoje post longa tempo.

Kalpurnia alrigardas lin, sed silentas kiel ankaŭ li mem. Kubutante sur la tablo, ŝi kunplektis la manojn kaj sur la fingrojn apogis la mentonon. Tiel ŝi rigardas transen al li, observante eĉ plej etan tremeton en lia kvieta vizaĝo.

»Kajo!« fine ŝi elflustras.

»Jes,« distrite li respondas.



»Kiel vi sentas vin, Kajo?« Li okullevas iom mirigite.

»Bone,« li respondas. »Mi dankas vin: tute bone.« Ŝi ridetas kaj kontentas kapbalance.

»Tio min ĝojigas.«

Ŝia rideto trapenetas lian lacon. Li ekatentas.

»Kial vi demandas,« li interesiĝas.

»Ĉar mi deziras, ke vi sentu vin ĉi tie vere bone kaj agrable.«

Flugetas rideto nun ankaŭ en lia vizaĝo.

»Mi vere min sentas komforte kaj agrable,« li ripetas. »Mi dankas vin.«

»Vere.«

Ŝi liberigas unu el siaj manoj kaj metas ĝin plate trans la tablo. Li surmetas la sian kaj mole ekkaresas la delikatajn fingrojn.

»Do, vi estas kontenta pri mi?« ree ŝi demandas.

»Ĉu mi bone estris vian domon?«

»Oni ne povus pli bone!« konvinkite li jesas.

»La edzino de Cezaro havas devojn. Neniam mi tion forĝesis.«

Li levas la mallarĝan manon al siaj lipoj.

»Jes, kara infano, mi vidas tion.« Momenton li silentas, tiam daŭrigas: »Vi plenumis viajn devojn perfekte.« Ŝi ete ekridas kaj Cezaro nevole sentas, kiel hele kaj freŝe sonoras tiu rido.

»Nun vi flatas,« ŝi ĝojas. Sed tuj ŝi serioziĝas kaj larĝokule lin alrigardas. »Ĉu ankoraŭ vi rememoras nian unuan vesperon?«

Li kapjesas.

»Tiam mi kondukis neeldireble malsaĝe, ĉu ne?« Ŝi atendas lian respondon; sed ĝi ne venas. Tial ŝi

daŭrigas: »Mi tre dezirus paroli kun vi pri tio. Ĉu vi volas min aŭskulti?«

»Volonte.«

Ŝi retiras la manon, ekfingretas kelkajn panerojn, mallevas la rigardon.

»Mi ne scias,« ŝi malrapidas, »kie komenci. — Vi estis por mi — de kiam mi memoras, tiel dire ia pli alta estaĵo — io, pri kio oni efektive — ne kredas, ke ĝi vere kaj fakte ekzistas — manĝas, trinkas — vivas, kiel aliaj homoj. — Kiam hejme oni parolis pri vi — ja, patro, tre ofte parolis pri vi — oni povus pensi — ke iu rakontas mitojn — kiel pri *Romulo* aŭ *Numo*. »Cezaro faris tion.« »Cezaro faris tion alian!« »Cezaro venkis la senaton.« »Cezaro denove enkondukis rajton apelacii.« Ĉiuj aliaj estis nenio, nur la amaso, el kiu apenaŭ elstaris, ie-tie, iu persono — vi sola altis super ĉiuj, vi, Unu super la Multaj.« Ŝi kapklinas pli profunden, pripensante pluajn vortojn. »Tiam venis la tago, kiam vi ekdeziris min via edzino. Patro min demandis: »Ĉu vi volas? kaj mi jesis. Kion alian mi ja povis fari? Eĉ penseto ne venis al mi, ke rilate vin oni povus havi propran volon. Nu, Cezaro tiel ordonis, do, tiel ankaŭ okazos. Sed, eĉ tiam, mi ne povis min konvinki, ke ĉio ĉi estas realo. Al mi ŝajnis, ke mi vivas strangan sonĝon, el kiu mi povus vekigi ĉiumomente. Mi sentis min kvazaŭ di-fianĉino — kvazaŭ *Io* — kvazaŭ *Danaa*. Tiam mi tute ne mirus, se la muro de mia ĉambro subite disfendiĝus kaj vi altorentus enen, kiel nubo aŭ orpluvo.« Refoje ŝi ek-silentas kaj nur post momento daŭrigas: »Tiam venis la tago de l' edziĝo. Unue la ceremonio, kiu min tiel solene agordis — tiam la festeno — ĉu vi rememoras? Kie vi sidas nun, sidis Pompejo apud Julia — jam for-

iris ĉiuj — kaj ni du restis solaj. Ankoraŭ mi ne povis kredi, ke estas realo, kion mi travivadis. Mi flustris al mi malnovajn infan-versojn por certigi, ke mi ne dormas, mi brakis ĉirkaŭ min — kvazaŭ antaŭ mi estus muro — kaj samtempe mi sentis nekonatan, nekompreneblan korpremon, pli kaj pli kreskantan. Ofte mi revivigis tiujn minutojn, huj, mi havis por tio ok longajn jarojn — kaj mi memoras ĉiun vian vorton ĉiun vian geston. Kiel, unue, vi min tiel delikate prenis kaj sidigis sur la seĝon apud vi. Viaj amoplenaj vortoj tiel agrablis min — tiel dolĉe min sonĝlulis — ke mi aŭskultus vin senfine. Sed subite — kvazaŭ arda timo trafajrus min. Mi ne scias, en kiu momento tio okazis, sed mi jam vidis viajn okulojn — kiel nigraj flamoj ili estis kaj ilia rigardo traboris ĝis profundo de mia animo. Mi vekigis subite kaj ekkomprenis, ke ĉio estas realo, ke la dio, kiun ĵus mi kredis senti apud mi, estas nur viro, kiu min avidas, el kies varma korpo sur min ardas spiro, ĉirkaŭvolvante kaj preskaŭ forbruligante min. Mi volis eksalti — kuri for — sed ne povis: mi estis jam aĵo, senvola objekto, kiun vi povis laŭplaĉe disponi kaj regi. Samtempe ŝajnis al mi, kvazaŭ mi sidus antaŭ vi tute nuda, senvestigita kiel sklavino, vendata ĉe foiro. Honto, fiero, korteruro — mi mem ne scias, kio ĝi estis. Mi sentis nur, ke mi devas forpuŝi viajn brakojn, kiuj etendiĝis por mi, ke mi devas forkuri de l' arda spiro, bruliganta la vizaĝon, ke mi devas kaŝiĝi for de viaj nigraj, flampikaj okuloj. Kaj tiam — tiam okazis tio — nun ŝi parolas flustre, apenaŭ aŭdeble — »ke mi kolektis mian tutan forton kaj kun lasta peno de l' volo forsaltis, eldirante en paniko la vorteton: ,Ne'! » Ŝi hezitas, rigardas antaŭ sin. Per strange seka voĉo ŝi finas: »Tiam subite ĉio kvi-

etiĝis. Vi alrigardis min — kaj mi jam komprenis ĉion. Tiel froste iĝis en la ĉambro — vi levigis — ion diris — vi foriris. Mi restis tute sola — kaj mi sciis, ke mi vin perdis por ĉiam.»

Profunda silento. Tiam refoje ŝi daŭrigas: »Tere mi pripentis tiun stulton de l' knabino, ho kajo, ja, terme, amare: dum la ok senfinaj jaroj. Ili min instruis, kion mi detruis per tiu ununura vorteto: mi devis esti al vi kamaradino, amikino, eble —« flustre, tute flustre — »ankaŭ guteto da feliĉo. Ĉion ĉi mi preterlasis. Vi sopiris filon — mi ne donacis lin.« Ŝi klinas la kapon, sed tuj ĝin levas. Ŝiaj vangoj ardas flam-etan ruĝon, tamen la rigardo estas brila kaj firma. »Dum la ok jaroj mi pentis, ho Kajo,« ŝi diras klare. »Sed la dioj ne postulas penton senfina. Kaj tial mi pensas, ke tamen povus veni la tago, kiam ankaŭ tiu provtempo finiĝos, la tago, kiam vi ekscios, ke nun mi komprenas vin pli bone, la tago, kiam vi refoje venos al mi, kiel vi venis tiam —« jam tute, tute flustre — »kiel tiam min ĉirkaŭbrakos kaj, kiel tiam, postulos de mi la filon, kiu —«

Si vortrompas. Kun abrupta movo Cezaro saltas, jam mortepala. La tremantaj manoj premiĝas al la brusto. La lipoj spasmas, dum, kun neperceptebla teruro, li ŝirlarĝe okulas ien en nekonataĵon.

»Ne — ne —« li elbalbutas sentone, stertore — »ne filon — nur ne filon —«

## Venkita Okcidento

Trebonio finis sian raporton. Nun li staras ĉi tie lacega, neeldorminta, dum liaj nervaj, tremaj fingroj ludas ĉe glavtenilo.

Cezaro lin malrapide okulmezuras supren-mal-supren. Li vidas: la homo estas plene elĉerpita, li nepre bezonas elriponon, satdormon. Kun bedaŭro li rigardas la profunde enkavajn okulojn, la malgrasiĝintajn vangojn kaj buŝon, kies lipoj senĉese konvulsietas. Sed li ne povas indulgi: la akiro de Massilio estas tro grava por riski ĝin pro elĉerpiĝo de unu homo: la urbo devas esti konkerita — devas ĉiuokaze — eĉ se la pompejanoj ŝtopus en ĝin sian tutan militistaron.

»Jam hodiaŭ vi revenos,« li diras malrapide, pri-penseme. »La marblokadon oni devas plifortigi ĝis plena nepenetreblo, la detruitajn sieĝ-fortikaĵojn plej baldaŭ rekonstrui. Post tiu ĉi rompo de l' interpaco oni ne plu traktu kun la massilianoj. Tuj kiam la urbo estos atakmatura, ek sur ĝin!«

Lia energio transiras en la vicgvidanton. Trebonio kelkfoje, kontinue kapjesas.

»Kaj en la okazo,« li endiras, »se ni sukcesos —«

»Kion vi pensas? Konkeri la urbon?«

Trebonio refoje kapjesas, dum liaj okuloj malice ekbrilas.

»Jes,« li diras rektiginte kaj ĉentgrince. »Tiam mi ĝisfine saldos la kalkulon,« ekgargaras lia profunda, kvazaŭ ebrula voĉo. »Nek estos indulgo, nek unu ŝtono restos sur la alia. Miaj homoj estas terure koleraj. Mi esperas, ke mi post unu monato povos al vi raportiti: jen, Massilio iam estis.«

»Eh, ne parolu sensencaĵojn!« konsternite saltas Cezaro. »Eĉ unu hareton vi ne rompos al la loĝantoj, kiam la rezisto estos venkita!«

Trebonio senkomprene okulegas.

»Sed, ĝuste pro tiu nekredebla perfido —«

»Eĉ unu hareton ne, mi diris al vi!« akcente ripetis Cezaro. »Ĉu mi estas buĉisto?« Li vortrompas, altrudante al si trankvilon. Nun li daŭrigas: »Ĉiuj vi, senescepte, ne komprenas min. Ĉu mi havas aspirojn por militgloro? Ĉu mi ne havas alian celon ol starigi sur la Roma Placo triumfarkon kun plej multaj nomoj de l' gajnitaj bataloj, konkeritaj, ruinigitaj urboj kaj jugitaj popoloj? Ĉu mi kaptis glavon nur pro la gloro de l' glavo?« Li kapneas. »Mi estas homo, kiu havas certan ideon kaj volas ĝin realigi, jen ĉio. Massilio kondukis kontraŭ ni abomeninde, jes sendube; ĝi rompis la kontraktitan interkonsenton kaj perfidis nin al niaj malamikoj. Sed Massilio estas granda, admirinda urbo, la okcidenta antaŭposteno de l' greka civilizo, la angulŝtono de l' kulturo, sen kiu la tuta konstruaĵo disfalus. Kiom min koncernas la sorto de ĝiaj unuopaj loĝantoj? Ili naskiĝis, ili mortos; ja, la fatalo de l' homoj. Sed la ideo de Massilio, la ideo de l' senmorte valora kultururbo, devas esti netuŝata! Ĝi devas resti vivanta, kiel ĉiu vere granda ideo, se la homaro volas

progresi. Li alrigardas la ĉagrenoplenan vizaĝon, kies buŝo tremetas, senĉese moviĝas, kaj tiam finas seke, kun apenaŭ rimarkebla malestimo: »Mi sciis, ke vi ne komprenos min. Sed ne gravas. Mi jam alikutimiĝis. Nun iru kaj faru, kiel mi diris al vi. Iru do, Trebonio.« Mola sento instigas lin iom mildigi la malglatajn vortojn kaj forviŝi la ofendeton. »Iru, iru, amiko mia,« li diras, »kaj konservu al mi vin — unu el miaj plej bonaj viroj.«

La generalo apenaŭ riverencas kaj senvorte foriras el la ĉambro. Cezaro lin postrigardas.

»Glavoj,« li elmurmuras, »ili ĉiuj estas nur glavoj, eĉ ne unu cerbo.« Mallaŭte li ĝemas kaj ektuŝas la tamtamon. Eniras Hircio.

»Ĉu ankoraŭ iu ekstere?« La vizaĝo de Hircio ridetas gajan, petolan junulgrimacon.

»Jes — Varro —«

Fluga rideto ĉe Cezaro.

»Jes, vere — Varro! Li anoncis ja sian viziton por hodiaŭ. Kiel li aspektas? Ĉu li ŝajnas al vi tre deprimita?«

»Ne,« respondas Hircio mire disokulante.

»Male, li aspektas eĉ kontenta — tiel sincere kontenta.«

»Kaj vi miras pri tio?«

»Kompreneble — la venkita militestro, venante proponi sian kapitulacon —«

Ĉe l' buŝo de Cezaro rikaneto.

»Hu, de kiam Varro estas militestro?«

»Imperato — ?«

»Ĉu ĉiu, kiu komandas trupon, estas militestro? Varro — kontraŭ sia kordeziro — ricevis ordonon gvidi kontraŭ mi militon kaj nun estas feliĉega, ke oni dep-

renis de liaj ŝultroj tiun ŝarĝon.« Subite lia buŝo fermiĝas amare kaj malmilde. »Tiu penso estus devinta veni al li pli frue,« li diras voĉprofunde. »Tiam Hispanio estus jam delonge post ni, kaj ni starus nun en Illirio kontraŭ Pompejo. Sed, tiel, Pompejo havis tempon por alkolekti trupojn kaj la batalo, kiun mi esperis ĉi tie fini, daŭras plue.« Senpacience li skuas seĝapogilon. »Eh, se mi havus ŝipojn! Jes, ŝipojn!, ŝipojn!« Lia rigardo dronas en nekonataĵon, poste revenas kaj renkontas la timigitajn okulojn de l' adjutanto. Li tuj ekridas bonvole kaj afable. »Nu — ankaŭ sen tio ni venos transen. Eĉ pli bone, ke estas tiel, ĉar alie Trebonio povus fari en Massilio malsaĝaĵon.« Li metas la manon sur la ŝultron de Hircio kaj delikate lin puŝas al la pordo. »Iru jam kaj venigu Varron.«

Hircio elrapidas, lasas eniri Varron kaj diskrete foriĝas.

La vizaĝo de Cezaro fandiĝas en ĝojon kaj plezuron. Li okulas la grasrondan, embarase sulkitan vizaĝon de Varro kaj atendas. Sed vidante, ke tiu estas senvorta, li mem komencas:

»Do, Varro, ĉu vi venas al mi kiel amiko aŭ malamiko?« Kaj ĉar Varro ankoraŭ ĉiam silentas, li venas tute al li, prenas lian velkpendan manon: »Varro!«

La alia palpebrumas. Liaj lipoj konvulsias, ili rideksplodas — sed ĝustatempe li rememoras, ke tio nun ne konvenus. Tute, tute mallaŭte li diras kaj, ŝajne, en tiu ĉi vorteto estas esprimita ĉio:

»Cezaro...«

Iliaj okuloj interkroĉiĝas. Varro spiras rapide, abrupte — kaj subite eksplodas en ridon. Unue ĝi estas



nerva kaj konvulsia, sed poste disfluas kaj fine ekru-  
liĝas larĝe kaj libere. Akompanas ĝin klara, kora rido  
de Cezaro.

La glacio de l' embaraso rompiĝis. Nun ĉio mar-  
ŝos glate.

»Kiel venis al vi ideo,« demandas Cezaro, post  
kiam ili ekkomfortis vid-al-vide, »ekmiliti kontraŭ  
min?«

»Ĉu al mi?« vigne rifuzas Varro. »Ne al mi ĝi  
venis! Se estus laŭ mia plaĉo, ankoraŭ hodiaŭ mi estus  
super miaj libroj ĉe la albaniaj montoj. Sed ĉu oni  
min demandis? Estis la senato, estis Pompejo, estis la  
ordono: Domicio prenos la okcidentan ŝiparon kaj iros  
al Massilio, Bibulo kun la orienta ŝiparo akompanos  
Pompejon al Illirio, Afranio kaj Petrejo prenos kvin  
legiojn kaj iros kun ili ĝis Pireneoj, Varro prenos du  
legiojn kaj iros kun ili ĝis Gado — kaj subite mi  
trovis min ĉi tie.«

»Kaj vi devis batali kontraŭ mi.«

»Jes. Kaj mi estis malfeliĉega. Vere, Pompejo  
estas en Hispanio ĉiopova, sed oni ankaŭ ne forgesis,  
kion vi por ili faris. Iuj obeis kaj estis disciplinaj, sed  
la aliaj nur rikanis kaj mi devis elbatali ĉiun buŝelon  
da greno.« Kolere li blovas. »Se mi almenaŭ estus  
vera komandanto! Sed mi estis pli tenejestro, inten-  
danto, kalkulgvidanto kaj simile — mi, la librovermo!  
— Tial vera milit-operacio eĉ ne okazis.« Li ĉesas kaj  
senhelpe rigardas Cezaron. »Sed ĉio ĉi tute ne gravus,  
se ne venadus alarmaj sciigoj. Ja, senĉese: Cezaro estas  
en Korfinio. Cezaro estas en Brundisio. Cezaro estas en  
Romo. Cezaro estas antaŭ Massilio. Cezaro staras ĉe  
Ilerdo kontraŭ Afranio kaj Petrejo. Ha, tio estis tagoj!  
Se vi ĉeestus iun el la militkonsiliĝoj! Unuj, la flam-

batalemaj, opiniis, ke estas honto ĉi tie oscedante malvigli kaj postulis, ke ni iru helpi la kamaradojn; la aliaj, kiuj ne tre simpatiis la aferon, diris, ke denove oni vidas, kia malfeliĉo estas tiu tuta militado kaj ke ni miksu nin en nenion. Tiel oni ŝanceliĝis tien-reen, foje oni pravigis tiujn, foje la aliajn — laŭ tio, ĉu bonŝancis Afranio aŭ vi.

Fine okazis kapitulaco de Ilerda — nu, tiam ankaŭ ĉi tie ĉio finiĝis. La plej radikalaj pompejanoj forkuris senhezite, lasante min en amaso da embaraso. Mi ne sciis, kion fari. Ĉiuokaze — mi pensis, ne malutilos aranĝi paradon. Do mi diris al mi: vi elokventos al la militistoj — eble tamen ĉio bone finiĝos. « Li ĉesas kaj alrigardas Cezaron, kies vizaĝo grimacas subprematan ridon. »Ja, tiu parado estis ĝuste la plej stulta ideo, kiun mi povis havi. Ĉu vi scias, kio ĉe ĝi okazis?»

»Mi scias,« kapjesas Cezaro.

»Gi povus esti notita en la mondhistorio kiel unikajo. Kaj tio devis okazi ĝuste al mi, la misŝanculo. Oni viciĝis kaj mi, suririnte la estradon, volis ĝuste ekparoli, kiam subite unu legio, la *vernakula*, turniĝis dekstren kaj senvorte ekmarŝis for. Kia honto! Kia honto! Mi, verŝajne, purpuriĝis kaj senvorte forlasis la estradon.« Liaj senhelpaj okuloj serĉas la vizaĝon de Cezaro. »Nu — per tio ĉio finiĝis. Mi faris tion, kio por mi estas plej prudenta, mi revenis hejmen, leteris al vi, ke mi ne plu intencas rezisti, kaj ke mi atendas viajn ordonojn. Kaj nun mi estas, jen, ĉi tie!«

Cezaro kapklinas — kvazaŭ bonvoleme ridetanta dio.

»Kaj tio estas plej bona, kredu al mi, Varro. — Miajn ordonojn? Ili estas tre simplaj: la vernakula legio antaŭ momento ĵuris fidelon al miaj batalsignoj;

el la aliaj legioj — kiu volos veni al mi, estos bonvena — la ceteraj devas transdoni la armilaron kaj reveni en Italion.«

»Kaj mi? Kio okazos pri mi? Mi estas ja via militkaptito.«

»Ĉu vi?« Cezaro denove ridetas. »Vi ricevos de mi —« lia voĉo parodias neŝanceblan severecon — »la plej rigoran ordonon: senprokraste reveni en vian somerdomon ĉe l' albaniaj montoj. Tie vi daŭrigu viajn studojn pri Herakleto kaj Menippo, kiuj certe interesas vin pli ol Pompejo kaj mi. Adiaŭ do, Varro.« Li levigas, ŝultrofrapetas la konsternitan kaj feliĉan homon, kiu ankaŭ levigis, kaj kompleze gestas al la pordo.

Varro preskaŭ estas ĉe la pordo, kiam voko de Cezaro lin haltigas. Demande li turniĝas.

»Kion vi pensas,« trankvile esploras Cezaro, »kiu fine venkos: Pompejo aŭ mi?«

»Nu, kompreneble vi,« konvinkite deklaras Varro.

»Sed, kiom ĝi rilatas min?«

»La instruo pri gramatiko en la romiaj lernejoj,« seriozegas Cezaro, »estas tre malbona. Nu, ĝuste vi ĝin reformos.«

### „Cezaro kaj lia feliĉo!“

»Ankoraŭ neniam sciigoj?« Lia rigardo trafas Hircion, kiu kapneas; poste ĝi glitas al Pollio, ripetanta la saman mutan geston. Nervoze li forpuŝas la piedbenketon kaj leviĝas.

»Mi ne komprenas Antonion,« li elbuŝigas. »Mi ordonis al li plej baldaŭ nin postveni. Mi ne povas ja kun miaj dekkvin mil homoj eterne stari antaŭ Dirrahio! Tre malmulte da ili por ion entrepreni kaj tro multe por nutri.« La lastaj vortoj gvidas lin al nova demando: »Kia situacio pri la provianto? Ĉu sufiĉe da greno?«

»Ne,« respondas Hircio. »Sed la homoj bakas sian panon el arbokrusto kaj ĵuras, ke ili eltenos, eĉ se ili devos manĝi herbon.«

»He, miaj bravaj knaboj!« Cezaro diras kortuŝite. »Se mi povus al ili helpi! Sed la marblokado estas tro akra. Mia dumviva malamiko Bibulo scias, ke li tenas min ĉi tie en kaptilo. Li jam ĝojas pri la momento, kiam la malsato rezultigos tion, kion neniam povus atingi liaj militistaj kapabloj.« La moka tono perdiĝas el la voĉo, ĝi pli kaj pli nervozas, tremetas. »Sed, certe, oni povus trovi ankoraŭ ie provizojn! Ĉu vi radikale elserĉis ĉion?«

Hircio senhelpe ŝultrolevas.

»Nenio plia. Buthroto kaj Oriko estis la lastaj lokoj, kie oni povis ankoraŭ ion trovi.«

»Mi do sidu ĉi tie senage kaj atendu ĝis plaĉos al tiu ĉiama hezitulo fingre ĉirkaŭringi mian gorĝon? — Ne, ne, mi ne povas tion elteni! Hircio!«

»Imperatoro?« La energia voĉo vekas en la junulo novajn esperojn.

»Ĉu en la haveno estas kurier-boatoj?«

»Jes. Ĉu vi ordonas elveturon? Sed prepariĝas uragano.«

»Indiferente! La plej rapida devas esti veturpreta. Sed tuj!«

Hircio konas tiun voĉon: ordono, kiun oni ne kontraŭstaru. Mallonge li abruptas:

»Kiam mi forveturu? Kaj kien?«

»Ĉu vi?« Cezaro lin mire alrigardas kaj kapklinas akcentante: »Nu ja, vi kuniros. Ankaŭ Pollio. Sed neniu pli, komprenite? Mi volas, ke neniu pri tio eksci.«

Sur la vizaĝoj de ambaŭ adjutantoj miro de konsterniĝo.

»Pri kio ja, ho imperatoro?«

»Ke mi transŝipos en Italion,« Cezaro respondas energie, kvazaŭ la afero estus komprenebla per si mem, ĉar temas nur pri promeneto.

»Do vi?«

»Nu, kiu alia? Fine mi devas akiri klaran scion, alie mi sufokiĝos.« Li ekrigardas la konfuzitajn vizaĝojn kaj daŭrigas: »La afero estas multe pli simpla ol ŝajnas: dum la uragano oni ne povos tiom rigore plenumi la blokadon kiel kutime; ni alivestos nin — kaj se ni havos feliĉon — morgaŭ frumatene ni estos en Brundisio.«

»Sed — sed la armeo ĉi tie?

»Post du-tri tagoj mi jam estos denove ĉi tie!  
Intertempe certe, okazos nenio.«

»Sed, ke vi mem riskos tiun aventuron —«

Mangesto tranĉas la vortojn.

»Ho vi,« ekkrias Cezaro kun malespere grimaci-  
ĝinta vizaĝo, »ĉu vi ne vidas, ke mi mortacŭs, se mi  
devus resti ĉi tie? — Do iru, iru kaj revenu kun sciigo,  
ke ĉio estas preta.«

— — — — —

Kurierŝipo, longa, plata boato kun lokoj por kvin  
personoj, balanciĝas sur sovaĝe dancaj ondoj de l' ri-  
vero. Kun duone mishumoraj, duone timigitaj vizaĝoj  
tenas ĝin ĉe l' bordo la mastro kaj ŝipisto. La veloj  
estas kunvolvitaĵ, nur antaŭe, ĉe l' masto, en fajfa  
vento flirtas malfirme fiksita tolpeceto.

Ekbrilas malklara lumeto de lanterno. Tri figuroj  
en krudaj lanmanteloj venas laŭ la montvoĵeto mal-  
supren kaj aliĝas al la atendantoj. Mutaj kapklinoj,  
ili eniras la ŝipeton. Iu el ili turniĝas al la ŝipmastro:

»Vi konas la ordonon?«

»Jes,« murmuras tiu ĉi. »Sed ne sukcesos.«

»Sed devos sukcesi,« sonoras akra voĉo de alia  
maskito.

La ŝipmastro ekatentas: la voĉo ŝajnas al li iel  
konata.

»Je via respondeco,« li denove elmurmuras. »Se  
ni ĉiuj dronos — estos ne mia kulpo.«

»Ne babilu, sed ek!« ekseveras la unua.

La mastro senvorte dekroĉas la barkon for de la  
bordo. Sovagaĵaj ondoj tuj ĝin puŝas kun forŝira rapi-  
deco laŭflue.

»Disstreĉu la velojn! ordonas la akra voĉo, netoleranta kontraŭstaron.

»En tia ventego?« murmure hezitas la ŝipisto.

»La velojn!«

Per tremantaj fingroj la ŝipistoj malligas la ŝnur-ojn de la ĉefvelo. La vento jam enpuŝiĝis kaj la boato kliniĝas flanken, ekflugante kiel sago.

»Ni renversiĝos,« liptreme diras la mastro. Nenia respondo. Teruraj, senmovaj, similaj al superaj dioj, sidas la tri maskitoj sur la ŝipbenketoj.

La ventego ĉiumomente plifortiĝas. Bolantaj ondoj ŝprucas trans la randon de l' ŝipeto farante el ĝia planko fajrere rebrilantan marĉeton. Turnovento alfuriozas la ŝipeton elflanke, renversas ĝin — entorentas ondego. La ŝipisto ekkrias:

»Ni dronas!«

Subite de sur la vizaĝo de unu el la triopo forflugas la mantelo. Du flamegaj okuloj boriĝas en la vizaĝon de l' timigita homo. Kaj terura, ne plu homa, voĉo ektondras:

»Timu nenion! Vi ja veturigas Cezaron kaj lian feliĉon!«

Sed ĉe la enmariĝo de l' rivero disblovis ciklono. Ventopuŝego boriĝas en la ŝipeton, en momenteto ŝiras la velojn en ĉifonojn kaj en fulmorapida kirliĝo disrabas la pecetojn. Pruo kaj poŭpo alterne enakviĝas. Senbridiĝintaj ondoj superverŝas la randon, plenigante la ŝipeton per akvo. La mastro — obeante al la superpotenca volo de l' imperatoro klopodas ĉiam denove — puŝi la boaton antaŭen, sed ĉiam denove ĝi estas ĵetata reen. Malgraŭ glaciiga vintro-tempeŝto, malgraŭ torenta

neĝhajlo, ili ĉiuj ŝvitbaniĝas en penoj superruzi la uraganon kaj elremi la boaton en liberan maron.

Sed ĉio vana. Post senĉesa laborado dum horo kaj duono estas elĉerpitaj ĉiuj fortoj kaj tamen la boato ne ŝoviĝis antaŭen eĉ je unu colo. La okuloj de la aliaj direktiĝas al Cezaro, kiu, tute kuntiriĝinte, kaŭras ĉe rembenketo kaj mordas siajn manartikojn.

Fine li ekmoviĝas. Kun senespera spito li levas la kapon alten kaj ekvoĉas: Reen! La ŝipmastro senhezite utiligas alruliĝantan ondon, rapide ĉirkaŭturnas la direktilon kaj lasas la ŝipon enflosi la riveron.

Remado kontraŭfluen estas neesprimeble peniga. Sed al la ŝipisto ĝi ŝajnas ludeto, la sovaĝantaj ondoj kvazaŭ nur fermentetus: lia multekosta vivo ne plu estas en danĝerego! Nur rigardo al la senmova figuro sur la meza rembenketo efikas iom malagrabla.

Jam tagiĝas, kiam ili ankras ĉe la loko, el kiu ili forŝipis post la noktomezo. La kilo grincas sur sablon. Mastro kaj maristoj saltas en malprofundan akvon kaj eltiras la ŝipeton tute sur bordon. Cezaro leviĝas kun mallertaj, abruptaj movoj de marioneto, ekpiedas trans la ŝiprandon kaj peze stariĝas sur la bordo: li surpaŝas ĝin ne kiel venkinto, sed kiel venkito.

---

La hundfidelaj, petegaj rigardoj de l' militista deputitaro preskaŭ fizike dolorigas Cezaron. Kun apenaŭ bridata senpacienco li aŭskultas la mallerte formulatajn petegojn, ke li ne plu risku tiajn aventurojn kaj ne endanĝerigu sian altvaloran vivon.

Kion li respondu al ili? Ke nevenkebla impulso lin pelis eksteren por spiti uraganon kaj ondegojn? Ke tiu aventuro estis la lasta ŝanco por alporti savon?



Ke uragano kaj ondoj estas malpli fortaj malamikoj ol Pompejo surtere kaj Bibulo surmare? Ke la fera kaptilo, en kiu ili kroĉiĝis, ne donas eĉ la plej malgrandan eblon por elturniĝi — ke li devos diri al ili (ne hodiaŭ, ne morgaŭ, sed iun jam proksiman tagon): ja, ĉio finiĝis, al ni restas nur liberiga morto!?

Ili tion ne komprenos — aŭ ne kredos! Ĉu estas ja io, kio estas pli forta ol ilia imperatoro? Io, kio dirus Ne, kiam li diras Jes? Ili ridus kapbalance kaj prirevus laŭrojn de gloro por siaj fruntoj, sur kiuj lia aŭgura rigardo jam antaŭvidas ruĝajn girlandetojn el vundoj.

Lia enfermita vizaĝo rigardas trans ilin, lia leviĝinta mano etendiĝas en mutan, forliberigan geston. Cezaro havis feliĉon, Cezaro transvivis sian feliĉon. Ĉiuj homoj estas mortemaj, Kajo estas homo, Kajo estas mortema. Tiu ĉi silogismo lin obsedas, sed li sentas nenian ĉagrenon.

Voĉoj antaŭ la barako. Indiferente kaj tamen iom strange ekscitiĝante li okulas al la enirejo...

»Cezaro! — Hej Cezaro!!«

Enfalegas Pollio. Ridetante. Plorante. Ŝanceliĝas kontraŭ iun el centurionoj. Puŝas lin flanken. Tremante tutkorpe li haltas antaŭ Cezaro. Li jam krias. Plenvoĉe — sed tamen apenaŭ kompreneble — !

»La blokado estas for — Bibulo jam mortinta — mortis pro senfortiĝo sur sia admiralsĥipo — kaj el Lisso marŝas al ni Antonio kun siaj trupoj.

## Farzalo

Deka, Sepa, Sesa; Dektria, Dekdua, Dekunua; Oka, Naŭa. Dudek du mil viroj, mil rajdistoj. Deka, Sepa, Sesa; Dektria, Dekdua, Dekunua; Oka, Naŭa. Dudek du mil viroj, mil rajdistoj.

Trankvile! — Trankvile!! —

La rivereto donas sufiĉan ŝirmon por la flankoj. Al ĝi sin apogos la Naŭa, kiu ankoraŭ ne refortiĝis post la frakaso antaŭ Dirrahio. Tuj-apude densaj vicoj de l' oka-anoj. Ili kunpremiĝas firme, kvazaŭ ferkompakta bulo, kiu devas samtempe defendi kaj ataksubteni. La ceteraj en normalaj distancoj: al ili li povas fidi. Tute dekstre jen liaj karaj deka-anoj, ili formos la neŝirmatan flankon.

La rivereto donas sufiĉan ŝirmon. Tial ne estis tro riske forpreni la tutan germanan kavalerion kaj forŝovi ĝin por flankgardo al la dekstra ekstremo: la dikaj, larĝaj kranioj estas sufiĉe malmolaj, ili eltenos eĉ fortosuperan atakon.

Spione glitas la rigardo transen, kie — en kolono post kolono — viciĝas la legioj de l' senata militistaro. Kontraŭ la Deka staras ĝuste tiuj du legioj, kiujn li siatempe cedis al Pompejo. Ne tre saĝe, ke la trupojn, iam servintajn sub Cezaro, oni metas kontraŭ la elit-legio de Cezaro.

Plue!

Aziaj, italaj legioj. Apude ambaŭ siriaj, postrestintaj el la armeo de Krasso. Eĉ eldistance oni povas vidi laŭ la ĉifitaj uniformoj kaj kaviĝintaj vizaĝoj la elsuferintajn turmentojn kaj lacojn. — Jen tie rekrutoj, tuj poste unu hispania legio kaj fine cilicia, fermante gardan posttrupon. Tiu ĉi ne tro malutilos al la Naŭa.

Sed kie Pompejo? Ĉe la maldekstra front-ekstreĉmo, ĝuste kontraŭ Cezaro. Ĉu pro tio, ke li ne fidis al la du ceditaj legioj — aŭ tiuloke li intencas entrepreni la ĉefatakon.

Transe ĉio en moviĝo. La tuta fronto estas jam aranĝita, sed tamen ankoraŭ ĉiam kolono post kolono venas, ŝovigas en la lastajn truojn, ŝtopas ilin: masojn en giganta muro, kiu baras la vojon de l' rivereto ĝis la montoj, la vojon al Farzalo.

Transe ĉio en moviĝo. Nun marŝas rajdistoj, tuj preter Pompejo, eskadrono post eskadrono: netrariĝardebla amaso. Kiom da ili povas esti? Kvin mil? Ses? Ili haltas en kompaktaĵ vicoj, viro ĉe viro, ĉevalo ĉe ĉevalo. Kiom da ili ĉe l' alia ekstremo? Eĉ ne unu! Eĉ ne unu!

Fulmo de ekkompreno: jen la granda ŝak-movo kiun Pompejo volas fari: tiuj amasoj devus sin puŝegi en la kavalerion de Cezaro, disbati ĝin, fali sur la Dekan elflanke-dedorse kaj de tie kapti kaj dismueli la fronton. Grandioza ideo, neriproĉeble planita, senerare realigata. La komandanto haltas antaŭ larĝa, larĝa vico de ĉevalkapoj, lia ferforte bridata makula ĉevalo flare levas la buŝegon, kvazaŭ ĝi volus tujegi antaŭen.

Sed ĉu li ne konas tiun makulan ĉevalon? Ĉu ĝi ne estas la sama, kiu iam portis Labienon tra ĉiuj

bataloj de Gallio? Ĉu li ja ne rekonas sub orita kasko la belan, glacian vizaĝon kun la kruela lupobuŝo? Labieno volas hodiaŭ akiri laŭron de gloro kontraŭ sia iama estro kaj majstro.

Ne!

Lia rigardo ekglitas laŭ la ordita vico de liaj legioj. Palpebrumeto. Sur ternospira ĉevalo jam algalopis Pollio. Lia ekscitita rigardo trankviliĝas sub la metalaj okuloj, falantaj sur lin.

»La trian batalvicon de ĉiuj legioj komandos mi mem. Ĝi ekatakos nur je aparta komando. — For!«

Pollio forpafiĝas, retenas la ĉevalon antaŭ la juna Sullo, komandanto de l' dekstra ekstremo, transdonas la ordonon, forgalopas al la centro, ripetas al Domicio, tiam al maldekstra ekstremo, al Marko Antonio, kiu trankvile kaj senzorge staras apud sia ĉevalo kaj babilas kun iu volontulo. La militistoj de la tria batalvico iom repaŝas, metas la lancojn kaj ŝildojn al la piedoj, kaj atendas, flegme malstreĉante la muskolojn.

Ĉu tio sufiĉos? Tute ne! Se Labieno sukcesos ĉirkaŭiri, la rezervo-trupoj venos tro malfrue. Oni devas krome trovi ion — ion, kio rebatos la atakon aŭ faros ĝin senefika.

Aŭ — faros ĝin — senefika —! Kojnon, kiu borĝos en la amason tiam, kiam ĝi tion malplej atendas. Kojnon, kiu fortunos ĝin el la direkto, kaj pelos tien, de kie ĝi venis, kiu —

»Hircio!«

»Imperatoro!« Jam antaŭ li la krete blanka vizaĝo de l' adjutanto.

»El ĉiuj ses legioj po unu kohorton. La unuan. Ili viciĝu post la kavalerio kaj atendu miajn pluajn ordonojn. For!«

La plano jam preta. Nun venu, Pompejo! Alkuru do, Labieno renegato!

Ŝajne la almarŝo tie transe finiĝis. Longe, longe sonoras romaj signaloj — Romo kontraŭ Romo!

Spronpiko en femuron. Kapbalance ekmoviĝas la blanka ĉevalo, paŝetante laŭ la fronto. Inter la Sesa kaj Dektria haltigas ĝin mano de l' rajdanto.

»Kamaradoj! Jen la tago de l' decido. Nenecese, ke mi inspiru al vi kuraĝon kaj heroecon aŭ certigu mian dumvivan dankemon: la malamiko staras antaŭ vi, do sufiĉas! Ni ne kulpas pri tiu ĉi batalo, ni ĉion provis por ŝpari fratsangon kaj konservi la pacon. Ili devigis nin al tiu ĉi milito, ili altrudis en nian manon la glavon. Do, ili spertu, ke ni scias ĝin uzi!« Lia rigardo ektraflugas sur la febraj vizaĝoj, kelkaj frazoj volas elpuŝiĝi, sed li ilin subpremas — kaj super la tuta fronto jam diseĥas tondro de unu sola vorteto:

»Ek!«

»Hura!« Kun oficiroj ĉefrunte ekkuras la unua kaj dua vicoj — lancoj jam ĵetpretaj — laŭ la deklivo malsupren, renkonte al la pompejanoj.

Ili ne moviĝas? — Ne moviĝas! Ruze pripensite! La militistoj de Cezaro alkuros elĉerpitaj, senspiraj, havante de la unua momento malavantaĝon kontraŭ tiuj ripozantaj, atendantaj. Tio devas ne okazi! Paŝon!

Tiu komando estas superflua: la bravaj junuloj tion mem ekkomprenis kaj ĉe duono de distanco spontanee ekmarŝas en perfekta linio laŭtaktan paŝon. Hej, tiuj pulmoj havos spiron, tiuj brakoj kaj kruroj havos forton. La espero de l' pompejanoj ne plenumiĝis.

Jam nur mallonga distanco. Denove spontanea ekkuro. Lancsalvoj interkruciĝas, homo puŝiĝas sur homon.

La blanka ĉevalo kun sia rajdanto ekfuriozegas post la atakantojn — mezen en la plej densan homvolvaĵon.

Tintego de ŝildoj, fajrerado de glavoj — nenio nova. Ekde la tago ĉe Mitileno tiu vivanta ŝtalo tiom ofte leviĝis kaj denove malŝvelis, ke ĝi povas surprizi per nenio. Nu, ni vidu, ĉu la iama skermolerteco ankoraŭ valoras!

Ekmoviĝo en la kavalerio de Pompejo ĉe l'dekstra ekstremo. Jen la momento. La blanka ĉevalo salte returniĝas al la propra kavalerio.

»Ne kontraŭi! Lasu ilin algalopi, tiam disŝoviĝu! Ili mem enkuros en la kaptilon!« Jam li estas for, jam li haltas antaŭ ses kohortoj, febra, kun elruliĝintaj okuloj, sed rigida, sur la rigida ĉevalo.

Tondro-tondrego. Ektremis la tero. Ne trarigardeblaj eskadronoj de Labieno. Longaj lancoj puŝitaj antaŭen. Sub bronzaĵ kaskoj sangsoifaj okuloj. Falo sur la germanan trupeton. Kelkaj interfrapoj ie-tie. La kavalerieto de Cezaro jam disŝoviĝas, kuras for.

La rajdistaj amasoj de Labieno tute ne zorgas pri tio. Kelkaj pluaj galopoj kaj ili jam fleksiĝas flanken. La interĉevalaj spacetoj mallongiĝas. Ekscitite kuregas unu eskadrono al alia, strekante — laŭ sia distanco — pli-malpli larĝan rondon.

»Antaŭen! Sur ilin!« La glavo montre ekmovas la ses kohortojn kontraŭ la ŝtopitan, ĉi-momente senhelpitan amason.

Ordonu nenecesa! La kohortoj jam ekkomprenis: orelfenda krio, kurego. Cezaro post ili. Iu centuriono saltas antaŭ lin.

»Imperato!«

Rigardo elsele. Goja rekono.

»Krastino! Ĉu vi?!«

»Hodiaŭ vi dankos min — vivantan aŭ mortintan!« Li jam malaperis. Ŝtalaj pintoj boriĝas en la rajdistajn amasojn, fendas kaj hakas ilin, vastigante ĉirkaŭ si panikon kaj teruron. Nur momenton ankoraŭ ondas malvigle homvolvaĵo sur la sama loko. Subite la rajdistoj komencas disgluiĝi: unuopaj — multaj — Ĉiuj!!

Panike ili kuregas, dispaŝiĝas ĉiufanken, en la vicojn de l' cezarianoj, kie ilin buĉas la plej proksima glavo, en la proprajn vicojn, efikante konfuzon kaj teruron, en la valon, al la montoj.

La maldekstra ekstremo de Pompejo kuŝas senŝirme. La ses kohortoj, helpate de l' germana kavalerio, kiu jam revenis kaj nun hurlas entuziasme kaj bataĵpasie, komencas ĉirkaŭfermadon: Cezaro realigas la planon de Pompejo!

Pompejo! Kie li? Ĵus li estis videbla ĉe sia maldekstra ekstremo. En la ruĝa, pompa mantelo de militestro li turnadis la plumkaskon dekstren-maldekstren, nun al la batalfuriozaj frontoj, nun al la atakanta rajdistaro.

Ĉu eble ja? Al la tendaro de l' pompejanoj galopegas unu sola rajdanto. La kapo estas sen kasko, la ruĝa mantelo flugpendas ankoraŭ nur de unu ŝultro; jam forŝirite ĝi ekflirtas en la mano, kiu ĝin ĉife manipulas en volvaĵon: la malamika militestro juĝas la batalon perdita, li forlasas la kampon!

Nun la lasta manovro! Malproksimen videbla gesto kaj la militistoj de l' tria batalvico estas saltopretaj. Dua gesto, ili jam kuras antaŭen, nereteneble antaŭen. Atinginte la proprajn vicojn, ili trapuŝas sin kaj ekfuriozas sur la malamikan fronton, martelante frapon post

frapo, frapon post frapo. Jen ili jam rompis ĝin tie, ankaŭ tie, ili frakosas, dispecetigas — nur momenta hezito kaj la malamikaj amasoj turniĝas, ekruliĝas al la tendaro, nedivideble intermiksitaj kun la furioze buĉantaj cezaranoj.

Longa, longa rigardo. Ringegoj, premantaj la bruston diskrakas, falas, la frapeganta koro trankviliĝas. Nun Cezaro rektiĝas alten kaj puŝas la glavon en ingon.

Venko!



## „Pompejo, Frato mia!“

Unue aperas du rajdistoj: galloj. Ili galopegas. Krucagas la ŝoseon. Forflankiĝas sur kampvojojn. Venas returne. Surgrimpas altaĵon. Okulspionas ĉiufranken. Rapidas malsupren sur siaj graciaj, elastaj ĉevaloj. Jam plue!

Duonmejlon post ili venas pli granda trupo: germanoj. La trotado de iliaj pezaj, fortikaj ĉevaloj estas iom malpli rapida ol la facila fluga paŝo de l' delikataj gallaj bestoj. Sed ĉar la rajdistoj kroĉiĝas al la ŝoseo, okulante nur dekstren-maldekstren, ili progresas antaŭen same rapide, kiel la facilmovaj esploristoj.

Tuj post iliaj kalkanoj, nur tiom fore, ke la levita polvonubo povas forbloviĝi, rajdas la ĉeftrupo. Tute ĉe-pinte, en sia ruĝa mantelo — sole laŭ ĝi povus lin rekoni la tuta mondo — jen la imperatoro mem. Malstreĉinte la bridojn por liberigi la kapon de la ĉevaloj li — laŭkutime — sin klinas antaŭen kaj elpuŝas la muskolstreĉan vizagon, kvazaŭ tiuj du-tri koloroj kiujn li tiel forrabas de l' vojo, havus apartan gravecon por la atingo de la celo.

Cezaro rajdas por atingi la forkurintan Pompejon.

En selo, kiun li de tiam ne forlasis, li akceptis la

kapitulacon de la senat-armeo, disbatita, ĉirkaŭfermita, fortranĉita de vojo kaj akvo. La tujsekvajn ordonojn li donis en plurajdo: la tuta kavalerio iros kun li, la sesa legio plej rapide postsekvos. La pompejanojn oni dividu en legiojn. Tri el ili formarŝu sub Domicio en Malgrandan Azion, kie reĝetoj klopodas elprofiti la malpacojn inter la potencaj gigantoj. El la unu legio kaj duono antaŭ Ateno, unu tuj marŝu al Rodo. La illiriajn garnizonojn oni plifortigu per dekkvin kohortoj el Italio, Gabinio transprenu la estrecon. La ĉefparto de l' farzalaj trupoj iru en Kampanion por refreŝiĝo. — Kaj oni ne forgesu: sur la batalkampo oni devas starigi monumenton al Krastino, same la tombon kaj venk-emblemojn! Li tion elmeritis pli ol iu alia!

Antonio, rajdante apud Cezaro, pacience aŭskultis tiun ordonhajlon. Nun li forturnas la ĉevalon kaj haltas. Por momento Cezaro vidas la salute levitan manon, sed la polvonubo, ĉion nebulanta, jam forglutis la junan kavaleriestron. Lasante ĉion post si, la venkinto ĉe Farzalo galopas sur la vojo, kiun unu tagon pli frue trasagis la forkuranta Pompejo — al la bordo, al la maro direkte.

Neniu el la adjutantoj kaj kurieroj kuraĝas proksimiĝi por rompi la silenton, en kiun li dronis. Kiam li ekokulas ĉirkaŭ sin, li vidas ĉiujn rigardojn fikse alturnitaj. Sajne ili volus diveni la pensojn, kiuj maturiĝas post lia frunto, por senprokraste ilin realigi.

Sed Cezaro ne emas al nova milito. Li forgesis dum momento la kontraŭulojn de Katona kaj Labiena speco. Nun en tiu ĉi sekundo, kvazaŭ la milito estus finita; kvazaŭ la gesto, per kiu li puŝis ĉe Farzalo la glavon en ingon, estus la lasta kaj definitiva. Li nun ĉesas ne militon, sed pacon, interakordiĝon kun Pom-

pejo -- kaj tutanime li klopodos ĝin atingi. Lin tute plenigas la sopiro por ĉirkaŭbraki la malnovan kamaradon, por preni kison de l' amikeco sur liajn vangojn.

Ĉu ne estas malsaĝe, ke ili du interbatalas? Kio ja staras inter ili du? Li estas preta ebligi al la iama amiko ĉion, kion li deziras. Ho, kiel volonte Cezaro lin metus apud sian ŝultron, frate dividante kun li rangon kaj postenojn! Ĝuu la maljuna leono elmerititajn honorojn! Cezaro zorgos, ke sub brilo de ilia pozicio estu necesa potenco kaj kreoforto — tiu plej bela ornamo. Se ili kuniĝos, al ili apartenos la mondo! Do, kial disputi pri l' komuna havaĵo?

Sed oni devas plandpremi tiun kanajlaron, kiu kun egoistaj motivoj ŝoviĝis inter ilin du; ĝin oni devas forpeli al la pozicio kiun ĝi meritas. Kiam temas pri ordigo de l' mondo, tiu partiaĉo el sinblovaj melonkapuloj kaj krimuloj ne rajtas diri eĉ vorteton. Jam tro longe regis la mondon por ĝia kaj propra pereco la senato, povanta fieri pri neniam meritoj, escepte pri siaj delonge mortintaj praavoj. Ekde nun povas kaj rajtas regi nur unu — la dikto de l' kreanta spirito.

El la antaŭo revenas sola rajdanto: unu el la du galloj. Li informas, ke oni proksimiĝas al iu urbo: Larisso.

Cezaro dronigas ĉiujn dezirojn kaj esperojn en sian plejprofundon, li jam estas plene nuntempa. Koncize li ordonas ripozon ĝis alveno de l' postiranta legio. Dume oni esploru pri plua vojo de Pompejo. Tiam li ekrajdas kvietan paŝon plue al la urbo kiun li atingas vespere.

Tie li ekscias, ke Pompejo unu tagon pli frue

forrapidis tra la *tempetala* valo al la marbordo. Kaj de tie ĉimatene li forvelis al Amfipolo.

Post noktomezo alvenas la legio. Laŭkutime Cezaro tuj daŭrigas la vojon al Amfipolo, distancanta proksimume cent sepdek mejlojn.

Sukceso, ke li mallongigis interspacon post la forkuranta Pompejo, nur plifortigis la sopiron pri li. Kelkafoje la sopiro estas tiel potenca, ke li imagas vidi la malhelan, seriozan vizaĝon de l' amiko, la iom melankoliajn trajtojn, la grandajn, brunajn okulojn, kiuj lin rigardas — kiel ĉiam — fikse kaj penetre. Li rememoras sennombrajn momentojn, kiujn ili pasigis kune, la planojn reciproke konceptatajn, kiam ili du kaj la grasa, bovnuka Krasso estris la mondon. Tiam la insidema kaj senpova senato devis obei iliajn ordonojn. Nun ĉio aliĝis. Krasso restis ĉe Sinnako, Pompejo kiel forkurinto vagas sen patrujo kaj li mem, Cezaro, iam romia konsulo, nun ribele levis armilojn kontraŭ Romon.

Tamen li ne sentas sin korpremita. Lin plenigas arda sinfido, ke finfine ĉio bone sukcesos. Se li nur atingos Pompejon kaj povos al li senŝargigi la koron! Ĉu iam du homoj povus esti pli intimaj? Ĉu la unua varma rigardo, la unua kora vorto ne povus rompi la muron, kiun fremdaj manoj ŝovis inter ilin du? Pompejo devas kompreni, ke lia loko estas ne apud la senato, klopodanta lin uzi kaj ekspluati kiel sian instrumenton. Ne, la loko de Pompejo estas apud li, apud Cezaro, kiu etendas al li la manon de amikeco kaj estas preta interdividi kun li la estrecon super Romo kaj la mondo.

Kaj ĉu Pompejo ne estis al li pli ol amiko? Ĉu Cezaro iam ne donis al li tion, kio estis al li plej kara,

sian solfilinon? Tia interligo neniam estas disŝirebla: ĉiam io postrestas, ia nedifinebla, dolĉa bloveto, kiu — ŝvebante super la rememoroj — renaskas partojn el ilia forpasinta vivo. Tio verŝajne estos sufiĉe forta por altiri la koron de Pompejo al tiu de Cezaro, por rekrei en iliaj animoj la solidarecon, kiu iam ilin inspiradis. Devas reveni la tempo, kiam Cezaro denove nomosian kamaradon per la nomo signifanta al ili ambaŭ samtempe promeson kaj plenumon:

»Pompejo, frato mia!«

Jen la pensoj animantaj Cezaron dum lia tritaga rajdado al Amfipolo. Ĉe la tagmezo de la tria tago li atingas tien.

Sed jam tro malfrue. Guste antaŭ unu horo Pompejo forlasis la havenon sur la sole disponebla ŝipo.

## Al Egiptujo

Veteras ardsufoke . . . Tamen malpeza venteto blovas grandajn velojn kaj ŝajnas jen, kiel aro da sov-aĝaj anseroj, sagas la maron girlandeto da ŝipoj. Tag-meza varmego pendas super la senlima surfaco. . . La pafisto kun arĝenta pafarko atingis en sia ĉaro la zeniton kaj nun pluvigas sur la teron gigantajn garbojn da ardaĵoj.

Sur la ferdeko de l' admirala ŝipo, sub distreĉita sunŝirmilo, kuŝas Cezaro. La kapon kaj ŝultron li apogas sur la sublevitan kusenon; el apuda ujo li prenas rulon post rulo, esploras ĝin kaj klopodas memorigi al si ĉiujn detalojn. Tio estas geografiaj kartoĵoj de Aleksandrio, de la marbordo, de la mareota lago, de Malgranda Azio. En ĉiu haveno, kie ili ankras, unua demando koncernas ilin. Centojn da ili li jam aĉetis en Mitileno, en Efezo, en Rodo. Nun li kovas super ili, sorbas ilin en sin kaj parkeras detalojn.

La vortoj pri l' propra feliĉo, eldiritaj antaŭ Dir-rahio al la hezitanta ŝipisto, refoje veriĝis. Nur la dioj mem sendis al li ŝiparon, kiam li provis per fiŝistaj barkoj ekspedi siajn trupojn trans Hellesponton. Eĉ nun, rememorante, li devas priridi la konsternitan mienon de l' Pompeja admiralo. Se tiu povus nur konjekti, kiel fakte statis lia militistaro: manpleno da rajdistoj sur la

konsumitaj ĉevalaĉoj, elĉerpite pendis en seloj kaj nekapablis levi eĉ la brakon; senfortiĝinta, malorde alstertoranta legio; servistaro kaj sargĉbestoj antaŭ terenfalo. Kvankam ankoraŭ nova korpuse'o — ĝi estis rekrutigita nur post la galla liberec-milito — ĝi jam spertis en Gallio, Hispanio kaj Illirio la cezaraĵn ekspresajn marŝojn. Sed tiu ĉi tamen superis ĝiajn fort-ojn: senorde, trenante post si pakajojn kaj armilaron ĝi ŝanceliĝis antaŭen. La okuloj ne plu povis rigardi, la blovabruptaj pulmoj ne plu spiri, disvunditaj, plumbopezaj piedoj ne plu porti: ja, ne homoj, sed eluzitaj, antaŭenpuŝiĝemaj maŝinoj.

Sed pri ĉio ĉi la pompejano ne havis eĉ supozet-on: ĉe la hellesponta markolo li vidis nur dekstre-maldekstre okupitan bordon, fajreradon de armiloj kaj aŭdis abruptajn, raŭkajn komandojn de oficiroj (ili apenaŭ kapablis voĉeti!) Dume antaŭ li staris tiu, kiun li malplej atendis ĉi tie, la Terura, la Nevenkebla, kies nura nomo paligas eĉ la elprovitajn legiojn. Do la pompejano ordonis kunvolvi la velojn kaj transdonis la ŝiparon — dek bonegajn, vastajn militŝipojn. Nur horon poste inundis ilin ĝojkriaj amasoj da cezaraĵ militistoj, animitaj al nova vivo.

Cezaro lasas la karton fali el la mano kaj prenas el la ujo novan. Refoje Aleksandrio, detalplano de ŝirmo-digo kun doko kaj *Heptastadio*, gvidanta ĝis la lumturo de insulo Faro. La okuloj esplore direktiĝas sur la bordolinion, ili mezuras, kalkulas. La mola humoro de l' rajdo al Amfipolo perdiĝis: Pompejo, lin antaŭinte, trovos en Aleksandrio romian garnizonon. Do, denove okazos batalo. Sed ĝi estu la lasta!

La imperatoro levas la rigardon kaj okulas en malproksimon. Antaŭ liaj spiritaj okuloj jam prez-

entigas ŝancoj eblaj al Pompejo. Li pripensas defensivon, sed tuj ĝin forĵetas. Aperas ideoj pri atakaj manovroj. Li elŝipiĝos ĉe Lohio kaj ofensivos al la lumturo. En tiu ĉi interpretilo Pompejo ĝisfine elsangos.

La malplenan rigardon de Cezaro subite inundas horizonto. Al li ŝajnas, ke io rompas la nebulitajn konturojn de l' perspektivo. Ĉiumomente pli klare. Li rigardas la ion kaj miras, ke la postenisto ĉe l' antaŭkilo ne avertas. Li volas voki, sed eĉ mem ne komprenas, kio lin malhelpas. Tial senmove li rigardas la nekonatan ion, kio ŝajnas moviĝi rekte al la ŝipo.

Li ne divenas, kio ĝi estas: por esti ŝipo, aŭ nur boato, ĝi estas tro mallarĝa. Ĝi aspektas paliso, alflotanta el senfina malproksimo — paliso proksimume hom-longa, elstarante rekte el la ondoj, kvazaŭ sur apenaŭ ekstrema akvosupro naĝus homo . . .

Jes, estas homo. Klare li distingas nun la korpon: jen kapo, jen larĝaj ŝultroj kun velkpendaj brakoj, jen piedoj klare videblaj laŭ la faldoj de algluiĝa vesto. Cezaro sentas, ke nevenkebla teruro boras tra lia spino. La tempioj, malgraŭ la ĉirulpika varmego, estas glaciaj. Kaj ankoraŭ ĉiam nenia signalo de l' postenisto ĉe la antaŭkilo.

Nun ĝi estas tiom proksime, ke li povas rekoni la detalojn de vesto; tuniko kaj sur ĝi flirtas pompa togo kun skarлата borderaĵo: jes, kostumo de senatano. Sed la skarlato borderas ne nur la randon, ĝi vastiĝis tra la tuta togo, pentrante ĝin malhele ruĝa. Nur ie-tie ekbrilas blankaj punktetoj. Ŝajnas, ke la tutan kostumon surverŝis sango, fluante el profunda vundo kaj . . . vere, ĝi estas sango!

Kvankam la terura korpo ne moviĝas, ĝi al-



proksimiĝas fulmorapide. Nun ĝi distancas nur duonmejlon, jam kvarcent paŝojn, ducent, cent kvindek, tridek.

Cezaro refalas sur la kusenon, nekapablante eĉ ekvoĉeti. Li jam rekonis la rigidan, mortpalan viz-aĝon, el kiu estingiĝe vitras okuloj en nekonataĵon: Pompejo mem!

Kun terura peno li elŝiras sin kaj saltas. Li palp-as ĉirkaŭ sin — la mano renkontas grifelon — li pikas ĝin en la brakon. Profunde boriĝas la ŝtalo, ekŝprucas sango, sovaĝa doloro: jes, li maldormas!

Sed la fantomo ne perdiĝas. Jen ĝi, apenaŭ kvin paŝojn for de li, ĝisdetale distingebla. La vundon oni ne povas vidi, sed la kolo sangruĝas: certe la vundo estas en la postkranio — aŭ en la nuko. La buŝo estas konvulsie disgrimacita, sed firme kunpremita, la vang-oj enfalis, en la estingiĝintaj okuloj — senlima miro kaj tuj ekflamonta furiozo.

Jen ĝi tuj-apude.

Jen ĝi glitas preter —

Jen ĝi jam for —

Cezaro trovas nek forton, nek kuraĝon por la decido: returniĝi. En la kapo senĉese martelas sur la kranion kaj senkompate frakasas eĉ la plej etan penson. Li luktas kontraŭ interna teruro, sed ne povas ĝin venki: li ne pensas, ne distingas, ne vidas. Li konscias nur: okazis io terura.

Fine post kelkaj minutoj li denove sin ekregas. Kubut-apoge sin levinte li alrigardis post sin, en la direkton, forprenintan la fantomon.

Sed li vidas nur la senliman marsupron: la fan-tomo jam malaperis.

## Kleopatra

Kvazaŭ statuoj, tra koridoroj staras rigidaj korp-oj de blanke vestitaj pastroj. Ter-brunaj, kvietaj vizaĝoj mallerte kaŝas zorgemon. Kun profunda timo iliaj rigardoj esploras la preteriranton, kiu kun larĝe malfermitaj okuloj kaj elŝvela, vertikala sulko sur la frunto, firme paŝas sur la multkolora ŝtonplanko. La rigardo boriĝis rekte antaŭen.

Lia sekvantaro ir-manieras same kiel li: korprekte, ignorante la hieratikan pompon, ĝi piedklakas la romiajn paŝojn, kiuj jam tramezuris la duonon de l' mondo. Ja, kie ajn romia paŝo tuŝas grundon, ĝi jam estras ĝin!

En la sekvantaro de l' imperatoro oni vidas la kurbiĝantan staturon de Teodoto kaj la grasan, brutan eŭnuk-vizaĝon de Potino. Iliaj mienoj spegulas profundan eksciton kaj iomete ankaŭ kortimon: ili ĉeestis, kiam oni alportis tiu ĉi elŝipiĝinto la kapon de Pompejo. Ili vidis la erupcion de lia doloro kaj aŭdis lian venĝojuron. Kaj kvankam antaŭ momento ili unuafoje lin vidis vizaĝ-al-vizaĝe — tamen ili scias sufiĉe pri li. Jes, li kutimas ankaŭ plenumi siajn ĵurojn.

La grupeto jam trapasis tri kortojn, tri halojn. La amasoj da sklavo kaj lakeoj, svarmintaj tra l' eksteraj ojoj, malaperis. Nur ie-tie oni vidas gardpostenistojn.

Intence ignorante la sintrudulojn, ili staras fiere ĉe pordoj, antaŭ kurtenoj: nobela gvardio. Ekregis silente, la paŝoj de l' romianoj klakas duoble sonore kaj la eĥo vibre reflektiĝas de l' pentritaj muroj.

Antaŭ iu kurteno subita lanco ekbarieras la piedon de l' romiano. La paŝanto haltas, mire ekrigardas la arbo-longan gardiston kaj, kun intenca malkompreno en la okuloj, returnas la kapon al ambaŭ egiptaj akompanantoj. Teodoto jam elpaŝas antaŭen, interŝanĝas kelkajn vortojn kun la postenisto.

»La apartamento de l' reĝino!« li informas la romian militestron.

»Nu, ĝuste al ŝi mi intencas,« tre energie eksonas la respondo.

Hezito. Timemo:

»Unue oni devus — demandi — vin anonci —«

»Do ek!«

»Ĉu vi atendas?«

»Ne tro longe!«

Refoje hezito. Potino kaj Teodoto interflustras. Tiam la maljunulo englitas tra la kurteno, kiu tuj post li fermiĝas.

Unu el la romia sekvantaro proksimiĝas al sia komandanto.

»Cezaro,« sufokate li diras »ĉi tie estas iom danĝere. Ni estus devintaj kunpreni eskorton.«

»Senzorge, Hircio,« respondas Cezaro. »Neniam ni estis pli sekuraj. Ĉu vi ja ne scias, ke en la tuta mondo ne ekzistas homo, kiu riskus rompi eĉ nur harenon de romiano?«

»Pompejo pensis la samon,« murmuris Hircio, »kaj tamen —« La brilaj okuloj jam mallumiĝas.

»Eh, Pompejo faris eraron: peti pri helpo. Romiano devas neniam ion peti.«

Hircio ŝultroleve retiriĝas. La grupeto atendas senvoĉe, senmove. Unu post alia la sekundoj fortintas en eternecon. Fine la kurteno disŝoviĝas kaj aperas Teodoto.

»La reĝino estas preta akcepti la romian militestron,« elsiblas lia akuta maljunula voĉo. »Sed lin solan,« rapide li aldonas, kiam la tuta grupeto ekmoviĝas.

Cezaro jam etendas la manon al la kurteno, kiam Hircio metas sian tremantan dekstran sur lian brakon.

»Cezaro...« diras la junulo time, petege.

»Senzorge, Hircio,« ripetas Cezaro. Milde li formetas la tremantajn fingrojn kaj eniras tra l' kurteno.

Vasta salono, pli malluma ol la ĵus trairitaj. Nevidebla lumfonto dronas en malhela krepusko, el kiu distingiĝas nur la plej intensaj koloroj de l' murbildoj. La planko estas mozaiko, prezentanta lagon kun lotusfloroj kaj fiŝoj. Sed nenie homo.

Rapidpaŝe Cezaro transversas la ejon, proksimiĝas al la kurteno. Jam antaŭ ĝi. Kvazaŭ sorĉe, ĝi per si mem disŝoviĝas. Ĉu post li denove ĝi kunfermiĝis? Sed li ne returniĝas.

Jen alia salono. Eĉ pli krepuska ol la unua. Ie-tie sur la muroj brilas skarлата ruĝo, blindige fajras flavo. La planko ŝtongriza, florŝutita.

Ree kurteno. Ankaŭ ĝi malfermiĝas per si mem. Cezaro eniras, haltas.

La ejo, kiun li eniris, estas — proporcie al la aliaj — malgranda salono, nur iom pli granda ĉambreto. Plenigita de narkotaj bonodoroj, ĝi dronas en

malhele ruĝa lumo. Multekostaj tapiŝoj tegas la murojn, sur la planko sterniĝas dikaj matoj.

Guste kontraŭ la enirejo staras sub baldakeno tronsimila seĝo. Sur ĝi en rigida pozo nekonata distatuo. Surkape alta reĝtiaro kun duobla *ureus* serpento. En la maldekstra mano longa scepro; en la dekstra, mistera simbolo de l' vivo: juna, bela virino.

La artisto skulptis la figuron tiel natura, ke oni povus ĝin opinii vivanta. En senriproĉa rondeco la delikataj membroj kunharmonias, la subtilaj trajtoj de la nobla, bela vizaĝo estas perfekte elĉizitaj. Nur la absoluta senmoveco, la fiksa rigardo de la iom oblikvaj, duonfermitaj okuloj perfidas, ke tio tamen estas nur statuo.

Subite la figuro malfermas la okulojn plene, la kapo kun nerimarkebla moveto turniĝas al la sintrudulo. La rigardo de la malhelaj pupiloj, ĉirkaŭ kiuj fleksiĝas helverda iriso kiel delikata ringeto, falas plenforte sur lin.

Nun estas Cezaro, kiu rigide, senmove staras. Io, antaŭe neniam sentita, kunpremas lian gorĝon kaj senlime dolĉa inkubeto ekpezas sur lia brusto. Li sentas, ke lin ligas nevideblaj katenoj, malhelpante eĉ la plej etan movon. Preterflugas penso, ke li sin defendu, forskuu la rigidon. Sed mirige: li ne havas volon eĉ por provi, entute li deziras nur: ĉi tie stari kaj droni en la efiko de tiuj okuloj, tiuj neeldireble belaj, superhomaj okuloj, boriĝantaj ĝis la plejprofundo kaj samtempe donantaj trankvilon.

Kiel longe li tiel staras? Minutojn? Horojn? Eternecon? Li nek scias, nek volas scii, li sentas nur: la perfekteco mem.

Ŝi estas, kiu fine rompas la silenton. Per ĉarma

gesto ŝi invitas lin proksimiĝi kaj per klara voĉo, plaŭdanta kiel eta akvofalo, ŝi diras:

»Ĉu vi parolas greke?«

»Jes, ho estrino,« respondas Cezaro rapide, pene, klinante la kapon, ja, la fieran kapon de romiano.

Sorĉa rideto disfendas ŝian admirinde elĉizitan, ruĝan buŝon.

»Ni havas ĉi tie romianojn,« ŝi grekas plue. »Ankoraŭ el la tempo de Gabinio. Sed mi ne havis okazon ellerni tiun lingvon. Nu vere —« en ŝia rideto ekbrilas milda ironio — »se mi estus sciinta, kiel glora homo venos el mi gastoj —«

»Vi ironietas pri mi, ho estrino,« rapide endiras Cezaro. La rigido foriĝis, malpeza, libera sento pleniĝas lian bruston ŝajne, nun li povus ekflugi. Facile, senpene li spiras. Li havas la senton, kvazaŭ en lia koro brulus pinta, eta flameto...

Ŝi gracie gestas rifuzon dum la okuloj glitas sur lin en fluga esploro.

»Vi estas ĉe ni pli konata ol vi supozas,« ŝi diras kaj rapide, gaje aldonas: »Per via nomo ni kutimas timigi malgrandajn infanojn. Kiam nenio helpas, oni minacas: »Jen, Cezaro! Tiam kvietiĝas eĉ la plej teruraj kriaĉuletoj.«

Jam denove li ridetas.

»Do, nova profesio krom multaj aliaj, kiujn mi plenumis.«

Sed ŝi jam reserioziĝis. Ekkubutante sur la genuoj, ŝi metas mandorson al sub la mentono, montranta firmon, decidemon, kaj rigardas lin per siaj enigmaj okuloj rekte en la vizagon. Iom al li, iom al si mem, ŝi parolas flustre, vualvoĉe:

»Kaj nun vi fakte venis — ĝuste tiel, kiel ni ku-

timis rakonti al infanoj: potenca, minaca, terura. Ĉe viaj brovoj pendas kolero, ĉe l' buŝo la minaco de detruo. Vi venis en la landon, kiun ĝis nun vi ne konis, kiu estis al vi same fremda, kiel iu ajn alia — kun kiu vi havis nenian, jes, nenian rilaton. Kaj nun vi preparas vin por ĝin subjugi. Kion vi intencas? Kion vi volas pri tiu ĉi malfeliĉa lando, kiu — eĉ sen tio — suferegas la tronbatalon inter mi kaj la frato? Kia sorto ĝin minacas el via mano? Ho, diru, kion vi faros el tiu ĉi disŝirata lando?«

En Cezaro bolas. Io neeldirebla, io pli forta ol li mem puŝas lin antaŭ la tronon de l' reĝino, devigas lin ekgenui:

»Pri ĝi mi volas nur tion,« li ekkrias, »kion vi mem volas!«

Si rektiĝas alten. Du bluaj flamoj fulmas el ŝiaj okuloj.

»Do, faru min ĝia vera reĝino!«

## Plenumiĝo

La mondo dronis for . . .

Sur fajrerantaj ondoj naĝas brila barko, rapide puŝata de l' flugantaj remiloj. Ene, sub krispa, purpura kovrilo kaŝanta kontraŭ enviemaj rigardoj, sidas du, reciproke sin amantaj.

Man-en-mane, vang-ĉe-vange, ili revas en mal-laŭtan kanton, delikate flirtantan de la leviĝanta ŝipnazo. Paciĝinte kun si mem kaj la mondo, absorbitaj unu en la alian, ebriaj pro la antaŭe nesupozita feliĉo, tiuj du faras sian edziĝvojaĝon.

Kio ili estis, jam forpasis: katenoj, ligantaj ilin al tiu ĉi mondo, falis for de l' membroj. Malproksimas aliaj, fremdaj, triaj personoj, kiuj ĝenus ilian feliĉan sinsenton. Kiel sankta, sankta unuo, ili vojaĝas en supertera pureco, feliĉo, revante tra l' silento la kanton, kiu vojaĝas kun ili kiel beno. Ja, ili aŭskultas ĉielajn horojn . . .

»Ĉu pikas la suno?«

Silento.

»Ĉu doloras la brako?«

Silento.

»Nu, diru — vi deziras ion?«

Neion alian ol kuŝi tiel kaj feliĉi en la Neeldireblo, unuiganta korpon kaj animon . . .



Tio devus esti venkiro, unu el atakflugoj, portantaj la aglon super la tutan teron. La akraj okuloj jam ekvidis la kaptajon, ŝtalaj hok-ungoj jam elstreĉiĝis por ĝin kapti, superforti — pereigi.

Tio devus esti venkiro — kaj iĝis edziĝvojaĝo. Kvazaŭ la ŝtala aglo, fidante sian potencon, sian memon, flugus mezen en la sunon. En ĝia sennoma ardo la ŝtalo fandiĝis, forbrulis pensoj, scio, volforto — nenio, nenio postrestis... nur la sento, la sankta flamo, kiu neniam estingiĝos, la senlima, la neeldirebla amo...

La mano, iam tiom firme tenanta la glavon, nun mole enkaptis la delikatajn fingrojn, kiuj dorlotas sin en ĝin. La kapo, iam kombinanta mondskuajn planojn, nun delikate apogiĝas sur la bukloj, dronante en ilin. La koro, iam firma kaj sentrema tra sennombraj tempestoj kaj danĝeroj, nun malfermiĝis ĝis la plejprofundo... ĝi volas ensorbi tiun alian koron, tiel intime, intime alpremiĝantan!

Tio ne estas febro narkotanta sentojn, nek ebrio konfuzanta la animon — tio estas dissolviĝo, esto ekster la vivo, esto ekster ĉiuj limoj, la plenumiĝo, la savo — la lasta vero.

Estis iam homo, volanta konkeri la tutan mondon por ĝin nove elformi laŭ sia plaĉo. De kiam li povas rememori, ekzistis en li tiu fajro, tiu impulso, puŝanta antaŭen, ĉiam antaŭen, al celoj, kiujn eĉ li mem ne plu rekonis. Sian tutan vivon, jardekon post jardeko, li dediĉis al tiu impulso oferante siajn gigantajn fortojn por la cel-atingo.

Sed kie nun la fajro, kiun iam li kredis senti? Kie la celoj, al kiuj li penis? Tie — tie, en la malproksimo, el kiu al li ne penetras eĉ sonĝeto.

Ĉar nun — kvankam lia senlaca kapo tion ne rekonis, kvankam lia ĉiam plena koro tion ne sopiris — nun estas en li profunda scio, kiun li ne plu povas perdi, la scio, ja, la lasta: *En tiu ĉi mondo estas nur unu vero, nur unu realo: la amo.*

Silenton! Silenton! Ne ĝenu la sanktan momenton, klinu la kapon antaŭ tiuj sanktaj horoj. Ĉi tie plenumiĝis io, kion vi ne povas kompreni, nek per viaj sentoj kaj menso percepti. Miraklo okazis, jam elkomence destinita de l' superaj potencoj al tiu ĉi mondo, al ĉiuj atingebla, sed preskaŭ de neniu atingita: du iĝis unu, tra du korpoj torentas unu sango, el du koroj burĝonas brila belo de unu animo, malferminta siajn grandajn, fidemajn okulojn al la ĉielo, el kiu ĝi venis.

Kio ĉi tie ankoraŭ homa, kio tera? Ĉu gravas, ke unu el ambaŭ koroj batas en brusto de l' juna reĝino, la alia en tiu de l' maljuniĝinta militestro? Kio estas la nomo de tiu ĉi horo? Kleopatra... Cezaro... Nur amaso da silaboj, perdintaj ĉiun sencon. Ĉar, jen ĉi tie, reviviĝis io praorigina, io elstaranta super loko, tempo, scio, kompreno — io, ĉie kaj ĉiam valora: diaĵo mem venis malsupren kaj denove rekreiĝis en tiu ĉi unuigo.

Sed nun, kiam la rekreado estas plenumita, jam leviĝas nova mondo. Ne malperfekta, ne ŝlima, kiel tiu ĉi tera, ne, ne, sed diafana, senmakula kaj pura — pura — la fine formortanta akordo de la granda harmonio.

Sur la sanktaj akvoj, fluantaj tra l' nova mondo, jen flugas la barko, en kiu du iĝis unu, supren . . . al la steloj . . .

## Mia reĝino

»Ĉu vi permesas al vi min influi? Kiu vi estas, ke vi riskis veni al mi antaŭ ol mi vin alvokis? Kio kuraĝigis vin, ke vi provas altrudi al mi vian volon?«

Hircio silentas.

»Ĉu mi cedis, ke vi tiom arogantu kaj uzurpu al vi rajton por prijuĝi miajn farojn! Ĉu ni ja tiel intimiĝis, ke vi volas legi en mia animo, kvazaŭ en libro? Ĉu mi jam donis min al vi tiel plene, ke vi kuraĝas pensi kaj senti anstataŭ mi?«

Hircio silentas.

Cezaro alpaŝas la tablon kaj puŝas la manon en la zorge aranĝitajn depeŝojn. La tuta turo perdas la ekvilibron kaj kun brueto disŝutiĝas sur la larĝa tabloplato.

»Depeŝoj! Eh, ĉu ili povus diri al mi ion, kion mi jam delonge ne antaŭscias? Kiaj gravaj novaĵoj povus esti en ili? Gravaj! Kio ja entute estas grava? Ĉu vi povas tion diri al mi?«

Hircio silentas, kliniĝas por levi de sur la planko kelkajn falintajn foliojn. Cezaro senpacience eltiras ilin el lia mano kaj laŭvice okultuŝetas.

»Konsuleco por kvin sekvaj jaroj! Mi estis konsulo antaŭ ol la senato kaj popolo bonvolis min elekti! — Diktatoreco! Ankaŭ diktatoro mi estis — ne, mi

ankoraŭ estas, egale, ĉu tiuj stultuloj en Romo tion sankcias aŭ ne!« Li alfuriozetas Hircion, ŝovante ĉifitan paperfaskon sub lian nazon. »Dumviva *cenzureco!* Prezidanteco ĉe elektoj! Rajto por arbitre atribui provincojn, deklari militon, kontrakti pacon! Nuraj formalajoj! Nuraj sensencaĵoj! Mi ne plu bezonas tiun balaston!« Li fiere rektiĝas, el liaj grandaj okuloj ŝprucas maro da flamoj. »La reptilioj eksentis, ke la tempo de ilia mastrado ĉesas, ke fine aperis iu, kiu scios esti mastro super ĉiuj — super ĉiuj!« La voĉo, jam dekomence laŭta kaj sonora, ekpotencas, kvazaŭ li estus sur la batalkampoj kaj estus necese, ke lin aŭdu ĉiuj. Ĝi tondras tra la ejo kaj la muroj, ŝajne, kun timego resonoras eĥon. »Mi estas mastro de l' mondo! Jes, mi! Mi! Se al mi plaĉos, mi kaptos la terglobon kaj levos ĝin supren, al la steloj; se al mi plaĉos, mi lasos ĝin el la manoj for, ne zorgante, ĉu ĝi frakasigos aŭ ne! Nur min mem tio koncernas kaj neniun alian! Ĉar, sciu, de hodiaŭ ekzistas nur unu volo: la volo de Cezaro!«

Hircio mallevas la kapon. Liaj manoj, ankoraŭ ĉiam kolektante kaj ordante la depeŝojn, tremas. Cezaro daŭrigas, mallaŭtigante la voĉon, sed ankoraŭ kun tondro en la gorgo: »Ĉu vi esperis, ke vi povos min bridteni? Ĉu al vi ne plu sufiĉis miaj ordonoj? Ĉu mi ja dormas, ĉar mi ne parolas al vi ĉiutage? Ĉu mi Pollion, Markon Antonion, vin kaj la ceterajn tial faris miaj disĉiploj, ke mi nun okupiĝu pri bagateloj? Ĉu estas tiel malfacile solvadi — sen miaj instrukcioj — tiajn aferetojn, kiaj estas la regado super Romo? Ĉu vi devas tag-al-tage min ĝeni nur, por ke mi montru la pugnon, ĉar la roma popolaĉo, ŝajne, respektas sole ĝin? Por kio tiuj ridindaj komedioj? Per kio tiuj

falsaj leteroj al la grandurba proletaro, ke ĉi tie en Egiptujo, ĉe la fonto de l' vivo, mi havas neniajn aliajn zorgojn ol nur pri ĝia bonstato?«

Denove li eksilentas. Trakuras tien-reen. Haltas. Ekkrias kun denove vekiganta kolero:

»Kion — kion ja vi fakte volas de mi?«

Hircio silentas, rigardas lin larmokule, glutas. Cezaro tuj mem respondas siajn demandojn: »Vi miras, ke mi tiom longe restadas ĉi tie, vane vi demandas vin, kio interrompis mian atakkuron, eble vi eĉ timas, ke mi eniris sakstraton, perdis la forton por atingi miajn celojn!«

»Ja, miaj celoj! Ho, Hircio! Ĉu tio, vere, estis celoj, kiujn mi aspiris? Ĉu entute ja valoris tio, al kio mi penis? Ĉu mi rajtis, mi, kiu sciis, kiel diferenca mi estas al ĉiuj aliaj, eniri direkton, vojon de l' ordinaraj homoj? Ho, kia feliĉo —« li levas la kunplektitajn manojn al la ĉielo —« kia feliĉo, ke mi ĝustatempe tion travidis! Ke mi ĝustatempe ekkonis: ekzistas nur unu sola celo, nur unu sola valoro — ekzistas nur unu afero en tiu ĉi mondo: trovi alian homon kaj kun la tuta forto de sia animo, kun la tuta ekstazo de sia koro en li malaperi — feliĉe perdiĝi por denove trovi sin mil-, milion-oble pli riĉa!«

Li metas la manojn sur la ŝultron de l' junulo kaj rigardas profunden en liajn okulojn. En lia voĉo ne plu estas tondro, ĝi nun vualite molas, kaj ŝajnas, ke ĝin saturas neeldirebla ebrieco: »Hircio — tian duan homon mi trovis — kaj kun li ankaŭ mian celon, kiun mi konkeris tuj en la unua atako. Hodiaŭ, kiam mi scias, kio estas la mia, mi tremas eĉ pro nura penseto, ke estus povinte okazi, ke mi ĝin preteririu, ke mi estus povinta eĉ morti, ne ekkonante ĝin. Nu, rigardu min,

Hircio, vi, mia kara infano! Rigardu mian, vizaĝon! Ĉu ĝi nun estas alia, ol ĝi estis antaŭe? Ĉu el ĝi ne radias brilo, kiu ĝin diferencigas de ĉiu alia? Ne, viaj okuloj ne povas esti tiel miopaj, ili devas ja vidi, ke sur miajn vangojn, al vi tiel longe konatajn, falis io superhoma... Iam rebrilo de l' dieco, kiu transformis mian tutan memon kaj nun faras min la plej feliĉa frato el ĉiuj vivantoj! Ĉu vi tion ne vidas? Ho, Hircio! Ĉu, vere, vi tion ne vidas?

Via mondo! Kian valoron havas por mi via mondo? Konservu ĝin, interdividu kaj estu feliĉaj kun ĝi! Mi mem ne deziras partopreni! Mi trovis mian mondon, ĝi apartenas al mi, jes, nur al mi mem, kaj ĝi signifas por mi ĉion, ĉion!«

Hircio silentas. Sur liaj senmovaj vangoj senĉese fluas larmoj.

Cezaro denove forpaŝis de li. Rapide kaptante la togon, li ĵetas ĝin trans la ŝultrojn. Kun milda rideto li turniĝas al Hircio:

»Iru, infano mia, iru! Nun vi certe scias, kio min tenas ĉi tie, nun vi komprenas, kial mi ne plu volas aŭskulti pri bataloj kaj konkeroj, pri regado kaj potenco. Pri ĉio ĉi mi rezignis, kaj nun mi iras laŭ la propra vojo al la eterna, eterna paco!«

Li paŝas preter Hircio al la pordo. Hircio, senmove starante, akompanas lin per la plorantaj okuloj, apenaŭ vidante tra la larmovualo.

Ĉe l' pordo Cezaro haltas. La obstina senmoveco de tiu ĉi figuro eĉ kontraŭvole lin maltrankviligas. Rapide, urĝe li demandas trans la ŝultro:

»Ĉu krome io?«

»Ja ĉio!« eksplodas Hircio en malesperan krieton.

»Tio, pro kio ni ja venis!«

Glacia pugno sur la arda, sovaĝe frapetanta koro de Cezaro.

»Diru do!«

»Cezaro! Estro! Majstro mia! Ĉion ĉi mi sentis, delonge sciis! Kaj neniam mi riskus ĝeni vian feliĉon, se la sorto, pli forta ol ĉio, ne devigus min!«

La tuta moleco, tuta trankvilo jam perdiĝis el la vizaĝo de Cezaro. Rigida, kvazaŭ ŝtona, ĝi turniĝas al Hircio:

»Diru jam!« li pluinsistas.

»En Aleksandrio eksplodis ribelo!« ektondras Hircio. »Teodoto kaj Potino elincitis kontraŭ ni la tutan popolon! Kun niaj tridek mil homoj ni estas ĉirkaŭfermitaj de milionoj, la palaco sieĝata, ni sidas en kaptilo, kaj ili ĵuras, ke vin kaj la reĝinon ili —«

»La reĝinon? *Mian* reĝinon?« Ekhurlo. Ekhurlo de ekstreme incitita leono. »Alarmu la trupojn! Ĉi tien la oficirojn! Ja, mian reĝinon! Nu, ili ekkonos Cezaron!«

## Cezaro rajdas

Ankoraŭ eĥas en li la lastaj tagoj kun mirakloj, per kiuj la superaj potencoj superŝutis lin. Ankoraŭ li povas nur mense, sed ne sente, kompreni, kio okazis, kio levis lin el la sanga, malespera batalo al nova glorbriilo. Antaŭ liaj spiritaj okuloj senorde, sed ankoraŭ freŝe kuŝas la konfuzaĵo de l' impresoj: la atako de amasoj kontraŭ la reĝpalacon. Ĉiam denove, kvazaŭ rabiaj hundoj, la amasoj alfuriozas, perdinte, ŝajne, ĉiun alian senton krom avidego al detruo. Li rememoras batalojn surmare, surtere, por insulo Faro, por la ŝirmodigo. Jen, post rapide improvizitaj barikadoj li defendis sin kontraŭ grandega pliforto; jen ili interluktis brusto - ĉe - brusto, sur ŝtonplatoj, encedantaj sub ŝarĝo, aŭ sur marĉa bordgrundo, ŝmace gluanta la piedojn, aŭ sur ondoj de l' maro kaj Nilo, senbrue glutantaj ĉiun falinton. Ili batalis tage-nokte kaj nur de sekundo al sekundo oni povis fari decidojn pri ĉiu sekva ago kaj intenco. Jes, tio estis terura inkubo el brulego, sango, fero kaj mortkonvulsiaj korpoj, inkubo, el kiu oni povis vekiĝi nur por eterna endormiĝo . . .

Intertempe tamen horoj plenaj de ekstazo, destinata nur al la mortkondamnitaj: ĝisfundi la plezuron, ĉar eble lastafoje; tute droni en spirraban kirliĝon de pasioj; forfrenezumi en amluktadon la furiozon de l' batalo por — denove tien rapidi kun lipoj



malsekaj de kisoj kaj sangaj de enmordoj; diskonsumis sian vivon kiel tiu, kiu elsaldinte la kalkulon, malŝpare disŝutas la reston.

Kaj kiam ĉiuj estis jam pleje mortpretaj, ekbrilis la suno de Pelusio: la venko, donacita al senesperuloj kiel amnestio, la venko, antaŭ kiu ili staris konsternite, la fulmo, alportanta savon kaj dishakanta ĉiun reziston, kvazaŭ trafitan arbon.

La dioj de l' lando ne favoris siajn filojn: la giganta armeo, al kiu oni taskis pereigi Cezaron kun lia trupeto, jam kuŝas en la larĝa, larĝa rivero, malvigle rulanta siajn ŝlimajn ondojn al la maro. La armeon kaptakiris la profundo kaj ĝiaj loĝantoj, la naŭzaj lacertegoj, kiujn la egiptoj kultas sanktaj. Dum semajnoj ili grasige sin regalos per la korpoj de siaj adorintoj. Se la venkinto nun volus juĝi la ekribelintan urbon, ja eĉ se li propramane submetus la fajron, cindrigante Aleksandrion kune kun ĝia fiero: la sepdek du militŝipoj — neniu povus lin malhelpi. La pelusia tago rompis la spinon de Egiptujo.

Cezaro rajdas ...

Nun, kiam denove li sentas sub si glatan ĉevaldoron, falis de li ĉio, kio al la aleksandrianoj ŝajnis lia vera memo. Ili ne konis tiun, kiu estis inter la muroj de ilia urbo. Vere, ili aŭdis pri lia neŝanceblebla energio, pri la potenca forto, grandiozeco de l' ideoj kaj verkoj sed al ili ŝajnis, ke tio por ĉiam perdiĝis en la revmondo de la reĝpalaco. Sed la hurlo de ŝakaloj vekis la florumitan tigron kaj, etendante siajn terurajn, mortfrapajn ungegojn, li saltis, sternis sin sur ilin — li, la reĝo de l' batalo, kiun ili altrudis. Jam malaperis la milda trankvilo, kiun ensugestis la sorĉaj monatoj de la lasta jaro, jam malaperis la rezigna

sendono, pleniganta lian tutan memon. Jes, ĉio, kio estis feliĉo kaj sentebrio, forviŝiĝis el lia vivo: en li — kiel iam — estas streĉo, estas impulso, dumvive puŝanta lin antaŭen, ĉiam antaŭen, tra la tuta tero, submetiĝanta ĉie, kie li ekplandis. Li nun rememoras, ke li estas imperatoro, la ordonanta. Kaj tra la lipoj, denove maldikaj kaj severaj, elpluvas ordono post ordono.

Kiam li forlasis la ĉefpordon de l' aleksandria reĝpalaco, li pensis, ke tio estas nur portempeta adiaŭo, post kiu li denove revenos en siajn revojn kaj feliĉon. Sed nun li scias: li revenas tute alia ol li eliris. La sorĉgroto, el kiu li paŝis en freŝan aeron, post li fermiĝis kaj neniam plu li trovos la enirejon. Li vekigiĝis el la dia fabelo: la trombono, kies metala sono — ah, nur por tiel mallonga tempo — mutiĝis en delikatan kordinton de pli bela mondo, denove ektondris en lia brusto. Ĝi puŝas lin el la sankta paco, kiun li opiniis akirita por eterne. Rajdi li devas, ja rajdi — al la nekonataj limoj, kien lin portas la Neeldireblo, al kiu iam li sin tute donis.

Doloro brulas en lia koro tiel terure, ke — por momento — li deziras kuŝi inter la miloj, falintaj kiel viktimoj de tiu ĉi tago. Jes, tiel rigida, tiel malvarma, kiel ili. Tion, kio apartenas nur al li mem, li devas forlasi, ĉar la fatalo postulas de li plej grandan oferon de l' propra feliĉo. . . . Kaj al li jam venas impulso ekkrii, per propraj manoj disŝiri la bruston — eble la sufero de l' korpo superpotencus tiun de l' animo. Unu fojon pli estas al li destinita malespera batalo, ne malpli akra ol la ĵus eltenita. Unu fojon pli li travivas la perdon de l' povo kaj lastapene luktas kontraŭ la propra koro.

Sed, pli potenca ol la tuta frenezumo de l' tor-

turata animo, estas en li la supertera forto de lia misio. Li estis gvidanto, vojpreparanto, reĝisoro pri sorto de milionoj. Alten li levis la ekfalan, brilan standardon de l' ideo kaj portis ĝin tra la mallumo de l' sen-dia mondo. Kun ĝi li paŝis antaŭ tiuj, kiuj lin fidis, kiuj ĝojaklame lin sekvis, por kiuj la simbolo en lia mano samtempe estis promeso kaj plenumiĝo. Kio pri ĉiu alia estus komprenebla, eble eĉ pardoninda — tion nur li sola devas ne fari por resti fidela al si mem: li devas ne perfidi la standardon. Kaj tiu ekkono de la Lasto jam ŝvebas super doloro kaj sufero, prilumante ĉion, al-mi-an per la brilo de fatala granda kaj forto — ĝi decidas la venkon!

Ja, forto! La granda sekreto de lia memo! La profunda, de l' amo donacita interligo kun la universo, kune kun tiu forto de l' flugiloj, destinitaj levi lin alten, super ĉion homan — estus malsufiĉaj. Devas aldoniĝi ekkono, ankranta sur la fondo de lia animo, ke la torento lin trafluanta estas nur branĉeto de torontoj, kiuj sume nomiĝas: vivo, movo, evoluo, klopodo, agado. Ne hazardo lin starigis en tiun ĉi mondon, sed neesplorable profunda plano, sur kiu baziĝas la tuta mond-okazado, kvankam tio, en siaj detaloj ŝajnas al la homaj okuloj sensenca. Amo povas displuviĝi oran reton de neesprimeble belaj radioj en la maron de lia animo, sed sole la forto povas traboriĝi ĝis la fundo kaj eksvingi, ŝaŭmkirli la ondojn supren, ĝis la ĉielo mem. Estus, do, ne nur hontige, sed eĉ maleble kontraŭstari: se li ne ĵetus sin memvole en la tempeston, por ke ĝi lin portu, li estus forŝirita kaj senhelpe frakasita. Nu, vera venkanto estas nur tiu kiu trovis la ekvilibron inter Voli kaj Devi: ĉar de praĉiam li estas unu kun la granda Harmonio.

Lastafoje ekatakas tio homa en li: la penso pri Kleopatra ekmartelas lian koron, revivigante ŝian bildon en ĝia tuta, sorĉa beleco.

Sed ankaŭ ĉifoje li venkas.

Ne, ŝi neniam ĉesos esti al li tio, kio ŝi estis — kio ŝi estas: diino, amatino kaj la lasta plenumiĝo de l' sopiro. Kaj, kiel en la malnova fabelo, la templo, en kiu li adoris ŝin, leviĝis sur brilan marmor-rokon. Nun ĝi staras tiom alte, ke li ne plu povas ĝin atingi, sed nur rigarde karesi. Plena li estas de dolĉdolora rememoro pri la horoj, kiam li rajtis trairi la oran enirejon. . . Ankaŭ sufere feliĉa, ke en la multvalora tabernaklo de la plej Sankta estas gardata lia plejbono: parto de lia memo estas savita en la eternon kaj nun li tute ne zorgas, kio okazos pri la resto . . .

Ho, tiu resto ne plu apartenas al li, sed al la vivo ĉirkaŭe: al Romo — al la homaro — al la tuta mondo.

Trankvilo lin ekregas. Ankoraŭ ie konvulsias kaj tremetas, ankoraŭ li aŭdas el la plejprofundo de sia koro kvazaŭ mallaŭtan, rompitan ploron . . . Sed la leĝo, kiun li mem donis al si, staras venkoplene kaj plenigas lin per supertera grando kaj majesto.

Cezaro rajdas. . .

En la helsonora hufado de lia ĉevalo distingiĝas la obtuza paŝo de la legioj. La trembrila sablo de l' dezerto dissternas ruĝ-oran tapiŝon. La tago kiu donacis al li venkon super Egiptujo, alportis unu novan, eĉ pli grandan: tiun super ĉio tera, kontraŭa al lia supera misio. Nur nun li komprenas, kiom ege lin admiris liaj fidelaj militistoj, kiam post la venko ili ovaciis lin kiel dion. Amo eksentis amon. Forto eksentis forton, komprenante, kion la saĝuloj ne povis,

kion la kontraŭuloj ne volis kaj kion la senspinaj flatemuloj ne rajtis vidi: tion dian, kio en li, kiel en ĉio vivanta, triumfas super la homa kaj malperfekta.

La radioj de l' okcidenta suno brilnuancas lingis spiratiĝo . . . Tiel, ĉe l' frunto de siaj trupoj, Cezaro rajdas ne kiel militestro de venkoglora armeo, sed kiel dia gvidanto de sankta kohorto, de senmorta taĉmento, kiu ĉe l' altoj eterne batalas por la homaro . . . Li rajdas en senhonore kuntiriĝintan Aleksandrion . . .

## Adiaŭo

El la plej profunda sentebrio Kleopatra levas la rigardon.

Ŝiaj okuloj, kutimiĝintaj al mallumo en la longa, longa nokto, klare distingas ĉiujn objektojn en la tap-iŝita ĉambro. Ili vagas sur la muroj, por momento kro-ĉiĝas al granitnigra statuo de Anubiso, antaŭ kiu flagretas verdvitra lampeto de l' sankta ĵurpromeso. Tiam denove ili revenas al tio, kio estas al ŝi plej proksima.

La malhelaj, larĝe malfermitaj pupiloj rigide glu-iĝas al la vizaĝo de l' dormanto. Kun senlima amo, nun eĉ pli profunda pro obtuza malrapide vastiĝanta doloro, ŝi observas la karan vizaĝon. En la dormo ĝi iĝis tute trankvila, mola kaj milda. Tamen en ĝi jam vekiĝas eta maltrankvilo . . . Ŝajne la dormanto, same kiel ŝi, sentas alveni la matenon — la lastan el la multaj, kiujn ili kune maldormis.

Kaj nun, kvazaŭ nubo trakurus la kvietan vizaĝon, ĝi jam iĝis streĉita kaj rigida. Ĉu eble sonĝo inkubas, turmentas la dormanton? Tiel li aspektis, kiam furi-ozis batalo ĉe Heptastadio, kies larĝaj, blankaj ŝton-  
oj estis ruĝaj kaj glitglataj de sango. Tiel li as-  
pektis, kiam en mortdangero li saltis el boato en la  
maron, por savi la vivon, aŭ kiam li iris al la decidiga  
batalo ĉe Pelusio.

Bataloj kaj malpacoj jam pasis for — sed ankaŭ la tagoj kaj noktoj de ilia kuna revomondo. La realo denove lin kaptis en sian potencon kaj nun, kun forŝira forto, ĝi vokas lin reen al si. Vana estas ilia doloro: la eterna leĝo, pli forta ol ili, por ĉiam disigas iliajn vojojn, kiu jam ŝajnis por ĉiam kunfandiĝintaj.

Malrapide kaj atente ŝi eltiras la manon, sur kiu ripozis la kapo de l' dormanto. Dolore ŝi sentas varmon sur la manplato — ĝi ne estas nur ŝia propra. Eĉ pli arde gluiĝas ŝiaj okuloj al la trajtoj de la viro, volante tion, kion ili vidas, ensorbi, en sin tute ŝteli.

La dormanto ekmoviĝas, profunde ekspiras, malfermante iom-post-iom la okulojn. Lia rigardo jam renkontas la ŝian kaj profunde dronas en ĝi. Longe tiel ili sin interrigardas, senmove, kroĉiĝinte unu al alia per rigardoj, plenaj de malespera energio. Tiam li malrapide levas la brakon por ĉirkaŭpreni ŝian nukon. Sed antaŭ ol li finis la movon, ŝi jam falis sur lin, alpremante siajn lipojn en la liajn.

Nur post tempeto, kiam ili forŝiriĝas unu de l' alia, li ekparolas. Unu-, dufoje li provas, ĝis fine li diras per rauka, rompita voĉo, duonflustre, kvazaŭ timante rompi la silenton de mallumo.

»Ĉu baldaŭ mateniĝos?«

»Jes,« ŝi diras same mallaŭte. »La steloj estingiĝas kaj ĉe l' oriento jam naskiĝas la tago.«

Li ne plu parolas, li nur profunde ĝemas kaj refoje ŝin tiras al si. Denove ili kuŝas tiel, longe, longe: buŝ-ĉe-buŝe, korp-ĉe-korpe, en arda ĉirkaŭprenado.

Fine ŝi la unua liberiĝas el la brakumo. Malrapide ŝi formetas la brakojn, ankoraŭ ŝin tenantajn, kaj duone sin levas.

»Vi ne plu estas trankvila,« mallaŭte ŝi diras.

Li ne povas respondi, li nur senvoĉe kapbalancas, ekkubutas, alturnante la vizaĝon.

»Huj, mi jam sentas la tutan doloron de l' venonta horo,« li elflustras. Lia vizaĝo, ŝtoniĝinta ĉe la vekigo en pene regatan maskon, taŭziĝas kaj estas jam timema, senhelpa, kvazaŭ de infano. Lia kapo jam kliniĝas al ŝia ŝultro kaj — ekstremante — ŝi sentas varmajn gutojn, ruliĝantajn sur ŝia kolo: Cezaro, la mastro de l' mondo, ploras . . .

Ŝi palpas ĉirkaŭ si, trovas vualon, per la maldekstra brako ĉirkaŭprenas la karan kapon kaj per la dekstra viŝas la larmojn, senĉese fluantajn. Kaj, dume, ŝi flustras mallaŭte apenaŭ kompreneblajn, rompitaĵajn karesojn . . . Tiel patrino konsolas la profunde afliktitan infanon . . .

La larmoj ĉesas. Profunda, dolora ĝemeto kaj la velkinta kapo leviĝas. Sur la vizaĝo jam denove kuŝas bronza masko, jes, masko, sed el la okultruoj rigardas la plej sovaĝa malespero. Malrapide li leviĝas.

»Jam tempos,« li diras. La voĉo iĝis pli laŭta kaj kvazaŭ metala: ankaŭ ĝi estas masko, kaŝanta la ploron, kiu sub ĝi ankoraŭ vibras.

Ŝi sekvas lin. Jam ŝi estas apud li. Ĉe l' piedoj sterniĝas la varma, elĉifita kuseno, kiu por tiu ĉi lasta nokto donacis al ili rifuĝon. Ŝiaj okuloj serĉas lian rigardon, sed ne trovas ĝin. Sencele ĝi boriĝis en malplenenon . . . Malrapide li komencas meti piedon antaŭ piedon. Sen difinita direkto, tamen ĉiupaŝe li malproksimiĝas de l' kuŝejo. Ŝi sekvas lin same, plenanĉente, kvazaŭ ŝi intencus ion aparte gravan, ian ceremonion, kiun oni devas plej rigore plenumi.

Ŝi ne proksimiĝas al li. Kvazaŭ inter ili jam leviĝus muro, disigante ilin kaj malhelpante ĉiun mov-



on. Terurite ŝi sentas, ke la amato estas jam senlime malproksima, ke inter ili kuŝas la tuta mondo kaj ne nur paŝdistanco.

Sed jen, ĉe l' pordo, kiun li atingis senkonscie, li turniĝas — kaj nun, lastafoje, malaperas la muro, ilin disiganta: li etendas al ŝi la manon kaj kun sufo-kita krieto ŝi alrapidas, velkas sur lian ŝultron. Tiel, firme brakumitaj, ili trapasas la jugon de l' pordo. Ŝajnas al ili, ke jen falos la larĝa trabo kaj ilin retenos.

Kaj subite ilin ambaŭ ekkaptas plena, terura po-tenco de doloro. Kun rompita stertoro la viro altiras al si la virinon, premas ŝin tutforte al sia korpo, gluas siajn lipojn sur ŝian vizaĝon, supersŭtante sennombrajn, ardajn kisojn: sur la frunton, sur la okulojn, sur la vangojn. Jam li trovis ŝian buŝon, malfermiĝe ĝi sin trudas al li. Li enboras siajn lipojn, la dentoj kunfra-piĝas, ŝin alardas lia flama spiro. Kaptante interdente ŝiajn lipojn li enmordas ĝissange. Refoje li levas la kapon, ekgorĝas obtuzan krieton kaj samtempe sin ĵetas super ŝin. Ŝi algluiĝas, kvazaŭ volante enpenetri, plektas siajn brakojn ĉirkaŭ liaj ŝultroj, kun sama so-vaĝo reciprokas kison per kiso, mordon per mordo. Ili ne konscias, kie li estas, ili ne konscias, kio ilin aten-das en la venonta momento, ili konscias nenion — nenion. Ilin ankaŭ kaptis frenezumo, tiu terura furi-ozo, naskiĝanta ofte el la plej bola pasio, tiu tragika avidego diskarni, disrompi tion, kion oni plej amas. Ĉio homa malaperis el ili: du mordsiremaj bestoj ĉirkaŭkaptiĝis en mortlukto. Naŭza soifo al detruo ekfajris en ĉiuj iliaj vejnoj borigante, kiel terura spast-mo, tra ilia tuta estaĵo... ĝis fine ĝi ilin venkas plene, nerezisteble.

Tiam, same subite kiel ĝi venis, la frenezumo

estingiĝas. Revenis sobriĝo. Liaj brakoj falas, la ŝiaj disiĝas. Retiriĝinte unu paŝon, li fiksrigardas ŝin. La okuloj de ambaŭ ŝajnas elbruligitaj kavoj. Kun longa elspiro li elpuŝas la aeron tra l' dentoj kaj per mal-espere movo subpremas la tremon de sia korpo. Tri-foje li diras — mallaŭte, sensone:

»Nun mi devas foriri! Nun mi devas foriri! Nun mi devas foriri!«

Senmove ŝi staras antaŭ li, malrapide klinante la kapon. Harbuklo ekglitas trans ŝia ŝultro, kaj en longaj, disvolviĝaj ringoj falas sur la bruston. Ŝi ĝin kaptas, senpense ludas en ĝi kaj subite ekŝiras. Ĝem-plorante ŝi jam falas apud la giganta porfir-tablo, premante al la orborderita rando sian frunton.

---

Post unu horo ili denove renkontiĝas — sed nun inter du sekvantaroj. Denove ŝi estas la reĝino de Egiptujo kaj li la militestro de Romo. Kun ĝentila, etiketa rideto ili interŝanĝas ĝentilajn, etiketajn vortojn: li dankas pro la donacita gastamo, ŝi deziras al li feliĉon kaj benon de dioj por lia plua, certe gloriĉa, kariero. Nun li ceremonie riverencas kaj kun sia stabo, ne turnante sin, forlasas la pompan aŭdiencejon. Kiel ĉe lia alveno, ankaŭ nun spaliras lian vojon senmovaj figuroj de blanke vestitaj pastroj. Se tiam li legis en iliaj rigardoj mallerte kaŝatan timon, nun li trovas tie nekaŝatan, plenan kontenton: la sintruduloj foriras tien, de kie ili venis, kaj la antaŭaj estroj de la lando re-prenos la regadon.

---

La ŝipo ŝiriĝas de l' bordo kaj malrapide ek-flosas de la tero. Cezaro staras ĉe la pouĉo, metinte

la manon sur la balustradon. Rigarde li ĉirkaŭprenas — por la lasta fojo — la grandiozan bildon antaŭ si. Jen, tie kuŝas la tumulta, riĉa havenurbo, kaj borde alten elturas la brile-blanka reĝpalaco. Ĉe iu el la fenestroj flirtas longa, blanka vualo. Al ĝi ĉiam denove *turniĝas la rigardo de Cezaro. Ĉu tie estis...?*

*Li fortunias la okulojn. Denove ili travagas super la urbo. Maldekstre de la teatro eksplodis la unua atako. La mareotan lagon, kiun li rondiris antaŭ la unua atako, kaŝas maro da domoj. Nur tie, dekstre, kie la domoj estas malpli altaj kaj densaj, iam-tiam ekargentas.*

La ŝipo veturas plue. Nun ili preteriras lokon, kie forbrulis la egipta ŝiparo — kaj kun ĝi unu el la mondmirakloj: la biblioteko. Dekstre etendiĝas la senfine longa lango de l' havendigo, kie preskaŭ oni finis la sorton pri li kaj lia militistaro. Jam aperas insulo Faro kun sia lumturo. Tie, ŝajne jam tute ĉirkaŭfermita de l' venkantaj kontraŭuloj, li kun Kleopatra travivis sanktajn, sanktajn horojn.

Freŝa vento de l' vasta maro ŝveligas la velojn. La ŝipo profunde trasagas la ŝaŭmkronojn de l' bolantaj ondoj, leviĝante, kurante antaŭen, kiel ĉevalo, plenforte hufanta la vojŝon. Refoje Cezaro okulturnas al la reĝpalaco. Nun ĝi estas nur eta kubeto en la netrarigardebla maro de kubetoj malpli grandaj. La blanka flirtanta vualo jam perdiĝis . . .

## Ili ribelas

»Vi fieras? Pri kio, fakte, vi tiel fieras?«

»Pri mia deveno, pri mia nobla sango, pri la tradicio de mia familio, kiu donis al Romo ĝian unuan konsulon.«

»Do, pri faktoj, kiuj ne rezultas el via laboro: viajn gepatrojn ne vi elektis kaj ili donis al vi donacon, kiun vi ne elmeritis. Ne, Bruto, tiuokaze mi preferas fieri pri io alia!«

Marko Bruto ridetas malvarme kaj mokeme.

»Tre, tre mi scivolas ekscii, pri kio do?«

»Mi fieras, ke ĉe Alesio mi savis agloportiston el la plej terura pugnobatalo; ke antaŭ Dirrahio tra blokado mi kondukis al Cezaro trupojn kaj provianton; ke ĉe Farzalo mi kroĉis al mia frontoparto pli ol tri-oblan superforton de malamikoj. Jen, vidu, la aferoj kiujn mi prifieras.«

Antonio, flamiĝinte dumparole, komforte sin rearanĝas en apogseĝon kaj per fajra rigardo nun mezuras sian kundisputanton. Cezaro tion ridete okulas. Senvorte li observas ambaŭ junajn, batalemajn virkokojn. Nu, kion respondos Marko Bruto?

Tiu ĉi ne hezitas longe.

»Sendube, ĉio laŭdinda,« li alĵetas ŝultroleve.

»Sed, ne sufiĉas nur ion fari; oni devas ankaŭ scii, por kio oni tion faris!«

»Sed tion mi ĉiam sciis,« ensaltas Antonio.

»Ĉefa afero estas la konvinko, la karaktero de l' aganto,« daŭrigas Bruto sian lektion, tute ignorante la interrompon.

»Eh, karaktero!« moketas Antonio. »Ĉu en la tendaro de l' senato vi esploradis viajn karakterojn antaŭ ĉiu batalo? Tion ja oni povus kredi — juĝante laŭ la maniero, kiel vi batalis.«

»Sufiĉe jam, Antonio,« ridsufokite riproĉas Cezaro la junan pasiulon. »Ne aludu al personoj.«

La delikatan, iom virinan, vizaĝon de Bruto varmigas sango.

»Al ni ne estis necese fari esploron,« li reciprokas iom akre. »Ĉiu el ni sciis, kio li estas.«

»Hu! Kaj kio, do, estis ĉiu el vi?«

»Respublikano.«

Antonio grimacas rideton.

»Ŝvela vorto, sed malplena. Ja, respublikanoj! Tio vi estis, ĉar nenion alian vi sciis. Reciprokaj antaŭjuĝoj kaj reciprokaj avantaĝoj vin blindigis por tio, kio ŝajnis al ni sole grava: por la personeco.«

Bruto ensaltas kiel ĉasisto, vidanta ĉasaĵon ŝteliĝi en kaptilon.

»Por la personeco de kiu?« li kompletas.

Antonio ĝoje kaj ruze strabetas al Cezaro, poste ekridas hele kaj sonore:

»Por nia propra, he,« li diras miele. Kontenta li estas, ke li evitis la ĝustatempe rimarkitan kaptilon.

»Kaj kion vi pensis, por kies?«

Bruto ne respondas la demandon. Ĉirkaŭ lia buŝo

enplugiĝis du malmolaj, doktrinulaj sulketoj. Li tute similas al Katono, kiam li ekmalicas:

»En la ordita socio ne estas loko por unu persono: ve al la ŝtato, en kiu unu civitano superas la ceterajn.«

»Jes, certe,« ironie kapklinas Antonio, »tro krude li rememorigus al la ceteraj ilian mezkvaliton. Ho Bruto! Bruto! Mi ĉiam miris vidante vin inter la malamikoj de Cezaro. Sed nun mi ne plu miras!«

»Neniam mi estis malamiko de Cezaro, sed ĉiam nur lia kontraŭulo.«

»Nu, diferenco?« demandas Antonio ŝultroleve.

»Ke neniam mi havis personan antipation.«

Antonio abrupte ekridas.

»Aliavorte, ke vi fariĝis plene nenatura, frazŝtopita pupo, perdinta ĉiun homan senton, ĉiun memstaran penson. Mi konas vin kaj viaspeculojn, ho Bruto! Vi pasias por fantaziaĵoj, kiujn por vi inventas cerboj de aliaj. Vi daŭrigas vian vivon en altrudita iluzio. En via senidea et-menso vi estas pretaj oferi al viaj tiel nomataj idealoj ĉion — fine eĉ vin mem, ĉar vi taksas vin malgravaj. Nu, mi preferas lastrangan legianon de Cezaro! Tiu ĉi, minimume, scias por kio li batalas kaj konscie sin donas — kiel ni ĉiuj, batalintaj sub Cezaro — al io Majesta, Grandioza. Kaj se li oferas sian vivon, li ĝin formetas por tiu, kiun li amas!«

Bruto eksaltas, enmordante la lipojn. El la okuloj malicas flamo.

»Nun mi kaptis vin!« li krias. »Nun vi mem konfesis, ke por vi la ĉefa afero estis ne la komuna bono, sed iu unuopulo! Per tio vi definitive disiĝis de mi kaj la miaspeculoj, kiel vi bonvolis nin nomi!«

Antonio ridas ironie. En lia sovaĝa, sentima viz-

aĝo de l' rajdisto klare montriĝas la abomeno, kiun li sentas kontraŭ la alia.

»Eh, ĉu vere vi kredis,« li glacias, malrapidas, »ke mi iam ajn deziris esti al vi alkalkulata!«

Antaŭ ol Bruto povas respondi, eksonoras la voĉo de Cezaro. Estre kaj katene:

»Sufiĉe ja! Malpacu, kie vi volas, sed ne antaŭ mi!« Flame li alokulas ilin ambaŭ. »Se mi kun iu interpacigiĝis, mi deziras, Antonio, ke ĉiu ĉirkaŭ mi tion respektu,« li daŭrigas akcente. »Kaj vi, Bruto, devus ne forgesi, ke la plej bona respublikano ne estas tiu, kies buŝo senĉese muelas respublikon!« Li alrigardas la mishumorajn vizaĝojn de ambaŭ, nevole ekridetas kaj volas preni interpacigan tonon — sed jam enpaŝas servisto. Abrupte, voĉŝanĝe Cezaro demandas:

»Nu kio?«

»Salustio petas aŭdiencon,« informas la servisto. Sed jen, jam eniras Salustio mem: polva, ŝvita, ekscitita. Cezaro okulas lin de l' kapo ĝis la piedoj kaj mire esploras:

»Vi jam revenis el Kampanio? Kio tie okazis?«

Salustio dentknaras kaj, profunde enspirinte, fine elstertoras:

»En Kampanio? Nun — nenio. Jen —« li montras kontuzaĵon sur sia maldekstra brako. — »Ŝtonojn ili ĵetis sur min. Ili traktos nur kun vi, ili kriis kaj, ĉar vi ne volas veni al ili, ili mem mallongigos al vi la distancon.«

Profunda brovsulko. En la okuloj de Cezaro ekardas tiu malhela flamo, pro kiu liaj amikoj, kvankam bone ĝin konantaj, ĉiufoje retimiĝas.

»Kion tio signifas?« li demandas nenature trankvila.

»Ke ĉiuj veteranaj legioj ekmarŝis kontraŭ Romon. Hodiaŭ posttagmeze ili verŝajne alvenos.«

»Bone; hodiaŭ ili min vidos.« Lia korpo, levigante streĉiĝas, la fingro altuŝetas vibrantan tamtamon.

»Vi iros al ili?«

»Kaj kial ne?« Li turniĝas al la eniranta sklavo: »Tuj al la ĉefgvardio. Ĝenerala alarmo. Oni fermu kaj okupu ĉiujn pordojn. Al ĉiuj, senescepte, malpermesite forlasi la urbon. Rapidu!« La sklavo forpafiĝas. Salustio petege levas la manojn:

»Cezaro! Ili plene senbridiĝis!«

»Ĉar jam delonge ili ne havis okazon trakti kun mi.«

»Ili mortigis ĉiujn oficirojn kontraŭantajn al la marŝo!« Cezaro alten levas la kapon. Ĉiuj terurite rigardas la bronzan maskon.

»Nu, mi volas vidi, ĉu ili ankaŭ min kiel lastan perfide murdos!«

Baldaŭ vesperiĝos.

En frua antaŭtagmezo — laŭ la sciigo de Salustio — oni vidis la batal-ekipitajn legiojn sur la *Appia Vojo*. Horon poste la legioj komencis fosi digojn kaj tranĉeojn, arangiĝante sur la *Mars*-kampo veran tendaron. Kaj, unu horon poste, ĉirkaŭ ili jam eksvarmis komercistetoj, kiuj laŭ nekonata maniero elkontrabandis sin el la urbo. Iliaj drastaj trinkaĵoj, vendataj uzur-preze, forrabis de la ribelantoj eĉ tiun iometon da prudento, kiun ili ankoraŭ posedis. Alfluis la plej lastrangaj virinaĉoj el Suburo. Kun ili ankaŭ lumevitaj apaĉoj el la kvartaloj transe de la Tiberio. Baldaŭ



la tendaro ricevis aspekton de giganta, aĉa drinkejo sub libera ĉielo.

Cezaro estis senĉese informata pri ĉio okazanta. La sciigojn li akceptis kun la same rigida vizaĝo, kun kiu li aŭskultis la unuan raporton de Salustio. Vortŝpare li konvinkigis dum inspektado, ke ĉiuj liaj ordonoj estas plenumitaj. Nun li igas seli sian preferatan blankĉevalon kaj, kun nur malmultaj akompanantoj, li ekrajdas al la tendaro de l' ribelantoj.

Jam el-malproksime li vidas senbridan tumulton. La spaco antaŭ la tendaro estas plenplena de militistoj kaj grandurbaj apaĉoj. Al liaj okuloj prezentiĝas monludoj, drinko kaj rapide vendata amo. Eksteraje li restas trankvila; sed la malordo, kies atestanto nun li estas, trafas lin pli akre — eĉ ol la ekribelo mem.

»Nu jen, vi vidas,« li aŭdas post si ironian voĉon de Bruto, »al kio sin alkroĉis viaj kamaradoj.«

»Eh Cezaro helpos al ili denove trovi sin mem,« furioze knaras Antonio.

Malgraŭ la mallumo en la animo, Cezaro devas mallaŭte ekridi.

Jes, li pensas. Sed alie ol vi supozas. Li jam scias, kiel li devas trakti siajn maltimulojn.

Nun ŝajnas, ke en la tendaro oni jam rimarkis la rajdtaĉmenton. La amasaĉo malkvietiĝas, konfuziĝas. La militistoj senorde sin grupigas; tra la pordo de l' tendaro jam malaperas kurieroj. Kaj subite io instigas la malluman, mutan homon pli streĉe ekokuli: tie-tie elsaltas centurionoj, rekoneblaj laŭ plumtufoj kaj kanbastonoj kaj leve etendas antaŭ sin la dekstran brakon. Rapide post ili taĉmentoj viciĝas, aranĝiĝas kaj ignorante la ĉirkaŭan popolaĉon, ordvice eniras en la tendaron.

Cezaro profunde spiras: do, ankoraŭ ili ne forgesis la disciplinon, ankoraŭ en ili estas iom de lia reganta volo, kiu ilin ekkaptis kaj katenis. Li pli ekpremas la femurojn, pli streĉas la bridojn kaj la ĉevalo pli rapide ektrotas.

Nur antaŭ la tendaro li bridas ĝin en paŝon. Malrapide, kun senmova ŝtonvizaĝo, li enrajdas, dum la rigardo sin boras en la kompaktajn trupojn de l' ribelantoj, nun orditajn en perfektaj vicoj. Cezaro vidas ĉiujn, ĉiuj vidas Cezaron.

Eĉ vorteton li ne diras, li ne reciprokas la senriproĉan saluton, kiun laŭkomande donas la legioj. Ŝajnas, ke lin tute ne koncernas tio, kio ĉirkaŭ li okazas. Nur kiam li preterrajdas la Dekan, la plej proksimaj aŭdas kiel li diras al Salustio:

»Ankaŭ la Deko?«

Fine li atingas la estradon. Li desaltas, ĵetas la bridojn al tiu el la ĉirkaŭvagaj ĉevalistoj kaj suriras. Paŝinte tute al la rando, li refoje ekrigardas en la tomban silenton kaj, ambaŭmane kaptinte sian glavrimon, li komencas per perfekte trankvila voĉo:

»Do, kion vi fakte volas?»

La militistoj konfuzite rigardas unu la alian. Interkubutas. Konfidence interflustras. Fine tri-kvar elpaŝas, plie puŝataj de l' aliaj ol propravole irantaj. Senhelpe ili turnas la kapojn reen al la kamaradoj. Unu el ili, la plej kuraĝa, balbutas fine kelkajn frazojn, sed oni komprenas nur fragmentojn: ». . . ĉiam promesadis . . . la lasta batalo . . . ne plenumis la vorton . . . al ni sufiĉas . . . Lia voĉo, jam dekomence rompiĝema, nun formortas en nekompreneblan flustron.

Cezaro, rigardante lin per siaj malvarmaj rigardoj lasis, ke la legiano eldiru ĉion.

Nun li faras mangeston, kvazaŭ pelante tedan muŝeton, kaj kroĉas la rigardon al la plejrangulo en la Deko:

»Vi parolu!«

La suboficiro elpaŝas, refoje donas honorsaluton, kiun Cezaro serioze, laŭregule reciprokas, kaj komencas:

»Imperato — la tuta armeo pensas —«

»Vi volas diri,« interrompas Cezaro, »la ĉi tie kolektiĝintaj! Feliĉe, tio estas ne la tuta armeo. Tamen daŭrigu! Do, pensas?«

»Pensas, ke tiom ofte estis promesite al ni ĉiuj: nur unu militiro pli, poste venos la triumfo kaj paco — sed ĉiam eksplodis nova milito.«

»Ne mi kulpas,« refoje interrompas Cezaro. »Se dependus nur de mi — mi preferus aranĝi la pacon jam hodiaŭ ol morgaŭ. Nu?«

»Imperato — ni ne plu estas la iamaj. De Bibrakto ĝis Farzalo multaj trupoj estis kvar-kvinfoje renovigataj. Ankaŭ ni ja estas nur homoj — ni ne plu povas tion elteni. Apenaŭ ni iomete refreŝiĝis en Kampanio —«

»Dum unu tuta jaro,« triafoje interrompas Cezaro.

»— denove ni devus iri en Afrikon.« La parolanto intence preteraŭdis la interrompon. »Tra la tuta mondo kuŝas disŝutite niaj ostoj. Do —« li volas ŝultrolevi, sed ĝustatempe rekonsciŝas kaj finas: »Ni ne plu povas.«

Cezaro momenton pripensas. Tiam li diras trankvile, kiel antaŭe:«

»Aliavorte, vi volas **eksiĝi**.«

»Jes!« la centurino kapklinas. Sed el la vicoj ekmuĝas unue timeme, poste pli kaj pli rultondre . . . kaj, fine, la estradon altrafas el sennombraj gorgoj unu sola krio:

»Jes!«

Cezaro lasas la ekscitiĝon estingiĝi. Nun li ekparolas, ankoraŭ ĉiam plene trankvila:

»Nu jes, mi vidas viajn postulojn pravaj. Vere, mi ne plenumis — kvankam tio estas ne mia kulpo — mian vorton, kaj nun devas ĝin elaĉeti. Se vi vere volas ekxiĝi, vi povas tion fari. Rilate la donacojn, kiujn mi promesis al vi, rilate la kampojn, kiujn fakte mi ne promesis, sed tamen intencis al vi asigni, estu senzorgaj. Vi devas pacienci nur, ĝis per novaj trupoj mi finos la militon, aranĝos la triumfon: ĉar en ĝi, kiel ekxiĝintoj, kompreneble, vi ne povos partopreni. Sed tuj post ĝi, vi estos kontentigitaj. Nu, tio estas ĉio. Vi estas, do, ekxiĝitaj — vi . . . civiluloj!«

»Ki —« la buŝo de l' suboficiro, staranta ankoraŭ ĉe la estrado, restas konsternite malfermita. Rigide kaj kvazaŭ fulmotrafite staras la legioj. Dum la mallonga alparolo de Cezaro ili unue ekhontis, poste jam tute konsterniĝis. Sed la vipobato ĉe l' fino ĉiujn dolorege ekskuis. Pum, tion ili ne atendis! Ili esperis, ke Cezaro ilin, siajn kamaradojn, petos — petegos, ke li aĉetos la rekonsenton per novaj promesoj. Ĉu ili ja ne estas liaj militistoj? Preskaŭ parto de li mem, lia glavo, per kiu li subjugis la tutan mondon? Ĉu, vere, li nun forĵetos ilin, kiel senutilan instrumentaĉon? Nu kaj, kio eĉ la plej malbona: ĉu la flavbekuloj, tute ne spertinte, kio estas vera batalo, marŝos en la triumfa procesio? Kaj ili, venkintoj en tiom multaj kaj tiom

teruraj bataloj, ili la elittrupoj, kies plandoj stampis preskaŭ ĉiun piedlarĝon da tero en Hispanio, Italio, Gallio, Britio, Illirio, Grekujo, ili — spaliros en burĝjako kaj rigardos. Tio devas ne okazi! Ne! Tio devas ne okazi!

Murmuro trakuras la vicojn, ekŝvelas, formortas reŝvelas. La ordo malfirmiĝas. Unuopaj elrompas sin el vicoj, alpaŝas la aliajn. Orditaj taĉmentoj transformiĝas en grupojn, grupoj en bulaĵon, en kiuj pasie interflagras konsultiĝoj. Ĉiuj serĉas la elvojon, sed neniu ĝin trovas. Fine la ĉiam plibolanta ekscitiĝo eksplodas en reciprokajn riproĉojn kaj insultojn.

Cezaro restis kelkajn momentojn senmova. Nun li turniĝas kaj preparas sin por forlasi la estradon. Sed nun la amasoj instinkte faras tion, kio sole estas ebla: ili ekondas antaŭen, krias, petas, petegas, levas la manojn:

»Restu! Ne iru!«

Cezaro ŝultrolevas, faras pluan paŝon. Krio disŝvelas en uraganon. Nun lin aliras unu el la akompanantoj kaj mallaŭte parolas. Cezaro respondas same, rifuzante per malŝata gesto la legiojn for de si. Sed tamen li restas.

Eta, pormomenta sukceso! Jam proksimiĝas kurpaŝe el ĉiuj trupoj rapide elektitaj delegitoj. Frunte la plejrangulo el la Deko, ĵus parolinta en la nomo de l' armeo. Kaj kiel antaŭe la imperatoro, tiel nun diras al li la kamaradoj:

»Vi parolu!«

La suboficiro, kvazaŭ kun ostoj en la gorĝo, hezite alpaŝas.

»Imperatoro —«

Tiu ĉi rapide alturniĝas kaj fiere lin okulmezuras.

»Kio ja? Kion vi volas krome? Ĉu ankoraŭ al vi ne sufiĉas?«

»Imperatoro — « la vortoj elpuŝiĝas lame kaj timeme, ni ne pensis tiel — se vi nin bezonas — «

»Ne, mi vin ne bezonas,« senkompatas Cezaro en lian misan elturniĝadon. »Mi havas sufiĉe da trupoj: la Kvinan kaj kvin legiojn da rekrutoj en Italio kaj Sicilio; du en Egiptujo; du en Malgranda Azio; ok en Hispanio; unu jam marŝantan ĉi tien; krome garnizonojn en Illirio, Grekujo, Sirio, Massilio. Do, vi vidas, mi povas min helpi eĉ sen vi. Jes, mi konfesas, ke mi tute ne bedaŭras pri la militistoj, kiuj post tiom longa servo-tempo plene forgesis siajn devojn. Sole mi bedaŭras, ke mi eraris pri la Deko: iam, kiam mi el ĝia mezo elektis mian korpogvardion, mi ne supozis, ke mi ĝisvivos tian tagon.«

El sub la peza kasko de l' plejrangulo gutas ŝvito.

»Imperatoro — doloras al ni, se ni vin afliktis. Tion ni ne volis — kredu, fakte ne volis. Se — se vi konsentas, estu ĉio, kiel antaŭe.«

Sed Cezaro kapbalancas.

»Ne, tio estas tute nenecesa,« senzorge li diras.

»Kulturu vian brasikon kaj flegu viajn ventraĉojn, mi ja mem al mi helpos!« Refoje li mienas por forlasi la estradon.

La plejrangulo faras unu paŝon pli proksimen. Li kunplektas la manojn timigite ilin dismetas kaj reprenas la plej rigidan sintenon. Nur liaj mizeraj, hundfidelaj okuloj petegas.

»Imperatoro!« li rekomencas, la voĉo raŭkas eks-citiĝon, »ni kondukis kiel veraj azenaĉoj. Ne koleru nin! Ni delonge vin ne vidis — kaj ni ne plu scias, kion fari. Jes, ni kondukis skandale, maldanke kaj sen-

honte — sed, kion ni faru sen vi? Ni ja ne scias, kio ni fariĝu, se ni ne plu estos viaj militistoj!«

»Ŝuistoj — tajloroj — ledistoj — kampuloj — kolportistoj de limonado —« post ĉiu vorto li malsupreniras unu ŝtupon.

»Imperatoro, punu nin, kiel ni meritas — sed pardonu al ni! Ni prenas sur nin ĉiun penton. Ni ja ne plu povas rigardi niajn militemblemojn. La dekaanoj vekis vian indignon — dekumu nin. Mi unua metos la kapon sur la ekzekutŝtipon! Sed permesu al ni denove esti viaj militistoj!«

»Kiel mi, komandanto de trupoj, povus puni vin civilulojn?« Nun li plene malsupreniris kaj malafable turnas al ili la dorson. Murmuro inter la militistoj denove ekŝvelas. Civiluloj! Tiu ĉi vorto ilin frenezigas!

Hircio rimarkas larmojn en la okuloj de l' maljuna centuriono kaj ekkompatas la mizerulojn. Tial li duonvoĉas al Cezaro:

»Imperatoro, estu indulgema al ili! Ili estas bovaĉoj — sed, vere, ili ne sciis, kion ili entreprenis. Ne estu tro malmola.

Rigardu nur, kiel mizere ili tie staras!«

Cezaro malrapide turniĝas kaj alrigardas la plej-rangulon. El liaj okuloj fluas larmoj, ruliĝante sur la cikatraj vangoj. Longe la imperatoro rigardas en la malesperajn okulojn de l' maljuna militisto. Nun li diras per ŝanĝita, rigida, malafabla voĉo, montrante la cikatron, kiu tiriĝas de l' maldekstra okulo kaj naziĝis la dekstra buŝangulo;

»Kie vi akiris ĝin?«

Teruro trabrogas al la suboficiro la spinon. Mil diabloj! Tiun komencon li konas. Nun sekvos tia sap-

umado, ke li preferus okupiĝi pri atakantaj galloj aŭ glavsvingaj germanoj. Sed tuj lin trafajras ankaŭ la penso: Cezaro tondras! Cezaro fulmas sur lin! Tio signifas: Cezaro denove konsideras ilin siaj militistoj. Sanceliĝante inter timo kaj entuziasmo, la plejrangulo **blov-abrupte elbuŝigas:**

»En la valo ĉe l' Rejno.«

»Tiel do. Kaj tion ĉi?« la fingroj de Cezaro ludas per medaloj kaj honorĉenoj, dense kovrantaj la brustkirason de l' plejrangulo. »Nu, kaj tion ĉi? Kaj tion ĉi?«

»Ĉe la Sabiso. — En Britio. — Ĉe Alesio.« Apenaŭ li povas respondsekvi. Strabante malsupren al la ordenoj, sed ne ŝanĝante sian sintenon, la militisto elbuŝigas pli kaj pli rapide: »Ĉe Ukselloduno. — Ĉe Dirrahio. — Ĉe Farzalo.« Dum la elnombrado de l' ordisketoj kaj ĉenoj, jen, disvolviĝas ĉiuj militiroj.

Cezaro duonpaŝe retiriĝas, kroĉas la manojn al la koksoj kaj okulfulmas sur lin.

»Eh, ĉarme, tre ĉarme!« li tranĉas, »dekoble ordenita oficiro, de tiel nomata elittrupo, bonvolas sin impliki en tiun aventureton. Ho viro, viro, kion fakte vi pensis? Nenion, kiel kutime, he? Se oni lasas vin solaj nur dum kelkaj tagoj, vi jam elmajstras stultaĵojn! Unu pli grandan ol la alia! Sed, kial vi bezonas ĝuste min kiel komandanton? Iru en Gallion kaj serĉu al vi iun alpan kretenon: li estos inda al vi!« Vort-al-vorte lia voĉo plilaŭtiĝas, nun ĝi tondras super la tuta tendaro. Lia rigardo jam ellasis la centurionon kaj enkaptas lian najbaron, iun *manipul*-estron de la Sesa. Eĉ tra la malhela sunbruno oni rimarkas lian paliĝon.

»Kiel ja staras tiu ĉi homo?« Cezaro eksiblas.  
»Ĉu tiel oni sin tenas enserve? Mi instruos al vi, kion



signifas: esti militistoj! He, mi tanos vin, ĝis sango elŝprucos el sub viaj ungoj! Vi, vi volas ribeli! Nu, atendu!« Lia rigardo ekflugas plue kaj alfuriozas la legiojn, kiuj, jam komence de l' uragano, ordviciĝis. »Kaj tie malsupre?« li krias, »kiel tie aspektas! Ĉu tio estas militista ordo?« Li montras kohorton tiel rekte vicigitan, kvazaŭ oni streĉus antaŭ ĝi ŝnureton. »Jen zigzagoj kaj anguloj, ke la plej kleraj matematikistoj ne povus ilin elkalkuli. Kaj la sinteno — nu, mi ricevas vomsenton! Fi!« Li enspiras aeron. »Nu diru jam, kion tio ĉi prezentas?« Kaj ĉar la respondo mankas, li elblekas sur la malfeliĉan plejrangulon: »mi demandas, kion ja prezentas tiu hordo da negroj?!«

La alparolato glutas por kapti aeron.

»La ok veteranajn legiojn, ho imperatoro,« fine li elballutas.

»La ok veteranajn legiojn?« tondras returne. »La ok veteranajn societojn, vi volis diri! Se vi kunstreĉos ĉiujn fortojn, ĉe entetigoj vi tre ĉarme lametos post kadavroj; por io alia vi ja estas neuzeblaj!« furioze li elspiras la spiron. Sur la frunto jam elŝvelis la konata vertikala sulketo. Per akra, senpersona tono li daŭrigas:

»Ĝis plua ordono ĉiuj trupoj restas en la tendaro malliberigitaj. La plejranguloj de la unuopaj legioj devas ĉiutage al mi prezenti la laborplanon, kiun oni plej rigore plenumos. He, mi elekzerkos el viaj kapoj la aventurojn! Post dekkvar tagoj mi venos por konstati, ĉu vi tamen ekkomprenetis, kio estas la militista disciplino. Tiam ni vidos, kion oni plue faru!« Li abrupte turniĝas, gestas por la ĉevalo kaj sin svingas en la selon. Nerigardante al la fulmofrapitaj legioj, li preparas sin por forlasi la tendaron.

Nun refoje alpaŝas la plejrangulo de la Deko. Per la time petantaj okuloj, kun fajreroj de espero li ekrigardas supren. Cezaro boras en lin sian malmolan glacian rigardon.

»Nu, kio denove?« abrupte li demandas.

»— — kaj —« la centuriono komencas senrilate,  
 » — ni ree estas viaj militistoj? Imp — imperatoro —  
 ĉu ni ree estas viaj militistoj —«

Cezaro lin rigardas. Longe, longe. En la okuloj ankoraŭ fulmas, sed ĉe l' buŝo tremeto. Li ekspronas la ĉevalon.

»Iru al la diablo!« li krudas jam en rajdo.

»Jes ja!«

## Tapso

»La Dekkvara: propraj perdoj tri mortigitoj, tridek unu vunditoj; perdoj de l' malamikoj antaŭ ĝia front-segmento: trimil ducent homoj.«

Gojtreme Hircio voĉas la skribitan raporton de la legia komandanto, notas la ciferojn kaj poste diras: »Ĝis nun la perdo de la malamikoj sumiĝas al preskaŭ dudek mil homoj. Kaj ni ĝis nun havas ne pli ol dudek mortigitojn, kaj, krome, cent dudek kvin vunditojn.«

Li, al kiu la vortoj estas direktataj, ne respondas. Kun sulkita frunto li promenas tien-reen tra la tendo, kroĉante la okulojn al la tero.

Tio daŭras jam kelkajn horojn — de kiam finiĝis la terura buĉado. En profunda silento la imperatoro rerajdis de l' sang-mara batalkampo. Senvorte li saltis el la selo de la ŝvitguta ĉevalo kaj malaperis en la tendo. Nur Hircio rajtis lin akompani internen. De tiam li senĉese promenas tien-reen. Ĉe l' brovoj pendas minaca uragano; kaŝante, preskaŭ tute, la mallumajn okulojn.

La milito finiĝis. El la senat-armeo postrestis nur malmultaj stumpoj, ne plu kapablaj doni kadron por nova militistaro. Al la malamikoj de Cezaro tute ne helpis la interligo kun la *numidoj*, nek la ĉeno de

marfortikaĵoj, kiuj — unu apud la alia — estus devintaj lin fortranĉi de Italio. Same ne efikis la milit-elefantoj kiel ĉefarmilo, nek la prema superforto de l' trupoj, kies tasko estis: forbalai lin kaj liajn legiojn en la maron. La genia majstro de l' strategio logis la tutan gigantan volvaĵon al loko, kie la amasoj ne povis disvolviĝi, sed nur senhelpe interpuŝiĝis kaj premegis unu la alian. Tie li ilin dismartelis, disfrakasis, dispistis, pereigis.

Li? Ne. Tion faris la trupoj mem kaj antaŭ ĉiuj la deka-anoj, kiuj kontraŭ lia volo eldevigis la batalon. Tuj aliĝis ankaŭ la ceteraj, la malnovaj, sangavidaj legioj de la veteranoj, kiujn — kvazaŭ avidemajn ĉashundojn — oni ne plu povis kateni. Ne konsiderante lin, eĉ kontraŭ lia speciala ordono, ili decidis unubate fini ĉion kaj la ĉiam denove kolektiĝantajn malamikojn definitive frakasi. Tiel fine, fine, ili povos ĵeti el la manoj la sangajn glavojn.

Ho, la momento — la momento, kiam li aŭdis la korniston de la Deko eksignali la atakon, kiun li ne — ankoraŭ ne — komandis! Kiam li, ja li! estis devigata postrajdi la kuratakan legion por — antaŭ ol ĝi atingos la malamikojn — ĝustatempe okupi sian postenon: ĉe l' frunto de sia armeo.

De sia armeo! Ĉu tio ja ankoraŭ estas lia armeo? Ĉu la glavo, forĝata en senfinaj militjaroj, nun ne estis pli forta ol li mem? Ĉu ĝi ne elsaltis el lia mano por memstare, laŭplaĉe murdi kaj buĉi? Tion faris ne sole la deka-anoj, kiujn iam li nomis »miaj« deka-anoj: la signalon akceptis la legioj tuj unu post alia. Eĉ unu ne forestis. Ĉiuj, kvazaŭ rabiiginte, ekkuris antaŭen; ekstere ili obeis al la reguloj, kiujn li instruis al ili, sed interne ilin pleniĝis nur unu sola penso,

unu sola sento, ne la lia: Mortigi! Mortigi!

Novaj kurieroj kun raportoj. Hircio rapide ilin akceptas.

»La Dekunua: tri mortigitoj, dudek vunditoj; perdoj de l' malamikoj: trimil okcent homoj. La Kvina: dekdu mortigitoj, sepdek tri vunditoj; perdoj de l' malamikoj: dekunu mil kvin cent homoj.«

Cezaro subite haltas.

»Kiom sume?«

Hircio ekspiras: fine la silento rompita! Rapide li kunkalkulas, tiam ĝoje abruptas: »Niaj perdoj: tridek kvin mortigitoj, ducent okdek vunditoj. Perdoj de l' malamikoj: tridek sep mil mortigitoj.« Esperplene li rigardas Cezaron, klinante sin por venonta demando.

Sed ĝi ne venas. Cezaro, daŭrigante la promenadon, dronas denove en silento. Lian cerbon sagas pensoj.

Tridek kvin mortigitoj en la propra, tridek sep mil en la malamika armeo. Ĉiu morto en la propraj vicoj, elpagita pli ol miloble, pro ĉiu mortvundo oscedas pli ol mil sur la korpoj de l' falintaj kontraŭuloj. Disversigis ĝis nun nevidita sang-torento, kolorante malhelan purpuron en la sablon de l' dezerto — akvofalo da vivenergio, senĉese, senĉese ruliĝas.

Kun senvola gesto Cezaro ĉirkaŭfingras la artikolon de la maldekstra mano. Tremante li sentas la pulsion. Li pensas, ke en tiu ĉi sangtago eble li estas la sola, kiu ne perdis eĉ nur unu guteton da ruĝa fluidaĵo, lia korpo la sola, kiu ne portas eĉ nur unu vundon, lia buŝo la sola, kiun ne taŭzas dolora konvulsio.

Tiom pli profunde li nun perceptas ĉion: en la propra koro li sentas ĉiujn mortdolorojn, kiuj hodiaŭ

disŝiris la koron de sennombraj miloj, li nun aŭdas resonori en si per unu sola terur-krio ĉiujn kriojn, plendveojn, stertorojn. Kaj sub terura respondeco pro tiom amasege oferitaj, por ĉiam estingitaj vivoj, fleksigas liaj ŝultroj, kiuj iam kredis sin sufiĉe fortaj por porti tutan mondon.

Celoj! Planoj! Intencoj! Ĉu li havas ilin ankaŭ hodiaŭ? Ĉu ĉio estas la sama kiel tiam, kiam li ekpaŝis la vojon, nerezisteble lin gvidatan de l' eta komenco ĝis la giganta okazaĵo de l' hodiaŭa tago? Ĉu li ankoraŭ intencas konstrui novan mondon, kiun li iam — kiel junuleto — revis kaj kies realigo sole povus pravigi la detruon de l' malnova? Ĉu li ja ne ekkonis, ke ĉi tiu nova mondo ne apartenas al ĉi tiu tero, ke li ne povos ĝin donaci al aliaj, ĉar ĉiu devas ĝin konstrui en sia propra brusto, kiel ankaŭ li mem faris? Ĉu la neforgeseblaj tagoj en Aleksandrio ne konigis al li la sole veran vivon: la vivon de l' koro?

Kun neesprimebla teruro li sentas, ke la viktimoj de tiu ĉi tago estas senutile oferitaj, ke vane fluis la sango, kiel ja vane fluas ĉiu sango, kiun oni ne verŝas pro l' amo . . . Ke la malamo sole mortigas, detruas kaj nur la amo vivigas, donacas, edifas, transformas...

La tendkurteno levigas: ankoraŭ mankis la batalraporto de la Deko. Nun ĝin alportas centuriono. Malice, triumfe brilas liaj verdaj okuloj de rabobesto. La uniformo estas disŝirita, la dekstra brako pendas en skarpo, dika bandaĝo duone kovras la forte elŝvelintan buŝon. Sible, apenaŭ kompreneble, filtriĝas liaj vortoj trans blu-ruĝaj, pufaj lipoj:

»La Deko: propraj perdoj dekkvin mortigitoj, okdek sep vunditoj; perdoj de la malamikoj: dektri mil mortigitoj.«

Unusalte Cezaro ekstaras antaŭ li, la okuloj large malfermiĝas, la pugnoj leviĝas kvazaŭ por bati aŭ malbeni. El la disŝirita brusto elpuŝiĝas unu sola **krio**:

»Murdistoj!«

## Antaŭ Triumfo

La lastaj vizitantoj forlasas la salonon kaj ĉe elirejo turniĝas por refoje fleksi profunden siajn fierajn, venkitajn nukojn.

Dum montriĝas eĉ nur pinteto de l' krispaj togoj, li konservas la estimplenan, sindetenan pozon, kun kiu li adiaŭis la forirantojn. Sed tuj poste li malrapide turniĝas kaj preter baseno revenas en sian kabineton. Ĉe l' muroj staras avo-bustoj kaj per senvivaj, rigidaj okuloj rigardas la nepon, kiu ilin ĉiujn tiel alte, ja alte, superflugis. La seriozaj, severaj trajtoj de l' venkinto ĉe Acerro kaj la ĝoja, vivĝua miĉeno de lia frato, brilas en la lastaj sunradioj, ŝteligantaj tra kvarangula luko, antaŭ longe ilin ambaŭ mortigis frenezado de l' maljuniĝinta Mario. La laca, malsaneca vizaĝo de l' patro staras en la plej profunda ombro.

Cezaro haltas por momento. Ho, ofte li pensis pri la horo, kiam fine estos rompita la lasta rezisto, kiam li fariĝos la Mastro. Jes, ofte li pensis pri tiu ĉi horo, kiun nun li travivas: dum solecaj labornoktoj, meze de l' popol-, senat-kunvenoj, en la tendaroj tra la duono de l' terglobo. Jen, la horo estas ĉi tie — sed li ne trovas ĝin alia ol estis tiuj sennombraj ceteraj. Nur la impulso, kiu dum la tuta vivo kirlis lin



antaŭen, sentiĝas nun pli forte. Krome, venas ankaŭ tiu timiga sento: ke li ne havas tempon, ke li devas labori ĝis elĉerpiĝo por plenumi, minimume, parteton el tio, pro kio la duonon de sia vivo li pasigis sur la batalkampoj.

Li ekpaŝas pli rapide: ĉiu horo, dediĉata al superflua ripozo, estas perdita por ĉiam.

En la kabineto krepuskas. Li ordonas alporti lampojn kaj sidiĝas al la skribotablo. Spirite li estas jam alcentrigita, li profundigis en iu el la sennombraj aktofaskegoj, kiuj ĉie-ĉie kuŝas sur la polurita tabloplato.

Paŝoj de eniranta sklavo, kvankam tute senbrujaj, igas lin levi la rigardon.

»Ĉu li estas ĉi tie?« li demandas. Kaj, kiam la servisto kapjesas, li pluas: »Oni alkonduku lin.«

La sklavo tuj ekspedas sin. Cezaro apogas sin aldorse, kroĉante la rigardon al la delikate ekstremanta kurteno.

Proksimiĝas mallaŭta, pli kaj pli forta tintetado. Akompanas ĝin taktaj paŝoj. La kurteno leviĝas, eniras du legianoj kaj ekpostenas dekstre-maldekstre de la pordo. En la ĉambro pezpaŝe venas viro alta, largŝultra, kun ŝtal-katenoj sur la manoj. Post li denove du legianoj, kiuj tuj prenas lin inter sin. Fine suboficiro. Rigide ekpozante, mallonge, militiste li raportas:

»La ordono plenumita«

Cezaro alrigardas la kateniton, starantan antaŭ li kun malluma, senmova mieno. La densa, kaŝtan-kolora hararo estas kombita malantaŭen, la delikate maldikan buŝon superarkas longaj, pendantaj lipharoj, la mentono kaj vangoj estas zorge razitaj: nu, oni jam pretigis lin por la morgaŭa triumfo. Sajne, tion

kredigas ankaŭ la vesto, ekipo de l' galla eminentulo kaj la maldikaj, malpezaj katenoj, kiujn li portas nun anstataŭ la pezegaj ĉenoj de militkaptitoj.

Ne fortunante la rigardon, Cezaro ordonas:

»Deprenu la katenojn.«

La centuriono paŝas al la kaptito kaj kun iom da peno malfermas la manringojn. La brakoj de l' kaptito ekpendas senvive, kvazaŭ ili tute ne apartenus al li. Cezaro daŭrigas:

»Lasu nin solaj.«

La centuriono senmove ekpozas, salutas kaj donvoĉas komandon: la militistoj forlasas la ĉambron. Dum momento oni povas reaŭdi mallaŭtan tintetadon kaj taktajn paŝojn. Subite ĉio ĉesas: ili haltis en la vestiblo kaj atendas por esti tuj ĉemane, se la imperatoro ilin bezonos.

Cezaro ankoraŭ silentas. Lia rigardo vagas. Unue sur la fortika, sed nun terure malgrasiĝinta korpo, staranta antaŭ li. Poste sur la fiera, delikate ĉizita vizago, similanta pro rigideco cindro-koloran maskon. Sed la okuloj sub la densaj brovoj — brulas.

Fine Cezaro ekparolas.

»Ja, antaŭ longe estis, kiam ni lastafoje nin vidis,« li diras en perfekta galla lingvo, ellernita dum sep jaroj en la transalpa Gallio. La kaptito levas la kapon, sed ne respondas.

»Ĉe Alesio tio estis, mi pensas,« Cezaro daŭrigas.

La kapo de l' kaptito jam velkis sur la bruston. Longa silento. Nun denove eksonas la voĉo de Cezaro. Trankvile, eĉ afable:

»Ĉu vi ne volas respondi, ho Vercingetorikso?«

La ardo de l' mallumaj okuloj ekradius en la

imperatoron: »Kion mi respondu al vi?« diras la gallo pezlange. »Ĉu mi refoje jesu, ke vi venkis? Nu jes, tio estis ĉe Alesio.«

»Ej, ne tiel, Vercingetorikso,« riproĉetas Cezaro trankvile. »Se mi volus nur tion de vi, estus multe pli simple paroli kun vi morgaŭ ĉe la triumfo, antaŭ ol oni ekiros. Sed pro aparta motivo mi venigis vin ĉi tien.« Jam voĉŝanĝe, priafero: »Mi havas ion por priparoli kun vi.«

En la senmova vizaĝo eklumetas kvazaŭ miro.

»Vi kun mi?« Vercingetorikso trene demandas. Lia vizaĝo denove surprenas rigidan maskon. »Parolu, mi aŭskultas.«

Cezaro ankoraŭ ĉiam lin rigardas kaj frapetas sur la maldekstra manplato per grifelo, prenita de sur la tablo. Ŝajne, li pripensas. Nun li ĵetas la grifelon sur la tablon, metas ambaŭ manojn sur la brak-apogilojn de seĝo kaj intence entrancas per seka voĉo:

»Nu, Vercingetorikso, jam kvin jarojn vi estas en kaptiteco kaj apenaŭ scias, kio okazis dum tiu ĉi tempo. Tial mi diros al vi mallonge: Gallio estas definitive venkita kaj tute malkapabla por nova kontraŭstaro. Sed, se eĉ oni provus tion, via liberec-partio havus nun malpli da ŝancoj ol antaŭe, ĉar tiujn kvin jarojn mi uzis por firmigi mian povon. La ekribelinta Gallio hodiaŭ renkontus ne dekdu-dektri legiojn, sed kvindek-sesdek. Hodiaŭ mi regas en Romo kaj mi ankaŭ scipovos eluzi tiun povon.« La lastan frazon li elparolas iom altvoĉe, substrekante ĉiun vorton per frapetoj de l' manplato sur la brakapogilon. Elekstere, el la vestiblo, eksonoras mallaŭta tintetado: ĉu pruve al la vortoj de Cezaro?!

Vercingetorikso redonas la rigardon senŝange. En la cindra masko, kiu rigidiĝis tragike — groteske, ne tremas eĉ unu muskoleto. Cezaro nun daŭrigas same trankvile, kiel ĉe l' komenco:

»Estas ja kompreneble, ke la lando, en kiu dum ok jaroj furiozis tiel terura milito, suferas profundajn vundojn. Do, estis unu el miaj unuaj taskoj: pripensi, kiel sanigi ilin. Mi kredas, ke mi jam multe sukcesis: la kampoj gravedas novajn semojn, la forbruligitaj urboj grandparte estas rekonstruitaj, la vojreto rearranĝita, dum regula komercado prizorgas la necesajojn — nu, mallonge: Gallio estas sur la plej bona vojo por cikatrigi la vundojn de l' teruraj jaroj.« Li apogas sin aldorse, ektusetas kaj prenas gluton el la miel-akvo, staranta sur la tablo. Jam plue:

»Sed ĉio ĉi estas nur komenco. Mi ne povas lasi Gallion, kia ĝi estas nun, al si mem. Tiun grandan landon oni devas fandi en perfektan unuecon, kiu povos, sen interfrotiĝo, adaptiĝi en la grandan ŝtatorganismon.« La lastajn vortojn denove akompanas forta frapeto de l' manplatoj sur la brakapogilojn.

»Nu, por efektiviĝi tiun planon, mi bezonas virtojn, kiuj konas la landon. Ia pretoro, reganta per administraj artifikoj la landon en pereon« (samtempe riĉigante sin, li aldonas al si mem) — »min tute ne helpus. Mi devas tien sendi homojn, kiuj havos varman koron por sia tasko, homojn, kiuj bone konas la loĝantaron kaj, antaŭ ĉio, homojn, al kiuj la popolo plene konfidus. Sed tiaj homoj estas tre malmultaj. Kiom da ili estis, tiuj falis aŭ —« momenton li rememoras Titon Labienon, kiu batalas ie en Hispanio kun la lasta resto de la pompejanoj — »entute ne povas esti konsiderataj.« Malmolaj, vertikalaj sulketoj elsaltas

sur lia laborplugita vizaĝo, sed tuj malaperas. Hela, preskaŭ infana rideto moligas — por momento — lian vizaĝon knabe juna. Li ĵetas la rigardon transen al la senmova gallo.

»He, ĉu vi scias, kial mi rakontas al vi ĉion ĉi?« li demandas.

La profunde enkavaj okuloj de l' kaptito gluiĝas sur lin. Cezaro leviĝas, rapide, elaste kaj alpaŝas pli proksimen. »Sufiĉe jam da ĉirkaŭfrazoj, ho Vercingetorikso,« li diras. »Mi vin ekkonis kaj nun alte taksas.« Lia rigardo leviĝas laŭ la elstara figuro. »Vi estas vera homo. Ĉu vi volas preni la oficon, pri kiu ĵus mi parolis?«

La okuloj de Vercingetorikso rigidiĝas. Sed Cezaro ne lasas al li tempon por pripenso.

»Kompreneble ja,« li daŭrigas, kiel ĝis nun, per intence priafera tono: »mi devus al vi aldoni roman oficiston. La senato devas pro mi multon gluti — refoje lian vizaĝon tuŝas tiu junuleta rideto — sed tamen ne ĉion. KREDU, mi scius aranĝi, ke neniu povus grumbli en vian laboron: vi estus al mi, jes nur al mi, submetita kaj priresponda. Kaj, ke mi, profunde konante Gallion, ĉiam decidus laŭ via opinio, pri tio, sendube, vi estas konvinkita.«

Li repaŝas. Liaj esploraj okuloj provas legi en tiuj de l' gallo, penetri la vualon, falintan super ili.

»En viaj manoj, ho Vercingetorikso, kuŝas nun la decido pri via plua estonteco,« li finas kun senpersona trankvilo, kaŝanta lian internan streĉiĝon. »Mi igis depreni viajn katenojn; nur vorteto — kaj ili ne plu estos surmetitaj; nur vorteto — kaj morgaŭ, marŝante en la triumfa procesio, vi estos ne inter la kaptitoj, sed inter la amikoj de Cezaro. En mia hejmo jam pretas

ĉambro por vin akcepti, same kiel mia koro — « nun io ekvarmas en la glacia voĉo — »estas preta forgesi ĉion pasintan kaj vidi en vi nur tion, kio estas bona. Jes, vidi nur la brilajn kapablojn de via spirito kaj koro — kaj la komunan laboron, kiu nin interligus por la bono de l' lando, amata de ni ambaŭ. — Do, parolu, ho Vercingetorikso!« Li palpas post si al la apogseĝo por rezidiĝi.

»Ne!« kvazaŭ pafite el ŝtonjetilo, alflugas lin la vorto.

Li levas la rigardon. La okuloj de l' gallo larĝe malfermiĝis, el ili flagras potenca brustofajro. La fortaj maĉmuskoloj tremas kaj la delikataj lipoj konvulsias, kvazaŭ pistante neaŭdeblajn vortojn.

Nepenetrebla masko nun surkovras la vizaĝon de Cezaro. Trankvile li altiras la apogseĝon kaj falsidiĝas en ĝi.

»Do, ne,« mallaŭte li diras. »Ĉu mi povas scii la motivon?« Sed, ĉar li ne tuj ricevas respondon, li senpacienca per tono de granda sinjoro: »Nu?«

La korpon de Vercingetorikso skuas subpremata furiozo. La palpebroj tremas. La lipoj balbute elpuŝas silabojn, vortojn:

»Vi kuraĝas de mi — de mi, kiu gvidis kontraŭ vin la tutan Gallion de mi, kiu estis lasta espero de la mizera, perfidita popolo — jes, vi kuraĝas de mi postuli la manon por plena sklavigo de tiu ĉi popolo? Kaj vi eĉ nur dum momento esperis, ke mi konsentos? Neniam! Ĉu vi aŭdas? Neniam! Vi povas min kateni, vi povas min ĵeti en karceron tiel teruran, ke oni similan ne trovos en la tuta Gallio, vi povas min morgaŭ konduki en via triumfa procesio kiel oferotan beston, jes, ĉion ĉi vi povas! Sed, neniam vi sukcesos altiri

min al io tiel senhonta, malmorala, al io tiel aĉa kaj senhonora: al mia kunlaboro en via verko!«

Li silentiĝas. Boras la ungojn en la manplatojn. Treme elpuŝiĝas astme kunpremitaj spiroj el la larĝa brusto.

Cezaro lin lasas, seninterrompe, satparoli. Oni povus preskaŭ kredi, ke li tute ne aŭskultas. Nun li diras malrapide, trankvile, kiel ĉiam antaŭe:

»Malmolaj estas la vortoj, ho Vercingetorikso, kiujn vi eldiris. La kolero faris vin maljusta.«

»Maljusta, ĉu?!« La gallo moke ekridas tra l' knarantaj dentoj. »Kvazaŭ ja estus eble, esti maljusta kontraŭ la rabisto de l' galla libereco!«

Cezaro preteraŭdas la ofendon.

»La historio de Gallio montras,« li diras kun neŝanĝita trankvilo, »el kio konsistis la galla libereco: arvernoj atakis eduojn, ĉi tiuj sekvanojn, kaj fine ĉiu gallo uzurpis al si rajton mortigi ĉiun alian gallon. Se vi tion nomas galla libereco, — jes vere, tiun mi senkompatate ekstermis.«

»Sed, sub mia gvido unuiĝis la tuta galla nacio!«

»Jes. Sed, se la sorto estus donacinta la venkon al vi, post jarduono vi estus ekdentintaj unu la alian ĉe l' gorgo, kvazaŭ rabiaj hundoj.«

»Tio estis bataloj por la supereco en Gallio, kiuj vin, la romanon, tute ne koncernis.«

»Hu, vi pensas?« En la voĉo de Cezaro ekvibras ironio. »Vi havas malbonan memoron, ho Vercingetorikso; alie vi devus scii, ke la eduoj invitis min en la landon, post kiam la sekvanoj helpovokis Arioviston.«

»Sed, post kiam vi venkis Arioviston, vi restis en la lando!«

»Jes! Nu, kion vi ja imagis, ke mi faros?« Ce-

zaro mishumore ĵetas sur la tablon la grifelon, per kiu li denove ekludis. »Eh, vi estas nebonigeblaj fantaziuloj, vi galloj! En Gallio kaj por Gallio fluis romia sango, ĉu vi komprenas? Do, ĉu vi pensis, ke mi retiriĝos kun la kolektiva danko de l' momente interpaciĝinta galla nacio? Nur kontenta, ke mi plenumis bonan agon?!« Vigle li saltas kaj, laŭkutime, promenetas tien-reen. Subite li haltas antaŭ Vercingetorikso kaj daŭrigas, volante konvinki: »Ho Vercingetorikso, estu prudenta! Traktu unufoje la aferojn seniluzie, sobre, kalkuleme, preskaŭ mi dirus: komerciste. Kiam vi petis de mi helpon kontraŭ la germanoj, al vi devis esti klare, ke vi faris ĉe mi ŝuldon. Kiel, do, vi povis miri, kiam mi prezentis al vi pag-maturan kvitancon? Kaj, ke mi — lian vizagon varmigis malforta rideto — »pro manko de elpago, prenis la enmanan garantiaĵon?«

»Mutigu!« la gallo pugne ekminacas sub la nazo de Cezaro. »Kiel vi povas paroli pri la senrajtigita nacio, kvazaŭ ĝi estas varo?«

Cezaro tute ne timas la minacan geston.

»Eh, tiel!« li diras tranĉe. »Vi volis diri, ke mi senrajtigis la gallan popolon? Kaj vi, sinjoregoj, kiuj ekspluatadis kaj prirabadis la landon? Por kiuj tri kvaronoj de la loĝantaro sang-kale servutadis nur, por ke vi ĝuu komfortan nenifaradon? Mi la popolon ne senrajtigis, mi ĝin liberigis! La haladzan marĉon de via duonkulturaĉo mi freŝe aerumis, ĉar jam minacis la danĝero, ke la galla popolo sufokiĝos! Sed, ke mi radikale agis, ke la tuta galla nacio post unu jarcento estos asimilita de l' granda romia nacio, pri tio kulpas nur vi, sinjoregoj! Jes, nur vi, kun via fierego, vantemo kaj kun via nebridebla reg-avido, suferu al la tuto!«

Li parolis ĝis vera koleriĝo. Nun li kuras tien-



reen, per mallongaj, abruptaj paŝoj, krucinte la manojn surdorse, kaj tute ne rigardante la senmovan gallon.

Tiu ĉi atendas; la ardo en liaj okuloj estingiĝas, sub la densaj brovoj liaj pupiloj rigide boriĝas antaŭen.

Post iom da tempo, ĉar Cezaro ankoraŭ silentas, Vercingetorikso demandas malhele, raŭke:

»Ĉu, krome, io por mi?«

Cezaro haltas.

»Ne,« iom malestime li respondas. »Mi havas nenion plian por diri al vi. Ni du — jam finis.« Li iras al la kurteno. Kun la mano jam en la faldoj de l' ŝtofaĵo, li haltas. »Sed tamen, nur tion ĉi: la reĝo de l' atrebatoj kontraktis kun mi pacon. Vere, li ankoraŭ malafabletas, sed tio por mi ne gravas, se li nur plenumos la pacon. Kion vi farus, se post la triumfo mi lasus vin en Gallion kiel liberan homon?«

En la okuloj de Vercingetorikso refoje ekardas flamo de fanatikeco.

»Mi ne ripozus,« krie li pasias, »ĝis la tuta Gallio, de l' belgoj ĝis la allobrogoj denove levus la armilojn kontraŭ vin!«

Kun energia gesto Cezaro fortiras la kurtenon.

»Gvardio!«

Kaj, turniĝinte al la kaptito, dum la tintado de l' proksimiĝanta taĉmento, li diras malmole, seke:

»Do, morgaŭ vi mortos!«

## „Io Triumphe!“

Triumfu, ho Cezaro!

Viaj malamikoj kuŝas subpiede, renversis ilin via potenco pugno. Dum dekdu jaroj da superhomaj bataloj vi frakasis militistaron post militistaro, konkeris urbon post urbo, venkis kontraŭulon post kontraŭulo. Tra tri kontinentoj portis vin via ĉevalo. De l' ekstremaj okcidentaj limoj ĝis la varmaj bordoj de la Nilo. De l' ruliĝantaj ondoj de l' Rejno ĝis la numidaj dezertoj. Super ili ĉiuj ŝvebis la agloj de viaj legioj, tondris fanfaroj de viaj venkoj. Nun vi estas mastroj la ĉiopova, arbitra mastro, kies ordonojn plenumas la tuta terrondo. Triumfu do, ho Cezaro!

Sur la vojo, kiun sanktigis la tradicio de l' pravaĵoj, rule ondas netrarigardebla amaso. Ĝia frunto jam atingis Kapitolon, sed la vosto ankoraŭ ne surpaŝis la komencon de l' Sankta Ŝoseo. Oro kaj juveloj fajreras sur sennombraj valoregaj militakiraĵoj. Malrapide balanciĝas la statuoj de riverdioj super la kapoj de portantoj. Flamas koloroj de batalbildoj. Blindige brilas la vergofaskaj hakiloj de sepdek du *liktoroj*, paŝantaj antaŭ la triumfanto. Nervoze dancas kvar purrasaj, neĝblankaj ĉevaloj, tirante lian triumfan ĉaron. Premvice, dekseŝope sekvas la bronza serpento de la nevenkeblaj legioj, okupante preskaŭ la tutan larĝon de l'

ŝoseo. Ili partoprenis la militirojn de Cezaro, ili elluktis liajn batalojn, ili gajnis liajn venkojn. Jen, frunte la Deko, voste la Dek-kvara: cikatro-strekitaj, sunbrunaj vizaĝoj, sovaĝe ardaĵ okuloj, la brustoj kovritaj per ordenoj, la kaskoj ornamitaj per riĉfoliaj kverkoj aŭ eĉ oraj girlandetoj. Dekstre-maldekstre spaliras grandegaj amasoj da rigardantoj: la tuta loĝantaro de l' miliona urbo en nekomparebla ekstazo festas la triumfan tagon.

Nur la vizaĝo de Cezaro estas serioza, indiferenta inter la milionoj de la aliaj, radiantaj la brilon de tiu ĉi tago. La iam klara rigardo de liaj grizaj okuloj trankvile antaŭvidis jam de jaroj en la konfuzego la ebriion de ĉi tiu festo. Sed nun vualite kaj lacete ili rigardas en la lumfajrerojn, kolorbrilon, flirtadon de tuko. De tempo al tempo li turnas la kapon jen al tiu, jen al alia flanko. Tra la breĉoj de l' moviĝemaj muroj de dudek elefantoj, flankantaj lian ĉaron, li rigardas en multajn, multajn okulparojn, kies brilo lin salutas. Tamen liaj okuloj senatente preterglitas. Senmova estas lia buŝo; ne kunpremita, ne lipmorda, sed ankaŭ ne malfermita. Ŝajne, fremdulo seninterese, senkomprene observas gajan tumulton, kiu lin tute ne rilatas.

Li ne sentas la ĝojon de l' festo, same kiel li ne sentis tagon antaŭe, en la momento de la gajnita venko. La finfina plenumiĝo estingis en li ĉiun senton pri l' feliĉo. La ebrio de l' amasoj estas tiel granda, ĉar al ili ĉio venis tute neatendite. Sed al li mem postrestis nur la lacego de homo plenuminta sian taglaboron.

Oro — juveloj — brilo — koloroj — variaj tapiŝoj, pendantaj de balkonoj kaj fenestroj — floroj, kovrantaj en senĉesa pluvo la teron antaŭ la piedoj de lia ĉevalo, ke la hufoj dronas — senpaŭzaj ĝojak-

lamoj de amasoj — tondraj triumf-kantoj de legioj — ĉio ĉi estas neordinare multekosta, neordinare luksa kadro de la bildo — kiu mankas. Li donis sin al la brila ceremonio de l' venko, kiel al »reprezenta« devo. Ĝi devis esti plenumata, ĉar ĝin atendis ĉiuj, ĉar tiu revuo de l' grandioza pompo efikas, el-ekstere, en la amasoj obeemon al la regado de l' mondmastro. Sed, en sia memo, li staras malproksime de ĉio ĉi, same kiel malproksime li staris, kiam li batalis ĉe la bordo de l' Tameso kontraŭ la britaj barbaroj, aŭ kiam en la reĝpalaco de Aleksandrio li klinis sian brulpensan kapon en la malvarman sinon de Kleopatra.

La ekpenso pri la malproksima amatino forviŝas, por kelkaj momentoj, la rigidon el liaj senmovaj trajtoj. Antaŭ li reviviĝas la sanktaj horoj inter rozoj kaj purpuraj kurtenoj en la reĝa barko sur la Nilo, la brulaj noktoj, en kiuj ili du flame disflagris kaj unu-igse interfandiĝis. Eble li ĝuus la ĝojon kaj plezuron de l' triumfo, se nun ŝi estus kun li, se li povus kun ŝi dividi la senton pri la fina venko. Sed, jene, la melankolio de sopiro maldolĉigas ĉiujn aliajn sentojn. Jam duoble klare kaj dolore lin ekpremas la senlima soleco, kiu estas lia sorto.

Ĉar soleca, terure soleca li estas — malgraŭ la adoraj, alkroĉitaj rigardoj de Hircio, de Pollio, de Antonio, kunmarŝantaj en la procesio. Jes, malgraŭ la pasia sindono de ĉiu unuopa legiano, malgraŭ la senfinaj ovacioj de l' amasoj — malgraŭ la spirite fremda edzino, hejme atendanta lian revenon. Soleca, kiel li ĉiam estis — escepte tiujn kelkajn monatojn, kiuj senrevene pasis for...

For? Ne: ankoraŭ vivas en li io el ili; io, kio ne povas estingiĝi. Tio estas ne nur rememoro, ne nur

pensoj pri l' ĝuita feliĉo, ne, ne, postrestis: io neesprimbla. Siriĝinte de l' forĝutinta okazaĵo, nun tio vivas sian propran, senmortan vivon, donante al la lia valoron kaj celon, levante ĝin super ĉion personan, homan. Li profundigis en la sento, en la kono, kiu unuafoje iĝis al li klara, kiam li rajdis de Pelusio al Aleksandrio — kaj antaŭ li jam reviviĝas tio, kion li ĝuis en la brakumo de Kleopatra. Jen tiu plej profunda interligo kun ĉio ekzistanta, kiu faris lin frato al ŝtono, planto, besto, homo, jen tiu absoluta unueco kun la universo. Kaj ĝuste nun la procesio haltas.

Skuita el la profunda medito, li palpe revenas en la nuntempon: oni kondukas la kaptitojn el la procesio, kies ornamo ili estis, por transdoni ilin alla terura fatalo. Lia rigardo travagas sur Arsinoa, la malamika fratino de Kleopatra, sur la gigantaj, karcerpalaj staturoj de l' germanaj, britaj, gallaj, hispanaj ĉefoj, sur la malhelaj vizaĝoj de l' egiptaj nobeloj, numidaj kavaleriestroj — kaj fine kroĉiĝas al la nobla kapo de Vercingetorikso.

La trajtoj de la juna reĝo de l' arvenoj perdis la spiton, kiu hieraŭ ilin malmoligis. Kun senlima majesto lia rigardo preterglitas la ondantan amason — la venkito ĉe Alesio, la venkinto ĉe Gergovio, okulas en la nekonatan malproksimon. Tiel potenca, tiel grandioza estas tiu rigardo, ke la gardantoj ĉirkaŭ li similas al eskortaj servistoj, ke la ekzekutisto, tuj apud li, ŝajne atendas liajn ordonojn. Oni dirus: jen la glorato de l' triumfo, ne ĝia viktimo.

Cezaro ne povas forŝiri la rigardon de tiu ĉi, kvazaŭ reviviĝinta, vizaĝo. La ĉirkaŭantoj atendas lian okulmovon por ekirigi la ĉaron, sed li restas senmova. Plej kortuŝite li rigardas la reĝon de l' arvernoj kaj

sentas, ke en la tuta giganta amaso eĉ unu homo ne estas al li tiel proksima, kiel tiu lia plej granda kontraŭulo.

El la fundo de l' animo li deziras, ke Vercingetorikso lin komprenu, reciproku lian rigardon. Malgraŭ ĉio li tuj forlasus la triumfan ĉaron, propramane malfermus la katenojn, kaj brakumante la neflekseblan, rektan nukon kun frata kiso altirus al si tiun fieran, reĝan homon.

Sed la rigardo de tiu alia ne renkontas la lian. Vercingetorikso rigardas preter kaj trans lin en malproksimon. En la grandaj, larĝe malfermitaj okuloj, hieraŭ ardantaj, hodiaŭ briletas radio, ne plu de tiu ĉi mondo. La reĝo de l' arvernoj venkis ĉiujn, eĉ Cezaron mem — ĉar, jen, li venkis la vivon. Kiu rigardas en tiun ĉi vizaĝon, scias: Vercingetorikso sopiras la morton, atendantan lin en la venonta horo, kiel fianĉo sopiras la amatan fianĉinon. Goje li sin ĵetos en tiun morton ĉirkaŭprenante ĝin per siaj fortegaj brakoj, kiuj iam tiel furioze skuis la potencon de Cezaro. Jes, korflame li transdonos sin tutan: ĉar por li tiu ĉi morto estas nur pordo, gvidanta al la eterna libereco.

Glacia mano kaptas Cezaron ĉe l' koro. Moleco kaj helo malaperas. Jam revenas sobra ekkono, laco kaj, kun ili, senkonsola sento pri la senlima soleco, kiun por momento forpelis la rememoro pri Kleopatra kaj la revido de Vercingetorikso.

Per la lasta, longa rigardo, kvazaŭ adiaŭante, li ĉirkaŭprenas la altan figuron de l' galla heroo. Malrapida, velkinta gesto — la procesio ekpluas.

## Ekkono

Kaj nun — ek al laboro!

La vojo estas libera, ĉiu kontraŭstaro rompita, kaj ĉie, lim-interne de l' romia imperio, oni atendas nur la ordonojn de Cezaro. Glave li traplugis tiun senfinan kampon kaj sange ĝin sterkis. La grundo estas preparita — ĝi atendas semojn.

Sed la semanto hezitas.

Kial? Ĉu li ion forgesis? Ĉu ankoraŭ io devas okazi antaŭ ol la granda kreado komenciĝos? Ĉu la direktisto de ĉiuj homaj sortoj trovas la tempon nematura? Sed, ĉu li ja mem ne diris, ke estas perdita ĉiu tago, kiu prokrastas komencon de agado, ke li havas nenian sopiron ol fine, fine, komenci la kreadon? Kaj nun tamen li hezitas?

Ripete ekŝajnis, ke li volas komenci. Tiel, ekzemple, kiam li venigis en Romon egiptajn astrologojn por reformi la kalendaron. Tiel, kiam li publikigis grandan dekreton pri la italaj komunumoj, en kiu oni ordigas ĝisdetale la burĝan vivon sur la apennina duoninsulo. Tiel, kiam li levis nedetruieblan digon kontraŭ la nesatigebla monavido de uzuristoj. Tiel, kiam li likvidis la longtempan malfeliĉon de l' ŝtatpensiuloj, la sekretajn klubojn, la regadon de l' grandurba popolo. Tiel, kiam li loĝigis okdek mil siajn veteranojn

en Gallio por kolonii kaj romanigi la landon. Tiel, kiam li donacis al sia kara Transpadio plenan romian civitanecon. Tiel, kiam el ĉiuj provincoj li vokis en la senaton la plej eminentajn, la plej indajn virojn, formante el tiu korporacio veran reprezentantaron de la ŝtato. Tiel en sennombraj grandaj kaj malgrandaj reformoj, kiuj inundis la tutan imperion, fortorentante ĉion malnoviĝintan, anakronisman kaj revivigante, fruktigante ĉion novan, espervekan.

Sed la vivo restis tia, kia ĝi estis, ĝi ruliĝas tra la malnova fluujo. Eble pli sekura, pli firmigita ol antaŭe, sed esence sama: ŝanĝiĝis nek doloroj, nek ĝojoj. La tempesto de l' nova tempo kiu devus ĉion fari alia, mankas; la granda alivalorigo de ĉiuj valoraĵoj ne venis.

Li, kiu devus tion plenumi, al kiu tio iam estis la vivcelo, ekkonis tion pli klare ol ĉiuj aliaj. Dum semajnoj, en la plej profunda soleco, en kiu neniu rajtas lin ĝeni, en multegaj sendormaj noktoj, li serĉas tion, kio de li forglitis. Li klopodas trovi la ŝlosilon, la sorĉvorton, per kiu li malfermos la trezorojn, kaŝatajn dum longaj jardekoj en sia plejprofundo. Kaj li scias, ke tio estas malebla: tio, kion li sentis neperdebla propraĵo, forpasis por ĉiam.

Kaj nun, kiam ĉio dependas nur de lia volo, minace aperas la demando, kiun tra la lastaj jaroj li starigadis al si ĝis teso: kion fakte li volas?

Fari ordon, iam li diris al la maljuna Sullo. Antaŭ liaj okuloj tiam ŝvebis ordo, la definitiva ordo, kiu forviŝus eĉ la lastajn postsignojn de kaoso, dissolvante ilin en la kosmo, en la lasta Harmonio. Novan mondon li volis krei, tiun idealan mondon, kiun havis antaŭ la okuloj la senmortaj dioj, kiam ili kreadis tiun



ĉi malperfektan mondon. Li volis leviĝi super ĉio hazarda por elarangi tion, kio ankoraŭ ĝermis kaj rondflirtis, por kolekti tion, kio ankoraŭ estis disŝutita kaj malamika. Li volis elmasoni konstruaĵon, kies ŝtonoj fragmente kuŝis sur la profanita, de li konsekrota grundo.

Kaj nun li ekkonis, ke li volis ion maleblan, ke la Malperfekto, Impulsoj kaj Batalo estas fundamentaj leĝoj de l' mondo: sen ili ĉiu vivo rigidiĝus. Do, la semoj ne povis elburĝoni, ĉar li tenas en la manoj lon; li ne kreadus, sed detruus, li ne donus vivon, sed — morton.

Kaj plue li ekkonis: ke al la homoj estas malamiko ĉiu, kiu forrabas ilian memon; ke ĝuste al la plej noblaj el ili, ĉiu devigo, eĉ se ĝi ŝajnus utilega, estus fakte plej terura torturado; ke la realigo de lia verko ekstermus el la mondo tion, kio, sole, ĝin vivtenas: la liberecon.

Kaj fine li ekkonis, tion, kion en la brakoj de Kleopatra li nur antaŭsentis. Tion, kion unuafoje li klare vidis en la sangtago de Tapso. Li ekkonis per sobra, pripensema racio, kiun ne konfuzas distingo inter vero kaj falso: ke ne ekzistas tia ordono, tia edikto, tia — eĉ se plej forta — volmonro, kiu helpus al la homaro leviĝi kaj puriĝi. Ke entute ne ekzistas homaro, nek komuna ideo, ke fakte nur unuopulo vivas; kaj estas nur: mi — vi. Sed ankaŭ al la unuopulo oni ne povas helpi, se li ne helpas al si mem.

Ĉar, se li povus eĉ disŝiri sian koron kaj al ĉiuj, ĉiuj, montri la mondon, ene konstruitan, kiu havas nenion komunan kun tiu ĉi tera — eĉ se li tion povus: la infanoj de tiu ĉi mondo, absorbitaj en la vivo de siaj sentorganoj, rigardus lin per okuloj nevidantaj,

aŭskultus per oreloj neaŭdantaj. Ili priridus tiun fantaziulon, revanton, kaj eĉ la iometon da bono, kiun li povus al ili proponi, ili forpuŝus. Lia ofero estus senfrukta kaj li mortus kun la konvinko, ke li vivis vane.

Tial li devas silenti, kvankam li konas la savon. Sennombraj vojoj gvidas al ĝi, sed ĉiu homo devas mem trovi la propran: li povas nenion alian ol nur flegi, nur milde balzami la puvundojn, ĉie faŭkantaĵojn. Li povas plifaciligi nur la eksteran vivon esperante, ke dum la paco de l' ĉiutago li vekos en kelkaj noblaj koroj tiun pli altan vivon. Ne gvidi, sed nur montri la direkton. Ne pretigi la ŝoseon, sed nur forŝovi barojn, malhelpantajn sur la vojeto.

Kaj senti, ke li — nur li sola — atingis la celon.

## Du viroj

Ekvibras sono de tamtamo. La sekretario en vestiblo ekatentas kaj rapidas en la kabineton, svingante longan, longan aŭdienc-liston.

Senpacienca, nervoza mano kaptas ĝin kaj la okuloj flugas tra la kolonoj.

»Cicerono,« li diras lace, elturmentite.

La sekretario elrapidas kaj enkondukas la maljuniĝintan konsulon. Sub neĝeblanka hararo, el la ronda, sanruĝa vizaĝo brilas ruzaj okuloj. Ĝueme arkiĝas la buŝo, kvankam nun ĝin taŭzas mishumoro.

La tro ĝentilan saluton de l' vizitanto Cezaro reciprokas nur per rapida kapklino kaj gestas al seĝo. Hezite, kun konfuza tusetado, la venkinto de Katilino okupas la lokon.

»Kio venigas vin al mi?« Tio devus soni ĝentile, sed elvenas abrupte, tranĉe, eĉ krude. Cezaro ne plu havas tempon por ĝentili.

Cicerono faras konvenan mangeston.

»Antaŭ ĉio la deziro informiĝi pri via farto. Mi aŭdis, ke vi malsanis.«

Tranĉa gesto, strange kontrastanta tiun rondan de l' alia.

»Mi ne kredas, ke mia farto estas speciale interesa temo.« La akraj, aĝ-palaj okuloj rigardas en la

palpebrumajn de l' vizitanto. »Eh, sen ĉirkaŭvojoj, ho Cicerono.«

La ekskonsulo grimacas, kvazaŭ la buŝo enmordus ion acidan. Lia rigardo evitemas la helajn okulojn de Cezaro. Hezite li komencas:

»Veteris tre bele dum la lastaj semajnoj.«

La mano de Cezaro jam tamburas sur la braka-pogilo. Cicerono rapidas daŭrigi:

»Tial mi pasigis kelkan tempon en Tuskulo, el kie mi revenis ĉimatene.«

»Kaj?« mallonge, krude. Cezaro jam scias, kio sekvos.

»Hieraŭ estis senat-kunsido.«

»Nu jes.«

»La tagordo estis speciale grava. Kiel mi estas informita, oni voĉdonis proponon pri investado de ŝtat-oficistoj pere de la diktatoro.«

»La *lex de partitione comitiorum*. Kio plue?«

»Oni akceptis ĝin unuanime.«

Cezaro ĵetas sin aldorse, ke ligno de la seĝo ekkrakas. La malrapida, embuska maniero de tiu alia mordas liajn nervojn.

»Jes, nu jes!« li ekkrias. »Kaj?«

»Mia nomo troviĝas en la listo de la jesaj voĉdonintoj — kvankam mi fakte ne ĉeestis.«

»Kaj?«

La palpebrumaj okuloj mire rondiĝas. Ĉu Cezaro ne komprenas?

»Sed tio estas fino de la respubliko.« Cicerono diras dolĉ-riproĉete, kvazaŭ klarigante ion al miskomprenema infano.

Li ne povis elekti malpli konvenan tonon: la patra

indulgemo de tiu lecionado plene ŝiras la elturmentitajn nervojn de Cezaro. La seĝo flugas returne.

»Respubliko! Vi, vi volas paroli pri la respubliko! Vi, kiuj ne scipovis ĝin uzi por io alia ol por satigo de viaj ambicioj kaj profito de viaj aferacoj!«

»Sed, Cezaro!« la vizaĝo de Cicerono volas grimaci ofenditan mienon. Cezaro tion plene ignoras: la uragano, jam senkatena, furiozas plue:

»Respubliko! Kio estas al vi la respubliko? Eblo, ke apartaj fragmentoj kunfandiĝu al tuto. Preteksto al et-animoj por uzurpi lokon de grandulo. Cemento, gluanta sablerojn ĝis ili akiras amplekson de roko. Miksaĵo el frazoj, pozoj kaj perfidoj. Miksaĵo el mensogoj, tro aĉaj por konfesi sin tiaj, el malnoblaĵoj, kiuj ne havas forton por esti konsekvencaj ĝisfine. Ŝanco por reciprokaj karieroj. Asocio de friponoj, ignorantaj ĉion noblan, ĉion majestan. Sur siajn standardojn ili devizas mistifikon pri egaleco de ĉiuj, ĉar ili ne volas permesi, ke iu superruzu ilian kanajlecon! Jen, via respubliko!«

La palaj okuloj malheliĝis, la laca voĉo sonoras. Cicerono senkonscie sentas la venkinton ĉe Farzalo.

»Tian respublikon mi finis, jes vere. *Tian* respublikon mi likvidis. Ĉar mi fakte volas tion, kion vi nur proklamas voli. Mi donas enhavon al la vorto, kiu malplene pendas ĉe via buŝo: al la libereco! Mi havas taskon kaj volas ĝin realigi: liberigi la popolon de vi, montri al ĝi la vantecon de viaj paroladoj kaj agoj, rompi la karcer-murojn, kiujn dum jarcentoj vi konstruadis, kaŝe kiel talpoj. Mi volas instrui al la homoj, ke ili vidu, mi volas planti en iliajn animojn volpovon, energion kaj senton pri la respondeco. Mi volas alporti forton, ke ili mem povu formi la vivon

kaj abomeni la fetiĉojn, per kiu vi baras al ili ĉiun liberan aktivecon. Mi volas inspiri, ke ili obeu nur la leĝon en siaj koroj!

Vi insultas min tirano, sufokiĝante en senpova furiozo, ke mi renversis vian tiranecon. Sur mian tutan laboron kaj penadon vi kraĉe salivas mensogojn, ĉar mi rompis el via faŭko la venen-dentojn. Kaj malamo kontraŭ mi saturas vin tiom, ke vi mem preskaŭ pereas pro ĝi — nur, ĉar mi montris al vi, ke unu estas pli forta ol multaj — ja, ĝuste tial, ke li estas Unu!

Kaj se vi havus almenaŭ kuraĝon leviĝi kontraŭ min. Se vi posedus almenaŭ la neflekseblan nukon de Katono, sin mortiganta, kiam li malvenkis kontraŭ mi! Eh ne, vi ĝentilas opozicion, kompleksas reziston. Vi venas kun amikaj plendetoj, bonvolaj riproĉetoj, vi afablas pri mia farto antaŭ ol deklari vian SE kaj SED. Sed, samtempe, vi estas feliĉaj, ke ĉi tie estas homo, kiu laboras por vi, kies agojn kaj sintenadon vi povas senfrukte kritikaĉi. Jes, homo, kiu, malgraŭ via senĉesa vortaĉado, tamen zorgas, ke vi vivu en paco kaj bonstato.

Kie estus sen mi via Tuskulo, en kiu — dum tiuj belaj aŭtunaj tagoj — vi pasigis kelkajn ripozdonajn semajnojn? Kie la somerdomoj, trezorejoj, negolibroj de l' ceteraj? Kun malfermitaj brakoj mi staras antaŭ uragano kaj rezistas ĝian furiozon nur, por ke vi povu okupiĝi senvunde kaj senĝene pri viaj ĉiutagaj vantaĵoj. Kiam mi ne plu estos, vi ekkompreneos, kio mi estis kaj vi ĝissange ungos sur mia tombo por min elfosi denove eksteren!

Nu, iru, Cicerono, iru jam, vi patro de l' patrujo! Mi estas sufiĉe granda por pretervidi malgrav-

aĵojn de vi kaj al vi similaj. Sed, ne forgesu tion ĉi: se vermeto sur mia vojo denove ekribelos, facile povos okazi, ke mi ĝin displandos — ja, ĝuste ĉar mi ĝin ne atentas.»

Cicerono ne scias, kiel li venis eksteren. Li rekonsciĝas nur, kiam la sekretario lin elkomplimentas tra l' elirejo. Kun senvola rideto rigardas la junulo post la konsulon, kies afektata digno forpecetiĝas, kiel malbona poluro. Sed jam denove ektintas la vibranta tono el la kabineto. Rapide li svenas internen, svingante antaŭ si kiel flagon la aŭdienc-liston, kiu jam plilongiĝis.

En la okuloj de la diktatoro, jam denove gluiĝantaj al la papero, ankoraŭ ardo de l' ĵusa flamo. Subite ili ĝoje heliĝas:

»Kaburo estas ĉi tie? Valerio Kaburo? Nu, tuj venigu lin!« Ekspirante pli rapide, li staras kaj atendas ĝis la kurteno leviĝas.

Alta staturó, kvankam iom kurbiĝinta, vekas duoblan respekton pro la blanka, purpur-randa togo. Sunbruna, akre ĉizita vizaĝo kun brilaj okuloj, en kiuj flamas neŝancebla amo. Profunde riverencas Valerio Kaburo, senatano per la favoro de Cezaro, antaŭ la mastro de l' mondo.

Tiu ĉi iras disbrake al li.

»Kaburo! Kara, malnova, mia amiko!«

»Imperatorio —« tio estas oficiala titolo, kiun Cezaro konservis ankaŭ post la formeto de la militista estreco.

»Por vi nur Cezaro!« rapide interrompas la dommastro. Sidiginte la vizitanton en apogseĝon, li altiras la sian pli proksimen kaj refoje kaptas la terbrunan

manon. »Ho, kiel mi ĝojas vin revidi! Hejme ĉio bona, ĉu? La patrino kaj Valeria kaj Procillo?«

Tiu demando-torento disrompas la bele pripensitan oratorajon de l' maljunulo. Li kapjesas iom senhelpe kaj respondas:

»Ĉio bona, jes. Mi donas al vi korajn salutojn de ĉiuj. Valeria antaŭ tri monatoj ekpatrinis trian fileton. Li nomiĝas Kajo — laŭ vi!«

»Laŭ ni!« Cezaro ridete korektas. »Ni ja havas la saman antaŭnomon. Unu-du sekundojn silento. Nun Cezaro faras al Kaburo la saman demandon, kun kiu li akceptis Ciceronon — sed kiel varme, kiel koregi nun vibras:

»Kio venigas vin al mi?« La maljunulo nun ekmemoras la celon de sia vizito. Rigide li rektiĝas en la apogseĝo kaj komencas:

»Ho majesta, ho venkoplena —«

»Ho nesuperebla,« Cezaro kompletigas kun malŝata gesto. »Jes, jes, mi scias. Ne oratoru, ho Kaburo: por tio estas la senato! Mallonge kaj koncize: pro kio vi venis?«

»Por danki vin, Cezaro.«

»Danki? Kial ja? Ah tiel!«

»Vi plenumis pli ol vi, siatempe, promesis al nia federacio. Ni fidis al vi kaj nun ni ne pentas. Ne nur, ke nia lando posedas plenan civitanecon, ne nur, ke nun ni estas veraĵ romianoj, egalrajtaj al la aliaj — vi faris eĉ pli: vi vokis niajn deputitojn en vian senaton kaj la purpur-rando sur mia togo estas pruvo —«

Cezaro ridas sian helan, freŝan knabridon, kiun li konservis tra ĉiuj uraganoj de sia vivo.

»Nu, belan parton da vojo ni formariĝis kune, de kiam mi vizitis vin unuafoje, ĉu ne, Kaburo? Tiam



sendube nek vi, nek mi supozis, ke iam ni renkontigos en la jenaj cirkonstancoj: mi, tiam politika novico kun amasego da ŝuldoj, vi, simpla vilaĝano, la senato ĉiopova kaj la ŝtato en la manoj de kelkaj kanajloj kaj stultuloj —

»Sed, jam tiam vi sciis, kion vi volis,« interrompas Kaburo. »Kaj vi atingis vian celon! Vi likvidis la potencon de la senato kaj la regadon de malkapabluloj, vi restarigis en la lando ordon kaj justecon, vi donacis al ni tion, kio por ni estis la plej valora, sed kio ĉiam al ni mankis: la liberecon!«

Jam ĉe la vorto »celo« Cezaro serioziĝis. Nun, kiam la vizitanto ĉesis paroli, li silentas. Fine li demandas enpense:

»La liberecon...« Li levas la kapon kaj akre alrigardas la maljunulon. »Kion vi opinias libereco?«

»Fari kaj plenumi, kion oni volas,« rapidas la respondo.

Malrapide, mediteme Cezaro kapskuas.

»Fari kaj plenumi, kion oni rajtas,« li korektas.

Jam li leviĝis kaj, kun, la manoj surdorse, ekpromenas tien-reen.

»Jus foriris de mi homo,« li ekduonvoĉas, »al kiu mi diris ĝuste la samon, kion nun vi diris al mi. Ĉar pri tio ĉi vi pravas: mi detruis la aŭtoritaton de la malsaĝaj kaj netoleremaj, mi restarigis la justecon. Se vi tion nomas libereco, nu, tiuokaze mi certe ĝin donacis. Sed, ho Kaburo, ĉu tio, vere, estas la libereco? Ĉu sklavo estas fakte libera, se vi lin emancipas el la sklaveco? Ĉu la libereco konsistas en tio, ke oni ne starigas eksterajn limojn al la agoj?« Li haltas, profunde alokulilas la maljunulon. »En la brusto de ĉiu homo loĝas leĝo, jen pli jen malpli rekonebla. Leĝo, kiu regas ni-

ajn pensojn, niajn intencojn, niajn decidojn, niajn verkojn. Kion ajn oni entreprenas, tiu leĝo dira al ni, kun precizeco pli granda ol tiu de la plej subtila pesileto, ĉu bone aŭ malbone ni agis. Kaj kontenta pri si mem oni povas esti nur tiam, kiam oni akordas kun tiu ĉi leĝo. Se tiam kontraŭstarus vin la tuta mondo vi estus pli forta ol ĝi, ĉar tiam vi estus plene: vi mem. Trankvila kaj harmonia vi estus en vi, ĉar vi sciis, ke vi faris, kion vi rajtis kion vi mem permesis al vi.

Nu vidu, Kaburo, tion ĉi mi nomas libereco: rekonu la leĝon en sia propra brusto kaj tiam sentime kaj senhezite agi laŭ ĝiaj ordonoj, okazu kio ajn. Ho, feliĉaj tiuj, kiuj elluktis la veran, internan liberecon! Minacu ilin morto aŭ teruroj, ja, pereu eĉ la tuta mondo — al ili nenio povos okazi. El la ruinoj kaj pereoj ĉiam leviĝos la brila ideo, al kiu ili servis, la granda modelo, kiun ili ekzemplis.

Kaj nun diru al mi: ĉu mi donacis ĉi tiun liberecon? Ĉu entute oni povas donaci ĉi tiun liberecon? Oni ĝin nur havas aŭ oni ĝin nur ne havas. Maksimume oni povas flegi kaj fortigi ĝiajn ĝermojn, kiel patro siajn infanojn. Vi, ho Kaburo, ĉiam havis tian liberecon. Ankaŭ multaj en via Transpadio. Tial, de l' unua momento, mi ekamis tiun landon, tial mi malavare malfermis al ĝi miajn manojn kaj tuj, kiam mi povis, mi donis al ĝi ĉion — nur ne tion!

Iru, Kaburo, iru, vi mia forta, libera kampulo! Montru per via ekzemplo, kiel devas aspekti tia libereco! Levu vian rektan, fortan nukon super ĉiujn fleksiĝintajn, kiuj amas sian jugon nur tial, ke ĝi estas el oro. Iru kaj bruligu en la koroj, similaj al la via, la sanktan flamon — alte ĝi disfajru, kiel en vi mem! Kaj sciu:

se estus neniu alia krom vi, por kiu mi plenumis mian verkon — mi estus plene kontenta pri mi.«

Kun muta saluto la maljunulo ekiras el la kabineto. La larmo-blindaj okuloj ne trovas la vojon, nur palpe laŭ la muro li atingas al la kurteno.

En la vestiblo lin atendas la sekretario kaj kun respekta afableco akompanas al la elirejo. Denove alvibras hela tinta. La junulo elmurmuras senkulpiĝon kaj enrapidas.

## Proksime al la nokto

Marko Antonio atendas pluajn vortojn de diktado. Lia skribopreta mano kuŝas sur preskaŭ plene elskrapita nottabuleto. Kun febra rapido li kaptis parton de l' torenta lavango, prilaboris kaj fasonis ĝin en konvenajn vortojn. Hejme, laŭ ili, li faros grandtrajtan planon. Ciferoj, legiaj numeroj, urbonomoj tute intermiksiĝis. Kelkaj punktoj estas du-, tri-oble substrekitaj: cifero ‚XVII‘ — nombro de preparotaj legioj — vorto »Apollonio« — kolektejo de potencaj trupamasoj: Cezaro planas novan, gigantan militiron kaj nun ĝuste finas la lastajn aranĝojn.

La diktado ankoraŭ ne estas daŭrigata. Antonio unue rigardas en siajn notojn, poste okullevas. Subita ekstimo trafajras lian korpon: ankoraŭ neniam li vidis la kadukiĝon en la vizaĝo de Cezaro, tiel klare kiel nun en la malvarma, senkompata krepusko, ŝteliĝanta en la salonon tra larĝa fenestro de la biblioteko. La kapo, kun belega, alta reĝfrunto, lace velkis sur la bruston. La duone estingiĝintajn okulojn ŝirme kurtenas la palpebroj. Dekstre-maldekstre de l' akre elstara nazo plugiĝas du sulkoj, kiuj, finiĝante ĉe l' makzeloj, premas inter si lip-maldikan buŝon kaj jam malrondan mentonon. Profundaj kavoj ĉe l' tempioj

kaj sub vizaĝosto. En la rigidaj trajtoj mankas ĉia freŝeco.

La ektimo de Antonio ŝanĝiĝas en korpreman teruron. La vizaĝo antaŭ li subite vekas rememoron pri la avobustoj, kiuj, deprenitaj mortmaske, staras en la atrioj de nobelaj domoj. Tiu kara vizaĝo estas tiel senviva, ke por momento ŝajnas al li: ĉi tie jam okazis tio lasta — la Nevenkeblan venkis la Ĉiovenka.

Nun Cezaro levas la kapon. La okuloj malfermiĝas. La senviva vizaĝo, ekradiante spiriton, reviviĝas.

»Ŝajne, tio estas ĉio,« li lacas pezvoĉe. »Nun estas fino de Februaro. Dum tri semajnoj vi povos koncentrigi la trupojn. Mi intencas forlasi Romon fine de Marto.«

Antonio rapide notas ankaŭ tion, kunfermas la nottabuletojn kaj leviĝas.

Okulmovo de Cezaro lin haltigas.

»Restu iom plue ĉe mi,« li diras mallaŭte. »Mi estas tiel soleca,« apenaŭ aŭdeblas.

Antonio denove apogas sin kaj silente atendas.

Cezaro ankoraŭ ne parolas. Liaj malkvietaj fingroj prenis de la tablo eburan statueton — belegan grand-azian artaĵon, iam donacitan de Nikomedo — kaj ludas per ĝi. Kaj subite, el silento kaj displuva mallumo, denove eklacas lia voĉo:

»Nu, kion vi pensas, kial mi entreprenas tiun militon kontraŭ la parthojn?«

Antonio indiferente levas siajn sensarĝajn, junulajn ŝultrojn de atleto.

»Mi ne cerbumis pri tio, ho imperatoro,« vigne li respondas. »Versajne por privenĝi Krasson?« li divenadas.

**Kapneo.**

»Ne? Do, por plivastigi sud-oriente la limojn de Romo.

Kapneo refoje.

Antonio meditas. Fine li diras:

»Tiuokaze, vere mi ne scias. . . «

»Ĉar en Romo mi ne plu havas ion por fari, « aŭdiĝas eltranse, kie pala, fantoma figuro komencas disfandiĝi en krepuskon.

»Kiel?« Antonio kredas misaŭdi.

»Aŭ pli ĝuste, ĉar mi ne plu scias, kion fari en Romo. Por kio ĉiuj miaj penoj? Por kio mia senlaca laborado? Por kio tiuj senfinaj turmentoj de l' pripensoj, zorgoj, interpacigoj, kiuj min nur antaŭtempe maljunigis kaj lacigis? Ke neniu estas al mi dankema pro miaj faroj, ne tre kortuŝas nin: mi ja neniam aspiris dankemon. Sed estas ankaŭ vero, ke per ili al neniu mi utilis, aŭ almenaŭ neniu konstatis tiun utilon. La homoj restos ĉiam samaj, eĉ se vi aranĝos al ili sur la tero la elizeon mem. Ĉiam ili konservas en la koroj sian malnoblon, sian bagatelemon, sian eternan vant-econ. Kie estas tiu, kiu dezirus levi sin pli alten, kiu klopodus penetri la esencon de miaj intencoj, kiu eĉ nur provus min kompreni? Memoru bone, ho Antonio: vi povas doni al la homoj ĉion, vi povas tranĉi viajn vejnojn kaj donaci al ili la sangon de l' propra koro, tamen vi ne ŝanĝos ilin eĉ plej ete. En ĉio nova ili restas sensanĝaj. Ja, ĉio vana! Ĉio vana!«

La laca voĉo plifortiĝas, tamen perdante neniom de sia rompiĝemo. Jam denove ĝi velkas.

»Kaj de kiam mi ekkonis tion, mi ne plu povas elteni en Romo. Ĉi tie mi ne plu havas ion por fari. Kion mi ankoraŭ povas, estas sole: plivastigi la areon de l' imperio, prepari la landon por la venontaj ge-

neracioj. Eble ili — ja, eble! — tamen komprenetos miajn intencojn. Milito — nur en ĝi mi sentas eblecon de vera kreado. Tie almenaŭ mi vidas, kiel — paŝ-al-paŝe — mi venas antaŭen, mi sentas la ŝtonojn de l' konkeritaj urboj, surplandas peceton da plugrundo, elbatalata por romiaj koloniuloj. Mi alrulis la rokon Gallio antaŭ la pordon de l' germana invado. Mi konstruis muro Hispanion, Afrikon, Egiptujon kaj, dua muro, Illirion, Grekujon, Malgrand-azion. Ankoraŭ faŭkas unu breĉo en tiu konstruaĵo: nun mi iras por ĝin ŝtonŝtopi tiel firme, ke la fermitan ringon neniu povu plu transiri. Jen, tial, vidu, mia Marko, mi gvidas tiun ĉi militon: por pruvi al mi mem, ke mi ankoraŭ taŭgas por io. Tiu ĉi milito estu la lasta enhavo de mia vivo. Gi daŭros longe kaj, verŝajne, mi ne ĝisvivos ĝian finon. — Ne, ne, parolu nenion: mi scias, ke mia vivo jam subiras al la fino. Sed, al mi estas destinite plenumi mian verkon almenaŭ eksteraĵe kaj morti tiel, kiel mi ĉiam deziris: meze de laboro, meze de aktiveco — konsciante, ke ankoraŭ pri mi ne estas ĉio finita, ke ankoraŭ mi estas ne ĝisfine elkonsumita.«

Krepusko jam plene sterniĝis. La figuro en blanka togo estas nun sole heleta makulo, apenaŭ distingebla en la mallumo, kiu kvazaŭ sin mem ensorbas.

Nur post longa paŭzo Antonio ĉesigas la preman silenton.

»Ili ne volas vin rekoni. La reĝa trono —«

Senpacienca gesto lin interrompas.

»La reĝa trono estas nur eksteraĵo — kiel ĉio, kion en Romo oni proponis aŭ rifuzis al mi. Mi ja estas reĝo ankaŭ sen ĝi. Kompreneble, ke mi malfacile toleras, ke tiu ĉi popolo ankoraŭ arogas al si rajton

influi miajn decidojn. La komedio ĉe la *Luperkalia* festo, kiam vi trifoje proponis al mi la diademon kaj, dum la ĝojhurlado de l' plebo, mi trifoje ĝin rifuzis, ĉiam estos por mi brulpika honto. Kiu mi estas, ke mi devas flatkaresi tiun kanajlaron?«

Liaj fingroj spasme premas la statueton. Subita kraketo: rompiĝis ĝia brako. Senpense kaj nekonscie Cezaro kunigas la du rompaĵojn. Tiam atente li starigas la kripligitan artaĵon sur la tablon, metante apud-en la fragmenton.

»Nun ankaŭ tio rompiĝis en mia mano,« malrapide li diras. »Ja, ĝuste kiel la romia libereco,« li aldonas kun rideto, saturita de abomeno. »Libereco! Nu, ĉu ili scipovas ĝin uzi? Jes, por aroganti! Sinjoro popoltribuno Poncio Akvila ne leviĝas, kiam mi preteriras! Respublikana fiero, ĉu ne? Sed, dume, li sekrete dentoklakas ĉar efektive li estas sama timulaĉo, kiel ĉiuj aliaj ne riskantaj eĉ tion. Nur nokte ili kuraĝas sekrete ŝteli girlandojn de sur miaj *hermoj* kiujn oferis nekonataj amikoj. Vid-al-vide ili rikanas humilon, fleksiĝas kaj riverencas, sed post mia dorso ili levas pugnojn kaj malbenas min. Aŭ vi eble pensas, ke mi ne scias, kiel ĉiuj estis, »mishumoraj«, ĉar mi nomis la filon de Kleopatra kaj mi — Cezariono? Kiel ĉiuj murmuris, kiam en mia nova templo de Venuso mi starigis la statuon de Kleopatra apud tiun de l' diino? Ho, se mi tiam ne kompromisus, se mi obeus nur al mia koro: en la templo nun starus nur unu sola statuo: tiu de mia reĝino!«

Kolerege li leviĝas kaj, man-sur-dorse, alpaŝas la fenestron. Ne turnante sin li parolas plue:

»Eĉ la plej malsaĝaj kalumnioj estas al ili konvenaj por pafi kontraŭ min. Mi amnestiis Marcellon.



Krimulo murdis lin, revenantan en Romon. Kompreneble, tio estis farata laŭ mia ordono — kvazaŭ mi povus havi motivon por flankenigi tiun malsaĝan stultuleton! — Mi interŝanĝis kun la egipta kortego kelkajn ĝentilajn leterojn: tuj ekcirkulas famo, ke mi intencas transloki mian rezidejon en Aleksandrion por kronigi min — despoto de l' Oriento! Kaj oni ne hontas miri pro miaj kolereksplodoj, oni trovas min mense malnormala, ekscesema! Mi moderigas min, kiom mi povas. Se mi tion ne farus jam delonge mi ordonus al miaj militistoj: ĉirkaŭfermi tiun antaŭdiluvan neston de friponoj, frenezuloj, malsaĝuloj kaj bruligi ĝin el ĉiuj flankoj. Tiel mi liberigus la mondon definitive de tiu infekta pestaĵo!«

En lia voĉo estas io, kvazaŭ sufokita gargaro; tia tono, ke Antonio eksentas pikajn frostotremojn. Sed tuj poste la voĉo reakiras la antaŭan tonon. Rompigema laceco ekfluas eltranse, de l' fantomo, apenaŭ rekonebla en mallumo — Cezaro denove revenis al sia seĝo.

»Ĉiuj estas samaj. Jen Bruto. Post Farzalo mi bonvole akceptis lin kaj superŝutis per nemerititaj amikaĵoj. Nun li kredas, ke li devas — pro sia pozo de respublikana heroo — edzinigi la filinon de Katono, Porcian, vidvinon de mia malamiko Bibulo. Kaj la tuta senato ekstazas pro tia malnov-respublika virto. Kien ajn mi rigardas, mi vidas nur hipokritadon, embuskemon, perfidon. Ĉio min naŭzas! Naŭzegas!«

Li eksilentas metante la manojn super la doloraj okuloj. En la preskaŭ tute malluma ejo denove ekregas peza, premega silento.

Nun Antonio komencas paroli, singarde palpante antaŭ si, kiel homo surpaŝinta glacieron.

»Jes, Bruto — sed vi lin tiom alte taksis...«

La respondo longe ne venas. Fine, mallaŭte, eltranse, el la mallumo:

»Mi havis kaŭzojn por tio...«

En aliaj cirkonstancoj ĉi tiuj vortoj Antonion silentigus, sed hodiaŭ li ne volas cedi: li devas malfermi sian animon kaj eldiri ĉion, kion li supozas — scias —

»Pri li — ĉu vi estas certa pri li?«

»Kion vi pensas?« en la voĉo, ŝajne, ekatento.

»Mi pensas, ĉu vi fidas al li?«

»Fidas... nu, neniam mi konfidis ion al li.«

Antonio pripensas kaj daŭrigas eĉ pli singarde:

»Ĉu vi povas garanti pri lia karaktero?«

La laca voĉo subite firmiĝas, ekabruptas — jam la voĉo al kutimiĝinta ordoni:

»Vi scias ion. Diru do!«

Antonio momenton hezitas, fine eljetas:

»Jes, imperatoro, mi scias ion. Multon. Mi scias, ke Bruto kun Kassio, Trebonio, Metello, Cimbro, Kasko kaj multaj aliaj aranĝis kontraŭ vin konspiron.«

»Kontraŭ min? Kial?« Tute trankvila, tute senpasia demando.

»Kial? Ĉar vi dispremis ilin? Ĉar ili ne povas toleri vian grandecon. Ĉar ili ne povas elteni la penson, ke ne ili, sed vi, nur vi, mastras Romon!«

Silento. Nun denove eltranse:

»Tion mi ne povas kredi.«

Antonio tordas la manojn, ekstertoras, pasie levigigas:

»Kredu, ho Cezaro, mi petegas vin, kredu! Mi ricevis la informojn el la plej fidinda fonto! Ĉiunokte ili renkontiĝas en la hejmo de Kassio, sekrete interkonsiliĝas, forĝas planojn —«

»Kiajn planojn?«

La vorto ne volas elpuŝiĝi trans la lipojn de Antonio. Tamen, fine, li diras sentone, kvazaŭ eĉ li mem ektimus:

»Por vin — murdi...«

Silento — silento — nun subite el la mallumo ektondras rido, frostopike resonanta en la granda ĉambro.

»Nur tio mankis! Jen la kulmino de ĉio! Nun mi eĉ pli certe scias, ke ĉio estis vana. Vana mia penado, vana mia tuta laboro, vana mia tuta vivo, kiu devis servi nur al la bono de l' homaro. Do, tial la kvindek ses jaroj da nervoŝira streĉiĝo, tial la lacoj kaj danĝeroj, vundoj kaj malsanoj, doloroj kaj suferoj! Se foje io sukcesas — se entute ja io povas sukcesi en tiu ĉi groteska mondo — jam aperas la stulto kaj unubate ĉion frakasas. »Nu, bone tiel!«

Antonio aŭdas ekscititan, abruptan spiradon, poste denove la malvarman tranĉan voĉon:

»Kaj Bruto ankaŭ kun ili, vi diris? *Mia filo Bruto?* Li, kiu neniam aŭdis de mi eĉ nur malagrablan vorteton. Li, kiu, de kiam li vivas, spertis de mi nur bonon? Bruto leviĝas kontraŭ min, starigas sin ĉe l' frunto de la konspirantoj, svingas ponardon kontraŭ mian bruston? Mi ne povas tion kompreni kaj tamen mi scias, ke tio estas vera: jen, eĉ tro bela ekzemplo pri la absurdo de ĉio okazanta. Al tiu ĉi mondo oni ne povas helpi: oni povas ĝin subjugi, oni povas ĝin sklavigi, sed ve al tiu, kiu nur por momento malstreĉas la bridojn, kiu kredas pri ia pli bona, pli nobla inklino en la homoj!«

La voĉo mutiĝas. Antonio vane klopodas legi en la mieno de Cezaro. Preskaŭ timeme li demandas:

»Ĉu mi zorgu pri antaŭgardo? Igu malliberigi Bruton kun la ceteraj?«

»Ne.« Jam denove la voĉo sonas tute trankvile kaj senpasie. »Nenian antaŭgardon. Nenian malliberigon. Kio devas okazi, okazos. Kaj, krome, havu nenian timon pri mi: mi vivis sufiĉe longe; ili mortigos nur mortinton. Iru nun, Marko.«

»Sed —«

»Iru.«

Senvorte Antonio leviĝas kaj ŝteliras tra la malumo al la pordo. Profunde noktĝis...

## La lasta nokto

»Ĉu la imperatoro ordonas ion krome?«

»Nenion.« Lace la mano gestas foriron. La servisto blove estingas lampon kaj dorsire forlasas la dormoĉambron.

Cezaro sternas sin tutkorpe kaj per profundaj spiroj elpuŝas aeron el la pulmoj. La brulaj okuloj ŝirlarĝe boriĝas en purpura mallumo. Kun ekfrosteto li altiras la kovrilon pli supren.

Denove kuŝas antaŭ li nokto similanta ĉiujn de la lastaj jaroj: unue longa, turmentoplena atendo de endormiĝo, kiu ne venas. Poste senkonscio, falpuŝiĝa drono en profundojn. Ili ĉirkaŭkaptos lin, kiel kondamniton malluma, senaera karcero, havanta monstrojn kaj fantomojn, kontraŭ kiuj la teruro jam delonge estingiĝis . . . Kaj, fine, li vekigis kun pezega kapo, kun naŭza, vomiga gusto sur la lango — kaj en la koro kun profunda mishumoro pri la venanta tago.

Kiom longe tiel daŭros? Kiu ringeto estos la lasta en la ĉeno, kiu ĉiun matenon plilongiĝas per unu ereto? Kie li trovos la finon? Kia estos tiu fino? Ĉu rompo, disŝiriĝo de l' tro daŭre streĉataj nervoj? Aŭ, eble, Antonio kun sia averto pravis? Ĉu vere la ponardoj soifantaj lian sangon, estas jam akriĝitaj?

Li palpe serĉas la tableton apud sia kuŝejo, ĝis li

eksentas inter siaj fingroj kruĉon kun mielakvo. Longa gluto — li remetas la vazon sur la tableton.

Atendi. Denove atendi. Kiel li faris dum sia tuta vivo. Unue li atendis sukceson, povon. Poste la miraklon. Nun tion lastan: la iometon da trankvilo. Ja, nur tiom, kiom estas permesite eĉ al la plej mizera homo.

Tute mallaŭte, tute senmove li kuŝas. Li klopodas, ke la frenezumo de pensoj forflugu, ke li liberiĝu de l' terura premo, kiu pezegas sur li, envolvante lin dense kiel ŝtona maso. En li ne estas malespero. Li ne tremas pro brula doloro, nek pereas pro turmento kaj sufero. Lin inkubas nur profunda, profunda laceco, nur senlima naŭzo kontraŭ la plua vegetado, nur plej elmema sopiro al nenio: li sumigis sian vivon kaj la ricevita rezulto estas nulo...

! Kiom longe li kuŝas tiel? En tiaj noktoj, minutoj longiĝas en jardekojn, neesprimebla pezo de horo en eternon. Tia nokto suĉas medolon el la ostoj, sangon el la vejnoj, ĉiujn pensojn, sentojn, volforton el la koro.

Cu ekstremo trakuris lian korpon? Li aŭskultas en sin mem kun streĉitaj organoj, tute maldorma, tute sinreganta, rigida, kiel en ĉiuj fatalaj horoj de sia vivo.

Ne; li ne trompiĝis: tio estas la sama sento, kiel tiam en la domo de Lukcejo.

Li ne scias, kiel nomi tion, kio en li naskiĝas: unue, dum la unuaj, nedifinitaj sentoj, ĝi ekŝajnis al li grandega kapo. Kaj nun, kiam ĝi pliklariĝas, li sentas, ke la homa parolo ne havas vortojn, ne havas ideojn por ĝin esprimi. Ĝi lin rigardas — kaj tamen ĝi ne havas okulojn, aŭ pli ĝuste: ĝi estas nur granda okulo mem. Ĝi parolas al li — kaj tamen ĝi ne havas buŝon, pli ĝuste: ĝi estas nur buŝo mem. Kvazaŭ ĉiuj sentaj funkcioj de tiu supernatura ŝajnaĵo estus reduk-

titaj al sia praradiko, ili nun ne bezonas la peradon de la organoj, ili efikas ja elmeme. Ĝi ankaŭ ne estas io, kio estus ekster li: iel — li mem ne povus tion klarigi — li apartenas al tiu Neeldireblo, li estas Parto kaj Plenumiĝo, Komplemento kaj Subjekto sammomente.

Nun li estas tute trankvila. Kiel papava trinkajo dislarĝiĝas en li profunda silento, kvietigante la martelantan koron kaj malvarmigante la brulajn tempiojn.

»Denove vi venis?« li demandas preskaŭ ridete, preskaŭ ĝoje.

»Jes,« resonas responde.

»Ofte mi atendis vin.«

»Mi estis ĉiam en vi.«

»Kial vi neniam parolis al mi?«

»Ĉar vi devis mem trovi vian vojon.«

»Kaj kial vi ekparolis nun?«

»Ĉar venis la momento.«

Profunda enspiro. Cezaro kunplektas la manojn sub la nuko, fermas la okulojn.

»Kion vi havas por diri al mi?« li esploras.

»Ke vi estas ĉe l' fino.«

»Ĉe l' fino?«

»Jes.«

»Tute ĉe l' fino?«

»Tute ĉe l' fino.«

Nur momenton li hezitas. Nur tiom, kiom necesas por plene kompreni. Nun:

»Ankoraŭ ĉinokte?«

»Ne.«

»Kiam?«

»Vi nomas tion morgaŭ.«

Refoje hezito por pripenso. Nun plene trankvila, plene senemocia voĉo:

»Ĉu — perforto?«

»Jes.«

Cezaro serĉas en si impulson de timo, de teruro, sed sensuce. Ĉio ŝajnas al li komprenebla, kiel la plej simpla, la plej facila ĉiutago. Ankoraŭ ĉiam estas en li tiu ĝojo, kies devenon eĉ li mem ne komprenas.

»Kaj tial vi venis?«

»Jes.«

»Min juĝi?«

»Juĝi? Ne.«

»Do?«

»Vin pesi!«

Cezaro denove rigidiĝas, la muskoloj kaj nervoj estas jam plene streĉitaj.

»Vi trovos min tro malpeza,« li diras mallaŭte.  
 »Mia tuta vivo estis nur tromp-vojo. Mi penis al celoj kaj, atinginte, rekonis ilin falsaj. Mi plenumadis agojn kaj, plenuminte, mi konstatis ilin senfruktaj. Kiam mi superrigardas mian ekzistadon — mi konstatas, ke ĝi estas nura, grandega miskompreno. Mi volis reformi la mondon — sed en la propra brusto mi portis haoson. Mi volis levi la homon supren — sed mi forgesis, ke unue mi devas profundiĝi en mia memo. Mia verko estis ludeto de infanoj, konstruantaj sablajn turojn: la unua venteto sufiĉas por disblovi ilin senpostsigne.«

Profunda, solena silento. Tiam:

»Vi eraras, same — kulpigante vin, ke en via vivo vi ĉiam nur eraris.«

»Mi eraras? Ĉu eble daŭros io el miaj kreaĵoj?«

»Jes.«

»Sed kio?«

»Vi mem.«

»Ĉu mi?« Senkomprena miro. »Ĉu vi ja ne mem



diris, ke mia fino estas jam ĉi tie, ke morgaŭ —«

»Jes, la fino de tio mortema en vi. Sed via verko estas senmorta.«

»Nu, pri kiu verko vi parolas?«

»La verko, kiun vi plenumis pri vi, en vi. La templo, kiun vi konstruis en via koro. La vera mondo, kiun vi kreis en via animo kaj kiu transdaŭros ĉi tiun teran mondon.«

Denove profunda silento. Nun Cezaro diras treme, timrespekte:

»Mi sciis tion...«

»Sciis? Ne. Sentis — supozis — perceptis en momentoj, kiam en vi la voĉo de l' vivo estis mallaŭta. Jes: vi paŝis multajn trompvojojn, vi plenumis multajn malbonaĵojn, vi verŝis senfrukte marojn da sango. Tial, ankoraŭ ĉinokte, vi elsuferos tiajn turmentojn, kiajn apenaŭ iu homo elsuferis: ĉar vi pekis kontraŭ la Plejgrando, vi rompis la plej Altan Leĝon, destinitan por tiu ĉi mondo. Sed ĉe l' fino vi tamen ĝin rekonis kaj tiu ĉi rekono alportos al vi la savon. Ekzistas nur unu afero, kiu *estas*:

»La amo,« kompletigas Cezaro mallaŭte.

»Vi diris...« respiretas responde. »Kaj ĉar vi rekonis tion, vi estis al mi bona instrumento, kiu plenumis sian taskon, laŭ mia destino. Kaj ĉar vi tion rekonis, via plejbono ne pereos, ĝi plu vivos, eĉ tiam, kiam el la giganta konstruaĵo de l' romia imperio ne restos ŝtono sur ŝtono.«

Silento. Muto. Plej profunde kortuŝite, Cezaro retrovas en la vortoj de l' aperaĵo plurajn, kiujn li mem eldiris: iam-tiam. Li komprenas, ke estis tio ĉi Dia, kio al li donacis tiujn vortojn, kio — sen lia scio — uzis lin por misteraj, neesprimeble grandaj

celoj. Kaj ĉi tiu kompreno plenigas lin per tiel senlima sento de feliĉo, ke en ĝi fandiĝas ĉio tera, homa el li.

Nur post longa tempo li demandas:

»Ĉu krom tio vi havas ion por diri al mi?«

»Nenion. Tamen nur ĉi tion: forto estis, kio tra la tuta vivo puŝis vin antaŭen. Vi elkonsumis ĝin ĝis nur eta resto. Uzu tiun reston por trapasi kun neŝancelebla kuraĝo la terurojn, kiuj vin atendas ĉinokte — kaj morgaŭ, ĉe l' statuo de Pompejo, falu tiel majeste sub la ponardoj de viaj murdontoj, kiel majeste vi vivis...«

---

Cezaro profunde spiras. Nokto silenta, silenta. La ŝajnaĵo malaperis.

Liaj konfuzitaj okuloj ĉirkaŭrigardas, kvazaŭ ili povus trapanetri nigran mallumon. Neklaraj kolormakuloj aperas, implikiĝas en rondoj, spiraloj, fantazie interplektitaj linioj, jam perdiĝas...

Silento — absoluta, tomba silento, kiel antaŭ uragano.

El kie subite aperis tiu ĉi galla urbo? Large, spite me apogiĝas ĝiaj hele-malhele kvadratitaj muroj sur grasa, bruna grundo, elstarante en la estingiĝan vesperan ĉielon. La murdontoj estas malplenaj. Large oscedas la pordo, kvazaŭ vundo de elsanginta korpo. Li trairas ĝin. Paŝas tra mallarĝaj urbaj stratoj. Duonruine staras la domoj. Intertuŝiĝas tegmentoj. El ĉie fluas, senlima malĝojo. Nenie homo, nenie viva estaĵo. Nur tomba silento. La iranto plej forte streĉas sian aŭdsenton, sed li ne perceptas eĉ plej etan sonon. Ankaŭ lia propra paŝo estas neaŭdebla, kvazaŭ li ne

paŝus sur batpremita tero, sed sur ŝlima grundo. Ĉirkaŭ li ĉio elspiras tiel senliman solecon, ke li preskaŭ mortas pro sopiro pri ia ajn viva estaĵo, birdo, besteto. Sed nenio — nenio — li estas tiel soleca, kiel ankoraŭ neniam en sia vivo.

Li volus foriri, rekuri la saman vojon, forlasi la missorcĉitan urbon, senmotive terurantan ĝis la fundo de l' animo — sed li ne povas. Kontraŭvole io pelas lin antaŭen, movas liajn piedojn kaj li devas iri, paŝon post paŝo, antaŭen, ĉiam antaŭen.

Li proksimiĝas al stratangulo. De momento al momento en li kreskas premento, kvazaŭ li sciis, ke post ĉi tiu angulo embuskas lin io terura, kio lin kaptos tuj, kiam li forlasos la ŝirmajn domomurojn. Vane li provas malrapidigi la paŝojn: li devas antaŭen, ĉiam antaŭen, kvankam li plej volonte kriegus pro la turmento.

Jam ĉe l' angulo. Nur paŝeto — li ĝin preteriris. Kun la energio de malesperulo li alturnas la kapon, elĉerpinte la lastan reston de fiero kaj volforto: tio terura ne kaptos lin nepreparita, li volas tion *vidi*, li volas alrigardi tiun sian meduzo-fantomon.

Nenio...

Kaj tamen: laŭ sia strango, laŭ sia maleblo pli malbona ol la plej malbona: larĝa, triumfa ŝoseo, gvidanta al Kapitulo. Sunbrilega, kun ornamo el luksaj domoj ambaŭflanke. Blanke kaj ore superfajras ĝin la templo de Jupitro sur la pinto de l' monteto, kie la triumfantoj kutimas celebri al la dioj dankoferon. Kiam li paŝis ĝin lastafoje, ĝi estis plena de ovaciantaj, aklamantaj kaj, ŝajne, ĝojfrenezaj homoj. Nun ĝi estas nuda — nuda — nur oro kaj marmoro fajrere pikas lin; ĉu terura primoko?

Io pelas lin surpaŝi la ŝoseon. Paŝ-al-paŝe, senvole, li iras ĝin. Li estas viktimo de io, kio lin tute enkaptis, viŝante el li ĉion propran, kiel kapo de grifelo viŝas signojn sur vaks-tabuletoj. Ĉiam antaŭen, ĉiam pli alten, li devas iri, sen forto por returniĝi, sen eb-  
leco por halti.

Nun li atingis supren. Li staras sur la larĝa plat-  
formo, antaŭ la templo, ĝuste ĉe l' altaro, kies fajron li bruligis tiom ofte. Tiu fremda potenco, pelanta lin antaŭen, perdiĝis en la momento, kiam li atingis la supron. Denove li estas sola — tute sola...

Ekspirinte kun eta sento de senŝarĝiĝo, li rigar-  
das ĉirkaŭ sin. La okuloj glitas trans dom-amasoj, kuŝantaj subpiede, trans la valon, kiu etendiĝas post ili — ĝis la maro.

Ĉar jen, subite, aperis la maro, sternante antaŭ la muroj de l' urbo senlimajn malproksimojn. Ĝi banas kajon, kiu ŝajnas al li strange konata, kaj longan, longan havendigon, ĉe kies fino elstaras insulo kun lumturo. Liaj okuloj kuras laŭ la marbordo... serĉas, ili jam trovas neĝeblankan palacon... Ĉe l' fenestro flirtas longa, blanka vualo... sovaĝe ĝin ŝiras vento, kies muĝon li ne aŭdas.

Kvazaŭ helpopete vagas liaj rigardoj returne al la altaro, antaŭ kiu li staras. Li ektemas, refoje alri-  
gardas tien: la ĵus blanka marmoro jam ruĝas sange.

La inkubata brusto penas liberiĝi en profundan forspiron — vane: restas la teruro, restas la sufero, kiu tiel sovaĝe sufokas, ke li ne povas eĉ krieti. Malrapide, kun neesprimebla peno, li turnas la kapon. Malaperis la templo, la platformo — ĉio. Li staras sur la supro de l' monto, kaj ĉirkaŭ li bolas densaj, malhele ruĝaj nebuloj.

Io en tiu ondanta maso komencas formiĝi, iĝas pli kaj pli klara, jam forŝiriĝas: homo. Senmove ĝi ŝoviĝas antaŭen, kiel statuo, puŝata de nevideblaj manoj. Nun ĝi haltas: gallo. Cezaro boras la okulojn en la mortpalan vizaĝon, serĉas en ĝi ion, rekonas nenion: estas iu el la multaj, kiujn preterglitis lia okulo dum la ok' jaroj de la galla milito. Iu el la multaj, kies koron trapikis romia lanco, romia glavo: meze de l' brusto li portas ruĝan makulon, el kiu senĉese glitas teren maldika, ruĝa fadeno.

Jam pli da ili, unu similas la alian, ĉiuj rigidaj kaj senvivaj, fiksante per siaj mortintaj okuloj la solulon. Mortvundoj ĉie: en la brusto, en la korpo, en la frunto. Senĉese ili ŝiriĝas el la nebulo, senlace elĵetanta figuron post figuro. Al Cezaro ŝajnas, ke li rekonas kelkajn: jen Dumnorikso, mortigita antaŭ la transveturo en Brition, jen Akko, kiun li ekzekutigis ĉe landa kunveno en Samarobrivo...

Venas novaj: germanoj. Pli altaj ol la galloj, kun pli sovaĝaj vizaĝoj, kun ruĝblonda hararo, kungluita de sango. Sed ankaŭ ili estas rigidaj kaj senvivaj, kiel la ceteraj. Jen virinoj inter ili, jen infanoj. Nu, kial tiuj germanaj katoj tiel furioze sin defendis?!

Ĉiam novaj, ĉiam novaj. La rigardo ne plu povas rekoni ilin unuope, ĝi distingas nur grupojn: britoj, hispanoj, egiptoj, malgrand-azianoj, numidoj. Netrarigardeblaj amasoj, ĉirkaŭantaj lin, kvazaŭ nepe-netrebla digo.

Subite en la griza amaso io ekbrilas malklare kaj monotone: uniformoj de l' falintaj legianoj. Kvazaŭ ili ankoraŭ vivus, ili viciĝas en *centuriojn*, *manipulojn*, *kohortojn* — legiojn. La aglo de la Dek-kvina, kiu ĝis la lasta homo restis ĉe Aduatuko, ekfajreras

por momento en tiuj sangondoĵoj — kaj malaperas. Tiel netrarigardeble granda estas tiu amaso da figuroj (ke, ŝajne, kunvenis ĉiuj mortintoj de l' mondo por postuli, ke li, Unu Sola, elpagu la ŝuldon.

Malespere li rigardas ĉirkaŭ sin. Ĉirkaŭita de la teruraj muroj, li staras sola sur peceto da tero, kiun pli kaj pli malgrandigas ĉiu nova figuro. El milmil vundoj fluetas sango sur la teron, akvumante kaj kolorante ĝin.

Nun el la amasoj ŝiriĝas unuopuloj kaj tute aliras lin. Sabino kaj Kotto senmove rigardas lin el estingiĝintaj okuloj, ankaŭ Kurio, Klodio, Katono, Potino, Labieno — Pompejo!! Vercingetorikso!!! Iliaj kapoj balanciĝas sur malrigidaj koloj. Sur la senvive pendantaj manoj spasmas fingroj. Tio estas manoj de katenitoj, vane klopodantaj kapti la kolon de sia ekzekutisto.

Cezaro volas disbraki por forpuŝi la fantomojn sed li ne povas. Kvazaŭ paralizite, li devas elsuferi ĉion, reciproki ĉiun senvivan rigardon, pezantan sur li, kiel io nedireble terura. Kaj, subite, jen iu tute-tute antaŭ li. Terurmortante li rekonas: legiano Glabrio, kiun li trovis militire kontraŭ la eburonojn. Glabrio ne havas okulojn: ili estas elpikitaj; el la malplenaj kavoj ŝprucas puso kaj sango. Li ne havas brakojn: ili estas forhakitaj; sangaj ĉifonoj kaŝas la stumpojn. Jam li alturnas sian distaŭzitan vizaĝon rekte al Cezaro kaj levas la kripligitajn brakojn kontraŭ lin. Ŝajne, li volus kapti Cezaron por fortiri lin kun si en la teruran amason, kies viktimo ankaŭ li mem estas.

Rapide, rapidege ŝvelas sangtorento. Glacie, nekompareble malvarme, ĝi banas la piedojn, maleolojn de Cezaro. Jam ĝi kreskas pli alten. Fulme, ĉiumo-

mente pli rapide, ĝi altuŝas liajn koksojn, lian forton, kunpremas lian korpon, lian bruston, lian gorĝon —

Nun ĉiuj milmiloj ekbrakas alten. Malfermas siajn senvivajn lipojn. Samtempe elpuŝas tian korfendan krion, ke Cezaro, en paroksismo de turmento kaj sufero, senkonsciĝas.

Mortante li sentas, ke la sangtorento ekŝprucas al la buŝo...

## Idibus Martiis

Cezaro abrupte vekigas.

Konfuzite li okulas ĉirkaŭ sin.

Jam hela mateno. Ĉirkaŭ lia kuŝejo staras servistoj kaj timoplene lin rigardas.

Malrapide rekonsciigante, li kelkfoje profunde enspiras, subpremas la tremon de l' korpo kaj traglitigas la fingrojn sur la frunto: ĝi estas malseka de glacia, gluiĝema ŝvito.

Refoje li ĵetas rigardon ĉirkaŭ sin: jam pli liberan. Iom post iom li ekkomprenas, ke ĉio estis nur songo, ke la teruroj de l' nokto estis en li, kaj nur el li ili leviĝis.

Li ekkomprenas eĉ pli multe: ke en tiu ĉi longa nokto li refoje travivis sian vivon, ekde la infaneco — tra ĉiuj bataloj kaj venkoj, tra l' tuta neesprimebla feliĉo kaj tuta senfina doloro — ĝis la hieraŭa tago.

Kaj nun li scias: en la tuta kirlo nur ĉi tio estas vera: la vortoj de l' ŝajnaĵo, Li scias, ke li estas, fakte, ĉe l' fino kaj ne plu ĝisvivos la vesperiĝon de tiu ĉi tago.

Fine li ekparolas kaj en lia voĉo, kvankam ĝi estas trankvila, ankoraŭ vibras la teruro, ĉinokte elsuferita:

»Kion vi volas?«

Hezito. Tiam la korposklavo diras mallaŭte:



»Ho sinjoro, vi kriis en songo. Ni pensis, vi vokas nin.«

Li ne respondas, li nur malrapide ekbalancas la kapon. Nun li demandas kaj el lia voĉo perdiĝis eĉ la lasta terureto:

»Kiu tago estas hodiaŭ?«

»La *Idoj* de Marto.«

Li kapjesas. Nu, ĉu ne estas profetaĵo, avertanta lin pri la *Idoj* de Marto? Kiel tamen ĉio finiĝas en fermita cirklo! Ja, devas esti tiel: ĉio estas nur cirkulado. Li sidiĝas:

»La bano preparita?«

»Jes, sinjoro. Sed —«

»Nu?«

»La estrino insiste petas la imperatoron pri vizito.«

»Min?« Pripenso. Tiam li tute leviĝas kaj jetas mantelon sur la korpon. »Anoncu, ke mi venas.«

La vojo al la apartamento de Kalpurnia estas mallonga. Sed ŝi duonigas ĝin, venante eĉ renkonte al la edzo: malespera, tremanta.

»Kajo!« ŝi nervozas, »ĉu vi eliros hodiaŭ?«

Trankvile li kapklinas.

»Jes: hodiaŭ estas ja kunsido de l' senato.«

»Ne faru tion! Mi petas vin, ne faru tion!« Ŝi krias kun nebridebla malespero. Kaj, ĉar li alrigardas ŝin iom mirigite, ŝi pli insistas, pli nervozas: »Mi havis terurajn songojn — vi staris sur la forumo kaj el multaj vundoj, kvazaŭ el fontano, fluis via sango. venis multaj-multaj homoj, entrempis siajn manojn kaj lavis sin.« Flamokule ŝi rigardas, atendente la respondon.

Anstataŭ ĝi — nur vorteto:

»Kaj?«

Si tordas la brakojn supren.

»Kaj? Kaj? Io timiga minacas vin, io terura okazos, se vi forlasos la domon. Restu hejme, mi petegas vin, restu hodiaŭ hejme!«

Lia vizaĝo estas tute trankvila, superhome trankvila. Ia majesto radias el ĝi, ia grandeco, ke ŝi, eĉ kontraŭvole, retiriĝas kaj ekmutas. Nun li ekparolas kaj en lia voĉo estas la sama majesto, sama grandeco:

»Kio ajn okazos, tio estas destinita al mi jam de l' komenco. Nur malsaĝuloj rezistas kontraŭ la supera fatalo. Mi scias, ke mi estas kun ĝi unu, ke al mi ne plu povas io okazi. Do, mi iras, ho Kalpurnia.«

Li forturniĝas, kaj tiu movo instigas ŝin provi lastfoje lin reteni. Sed forpaŝante, li refoje turnas al ŝi la vizaĝon kaj ekbrakas rifuzan geston. Ŝi rigide haltas — la kapo, la brakoj jam velkas senhelpe. Nur senvorte ŝi aŭskultas liajn perdiĝantajn paŝojn.

Ankoraŭ neniam bano tiel agrablis lian korpon. La varmeta akvo karesas liajn membrojn, forŝtelante la lastan reston de l' korpremo. Atente, en ĉiam pli profunda, supertera trankvilo, li lavas membron post membro, kvazaŭ plenumante sanktan ceremonion.

Por momento venas al li la penso, ke oni lavas ankaŭ la oferotajn bestojn, antaŭ ol konduki ilin al la altaro. Sed tio lin ne doloras: jes, li estos oferaĵo; sed samtempe ankaŭ la pastro, ĝin proponanta — kaj la diaĵo, por kies honoro la varma sango ekvaporos.

( Fine li eliras el la bankuvo. Li lasas, ke oni volvu lin en molajn, lanajn tukojn, kaj transdonas sin al la lertaj fingroj de l' kombisto. Trankvilo ĉirkaŭ li, en li.,

Proksimiĝas servisto. Li tenas tunikon, dum aliaj du surmetas al li anstataŭ la malpezaj sandaloj purpur-

ŝuojn, ornamitajn per duonluno. La servisto humile demandas, kiun veston la imperatoro preferas.

Lia rigardo vagas tra la malfermitaj kestoj, en kiuj kuŝas vestoj, unu apud la alia. Ripete li volas montri jen tiun, jen alian, sed hezitas. Fine li levigas, iras al ŝlosita ŝranko, gardanta malnovajn milit-uniformojn kaj montras. La pordeto malfermiĝas, lia rigardo ekvidas kirasojn, kaskojn, mantelojn.

Li kaptas iun el ili, densan, fortikan ŝtofajon. Nur unu solan fojon li portis ĝin en la tago, kiam li venkis la nerveojn. Ho, antaŭ kiom longe! Propramane li elprenas la mantelon. Ĝi estos plej konvena por hodiaŭ.

»Ĉi tiun!« mallonge li diras.

La blinde obeema servisto fald-aranĝas la mantelon, ĵetas ĝin kiel togon trans la maldekstran ŝultron de l' imperatoro, tiras tra sub la dekstra brako kaj refoje trans la maldestra ŝultro. Profunde riverencante li retiriĝas.

Cezaro staras sola meze de l' ĉambro. Senvorte li rigardas ĉirkaŭ si kaj al li ŝajnas, ke lia rigardo penetras la domomurojn kaj vidas ĉion, kio iam ajn tuŝis liajn okulojn. Refoje li rimarkas kvadratitajn murojn de gallaj urboj, tiel klare, kvazaŭ ili starus tuj antaŭ li, refoje arbarojn de germanoj, kreto-rokojn de britoj, hispanajn montojn, fruktoriĉan valon de Transpadio, ridetantajn herbejojn de Grekujo, dezertojn de Malgrand-azio, sablon de Numidio. Refoje ekbrilas antaŭ li la reĝpalaco de Aleksandrio. Lia koro ekŝvelas: longe, longe li vagis, sed, jen, fine li tamen atingis al la celo. La ŝajnaĵo de l' lasta nokto pravis: lia tera korpo povas morti — sed tio, kion li plenumis, la

mondo, kiun li kreis en sia animo, neniam, neniam pereos.

Kara nomo trudiĝas al liaj lipoj, ĝi estas tio lasta, kio havas por li valoron kaj sencon. Li elparolas ĝin tiel mallaŭte, ke eĉ li mem ĝin ne aŭdas. Nun denove li staras senvorte, senmove, liberigita de ĉio, kio lin ligis al tiu ĉi mondo.

La kurteno leviĝas, eniras lia korposklavo. Riverence li anoncas:

»Venis deputitaro de la senato por akompani la imperatoron al la kunsido.«

Malrapide, senlime majeste, Cezaro turnas la kapon: »Venigu ĝin!«

Ili eniras, unu post la alia: antaŭe Marko Bruto, alten levante la noblan, virinan junulkapon, kun okuloj de fanatikulo. Post li Kassio, malgrasa, elbruligita, paŝante neaŭdeble, kvazaŭ rabobesto. Tiam Trebonio kun senmova, ŝtona vizaĝo. Tiam Decimo Bruto, apenaŭ povante kaŝi la tremadon de siaj manoj. Tiam Kasko. Tiam Metello Cimbro. Tiam Cinno — kaj multaj aliaj, kies nomojn li apenaŭ konas.

Lia rigardo trankvile, malrapide glitas de unu al la alia. Ĉiuj vizaĝoj estas cindre palaj, sensangaj. Neĝu ni okulo povas elteni lian rigardon.

Profunda silento. Nun Cezaro ekparolas kaj lia voĉo sonoras kiel glavo frapanta bronzan ŝildon:

»Ĉu vi — ĉiuj?«

Hezito. Reciproka interrigardado. Fine Bruto respondas sufokite, kvazaŭ el spasma gorgo:

»Ĉiuj.«

Denove li ekrigardas ilin ĉiujn. Granda — malproksima — tiel neesprimeble potenca kaj majesta

estas tiu ĉi rigardo, ke ĉiuj ekstremaĝis la fundo de l' animo.

Fine, refoje aŭdiĝas lia voĉo al ili tiel proksima kaj tamen tiel fora, kvazaŭ ĝi venus el alia mondo:

»Do, ni ĵiru!«

Fino.

## KLARIGOJ KAJ NOTOJ

Estas ja kompreneble, ke tradukante tiel ampleksan verkon, mi renkontis diversajn problemojn, kiujn oni povas solvi diversmaniere. Mi klopodis uzi simplan, sed vivantan lingvon kaj eviti ĉiujn teoriajn preferojn. Tial mi ankaŭ ignoris la neologismojn, bazante min sur la Plena Vortaro, eldonita de SAT (I-a eld.). Sola neologismo estas la vorto »nervoza«. Sed ĝi jam firme eksidis en la ĉiutaga lingvo, kvazaŭ indigeno mem.

Tre malfacila problemo estis la transskribo de propraj nomoj, kiuj en la originalo venas en sia origina formo. Kiel konate en Esperanto ekzistas diversaj sistemoj por tiu ĉi celo. La plej logika estas, laŭ mi, tiu de Wüster. Tamen mi alprenis ne ĝin, ĉar la sistemo de Zamenhof estas multe pli uzata. Tial mi transskribis: Kajo *Julio* Cezaro kaj ne: Kajo *Julo* Cezaro. Ktp. Por ne deformi nerezoneble la proprajn nomojn (Koto, Cino, Kraso ktp.), mi decidis konservi la duoblajn konsonantojn (Kotto, Cinno, Krasso ktp.). Al la geografiaj nomoj mi aplikis la saman sistemon.

Kvankam mi persone preferus skribi »galo«, mi uzis la vorton »gallo«, ĉar — kiel zamenhofs — ĝi estas pli konata kaj cetere jam precedenco en verkoj de aliaj tradukintoj. — Same precedenco estas la vorto »tribuno« anstataŭ, eble, preferinda »tribunuso«. Sed por klara distingo mi uzis kursivon, montrante, ke ĝi estas fremda termino. — Krome mi preferis esprimojn kiel »steno-grafo« anstataŭ »stenografiisto«. — Virinaj nomoj havas finaĵon »a« (ekz. Julia). — La artikolon antaŭ »**Juliano**«

mi uzis por rolo de difina antaŭnomo. — »Romia« rilatas al la imperio, »roma« al urbo-civito Romo.

Doni detalan komenton pri la vivo kaj moroj estas neeble, ĉar tio postulus dikan libron. Por ne forviŝi koloran polvon sur la kanvaso de l' verko, mi konservis fremdajn terminojn (ekz. centurio, edilo ktp.).

Por ebligi plifacilan komprenon al la legantoj, kiuj ne havas konon pri la epoko de l' verko, mi donas sube kelkajn klarigojn.

*agoro*: placo en la antikvaj grekaj urboj.

*Anubiso*: filo de dio Oziriso kaj akompananto de mortintoj en la submondo.

*Ariadna*: filino de la Kreta reĝo Mino. Ŝi helpis (per fadeno) al Teseo eliri el la labirinto.

*atrio*: centra parto en nobela domo. Ĝi servis ankaŭ por akceptado de gastoj.

*cenzero*: oficisto, zorganta pri impostaj listoj kaj rekrutigo.

*centurio*: cent militistoj (sesdekono de la legio).

*centuriono*: centuriestro.

*edilo*: helpanto de tribunano. Lia ĉefa tasko estis kontrolo de publika trafikado kaj prizorgo de publikaj spektakloj.

*Flamen Dialis*: pontifiko de Jupitero.

*Flamen Martialis*: pontifiko de dio Marso.

*hermo*: busto de dio Hermo, de iu el la aliaj dioj, eĉ personoj, starigita en stratoj aŭ sur placoj.

»*Idibus Martiis*«: laŭ la roma kalendaro la 15-a de Marto.

»*Io triumphe*«: aklamo de la rigardantoj ĉe triumfo.

*imperatoro*: supera militestro.

*Kassandra*: filino de la Troja reĝo Priamo. Ŝi antaŭdiris pereon de sia urbo.

*kohorto*: sescent militistoj (dekono de la legio).

*komicio*: popolkunveno, kie oni voĉdonis laŭ kastoj.

*kurio*: senat(ej)o.

*kvestoro*: helpanto de konsulo. Li kontrolis ŝtatajn enspezojn.

*liktoro*: servisto, portanta antaŭ la konsulo aŭ pretoro faskon kun hakilo. Ĝi simbolis la plej superan aŭtoritaton.

- luperkalia festo*: festo honore al dio Faŭno, kiel protektanto kontraŭ lupoj.
- manipulo*: ducent militistoj (tridekono de la legio).
- Numo*: laŭmita reĝo en Romo (715—772 j. a. K.). Firmiginto de la roma civito.
- »*Panem et circenses*«: devizo de la tiutempa roma plebo; ĝi signifas: panon kaj cirk-spektaklojn!
- prognostikono*: antaŭdiro pri ies sorto.
- Pontifex maximus*: la plej alta pontifiko.
- prefekto*: komandanto de trupo.
- pretoro*: plenumanto de juĝista ofico.
- pretorio*: (en la romano:) tendo de la militestro.
- prokonsulo, prokvestoro, propretoro*: konsulo, kvestoro, pretoro. kies ofidadon oni plilongigis pro milito aŭ por administri provincojn.
- provinco*: (en la romano:) subjugita lando ekster Italio, devanta kontribui imposton kaj regata de guberniestro (prokonsulo, prokvestoro, ktp.).
- Romulo*: laŭmita fondinto kaj unua reĝo de Romo.
- tribuno*: (en la romano:) komandanto de legio aŭ kavalerio.
- »*Vae victis*«: ve al la venkitoj.
- »*Videant consules...*«: diktatora aŭtoritato, dekretita de la senato al la konsuloj.



## ENHAVTABELO

|   | Paĝo |
|---|------|
| I. JULIO . . . . .                      | 5    |
| Infano . . . . .                        | 7    |
| Onklo Mario . . . . .                   | 13   |
| Junulo . . . . .                        | 22   |
| Vivĉaso . . . . .                       | 30   |
| Sullo . . . . .                         | 38   |
| Du girlandoj . . . . .                  | 46   |
| Unua renkonto . . . . .                 | 60   |
| Katenoj . . . . .                       | 73   |
| Pompejo . . . . .                       | 82   |
| Fino kaj Komenco . . . . .              | 91   |
| Libera popolo sur libera tero . . . . . | 97   |
| Gvidanto de l' Popolo . . . . .         | 108  |
| »Panem et Circenses!...« . . . . .      | 114  |
| Tondrominacoj . . . . .                 | 119  |
| Konstruisto de l' Pontoj . . . . .      | 126  |
| Momento de danĝero . . . . .            | 139  |
| Katastrofo . . . . .                    | 145  |
| »Vae Victis« . . . . .                  | 151  |
| Gasto el la alia mondo . . . . .        | 164  |
| En la lasta horo . . . . .              | 170  |
| II. CEZARO . . . . .                    | 175  |
| La homo ĉe la pordo . . . . .           | 177  |
| Al gloro renkonte . . . . .             | 182  |
| Bataloj kaj vundoj . . . . .            | 189  |
| Konsulo . . . . .                       | 197  |
| Sola, tute sola... . . . .              | 207  |
| La ĉaso komenciĝas . . . . .            | 213  |

|  | Paĝo |
|--|------|
| Lasta spirkapto . . . . .                | 217  |
| La unuaj . . . . .                       | 223  |
| Bibrakto . . . . .                       | 230  |
| Kaptilo . . . . .                        | 236  |
| Turniĝo de l' Sorto . . . . .            | 242  |
| La maldekstra vojo . . . . .             | 247  |
| La plej bravaj inter la bravaj . . . . . | 251  |
| Krasso . . . . .                         | 258  |
| Luko . . . . .                           | 263  |
| Ĉasfabelaĵoj en Germanio . . . . .       | 271  |
| En la profunda nokto . . . . .           | 276  |
| Ĉe l' fino de la libereco . . . . .      | 284  |
| Envio de Dioj . . . . .                  | 289  |
| Embuska frapo . . . . .                  | 297  |
| Legiano Glabrio . . . . .                | 306  |
| Ho lando mizera! . . . . .               | 327  |
| Neniam ripozo . . . . .                  | 333  |
| Fajro . . . . .                          | 338  |
| Nur malamikoj ĉirkaŭe . . . . .          | 344  |
| Gergovio . . . . .                       | 350  |
| La glavo de Cezaro . . . . .             | 356  |
| Kia ŝanĝiĝo... . . . .                   | 362  |
| Al la Dioj dediĉite . . . . .            | 368  |
| III. IMPERATORO . . . . .                | 373  |
| Antaŭ uragano . . . . .                  | 375  |
| Granda Loto . . . . .                    | 380  |
| Cio pretu . . . . .                      | 387  |
| Du virinoj . . . . .                     | 392  |
| Venkita Okcidento . . . . .              | 402  |
| Cezaro kaj lia feliĉo . . . . .          | 409  |
| Farzalo . . . . .                        | 415  |
| »Pompejo, frato mia!« . . . . .          | 422  |
| Al Egiptujo . . . . .                    | 427  |
| Kleopatra . . . . .                      | 431  |
| Plenumiĝo . . . . .                      | 437  |
| »Mia reĝino« . . . . .                   | 440  |
| Cezaro rajdas . . . . .                  | 445  |
| Adiaŭo . . . . .                         | 451  |

|                                | Pago |
|--------------------------------|------|
| Ili ribelas . . . . .          | 457  |
| Tapso . . . . .                | 472  |
| Antaŭ triumfo . . . . .        | 477  |
| »Io triumphe!« . . . . .       | 487  |
| Ekkono . . . . .               | 492  |
| Du viroj . . . . .             | 496  |
| Proksime al la nokto . . . . . | 505  |
| La lasta nokto . . . . .       | 514  |
| IV. IDIBUS MARTIIS . . . . .   | 525  |
| Klarigoj kaj notoj . . . . .   | 531  |



600.-

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Esperanto

1388 I

